

FOLIOJ DE HERBO

de Walt Whitman

Tradukita el la angla de M. J. Wittenberg

Venu, diris mia Animo,
Tiajn versojn por mia Korpo ni skribu (char ni estas unu),
Ke mi post morto nevideble revenu,
Au, longe, longe de nun, en aliaj sferoj,
Tien al ia grupo da kunuloj la kantojn rekomencante,
(Registrante la grundon, arbojn, ventojn, tumultajn ondojn de la Tero),
Chiam kun ia kontenta rideto mi daurigu,
Chiam kaj chiam ancorau la versojn posedante – kiel, unue, mi chi tie kaj nun,
Subskribante por Korpo kaj Animo, metas al ili mian nomon.

Walt Whitman

Enkonduko de la Tradukinto

Walt Whitman (1819-1892) estas fama Usona poeto de la 19a jarcento. Li elvolvis propran idiosinkrazian stilon kaj multe influis la poetojn kaj verkistojn post li. Li enkorpigis la optimismon kaj entuziasmon de Usono de la 19a jarcento en siajn poemojn. Se oni volas bone kompreni la intencojn de Whitman kiam li verkis Folioj de Herbo estas konsilinde legi "Retroa Rigardo lau Vojaghitaj Vojoj" che la fino de la libro. Tie la aŭtoro esprimas siajn motivojn kaj celojn. Estas ankaŭ utile legi *Walt Whitman's America* de David S. Reynolds.

Whitman volis priskribi la impresojn kaj sentojn de homo en Usono de la dua duono de la 19a jarcento. La homo estis li mem. Li invitas la leganton vidi sin mem en li, kaj senti la samajn emociojn, eĉ en la malproksima estonteco, ĉar li opiniis ke liaj poemoj esprimas aferojn kiuj restos eterne signifoplenaj por ĉiu homo. Li volis paroli senorname kaj honeste pri la tuta sperto de homo en la natura mondo, kaj ne, kiel la antikvaj poetoj, pri mitoj kaj aliaj nenaturaj aferoj.

Whitman evoluigis sian propran stilon, kiu estas iom nekonvencia. Li amis uzi participojn anstataŭ indikativajn verbojn kaj multe uzis la nominativan adjekton, kun participoj, adjektivoj/substantivoj, au prepozitivoj. Ekzemple, en "Tendaroj de Verdo": "Pieddoloraj kaj lacaj, tuj kiam la lumo malpliighas, ni haltas por la nokto,/ Kelkaj el ni, tiel lacigitaj de portado de la pafilo kaj tornistro falantaj ekdorminte kie ni staras,/ Aliaj muntantaj la malgrandajn tendojn, kaj la ekfaritaj fajroj komencas scintili,/ Antaupostenuloj starigitaj ĉirkaŭe viglaj tra la mallumo,/ Kaj vorto liverita por signalrespondo, pro zorgo por sekureco, ..." [kvar nominativaj adjektoj]. En "Kanto de la Libera Vojo" li komencas: "Surpiede kaj facilcore mi ekiras la liberan vojon,/ Sana, senbara, la mondo antaŭ mi,/ La longa bruna pado antaŭ mi kondukanta kien ajn mi elektas." [Du nominativaj adjektoj]. Konvencia Esperanto uzus "kun" antaŭ ĉiuj nominativaj adjektoj, au iajn aliajn frazturnojn. Mi decidis lasi la nominativajn adjektojn senshanghaj, ĉar tio estas esenca parto de la stilo de Whitman kaj la uzado de "kun" ofte ghenas. (Mi efektive trovis unu kazon de la uzo de nominativa adjekto che Zamenhof, en *Marta*, [p. 29] la frazon: "La dua, pli juna, tre juna, en malhela lana vesto, iom eluzita shalo sur la shultroj, kun chapelo, kiu videble travivis jam pli ol unu autunon, iris kun mallevitaj manoj, kun rigardo direktita al la tero.") Oni povas vidi, ke la adjekto "iom eluzita shalo sur la shultroj" estas sufiche klara, kiel estas la similaj adjektoj che Whitman. La nominativan adjekton oni povas rigardi propozicio kun la verbo "estas", el kiu oni forigis "estas" por fari el ĝi adjekton por alia propozicio: "Sana, libera, la mondo [estas] antaŭ mi, ..." Forigo de "estas" faras la propozicion "la mondo estas antaŭ mi" adjekto por la propozicio "Surpiede kaj facilcore mi ekiras la liberan vojon".

Rilate la vorton por Usono, mi elektis "Ameriko". "Usono" estas malbela akronimo, tute sen la varmaj emocioj kiujn "Ameriko" elvokas. Mi devis uzi "Ameriko" kie Whitman uzas "America" kaj "Unuighintaj Shtatoj" por traduki "United States", por konformighi al la spirito de lia teksto. La francajn kaj hispanajn vortojn mi tradukis en Esperanton (Ekz., En-Masse = Amase). La italajn muzikajn terminojn mi lasis senshanghaj (Ekz., cantabile). Por la vorto *Koboo* mi ne trovis tradukon, sed ĝi shajnas signifi "ia fia sovaghulo"; mi esperantigis ĝin kiel Kobuo.

Por plibonigi la ritmon de la frazoj, mi decidis ellasi enkondukajn demonstrativojn antaŭ subpropozicioj kie tio shajnas tauga (vidu *Proverbaron*).

Mi strebis liveri precizan tradukon de la angla teksto de Whitman. Kelkfoje, precipe kiam li uzas rimon (kio estas tre malofte), kaj kelkfoje pro estetikaj kialoj, mi iom devojighis de la laulitera traduko. Komprenoble, traduko Esperanta ne povas reprodukti la ritmon kaj ĉiujn subkomprenajhojn kaj aliteraciojn de la anglaj vortoj kaj esprimoj, sed ĝi povas esti multe pli preciza ol la angla kiam koncernas homonimojn, multsignifajn vortojn, vortojn de

ambigua signifo, kaj ech vortojn de duba parto de parolo, kiuj tre abundas en la angla sed preskau ne ekzistas en Esperanto. Pro chi tiu kvalito de Esperanto, la traduko povas bone servi kiel ponttraduko kaj ankaŭ kiel ekspliko de la angla teksto, kiu teksto ech al Usonano estas kelkfoje iom malfacile komprenebla. Sed legante Folioj de Herbo, memoru kion diris Whitman: “La vortoj de mia libro nenio, la aludoj de ghi chio.”

Paumanoko, 2019.

ENSKRIBOJ

LA MEMON MI KANTAS

La Memon mi kantas, simplan apartan personon,
Tamen eldiras la vorton Demokratia, la vorton Amase.

Pri fiziologio de verto al pied' mi kantas,
Ne fizionomio sola au cerbo sola estas inda por la Muzo,
 Mi diras, la Formo kompleta estas multe pli inda,
Kaj la Femalan kaj la Masklan egale mi kantas.

Pri Vivo vastega en pasi', pulsado, kaj potenc',
Gajan, por agado plej liberan, formitan sub la diaj leghoj,
La Modernan Homon mi kantas.

DUM MI MEDITIS EN SILENTO

Dum mi meditis en silento,
Reirante al miaj poemoj, konsiderante, longe restante,
Fantomo levighis antaŭ mi kun malfidema aspekto,
Terura en belo, agho, kaj povo,
La genio de poetoj de malnovaj landoj,
Kvazau direktanta al mi kiel flamon siajn okulojn,
Kun fingro montranta al multaj senmortaj kantoj,
Kaj minacanta vocho, Kion vi kantas? ghi diris,
Chu vi ne scias ke estas nur unu temo por chiamdaŭraj bardoj?
Kaj tio estas la temo de Milito, la sorto de bataloj,
La farado de perfektaj soldatoj.

Tiel estu, tiam mi respondis,
Mi ankau, aroganta Ombro, kantas militon, kaj pli longan kaj pli grandan ol iun,
Aranghata en mia libro kun varianta sorto, kun fugho, avanco kaj retreto, venko
 prokrastita kaj shancelighanta,
(Tamen, lau mi certa, au kvazau certa, finfine), kun la kampo la mondo,
Por vivo kaj morto, por la Korpo kaj por la eterna Animo,
Jen, mi ankau estas veninta, kantanta la kanton de bataloj,
Mi antaŭ chio reklamas bravajn soldatojn.

EN KAJUTAJ SHIPOJ SURMARE

En kajutaj ŝipoj surmare,
Kun la senlima bluo sur chiu flanko plivastighanta,
Kun siflantaj ventoj kaj muziko de la ondoj, la grandaj imperiaj ondoj,

Au iu sola shipo flosigata sur la densa maro,
Kie ghoje fidoplana, disvastigante blankajn velojn,
Shi tranchas la eteron meze de la brilo kaj shaumo de la tago, au sub multaj steloj en la
nokto,
De maristoj junaj kaj maljunaj eble estos mi legata, rememoro de la lando,
Finfine en plena komunikigho.
Chi tie estas niaj pensoj, pensoj de vojaghantoj,
Chi tie ne la lando, firma lando, sola aperas, eble tiam de ili estos dirata,
La chielo supervolbighas chi tie, ni sentas la ondantan ferdekon sub niaj piedoj,
Ni sentas la longan pulsadon, malfluson kaj fluson de senfina movado,
La tonoj de nevidata mistero, la svagaj kaj vastaj sugestioj de la mara mondo, la
likvefluaj silaboj,
La parfumo, la mallauta knarado de la shnuraro, la melankolia ritmo,
La senlima vido kaj la horizonto malproksima kaj malklara estas chiuj chi tie,
Kaj chi tio estas la poemo de l' oceano.

Do ne shancelighu ho libro, plenumu vian destinon,
Vi ne rememoro de la lando sola,
Vi ankau kiel sola shipo tranchanta la eteron, celita mi ne scias kien, tamen chiam plena
de fido,
Kunulo al chiu shipo kiu velas, vi velas!
Forportu al ili enfalditan mian amon (karaj maristoj, por vi mi enfaldas ghin chi tie en
chiu folio);
Rapidu antauen mia libro! sternu viajn blankajn velojn, mia malgranda shipo, trans la
imperiaj ondoj,
Kantadu, veladu, portu tra la senlima bluo, de mi al chiu maro,
Chi tiun kanton por maristoj kaj chiuj shipoj iliaj.

AL FREMDAJ LANDOJ

Mi audis, ke vi petis ion por ekspliki chi tiun enigmon la Novan Mondon,
Kaj difini Amerikon, shian atletan Demokration,
Tial mi sendas al vi miajn poemojn por ke vi vidu en ili kion vi volis.

AL HISTORIISTO

Vi kiu celebras pasintajhojn,
Kiu esploris la eksteran, la surfacojn de la raso, la vivon sin elmontrintan,
Kiu pritraktis homon kiel la dependulon de politiko, amasoj, regantoj, kaj pastroj,
Mi, loghanto de Aleganoj, lin pritraktante kiel li estas per si mem en sia propra kvalito,
Palpante la pulson de la vivo kiu malofte sin elmontris (la grandan fieron de homo pri
si mem),
Kantanto de Personeco, skizante tion kio estas ankoraŭ estonta,
Mi projektas la historion de la estonteco.

AL VI, MALNOVA AFERO

Al vi, malnova afero!
Vi, senkompara, pasia, bona afero,
Vi, severa, senrimorsa, dolcha ideo,
Senmorta tute tra la epokoj, rasoj, landoj,
Post stranga malghoja milito, granda milito por vi,
(Mi pensas, ke chiu milito tra tempo estis vere militata, kaj chiam estos vere militata, por vi),
Chi tiuj kantoj por vi, la eterna marsho de vi.

(Milito, ho soldatoj, ne por si mem sola,
Multo, multo pli silente atendadis malantaue, por nun antaueniri en chi tiu libro.)

Vi astro de multaj astroj!
Vi bolanta principo! vi bone tenata latentata ghermo! vi centro!
Chirkau la ideo de vi la milito turnighanta,
Kun ghia tuta kolera kaj fervora ludado de aferoj,
(Kun vastaj rezultoj, venontaj por trioble mil jaroj),
Chi tiuj recitativoj por vi, – mia libro kaj la milito estas unu,
Miksitaj en ghia spirito mi kaj mia, kiel la konkurso, charnirita sur vi,
Kiel rado sur ghia akso turnighas, chi tiu libro, nesciate al si mem,
Chirkau la ideo de vi.

EJDOLOJ

Mi renkontis profeton,
Trapasantan la kolorojn kaj objektojn de la mondo,
La kampojn de arto kaj scio, plezuro, senso,
Rikolti ejdolojn.

Metu en viajn kantojn, diris li,
Ne plu la enigman horon nek tagon, nek segmentojn, partojn enmetu,
Metu unua antaŭ la ceteraj kiel lumon por chiuj kaj enirokanton de chiuj,
Tiun de ejdoloj.

Chiam la malklara komencigho,
Chiam la kreskado, la chirkauiro de la rondo,
Chiam la supro kaj la kunfandigho finfine (certe rekomencighi),
Ejdoloj! ejdoloj!

Chiam la shanghebla,
Chiam materialoj, shanghighantaj, dispecighantaj, rekoherantaj,
Chiam la atelieroj, la fabrikoj diaj,
Eldonantaj ejdolojn.

Jen, mi au vi,
Au virino, viro, au shtato, konata au nekonata,
Ni shajne solidan richon, forton, belon konstruas
Sed vere konstruas ejdolojn.

La shajno malaperema,
La substanco de l' humoro de artisto au studoj longaj de klerulo,
Au laboregoj de militisto, martiro, au heroo
Formi sian ejdolon.

De chiu homa vivo,
(La unuoj kolektitaj, registritaj, ne unu penso, emocio, faro, ellasita),
La tuto au granda au malgranda sumigita, kalkulita,
En ghia ejdolo.

La tute malnova urgho,
Bazita sur la antikvaj kulminoj, jen, pli novaj, pli altaj kulminoj,
De scienco kaj la moderna ankorau pelataj,
La tute malnova urgho, ejdoloj.

La nuntempo aktuala,
La aferoplena, svarma, komplika kirlo de Ameriko,
De la kunigajho kaj la apartigajho por nur de tie liberigi,
La hodiauajn ejdolojn.

Tiuj kun la pasinteco,
De malaperintaj landoj, de chiuj reghadoj de reghoj trans la maro,
Malnovaj venkantoj, malnovaj militiroj, malnovaj vojaghoj de maristoj,
Kunigantaj ejdolojn.

Densecoj, kreskado, fasadoj,
Tavoloj de montoj, grundoj, rokoj, gigantaj arboj,
Maproksime naskitaj, malproksime mortantaj, longe vivantaj, por restigi,
Ejdolojn chiamdaurajn.

Ekzaltitaj, ravitaj, ekstazaj,
La videbla nur ilia utero de naskigho,
El astraj emoj por formi kaj formi kaj formi,
La potencan ter-ejdolon.

La tuta spaco, la tuta tempo,
(La steloj, la teruraj agitighoj de la sunoj,
Shvelantaj, kolapsantaj, finighantaj, plenumantaj sian pli longan, pli mallongan utilon),
Plenigitaj per ejdoloj sole.

La senbrujaj miriadoj,

La senlimaj oceanoj, kien la riveroj elfluas,
La apartaj sennombraj liberaj identoj, kiel vidpovo,
La veraj realoj, ejdoloj.

Ne chi tiun la mondo,
Nek chi tiujn la universoj, ili la universoj,
Signifas kaj celas, chiam la dauran vivon de vivo
Ejdolojn, ejdolojn.

Preter viaj prelegoj, klera profesoro,
Preter via teleskopo au spektroskopop, observanto arda, preter tuta matematiko,
Preter la kirurgio, anatomio, de la kuracisto, preter la kemiisto kun lia kemio,
La entoj de entoj, ejdoloj.

Nefiksitaj kvankam fiksitaj,
Chiam estos, chiam estis kaj estas,
Balaantaj la nuntempon al la senlima estonteco,
Ejdoloj, ejdoloj, ejdoloj.

La profeto kaj la bardo,
Ankorau konservos sin, en ancorau pli altaj stadioj,
Eksplikos al la Modernaj, al Demokratio, interpretos fine al ili,
Dion kaj ejdolojn.

Kaj vi, mia animo,
Ghojoj, senchesaj ekzercadoj, ekzaltadoj,
Via sopirado plene satigota fine, preta renkonti,
Viajn kunulojn, ejdolojn.

Via korpo chiamdaura,
La korpo kashita tie interne de via korpo,
La sola signifo de la formo kiu vi estas, la reala mi,
Bildo, ejdolo.

Viaj kantoj mem ne en viaj kantoj,
Neniaj specialaj arioj por kanti, neniu por si mem,
Sed el la tuto rezultanta, levighanta fine kaj shvebanta,
Ronda plensfera ejdolo.

POR LI MI KANTAS

Por li mi kantas,
Mi kreskigas la nuntempon sur la pasinteco,
(Kiel ia plurjara arbo el ghiaj radikoj, la nuntempon sur la pasinteco),
Per tempo kaj spaco mi lin dilatlas kaj kunfandas kun li la senmortajn leghojn,
Por ke li sin faru per ili la legho al si mem.

KIAM MI LEGIS LA LIBRON

Kiam mi legis la libron, la biografion faman,
Kaj chu chi tio estas do (diris mi) kion la aŭtoro nomas vivo de homo?
Kaj do chu iu, kiam mi estos morta kaj for, verku mian vivon?
(Kvazau iu homo vere scius ion pri mia vivo,
Nu ech mi mem, mi ofte pensas, scias malmulte au nenion pri mia reala vivo,
Nur kelkajn aludojn, kelkajn difuzitajn malfortajn indicojn kaj nerektajhojn
Mi intencas por mia propra uzo skizi chi tie.)

KIAM MI KOMENCIS MIAJN STUDIOJN

Kiam mi komencis miajn studojn, la unua pasho tiom plachis al mi,
La nura fakto konscio, chi tiuj formoj, la povo de movo,
La plej eta insekto au besto, la sensoj, vidado, amo,
La unua pasho, mi diras, mirigis min kaj tiom plachis al mi,
Ke mi apenau iris kaj apenau deziris iri iom plu,
Sed male halti kaj lanti la tutan tempon por kanti ghin en ekstazaj kantoj.

KOMENCANTOJ

Kiel ili estas liverataj sur la tero, (aperante je intertempoj),
Kiel karaj kaj teruraj ili estas al la tero,
Kiel ili apartenas al si tiom kiel al iuj ajn – kia paradokso shajnas ilia epoko,
Kiel homoj reagis al ili, tamen ne konas ilin,
Kiel estas io senkompata en ilia sorto chiujn tempojn,
Kiel chiuj tempoj miselektas la objektojn de sia laudado kaj rekompenco,
Kaj kiel la sama neevitebla prezo devas ankoraŭ esti pagata por la sama granda acheto.

AL LA SHTATOJ

Al la Shtatoj au iu ajn el ili, au iu urbo de la Shtatoj, Rezistu multe, obe-u malmulte,
Kiam ajn sendemanda obeado, tiam tute sklavigita,
Kiam ajn tute sklavigita, nenia nacio, shtato, urbo de chi tiu tero iam poste rekomencas
sian liberecon.

POR VOJAGHOJ TRA LA SHTATOJ

Por vojaghoj tra la Shtatoj ni ekiras,
(Jes tute tra la mondo, urghate de chi tiuj kantoj,
Velantaj de nun al chiu lando, al chiu maro),

Ni, volontaj lernantoj de chio, instruantoj de chio, kaj amantoj de chio.

Ni observis la sezonojn sin disdonantaj kaj forpasantaj,
Kaj diris, Kial ne devus viro au virino fari tiom kiom la sezonoj, kaj tiom elvershi?

Ni loghas mallongan tempon en chiu urbo kaj urbeto,
Ni pasas tra Kanado, la Nord-oriento, la vasta valo de Misisipo, kaj la Sudaj Shtatoj,
Ni konsilighas kiel egaluloj kun chiu el la Shtatoj,
Ni faras provon de ni mem kaj invitas virojn kaj virinojn audi,
Ni diras al ni mem, Memoru, ne timu, estu malkashema, diskonigu la korpon kaj la animon,
Restu dum tempo kaj forpasu, estu abunda, modera, chasta, magneta,
Kaj kion vi elvershos povus poste reveni, kiel la sezonoj revenas,
Kaj povas esti ghuste tiom kiom la sezonoj.

AL CERTA KANTISTINO

Jen, prenu chi tiun donacon,
Mi rezervadis ghin por ia heroo, oratoro, au generalo,
Iu kiu servus la bonan malnovan aferon, la grandan ideon, la progreson kaj liberecon de la raso,
Iu kuragha alfrontanto de despotoj, iu audaca ribelulo;
Sed mi vidas ke kion mi rezervadis apartenas al vi ghuste tiom kiom al iu.

MI NECHAGRENEBLULO

Mi nechagreneblulo, staranta senghene en Naturo,
Mastro de chio au mastrino de chio, aplomba meze de senraciaj aferoj,
Inspirita kiel ili, pasiva, riceva, silenta kiel ili,
Trovanta mian oficon, malrichecon, famon, petolojn, krimojn, malpli gravaj ol mi pensis,
Mi proksime al la Meksikia maro, au en la regiono Manahata, au la Tenesia, au malproksime norde au landinterne,
Rivera homo au homo de la arbaro au de ia bona vivo de chi tiuj Shtatoj au de la marbordo, au la lagoj au Kanado,
Mi, kie ajn mia vivo estas vivata, ho esti memekvilbrigita por kontingencajhoj,
Alfronti la nokton, shtormojn, malsaton, mokadon, akcidentojn, repushojn kiel la arboj kaj bestoj.

KLERISMO

Tien, dum mi rigardas, mi vidas chiun rezulton kaj gloron respuranta sin kaj alpremanta sin firme, chiam devigitan,
Tien horoj, monatoj, jaroj – tien metioj, paktoj, establaĵoj, ech la plej etaj,

Tien chiutaga vivo, parolo, iloj, politiko, personoj, bienoj;
Tien ni ankau, mi kun miaj folioj kaj kantoj, fidema, admira,
Kiel patro, irante al sia patro, kunprenas kun si siajn infanojn.

LA SHIPO EKVETURANTA

Jen, la nelimigita maro,
Sur ghia brusto shipo ekveturanta, etendanta chiujn velojn, portanta ech siajn lunvelojn,
La flageto flirtas supre dum shi rapidas shi rapidas tiel majeste – malsupre rivalemaj
ondoj urghighas antauen,
Ili chirkauas la shipon per brilaj kurbighantaj movighoj kaj shaumo.

MI AUDAS AMERIKON KANTANTA

Mi audas Amerikon kantanta, la diversajn karolojn mi audas:
Tiu de mehhanistoj, chiu kantanta sian kia ghi devus esti, gaja kaj forta,
La charpentisto kantanta sian dum li mezuras sian tabulon au trabon,
La masonisto kantanta sian dum li pretighas por laboro au chesigas laboron,
La boatisto kantanta kio apartenas al li en lia boato, la helpisto kantanta sur la
vaporboata ferdeko,
La shuisto kantanta dum li sidas sur sia benko, la chapelisto kantanta dum li staras,
La kanto de la arbohakisto, au de la juna plugisto survoje matene au che la tagmeza
pauzo au che sunsubiro,
La delica kantado de la patrino, au de la juna edzino laboranta, au de la knabino
kudranta au lavanta,
Chiu kantas kio apartenas al li au shi kaj al neniu alia,
La tago kio apartenas al la tago – nokte la aro da junuloj, fortikaj, amikaj,
Kantas kun malfermitaj bushoj siajn fortajn melodiajn kantojn.

KIU LOKO ESTAS SIEGHATA?

Kiu loko estas sieghata, kaj vane penas levi la sieghon?
Jen, mi sendas al tiu loko komandonon, rapidan, kuraghan, senmortan,
Kaj kun li kavalerion kaj infanterion, kaj arojn da artilerio,
Kaj artileriistojn, la plej mortigajn kiuj iam pafis pafilegon.

ANKORAU PER LA UNU MI KANTAS

Ankorau per la unu mi kantas,
Unu (tamen el kontraudiroj faritan) mi dedichas al Nacieco,
Mi lasas en li ribeladon, (ho latentaj rajtoj de insurekcio! ho neestingeblo, neformeteblo
fajro!).

NE FERMU VIAJN PORDOJN

Ne fermu viajn pordojn al mi, fieraj bibliotekoj,
Char kio estis mankanta sur chiuj viaj bone plenigitaj bretoj tamen plej multe
 bezonata mi alportas,
El la milito elighante, libron mi faris,
La vortoj de mia libro nenio, la aludoj de ghi chio.
Libro aparta, ne ligita kun la ceteraj nek sentata de la intelekto,
Sed vi, vi sennombraj latentajhoj, ekscitighos je chiu pagho.

POETOJ VENONTAJ

Poetoj venontaj! oratoroj, kantistoj, muzikistoj venontaj!
Ne la hodiauo estas pravigonta min kaj respondonta por kio mi estas,
Sed vi, nova idaro, indighena, atleta, kontinenta, pli granda ol antaue sciata,
Vekighu! char vi devas pravigi min.

Mi mem nur skribas unu au du indikajn vortojn por la estonteco,
Mi antaue niras momente nur pivoti kaj rapidi returnen en la mallumon.

Mi estas homo kiu, promenadante, ne tute haltante, turnas hazardan rigardon al vi kaj
 tiam forturnas sian vizaghon,
Lasante al vi pruvi kaj difini ghin,
Atendante la chefajn aferojn de vi.

AL VI

Fremdulo, se vi pasante renkontas min kaj deziras paroli al mi, kial vi devus ne paroli al
 mi?
Kaj kial mi devus ne paroli al vi?

VI LEGANTO

Vi, leganto, pulsadas vivon kaj fieron kaj amon same kiel mi,
Tial por vi la sekvantaj kantoj.

KOMENCANTE DE PAUMANOKO

1

Komencante de la fishforma Paumanoko, kie mi naskighis,
Bone generita, kaj edukita de perfekta patrino,
Vaginte en multaj landoj, amanto de homplenaj pavimoj,
Loghinto en Manahato, mia urbo, au sur sudaj savanoj,
Au soldato bivakanta, au portanta mian tornistron kaj pafilon, au ministro en
Kalifornio,
Au kruda en mia domo en la arbaro de Dakoto, mia dieto viando, mia trinko de la fonto,
Au retirighinta por pripensi kaj mediti en iu profunda alkovo,
Malproksima de la tintado de homamasoj intertempojn pasante ravita kaj felicha,
Konscia pri la fresha libera donanto, fluanta Misuro, konscia pri potenca Niagaro,
Konscia pri la bizonherdoj sin pashtantaj sur la ebenajhoj, la hara kaj fortikbrusta
virulo,
Pri tero, rokoj, Kvina-monataj floroj spertataj, steloj, pluvo, negho – mia miro,
Studinte la tonojn de la mokbirdo kaj la flugadon de la montfalko,
Kaj audinte che tagigho la nerivaleblan, la ermitoturdon de la marchocedroj,
Soleca, kantanta en la Okcidento, mi ekkarolas por Nova Mondo.

2

Venko, unuigho, fido, identeco, tempo,
Nedisigeblaj interkonsentoj, richo, mistero,
Eterna progreso, la kosmo, kaj la modernaj raportoj.

Tio do estas la vivo,
Jen kio venis al la surfaco post tiom da suferegoj kaj konvulsioj.

Kiel kurioza! kiel reala!
Sub la piedoj la dia grundo, super la kapo la suno.

Vidu rotacii la globon,
La pra-ulokontinentoj for kungrupigitaj,
La nunaj kaj estontecaj kontinentoj norde kaj sude, kun la istmo intere.

Vidu vastajn senvojajn spacojn,
Kiel en songho ili shanghighas, ili rapide plenighas,
Sennombraj amasoj eliras sur ilin,
Ili estas nun kovritaj de la plej altrangaj homoj, artoj, institucioj, konataj.

Vidu projekciatan tra tempo,
Por mi audantaron senfinan.

Per firma kaj regula pasho ili iras, ili neniam haltas,
Serioj da homoj, Amerikanoj, cent milionoj,
Unu generacio ludanta sian rolon kaj forpasanta,
Alia generacio ludanta sian rolon kaj forpasanta siavice,
Kun vizaghoj turnitaj flanken au malantauen al mi por auskulti,
Kun okuloj retrospektivaj al mi.

3

Amerikanoj! venkantoj! marshoj homamaj!
Unuarangaj! jarcentaj marshoj! Libereco! amasoj!
Por vi programo de kantoj.

Kantoj de la prerioj,
Kantoj de longkursada Misisipo, kaj malsupren al la Meksikia maro,
Kantoj de Ohio, Indianio, Ilinojso, Iovao, Viskonsio, kaj Minesoto,
Kantoj elirantaj de la centro, de Kansaso, kaj de tie egaldistance,
Pafighantaj en pulsoj de fajro, senchesaj por vivigi chion.

4

Prenu miajn foliojn, Ameriko, prenu ilin Sude kaj prenu ilin Norde,
Bonvenigu ilin chie, char ili estas viaj propraj idoj,
Chirkauu ilin Oriente kaj Okcidente, char ili volas chirkaui vin,
Kaj vi antaurintoj, kunighu ame kun ili, char ili kunighas ame kun vi.

Mi studis la malnovajn tempojn,
Mi sidis studante che la piedoj de la grandaj majstroj,
Nu, se inde, ho ke la grandaj majstroj povu reveni kaj studi min.

Nome de chi tiuj Shtatoj, chu mi malestimu la antikvan?
Nu chi tiuj estas la idoj de la antikva por pravigi ghin.

5

Mortaj poetoj, filozofoj, pastroj,
Martiroj, artistoj, inventistoj, registaroj antau longe for,
Lingvoformantoj sur aliaj marbordoj,
Nacioj iufoje potencaj, nun malpliigitaj, retirighintaj, au dezertaj,
Mi ne audacas procedi ghis mi respekte agnoskos kion vi lasis alblovetita chi tien,
Mi trarigardis ghin, agnoskas ghi estas admirinda, (movighinte iom da tempo meze de
ghi),
Pensas nenio povas iam esti pli granda, nenio povas iam meriti pli ol ghi meritas,
Atente rigardante ghin chion dum longa tempo, tiam sengravigante ghin,
Mi staras en mia loko kun mia propra tago tie chi.

Chi tie elshipighas femalo kaj masklo,

Chi tie la heredanteco kaj heredantineco de la mondo, chi tie la flamo de materialoj,
Chi tie la spiriteco la tradukantino, la malkashe konfesata,
La chiam tendencanta, la finalo de videblaj formoj,
La kontentigantino, post necesa longatendado nun antaueniranta,
Jes jen venas mia mastrino la animo.

6

La animo,
Chiam kaj chiam – pli longe ol la grundo estas bruna kaj solida, pli longe ol la akvo
malflusas kaj flusas.

Mi faros la poemojn de materialoj, char mi pensas ke ili estos la plej spiritaj poemoj,
Kaj mi faros la poemojn de mia korpo kaj de mortemo,
Char mi pensas ke mi tiam liveros al mi la poemojn de mia animo kaj de senmorteco.

Mi faros kanton por chi tiuj Shtatoj ke neniun unu Shtato povus sub iaj cirkonstancoj esti
submetita al alia Shtato,
Kaj mi faros kanton ke estos afableco tage kaj nokte inter chiuj Shtatoj, kaj inter iu duo
el ili,
Kaj mi faros kanton por la oreloj de la Prezidento, plenan de bataliloj kun minacaj pintoj,
Kaj malantau la bataliloj sennombraj nekcontentaj vizaghoj;
Kaj kanton faros mi de la Unu formita el chiuj,
La denteghava kaj scintilanta Unu, kies kapo estas super chiuj,
Rezoluta militema Unu chiujn ampleksanta kaj super chiuj,
(Kiel ajn alta la kapo de iu alia, tiu kapo estas super chiuj).

Mi agnoskos samepokajn landojn,
Mi spuros la tutan geografion de la globo kaj salutos ghentile chiun urbon, grandan kaj
malgrandan,
Kaj oficoj! Mi metos en miajn poemojn ke kun vi estas heroismo sur lando kaj maro,
Kaj mi raportos tutan heroismon el Amerika vidpunkto.

Mi kantos la kanton de kamaradeco,
Mi montros kio sola devas fine interkonsentigi chi tiujn,
Mi kredas ke tiuj fondos sian propran idealon de vira amo, indikante ghin en mi,
Mi tial lasos flami de mi la brulantajn fajrojn kiuj minacis min konsumi,
Mi levos kio tro longe retenis tiujn subbrulantajn fajrojn,
Mi donos al ili kompletan senbridecon,
Mi skribos la evangelipoemon de kamaradoj kaj de amo,
Char kiu krom mi komprenus amon kun ghia tuta malghojo kaj ghojo?
Kaj kiu krom mi estus la poeto de kamaradoj?

7

Mi estas la kredema homo de kvalitoj, epokoj, rasoj,
Mi antaueniras de la popolo en ilia propra spirito,

Jen kio kantas nelimigitan fidon.

Chiuuj! chiuuj! la aliaj ignoru kion ili ignorus,
Mi faras la poemon de malbono ankau, mi solenas tiun parton ankau,
Mi estas mem ghuste tiom malbona kiom bona, kaj mia nacio estas – kaj mi diras ke
estas fakte nenia malbono,
(Au se estas, mi diras ke ghi estas ghuste tiom grava al vi, al la lando, au al mi kiom io
alia).

Mi ankau, sekvante multajn kaj sekvata de multaj, inauguras religion, mi malsupreniras
en la arenon,
(Povus esti ke mi estas destinita eligi la plej lautajn kriojn tie, la sonorantajn kriojn de la
venkinto,
Kiu scias? ili ankoraŭ povus levighi de mi, kaj shvebi super chio).

Chiu afero ne estas por si mem,
Mi diras, la tuta tero kaj chiuuj steloj en la chielo estas por religio.

Mi diras, neniu homo iam ankoraŭ estis ech duone sufiche pia,
Neniu iam ankoraŭ adoris au kultis duone sufiche,
Neniu iam komencis pensi kiel dia li mem estas kaj kiel certa la estonteco estas.

Mi diras ke la reala kaj daŭra grandeco de chi tiuj Shtatoj devas esti ilia religio,
Alie estas nenia reala kaj daŭra grandeco;
(Nek karaktero nek vivo inda je la nomo sen religio,
Nek lando nek viro au virino sen religio).

8

Kion vi faras, juna viro?
Chu vi estas tiel serioza, tiel fordonita al literaturo, scienco, arto, amoroj?
Chi tiuj shajnrealajhoj, politiko, poentoj?
Via ambicio au komerco, kio ajn ghi estu?

Estas bone – kontraŭ tiaj mi ne diras vorton, mi estas ilia poeto ankau,
Sed jen! tiaj rapide kvietighas, forbruligite pro religio,
Char chiaj aferoj ne estas fuelo por varmo, la nepalpebla flamo, la esenca vivo de la tero,
Iom pli ol tiaj estas por religio.

9

Kion vi serchas tiel pensema kaj silenta?
Kion vi bezonas, kamarado?
Kara filo, chu vi opinias ke ghi estas amo?

Auskultu, kara filo – auskultu, Ameriko, filino au filo,
Estas dolora afero ami viron au virinon troe, kaj tamen ghi kontentigas, ghi estas granda,

Sed estas io alia tre granda, ghi ampleksas la tuton,
Ghi, grandioza, preter materialoj, per konstantaj manoj chirkaubalaas kaj provizas
chiujn.

10

Vi sciu, ke nur por faligi sur la teron la ghermojn de pli granda religio,
La sekvantaj kantojn, chiun por ghia speco, mi kantas.

Mia kamarado!
Por ke vi partoprenu kun mi du grandajhojn, kaj trian levighantan inkluziva kaj pli
splenda,
La grandajhojn de Amo kaj Demokratio, kaj la grandajhon de Religio.

Miksajho mia propra, la nevidata kaj la vidata,
Mistera oceano kien la riveroj elfluas,
Profeta spirito de materialoj, shanghighantaj kaj flagretantaj chirkau mi,
Vivantaj estajhoj, identecoj nun sendube proksime al ni en la aero pri kiuj ni ne scias,
Kontakto tage kaj hore kiu ne volas liberigi min,
Tiujn selektanta, tiuj alude postulataj al mi.

Ne li, per taga kiso antauen de infaneco kisanter min,
Estas volvinta kaj volvinta chirkau mi kio tenas min al li,
Iom pli ol mi estas tenata al chielo kaj al la tuta spirita mondo,
Post kion ili faris al mi, sugestante temojn.

Ho tiaj temoj – egalecoj! ho dia mezo!
Triladoj sub la suno, inaugurata kiel nun, au che tagmezo, au subiranta,
Melodioj muzikaj, fluantaj tra epokoj, nun atingantaj chi tien,
Mi ekshatas viajn senzorgajn kaj miksitajn akordojn, aldonas al ili, kaj gaje donas
ilin antauen.

11

Dum mi promenis en Alabamo mian matenan promenon,
Mi vidis, kie la birdino, la mokbirdino, sidis sur sia nesto en la dornarbustoj, kuvante
sian idaron.

Mi vidis la virbirdon ankau,
Mi pauzis por audi lin de proksime, shveliganta sian gorghon kaj ghoje kantanta.

Kaj dum mi pauzis, venis al mi ke tio por kio li kantas ne estas tie sole,
Nek por lia kunulino nek por li mem sole, nek por chio resendita de la ehhoj,
Sed subtila, sekreta, pretere fora,
Transdonita tasko kaj kashita donaco por tiuj naskataj.

12

Demokratio! proksime al vi gorgho nun shveligas sin kaj ghoje kantas.

Mia edzino! por la idaro preter ni kaj de ni,
Por tiuj kiuj apartenas chi tie kaj tiuj venontaj,
Mi, ghojega esti preta por ili, nun elskuos karolojn pli fortajn kaj fierajn ol iam estis
audataj sur tero.

Mi faros la kantojn de pasio por komplezi al ili,
Kaj viajn kantojn eksterleghaj ofendantoj, char mi ekzamenas vin per parencaj okuloj, kaj
portas vin kun mi same kiel iujn.

Mi faros la veran poemon de richo,
Gajni por la korpo kaj la menso tion kio adheras kaj antaueniras kaj ne estas faligata de
morto;

Mi elvershos egoismon kaj montros ghin subkushanta chion, kaj mi estos la bardo de
personeco,
Kaj mi montros pri la masklo kaj la femalo, ke chiu estas nur la egalulo de la alia,
Kaj seksaj organoj kaj agoj! vi koncentrighu en mi, char mi rezolutighis renkonti vin per
kuragha klara vocho por pruvi vin eminentaj,
Kaj mi montros ke ne estas neperfekto en la nuntempo, kaj povas esti nenia en la
estonteco,

Kaj mi montros ke, kio ajn okazas al iu, ghi povas esti direktata al belaj rezultoj,
Kaj mi montros ke nenio povas okazi pli bela ol morto,
Kaj mi tredos fadenon tra miaj poemoj ke la tempo kaj okazoj estas kunligitaj,
Kaj ke chiuj aferoj de la universo estas perfektaj mirakloj, chiu tiel profunda kiel iu.

Mi ne faros poemojn rilate partojn,
Sed mi faros poemojn, kantojn, pensojn rilate tuton,
Kaj mi ne kantos rilate tagon, sed rilate chiujn tagojn,
Kaj mi ne faros poemon nek la plej etan parton de poemo kiu ne rilatas la animon,
Char rigardinte la objektojn de la universo, mi trovas ke ne estas unu nek ia ero de unu
kiu ne rilatas la animon.

13

Chu iu petis vidi la animon?
Vidu, via propra formo kaj vizagho, personoj, substancoj, bestoj, la arboj, la fluantaj
riveroj, la rokoj kaj sabloj.

Chiuj tenas spiritajn ghojojn kaj poste liberigas ilin;
Kiel la vera korpo iam povas morti kaj esti enterigita?

Pri via reala korpo kaj la reala korpo de iu viro au virino,
Ero post ero ghi eskapos la manojn de la kadavropurigistoj kaj pasos al taugaj sferoj,
Portante kio aldonighis al ghi de la momento de naskigho al la momento de morto.

Ne la tipoj aranghitaj de la presisto redonas sian impreson, la signifon, la precipan
koncernitajhon,
Iom pli ol la substanco kaj vivo de viro au la substanco kaj vivo de virino revenas en la
korpo kaj la animo,
Indiferente antaŭ morto kaj post morto.

Jen, la korpo inkludas kaj estas la signifo, la precipa koncernitajho, kaj inkludas kaj
estas la animo;
Kiu ajn vi estas, kiel surperba kaj kiel dia estas via korpo, au iu parto de ghi!

14

Kiu ajn vi estas, al vi senfinajn anoncojn!

Filino de la landoj, chu vi atendis vian poeton?
Chu vi atendis iun kun vershanta busho kaj montra mano?
Al la masklo de la Shtatoj kaj al la femalo de la Shtatoj,
Ghojegajn vortojn, vortojn al la landoj de Demokratio.

Interligitaj, nutrajh-produktaj landoj!
Lando de karbo kaj fero! lando de oro! lando de koton, sukero, rizo!
Lando de tritiko, bovajho, porkajho! lando de lano kaj kanabo! lando de la pomo kaj la
uvo!
Lando de la pashtistaj ebenajhoj, la herbokampoj de la mondo! lando de tiuj dolch-aeraj
sennombraj altplatajhoj!
Lando de la grego, la ghardeno, la sana domo el adobo!
Landoj kie nord-okcidenta Kolumbio sinuas kaj kie sud-okcidenta Kolorado sinuas!
Lando de orienta Chesapiko! lando de Delavaro!
Lando de Ontario, Erio, Hurono, Michigano!
Lando de la Malnovaj Dek Tri! Masachuseca lando! lando de Vermonto kaj Konektikuto!
Lando de la oceanaj bordoj! lando de segil-montaroj kaj pintoj!
Lando de boatistoj kaj maristoj! lando de fishkaptistoj!
Neeltireblaj landoj! la kuntenighantaj! la pasiaj!
La flank-al-flankaj! la pli maljunaj kaj pli junaj fratoj! la osteca-membraj!
La granda lando de virinoj! la femala! la spertaj fratinoj kaj la nespertaj fratinoj!
Malproksim-spira lando! Arkte stimolata! Meksikie ventumata! la diversaj! La
kompaktaj!
La Pensilvaniano! la Virginiano! la duobla-Karolinano!
Ho chiuj kaj chiu mult-amataj de mi! Miaj sentimaj nacioj! Ho mi chiuokaze inkludas
vin chiujn kun perfekta amo!
Mi ne povas esti eligata el vi! ne el unu iel prefere ol el alia!
Ho morto! Ho malgrau chio, mi estas ankoraŭ de vi nevidata chi-hore, kun
nerepremebla amo,
Piedirante tra Nov-anglio, amiko, vojaghanto,
Plaudante per miaj nudaj piedoj en la rando de la someraj ondetoj sur la sabloj de
Paumanoko,

Transirante la preriojn, loghante denove en Chikago, loghante en chiu urbo,
Observante elmontrajhojn, naskojn, plibonigojn, strukturojn, artojn,
Auskultante oratorojn kaj oratorinojn en publikaj haloj,
De kaj tra la Shtatoj kiel dum vivo, chiu viro kaj virino mia najbaro,
La Luiziano, la Georgiano, tiel proksima al mi, kaj mi tiel proksima al li kaj ŝi,
La Misisipiano kaj Arkansasano ankoraŭ kun mi, kaj mi ankoraŭ kun iu el ili,
Ankoraŭ sur la ebenajhoj okcidente de la spina rivero, ankoraŭ en mia domo de adobo,
Ankoraŭ revenanta orienten, ankoraŭ en la Marflanka Shtato au en Marilando,
Ankoraŭ Kanadano gaje defianta la vintron, la negho kaj glacio bonvenaj al mi,
Ankoraŭ fidela filo au de Majno au de la Granita Shtato, au la Naraganseta-Golfa Shtato,
au la Imperia Shtato,
Ankoraŭ velanta al aliaj bordoj por aneksi chi tiujn, ankoraŭ bonvenigante chiun novan
fraton,
Chi pere almetante chi tiujn foliojn al la novaj de la horo, ili unuighas kun la malnovaj,
Venante mem inter la novajn esti ilia kunulo kaj egalulo, venante persone al vi nun,
Urghante vin al agoj, karakteroj, spektakloj, kun mi.

15

Kun mi kun firma tenado, tamen hastu, hastu antauen.

Por via vivo adheru al mi,
(Mi eble devos esti persvadata multajn fojojn antau ol mi konsentos doni min vere al vi,
sed chu tio gravas?
Chu ne devas Naturo esti persvadata multajn fojojn?)

Nenia delikata dolcha tenerulo mi,
Barba, sunbruligita, grizkola, forpeleca, mi estas alveninta,
Kun kiu lukti, dum mi pasas, por la solidaj premioj de la universo,
Char tiajn mi donas al li kiu povas persisti por gajni ilin.

16

Survoje momenton mi pauzas,
Chi tie por vi! kaj chi tie por Ameriko!
Ankoraŭ la nuntempon mi hisas alten, ankoraŭ la estontecon de la Shtatoj mi
antausignas ghoja kaj subluma,
Kaj por la pasinteco mi prononcas kion la aero entenas de la rughaj aborigenoj.

La rughaj aborigenoj,
Lasante naturajn spirajhojn, sonojn de pluvo kaj ventoj, blekojn kiel de birdoj kaj bestoj
en la arbaro, silabitajn al ni por nomoj,
Okoni, Kusa, Ótaua, Monongahila, Sok, Nachez, Chatahuchi, Kakueta, Oronoko,
Uabash, Majami, Ságino, Chípeua, Oshkosh, Uala-Uala,
Lasante tiajn al la Shtatoj, ili fandighas, foriras, sharghante la akvon kaj la landon per
nomoj.

Ekspansiantaj kaj rapidaj, de nun,
 Elementoj, rasoj, alghustigoj, turbulentaj, viglaj kaj audacaj,
 Mondo praa denove, vidajhoj de gloro senchesaj kaj forkighantaj,
 Nova raso dominantanta antaŭajn kaj multe pli grandioza, kun novaj konkursoj,
 Novaj politikoj, novaj literaturoj kaj religioj, novaj inventajhoj kaj artoj.

Chi tiujn, mia vocho anoncanta – mi ne plu dormos sed levighos,
 Vi oceanoj kiuj estis trankvilaj en mi! kiel mi sentas vin, nesondeblaj, movighantaj,
 preparantaj senprecedentajn ondojn kaj shtormojn.

Vidu, vaporshipoj vaporveturantaj tra miaj poemoj,
 Vidu, en miaj poemoj enmigrantoj daure venantaj kaj alterighantaj,
 Vidu, malantaue, la vigvamo, la pado, la kabano de la chasisto, la platboato, la
 maizfolio, la pretendo, la kruda barilo, kaj la arbara vilagho,
 Vidu, unuflanke la Okcidenta Maro kaj aliaflanke la Orienta Maro, kiel ili antaŭenighas
 kaj retirighas sur miaj poemoj kiel sur siaj propraj bordoj,
 Vidu, pashtejoj kaj arbaroj en miaj poemoj – vidu, bestoj sovaghaj kaj malsovaghaj –
 vidu, preter la Koo, sennombraj herdoj da bizonoj pashtighantaj sur la mallonga
 krispa herbo,
 Vidu, en miaj poemoj, urboj, solidaj, vastaj, land-internaj, kun pavimitaj stratoj, kun
 konstruajhoj el fero kaj shtono, senchesaj veturiloj, kaj komerco,
 Vidu, la multcilindra vapora presmashino – vidu, la elektra telegrafo etendighanta trans
 la kontinenton,
 Vidu, tra la profundajhoj de Atlantiko pulsoj Amerikaj Europon atingantaj, pulsoj de
 Europo tauge redonataj,
 Vidu, la forta kaj rapida lokomotivo dum ghi foriras, anhelante, fajfigante la vapor-
 fajfilegon,
 Vidu, plugistoj plugantaj kampojn – vidu, ministoj fosantaj minojn – vidu, la sennombraj
 fabrikoj,
 Vidu, mehhanistoj okupitaj che siaj stabloj kun iloj – vidu, el inter ili superaj jughistoj,
 filozofoj, Prezidentoj elighas, vestitaj en laborvestoj,
 Vidu, lantanta tra la laborejoj kaj kampoj de la Shtatoj, mi multe amata, proksime tenata
 tage kaj nokte,
 Audu la lautajn ehhojn de miaj kantoj tie – legu la aludojn finfine venintajn.

Ho kamarado proksima! ho vi kaj mi finfine, kaj ni du sole.
 Ho vorto por malobstrukci onian vojon antaŭen senfine!
 Ho io ekstaza kaj nedemonstrebla! ho muziko sovagha!
 Ho nun mi triumfas – kaj vi ankau triumfos;
 Ho man-en-mane – ho senpeka plezuro – ho ancorau unu deziranto kaj amanto!
 Ho hasti firmitenante – hasti, antaŭenhasti kun mi.

KANTO DE MI MEM

1

Mi celebras min mem kaj kantas min mem,
Kaj kion mi supozas tion vi supozos,
Char chiu atomo apartenanta al mi virtuale apartenas al vi.

Mi lantas kaj invitas mian animon,
Mi klinighas kaj lantas, senghene observante tigon de somera herbo.

Mia lango, chiu atomo de mia sango, formita el chi tiu grundo, chi tiu aero,
Naskita chi tie de gepatroj naskitaj chi tie de gepatroj same, kaj iliaj gepatroj same,
Mi, nun tridek-sep jarojn agha kun perfekta sano komencas,
Esperante ne chesi ghis morto.

Kredoj kaj skoloj suspenditaj,
Retirighantaj por iom da tempo, sufichintaj je kio ili estas sed neniam forgesitaj,
Mi enhavas por bono au malbono, mi permesas paroli che chiu shanco,
Naturon sen haltigo, kun ghia praenergio.

2

Domoj kaj chambroj estas plenaj de parfumoj, la bretoj estas densaj per parfumoj,
Mi spiras mem la aromon kaj konas ghin kaj shatas ghin,
La distilajho ankau min ebriigus, sed mi ne permesos al ghi.

La atmosfero ne estas parfumo, ghi havas nenian guston de la distilajho, ghi estas
senodora,
Ghi estas por mia busho por chiam, mi amas ghin,
Mi iras al la riverbordo apud la arbaro kaj ighas malmaskvestita kaj nuda,
Mi sopiregas ke ghi kontaktu min.
La fumo de mia propra spiro,
Ehhoj, ondetoj, zumataj flustroj, am-radiko, silk-fadeno, forko kaj vito,
Mia respirado kaj enspirado, la batado de mia koro, la pasado de sango kaj aero tra miaj
pulmoj,
La snufo de verdaj folioj kaj sekaj folioj, kaj de la marbordo kaj malhelkoloraj marrokoj,
kaj la fojno en la tenejo,
La sono de la elruktataj vortoj de mia vocho liberigitaj al la kirlighoj de la vento,
Kelke da legheraj kisoj, kelke da brakumoj, chirkauetendigho de brakoj,
La ludado de brilo kaj ombro sur la arboj dum la supraj branchoj svingighas,
La delectigho, sola au en la impeto de la stratoj, au lau la kampoj kaj deklivoj,
La sento de sano, la plentagmeza trilo, la kanto de mi levighanta el la lito kaj
renkontanta la sunon.

Chu vi taksis mil akreojn multa? Chu vi taksis la teron multa?
Chu vi ekzercis vin tiel longe por lerni legi?
Chu vi sentis vin tiel fiera, kompreninte la signifon de poemoj?

Haltu chi tiun tagon kaj nokton kun mi kaj vi posedos la originon de chiuj poemoj,
Vi posedos la bonon de la tero kaj suno, (estas milionoj da sunoj restantaj),
Vi ne plu prenos aferojn duamane au triamane, nek rigardos tra la okuloj de la mortaj,
 nek nutros vin per fantomoj en libroj,
Vi ankau ne rigardos tra miaj okuloj, nek prenos aferojn de mi,
Vi auskultos chiuajn flankojn kaj filtros ilin de via memo.

3

Mi audis kion la parolantoj parolis, la parolon pri la komenco kaj la fino,
Sed mi ne parolas pri la komenco au la fino.

Estis neniam pli da komencado ol estas nun,
Nek iom pli da juneco au maljuneco ol estas nun,
Kaj neniam estos iom pli da perfekteco ol estas nun,
Nek iom pli da chielo au infero ol estas nun.

Urgho kaj urgho kaj urgho,
Chiam la naskiga urgho de la mondo.
El la malhelo malaj egaluloj antaueniras, chiam substanco kaj pliigho, chiam sekso,
Chiam interteksigho de identecoj, chiam distingo, chiam genero de vivo.

Detali estas senutile, kleraj kaj malkleraj sentas ke estas tiel.

Certaj kiel la plej certe certaj, vertikalaj en la apogfostoj, bone interligitaj, apogitaj en la
 traboj,
Fortaj kiel chevalo, amemaj, fieraj, elektraj,
Mi kaj chi tiu mistero chi tie ni staras.

Klara kaj dolcha estas mia animo, kaj klara kaj dolcha estas chio kio ne estas mia animo.

Manku unu, mankas ambau, kaj la nevidata estas pruvita per la vidata,
Ghis chi tio ighas nevidata kaj ricevas pruvon siavice.

Montrante la plej bonan kaj apartigante ghin de la plej malbona, epoko chagrenas
 epokon,
Sciante la perfektan taugecon kaj egalanimecon de aferoj, dum oni diskutas, mi silentas,
 kaj iras bani kaj admiri min.

Bonvena estas chiu organo kaj atributo de mi, kaj de ia homo verva kaj pura,
Ne colo nek ero de colo estas abomena, kaj neniuj estos malpli konata ol la ceteraj.

Mi kontentas – Mi vidas, dancas, ridas, kantas;

Dum la brakumanta kaj amanta litkunulo dormas apud mi tra la nokto, kaj forighas je la
ekrigardo de la tago per shtelira pashado,
Lasante al mi korbojn kovritajn per blankaj tukoj, shveligantaj la domon per sia
abundo,
Chu mi prokrastu mian akcepton kaj konstaton kaj kriegu al miaj okuloj,
Ke ili turnighu de fiksrigardo al kaj lau la vojo,
Kaj tuj kalkulu kaj montru al mi ghis cendo,
Ghuste la valoron de unu kaj ghuste la valoron de du, kaj kiu estas supera?

4

Krurfalchantoj kaj demandantoj chirkauas min,
Homoj, kiujn mi renkontas, la efiko sur mi de mia frua vivo au la kvartalo kaj urbo en
kiuj mi loghas, au la nacio,
La lastaj datoj, eltrovajhoj, inventajhoj, societoj, autoroj malnovaj kaj novaj,
Mia vespermangho, vestoj, kunuloj, aspektoj, komplimentoj, devoj,
La vera au imagita indiferenteco de iu viro au virino kiun mi amas,
La malsano de unu el miaj familanoj au de mi mem, au malbonago au perdo au manko
de mono, au deprimoj au ghojegoj,
Bataloj, la hororoj de fratmortiga milito, la febro de la necerta novajho, la subitaj okazoj,
Chi tiuj venas al mi tagojn kaj noktojn kaj foriras de mi denove,
Sed ili ne estas la Mi mem.

Aparte de la tirado kaj haulado staras kio mi estas,
Staras amuzita, kompleza, kompatanta, senokupa, unueca,
Malsuprenrigardas, estas rekta, au fleksas brakon sur nepalpebla certa ripozejo,
Rigardanta per flankenklinita kapo, scivolema pri tio kio venos poste,
Tiel en kiel ekster la ludo, kaj rigardanta kaj miranta al ghi.

Malantauen mi vidas en miaj propraj tagoj kie mi shvitis tra nebulo kun lingvistoj kaj
disputantoj,
Mi havas neniajn mokojn au argumentojn, mi observas kaj atendas.

5

Mi kredas je vi, mia animo; la alia kiu mi estas, ne devas humiligi sin al vi,
Kaj vi ne devas humilighi al la alia.

Lantu kun mi sur la herbo, forigu la shtopilon de via gorgho,
Ne vortojn, ne muzikon au rimon mi volas, ne kutimon au prelegon, ech ne la plej
bonajn,
Nur la luladon mi shatas, la zumadon de via valvita vocho.

Mi memoras kiel iam ni kushis dum tiel travidebla somera mateno,
Kiel vi kushigis vian kapon inter miaj koksoj kaj milde renversighis sur mi,
Kaj disigis la chemizon de mia Brust-osto, kaj plonghis la langon al mia ghisnude
senvestita koro,

Kaj etendis la manojn ghis vi sentis mian barbon, kaj etendis la manojn ghis vi tenis miajn piedojn.

Rapide levighis kaj disvastighis chirkau mi la paco kaj scio kiuj superas chiujn argumentojn de la tero,
Kaj mi scias ke la mano de Dio estas la promeso de mia propra,
Kaj mi scias ke la spirito de Dio estas la frato de mia propra,
Kaj ke chiu viroj iam naskitaj estas ankau miaj fratoj, kaj la virinoj miaj fratinoj kaj amantinoj,
Kaj ke kilsono de la kreaĵo estas amo,
Kaj senlimaj estas folioj rigidaj au velkantaj en la kampoj,
Kaj brunaj formikoj en la etaj ujoj sub ili,
Kaj muskaj krustoj de la zigzag-barilo, amasigitaj shtonoj, sambukoj, verbaskoj, kaj fitolakoj.

6

Infano diris Kio estas la herbo? portante ghin al mi kun plenaj manoj;
Kiel mi povus respondi al la infano? Mi ne scias kio ghi estas iom pli ol li.

Mi supozas ke ghi devas esti la standardo de mia dispozicio, el esperema verda shtofa teksita.

Au mi supozas, ke ghi estas la poshtuko de la Sinjoro,
Parfumita donaco kaj memorajho intence faligita,
Portanta nomon de l' posedanto iel en la anguloj, ke ni vidu kaj rimarku, kaj diru Kies?

Au mi supozas ke la herbo estas mem infano, la produktita bebo de la vegetajho.

Au mi supozas ke ghi estas unuforma hieroglifo,
Kaj ghi signifas: Shosado egale en vastaj zonoj kaj malvastaj zonoj,
Kreskado inter nigruloj, kiel inter blankuloj,
Kanuko, Tákaho, Kongresano, Kuffo, mi donas al ili same, mi akceptas ilin same.

Kaj nun ghi shajnas al mi la belaj netonditaj haroj de tomboj.

Tenere mi uzos vin krispighanta herbo,
Povas esti ke vi transpiras de la brustoj de junaj viroj,
Povas esti ke, se mi konus ilin, mi amus ilin,
Povas esti ke vi estas de maljunuloj, au de idoj prenitaj baldau el la sinoj de siaj patrinoj,
Kaj chi tie vi estas la sinoj de la patrinoj.

La herbo estas tro malhela esti de la blankaj kapoj de maljunaj patrinoj,
Pli malhela ol la senkoloraj barboj de maljunaj viroj,
Tro malhela veni de sub la rughetaj tegmentoj de bushoj.

Ho mi perceptas malgrau chio tiom da parolantaj langoj,

Kaj mi perceptas ke ili ne venas de sub la tegmentoj de bushoj sencele.

Mi deziras ke mi povu traduki la sugestiojn pri la mortaj junaj viroj kaj virinoj,
Kaj la sugestiojn pri maljunaj viroj kaj patrinoj, kaj la idoj prenitaj baldau el iliaj sinoj.

Kio viaopinie farighis el la junaj kaj maljunaj viroj?
Kaj kio viaopinie farighis el la virinoj kaj infanoj?

Ili estas vivaj kaj sanaj ie,
La plej malgranda shoso montras ke estas vere nenia morto,
Kaj se iam estis, ghi antaŭenkondukis vivon, kaj ne atendas che la fino por haltigi ghin,
Kaj ghi chesis che la momento kiam vivo aperis.

Chio iras antaŭen kaj eksteren, nenio disfalas,
Kaj morti estas malsame ol iu supozis, kaj pli felice.

7

Chu iu supozis ke estas felice naskighi?
Mi hastas sciigi al li au shi ke estas egale felice morti, kaj mi scias tion.

Mi preterpasas morton kun la mortantoj kaj naskighon kun la novlavita bebo, kaj ne
estas enhavata inter mia chapelo kaj botoj,
Kaj observas multajn objektojn, neniu du similaj kaj chiu bona,
La tero bona kaj la steloj bonaj, kaj iliaj kunajhoj chiuj bonaj.

Mi ne estas ia tero nek kunajho de ia tero,
Mi estas la kunulo kaj kompano de homoj, chiuj egale senmortaj kaj senfundaj kiel mi,
(Ili ne scias kiel senmortaj, sed mi scias).

Chiu speco por si kaj sia propra, por mi la mia maskla kaj femala,
Por mi tiuj kiuj estis knaboj kaj kiuj amas virinojn,
Por mi la viro kiu estas fiera kaj sentas kiel pikas esti malrespektata,
Por mi la amatino kaj la maljuna fraulino, por mi patrinoj kaj la patrinoj de patrinoj,
Por mi lipoj kiuj ridetis, okuloj kiuj larmis,
Por mi infanoj kaj la generantoj de infanoj.

Maldrapiru vin! vi ne estas kulpa lau mi, nek malfresha nek formetita,
Mi vidas tra la drapo kaj gingamo chiuokaze,
Kaj estas chirkaue, tenaca, akirema, senlaca, kaj ne povas esti forskuita.

8

La etulo dormas en ghia lulilo,
Mi levas la gazon kaj rigardas longatempe, kaj silente forbrozas mushojn per mia mano.

La junulo kaj la rughvizagha knabino forturnas sin supren lau la arbethava monteto,

Mi strabe rigardas ilin de la supro.

La memmortinto kushas dissternite sur la sanga planko de la dormochambro,
Mi observas la kadavron kun ghiaj trempetitaj haroj, mi notas kien la pistolo falis.

La klacho de la pavimo, radoj de charoj, frotsono de bot-plandumoj, parolado de la
promenantoj,

La peza omnibuso, la veturigisto kun sia demandanta dikfingro, la tintego de la
hufferitaj chevaloj sur la granita planko,

La sledocharoj tintantaj, kriataj shercoj, bombardadoj de neghbuloj,

La huraoj por popularaj favoratoj, la furiozo de ekscititaj amasoj,

La klako de la kurtenita portlito, malsanulo interne, portata al la hospitalo,

La renkonto de malamikoj, la subita sakrajho, la batoj kaj falo,

La ekscitita amaso, la policisto kun lia stelo, rapide pasiganta sin al la centro de la
amaso,

La senemociaj shtonoj, kiuj ricevas kaj redonas tiom da ehhoj,

Kiaj ghemoj de tromanghintaj au duonmortmalsataj, kiuj falas sunfrapite au ikte,

Kiaj ekkrioj de virinoj, subite frapitaj, kiuj hejmenhastas por naski bebojn,

Kiaj vivantaj kaj enterigitaj paroloj chiam vibras chi tie, kiaj hurloj briditaj de deco,

Arestoj de krimuloj, malrespektoj, adultaj proponoj farataj, akceptoj, malakceptoj kun
konveksaj lipoj,

Mi atentas ilin au la aspekton au resonancon de ili – mi venas kaj mi foriras.

9

La grandaj pordoj de la kampara tenejo staras malfermitaj kaj pretaj,

La sekigita herbo de la rikolta tempo sharghas la malrapide tiratan charegon,

La klara lumo ludas sur la brunogrizo kaj verde internuancitaj,

La plenbrakoj estas pakitaj en la subfleksighantan subtegmenton.

Mi estas tie, mi helpas, mi venis etendite supre de la shargho,

Mi sentis ghiajn molajn ekskuojn, unu gambo kushanta sur la alia,

Mi saltas de la transaj traboj kaj ekkaptas la trifolion kaj fleon,

Kaj rulighas kalkanoj super kapo kaj implikas miajn harojn kun multaj filamentoj.

10

Sola malproksime en la sovaghejoj kaj montaroj mi chasas,

Vaganta, mirigite pri mia propra leghero kaj gajo,

En la malfrua posttagmezo elektanta sekuran lokon pasigi la nokton,

Ekbruliganta fajron kaj rostanta la freshe mortigitan chasajhon,

Ekdormanta sur la kolektitaj folioj, kun mia hundo kaj pafilo cheflanke.

La Jankia klipero veturas per siaj chiel-veloj, shi tranchas la scintilon kaj shaumon,

Miaj okuloj perceptas la landon, mi klinighas che shia pruo au krias ghoje de la ferdeko.

La boatistoj kaj pekten-fosistoj levighis frue kaj haltis por mi,

Mi enshovis miajn pantalonfinojn en miajn botojn kaj iris kaj amuzis min;
Vi devus esti kun ni tiun tagon chirkau la pekten-supra kaldrono.

Mi vidis la edzighon de la kaptilisto sub la chielo en la malproksima okcidento, la
novedzino estis rugha junulino,
Shia patro kaj liaj amikoj sidis proksime, kruckrure, kaj muete fumante, ili havis
mokasenojn surpiede kaj grandajn dikajn lankovrilojn pendantajn de iliaj
shultroj,
Sur riverbordo lantis la kaptilisto, li estis vestita plejparte en feloj, liaj abunda barbo kaj
bukloj shirmis lian kolon, li tenis sian novedzinon che la mano,
Shi havis longajn palpebrojn, shia kapo estis nuda, shiaj malfajnaj rektaj haroj
malsuprenighis sur shiaj voluptaj membroj kaj etendighis ghis shiaj piedoj.

La forkurinta sklavo venis al mia domo kaj haltis ekstere,
Mi audis liajn movojn kraketadi sur la branchetoj de la shtiparo,
Tra la svingita duon-pordo de la kuirejo mi vidis lin lamecan kaj malfortan,
Kaj iris tien kie li sidis sur shtipo kaj enkondukis lin kaj trankviligis lin,
Kaj alportis akvon kaj plenigis kuvon por lia shvita korpo kaj kontuzitaj piedoj,
Kaj donis al li chambron enireblan el mia propra, kaj donis al li iom da krudaj freshaj
vestoj,
Kaj memoras perfekte bone liajn turnighantajn okulojn kaj lian mallertecon,
Kaj memoras ke mi metis plastrojn sur la frotlezojn de lia kolo kaj maleoj;
Li restis kun mi semajnon antaŭ ol li resanighis, kaj pasis norden,
Mi sidigis lin apud mi chetable, mia karabeno klinita en la angulo.

11

Dudek ok junaj viroj sin banas che la bordo,
Dudek ok junaj viroj kaj chiuj tiel amikaj;
Dudek ok jaroj de virina vivo kaj chiuj tiel solecaj.

Shi posedas la bonegan domon che la levigho de la bordo,
Shi sin kashas nobleca kaj riche vestita malantaŭ la persienoj de la fenestro.

Kiun el la junaj viroj shi amas plej multe?
Ha la plej malbela el ili estas bela al shi.

Kien vi ekiras, sinjorino? char mi vidas vin,
Vi plaudas en la akvo tie, tamen restas tute senmova en via chambro.

Dancante kaj ridante lau la plagho venis la dudek-naŭa banighanto,
La ceteraj ne vidis shin, sed shi vidis ilin kaj amis ilin.

La barboj de la junaj viroj briletis de malseko, ghi fluis de iliaj longaj haroj,
Rojetoj pasis chie sur iliaj korpoj.

Nevidata mano ankau pasis sur iliaj korpoj,
Ghi malsupreniris tremade de iliaj tempioj kaj ripoj.

La junaj viroj flosas sur la dorsoj, iliaj blankaj ventroj volbighas al la suno, ili ne
demandas kiu firme ektenas ilin,
Ili ne konscias kiu pufighas kaj klinighas kun penda kaj fleksa arko,
Ili ne pripensas kiun ili saturas per shpruco.

12

La buchisto knabo demetas siajn mortig-vestojn, au akrigas sian tranchilon che la budo
en la bazaro,
Mi lantas, ghuante lian spritan respondadon kaj lian pied-trenan dancadon.

Hufferistoj kun fulgaj kaj vilaj brustoj chirkauas la amboson,
Chiu havas sian chefmartelegon, ili impetegas, granda estas la varmego en la fajro.

De la cindro-disshutita sojlo mi sekvas iliajn movojn,
La supla deviado de iliaj talioj kunludas kun la masivaj brakoj,
Mansupre la marteloj svingighas, mansupre tiel malrapide, mansupre tiel trafaj,
Ili ne hastas, chiu viro batas en sia loko.

13

La negro firme tenas la bridrimenojn de siaj kvar chevaloj, la bloko svingighas sube sur
ghia supreligita cheno,
La negro kiu veturigas la longan platcharon de la shtonkorto, stabila kaj alta li staras,
ekvilibrigite sur unu gambo sur la rando-trabo,
Lia blua chemizo vidigas lian plenforman kolon kaj bruston kaj malstriktighas super lia
koksozono,
Lia rigardo estas trankvila kaj komandema, li ekpushas la pend-randon de sia chapelo
for de sia frunto,
La sunlumo falas sur liajn krispajn vertharojn kaj lipharojn, falas sur la nigron de liaj
poluritaj kaj perfektaj membroj.

Mi rigardas la pitoreskan giganton kaj amas lin, kaj ne haltas tie,
Mi iras kun la chevalaro ankau.

En mi la karesanto de vivo kie ajn ghi movighas, malantauen kaj ankau antauen
turnighanta,
Al nichoj flankaj kaj pli junaj klinighanta, ne unu personon au objekton maltrafanta,
Sorbanta chion al mi mem kaj por chi tiu kanto.

Bovoj kiuj klakadas la jugon kaj chenon au haltas en la folia ombro, kio estas tio kion vi
esprimas en viaj okuloj?
Ghi shajnas al mi pli ol la tutaj presajhoj kiujn mi legis dum mia vivo.

Mia pashado timigas la gekrestanasojn, dum mia fora kaj tuttaga vagado,
Ili levighas kune, ili malrapide rondiras.

Mi kredas je tiuj flugilhavaj celoj,
Kaj agnoskas rughon, flavon, blankon, ludantajn interne de mi,
Kaj rigardas verdon kaj violon kaj la tufan verton intencaj,
Kaj ne nomas la testudon neinda pro tio ke ghi ne estas io alia,
Kaj la garolo en la arbaro neniam studis la gamon, tamen trilas sufiche bone lau mi,
Kaj la rigardo de la rughbruna chevalino hontigas folecon el mi.

14

La sovagha viransero kondukas sian aron tra la malvarmeta nokto,
Ja-honk li diras, kaj sonas ghin malsupren al mi kiel inviton,
La aplombuloj eble supozas ghin sensignifa, sed mi, streche auskultante,
Trovas ghian celon kaj lokon tie supre kontraŭ la vintra chielo.

La akrahufa alko de la nordo, la kato sur la domsojlo, la paruo, la prerirato,
La idaro de la gruntanta porkino dum ili tiradas che shiaj cicoj,
La elkovitaro de la meleagrino kaj shi kun siaj duonsternitaj flugiloj,
Mi vidas en ili kaj en mi mem la saman malnovan leghon.

La premo de mia piedo sur la tero fontigas cent emociojn,
Ili primokas miajn plej bonajn penojn rakonti ilin.

Mi estas enamighinta al kreskado subchiela,
Al homoj kiuj vivas inter brutoj au gustas el la oceano au arbaro,
Al la konstruistoj kaj stiristoj de ŝipoj kaj la ŝvingistoj de hakiloj kaj malegoj, kaj la
pelistoj de chevaloj,
Mi povas manghi kaj dormi kun ili semajnojn longe.

Kio estas plej komuna, plej malkara, plej proksima, plej facila estas Mi,
Mi, eniranta por provi miajn ŝancojn, elspezanta por grandaj enspezoj,
Min ornamenta por donaci min al la unua kiu prenos min,
Ne petanta la chielon malsupreniri pro mia bonvolo,
Disjhetanta ghin libere por chiam.

15

La kontraltulino kantas en la orgenejo,
La charpentisto rabotas sian tabulon, la lango de lia rabotilo fajfas sian sovaghan
suprenirantan lispon,
La geedzighintaj kaj negeedzighintaj infanoj veturas hejmen al sia Dankofesta
vespermangho,
La piloto ekkaptas la pivot-shtifton, li malsuprenigas per forta brako,
La maato staras apogita en la balen-boato, la lanco kaj harpuno estas pretaj,
La anas-pafisto iras tra silentaj kaj singardaj etendoj,

La dekanoj estas ordinataj kun krucitaj manoj che la altaro,
 La shpinistino knabino retirighas kaj antauenighas je la zumo de la granda rado,
 La bienisto haltas che la bariloj, dum li promenas che Unuataga lantado kaj rigardas la
 avenon kaj sekalon,
 La lunatiko estas fine portata al la azilo, konfirmita kazo,
 (Li ne plu dormos, kiel li dormis, en la liteto en la dormochambro de lia patrino);
 La potaga presisto kun griza kapo kaj malgrasaj makzeloj laboras che sia tip-kesto,
 Li turnas sian tabak-machajhon, dum liaj okuloj nebulighas de la manuskripto;
 La malbonformitaj membroj estas ligataj al la tablo de la kirurgo,
 Kio estas deprenita falas horore en sitelon;
 La kvarterono knabino estas vendata che la aukcia podio, la drinkulo endormighas
 kap-balance apud la drinkeja stovo,
 La mashinisto kuspe suprenfaldas siajn manikojn, la policisto iras sian kurson, la
 pordisto rimarkas kiuj pasas,
 La junulo veturigas la ekspresan charegon, (mi amas lin, kvankam mi ne konas lin);
 La duonindiano surrimenas siajn malpezajn botojn por konkuri en la konkurso,
 La okcidenta meleagro-pafado allogas maljunulojn kaj junulojn, iuj apogas sin sur siaj
 fusiloj, iuj sidas sur shtipoj,
 El la amasoj pashas la paf-lertulo, prenas sian pozicion, celumas sian fusilon;
 La aroj da jhus venintaj enmigrantoj kovras la varfon au digon,
 Dum la lan-vertuloj sarkas en la sukerkampo, la vokto rigardas ilin de sia selo,
 La klariono vokas en la balejo, la sinjoroj hastas por siaj partnerinoj, la dancantoj
 riverencas unu al la alia,
 La junulo kushas maldorme en la cedrotegmenta subtegmento kaj auskultas la muzikan
 pluvadon,
 La Michiganano starigas kaptilojn apud la rivereto kiu helpas plenigi Huronon,
 La Indianino, volvita en sia flav-orla shtofa, ofertas mokasenojn kaj bidretikulojn vende,
 La spertulo rigardas lau la ekspozicigalerio per duonfermitaj okuloj, flanke klinitaj,
 Dum la boat-helpisto fiksas la vaporboaton, la pas-tabulo estas dejhetata por la
 terenirontaj pasagheroj,
 La juna fratino eltenas la bukaron, dum la pli maljuna fratino devolvas ghin en bulon,
 kaj haltas de tempo al tempo pro la nodoj,
 La unujara edzino estas resanighanta kaj kontenta, naskinte antaŭ semajno sian unan
 infanon,
 La purhara janki-knabino laboras per sia kudromashino au en la fabriko au uzino,
 La pavimisto apogas sin sur sia du-mana ramo, la unueakirita historio de la raportisto
 hastas rapide tra la kajero, la afishopentristo literumas per blua kaj oro,
 La kanalknabo trotras sur la trenpado, la kontisto kalkulas che sia skribotablo, la shuisto
 vaksas sian fadenon,
 La kondukisto batas takton por la bando kaj chiuj muzikistoj sekvas lin,
 La infano estas baptata, la konvertito faras siajn unuajn konfesojn,
 La regatto estas sternita sur la golfo, la konkurso estas komencita (kiel la blankaj veloj
 scintilas!),
 La brutpelisto gardanta sian brutaron elkantas al tiuj kiuj volus forvagi,
 La kolportisto shvitas kun la tornistro sur la dorso (la achetanto, marchandanta pri
 restanta cendo);
 La novedzino malchifas sian blankan robon, la minutmontrilo de la horlogho movighas

malrapide,
 La opiomanghanto kushas klinite kun rigida kapo kaj jhus malfermitaj lipoj,
 La prostituitino trenadas sian shalon, shia kufo balanciĝas sur shia malstabila kaj akna kolo,
 La amaso ridas je shiaj kanajlaj sakrajhoj, la viroj mokkrias kaj palpebrumas unu al alia, (Mizerulino! Mi ne ridas je viaj sakrajhoj nek mokkrias al vi);
 La Prezidento, okazigante kabinetan konsilion, estas chirkauita de la grandaj Sekretarioj,
 Sur la placo promenas tri matronoj, dignaj kaj amikaj kun enplektitaj brakoj,
 La anaro de la fishboato pakas pli kaj pli da tavoloj da hipoglosoj en la holdon,
 La Misuriano transiras la ebenajhojn, kunportante siajn varojn kaj siajn brutojn,
 Dum la kolektisto de veturpago trairas la trajnon, li avizas per tintigado de moneroj,
 La plankistoj metas la plankon, la ladistoj ladas la tegmenton, la masonistoj voke postulas morteron,
 Defilante unuope, chiu surshultriganta sian brikportilon, pasas antauen la laboristoj;
 Sezonoj postkurantaj unu la alian, la nepriskribebla homamaso estas amasighinta, estas la kvara de Sepa-monato (kiaj salutoj de kanonoj kaj malgrandaj armiloj!),
 Sezonoj postkurantaj unu la alian, la plugmashino plugas, la falchmashino falchas, kaj vintrogreto falas en la teron;
 Malproksime sur la lagoj la ezokkaptisto observas kaj atendas apud la truon en la glaciighinta surfaco,
 La stumpoj staras dense en la senarbejo, la setlanto batas profunde per sia hakilo,
 Platboatistoj fiksas la boaton chirkau sunsubiro proksime al la kotonligno- au pekanarboj,
 Procion-serchistoj iras tra la regionoj de la Ruga Rivero au tra tiuj drenataj de la Tenesia, au tra tiuj de la Arkansasa,
 Torchoj brilas en la mallumo kiu pendas super la Chatahuchia au Altamahoa,
 Patriarkoj sidas che vespermangho kun filoj kaj nepoj kaj pranepoj chirkau si,
 En muroj el adobo, en drelikaj tendoj, ripozas chasistoj kaj kaptilistoj post sia sporto de la tago,
 La urbo dormas kaj la ruo dormas,
 La vivaj dormas por sia tempo, la mortaj dormas por sia tempo,
 La maljuna edzo dormas apud sia edzino kaj la juna edzo dormas apud sia edzino;
 Kaj chi tiuj tendencas enen al mi, kaj mi tendencas elen al ili,
 Kaj tia kia estas esti de chi tiuj, pli au malpli mi estas,
 Kaj el chi tiuj, unu kaj chiuj, mi teksas la kanton de mi mem.

16

Mi estas de maljunaj kaj de junaj, de la malsaghaj tiom kiom de la saghaj,
 Senatenta al aliaj, chiam atenta al aliaj,
 Kaj patrino kaj patra, kaj infano kaj viro,
 Plenigita per la plenigajho kiu estas malfajna, kaj plenigita per la plenigajho kiu estas fajna,
 Unu el la Nacio el multaj nacioj, la plej malgranda sama kaj la plej granda sama,
 Tiom volonte Sudulo kiom Nordulo, plantisto, senzorga kaj gastama, malproksime apud la Okonio mi loghas,
 Jankio, celanta en mia propra direkto, preta por komerco, miaj artikoj la plej supraj sur la

tero kaj la plej necedemaj sur la tero,
Kentukiano, marshanta la valon de Alkkorno en miaj cervhautaj kruringoj, Luiziano
au Georgiano,
Boatisto sur lagoj au golfoj au la marbordoj, Indianiano, Viskonsiano, Ohiano,
Hejme sur Kanadaj neghshuoj au fore en la veprejo, au kun fishkaptistoj apud
Novlando,
Hejme en la floto de glaciboatoj, velante kun la aliaj kaj boardante,
Hejme sur la montetoj de Vermonto au en la arbaroj de Majno, au la Teksasa rancho,
Kamarado de Kalifornianoj, kamarado de liberaj Nord-Okcidentanoj (amanta iliajn
grandajn proporciojn),
Kamarado de flosistoj kaj karbistoj, kamarado de chiuj kiuj manpremas kaj bonvenigas
al trinko kaj mangho,
Lernanto kun la plej naivaj, instruanto de la plej pensemaj,
Novico komencanta tamen spertinto de miriadoj da sezonoj,
De chiu koloro kaj kasto mi estas, de chiu rango kaj religio,
Bienisto, mehhanisto, artisto, ghentlemano, matroso, kvakero,
Prizonulo, putinviro, tumultulo, advokato, kuracisto, pastro.

Mi rezistas rigardi ian aferon pli bona ol mian propran diversecon,
Spiras la aeron sed lasas multe post mi,
Kaj ne estas fieracha, kaj estas en mia loko.

(La moteo kaj fish-ovoj estas en sia loko,
La helaj sunoj kiujn mi vidas kaj la malhelaj sunoj kiujn mi ne povas vidi estas en sia
loko,
La palpebla estas en sia loko kaj la nepalpebla estas en sia loko.)

17

Chi tiuj estas efektive la pensoj de chiuj homoj en chiuj epokoj kaj landoj, ili ne estas
originalaj che mi,
Se ili ne estas viaj tiom kiel miaj, ili estas nenio, au preskau nenio,
Se ili ne estas la enigmo kaj la malnodado de la enigmo, ili estas nenio,
Se ili ne estas egale tiel proksimaj kiel ili estas malproksimaj, ili estas nenio.

Chi tio estas la herbo kiu kreskas kie ajn la tero estas kaj la akvo estas,
Chi tio estas la komuna aero kiu banas la globon.

18

Kun muziko forta mi venas, kun miaj kornetoj kaj miaj tamburoj,
Mi ne ludas marshojn por akceptitaj venkintoj sole, mi ludas marshojn por venkitoj kaj
mortigitoj.

Chu vi audis ke estas bone venki en batalo?

Mi ankau diras ke estas bone fali, bataloj estas malgajnataj en la sama spirito en kiu ili estas gajnataj.

Mi batas kaj frapas por la mortaj,
Mi blovas tra miaj bushajhoj la plej laute kaj la plej gaje kiel mi povas, por ili.

Vivuojn al tiuj kiuj malsukcesis!
Kaj al tiuj kies militshipoj dronis en la maro!
Kaj al tiuj mem kiuj dronis en la maro!
Kaj al chiu generaloj kiuj malgajnis batalojn, kaj al chiu venkitaj herooj!
Kaj al la sennombraj nekonataj herooj, egalaj al la plej grandaj herooj konataj!

19

Chi tio estas la mangho egale metita, chi tio la nutrajho por la natura malsato,
Ghi estas por la malvirtaj tute same kiel la virtaj, mi provizas chiujn,
Mi ne volas ke ech unu persono estu neglektita au forrestigita,
La vivtenata kromvirino, la parazito, la shtelisto, estas chi-pere invitataj,
La pezlipa sklavo estas invitata, la venere-ulo estas invitata,
Ne estu diferenco inter ili kaj la aliaj.

Chi tio estas la premo de singhena mano, chi tio estas la shvebado kaj odoro de haroj,
Chi tio estas la tusho de miaj lipoj al viaj, chi tio la murmuro de sopirado,
Chi tio la malproksima profundo kaj alto spegulantaj mian propran vizaghon,
Chi tio la pensema enmeto de mi mem, kaj la reellaso.

Chu vi divenas ke mi havas ian komplikon celon?
Nu mi havas, char la Kvara-monataj pluvoj havas, kaj la glimo sur la flanko de roko havas.

Chi vi pensas ke mi volas mirigi?
Chu la tagolumo mirigas? chu la frua setofago kvivitadanta tra la arbaro?
Chu mi mirigas pli ol ili?

Chi tiun horon mi diras aferojn konfidence,
Mi eble ne diros al chiu ajn, sed mi diras al vi.

20

Kiu iras tie? sopiranta, kruda, mistika, nuda;
Kiel estas ke mi eltiras forton el la bovajho kiun mi manghas?

Kio do estas homo? kio estas mi? kio estas vi?

Chio kion mi markas kiel mian propran vi aldonu al ghi per via propra,
Alie vi perdus la tempon auskultante min.

Mi ne snufploras tiun snufploron tutmondan,
Ke monatoj estas vakuoj kaj la tero nur rulighkoto kaj malpurajho.

Ploretanta kaj lakeanta faldajho kun pulvoroj por invalidoj, konformeco iras al la kvara
praido,
Mi portas mian chapelon lau mia placho endome au ekstere.

Kial mi preghu? kial mi respektu kaj estu ceremonia?

Levstanguminte tra la stratumoj, analizinte ghis haro, konsilighinte kun doktoroj kaj
precize kalkulinte,
Mi trovas nenian pli dolchan grason ol tiu kiu adheras al miaj propraj ostoj.

En chiuj homoj mi vidas min mem, ne pli kaj ne je unu hordegrajno malpli,
Kaj la bonon au malbonon kiun mi diras pri mi mem mi diras pri ili.

Mi scias ke mi estas solida kaj sana,
Al mi la konverghantaj objektoj de la universo konstante fluas,
Chiu estas skribitaj al mi, kaj mi devas kompreni kion la skribo signifas.

Mi scias ke mi estas senmorta,
Mi scias ke chi tiu orbito mia ne povas esti balaata de cirkelo de charpentisto,
Mi scias ke mi ne forpasos kiel la harvolvajho de infano, tondita per bruligita stangeto en
la nokto.

Mi scias ke mi estas majesta,
Mi ne chagrenas mian spiriton pravigi sin au esti komprenata,
Mi vidas ke la elementaj leghoj neniam pardonpetas,
(Mi supozas ke mi kondutas ne pli fiere ol montras la nivelo che kiu mi metas mian
domon, malgrau chio).

Mi ekzistas tia kia mi estas, tio sufichas,
Se neniu alia en la mondo konsciu, mi sidas kontenta,
Kaj se chiu kaj chiuj konsciu, mi sidas kontenta.

Unu mondo konscias, kaj je multo la plej granda lau mi, kaj tio estas mi mem,
Kaj chu mi ricevos lau mia merito hodiau au post dek mil jaroj au dek milionoj,
Mi povas gaje preni ghin nun, au kun egala gajeco mi povas atendi.

Mia piedteno estas tenonita kaj mortezita en granito,
Mi priridas kion vi nomas dissolvigho,
Kaj mi konas la amplitudon de tempo.

Mi estas la poeto de la Korpo, kaj mi estas la poeto de la Animo,
La plezuroj de chielo estas kun mi, kaj la doloroj de infero estas kun mi,

La unuajn mi greftas kaj kreskigas sur min, chi-lastajn mi tradukas en novan lingvon.

Mi estas la poeto de la virino same kiel de la viro,
Kaj mi diras ke estas tiel granda esti virino kiel esti viro,
Kaj mi diras ke estas nenio pli granda ol la patrino de viroj.

Mi kantas la kanton de shvelado au fiero,
Ni jam sufiche satighis de ekkaurado kaj mallaudado,
Mi montras ke grandeco estas nur disvolvigho.

Chu vi preterpasis la aliajn? chu vi estas la Prezidento?
Tio estas bagatelo, ili pli ol alvenos tien chiuj, kaj ech preterpasos.

Mi estas li kiu marshas kun la tenera kaj kreskiganta nokto,
Mi vokas al la tero kaj maro duontenataj de la nokto.

Premu vin proksimen nudsina nokto – premu vin proksimen magneta, nutranta nokto!
Nokto de sudaj ventoj – nokto de la grandaj malmultaj steloj!
Silenta kapbalancanta nokto – freneza nuda somernokto.

Ridetu ho volupta friska-spira tero!
Tero de la dormantaj kaj likvaj arboj!
Tero de la foririnta sunsubiro – tero de la montoj nebulsupraj!
Tero de la vitra versho de la plena luno, iom nuancita per bluo!
Tero de brilego kaj malhelo, jaspantaj la fluon de l' rivero!
Tero de la klara grizo de nuboj, pli helaj kaj pli klaraj por mi!
Malproksimen-svingant-kubuta tero – richa pomflora tero!
Ridetu, char via amanto venas.

Malavaregulino, vi donis al mi amon – tial mi al vi donas amon!
Ho nedireblan pasian amon.

22

Vi maro! Mi rezignas min al vi ankau – mi divenas kion vi volas diri,
Mi rigardas de la plagho viajn kurbitajn invitantajn fingrojn.
Mi kredas ke vi rifuzas reiri ne palpinte min,
Ni devas kunrilati, mi senvestighas, forrapidas, ghis mi estas nevidebla de la tero,
Kusenu min mole, lulu min en onda somnolo,
Jhetvershu al mi per amora malseko, mi povas vin repagi.

Maro de sternitaj shvelegoj,
Maro spiranta vastajn kaj konvulsiajn spirojn,
Maro de la salakvo de vivo kaj de neshovelitaj tamen chiampretaj tomboj,
Hurlanto kaj shkopeganto de shtormoj, kaprica kaj delikata maro,
Mi estas integra kun vi, mi ankau estas de unu fazo kaj de chiuj fazoj.

Partoprenanto de fluso kaj malfluso mi, gloranto de malamo kaj repacigho,
Gloranto de amikoj kaj tiuj kiuj dormas en la brakoj unu de la alia.

Mi estas li atestanta simpation,
(Chu mi faru mian liston de aferoj en la domo, kaj ellasu la domon kiu subtenas ilin?)

Mi ne estas la poeto nur de boneco, mi ne malakceptas esti la poeto ankau de malboneco.

Kia elversho estas chi tio pri virto kaj pri malvirto?
Malvirto propulsas min kaj reformo de malvirto propulsas min, mi staras indiferenta,
Mia irmaniero estas nenia irmaniero de kulpiganto au malakceptanto,
Mi akvumas la radikojn de chio kio ekkreskis.

Chu vi timis ian skrofulon el la nefinighanta gravedeco?
Chu vi konjektis ke la chielaj leghoj estas ancorau prilaborendaj kaj korektendaj?

Mi trovas unu flankon ekvilibro kaj la antipodan flankon ekvilibro,
La malfirma doktrino tiel konstanta helpo kiel la firma doktrino,
Pensoj kaj faroj de la nuntempo nia vigligo kaj frua komenco.

Chi tiu minuto kiu venas al mi preter la pasintaj dekilionoj,
Estas nenio pli bona ol ghi kaj nun.

Kio funkciis bone en la pasinteco au funkcias bone hodiau ne estas tia miro,
La miro estas chiam kaj chiam kiel povas esti malica homo au nekredanto.

23

Senchesa disvolvighado de vortoj de epokoj!
Kaj la mia, vorto de la moderna, la vorto Amase.

Vorto de la kredo kiu neniam hezitas,
Nun au de nun antauen, estas al mi egale, mi akceptas Tempon absolute.

Ghi sola estas sendifekta, ghi sola chirkauas kaj kompletigas chion,
Tiu mistika, perpleksiga miro sola kompletigas chion.

Mi akceptas Realon kaj ne audacas pridemandi ghin,
Materiismon unue kaj laste sorbante.

Hura por pozitiva scienco! longe vivu ekzakta demonstrado!
Alportu sedon miksitan kun cedro kaj branchoj de lilako,
Chi tiu estas la leksikografo, chi tiu la kemiisto, chi tiu faris gramatikon de la malnovaj
kartushoj,
Chi tiuj maristoj trametis la shipon tra dangheraj nekonataj maroj.
Chi tiu estas la geologo, chi tiu laboras per la skalpelo, kaj chi tiu estas matematikisto.

Sinjoroj, al vi la unuajn honorojn chiam!
Viaj faktoj estas utilaj, kaj tamen ili ne estas mia loghejo,
Mi nur eniras per ili al regiono de mia loghejo.

Malpli la memorigajhoj pri posedajhoj registritaj miaj vortoj,
Kaj pli la memorigajhoj ili pri vivo neregistrita, kaj pri libereco kaj malimpliko,
Kaj malestimas neutrulojn kaj kastrojn, kaj favoras virojn kaj virinojn plene ekipitajn,
Kaj batas la gongon de ribelo, kaj haltas che fughantoj kaj ili kiuj komplotas kaj
konspiras.

24

Walt Whitman, kosmo, de Manhatano la filo,
Turbulenta, karna, sens-ama, manghanta, trinkanta, kaj generanta,
Nenia sentimentalisto, nenia staranto super viroj kaj virinoj au aparte de ili,
Ne pli modesta ol malmodesta.

Malshraubu la serurojn de la pordoj!
Malshraubu la pordojn mem de iliaj framflankoj!

Kiu ajn malhonoras alian malhonoras min,
Kaj kio ajn estas farita au dirita revenas fine al mi.

Tra mi la inspiro impetanta kaj impetanta, tra mi la fluo kaj indikilo.

Mi parolas la pasvorton praan, mi donas la signon de demokratio,
Per Dio! mi akceptos nenion de kio chiuj ne povu havi sian kontraupartan sur egala
bazo.

Tra mi multaj longe mutaj vochoj,
Vochoj de la senfinaj generacioj de prizonuloj kaj sklavojoj,
Vochoj de la malsanaj kaj malesperantaj kaj de shtelistoj kaj nanoj,
Vochoj de cikloj de preparado kaj alkreskado,
Kaj de la fadenoj kiuj ligas la stelojn, kaj de uteroj kaj de la patro-materialo,
Kaj de la rajtoj de ili kiujn la aliaj malamas,
De la misformitaj, bagatelaj, ordinaraj, malsaghaj, malestimataj,
Nebulo en la aero, skaraboj rulantaj bulojn da fekajho.

Tra mi malpermesitaj vochoj,
Vochoj de seksoj kaj voluptoj, vochoj vualitaj kaj mi forprenas la vualon,
Vochoj maldecaj de mi klarigitaj kaj transformitaj.

Mi ne premas la fingrojn trans la busho,
Mi restas tiel delikata apud la intesto kiel apud la kapo kaj koro,
Kopulacio estas ne pli fetora al mi ol morto.

Mi kredas je la karno kaj la apetitoj,
Vidado, audado, sentado estas mirakloj, kaj chiu parto kaj pendantajho de mi estas
miraklo.

Dia mi estas interne kaj ekstere, kaj mi sanktigas kion ajn mi tushas au de kio mi estas
tushata,
Laodoro de chi tiuj subbrakoj aromo pli fajna ol preghado,
Chi tiu kapo pli ol preghejoj, biblio, kaj chiuj kredoj.

Se mi kultos unu aferon pli ol alian, ghi estu la amplekso de mia propra korpo au iu
parto de ghi,
Diafana formo de mi, ghi estu vi!
Ombrataj kornicoj kaj apogiloj, ghi estu vi!
Firma maskla soko, ghi estu vi!
Kio ajn kontribuas al la fekundeco de mi, ghi estu vi!
Vi, mia richa sango! via lakta fluo palaj melkajhoj de mia vivo!
Brusto kiu sin premas kontrau aliaj brustoj, ghi estu vi!
Mia cerbo, ghi estu viaj kashitaj volvajhoj!
Radiko de lavita kalamo! timema galinago! nesto de shirmataj duopaj ovo! ghi estu vi!
Miksita tautita fojno de kapo, barbo, korpo, ghi estu vi!
Fluetanta suko de acero, fibroj de vireca tritiko, ghi estu vi!
Suno tiel malavara, ghi estu vi!
Humoroj lumigantaj kaj ombrantaj mian vizaghon, ghi estu vi!
Vi shvitaj rojoj kaj rosoj, ghi estu vi!
Vento kies mole tiklantaj generiloj frotas kontrau mi, ghi estu vi!
Vastaj muskolaj kampoj, branchoj de vivkverko, ama lantanto en miaj sinuantaj padoj,
ghi estu vi!
Manoj kiujn mi prenis, vizagho kiun mi kisis, mortonto kiun mi iam tushis, ghi estu vi!

Mi dorlotas min, estas tiu kvanto da mi kaj chio tiel delica,
Chiu momento, kaj kio ajn okazas, ekscitas min per ghojo,
Mi ne povas ekspliki kiel miaj maleoloj fleksighas, nek de kie la kauzo ech de mia plej
malforta deziro,
Nek la kauzo de la amikeco kiun mi eligas, nek la kauzo de la amikeco kiun mi ricevas
returne.

Ke mi supreniras mian peronon mi paugas por pripensi chu vere estu,
Matengloro che mia fenestro kontentigas min pli ol la metafiziko de libroj.

Ekvidi la tagighon!
La lumeto paligas la grandegajn kaj diafanajn ombrojn,
La aero bongustas al mia palato.

Pezajhoj de la movighanta mondo che naivaj kaprioloj, silente levighantaj, freshe
elighantaj,
Hastantaj oblikve alten kaj malalten.

Io kion mi ne povas vidi metas supren lascivajn stiftojn,
Maroj da hela suko sufuzas chielon.

La tero kunrestata de la chielo, la chiutaga fermigho de ilia kunigho,
La jhetita defio el la oriento tiun momenton super mia kapo,
La mokanta incito, Vidu do chu vi estos mastro!

25

Blindumanta kaj kolosa, kiel rapide la sunlevigho mortigus min.
Se mi ne povus nun kaj chiam sendi sunlevighon el mi.

Ni ankau supreniras, blindumantaj kaj kolosaj kiel la suno,
Ni fondas nian propran, ho mia animo, en la trankvilo kaj malvarmeto de la tagigho.

Mia vocho postkuras kion miaj okuloj ne povas atingi,
Per la kirlo de mia lango mi ampleksas mondojn kaj mondarojn.

Parolo estas la ghemelo de mia vidpovo, ghi estas manka por mezuri sin mem,
Ghi provokas min chiam, ghi diras sarkasme,
Walt, vi enhavas sufiche, kial vi ne ellasas ghin do?

Vi ne konvinkas, mi ne volas esti tantaligita, vi tro alte taksas artikulacion,
Chu vi ne scias, ho parolo, kiel la burghonoj sub vi estas falditaj?
Atendante en mallumo, protektite kontrau prujno,
La grundo retirighanta antau miaj profetaj kriegoj,
Mi subkushanta kauzojn por ilin fine ekvilibrigi,
Mia scio miaj vivaj partoj, ghi akordanta kun la signifo de chiuj aferoj,
Felicho (kiun, kiu ajn audas min, li au shi ekiru serchi chi tiun tagon).

Mian finan meriton mi rifuzas al vi, mi rifuzas meti de mi kio mi vere estas,
Ampleksu mondojn, sed neniam penu ampleksi min,
Mi repushas viajn plej viglajn kaj plej bonajn per tio ke mi simple rigardas al vi.

Skribo kaj parolo ne pravas min,
Mi portas la plenecon de pruvo kaj chion alian en mia vizagho,
Per la silento de miaj lipoj mi tute konfuzas la skeptikulon.

26

Nun mi faros nenion krom auskulti,
Por lukri kion mi audas en chi tiun kanton, por lasi sonojn kontribui al ghi.

Mi audas la bravurojn de birdoj, hastadon de kreskanta tritiko, klachon de flamoj,
klakon de shtipoj kuirantaj miajn manghojn,

Mi audas la sonon kiun mi amas, la sonon de la homa vocho,
Mi audas chiujn sonojn, kunfluantajn, kunigitajn, kunfanditajn au sinsekvantajn,
Sonojn de la urbo kaj sonojn ekster la urbo, sonojn de la tago kaj nokto,
Babilemajn junajn al tiuj kiuj shatas ilin, la lautan ridon de laboruloj che iliaj manghoj,
La koleran bason de misa amikeco, la malfortajn tonojn de la malsanaj,
La jughiston kun la manoj firme sur la tablo, kun palighintaj lipoj eldirantan
mortkondamnon,
La ruk!-ho ruk! de stivistoj malsharghantaj shipon apud la varfoj, la refrenon de la
malankrantoj,
La sonoradon de alarmsonoriloj, la krion de fajro, la zumadon de rapidflugantaj
fajrkamionoj kaj hos-charoj kun antauevertaj tintadoj kaj koloritaj lumiloj,
La vaporfajfilon, la solidan rulighadon de la trajno da alvenantaj vagonoj,
La malrapidan marshon ludatan che la antaue de la asocio marshanta duope,
(Ili iras por gardi ian kadavron, la standardosuproj estas drapiritaj per nigra muslino.)

Mi audas la violonchelon, (ghi estas la plendo de la koro de la juna viro),
Mi audas la klavan korneton, ghi englisas rapide tra miaj oreloj,
Ghi skuas freneze dolchajn ekdolorojn tra mia ventro kaj brusto.

Mi audas la hhoron, ghi estas grand-opero,
Ha chi tio ja estas muziko – chi tio taugas al mi.

Tenorulo granda kaj fresha kiel la kreitaro plenigas min,
La globa fleksigho de lia busho alvershas kaj plenigas min plena.

Mi audas la trejnitajn sopranulinon (kun shia verko, kia estas tiu chi?),
La orkestro girigas min pli vaste ol Urano flugas,
Ghi tordas tiajn ardojn el mi, mi ne sciis ke mi posedis ilin,
Ghi navigas min, mi dabas per nudaj piedoj, ili estas lekataj de la apatiaj ondoj,
Mi estas tranchita de amara kaj kolera hajlo, mi senspirighas,
Trepita meze de miela morfino, mia trahheo strangolata en mimoj de morto,
Finfine lasita relevi por senti la enigmon de l' enigmoj,
Kaj tion ni nomas Estado.

27

Esti en ia formo, kio estas tio?
(Chirkaue kaj chirkaue ni iras, ni chiuj, kaj chiam revenas tien),
Se nenio status pli evoluinte, la kvahog-pekteno en ghia malmolega shelo estus suficha.

La mia estas nenia malmolega shelo,
Mi havas tujajn konduktilojn chie sur mi, chu mi pasas au haltas,
Ili kaptas chiun objekton kaj kondukas ghin senmalutile tra mi.

Mi nur ekmovighas, premas, palpas per la fingroj, kaj mi estas ghoja,
Tushigi mian personon al tiu de iu alia estas preskau tiom kiom mi povas toleri.

Chu tio estas do tusho? tremiganta min al nova identeco,
 Flamoj kaj etero rapidantaj por miaj vejnoj,
 Danghera pinto de mi sin etendanta kaj trudanta por helpi ilin,
 Mia karno kaj sango eligantaj fulmon por frapi kio estas apenau malsama ol mi,
 Che chiuj flankoj lascivaj provokantoj rigidigantaj miajn membrojn,
 Strechantaj la vezikon de mia koro por ghia retenata gutado,
 Kondutantaj malchaste al mi, akceptantaj nenian rifuzon,
 Senigantaj min je mia plej bona kiel por celo,
 Malbutonantaj miajn vestojn, tenantaj min che la nuda talio,
 Trompantaj mian konfuzon per la trankvilo de la sunlumo kaj pashtejkampoj,
 Nepudore glitigantaj la kunsensojn for,
 Ili subachetitaj esti intershanghitaj kun tusho kaj iri pashtighi che la randoj de mi,
 Nenia komplezo, nenia zorgo por mia drenighanta forto au mia kolero,
 Veniganta la reston de la herdo chirkauen por ghui ilin kelktempe,
 Tiam chiuj unuighantaj por stari sur promontoro kaj ataki min.

La sentineloj dizertas chiun alian parton de mi,
 Ili lasis min senhelpa al rugha rabisto,
 Ili chiuj venas al la promontoro por atesti kaj asisti kontrau mi.

Mi estas fordonita de perfiduloj,
 Mi parolas senorde, mi perdis la prudenton, mi kaj neniu alia estas la plej granda
 perfidulo,
 Mi iris mem la unua al la promontoro, miaj propraj manoj portis min tien.

Vi kanajlo tusho! kion vi faras? mia spirado estas strechita en sia gorgho,
 Malkunpremi viajn hersojn, vi estas troa por mi.

Blinda ama luktanta tusho, eningigita kapuchita akradenta tusho!
 Chu vin tiel doloris min forlasi?

Disigho sekvata de alveno, chiama pagado de chiama prunto,
 Riche dushanta pluvo, kaj rekompenco pli richa poste.

Sprosoj ekghermas kaj amasighas, staras che la vojrandoj fekundaj kaj viglaj,
 Pejzaghoj projekciataj masklaj, plengrandaj kaj oraj.

Chiuj veroj atendas en chiuj aferoj,
 Ili nek hastigas sian propran naskighon nek rezistas ghin,
 Ili ne bezonas la obstetrikajn forcepson de la kirurgo,
 La malgrava estas tiel granda al mi kiel ia,

(Kio estas malpli au pli ol tusho?).

Logiko kaj predikoj neniam konvinkas,
La malseko de la nokto penetras pli profunde en mian animon.

(Nur kio pruvas sin al chiu viro kaj virino estas tia,
Nur kion neniu neas estas tia.)

Minuto kaj guto de mi ordigas mian cerbon,
Mi kredas ke la malsekaj gleboj farighos amantoj kaj lampoj,
Kaj la kompendio de kompendioj estas la karno de viro au virino,
Kaj kulmino kaj floro tie estas la sento kiun ili havas unu por la alia,
Kaj ili estas senlime branchighontaj el tiu leciono ghis ghi ighos chionfara,
Kaj ghis ili chiuuj ghojigos nin, kaj ni ilin.

31

Mi kredas ke folio de herbo estas ne malpli ol la ellaborajho de la steloj,
Kaj la formiko estas egale perfekta, kaj grajno de sablo, kaj la ovo de troglodito,
Kaj la arbobufo estas majstrajho por la plej alta,
Kaj la rampanta rubuso ornamus la salonojn de chielo,
Kaj la plej malgranda charniro en mia mano malestimigas chiujn mashinojn,
Kaj la bovino machanta kun mallevita kapo superas ian statuon,
Kaj muso estas miraklo suficha por konsterni miliardojn da nekredantoj.

Mi trovas ke mi enkorpigas gnejson, karbon, longfadenan muskon, fruktojn, grenojn,
mangheblajn radikojn,
Kaj estas stukita chie per kvarpieduloj kaj birdoj,
Kaj malproksimigis kio estas malantau mi, pro bonaj kialoj,
Sed revenigas ion denove kiam mi deziras ghin.

Vane la rapidado au evitemo,
Vane la plutonaj rokoj sendas sian kutiman varmegon kontrau mia alproksimigho,
Vane la mastodonto retirighas sub siajn proprajn pulvorighintajn ostojn,
Vane objektoj staras leugojn for kaj alprenas multoblajn formojn,
Vane la oceano surfundighanta en kavojn, kaj la grandaj monstroj kushantaj malsupre,
Vane la buteo endomigas sin per la chielo,
Vane la serpento glitas tra la rampoplantoj kaj shtipoj,
Vane la alko eniras la internajn trairejojn de la arbaro,
Vane la razil-beka auko velas fore norden al Labradoro,
Mi sekvas rapide, mi suprengrimpos al la nido en la fendo de la klifo.

32

Mi pensas ke mi povus ekloghi kun bestoj, ili estas tiel serenaj kaj sendependaj,
Mi staras kaj rigardas ilin longe kaj longe.

Ili ne shvitas kaj plendas pri sia stato,
Ili ne kushas maldorme en la mallumo kaj priploras siajn pekojn,
Ili ne nauzas min diskutante sian devon al Dio,
Ech ne unu malkontentas, ech ne unu frenezas kun la manio de posedo de ajhojn,
Ech ne unu genuighas al alia, nek al sia samspeculo kiu vivis antaŭ miloj da jaroj,
Ech ne unu estas respektinda au malfelicha tra la tuta tero.

Tiel ili montras siajn rilatojn al mi kaj mi akceptas ilin,
Ili portas al mi signojn de mi mem, ili manifestas ilin klare en sia posedo.

Mi demandas min kie ili akiras tiujn signojn,
Chu mi preterpasis tie antaŭ longegaj tempoj kaj neglekte lasis ilin fali?
Mi mem movighanta antaŭen tiam kaj nun kaj chiam,
Kolektanta kaj montranta pli multe chiam kaj kun rapideco,
Infinita kaj chiospeca, kaj la similulo de chi tiuj inter ili,
Ne tro ekskludema al la atingintoj de miaj rekonajhoj,
Selektanta chi tie unu kiun mi amas, kaj nun mi iras kun li en frata rilato.

Giganta stalono-belulo, vigla kaj reagema al miaj karesoj,
Kapo alta en la frunto, vasta inter la oreloj,
Gamboj glaceaj kaj supraj, vosto balaanta la grundon,
Okuloj plenaj de scintila petolemo, oreloj fajne chizitaj, flekseble movighantaj.

Liaj naztruoj plivastighas kiam miaj kalkanoj chirkauprenas lin,
Liaj bone konstruitaj gamboj tremas de plezuro dum ni chirkaukuregas kaj revenas.

Mi nur uzas vin dum minuto, tiam mi vin formetas, stalono,
Kial mi bezonu viajn pashojn, kiam mi mem ilin supergalopas?
Ech dum mi staras au sidas, pasante pli rapide ol vi.

33

Spaco kaj Tempo! nun mi vidas ke estas vera kion mi konjektis.
Kion mi konjektis kiam mi lantis sur la herbo,
Kion mi konjektis dum mi kushis sola en mia lito,
Kaj denove kiam mi marshis sur la plagho sub la palighantaj steloj de la mateno.

Miaj ligoj kaj balastoj forlasas min, miaj kubutoj kushas en marbrechoj,
Mi preterpasas montaregojn, miaj manplatoj kovras kontinentojn,
Mi chirkaumarshas kun mia vizio.

Apud la kvarangulaj domoj de la urbo – en shtipkabanjoj, kampadante kun arbsegistoj,
Lau la sulkoj de la pagvojo, lau la seka ravino kaj rojfundo,
Sarkanta mian cepobedon au hojanta vicojn da karotoj kaj pastinakoj, transiranta
savanojn, padanta en arbaroj,
Prospektoranta, or-fosanta, trunkzonanta la arbojn de nova acheto,
Hautbruligita ghis la maleoloj de la varmega sablo, haulanta mian boaton lau la

malprofunda rivero,
 Kie la pantero iras tien kaj reen sur supera branĉo, kie la boko sin turnas furioze al la
 chasisto,
 Kie la sonserpento sunumas sian molachan longon sur roko, kie la lutro sin nutras per
 fishoj,
 Kie la aligatoro en siaj duraj aknoj dormas apud la marĉo,
 Kie la nigra urso serĉas radikojn kaj mielon, kie la kastoro frapetas la koton per sia
 padelforma vosto;
 Super la kreskanta sukero, super la flava-flora kotono, super la rizo en ghia malalta
 malseka kampo,
 Super la akra-tegmenta biendomo, kun ghia tavolohintaj skorio kaj sveltaj shosoj el la
 gutejoj,
 Super la okcidenta persimono, super la longfolia maizo, super la delikata bluflova lino,
 Super la blanka kaj bruna fagopiro, zumanto kaj vibranto tie kun la ceteraj,
 Super la krepuska verdo de la sekalo dum ghi ondetas kaj ombras en la venteto;
 Grimpanta montojn, suprentirante min singarde, altenante per malaltaj malrektaj
 branĉoj,
 Iranta la padon eroditan en la herbo kaj tratatitan tra la foliaro de la vepro,
 Kie la koturno fajfas inter la arbaro kaj tritikejo,
 Kie la vespereto flugas en la Sepa-monata vespero, kie la granda or-skarabo
 malsuprenfalas tra la mallumo,
 Kie la roĝo eliras el sub la radikoj de l' maljuna arbo kaj fluas al la herbejo,
 Kie bovoj staras kaj forskuas mushojn per la tremada ondado de sia felo,
 Kie la stamino pendas en la kuirejo, kie moreloj staras rajde sur la kamen-slabo, kie
 araneajhoj festonfalas de la chevronoj;
 Kie la klikmarteloj bategas, kie la presilo girigas siajn cilindrojn,
 Kie ajn la homa koro batas kun teruraj doloregoj sub siaj ripoj,
 Kie la pirforma balono supre shvebas (shvebanta en ghi mi mem kaj
 malsuprenrigardanta trankvile),
 Kie la savĉaro estas tirata sur la shnurmasho, kie la varmo elkovas paleverdajn ovojn
 en la sulkita sablo,
 Kie la balenino naghos kun sia ido kaj neniam forlasas ghin,
 Kie la vaporŝipo trenas malantaŭe sian longan flagon de fumo,
 Kie la naghilo de la ŝarko tranĉas kiel nigra klingo ekster la akvo,
 Kie la duonbruligita brigo veturas sur nekonataj fluoj,
 Kie konkoj kreskas sur shia shlima ferdeko, kie la mortaj putras malsupre;
 Kie la dens-stelita standardo estas portata antaŭ la regimentoj,
 Alirante Manhatanon laŭ la longetendighanta insulo,
 Sub Niagaro, la katarakto falanta kiel vualo antaŭ mia vizagho,
 Sur pordoshtupo, sur la chevalbloko el malmola ligno ekstere,
 Sur la hipodromo, aŭ ghuanta piknikojn aŭ jhigojn aŭ bonan ludon de basbalo,
 Ĉe virfestenoj, kun kanajlaj moko, ironia licenco, bizondancoj, drinkado, ridado,
 Ĉe la cidrofabriko, gustumanta la dolĉojn de la bruna kacho, ŝuchanta la sukon tra
 shalmo,
 Ĉe pomsensheligoj, deziranta kisojn por ĉiuj rughaj fruktoj kiujn mi trovas,
 Ĉe kolektigoj, plaghfestoj, amikkunvenoj, maizsensheligadoj, domframlevoj;
 Kie la mokbirdo sonas siajn delicajn gluglojn, gakojn, kriojn, kriĉojn,

Kie la fojnostako staras en la tenejkorto, kie la sektrunketoj estas disjhetataj, kie la
 bredbovino atendas en la shedo,
 Kie la virbovo aliras por fari sian masklan taskon, kie la virchevalo al la chevalino, kie la
 virkoko kopulacias kun la kokino,
 Kie la bovidinoj pashtighas, kie la anseroj detranchadas sian nutrajhon per ektiretoj,
 Kie la sunsubiraj ombroj plilongighas tra la senlima kaj soleca prerio,
 Kie herdoj da bizonoj grade disvastighas en la kvadratajn mejlojn, malproksimajn kaj
 proksimajn,
 Kie la kolibro trembrilas, kie la kolo de la longa-viva cigno kurbas kaj sinuas,
 Kie la ridmevo preterflugas che la marbordo, kie ghi ridas sian preskau homan ridon,
 Kie abeluoj vicighas sur griza benko en la ghardeno, duonkashitaj de la altaj trudherboj,
 Kie bendkolaj perdrikoj ripozas en rondo sur la tero kun siaj kapoj ekstere,
 Kie enterigaj kaleshaj eniras la arkajn pordegojn de tombejo,
 Kie vintro-lupoj bojas meze de sovaghejoj de negho kaj pendo-glaciaj arboj,
 Kie la flavkronita ardeo venas al la rando de la marcho dum la nokto kaj sin nutras per
 malgrandaj kraboj,
 Kie la plaudado de naghantoj kaj plonghantoj friskigas la varman tagmezon,
 Kie la akrido funkciigas sian kromatan anchon sur la juglandarbo super la puto,
 Tra bedoj de cedrat-melonoj kaj kukumoj kun arghentodrataj folioj,
 Tra la sal-lekejo au oranghuja pado, au sub konusformaj abioj,
 Tra la gimnastikejo, tra la kurtenita salono, tra la oficejo au publika halo;
 Kontentigita de la indighena kaj kontentigita de la fremda, kontentigita de la nova kaj
 malnova,
 Kontentigita same de la malbela virino kiel de la bela,
 Kontentigita de la kvakerino kiam shi demetas sian kufon kaj parolas melodie,
 Kontentigita de la melodio de la hgoro de la kalkolaktita preghejo,
 Kontentigita de la seriozaj vortoj de la shvitanta Metodista predikisto, grave impresitaj
 che la kampokunveno,
 Enrigardanta che montrofenestroj de Broadvejo la tutan antautagmezon, platiganta la
 pinton de mia nazo sur la dika glaco,
 Vaganta la saman posttagmezon kun mia vizagho suprenturnita al la nuboj, au lau pado
 au plagho,
 Mia dekstra kaj maldekstra brakoj chirkau la flankoj de du amikoj, kaj mi en la mezo;
 Hejmenvenanta kun la silenta kaj malhelvanga gvidisto knabo, (malantau mi li rajdas
 che la sunsubiro),
 Malproksime de la setlejoj, studanta la spurojn de bestpiedoj, au de mokasenoj,
 Apud la lito en la hospitalo, prezentanta limonadon al febra paciento,
 Proksime de la encherka kadavro kiam tute silentas, ekzamenanta per kandelo;
 Vojaghanta en chiun havenon marchandi kaj aventuri,
 Hastanta kun la moderna homamaso, tiel avida kaj kaprica kiel iu,
 Kolerega al iu kiun mi malamas, preta en mia frenezo tranchi lin,
 Sola je noktomezo en mia malantaua korto, senpensa dum longa tempo,
 Marshanta la malnovajn montetojn de Judeo kun la bela milda Dio che mia flanko,
 Rapidanta tra spaco, rapidanta tra chielo kaj la steloj,
 Rapidanta inter la sep satelitoj kaj la vasta ringo, kaj la diametro de okdek mil mejloj,
 Rapidanta kun vostohavaj meteoroj, jhetanta fajrobulojn kiel la ceteraj,
 Portanta la krescentan idon kiu portas sian propran plenan patrinon en sia ventro,

Sturmanta, ghuanta, plananta, amanta, avertanta,
Malpleniganta kaj pleniganta velon, aperanta kaj malaperanta,
Mi tretas tage kaj nokte tiajn vojojn.

Mi vizitas la hortojn de sferoj kaj rigardas la produkton,
Kaj rigardas kvinilionojn maturighintajn kaj kvinilionojn verdajn.

Mi flugas tiujn flugojn de fluida kaj glutanta animo,
Mia kurso etendighas sub la sondoj de lodoj.

Mi prenas al mi materian kaj nematerian,
Nenia gardisto povas min elbari, nenia legho min malhelpi.

Mi ankras mian shipon nur por mallonga tempo,
Miaj mesaghistoj senchese fornavigas au portas siajn raportojn al mi.

Mi iras chasi polusajn peltojn kaj la fokon, transsaltante abismojn kun pikpinta stango,
alkrochighante al falemajhoj de frakasighemo kaj bluo.

Mi supreniras al la frontmasta hisilo,
Mi komencas mian deĵoron malfrue en la nokto en la gvatnesto,
Ni navigas la arktan maron, estas sufiche sufiche lume,
Tra la klara atmosfero ni etendighas chirkaue sur la mirinda belo,
La enormaj amasoj da glacio pasas min kaj mi pasas ilin, la pejzagho estas klara en
chiuj direktoj,
La blanka-pintaj montoj vidighas en la malproksimo, mi eljhetas miajn fantaziojn al ili,
Ni alproksimighas ian grandan batalkampon, en kiu ni estas baldau engaghontaj,
Ni pasas la kolosajn antaŭpostenojn de la tendaro, ni pasas kun silentaj piedoj kaj
singardo,
Au ni eniras per la antaŭurboj ian vastan kaj ruinigitan urbon,
La blokoj kaj falintaj arkitekturajhoj pli ol chiuj vivantaj urboj de la globo.

Mi estas libera kompano, mi bivakas apud invadaj vachfajroj,
Mi ellitigas la novedzon kaj restas mem kun la novedzinon,
Mi alpremas shin la tutan nokton al miaj femuroj kaj lipoj.

Mia vocho estas la vocho de l' edzino, la kricho che l' balustrad' de la shtuparo,
Oni alportas supren la korpon de mia edzo, gutantan kaj dronintan.

Mi komprenas la grandajn korojn de herooj,
La kuraghon de la nuntempo kaj de chiuj tempoj,
Kiel la shipestro vidis la prematan kaj senrudran vrakon de la vaporshipo, kaj Morton
pelanta ghin tien kaj reen en la shtormo,
Kiel li forte pugnigis kaj ne cedis colon, kaj estis fidela je tagoj kaj fidela je noktoj,
Kaj kretis grandlitere sur tabulo, Estu ghohaj, ni ne forlasos vin;
Kiel li sekvis post ili kaj takis post ili tri tagojn kaj ne volis rezigni,
Kiel li savis la drivantojn finfine,

Kiel la magraj lozrobaj virinoj aspektis, boatate de apud siaj novefaritaj tomboj,
Kiel la silentaj maljunvizaghaj infanoj kaj la levataj malsanuloj, kaj la akra-lipaj
nerazituloj;

Chion chi mi glutas, ghi gustas bone, ghi plachas al mi, ghi ighas mia,
Mi estas la homo, mi suferis, mi cheestis.

La disdegno kaj trankvilo de martiroj,
La patrino antikvatempa kondamnita kiel sorchistino, bruligita per seka ligno, shiaj
infanoj rigardantaj,
La chasata sklavo kiu lacighas de kurado, klinighas che la barilo, anhelante, kovrite de
shvito,
La ekdoloroj kiuj pikas kiel nadloj liajn krurojn kaj kolon, la murda kugletajho kaj la
kugloj,
Chiujn chi mi sentas au estas.

Mi estas la hundochasata sklavo, mi ekspasmas che la mordo de la hundoj,
Infero kaj malespero atakas min, krakas kaj denove krakas la lertpafistoj,
Mi krochas la relojn de la barilo, mia sango gutas, diluate de la eksudo de mia hauta,
Mi falas sur la herbojn kaj shtonojn,
La rajdantoj spronas siajn hezitajn chevalojn, alproksimighas,
Mokas miajn kapturnighajn orelojn kaj batas min fortege sur la kapo per vipteniloj.

Doloregoj estas unu el miaj vestaroj,
Mi ne demandas al la vundito kiel li sin sentas, mi mem ighas la vundito,
Miaj vundoj lividighas sur mi dum mi apogas min sur baston' kaj observas.

Mi estas la dispremita fajrbrigadisto kun rompita sternumo,
Disfalantaj muroj min tutkovris per siaj disrompajhoj,
Varmegon kaj fumon mi enspiris, mi audis la kriegojn de miaj kamaradoj,
Mi audis la malproksiman tintadon de iliaj piochoj kaj shoveliloj,
Ili jam forigis la trabojn, ili tenere forlevas min.

Mi kushas en la nokta aero en mia rugha chemizo, la ggeneralasiento estas por mi,
Sendolora malgrau chio mi kushas ellacighinta sed ne tre malkontenta,
Blankaj kaj belaj estas la vizaghoj chirkau mi, la kapoj mankas siajn fajrokaskojn,
La genuanta amaso malaperadas kun la lumo de la torchoj.

Malproksimaj kaj mortaj reanimighas,
Ili montrighas kiel la ciferplato au movighas kiel la montriloj de mi, mi mem estas la
horlogho.

Mi estas maljuna artileriisto, mi rakontas pri la bombardo de mia fuorto,
Mi estas tie denove.

Denove la longa rulado de la tamburistoj,
Denove la atakantaj kanonoj, bombokanonoj,
Denove al miaj auskultantaj oreloj la kanonoj respondaj.

Mi partoprenas, mi vidas kaj audas la tuton:
La krioj, sakroj, mugho, la aplaudoj pro bone celitaj pafoj,
La ambulanco malrapide pasanta, postlasanta sian rughan gutadon,
Laboristoj serchantaj difektojn, farantaj nemalhaveblajn riparojn,
La falo de grenadoj tra la rompita tegmento, la ventumilforma eksplodo,
La jhetigho de membroj, kapoj, shtonoj, ligno, fero, alten en la aero.

Denove gluglas la busho de mia mortanta generalo, li furioze svingas la manon,
Li anhelas tra la koagulajho Ne atentu min – atentu – la trancheojn.

34

Nun mi rakontas kion mi konis en Teksaso en mia frua juneco,
(Mi ne rakontas la falon de Alamo,
Ne unu eskapis por rakonti la falon de Alamo,
La cent kvindek estas mutaj ankoraŭ che Alamo),
Ghi estas la rakonto de la murdo senkompata de kvarcent dek du junaj viroj.

Retretante ili aranghis sin en kavan kvadraton kun sia bagagho por shirmbarilo,
Naucent vivoj el tiuj de la chirkauantaj malamikoj, nauoble ilian nombron, estis la prezo
kiun ili postulis antaue,
Ilia kolonelo estis vundita kaj ilia municio forkonsumita,
Ili traktis por honora kapitulaco, ricevis skribon kaj sigelon, fordonis siajn armilojn kaj
remarshis kiel militkaptitoj.

Ili estis la gloro de la arbaristaro,
Senegalaj kun chevalo, fusilo, kanto, vespermangho, amindumo,
Grandaj, agemaj, malavaraj, belaj, fieraj, kaj teneraj,
Barbaj, sunbrunigitaj, vestitaj en la neformala vesto de chasistoj,
Ech ne unu agha pli ol tridek jarojn.

La duan Unua-tagan matenon ili estis elkondukitaj en grupoj kaj masakritaj, estis la bela
frua somero,
La laboro komencighis chirkau la kvina kaj estis finita ghis la oka.

Neniu obeis la ordonon genui,
Iuj faris frenezajn kaj senutilajn rapidon, iuj staris forte rektaj,
Kelkaj falis tuj, trafite en la tempio au koro, la vivaj kaj mortaj kushis kune,
La kripligitaj kaj mutilitaj fosis en la grundon, la nove-venintoj vidis ilin tie,
Iuj duonmortigitaj penis forrampi,
Tiuj chi estis finmortigitaj per bajonetoj au batitaj per la kolboj de musketoj,
Junulo ech ne dek-sepjarajn agha kaptis sian murdanton, ghis du pliajn venis liberigi tiun,
La tri estis chiuj shiritaj kaj kovritaj de la sango de l' knabo.

Je la dek-unua komencighis la bruligado de la kadavroj;
Tio estas la rakonto de l' murdo de la kvarcent dek du junaj viroj.

Chi vi volonte audus pri malnovtempa marbatalo?
 Chu vi volonte sciighus kiu gajnis sub la lumo de l' luno kaj steloj?
 Auskultu la rakonton, kiel al mi ghin diris la maristo patro de mia avino.

Nia malamiko estis nenia maldiligentulo en sia shipo, mi diras al vi (li diris),
 Lia estis la malafabla Angla kuragho, kaj estas nenia pli fortika au fidinda, kaj neniam
 estis, kaj neniam estos;
 Chirkau la komenco de l' vespero li venis horore enfilante nin.

Ni kontaktis lin, la jardbrakoj implikighis, la kanonoj intertushis,
 Mia kapitano firmligis per la propraj manoj.

Ni jam ricevis kelkajn dekokfontajn kuglegojn sub la akvo,
 Sur nia malsupera pafilferdeko du grandaj kanonoj jam krevis che l' unua pafo,
 mortigante chiujn chirkaue kaj frakasante supren.

Batalado che l' sunsubiro, batalado che l' mallumo,
 La deka nokte, la plenluno tute supre, niaj likoj pliighantaj, kaj kvin futoj da akvo
 raportita,
 La chefpolicisto liberiganta la prizonulojn tenatajn en la malantaŭa holdo por doni al ili
 shancon sin savi.

La irado al kaj de la magazeno estas nun chesigita de la sentineloj,
 Ili vidas tiom da fremdaj vizaghoj ke ili ne scias kiun fidi.

Nia fregato ekbrulas,
 La alia demandas, chu ni petas indulgon?
 Chu nia flago estas mallevita kaj la batalado finita?

Nun mi kontente ridas, char mi audas la vochon de mia kapitaneto,
 Ni ne estas mallevintaj, li trankvile krias, ni jhus komencis nian parton de la batalado.

Nur tri pafiloj estas uzablaj,
 Unu estas celata de la kapitano mem kontraŭ la chefmasto de la malamiko,
 Du bone provizitaj per kugletajho kaj kanistrokugloj silentigas lian musketaron kaj
 senhomigas lian ferdekon.

La topoj solaj suplementas la pafadon de chi tiu malgranda baterio, precipe la chefa
 topo,
 Ili kuraghe eltenas dum la tuta agado.

Ech ne momenta paŭzo,
 La likoj rapide superfortas la pumpilojn, la fajro manghas vojon al la pulvomagazeno.

Unu el la pumpiloj estas jam forpafita, la komuna opinio estas ke ni dronas.

Serena staras la kapitaneto,
Li ne hastas, lia vocho estas nek lauta nek mallauta,
Liaj okuloj donas al ni pli da lumo ol niaj batallanternoj.

Chirkau la dek-dua tie en la radioj de la luno ili kapitulacas al ni.

36

Sternita kaj silenta kushas la noktomezo,
Du grandaj shipkorpoj senmovaj sur la brusto de la mallumo,
Nia shipo distruita kaj malrapide dronanta, preparoj por pasi al tiu kiun ni konkeris,
La kapitano sur la pobo malvarme donanta siajn ordonojn tra vizagho blanka kiel
littuko,
Proksime la kadavro de la knabo kiu servadis en la kajuto,
La morta vizagho de maljuna maristo kun longaj blankaj haroj kaj zorge frizita barbo,
La flamoj, malgrau chio farata, flagretantaj supre kaj malsupre,
La raukaj vochoj de la du au tri oficiroj ankoraŭ taugaj por dejhorado,
Senformaj stakoj da kadavroj kaj kadavroj solaj, pecoj da karno sur la mastoj kaj
velstangoj,
Tranchajho de shnuraro, pendajho de rigilaro, eta shokado de la kvietigo de ondoj,
Nigraj kaj senemociaj pafiloj, disrubo de pulvujoj, fortaodoro,
Kelkaj grandaj steloj supre, silente kaj morne brilantaj,
Delikataj snufoj de marventeto,odoro de kareksa herbo kaj kampoj apud la bordo,
mortmesaghoj donitaj konfide al transvivintoj,
La siblo de l' tranchilo de l' kirurgo, la ronghantaj dentoj de lia segilo,
Viz, klok, svash de defluanta sango, mallonga sovagha kricho, kaj longa, obtuza,
diminuenda ghemo,
Chi tiuj tiel, chi tiuj nerepreneblaj.

37

Vi lantermoj tie gardestarantaj! pretigu viajn armilojn!
Enen che la konkeritaj pordoj ili sin pelas! Eniris min demonoj!
Enkorpigi chiujn estajhojn, eksterlegghajn au suferantajn,
Vidi min mem en prizono kun la formo de alia viro,
Kaj senti la obtuzan neintermitantan doloron.

Pro mi la gardistoj de konviktitoj surshultrigas siajn karabenojn kaj vachadas,
Estas mi ellasata matene kaj enbarata nokte.

Ech ne unu ribelinto marshas mankatenta al prizono' sen tio ke mi estas mankatenta al li
kaj marshas apud li,

(Mi estas malplie la ghoja tie, kaj plie la silenta kun shvito sur miaj tikantaj lipoj).

Chiam kiam unu junulo estas prenita pro shtelo, mi ankau prezentas min kaj estas jughata kaj kondamnata.

Chiam kiam unu hholera paciento kushas tuj mortonta, mi ankau kushas tuj mortonta, Mia vizagho estas cindrokolora, miaj tendonoj tordighas, de mi homoj forkuras.

Petantoj sin enkorpigas en mi kaj mi estas enkorpigita en ili,
Mi etendas la chapelon, sidas hontmiena, kaj almozas.

38

Sufiche! sufiche! sufiche!

Iel mi jhus estis frapita. Dorsen!

Donu al mi iom da tempo preter mia frapita kapo, dormoj, songhoj, gapado,
Mi ekrimarkas min tuj faronta kutiman eraron.

Ke mi povus forgesi la mokantojn kaj insultojn!
Ke mi povus forgesi la fluantajn larmojn kaj la batojn de la klaboroj kaj marteloj!
Ke mi povus rigardi per aparta rigardo mian propran krucumadon kaj sangan kronadon.

Mi memoras nun.

Mi rekomencas la superombritan frakcion,
La tombo el roko multobligas kio estis konfidita al ghi, au al iaj tomboj,
Kadavroj levighas, tranchvundoj resanighas, fiksiloj rulighas de mi.

Mi antauenmarshas replenigita per superega potenco, unu el ordinara senfina procesio,
Landinternen kaj marborden ni iras, kaj pasas chiujn limliniojn,
Niaj rapidaj vicoj survoje tra la tuta tero,
La floroj kiujn ni portas en niaj chapeloj, la kreskajho de miloj da jaroj.

Lernantoj, mi vin salutas! antauenvenu!
Daurigu viajn prinotadojn, daurigu viajn demandadojn.

39

La afabla kaj fluanta sovaghulo, kiu li estas?
Chu li atendas civilizon, au estas preter ghi kaj primajstrinta ghin?

Chu li estas iu Sud-okcidentulo edukita subchiele? chu li estas Kanadano?
Chu li estas el la Misisipa lando? Iovao, Oregono, Kalifornio?
La montoj? prerivivo, veprevivo? au maristo de la maro?

Kien ajn li iras, viroj kaj virinoj akceptas kaj deziras lin,
Ili deziras ke li amu ilin, tushu ilin, parolu al ili, restu kun ili.

Konduto senlegha kiel neghflokoj, vortoj simplaj kiel herbo, nekombita kapo, ridado, kaj
naiveco,
Malrapide pashantaj piedoj, ordinara vizagho, ordinaraj modoj kaj emanajhoj,
Ili malsupreniras en novaj formoj de la pintoj de liaj fingroj,
Ili disblovigas kun la odoro de lia korpo au spiro, ili flugas el la rigardo de liaj okuloj.

40

Parado de la sunbrilo, mi ne bezonas vian lumadon – forrestu!
Vi lumas sole surfacojn, mi trafas surfacojn kaj profundojn ankaŭ.

Tero! vi shajnas atendi ion de miaj manoj,
Diru, malnova suprotufo, kion vi volas?

Viro au virino, mi eble dirus al vi kiel vi al mi plachas, sed ne povas,
Kaj eble dirus kio estas en mi kaj kio estas en vi, sed ne povas,
Kaj eble dirus pri la sopirado kiun mi havas, tiu pulso de miaj noktoj kaj tagoj.

Jen, mi ne donas prelegojn au iom da almozo,
Kiam mi donas, mi donas min mem.

Vi tie, senpotenca, malfortika en la genuoj,
Malfermu viajn artikitajn makzelojn, ghis mi blovu kuraghon en vin,
Larghigu la manplatojn kaj levu la klapojn de viaj poshoj,
Mi ne estas fornegebla, mi devigas, mi havas stokojn sufichajn kaj ekstrajn,
Kaj ajnan aferon kiun mi havas mi donacas.

Mi ne demandas kiu vi estas, tio ne estas grava por mi,
Vi povas fari nenion kaj esti nenion sed tamen mi chirkaubrakos vin.

Al la kotonkampa servutulo au purigisto de necesejoj mi klinas min,
Sur lia dekstra vango mi metas kison de parenco,
Kaj en mia animo mi jhuras ke mi neniam fornegos lin.

Che virinoj taugaj por gravedigho mi komencas pli grandajn kaj pli viglajn bebojn,
(Chi tiun tagon mi shprucigas la materialon de multe pli arogantaj respublikoj).

Al iu mortanta, tien mi rapidas kaj turnas la anson de la pordo,
Kuspas la kovrilojn al la piedo de la lito,
Lasas hejmeniri la kuraciston kaj pastron.

Mi kaptas la malsupreniranton kaj lin levas kun nerezistebla volo,
Ho malesperanto, jen mia kolo,
Je Dio, vi ne iros malsupren! pendigu sur mi vian tutan pezon.

Mi dilatas vin per grandega spiro, mi flosigas vin,

Chiun chambron de la domo mi plenigas per armita forto,
Amantoj de mi, malhelpantoj de tomboj.

Dormu – mi kaj ili gardestaras la tutan nokton,
Nek malsekuro nek morto audacos meti fingron sur vin,
Mi chirkaubrakis vin, kaj de tiam vin posedas al mi,
Kaj kiam vi levighos matene, vi trovos ke kion mi diras al vi estas tiel.

41

Mi estas tiu alportanta helpon por la malsanaj dum ili anhelas sur la dorso,
Kaj por fortaj justaj homoj mi alportas eĉ pli da bezonata helpo.
Mi audis kio estis dirita pri la universo,
Audis ghin kaj audis ghin pri kelkaj miloj da jaroj;
Ghi estas mezbona tiom kiom ghi rilatas – sed ĉu tio estas la tuto?

Grandigante kaj aplikante venas mi,
Pliproponante ĉe la komenco la malnovajn singardajn komercantojn,
Prenante mem la ekzaktajn dimensiojn de Jehovo,
Litografante Kronon, Zeuson, lian filon, kaj Herkulon, lian nepon,
Achetante desegnajhojn de Oziriso, Izisa, Belo, Bramo, Budho,
En mia teko lokante Manituon malfiksa, Alahon sur folio, la krucifikson gravurita,
Kun Odino kaj la malbelegvizagha Meksitlio kaj ĉiu idolo kaj bildo,
Prenante ilin ĉiujn por kion ili valoras kaj ne cendo pli,
Agnoskante ke ili vivis kaj faris la laboron de siaj tempoj,
(Ili alportis pecetojn kiel por neplumizitaj birdoj, kiuj nun devas levighi kaj flugi kaj
kanti proprapene),
Akceptante la krudajn diajn skizojn kompletigi pli bone en mi mem, donacante ilin
libere al ĉiu viro au virino kiun mi vidas,
Eltrovante tiom au pli en charpentisto charpentanta domon,
Metante pli altajn pretendojn por li tie kun siaj kuspitaj manikoj pelanta la maleon kaj
chizilon,
Ne objhetante al specialaj revelacioj, rigardante fumobuklon au haron sur la dorso de
mia mano ghuste tiel kurioza kiel ia revelacio,
Junuloj krochantaj fajrokamionojn kaj shnuregojn de hok-kaj-shtupetaraj veturiloj ne
malpli al mi ol la dioj de la antikvaj militoj,
Atentante la sonoradon de iliaj voĉoj tra la krasho de detruo,
Iliaj muskolaj membroj pasantaj sekuraj super braghigitaj latoj, iliaj blankaj fruntoj sanaj
kaj sendifektaj el la flamoj;
Apud la edzino de la mehhanisto kun sia bebo ĉe la cico, propetante pro ĉiu homo
naskita,
Tri falchiloj ĉe rikolto, siblantaj en vico de tri fortegaj angheloj kun chemizoj pufighintaj
ĉe la talio,
La malrektdenta mastro kun rughaj haroj elachetanta pekojn pasintajn kaj estontajn,
Vendanta ĉion kion li posedas, vojaghanta piede pagi advokatojn por sia frato kaj sidi
apud li dum li estas jughata pri falsado;
Kio estis disshutita plej vaste surshutanta la grandan kvadraton chirkau mi, kaj ne

plenigante la kvadraton tiam,
La bovo kaj la skarabo neniam kultataj ech duone sufiche,
Fekajho kaj grundo pli admirindaj ol estis atendate,
La supernatura de nenia graveco, mi mem atendanta ghis mi estos unu el la
plejsuperuloj,
La tago sin pretiganta por mi kiam mi faros tiom da bono kiel la plej bonaj kaj estos tiom
miriga;
Per miaj vivbuloj! farighanta jam kreanto,
Almetanta min tie chi kaj nun al la embuskigita utero de la ombroj.

42

Voko meze de la homamaso,
Mia propra vocho, sonora, ampleksa, kaj fina.

Venu miaj infanoj,
Venu miaj knaboj kaj knabinoj, miaj virinoj, domanoj kaj intimuloj,
Nun la ludisto lanchas sian audacon, li jam preterpasis sian preludon sur la anchoj
internaj.

Facile skribitaj liberfingraj akordoj – mi sentas la vibron de via klimakso kaj ekcheso.

Mia kapo chirkaupivotas sur mia kolo,
Muziko fluas, sed ne de la orgeno,
Homoj estas chirkau mi, sed domanoj miaj ili ne estas.

Chiam la malmola nesinkinta grundo,
Chiam la manghantoj kaj trinkantoj, chiam la suprena kaj malsuprena suno, chiam la
aero kaj la senchesaj tajdoj,
Chiam mi mem kaj miaj najbaroj, refreshigantaj, petolaj, realaj,
Chiam la malnova neeksplikebla demando, chiam tiu dorna dikfingro, tiu spiro de jukoj
kaj soifoj,
Chiam la hu! hu! de l' chagrenisto ghis ni trovas kie la ruzulo sin kashas kaj eligas lin,
Chiam amo, chiam la ploranta likvajho de vivo,
Chiam la bandagho sub la mentono, chiam la truspontoj de morto.

Tie kaj tie kun dekcendoj sur la okuloj marshantaj,
Por nutri la avidon de la ventro la cerboj libere kulerantaj,
Biletojn aĉetantaj, prenantaj, vendantaj, sed al la festo neniam irantaj,
Multaj shvitantaj, plugantaj, drashantaj, kaj tiam page la branon ricevantaj,
Malmultaj senpene posedantaj, kaj ili la tritikon senchese depostulantaj.

Chi tio estas la urbo kaj mi estas unu el la civitanoj,
Kio ajn interesas la ceteron interesas min, politiko, militoj, merkatoj, jhurnaloj, lernejoj,
La urbestro kaj konsilioj, bankoj, tarifoj, vaporshipoj, fabrikoj, akcioj, butikoj, terenajhoj,
kaj personaj posedajhoj.

La malgrandaj abundaj hometoj chirkausaltetantaj en kolumoj kaj baskaj manteloj,
Mi konscias kiuj ili estas (ili estas certe ne vermoj au puloj),
Mi agnoskas la duplikatojn de mi mem, la plej malforta kaj malprofunda estas senmorta
kun mi,
Kion mi faras kaj diras, la samo atendas ilin,
Chiu penso kiu baraktas en mi, la sama baraktas en ili.

Mi konas perfekte bone mian propran egoismon,
Mi konas miajn chiomanghajn liniojn kaj ne devas skribi iom malpli,
Kaj volus alporti vin, kiu ajn vi estas, ghuste tien kie mi staras.

Ne vortoj de rutino chi tiu kanto mia,
Sed abrupte pridemandi, pretersalti sed pli proksimen alporti;
Chi tiu presita kaj bindita libro – sed la presisto kaj preseja knabo?
La bone faritaj fotografajhoj – sed via edzino au amiko proksima kaj firma en viaj brakoj?
La nigra shipo kirasita per fero, shiaj potencaj pafiloj en shiaj turetoj – sed la kuragho de
la kapitano kaj mashinistoj?
En la domoj la teleroj kaj manghoj kaj mebloj – sed la gegastigantoj, kaj la rigardo el iliaj
okuloj?
La chielo tie supre – tamen chi tie au apude au trans la vojo?
La sanktuloj kaj saghuloj en historio – sed vi mem?
Predikoj, kredoj, teologio – sed la nekomprenebla homa cerbo;
Kaj kio estas racio? kaj kio estas amo? kaj kio estas vivo?

43

Mi ne malestimas vin pastrojn, je chiu tempo, chie en la mondo,
Mia kredo estas la plej granda el la kredoj kaj la plej eta el la kredoj,
Enfermanta kulton antikvan kaj modernan kaj chian inter antikva kaj moderna,
Kredanta ke mi revenos sur la tero post kvin mil jaroj,
Atendanta respondojn de orakoloj, honoranta la diojn, salutanta la sunon,
Faranta fetichon el la unua roko au stumpo, sorchanta per bastonoj en cirklo de
talismanoj,
Helpanta lamaon au bramanon, dum li stucas la lampojn de la idoloj,
Dancanta ancorau tra la stratoj en falusa procesio, ravita kaj austera en la arbaro, asketo
hindua,
Drinkanta medon el la krani-taso, admiranta al Shastroj kaj Vedoj, atentanta la Koranon,
Marshanta en la Aztekaj temploj, makulita de sango de la shtono kaj tranchilo, batanta la
serpenthautan tamburon,
Akceptanta la Evangeliojn, akceptanta lin kiu estis krucumita, scianta certe ke li estas
dia,
Je la meso genuanta au je la pregho de la puritano levighanta, au sidanta pacience sur
pregheja benko,
Deklamanta kaj shaumanta en mia freneza krizo, au atendanta mortece, ghis mia spirito
vekos min,
Rigardanta al pavimo kaj tero, au al ekster pavimo kaj tero,
Apartenanta al la strechistoj de la rondiro de la rondiroj.

Unu el tiu centripeta kaj centrifuga bando mi turnighas kaj parolas kiel viro lasanta taskojn antaŭ vojaĝo.

Malgajaj malkredantoj malspritaĵoj kaj elfermitaĵoj,
Frivolaj, mornaĵoj, pautantaĵoj, koleraĵoj, tushitaĵoj, senkuragaĵoj, ateismaĵoj,
Mi konas ĉiun el vi, mi konas la maron da turmento, dubo, malespero, kaj malkredo.

Kiel la balenaj plaudiloj plaudas!
Kiel ili distordas rapide kiel fulmo, kun spasmoj kaj ŝprucoj de sango!

Estu trankvilaj, sangaj plaudiloj de dubantoj kaj mornaĵoj pautantoj,
Mi envicigas min inter vi tiom kiom inter iuj,
La pasinteco estas la pusho de vi, mi, ĉiuj, precize same,
Kaj kio estas ankoraŭ neprovita kaj posta estas por vi, mi, ĉiuj, precize sama.

Mi ne scias kio estas neprovita kaj posta,
Sed mi scias ke ĝi siavice montrighos suficha, kaj ne povas malsukcesi.

Ĉiu kiu pasas estas konsiderata, ĉiu kiu haltas estas konsiderata, eĉ ne al unu ĝi povas malsukcesi.

Ĝi ne povas malsukcesi al la juna viro kiu mortis kaj estis entombigita,
Nek al la juna virino kiu mortis kaj estis metita apud li,
Nek al la malgranda infano kiu engvatis ĉe la pordo, kaj tiam retirighis kaj estis neniam revidita,
Nek al la maljunulo kiu vivis sen celo, kaj sentas tion kun amareco pli forta ol galo,
Nek al li en la malrichulejo tubereta pro rumo kaj la malbona malsano,
Nek al la sennombraj masakritaĵoj kaj frakasitaĵoj, nek al la brutaj kobuoj, nomata la ekskremento de homaro,
Nek al la sakoj nur flosantaĵoj kun malfermitaĵoj bushoj, por ke manghaĵo englitu,
Nek al iu afero en la tero, aŭ malsupre en la plej malnovaj tomboj de la tero,
Nek al iu afero en la miriadoj da sferoj, nek al la miriadoj da miriadoj kiuj loghas en ili,
Nek al la nuntempo, nek al la plej eta ereto konata.

44

Estas tempo min klarigi – ni starighu.

Kio estas konata mi forshiras,
Mi lanchas ĉiujn virojn kaj virinojn antaŭen kun mi en la Nekonatan.

La horlogho indikas la momenton – sed kion eterno indikas?

Ni ĝhis nun jam elĉerpis duilionojn da vintroj kaj someroj,
Estas duilionoj antaŭen, kaj duilionoj antaŭen de ili.

Naskoj alportis al ni richecon kaj diversecon,
Kaj aliaj naskoj alportos al ni richecon kaj diversecon.

Mi ne nomas unu pli granda kaj unu pli malgranda,
Kio taugas por sia epoko kaj loko egalas ajnan.

Chu homaro estis murdaj au enviaj al vi, mia frato, mia fratino?
Mi kompatas vin, ili ne estas murdaj au enviaj al mi,
Chio estis milda al mi, mi tenas nenian konton kun lamentadoj,
(Kiel min koncernas lamentado?)

Mi estas akmeo de aferoj plenumitaj, kaj mi entenanto de aferoj estontaj.

Miaj piedoj trafas kulminon de la kulminoj de la shtupoj,
Sur chiu shtupo epokaroj, kaj pli grandaj aroj inter la shtupoj,
Chio malsupre tauge vojaghita, kaj tamen mi supreniras kaj supreniras.

Supreniro post supreniro riverencas la fantomoj malantau mi,
Malproksime malsupre mi vidas la grandegan unuan Nenion, mi scias ke mi estis ech
tie,

Mi atendis nevidata kaj chiama, kaj tradormis la letargian nebulon,
Kaj ne hastis, kaj ne difektighis de la fetora karbono.

Longe mi estis chirkaupremata strikte – longe kaj longe.

Enormaj estis la preparoj por mi,
Fidelaj kaj amikaj la brakoj kiuj helpis min.

Cikloj pramis mian lulilon, ramante kaj ramante kiel gajaj boatistoj,
Pro spaco al mi steloj tenis sin aparte en siaj propraj ringoj,
Ili sendis influojn por prizorgi kio estis tenonta min.

Antau ol mi estis naskita el mia patrino, generacioj gvidis min,
Mia embrio neniam estis torpora, nenio povis ghin superkushi.

Pro ghi la nebulozo koheris en astron,
La longaj malrapidaj stratumoj amasighis kiel apogo por ghi,
Vastaj legomoj donis al ghi nutrajhon,
Monstraj sauroidoj transportis ghin en sia busho kaj demetis ghin zorge.

Chiu fortotoj estis senchese utiligataj kompletigi kaj delekti min,
Nun sur chi tiu loko mi staras kun mia fortika animo.

Ho dauro de juneco! chiam pushata elasteco!
Ho vireco, ekvilibra, rughvanga, kaj plena.

Miaj amantoj sufokas min,
Premante al miaj lipoj, densaj en la poroj de mia hauto,
Shancelante min tra la stratoj kaj publikaj haloj, venante nudaj al mi en la nokto,
Kriante tage Ho hoj! de la rokoj de la rivero, svingighante kaj kvivitantaj super mia
kapo,
Vokante mian nomon de florbedoj, grimpoplantoj, implikitaj subkreskajhoj,
Surterighante sur chiun momenton de mia vivo,
Kisante mian korpon per molaj balzamaj kisoj,
Senbrue pasigante plenmanojn el siaj koroj kaj donante ilin ke ili estu miaj.

Maljuneco superbe levighanta! Ho bonvena neesprimebla gracio de tagoj de mortigho!

Chiu stato disvastigas ne nur sin mem, ghi disvastigas kio kreskas poste kaj el ghi,
Kaj la malhela silento disvastigas tiom kiom io.

Mi malfermas mian lukon nokte kaj vidas la malproksimen-aspergitajn sistemojn,
Kaj chio kion mi vidas multiplikita per tiom kiom mi povas kalkuli tushas nur la randon
de la pli malproksimaj sistemoj.

Pli vasten kaj pli vasten ili disvastighas, ekspansiante, chiam ekspansiante,
Eksteren kaj eksteren kaj chiam eksteren.

Mia suno havas sian sunon kaj chirkau li obeeme rondiras,
Tiu anighas kun siaj kunuloj en grupon de supera rondiro,
Kaj pli grandaj aroj sekvas, farante eretoj la plej grandajn en si.

Estas nenia halto kaj neniam povas esti halto,
Se mi, vi, kaj la mondoj, kaj chio sub au sur iliaj surfacoj estus chi tiun momenton reen
reduktitaj al pala flosajho, tio ne sukcesus finfine,
Ni certe revenus kie ni nun staras,
Kaj certe irus tiom pli malproksimen, kaj tiam pli kaj pli malproksimen.

Kelkaj duiliardoj da epokoj, kelkaj kvariliardoj da kubleugoj ne endangherigas la
larghon au malpaciencigas ghin,
Ili estas nur partoj, io estas nur parto.

Vidu treege malproksimen, estas senlima spaco ekster tio,
Kalkulu treege multe, estas senlima tempo chirkau tio.

Mia rendevuo estas starigita, ghi estas certa,
La Sinjoro estos tie kaj atendos ghis mi venos lau perfektaj kondicho,
La granda Kamarado, la amanto fidela kiun mi sopiras estos tie.

Mi scias, ke mi havas la plej bonan de tempo kaj spaco, kaj mi neniam estis mezurata kaj

neniam estos mezurata.

Mi pashadas eternan vojaghon, (venu auskulti chiuj!),
Miaj signoj estas pluv-imuna mantelo, bonaj shuoj, kaj bastono tondita el la arbaro,
Nenia amiko mia ripozas en mia segħo,
Mi havas nenian katedron, nenian eklezion, nenian filozofion,
Mi kondukas nenian homon al manghotablo, biblioteko, borso,
Sed chiun viron kaj chiun virinon el vi mi kondukas sur teraltajhon,
Mia maldekstra mano vin tenanta chirkau la talio,
Mia dekstra mano montranta al pejzagħoj de kontinentoj kaj la publika vojo.

Ne mi, ne iu alia povas vojagħi tiun vojon por vi,
Vi devas vojagħi ghin por vi mem.

Għi ne estas malproksima, għi estas atingebla,
Eble vi estas sur għi de post kiam vi estis naskita kaj ne sciis,
Eble għi estas chie sur akvo kaj sur sektero.
Shultru viajn vestojn kara filo, kaj mi shultros miajn, kaj ni hastu for,
Mirindajn urbojn kaj liberajn naciojn ni havigos al ni dum ni iras.

Se vi lacighos, donu al mi ambau shargħojn kaj apogu la platon de via mano sur mia
kokso,
Kaj siatempe vi repagos la saman servon al mi,
Char post kiam ni komencos, ni neniam ree foriros de l' vojo.

Chi tiun tagon antau la tagigho mi supreniris deklivon kaj rigardis la dense logħatan
chielon,
Kaj mi diris al mia spirito Kiam ni ighos chirkauprenintoj de tiuj sferoj kaj de la plezuro
kaj scio de chiu afero en ili, chu ni estos tiam plenigitaj kaj kontentigitaj?
Kaj mia spirito diris Ne, ni nur atingas tiun nivelon por pasi kaj daurigi preteren.

Vi ankau metas al mi demandojn kaj mi audas vin,
Mi respondas ke mi ne povas respondi, vi devas eltrovi per vi mem.

Sidu tempeton, kara filo,
Jen biskvitoj por mangħi kaj jen lakto por trinki,
Sed tuj post kiam vi dormis kaj renovigis vin en freshaj vestoj, mi kisos vin per adiaua
kiso kaj malfermos la pordon por via eliro de tie chi.

Sufiche longe vi songhis malestimindajn songħojn,
Nun mi lavas la gumon for de viaj okuloj,
Vi devas alkitimigi vin al la helego de la lumo kaj de chiu momento de via vivo.

Longe vi timeme vadis, tenante tabulon che la bordo,
Nun mi pervolas vin esti audaca naghanto,
Desalti meze de la maro, relevighi, kapjesi al mi, krii, kaj ride skui la harojn.

Mi estas la instruisto de atletoj,
 Li kiu apud mi etendas pli larghan bruston ol mia propra pravas la larghon de mia
 propra,
 Li pleje honoras mian stilon kiu lernas sub ghi detruo la instruiston.

La knabo kiun mi amas, tiu sama ighas viro ne per derivita potenco, sed per si mem,
 Malvirta prefere ol virta pro konformo au timo,
 Shatanta sian amatinon, ghuanta bone sian stekon,
 Ne redonita amo au malrespekto tranchanta lin pli forte ol la akra shtalo tranchas,
 Unuaranga por rajdi, batali, trafi la celpunkton, navigi velboaton, kanti kanton au ludi la
 banghon,
 Preferanta cikatrojn kaj la barbon kaj vizaghojn variolmarkitajn ol chiujn sapumantojn,
 Kaj tiujn tute sunbrunigitajn ol tiujn kiuj evitas la sunon.

Mi instruas forvagon de mi, tamen kiu povas forvagi de mi?
 Mi sekvos vin, kiu ajn vi estas, de la nuna horo,
 Miaj vortoj jukigas che viaj oreloj ghis vi komprenos ilin.

Mi ne diras chi tiujn aferojn por dolaro au por pasigi la tempon dum mi atendas boaton,
 (Estas vi parolanta ghuste tiom kiel mi, mi agas kiel la lango de vi,
 Ligite en via busho, en la mia ghi komencas malfiksighi).

Mi jhuras ke mi neniam ree mencios amon au morton interne de domo,
 Kaj mi jhuras ke mi neniam ajn tradukos min krom al li au shi kiu private restas kun mi
 sub la chielo.

Se vi volus kompreni min, iru al la altajhoj au marbordo,
 La plej proksima kulo estas klarigo, kaj guto au movo de ondoj shlosilo,
 La maleo, la remilo, la segilo subtenas miajn vortojn.

Nenia shutrizita chambro au lernejo povas komuniighi kun mi,
 Sed primitivuloj kaj malgrandaj infanoj pli bone ol ili.

La juna mehhanisto estas plej proksima al mi, li konas min bone,
 La arbohakisto kiu kunportas sian hakilon kaj vazon kun si kunportos min kun si la
 tutan tagon,
 La bienisto junulo, pluganta en la kampo, sin sentas bone je la sono de mia vocho,
 En shipoj kiuj veladas, miaj vortoj veladas, mi iras kun fishkaptistoj kaj maristoj kaj amas
 ilin.

La soldato kampadanta au marshadanta estas mia,
 En la nokto antau la okazonta batalo multaj serchas min, kaj mi ne mankas al ili,
 En tiu solena nokto (ghi povas esti ilia lasta) tiuj kiuj konas min serchas min.

Mia vizagho frotas al la vizagho de la chasisto kiam li kushighas sola en sia kovrilo,

La veturigisto, pensante pri mi, ne atentis la skuon de sia charego,
La juna patrino kaj maljuna patrino komprenas min,
La knabino kaj la edzino chesigas la kudrilon momenton kaj forgesas kie ili estas,
Ili kaj chiu volus rememori kion mi jam diris al ili.

48

Mi jam diris ke la animo estas ne pli ol la korpo,
Kaj mi jam diris ke la korpo estas ne pli ol la animo,
Kaj nenio, ne Dio, estas pli grava al oni ol la memo estas,
Kaj kiu ajn marshas dekonmejlon sen miro, marshas al sia propra enterigo vestite en sia
mortotuko,
Kaj mi au vi sen ech dekcendo en la posho povas acheti la plejbonajhojn de la tero,
Kaj ekrigardi per okulo au montri fabon en ghia gusho konsternigas la klerecon de chiu
epokoj,
Kaj estas nenia metio au ofico sen ke la junulo entreprenanta ghin povu igi heroo,
Kaj estas nenia objekto tiel mola ke ghi ne farighas nabo por la rado de l' universo,
Kaj mi diras al iu viro au virino, Via animo staru aplomba kaj trankvila antaŭ miliono
da universoj.

Kaj mi diras al homaro, Ne estu scivolaj pri Dio,
Char mi, kiu estas scivola pri chiu, ne estas scivola pri Dio,
(Nenia terminaro povas diri kion mi estas trankvila pri Dio kaj pri morto).

Mi audas kaj vidas Dion en chiu objekto, sed komprenas Dion ne ech iomete,
Nek komprenas kiu povas esti pli mirinda ol mi mem.

Kial mi deziru vidi Dion pli bone ol che chi tiu tago?
Mi vidas ion de Dio chiun horon de la dudek kvar, kaj tiam chiun momenton,
En la vizaghoj de viroj kaj virinoj mi vidas Dion, kaj en mia propra vizagho en la
spegulo,
Mi trovas leterojn de Dio faligitajn en la strato, kaj chiu estas subskribita per la nomo de
Dio,
Kaj mi lasas ilin tie kie ili estas, char mi scias ke kien ajn mi iros,
Aliaj akurate venos por chiam kaj chiam.

49

Kiel koncernas vin, Morto, kaj vin, amara chirkaubrako de mortonteco, estas senutile
provi timigi min.

Al sia laboro sen ekretirigo la akushisto venas,
Mi vidas la maljunul-manon premanta ricevanta subportanta,
Mi kushas apud la sojloj de la ekskvizitaj flekseblaj pordoj,
Kaj rimarkas la eliron kaj rimarkas la ellason kaj eskapon.

Kaj koncerne vin, Kadavro, mi pensas ke vi estas bona sterko, sed tio ne ofendas min,
Mi flaras la blankajn rozojn, dolchodorajn kaj kreskantajn,
Mi etendas la manojn al la foliaj lipoj, mi etendas la manojn al la poluritaj mamoj de
melonoj.

Kaj koncerne vin, Vivo, mi rigardas vin la restajhoj de multaj mortoj,
(Sendube mi mortis mem dekmil fojojn antaue).

Mi audas vin flustrantaj tie, ho steloj de chielo,
Ho sunoj—ho herbo de tomboj—ho chiamaj transiroj kaj antauenmovoj,
Se vi ne diras ion, kiel mi povu diri ion?

De la malklara lageto kiu kushas en la autuna arbaro,
De la luno kiu malsupreniras la altajhojn de la suspiranta krepusko,
Jhetighu, scintiloj de tagigho kaj malheligho—jhetighu sur la nigrajn tigojn kiuj putras
en la koto,
Jhetighu al la ghemanta babilacho de la sekaj branchoj.

Mi supreniras de la luno, mi supreniras de la nokto,
Mi perceptas ke la makabra glimado estas tagmezaj sunradioj spegulataj,
Kaj eliras al la stabilaj kaj centraj de la idoj grandaj au malgrandaj.

50

Estas tio en mi—Mi ne scias kio ghi estas—sed mi scias ke ghi estas en mi.

Tordita kaj shvita—trankvila kaj malvarmeta tiam ighas mia korpo,
Mi dormas—mi dormas longe.

Mi ne konas ghin—ghi estas sennoma—ghi estas vorto nedirita,
Ghi ne estas en ia vortaro, eldiro, simbolo.

Sur io ghi svingighas, pli ol la tero sur kiu mi svingighas,
Al ghi la kreitajho estas la amiko kies chirkaubrako vekas min.

Eble mi povus diri pli. Skizoj! Mi petegas pro miaj fratoj kaj fratinoj.

Chu vi vidas, ho miaj fratoj kaj fratinoj?
Ghi ne estas hhaoso au morto—ghi estas formo, unuigho, plano—ghi estas eterna vivo—
ghi estas Felicho.

51

La pasinteco kaj nuntempo velkas—mi plenigis ilin, malplenigis ilin,
Kaj procedas plenigi mian sekvantan porcion de l' estonteco.

Auskultanto tie supre! kion vi havas por konfidi al mi?

Rigardu mian vizaghon dum mi snufas la flanketon de l' vespero,
(Parolu honeste, neni alia audas vin, kaj mi restos nur minuton pli longe).

Chu mi kontraudiras min?
Bone do mi kontraudiras min,
(Mi estas vasta, mi enhavas multegojn).

Mi direktas min al tiuj kiuj estas proksimaj, mi atendas sur la pordoshtupo.

Kiu jam faris sian tagan taskon? kiu plej frue finmanghos sian vespermanghon?
Kiu deziras promeni kun mi?

Chu vi parolos antaŭ ol mi estos for? chu vi montrighos jam tro malfrua?

52

La makulita falko falflugas pretere kaj akuzas min, li plendas pri mia babilado kaj mia
lantado.

Mi ankau estas tute ne malsovaghigita, mi ankau estas netradukebla,
Mi sonas mian barbaran jelpon super la tegmentojn de la mondo.

La lasta drivo de tago sin retenas por mi,
Ghi jhetegas mian bildon al la ceteraj, kaj tiel fidindan kiel iu sur la ombrata sovaghejo,
Ghi kajholas min al la vaporo kaj la krepusko.

Mi foriras kiel aero, mi skuas miajn blankajn buklojn al la forkurinta suno,
Mi disvershas mian karnon en kirlofluo, kaj drivigas ghin en puntecaj pecoj.

Mi testamentas min al la grundo de kiu kresku la herbo kiun mi amas,
Se vi volas min denove, serchu min sub viaj shuplandoj.

Vi preskau ne scios kiu mi estas au kion mi signifas,
Sed mi estos bona sano al vi tamen,
Kaj infiltras kaj fortikigos vian sangon.

Ne veniginte min komence, restu kuraghigita,
Ne trafinte min en unu loko, serchu alian,
Mi haltos ie atendente vin.

ADAMIDOJ

AL LA GHARDENO LA MONDO

Al la ghardeno la mondo denove supreniranta,
Naskpovajn parojn, filinojn, filojn preludanta,
La amon, la vivon de iliaj korpoj, signifanta kaj estanta;
Kuriozan tie chi vidu mian resurekton post dormado,
La turnighantaj cikloj per sia vasta balao min alportintaj denove,
Amoreman, maturan, chio bela por mi, chio mirinda,
Miaj membroj kaj la tremetanta fajro kiu chiam ludas tra ili, pro kialoj, plej mirindaj,
Ekzistanta mi perceptas kaj penetras ankoraŭ,
Kontenta pri la nuntempo, kontenta pri la pasinteco,
Che mia flanko au malantau mi Eva sekvanta,
Au antaue, kaj mi sekvanta shin tute same.

DE ENFERMITAJ DOLORANTAJ RIVEROJ

De enfermitaj dolorantaj riveroj,
De tiu de mi mem sen kiu mi estus nenio,
De tio kion mi rezolute volas fari eminenta, ech se mi staru sola inter homoj,
De mia propra resonanta vocho, kantanta la faluson,
Kantanta la kanton de generado,
Kantanta la bezonon de superbaj infanoj kaj en tio superbaj plenkreskuloj,
Kantanta la musklan urghon kaj la kunmiksadon,
Kantanta la kanton de la litkunulo, (ho nerezistebla sopirado!
Ho por iu kaj chiu la korpon kunrilatan altiranta!
Ho por vi, kiu ajn vi estas, vian kunrilatan korpon! ho ghi, pli ol chio alia, vin ravanta!)
De la malsata ronghado kiu manghas min nokte kaj tage,
De naturaj momentoj, de hontaj doloroj, kantanta ilin,
Serchantaj ion ankoraŭ netrovitan, kvankam mi diligente serchis ghin dum multaj longaj
jaroj,
Kantanta la veran kanton de l' animo maltrankvila je hazardo,
Renaskighanta kun plej kruda Naturo au inter bestoj,
Pri tio, pri ili kaj kio akompanas ilin miaj poemoj informantaj,
Pri la odoro de pomoj kaj citronoj, pri la parigho de birdoj,
Pri la malseko de arbaroj, pri la plaudado de ondoj,
Pri la frenezaj pushoj de ondoj sur la teron, mi ilin kantanta,
La uverturon facile sonanta, la melodion anticipanta,
La bonvena proksimeco, la vido de la perfekta korpo,
La naghanto naghanta nuda en la naghejo, au senmova sur lia dorso kushanta kaj
flosanta,
La ina formo alvenanta, mi pensema, tremema amorkarno doloranta,
La ravan liston por mi au por vi au por iu faranta,
La vizagho, la membroj, la indekso de kapo al piedo, kaj kion ghi ekscitas,

La mistikaj diliroj, la frenezo amora, la tuta sinforgeso,
 (Auskultu proksima kaj silenta kion mi nun flustras al vi,
 Mi amas vin, ho vi tute posedas min,
 Ho ke vi kaj mi eskapu de la ceteraj kaj tute foriru, liberaj kaj senbridaj,
 Du falkoj en la aero, du fishoj naghantaj en la maro ne pli senbridaj ol ni);
 La furioza shtormo tra mi kuranta, mi pasie tremanta,
 La jhuro de la neapartigeblo de du kune, de la virino kiu amas min kaj kiun mi amas pli
 ol mian vivon, tiun jhuron jhuranta,
 (Ho mi volonte riskos chion por vi,
 Ho mi perdighu, se tiel devas esti!
 Ho vi kaj mi! kaj kiel gravas al ni kion la ceteraj faras au pensas?
 Kio estas chio alia al ni? nur ke ni ghuu unu la alian kaj elcherpu unu la alian, se tiel
 devas esti);
 De la mastro, la piloto, al kiu mi cedas la shipon,
 La generalo komandanta min, komandanta chion, de li permeson prenanta,
 De tempo la programon hastiganta, (mi jam lantis tro longe),
 De sekso, de la varpo kaj de la vefto,
 De privateco, de oftaj chagrenoj sola,
 De multe da personoj proksime kaj tamen la ghusta persono ne proksime,
 De la milda glitado de manoj sur mi kaj shovado de fingroj tra miaj haroj kaj barbo,
 De la longe daurigata kiso sur busho au brusto,
 De la strikta premo, kiu igas min au ian viron ebria, svenonta pro troeco,
 De kion la dia edzo scias, de la laboro de patreco,
 De ghojego, venko, kaj kvietigho, de la brakumo de la litkunulo en la nokto,
 De la agopoemoj de okuloj, manoj, koksoj, kaj mamoj,
 De la krocho de la tremanta brako,
 De la fleksa kurbo kaj la fiksigho,
 De flanko che flanko la flekseblan kovrilon dejhetanta,
 De la unu tiel malvolonta ke mi foriru, kaj mi ghuste tiel malvolonta foriri,
 (Nur momenton ho tenera atendanto, kaj mi revenos),
 De la horo de brilaj steloj kaj defalaj rosoj,
 De la nokto momento, kaj mi, elirante, elflirtante,
 Celebras vin, ago dieca, kaj vin, infanoj anticipitaj,
 Kaj vin, bravaj lumboj.

MI KANTAS LA KORPON ELEKTRAN

1

Mi kantas la korpon elektran,
 La armeoj de tiuj kiujn mi amas, brakumas min kaj mi brakumas ilin,
 Ili ne lasos min ghis mi iros kun ili, respondos al ili,
 Kaj malkoruptos ilin, kaj shargos ilin plenaj per la shargo de l' animo.

Chu estis dubate ke tiuj kiuj koruptas siajn proprajn korpojn kashas sin mem?
 Kaj chu tiuj kiuj profanas la vivajn estas tiel malbonaj kiel tiuj kiuj profanas la

mortajn?
Kaj chu la korpo ne faras tute tiom kiom la animo?
Kaj se la korpo ne estus la animo, kio estas la animo?

2

La amo de la korpo de viro au virino rezistas rakonton, la korpo mem rezistas rakonton,
Tiu de la masklo estas perfekta, tiu de l' femalo estas perfekta.

La mieno de l' vizagho rezistas rakonton,
Sed la mieno de bone formita viro aperas ne nur en lia vizagho,
Ghi estas en liaj membroj kaj artikoj ankau, ghi estas kurioze en la artikoj de liaj koksoj
kaj pojnoj,
Ghi estas en lia iro, la tenado de lia kolo, la flekso de lia talio kaj genuoj, vestajho ne
kashas lin,
La forta dolcha kvalito kiun li havas trafenstras la katunon kaj drapon,
Vidi lin pasi komunikas tiom kiom la plej bona poemo, eble pli,
Vi restadas por vidi lian dorson, kaj la dorson de lia kolo kaj shultroflankon.

La sternigho kaj pleneco de beboj, la brustoj kaj kapoj de virinoj, la faldoj de ilia vestajho,
ilia stilo dum ni pasas en la strato, la konturo de ilia formo malsupre,
La naghanto nuda en la naghejo, vidata dum li naghas tra la travidebla verdbrilo, au
kushas kun sia vizagho supre kaj rulighas silente tien kaj reen en la ondado de la
akvo,
La klinigho antauen kaj malantauen de remantoj en remboatoj, la rajdanto en sia selo,
Knabinoj, patrinoj, mastrumantinoj, en chiuj iliaj faroj,
La aro da laboristoj, sidighintaj tagmeze kun siaj malfermitaj manghujoj, kaj iliaj edzinoj
atendantaj,
La ino kvietiganta infanon, la filino de l' bienisto en la ghardeno au bovinejo,
La junulo sarkanta maizon, la glitverurilisto pelanta siajn ses chevalojn tra la homamaso,
La luktado de luktantoj, du junuloj metilernantoj, sufiche plenkreskintaj, fortikaj, afablaj,
indighenaj, ekstere sur la vaka terpeco che sunsubiro post la laboro,
La jakoj kaj chapoj dejhetitaj, la brakumo de amo kaj rezisto,
La suproteno kaj la malsuproteno, la haroj tauzitaj kaj blindigantaj la okulojn;
La marsho de fajrbrigadistoj en siaj propraj kostumoj, la movo de masklaj muskoloj tra
netsidantaj pantalonoj kaj zonoj,
La malrapida reveno post la fajro, la pauzo kiam la sonorilo batas subite denove, kaj la
auskultado atenta,
La naturaj, perfektaj, diversaj sintenoj, la klinita kapo, la kurbigita kolo, kaj la kalkulado;
Tiajn mi amas – mi malfiksas min, pasas libere, estas che la patrina mammo kun la
infaneto,
Naghas kun la naghantoj, luktas kun la luktantoj, marshas en vico kun la fajrbrigadistoj,
pauzas, auskultas, kalkulas.

3

Mi konis viron, ordinara bienisto, patro de kvin filoj,

Kaj en ili la patroj de filoj, kaj en ili la patroj de filoj.
Chi tiu viro estis de mirinda vigleco, trankvileco, beleco persona,
La formo de lia kapo, la pala flavo kaj blanko de liaj haroj kaj barbo, la senmezura
signifo de liaj nigraj okuloj, la richeco kaj amplekso de liaj manieroj,
Por vidi chi tiujn mi kutimis iri lin viziti, li estis sagha ankau,
Li estis ses futojn alta, li havis pli ol okdek jarojn, liaj filoj estis masivaj, puraj,
barbhavaj, sunbrunvizaghaj, belaj,
Ili kaj liaj filinoj amis lin, chiuj kiuj vidis lin amis lin,
Ili ne amis lin pro konveneco, ili amis lin per propra amo,
Li trinkis akvon sole, sano vidighis kiel skarlato tra la klarbruna hauto de lia vizagho,
Li estis ofta pafanto kaj fishanto, li navigis mem sian boaton, fajnan li havis, donacitan al
li de shipcharpentisto, li havis birdpafilajn, donacitajn al li de viroj kiuj amis lin,
Kiam li iris kun siaj kvin filoj kaj multaj nepoj chasi au fishi, vi distingus lin kiel la plej
belan kaj viglan el la tuto,
Vi dezirus longe kaj longe esti kun li, vi dezirus sidi apud li en la boato, ke vi kaj li povu
kuntushi unu kun la alia.

4

Mi perceptis ke esti kun tiuj kiuj plachas al mi estas sufiche,
Halti akompanate de tiuj vespere estas sufiche,
Esti chirkauita de bela, scivola, spiranta, ridanta karno estas sufiche.
Pasi inter ili au tushi iun, au meti mian brakon tiel tre facile chirkau lia au shia kolo dum
momento, kio estas chi tio do?
Mi ne petas ian plian delicon, mi naghos en ghi kiel en maro.

Estas io en restado proksime al viroj kaj virinoj kaj rigardado al ili, kaj en la kontakto kaj
odoro de ili, kiu bone plachas al la animo.
Chiuj aferoj plachas al la animo, sed tiuj chi bone plachas al la animo.

5

Chi tio estas la femala formo,
Dia nimbo elspirighas de ghi de kapo al piedo,
Ghi allogas per sovagha nenegebla allogo,
Mi estas altirata de ghia spiro, kvazau mi estus ne pli ol senhelpa vapore, chio
flankenfalas krom mi mem kaj ghi,
La libroj, arto, religio, tempo, la videbla kaj solida tero, kaj la atendatajhoj de chielo au la
timatajhoj de infero estas nun konsumitaj,
Folaj filamentoj, neregeblaj shosoj ludas el ghi, la reago same neregebla,
Haroj, mamoj, koksoj, flekso de gamboj, neglektece tushantaj manoj, tute vagmovantaj,
la miaj ankau vagmovantaj,
Malfluso pikata de fluso, kaj fluso pikata de malfluso, amkarno shvelanta kaj delice
doloranta,
Senlimaj klaraj shprucoj de amo varmegaj kaj enormaj, tremetanta jheleo de amo,
blankpuso kaj delira suko,

Novedzo nokto de amo, movighanta certe kaj milde en la kushantan tagighon,
Ondadanta en la volontan kaj cedantan tagon,
Perdighinta en la fendo de la krochanta kaj dolchkarna tago.

Chi tio la nukleo – post kiam la infano estas naskita de la virino, la homo estas naskita de
la virino.
Chi tio la nagho de nasko, chi tio la kunfandigho de malgranda kaj granda, kaj la ellaso
denove.

Ne hontu virinoj, via privilegio enfermas la ceterajn, kaj estas la elirejo de la ceteraj,
Vi estas la pordoj de la korpo, kaj vi estas la pordoj de l' animo.

La femalo enhavas chiujn kvalitojn kaj mildigas ilin,
Shi estas en sia loko kaj movighas kun perfekta ekvilibro,
Shi estas chiuj aferoj konvene vualitaj, shi estas kaj pasiva kaj aktiva,
Shi estas konciponta filinojn tute same kiel filojn, kaj filojn tute same kiel filinojn.

Dum mi vidas mian animon spegulata en Naturo,
Dum mi vidas tra nebulo, Iun kun neesprimebla kompleteco, prudento, beleco,
Vidas la klinitan kapon kaj la brakojn kunmetitajn super la brusto, la Femalon mi vidas.

6

La masklo estas ne malpli la animo nek pli, li ankau estas en sia loko,
Li ankau estas tute kvalitoj, li estas agado kaj potenco,
La abundeco de la konata universo estas en li,
Malestimo bone konvenas al li, kaj apetito kaj defio bone konvenas al li,
La plej sovaghaj, plej grandaj pasioj, beato kiu estas pleja, malghojo kiu estas pleja,
bone konvenas al li, fiero estas por li,
La plensternita fiero de homo estas trankviliga kaj bonega al la animo,
Scio konvenas al li, li shatas ghin chiam, li alportas chion al la provo de si mem,
Kio ajn la vidajho, kio ajn la maro kaj la velo, li eksondas finfine nur chi tie,
(Kie alie li eksondas krom chi tie?).

La korpo de la viro estas sankta kaj la korpo de la virino estas sankta,
Kiu ajn ghi estu, ghi estas sankta – chu ghi estas la plej malsupera en la laboristaro?
Chu ghi estas unu el la stultmienaj enmigrantoj jhus alterighintaj sur la varfo?
Chiu apartenas chi tie au ie ghuste tiom kiom la richaj, ghuste tiom kiom vi,
Chiu havas sian lokon en la procesio.

(Chio estas procesio,
La universo estas procesio kun mezurita kaj perfekta movo.)

Chu vi scias mem tiom, ke vi nomas la plej malsuperajn sensciaj?
Chu vi supozas ke vi rajtas bonan vidon kaj li au shi ne rajtas bonan vidon?
Chu vi pensas ke la materio koheris de ghia disa flosado, kaj la grundo estas sur la
surfaco, kaj la akvo fluas, kaj la vegetajho ghermas,

Por vi sole, kaj ne por li kaj shi?

7

La korpo de viro che l' aukcio,
(Char antaŭ la milito mi ofte iras al la sklavovendejo kaj rigardas la vendadon),
Mi helpas la aukciiston, la fushisto ne duone scias sian aferon.

Sinjoroj rigardu ĉi tiun mirindajhon,
Kio ajn la proponoj de l' proponantoj, ili ne povas esti sufiĉe altaj por ghi,
Por ghi la globo preparadis dum miliardoj da jaroj sen unu animalo aŭ planto,
Por ghi la rotaciantaj cikloj senerare kaj seninterrompe rulighis.

En ĉi tiu kapo la tutkonsternanta cerbo,
En ghi kaj malsupre de ghi la materialoj de herooj.

Ekzamenu ĉi tiujn membrojn, rughajn, nigrajn, aŭ blankajn, ili estas lerte konstruitaj
tendene kaj nerve,
Ili estu nudigataj, ke vi povu vidi ilin.

Ekskvizitaj sensoj, vivlumigataj okuloj, kuragho, volo,
Flokoj de brustmuskolo, fleksebla spino kaj nuklo, karno ne molacha, tauge
grandaj brakoj kaj gamboj,
Kaj mirindajhoj interne ankoraŭ.

Interne kuras la sango,
La sama familiara sango! la sama rughkuranta sango!
Tie shvelas kaj jhetas la koro, tie ĉiuj pasioj, deziroj, etendoj, aspiroj,
(Ĉu vi pensas ke ili ne estas tie tial ke ili ne estas esprimataj en salonoj kaj prelegejoj?).

Ĉi tiu estas ne nur unu viro, ĉi tiu la patro de tiuj kiuj estos patroj siavice,
En li la komenco de multloĝataj ŝtatoj kaj riĉaj respublikoj,
De li sennombraj senmortaj vivoj kun senombraj enkorpiĝoj kaj ghuoj.

Kiel vi scias kiu venos de la idoj de liaj idoj tra la jarcentoj?
(De kiu vi povus eltrovi ke vi devenis mem, se vi povus spuri malantaŭen tra la
jarcentoj?)

8

La korpo de virino che l' aukcio,
Shi ankau estas ne nur si mem, shi estas la multnaska patrino de patrinoj,
Shi estas la portantino de ili kiuj kreskos kaj estos paruloj al la patrinoj.

Ĉu vi iam amis la korpon de virino?
Ĉu vi iam amis la korpon de viro?
Ĉu vi ne vidas ke ĉi tiuj estas ĝuste la samaj al ĉiuj en ĉiuj nacioj kaj tempoj ĉie

tra la tero?

Se io estas sankta, la homa korpo estas sankta,
Kaj la gloro kaj dolcho de viro estas la signo de vireco nedifektita,
Kaj en la viro au la virino, pura, forta, firmfibra korpo estas pli bela ol la plej bela
vizagho.

Chu vi vidis la stultulon kiu koruptis sian propran vivan korpon? au la stultulinon kiu
koruptis sian propran vivan korpon?
Char ili ne kashas sin, kaj ne povas kashi sin.

9

Ho mia korpo! mi ne rajtas forlasi viajn similajhojn en aliaj viroj kaj virinoj, nek la
similajhojn de la partoj de vi,
Mi kredas ke viaj similajhoj estas starontaj au falontaj kun la similajhoj de l' animo (kaj
ke ili estas la animo),
Mi kredas ke viaj similajhoj staros au falos kun miaj poemoj, kaj ke ili estas miaj poemoj,
Poemoj de la viro, de la virino, de la infano, de la junulo, de la edzino, de la edzo, de la
patrino, de la patro, de la juna viro, de la juna virino,
Kapo, kolo, haroj, oreloj, lobo kaj timpano de l' oreloj,
Okuloj, okulharoj, iriso de l'okulo, okulbrovoj, kaj la maldormo au dormo de la
palpebroj,
Busho, lango, lipoj, dentoj, palato, makzeloj, kaj la makzelcharniroj,
Nazo, naztruoj, kaj la septo,
Vangoj, tempioj, frunto, mentono, gorgho, nuko, kolturnigho,
Fortaj shultroj, vireca barbo, skapolo, malantaushultroj, kaj la plenforma flankrondajho
de la brusto,
Braksupro, subbrako, kubutartiko, antaubrako, braktendenoj, brakostoj,
Pojno kaj pojnartikoj, mano, polmo, fingrartikoj, polekso, montrofigro, fingrungoj,
Largha brustantauo, krispaj haroj de l' brusto, brustosto, brustflanko,
Ripoj, ventro, spino, artikoj de l' spino,
Koksoj, koksartikoj, koksforto, interne kaj eksterne rondaj, virbuloj, virradiko,
Forta femuraro bone portanta la torson supere,
Gambfibroj, genuo, patelo, femuro, kruro,
Maleoloj, instepo, metatarso, piedfingroj, piedfingraj artikoj, la kalkano;
Chiuj sintenoj, la tuta belformeco, chiuj posedajhoj de mia au via korpo au la korpo de
iu, masklo au femalo,
La pulmspongoj, la stomaksako, la intestoj dolchaj kaj puraj,
La cerbo en siaj faldajhoj interne de la kraniframo,
Simpatioj, korvalvoj, palatvalvoj, sekseco, patrineco,
Virineco, kaj chio kio estas virino, kaj la viro kiu devenas de la virino,
La utero, la mamoj, cicoj, mamlakto, larmoj, ridado, plorado, amrigardoj,
amchagrenighoj kaj levighoj,
La vocho, artikulacio, lingvo, flustrado, lautkriado,
Nutrajho, trinkajho, pulso, digesto, shvito, dormo, marshado, naghado,
Ekvilibro sur la koksoj, saltado, kushado, brakumado, kurbigado kaj firmigado de la

brako,
La chiamaj shanghoj de la flekso de la busho kaj chirkau la okuloj,
La hauto, la sunbrunigita koloro, efelidoj, haroj,
La kurioza simpatio kiun oni sentas palpante per la mano la nudan karnon de la korpo,
La chirkauirantaj riveroj la spirajho, kaj la en- kaj elspirado de ghi,
La beleco de la talio, kaj de tie la koksoj, kaj de tie malsupren al la genuoj,
La maldensaj rughaj jheleoj interne de vi au interne de mi, la ostoj kaj la medolo en la
ostoj,
La ekskvizita ekkonscio de sano,
Ho, mi diras, tiuj ne estas la partoj kaj poemoj de la korpo sole, sed de la animo,
Ho, mi diras nun, tiuj estas la animo!

VIRINO ATENDAS MIN

Virino atendas min, shi enhavas chion, nenio mankas,
Tamen chio mankus se sekso mankus, au se la malseko de la ghusta viro mankus.

Sekso enhavas chion, korpojn, animojn,
Signifojn, pruvojn, purecojn, delikatecojn, rezultojn, diskonigojn,
Kantojn, komandojn, sanon, fieron, la patrinan misteron, la gherman lakton,
Chiujn esperojn, bonfarojn, donacojn, chiujn pasiojn, amojn, belojn, delicojn de la tero,
Chiujn registarojn, jughistojn, diojn, sekvatajn personojn de la tero,
Chi tiuj estas enhavataj en sekso kiel partoj de ghi kaj pravigoj de ghi.

Sen honto la viro kiun mi shatas konas kaj agnoskas la delicecon de sia sekso,
Sen honto la virino kiun mi shatas konas kaj agnoskas la sian.

Nun mi forpermesos min de senemociaj virinoj,
Mi iros resti kun shi kiu atendas min, kaj kun tiuj virinoj kiuj estas varmsangaj kaj
sufichaj por mi,
Mi vidas ke ili komprenas min kaj ne rifuzas min,
Mi vidas ke ili estas indaj je mi, mi estos la fortika edzo de tiuj virinoj.

Ili ne estas unu ereton malpli ol mi,
Ili estas brunigitaj vizaghe de brilantaj sunoj kaj blovantaj ventoj,
Ilia karno havas la kutiman dian suplecon kaj forton,
Ili scipovas naghi, remi, rajdi, lukti, pafi, kuri, frapi, retreti, avanci, kontraustari, sin
defendi,
Ili estas plej altaj siamerite – ili estas trankvilaj, klaraj, sufiche aplombaj pri si mem.

Mi tiras vin proksimen al mi, vi virinoj,
Mi ne povas delasi vin, mi volus fari al vi bonon,
Mi estas por vi, kaj vi estas por mi, ne nur por mi, sed por aliaj,
Envolvitaj en vi dormas pli grandaj herooj kaj bardoj,
Ili rifuzas vekighi che la tusho de iu viro krom mi.

Estas mi, vi virinoj, mi iradas mian vojon,
Mi estas severa, akra, granda, nemalpersvadebla, sed mi amas vin,
Mi ne vundas vin iom pli ol necesas al vi,
Mi vershas la materialon komenci filojn kaj filinojn taugajn por chi tiuj Shtatoj, mi
 urghas per lanta kruda muskolaro,
Mi apogas min efike, mi auskultas nenian petegojn,
Mi ne rajtas retirighi ghis mi delasos kio tiel longe akumulighis en mi.

Per vi mi elfluigas la enfermitajn riverojn de mi mem,
En vi mi volvas mil antauenajn jarojn,
Sur vi mi greftas la greftojn de la plej multe amataj de mi kaj Ameriko,
La gutoj kiujn mi distilas sur vi kreskigos sovaghajn kaj atletajn knabinojn, novajn
 artistojn, muzikistojn, kaj kantistojn,
La beboj kiujn mi generas sur vi estas generontaj bebojn siavice,
Mi postulos perfektajn virojn kaj virinojn el miaj am-elspezoj,
Mi atodos ke ili interpenetru kun aliaj kiel mi kaj vi interpenetras nun,
Mi kalkulos je la fruktoj de la vershigantaj pluvegoj de ili kiel mi kalkulos je la fruktoj
 de la vershigantaj pluvegoj kiujn mi donas nun,
Mi serchos amantajn rikoltojn el la naskigho, vivo, morto, senmorteco kiujn mi plantas
 tiel ame nun.

SPONTANEA MI

Spontanea mi, Naturo,
La amanta tago, la levighanta suno, la amiko kun kiu mi estas felicha,
La brako de mia amiko pendanta senokupe sur mia shultro,
La deklivo, blankigita de floroj de l' orno,
La sama malfruaŭtune, la koloroj de rugho, flavo, flavbruno, purpuro, kaj hela kaj
 malhela verdo,
La luksa kovrilo de la herbo, bestoj, kaj birdoj, la privata nechirkautondita bordo, la
 primitivaj pomoj, la shtonetoj,
Belaj gutigantaj fragmentoj, la sencela listo de unu post alia, dum mi hazarde alvokas
 ilin al mi au pensas pri ili,
La realaj poemoj, (kion ni nomas poemoj estanta nur bildoj),
La poemoj de la privateco de la nokto, kaj de viroj kiel mi,
Chi tiu poemo, pendanta modesta kaj nevidata, kiun mi chiam portas, kaj kiun
 chiuj viroj portas,
(Sciu unu fojon por chiam, agnoskite intence, kie ajn estas viroj kiel mi estas niaj voluptaj
 kashitaj masklaj poemoj),
Ampensoj, amlikvajho, amodoro, amcedado, amsuprenirantajhoj, kaj la supreniranta
 suko,
Brakoj kaj manoj de amo, lipoj de amo, falusa polekso de amo, mamoj de amo, ventroj
 kunpremitaj kaj kungluitaj per amo,
Tero de chasta amo, vivo kiu estas vivo nur post amo,
La korpo de mia amato, la korpo de la virino kiun mi amas, la korpo de la viro, la korpo
 de la tero,

Mildaj antautagmezaj aeraj kiuj blovas el la sud-okcidento,
 La vila sovagh-abelo, kiu murmuras kaj serchas supre kaj malsupre, kiu kaptas la
 plenkreskintan florinon, kurbighas sur shi per amaj firmaj gamboj, trudas sian
 volon al shi, kaj tenas sin treme kaj firme ghis li kontentigas sin;
 La malseko de arbaroj dum la fruaj horoj,
 Du dormantoj, nokte kushantaj tute kunaj dum ili dormas, unu kun brako deklinighanta
 trans kaj malsupren de la talio de la alia,
 Laodoro de pomoj, aromoj de dispremita salvio, mento, betulshelo,
 La sopiroj de la knabo, la ardo kaj premo, dum li konfidas al mi kion li estis songhanta,
 La morta folio giranta sian spiralan giron, kaj falanta kvieta kaj kontenta al la tero,
 La senformaj pikoj per kiuj vidajhoj, homoj, objektoj pikas min,
 La nabita piko de mi mem, pikanta min tiom kiom ghi iam povas iun,
 La sentivaj, sferaj, subpendantaj fratoj, ke nur privilegiaj palpantoj povas esti intimaj kie
 ili estas,
 La kurioza vaganto la mano, vaganta chien sur la korpo, la modesta retirigho de karno
 kie la fingroj kvietige pauzas kaj trudas sin,
 La klara likvo interne de la juna viro,
 La ghenakorodo, tiel pensema kaj doloriga,
 La tormento, la incitighema tajdo kiu ne estos kvieta,
 La similajhon de tio sama mi sentas, la similajho de tio sama en aliaj,
 La junulo kiu rughighas kaj rughighas, kaj la junulino kiu rughighas kaj rughighas,
 La junulo kiu maldormighas profundnokte, la varmega mano penanta repremi tion kio
 volus mastri lin,
 La mistika amora nokto, la strangaj, duonbonvenaj ekdoloroj, vizioj, shvitoj,
 La pulso batanta tra polmoj, kaj tremantaj, chirkauantaj fingroj, la junulo tute
 kolorighinta, rugha, honta, kolera;
 La versho sur mi de mia amanto la maro dum mi kushas volonta kaj nuda,
 La gajeco de la ghemelaj beboj kiuj rampas tra la herbo en la suno, la patrino neniam
 fortunanta siajn atentajn okulojn de ili,
 La juglanda trunko, la juglandaj sheloj, kaj la maturighantaj au maturighintaj longrondaj
 juglandoj,
 La chasteco de vegetajhoj, birdoj, bestoj,
 La konsekvenca malnobleco de mi se mi kaurus au trovas min nedeca dum birdoj kaj
 bestoj neniam ech unufoje kauras au trovas sin nedecaj,
 La granda chasteco de patreco, por egali la grandan chastecon de patrineco,
 La jhuro de generado kiun mi jhuris, miaj Adamaj kaj freshaj filinoj,
 La avido kiu manghas min tage kaj nokte per malsata rongho ghis mi saturos per tio kio
 produktos knaboj por anstataui min kiam mi estos finita,
 La sana kvietigho, ripozo, kontento,
 Kaj chi tiu grapolo kiun mi plukis hazarde de mi,
 Ghi jam faris sian taskon – mi jhetas ghin senzorge por fali kien ghi falos.

UNU HORO AL FOLECO KAJ GHOJO

Unu horo al foleco kaj ghojo! Ho furioze! Ho ne enfermu min!
 (Kio estas chi tio kio liberigas min tiel en shtormoj?)

Kion miaj krioj meze de fulmoj kaj furiozaj ventoj signifas?),

Ho trinki la mistikajn delirojn pli profunde ol iu alia viro!
Ho sovaghaj kaj teneraj doloroj! (mi testamentas ilin al vi, miaj infanoj,
Mi diras ilin al vi, pro kialoj, Ho novedzo kaj novedzino).

Ho esti cedita al vi, kiu ajn vi estas, kaj vi esti cedita al mi defie al la mondo!
Ho reveni al Paradizo! Ho modesta kaj femala!
Ho tiri vin al mi, meti sur vin je la unua fojo la lipojn de rezoluta viro.

Ho la enigmo, la trioble nodita nodo, la profunda kaj malluma lageto, tute malnodita
kaj lumita!
Ho rapidi kie estas sufiche da spaco kaj sufiche da aero finfine!
Esti absolvita de antaŭaj ligoj kaj konvencioj, mi de miaj kaj vi de viaj!
Trove novan neimagitan senzorgecon kun la plej bona de Naturo!
Havi la shtopilon forigita de sia busho!
Havi la senton chi tiun tagon au iun tagon mi sufichas kiel mi estas.

Ho io neprovita! io trancanta!
Eskapi komplete de la ankroj kaj tenoj de aliaj,
Peli sin libere! ami libere! impeti senzorge kaj danghere!
Peti detruon per moko, per invito!
Suprenighi, salti al la chieloj de la amo indikita al mi!
Levighi tien kun mia ebria animo!
Esti perdita, se devas esti tiel!
Nutri la reston de vivo per unu horo de pleneco kaj libero!
Per unu mallonga horo de foleco kaj ghajo.

EL LA RULIGHANTA OCEANO LA AMASO

El la rulighanta oceano la amaso venis guto milde al mi,
Flustranta Mi amas vin, post nelonge mi mortos,
Mi vojaghis longan vojon sole rigardi vin tushi vin,
Char mi ne povis morti ghis mi unufoje rigardis vin,
Char mi timis ke mi povus poste perdi vin.

Nun ni renkontighis, ni rigardis, ni estas sekuraj,
Reiru en paco al la oceano mia amato, ni ne estas tiom apartigitaj,
Jen la granda rondajho, la koherado de chio, kiel perfekta!
Sed kiel koncernas min, vin, la nerezistebla maro estas apartigonta nin,
Kiel koncernas horon disportantan nin, tamen ne povas disporti nin por chiam;
Ne estu senpacienca – spaceton – vi sciu ke mi salutas la aeron, la oceanon, kaj la teron,
Chiun tagon che sunsubiro pro vi kara, mia amato.

EPOKOJ KAJ EPOKOJ REVENANTAJ JE INTERTEMPOJ

Epokoj kaj epokoj revenantaj je intertempoj,
Nedetruita, vaganta senmorta,
Fortika, falusa, kun la potencaj originalaj lumboj, perfekte freshaj,
Mi, kantanto de Adamaj kantoj,
Tra la nova ghardeno la Okcidento, la grandajn urbojn vokante,
Delirighas, tiel preludas kio estas generotaj, prezentante chi tiujn, prezentante min,
Banante min, banante miajn kantojn en Sekso,
Ido de miaj lumboj.

NI DU, KIEL LONGE NI ESTIS TROMPITAJ

Ni du, kiel longe ni estis trompitaj,
Nun transformite, ni rapide eskapas, kiel Naturo eskapas,
Ni estas Naturo, longe ni forestis, sed nun ni revenas
Ni farighas plantoj, trunkoj, foliaro, radikoj, shelo,
Ni kushas en la tero, ni estas rokoj,
Ni estas kverkoj, ni kreskas en la malfermajhoj flanko che flanko,
Ni pashtighas, ni estas du inter la sovaghaj herdoj, spontaneaj kiel iuj,
Ni estas du fishoj naghantaj en la maro kune,
Ni estas tio kio estas robiniaj floroj, ni faligas parfumon apud vojetoj matenojn kaj
vesperojn,
Ni estas ankau la kruda malpurajho de bestoj, vegetajhoj, mineraloj,
Ni estas du rabaj falkoj, ni shvebas supre kaj rigardas malsupren,
Ni estas du splendaj sunoj, estas ni kiuj ekvilibrigas nin astraj kaj stelaj, ni estas du
kometoj,
Ni predvagas denteghavaj kaj kvarpiedaj en la arbaro, ni saltas sur predon,
Ni estas du nuboj antautagmezojn kaj posttagmezojn drivantaj supre,
Ni estas maroj intermiksantaj, ni estas du el tiuj gajaj ondoj, rulighantaj unu super alia
kaj intermalsekigantaj unu alian,
Ni estas tiaj kia estas la atmosfero, travideblaj, ricevemaj, penetreblaj, nepenetreblaj,
Ni estas negho, pluvo, malvarmo, mallumo, ni estas chiu produkto kaj influo de la
globo,
Ni rondiris kaj rondiris ghis ni alvenis hejmen denove, ni du,
Ni nuligis chion krom libero kaj chion krom nia propra ghojo.

HO HIMENO! HO HIMENEO!

Ho Himeno! ho Himeneo! kial vi tantaligas min tiel?
Ho kial piki min nur dum rapida momento?
Kial vi ne povas daurigi? Ho, kial vi nun chesas?
Chu estas pro tio ke, se vi daurigis preter la rapida momento, vi baldau nepre mortigus
min?

MI ESTAS LI KIU DOLORAS PRO AMO

Mi estas li kiu doloras pro amora amo;
Chu la tero gravitas? chu tuta materio, dolorante, ne altiras tutan materion?
Tiel la korpo de mi al chiuj kiujn mi renkontas au konas.

NATURAJ MOMENTOJ

Naturaj momentoj – kiam vi renkontas min – ha vi estas chi tie nun,
Donu al mi nun libidajn ghojojn sole,
Donu al mi la vershon de miaj pasioj, donu al mi vivon kruda kaj svarma,
Hodiau mi iras asociighi kun la karuloj de Naturo, chi-nokte ankau,
Mi estas por tiuj kiuj kredas je malchastaj delicoj, mi partoprenas la noktomezajn
festenojn de junaj viroj,
Mi dancas kun la dancantoj kaj drinkas kun la drinkantoj,
La ehhoj sonoras per niaj nedecaj krioj, mi elektas iun malaltklasulon por mia plej kara
amiko,
Li estu senlegha, kruda, analfabeta, li estu iu kondamnita de aliaj pro faroj faritaj,
Mi ludos rolon ne plu, kial mi ekzilu min de miaj kompanoj?
Ho vi evitataj personoj, mi almenau ne evitas vin,
Mi venas senprokraste mezen de vi, mi volas esti via poeto,
Mi volas esti pli al vi ol iu el la ceteraj.

UNUFOJE MI TRAPASIS MULTLOGHATAN URBON

Unufoje mi trapasis multloghatan urbon, stampante mian cerbon por estonta uzo per
ghiaj montraĵoj, arkitekturo, kutimoj, tradicioj,
Tamen nun pri la tuta urbo mi memoras nur unu virinon, kiun mi okaze renkontis tie,
kiu detenis min pro amo de mi,
Tago post tago kaj nokto post nokto ni estis kune – chio cetera estas de longe forgesita de
mi,
Mi memoras, mi diras, nur tiun virinon, kiu pasie alkrochighis al mi,
Denove ni vagas, ni amas, ni apartighas denove,
Denove shi tenas min che la mano, mi ne devas iri,
Mi vidas shin proksime apud mi kun silentaj lipoj malghojaj kaj tremetaj.

MI AUDIS VIN, SOLENDOLCHAJ TUBOJ DE L' ORGENO

Mi audis vin solendolchaj tuboj de l' orgeno, dum lastdimanchan matenon mi pasis la
preghejon,
Ventoj de autuno, dum mi trairis la arbaron che l' krepusko, mi audis viajn longeltiritajn
suspirojn tie supre, tiel mornajn,

Mi audis la perfektan italan tenorulon kantanta che l' opero, mi audis la sopranulinon
kantanta meze de l' kvarteto;
Koro de mia amo! vin ankau mi audis murmuranta mallaute tra unu el la pojnoj che mia
kapo,
Audis la pulson de vi, kiam chio estis silenta, sonoriganta sonoriletojn lastan nokton sub
mia orelo.

FRONTANTE OKCIDENTEN DE LA MARBORDOJ DE KALIFORNIO

Frontante okcidenten de la marbordoj de Kalifornio,
Enketanta, senlace, serchante kio estas ankoraŭ netrovita,
Mi, infano, tre maljuna, tra ondoj, al la domo de patrineco, la lando de migradoj,
rigardas malproksimen,
Rigardas de la bordoj de mia Okcidenta maro, la rondo preskau rondirita;
Char komencinte okcidenten de Hindustano, de la valoj de Kashmiro,
De Azio, de la nordo, de la Dio, la saghulo, kaj la heroo,
De la sudo, de la floraj duoninsuloj kaj la spicinsuloj,
Longe vaginte poste, chirkau la tero vaginte,
Nun mi frontas hejmen denove, tre kontenta kaj ghoja,
(Sed kie estas tio por kio mi komencis antaŭ tiel longe?
Kaj kial ghi estas ankoraŭ netrovita?).

KIEL ADAMON FRUE MATENE

Kiel Adamon frue matene,
Elmarshantan el la laubo, refreshigitan de dormo,
Rigardu min kie mi pasas, audu mian vochon, alproksimighu,
Tushu min, tushigu la polmon de via mano al mia korpo dum mi pasas,
Ne timu mian korpon.

KALAMO

EN PADOJ NETRETITAJ

En padoj netretitaj,
En la kreskajho apud randoj de laget-akvoj,
Eskapinta de la vivo kiu eksponas sin,
De chiuj normoj ghis nun publikigitaj, de la plezuroj, profitoj, konformighoj,
Kiujn tro longe mi proponadis por nutri mian animon,
Klaraj al mi nun normoj ancorau ne publikigitaj, klare al mi ke mia animo,
Ke la animo de la homo por kiu mi parolas jubilas pri komaradoj,
Chi tie sola for de la tintego de la mondo,
Registranta chi tie langojn aromajn kaj alparolata de ili,
Ne plu embarasata (char en chi tiu izolita loko mi povas respondi tiel kiel mi ne audacus
aliloke),
Forta sur mi la vivo kiu ne eksponas sin tamen enhavas chiujn ceterajn,
Rezoluta kanti nenian kantojn hodiau krom tiuj de vireca alligigho,
Projekciante ilin lau tiun substancan vivon,
Testamentante de chi tie specojn de atleta amo,
Posttagmeze chi tiun delican Naua-monaton en mia kvardek-unua jaro,
Mi procedas por chiuj kiuj estas au estis junaj viroj,
Diri la sekreton de miaj noktoj kaj tagoj,
Celebri la bezonon de kamaradoj.

PARFUMITA HERBAJHO DE MIA BRUSTO

Parfumita herbajho de mia brusto,
Foliojn de vi mi elektas, mi skribas, por esti trarigardataj plej bone poste,
Tombofolioj, korpofolioj, suprenkreskantaj super min super morton,
Dauraj radikoj, altaj folioj, ho la vintro ne frostigos vin, delikataj folioj,
Chiun jaron vi floros denove, el tie kie vi enlitighis, vi elighos denove;
Ho mi ne scias chu multaj preterpasantoj malkovros vin au enspiros vian malfortan
odoron, sed mi pensas ke kelkaj tion faros,
Ho sveltaj folioj! ho floroj de mia sango! mi permesas vin diri en via propra maniero pri
la koro kiu estas sub vi,
Ho mi ne scias kion vi signifas tie sub vi mem, vi ne estas felicho,
Vi estas ofte pli maldolchaj ol mi povas elporti, vi bruligas kaj pikas min,
Tamen vi estas belaj al mi, vi malforte koloritaj radikoj, vi pensigas min pri morto,
Morto estas bela de vi, (kio ja estas fine bela krom morto kaj amo?),
Ho mi pensas ke ne estas por vivo ke mi chantas chi tie mian chanton de amantoj, mi
pensas ke devas esti por morto,
Char kiel trankvile, kiel solene farighas supreniri al la atmosfero de amantoj,
Pri morto au vivo mi estas do indiferenta, mia animo rifuzas preferi,
(Mi konjektas, ke la alta animo de amantoj bonvenigas morton pleje),

Ja, ho morto, mi pensas nun ke chi tiuj folioj signifas precize la samon kion vi signifas,
Elkresku pli altaj, dolchaj folioj ke mi povu vidi! elkresku el mia brusto!
Saltu for de la kashita koro tie!
Ne volvu vin tiel en vian roznuancitajn radikojn timemaj folioj!
Ne restu tie tiel hontaj, herbajho de mia brusto!
Venu mi rezolutighis nudigi chi tiun largan bruston mian, mi sufiche longe malfacile
spiris kaj sufokighis;
Emblemaj kaj kapricaj tigoj, mi forlasas vin, nun vi ne helpas min,
Mi diros kion mi volas diri per ghi sole,
Mi sonos min mem kaj kamaradojn sole, mi neniam denove elsonos vokon, nur ilian
vokon,
Mi levos per ghi senmortajn reehojn tra la Shtatoj,
Mi donos ekzemplon al amantoj, alpreni dauran formon kaj volon tra la Shtatoj,
Per mi la vortoj estos dirataj por igi morton gajiga,
Donu al mi vian tonon ho morto, ke mi povu agordighi kun ghi,
Donu al mi vin mem, char mi vidas ke vi apartenas al mi nun antau chio, kaj estas
envolvitaj nedisigeble kune, vi, amo kaj morto, estas,
Nek mi permesos al vi obstrukci min plu per kion mi nomadis vivo,
Char nun estas komunikite al mi ke vi estas la signifoj esencaj,
Ke vi kashighas en chi tiuj shanghighantaj formoj de vivo, pro kialoj, kaj ke ili estas
plejparte por vi,
Ke vi preter ili elvenas por dauri, la reala realo,
Ke malantau la masko de materialoj vi pacience atendas, ne gravas kiel longe,
Ke vi eble iun tagon ekregos chion,
Ke vi eble disipos chi tiun tutan elmontrajhon de shajno,
Ke eble vi estas tio por kio chio estas, sed ghi efektive ne tre longe dauras,
Sed vi tre longe dauros.

KIU AJN VI ESTAS, TENANTA MIN NUN PER LA MANO

Kiu ajn vi estas, tenanta min nun per la mano,
Sen unu afero chio estos senutila,
Mi donas al vi honestan averton antau ol vi provos min plu,
Mi ne estas kion vi supozis, sed ege malsama.

Kiu estas li kiu volus farighi mia sekvanto?
Kiu volus sin subskribi kandidato por mia amo?

La vojo estas suspektinda, la rezulto necerta, eble detrua,
Vi devus forkonfesi chion alian, mi sola atendus esti via sola kaj ekskluziva normo,
Via noviceco ech tiam estus longa kaj laciga,
La tuta estinta teorio de via vivo kaj chia konformado al la vivoj chirkau vi devus esti
forlasitaj,
Tial liberigu min nun antau ol vin gheni iom plu, forigu la manon de miaj shultroj,
Demetu min kaj foriru al via vojo.

Au alie shtele en iu arbaro prove,
Au malantau roko subchiele,
(Char en ia tegmentita chambro de domo mi ne ekaperas, nek en kompanio,
Kaj en bibliotekoj mi kushas kiel mutulo, strangulo, au nenaskita, au morta),
Sed ja eble kun vi sur alta monteto, unue observante, por ke neniu persono mejlojn
chirkaue alvenu nerimarkite,
Au eble kun vi velante mare, au sur la marbordo au ia kvieta insulo,
Chi tie meti viajn lipojn sur la miajn mi permesos al vi,
Kun la longrestanta kiso de la kamarado au la kiso de la nova edzo,
Char mi estas la nova edzo kaj mi estas la kamarado.

Au se vi volas, shovante min sub viajn vestojn,
Kie mi povas senti la batojn de via koro au kushi sur via kokso,
Portu min, kiam vi eliras tra tero au maro;
Char tiel nur tushi vin estas sufiche, estas plej bone,
Kaj tiel tushante vin, mi volus silente dormi kaj esti portata eterne.

Sed chi foliojn legante, vi legas en danghero,
Char chi foliojn kaj min vi ne komprenos,
Ili sin kashos antau vi unue kaj ankoraŭ pli poste, mi certe min kashos antau vi,
Ech dum vi pensus ke vi sendube kaptis min, jen!
Jam vi vidas ke mi eskapis de vi.

Char ne estas por kion mi enmetis en ghi ke mi skribis chi tiun libron,
Nek estas ke, legante ghin, vi akiros ghin,
Nek konas min plej bone kiuj admiras min kaj fanfarone laudas min,
Nek montrighos triumfaj la kandidatoj por mia amo (se ne, pleje, tre malmultaj),
Nek faros miaj poemoj bonon sole, ili faros ghuste tiom da malbono, eble pli,
Char chio estas senutila sen kion vi povus konjekti multfoje kaj ne trafi, sen kion mi
sugestis,
Tial delasu min kaj foriru vian vojon.

POR VI, HO DEMOKRATIO

Venu, mi faros la kontinenton nedisigebla,
Mi faros la plej grandiozan genton sur kiun la suno iam brilas,
Mi faros diajn magnetajn landojn,
Kun la amo de kamaradoj,
Kun la vivlonga amo de kamaradoj.

Mi plantos kamaradecon tiel dense kiel arbojn lau chiuj riveroj de Ameriko, kaj lau la
bordo de la Lagoj Grandaj, kaj chie sur la prerioj,
Mi faros nedisigeblajn urbojn kun iliaj brakoj chirkau la koloj unuj de aliaj,
Per la amo de kamaradoj,
Per la vireca amo de kamaradoj.

Por vi chi tiuj de mi, ho Demokratio, por servi vin mia sinjorino!
Por vi, por vi mi trilas chi tiujn kantojn.

CHI TIUJN MI, KANTANTE EN PRINTEMPO

Chi tiujn mi, kantante en printempo, kolektas por amantoj,
(Char kiu krom mi komprenus amantojn kaj ilian tutan malghojon kaj ghojon?
Kaj kiu krom mi estus la poeto de kamaradoj?).
Kolektante mi trairas la ghardenon la mondon, sed baldau mi pasas la pordojn,
Nun lau la lagetflanko, nun vadante iomete, ne timante la malsekon,
Nun apud la fosto-kaj-relaj bariloj, kie la malnovaj shtonoj, jhetitaj tien, prenitaj el la
kampoj, akumulighis,
(Sovaghfloroj kaj grimoplantoj kaj trudherboj suprenkreskas tra la shtonoj kaj parte
kovras ilin, preter tiuj mi pasas),
Malproksime, malproksime en la arbaro, au promenante pli malfrue en somero, antau ol
mi pripensas kien mi iras,
Sola, flarante la grundan odoron, haltante de tempo al tempo en la silento,
Sola, mi pensis, tamen baldau trupo kolektighas chirkau mi,
Kelkaj iras che mia flanko kaj kelkaj malantaue, kaj kelkaj brakumas miajn brakojn au
kolon,
Ili la spiritoj de karaj amikoj mortaj au vivaj, pli dense ili venas, granda amaso, kaj mi en
la mezo,
Kolektante, disdonante, kantante, tie mi vagas kun ili,
Plukante ion por signoj, jhetante al kiu ajn estas apud mi,
Jen, lilako, kun brancho de pino,
Jen, el mia posho, iom da musko kiun mi detiris de vivkverko en Florido dum ghi
pendis, etendighante malsupren,
Jen, iom da diantoj kaj folioj de lauro, kaj manpleno da salvio,
Kaj jen kion mi nun tiras el la akvo, vadante en la lagetflanko,
(Ho chi tie mi laste vidis lin kiu tenere amas min kaj rerevenas, neniam apartighi de mi,
Kaj chi tiu, ho chi tiu de nun estos la signo de kamaradoj, chi tiu kalama radiko estos,
Intershangu ghin junuloj unu kun alia! neniun donu ghin returne!),
Kaj branchetoj de acero kaj bukedo de sovagha orangho kaj kashtano,
Kaj tigoj de riboj kaj prunfloroj, kaj la aroma cedro,
Tiujn mi, chirkauate de densa nubo da spiritoj,
Vagante, montras au tushas dum mi pasas, au jhetas ilin libere de mi,
Indikante al chiu kion li havu, donante ion al chiu;
Sed kion mi tiras el la akvo che la lagetflanko, tion mi rezervas,
Mi donos da ghi, sed nur al ili kiuj amas kiel mi mem kapablas ami.

NE JHETIGHANTA DE MIA RIPA BRUSTO SOLE

Ne jhetighanta de mia ripa brusto sole,
Ne en suspiroj nokte kolerege, malkontenta pri mi mem,
Ne en tiuj longe eltirataj, malbone subpremataj suspiroj,

Ne en multaj jhuroj kaj promesoj neobservitaj,
Ne en la volo de mia obstina kaj sovagha animo,
Ne en la subtila nutrado de la aero,
Ne en chi tiu batado kaj pulsado de miaj tempioj kaj pojnoj,
Ne en la kuriozaj sistolo kaj diastolo interne, kiuj iun tagon chesos,
Ne en la multaj avidaj deziroj, dirataj al la chielo sole,
Ne en krioj, ridado, defioj, disjhetataj de mi kiam sola malproksime en la sovaghejoj,
Ne en rauketaj anheladoj tra kunpremitaj dentoj,
Ne en sonataj kaj resonataj vortoj, babilantaj vortoj, ehhoj, mortaj vortoj,
Ne en la murmuroj de miaj songhoj dum mi dormas,
Nek la aliaj murmuroj de chi tiuj nekredeblaj revoj de chiu tago,
Nek en la membroj kaj sensoj de mia korpo, kiuj prenas vin kaj delasas vin ade – ne tie,
Ne en iuj au chiu de ili, ho kuntenigho! ho pulso de mia vivo!
Bezonas mi ke vi ekzistu kaj montru vin, iom pli ol en chi tiuj kantoj.

PRI LA TERURA DUBO DE SHAJNOJ

Pri la terura dubo de shajnoj,
Pri la necerteco malgrau chio ke ni povu esti trompitaj,
Ke eble la fido kaj espero estas nur spekulativoj malgrau chio,
Ke eble la identeco preter la tombo estas bela fablo sole,
Eble la objektoj kiujn mi perceptas, la bestoj, plantoj, homoj, montetoj, brilantaj kaj
fluantaj akvoj,
La chieloj de tago kaj nokto, koloroj, densecoj, formoj, eble chi tiuj estas (kiel sendube ili
estas) nur aperajhoj, kaj la reala io estas ankoraŭ konota,
(Kiel ofte ili elsaltas el si mem kvazau por konfuzi min kaj moki min!
Kiel ofte mi pensas ke nek mi scias nek iu homo scias ion pri ili),
Eble shajnantaj al mi tiaj kiaj ili estas (kiel sendube ili nur shajnas) kiel de mia nuna
vidpunkto, kaj povus montrighi (kiel kompreneble ili montrighus) nenio de kio
ili shajnas, au nenio chiuokaze, de tute shanghitaj vidpunktoj;
Al mi tiuj kaj tiuj similaj estas kurioze respondataj de miaj amantoj, miaj karaj amikoj,
Kiam li kiun mi amas vojaghas kun mi au sidas longatempe, tenante min che la mano,
Kiam la subtila aero, la nepalpebla, la sento ke vortoj kaj racio ne validas, nin chirkaŭas
kaj nin trafenetas,
Tiam mi estas sharghata per nemezurebla kaj nepridirebla sagho, mi silentas, mi
bezonas nenion plu,
Mi ne povas respondi la demandon de shajnoj au tiun de identeco preter la tombo,
Sed mi marshas au sidas indiferenta, mi estas kontenta,
Li tenanta mian manon jam komplete kontentigis min.

LA BAZO DE TUTA METAFIZIKO

Kaj nun sinjoroj,
Vorton mi donas resti en viaj memoroj kaj mensoj,
Kiel bazon kaj finalon ankau por tuta metafiziko.

(Tiel al la studentoj la maljuna profesoro,
Che la fermo de sia homplena kurso.)

Studinte la novan kaj antikvan, la Grekajn kaj Germanajn sistemojn,
Kanton studinte kaj asertinte, Fihhton kaj Shelington kaj Hegelon,
Asertinte la doktrinojn de Platono, kaj Sokrato pli granda ol Platono,
Kaj pli granda ol Sokrato serchita kaj asertita, Kriston dian studinte longe,
Mi vidas rememore hodiau tiujn Grekajn kaj Germanajn sistemojn,
Vidas la filozofiojn chiujn, Kristanajn ekleziojn kaj kaj doktrinojn vidas,
Tamen sub Sokrato klare vidas, kaj sub Kristo la dia mi vidas,
La karan amon de homo al sia kamarado, la altiro de amiko al amiko,
De la ghuste geedzighintaj edzo kaj edzino, de infanoj kaj gepatroj,
De urbo al urbo kaj lando al lando.

REGISTRANTOJ EPOKOJN DE NUN

Registrantoj epokojn de nun,
Venu, mi kondukos vin sub chi tiun senemocian eksteron, mi diros al vi kion diri pri mi,
Publikigu mian nomon kaj pendigu mian bildon kiel tiun de la plej tenera amanto,
La portreton de la amiko la amanto kiun lia amiko lia amanto plej shatis,
Kiu ne estis fiera pri siaj kantoj, sed pri la senmezura oceano de amo en si, kaj libere
elvershis ghin,
Kiu ofte promenis solecajn promenojn, pensante pri siaj karaj amikoj, siaj amantoj,
Kiu penseme for de unu kiun li amas, ofte kushis sendorma kaj malkontenta nokte,
Kiu sciis tro bone la doloran, doloran timon ke tiu kiun li amas povus sekrete esti
indiferenta pri li,
Kies plej felichaj tagoj estis malproksime foraj tra kampoj, en arbaroj, sur montetoj, li kaj
alia vagantaj mano en mano, ili du apartaj de aliaj homoj,
Kiu ofte, dum li promenis la stratojn, brakumis per la brako la shultron de sia amiko,
dum la brako de lia amiko kushis sur li ankaŭ.

KIAM MI AUDIS CHE L' FINO DE L' TAGO

Kiam mi audis che l' fino de l' tago ke mia nomo estis ricevita kun laudoj en la kapitolo,
tamen ne estis felicha por mi la nokto kiu sekvis,
Kaj alie, kiam mi festegis, au kiam miaj planoj estis plenumitaj, tamen mi ne estis felicha,
Sed la tagon kiam mi levighis che tagigho de la lito de perfekta sano, refreshigita,
kantanta, enspiranta la maturan spiron de autuno,
Kiam mi vidis la plenlunon en la okcidento palighi kaj malaperi en la matena lumo,
Kiam mi vagis sola sur la plagho, kaj senvestighinte banis min, ridante kun la friskaj
akvoj, kaj vidis la sunon levighi,
Kaj kiam mi pensis ke mia kara amiko mia amanto estis survoje venanta, ho tiam mi
estis felicha,
Ho tiam chiu spiro gustis pli dolche, kaj tiun tutan tagon mia manghajho nutris min pli,

kaj la bela tago bone pasis,
Kaj la sekvanta venis kun egala ghojo, kaj che la sekvanta che vespero venis mia amiko,
Kaj tiun nokton, dum chio estis silenta, mi audis la akvojn rulighi malrapide senchese
supren al la bordoj,
Mi audis la siblantajn susuron de la likvo kaj sabloj, kiel direktataj al mi flustrantaj por
gratuli min,
Char tiu kiun mi plej amas kushas dormante apud mi sub la sama kovrilo en la
malvarmeta nokto,
En la silento en la autunaj lunradioj lia vizagho estis inklinita al mi,
Kaj lia brako kushis leghere chirkau mia brusto – kaj tiun nokton mi estis felicha.

CHU VI ESTAS LA NOVA PERSONO ALTIRATA AL MI?

Chu vi estas la nova persono altirata al mi?
Komence estu avertata, mi estas certe multe pli malsama ol kion vi supozas;
Chu vi supozas ke vi trovos en mi vian idealon?
Chu vi pensas ke estas tiel facile aranghi ke mi estu via amanto?
Chu vi pensas ke la amikeco de mi estus senmiksita kontentigho?
Chu vi pensas ke mi estas fidinda kaj lojala?
Chu vi vidas ne pli malproksimen ol chi tiun fasadon, chi tiun glatan kaj tolereman
manieron de mi?
Chu vi supozas vin antaŭeniranta sur reala grundo al reala heroo homo?
Chu vi havas nenian penson ho revanto ke ghi povas esti tute maja, iluzio?

RADIKOJ KAJ FOLIOJ TUTE SOLAJ

Radikoj kaj folioj tute solaj estas chi tiuj,
Aromoj alportitaj al viroj kaj virinoj de la sovagha arbaro kaj lagetflanko,
Brust-rumekso kaj diantoj de amo, fingroj kiuj chirkauvolvas sin pli strikte ol
grimplantoj,
Elvershoj el la gorghoj de birdoj, kashitaj en la foliaro de arboj kiam la suno jam levighis,
Ventetoj de tero kaj amo, elmetataj de vivantaj bordoj al vi sur la vivanta maro, al vi ho
maristoj!
Frostmaturigitaj beroj kaj Tria-monataj branchetoj proponataj freshaj al junaj personoj,
vagantaj ekstere en la kampoj kiam la vintro disighas,
Am-burghonoj metitaj antaŭ vin kaj en vin, kiu ajn vi estas,
Burghonoj malvolvojtaj lau la malnovaj kutimoj,
Se vi alportos la varmon de la suno al ili, ili malfermighos kaj alportos formon, koloron,
parfumon, al vi,
Se vi farighos la nutrajho kaj la malseko, ili farighos floroj, fruktoj, altaj branĉoj, kaj
arboj.

NE VARMEGO EKFLAMAS KAJ KONSUMAS

Ne varmego ekflamas kaj konsumas,
Ne marondoj hastas enen kaj elen,
Ne la aero, delica kaj seka, la aero de matura somero, facile kunportas blankajn
lanugbulojn de miriadoj da semoj,
Disblovataj, velantaj graciaj, por ekfali kien ili ekfalos,
Ne tiuj, ho neniuj el tiuj pli ol la flamoj de mi, konsumantaj, brulantaj por la amo de li
kiun mi amas,
Ho neniuj pli ol mi hastanta enen kaj elen;
Chu la tajdo hastas, serchante ion, kaj neniam rezignas? ho mi same,
Ho ne lanugbuloj nek parfumoj, nek la altaj pluv-eligantaj nuboj, estas portataj tra la
libera aero,
Iom pli ol mia animo estas portata tra la libera aero,
Disblovata en chiuj direktoj, ho amo, por amikeco, por vi.

FLUETU, GUTOJ

Fluetu, gutoj! miajn bluajn vejnojn forlasante!
Ho gutoj de mi! fluetu, malrapidaj gutoj,
Malkashe de mi falante, gutu, sangantaj gutoj,
De vundoj faritaj liberigi vin de kie vi estis enprizonigitaj,
De mia vizagho, de mia frunto kaj lipoj,
De mia brusto, de interne, kie mi estis kashita, elurghu vin, rughaj gutoj, konfesaj gutoj,
Makulu chiun paghon, makulu chiun kanton kiun mi kantas, chiun vorton kiun mi
diras, sangaj gutoj,
Lasu ilin koni vian skarlatan varmegon, lasu ilin rebrili,
Saturu ilin per vi mem, tute hontaj kaj malsekaj,
Ardu sur chion kion mi skribis au skribos, sangantaj gutoj,
Lasu ghin tutan esti vidata en via lumo, rughighantaj gutoj.

URBO DE FESTENOJ

Urbo de festenoj, promenoj, kaj ghojoj,
Urbo, kiun tio ke mi vivis kaj kantis meze de vi iun tagon faros fama,
Ne la pompoj de vi, ne viaj shanghighantaj scenoj, viaj spektakloj, repagas min,
Ne la senfinaj vicoj de viaj domoj, nek la shipoj che la varfoj,
Nek la procesioj en la stratoj, nek la lumaj fenestroj kun varoj en ili,
Nek konversi kun kleruloj, au bone paroli miaflanke che vesperfestoj au festenoj;
Ne tiuj, sed dum mi pasas, ho Manhatano, via ofta kaj rapida ekbrilo de okuloj
proponantaj al mi amon,
Proponantaj respondon al mia propra – tiuj chi repagas min,
Amantoj, nur konstantaj amantoj, repagas min.

RIGARDU CHI TIUN MALHELAN VIZAGHON

Rigardu chi tiun malhelan vizaghon, chi tiujn grizajn okulojn,
Chi tiun barbon, la blankan lanon ne tonditan sur mia nuko,
Miajn brunajn manojn kaj mian silentan manieron sen charmo;
Tamen venas unu, Manhatanano, kaj chiam che disigho kisas min leghere sur la lipoj
kun fortika amo,
Kaj mi sur la transirejo de la strato au sur la ferdeko de la shipo kison redonas,
Ni observas tiun saluton de Amerikaj kamaradoj, teraj kaj maraj,
Ni estas tiaj du naturaj kaj nezorgaj personoj.

MI VIDIS EN LUIZIANO VIVKVERKON KRESKANTA

Mi vidis en Luiziano vivkverkon kreskanta,
Tute sola ghi staris kaj la musko dependis de la branĉoj,
Sen ia kompano ghi kreskis tie, eldirante ghojajn foliojn de malhelverdo,
Kaj ghia aspekto, kruda, nefleksema, fortega, pensigis min pri mi mem,
Sed mi demandis min kiel ghi povus eldiri ghojajn foliojn starante sola tie sen ghia
amiko proksime, char mi sciis ke mi ne povus,
Kaj mi derompis brancheton kun certa nombro da folioj sur ghi, kaj chirkauvolis iom
da musko,
Kaj forportis ghin, kaj metis ghin chevide en mia chambro,
Ghi ne estas bezonata por memori min kiel pri miaj propraj karaj amikoj,
(Char shajnas ke aktuale mi pensas pri malmulto alia ol pri ili),
Tamen ghi restas por mi kurioza simbolo, ghi pensigas min pri la vireca amo;
Malgrau chio tio, kaj kvankam la vivkverko briletas tie en Luiziano soleca en largha
plata loko,
Eldirante ghojajn foliojn ghian tutan vivon sen amiko amanto proksime,
Mi tre bone scias ke mi ne povus.

AL FREMDULO

Pasanta fremdulo! vi ne scias kiel sopire mi rigardas al vi,
Vi devas esti li kiun mi serchis, au shi kiun mi serchis, (ghi venas al mi kiel de songho),
Mi ie certe vivis vivon de ghojo kun vi,
Chio estas rememorata dum ni hastas unu preter la alia, fluidaj, amemaj, chastaj,
maturighintaj,
Vi elkreskis kun mi, estis knabo kun mi au knabino kun mi,
Mi manghis kun vi kaj dormis kun vi, via korpo farighis ne la via sole, nek lasis mian
korpon la mia sole,
Vi donas al mi la plezuron de viaj okuloj, vizagho, dum ni pasas unu la alian, vi prenas
mian barbon, bruston, manojn, rericive,
Mi devas ne paroli al vi, mi devas pensi pri vi kiam mi sidas sola au maldormas nokte
sola,
Mi devas atendi, mi ne dubas, ke mi nepre renkontos vin denove,
Mi devas prizorgi ke mi ne perdu vin.

CHI TIUN MOMENTON, SOPIRANTA KAJ PENSEMA

Chi tiun momenton, sopiranta kaj pensema, dum mi sidas sola,
Shajnas al mi ke estas aliaj homoj en aliaj landoj, sopirantaj kaj pensemaj,
Shajnas al mi ke mi povas transrigardi kaj vidi ilin en Germanujo, Italujo, Francujo,
Hispanujo,
Au tre, tre malproksime, en Chinujo, au en Rusujo au Japanujo, parolantajn aliajn
lingvojn,
Kaj shajnas al mi ke, se mi povus koni tiujn homojn, mi alligighus al ili, kiel mi alligighas
al homoj en miaj propraj landoj,
Ho mi scias ke ni estus fratoj kaj amantoj,
Mi scias ke mi estus felicha kun ili.

MI AUDAS KE ESTIS IMPUTITE KONTRAU MI

Mi audas ke estis imputite kontrau mi ke mi klopodis detrui instituciojn,
Sed vere mi estas nek por nek kontrau institucioj,
(Kion ja mi havas komune kun ili? au kion kun la detruo de ili?),
Nure mi volas starigi en la Manhatana kaj en chiu urbo de tiuj chi Shtatoj, landinternaj
kaj marbordaj,
Kaj en la kampoj kaj arbaroj, kaj super chiu kilo, malgranda au granda, kiu kavigas la
akvon,
Sen konstruajhoj au reguloj au komisiitoj au ia argumento,
La institucion de la kara amo de kamaradoj.

LA PRERIAN HERBON DISIGANTE

La prerian herbon disigante, ghian specialan odoron spirante,
Mi postulas de ghi la spiritajhojn respondantajn,
Postulas la plej abundan kaj proksiman kamaradecon de homoj,
Postulas al la tigoj levighi vortoj, agoj, estajhoj,
Tiuj de la vasta atmosfero, krudaj, sunlumigataj, freshaj, nutraj,
Tiuj kiuj iras lau sia propra irado, erektaj, pashantaj kun libereco kaj komandemo,
kondukantaj, ne sekvantaj,
Tiuj kun neniam subpremita audaco, tiuj kun dolcha kaj fortika karno, sen malpuro,
Tiuj kiuj rigardas indifere en la vizaghojn de Prezidentoj kaj guberniestroj kvazau diri
Kiu estas vi?
Tiuj de ternaskita pasio, simplaj, neniam devigataj, neniam obeemaj,
Tiuj de landinterna Ameriko.

KIAM MI RIGARDAS LA KONKERITAN FAMON

Kiam mi rigardas la konkeritan famon de herooj kaj la venkojn de potencaj generaloj, mi
ne envias la generalojn,
Nek la Prezidenton en lia Prezidenteco, nek la ricolon en lia granda domo,
Sed, kiam mi audas pri la frateco de amantoj, kiel estis pri ili,
Kiel kune tra vivo, tra dangheroj, malamo, senshanghe, longe kaj longe,
Tra juneco kaj tra la mez- kaj maljunagho, kiel neshancelighemaj, kiel amemaj kaj fidelaj
ili estis,
Tiam mi estas pensema – mi haste formarshas, plenigite per la plej amara envio.

NI DU KNABOJ, KUNE ALKROCHIGHANTAJ

Ni du knaboj, kune alkrochighantaj,
Unu la alian neniam forlasantaj,
Supren kaj malsupren lau la vojoj irantaj, Norden kaj Suden ekskursojn farantaj,
Potencon ghuantaj, kubutojn strechantaj, fingrojn kaptantaj,
Armitaj kaj sentimaj, manghantaj, trinkantaj, dormantaj, amantaj,
Nenian leghon malpli ol ni mem agnoskantaj, velantaj, soldatantaj, shtelantaj,
minacantaj,
Avarulojn, lakeojn, pastrojn timigantaj, aeron spirantaj, akvon trinkantaj, sur la herbejo
au marbordo dancantaj,
Urbojn eltordantaj, ripozon malestimantaj, statutojn mokantaj, malfortecon chasantaj,
Plenumante nian invadon.

PROMESO AL KALIFORNIO

Promeso al Kalifornio,
Au landinternen al la grandaj pashtistaj Ebenajhoj, kaj antauen al la Pugheta Markolo kaj
Oregono;
Loghante okcidente iom pli longe, baldau mi vojaghos al vi, resti, instrui la fortikan
Amerikan amon,
Char mi scias tre bone ke mi kaj la fortika amo taugas inter vi, landinterne, kaj lau la
Okcidenta maro;
Char chi tiuj Shtatoj tendencas landinternen kaj al la Okcidenta maro, kaj mi tendencos
tien ankau.

CHI TIE LA PLEJ MALFORTAJ FOLIOJ DE MI

Chi tie la plej malfortaj folioj de mi kaj tamen miaj plej forte daurantaj,
Chi tie mi ombras kaj kashas miajn pensojn, mi mem ne malkashas ilin,
Kaj tamen ili malkashas min pli ol chiuj miaj aliaj poemoj.

NENIAN LABORSHPARANTAN MASHINON

Nenian laborshparantan mashinon,
Nek malkovron mi faris,
Nek povos mi lasi post mi ian richan testamenton fondi hospitalon au bibliotekon,
Nek rememoron de ia ago de kuragho por Ameriko,
Nek literaturan sukceson nek intelektan, nek libron por la librobreto,
Sed kelkajn karolojn vibrantajn tra l'aero mi postlasas,
Por kararadoj kaj amantoj.

EKVIDO

Ekvido, tra interstico, kaptita,
De amaso da laboristoj kaj veturigistoj en drinkejchambro chirkau la forno malfrue dum
vintronokto, kaj mi nerimarkita, sidanta en angulo,
De junulo kiu amas min kaj kiun mi amas silente alvenanta kaj sin sidiganta proksime,
ke li povu teni min che la mano,
Longatempe inter la bruoj de venado kaj irado, de trinkado kaj sakrado kaj la fia sherco,
Tie ni du, kontentaj, felichaj esti kune, parolantaj malmulte, eble ne unu vorton.

FOLIO POR MANO EN MANO

Folio por mano en mano;
Vi naturaj personoj, maljunaj kaj junaj!
Vi sur Misisipo kaj sur chiuj enfluriveroj kaj marchokrekoj de Misisipo!
Vi afablaj boatistoj kaj mehhanistoj! vi kruduloj!
Vi du! kaj chiuj procesioj movighantaj lau la stratoj!
Mi deziras min infuzi inter vi ghis mi vidos ke estas kutime por vi marshi mano en
mano.

TERO, MIA SIMILULO

Tero, mia similulo,
Kvankam vi aspektas tiel indifere, amplekse, kaj sfere tie,
Mi nun suspektas ke tio ne estas tuta;
Mi nun suspektas ke estas io sovagha en vi, elrompighonta,
Char atleto enamighis al mi, kaj mi al li,
Sed al li estas io sovagha kaj terura en mi, elrompighonta,
Mi ne audacas diri ghin en vortoj, ech ne en chi tiuj kantoj.

MI SONGHIS EN SONGHO

Mi songhis en songho ke mi vidis urbon nevenkeblan de la atakoj de la tuto de la cetero
de la tero,
Mi songhis, ke ghi estas la nova urbo de Amikoj,
Nenio estis pli granda tie ol la eco de fortika amo, ghi superis la ceteron,
Ghi estis vidata chiun horon en la agoj de la homoj de tiu urbo,
Kaj en chiuj iliaj rigardoj kaj vortoj.

KION VI PENSAS KE MI ENMANIGAS MIAN PLUMON?

Kion vi pensas ke mi enmanigas mian plumon por registri?
La batalshipon, perfektforman, majestan, kiun mi vidis pasi la malproksimon hodiau je
plena velaro?
La belegojn de la pasinta tago? au la belegon de la nokto kiu envolvas min?
Au la fanfaronatan gloron kaj kreskadon de la granda urbo sternita chirkau mi? – ne;
Sed nur pri du simplaj homoj kiujn mi vidis hodiau sur la varfo meze de la amaso,
disighantaj la disighon de karaj amikoj,
La restonto pendighis sur la kolo de la alia kaj pasie kisis lin,
Dum la forironto strikte premis la restonton en siaj brakoj.

AL LA ORIENTO KAJ AL LA OKCIDENTO

Al la Oriento kaj al la Okcidento,
Al la homo de la Marflanka Shtato kaj de Pensilvanio,
Al la Kanadano de la nordo, al la Sudulo kiun mi amas,
Tiujn kun perfekta fido, bildigi vin kiel min mem, la ghermoj estas en chiuj homoj,
Mi kredas ke la chefa signifo de chi tiuj Shtatoj estas fondi superban amikecon,
ekzaltitan, antaue nekonatan,
Char mi perceptas ke ghi atendas, kaj chiam atendadis, latentan en chiuj homoj.

FOJE KUN IU KIUN MI AMAS

Foje kun iu kiun mi amas mi plenigas min per kolero pro timo ke mi eligas neredonitan
amon,
Sed nun mi pensas ke estas neniam neredonita amo, la pago estas certa en ia maniero au
alia,
(Mi amis certan personon arde kaj mia amo ne estis redonita,
Tamen el tio mi skribis chi tiujn kantojn.)

AL OKCIDENTA KNABO

Multajn aferojn sorbendajn mi instruas por helpi vin ighi lernanto mia,
Tamen se sango kiel mia ne chirkauiras en viaj vejnoj,
Se vi ne estu silente elektata de amantoj kaj ne silente elektas amantojn,

Kiel utilas ke vi celas ighi lernanto mia.

FIRMANKRITA ETERNE HO AMO!

Firmankrita eterne ho amo! ho virino kiun mi amas,
Ho novedzino! ho edzino! pli nerezistebla ol mi povas diri, la penso pri vi!
Poste aparta, kiel senkorpigita au naskita alia,
Etera, la lasta atleta realajho, mia konsolo,
Mi supreniras, mi shvebas en la regionoj de via amo, ho homo,
Ho partoprenanto de mia vagada vivo.

INTER LA HOMAMASO

Inter la viroj kaj virinoj la homamaso,
Mi perceptas unu elektantan min per sekretaj kaj diaj signoj,
Agnoskantan neniun alian, ne patrinon, patron, edzinon, edzon, fraton, infanon, iun pli
proksima ol mi estas,
Unuj estas konfuzitaj, sed tiu ne – tiu konas min.

Ha amanto kaj perfekta egalulo,
Mi intencis ke vi malkovru min tiel per etaj nerektajhoj,
Kaj kiam mi renkontos vin, intencas malkovri vin per la similo en vi.

HO VI AL KIU MI OFTE KAJ SILENTE VENAS

Ho vi al kiu mi ofte kaj silente venas tien kie vi estas, ke mi povu esti kun vi,
Dum mi marshas che via flanko au sidas proksime, au restas en la sama chambro kun vi,
Malmulte vi konscias la subtilan elektran fajron kiu por vi ludas interne de mi.

TIU OMBRO MIA SIMILULO

Tiu ombro mia similulo kiu iras tien kaj reen, serchante vivrimedojn, babilante,
marchandante,
Kiel ofte mi trovas min staranta kaj ghin rigardanta kie ghi flirtas,
Kiel ofte mi demandas kaj dubas chu tio estas vere mi;
Sed inter amantoj kaj karolante chi tiujn kantojn,
Ho mi neniam dubas chu tio estas vere mi.

PLENA DE VIVO NUN

Plena de vivo nun, kompakta, videbla,
Mi, havanta kvardek jarojn, la okdek-trian jaron de la Shtatoj,

Al iu jarcenton de nun au iun nombron da jarcentoj de nun,
Al vi ankoraŭ nenaskita ĉi tiuj, serĉantaj vin.

Kiam vi legas ĉi tiujn, mi, kiu estis videbla, estas farighinta nevidebla,
Nun estas vi, kompakta, videbla, realiganta miajn poemojn, serĉanta min,
Imaganta kiel felicha vi estus se mi povus esti kun vi kaj farighi via kamarado;
Estu kvazaŭ mi estus kun vi. (Ne estu tro certa ke mi ne estas nun kun vi.)

SALUTON AL LA MONDO!

1

Ho prenu mian manon Walt Whitman!
Tiaj glisantaj mirindajhoj! tiaj vidoj kaj sonoj!
Tiaj kunigitaj nefinitaj cheneroj, chiu krochita al la sekvanta,
Chiu respondanta al chiuj, chiu dividanta la teron kun chiuj.

Kio plilarghighas interne de vi Walt Whitman?
Kiaj ondoj kaj grundoj eksudantaj?
Kiaj regionoj? kiaj personoj kaj urboj estas chi tie?
Kiuj estas la infanoj, iuj ludantaj, iuj dormantaj?
Kiuj estas la knabinoj? kiuj estas la edzinighintaj virinoj?
Kiuj estas la grupoj da maljunaj viroj, irantaj malrapide kun la brakoj chirkau la koloj
unuj de la aliaj?
Kiaj riveroj estas chi tiuj? kiaj arbaroj kaj fruktoj estas chi tiuj?
Kiel nomighas la montoj kiuj levighas tiel altaj en la nebuloj?
Kiaj miriadoj da loghejoj estas ili, plenigitaj de loghantoj?

2

Interne de mi latitudo plilarghighas, longitudo plilongighas,
Azio, Afriko, Europo, estas oriente – Ameriko estas prizorgata okcidente,
Bendante la rondajhon de la tero volvighas la varmega ekvatoro,
Kurioze norde kaj sude turnighas la aksofinoj,
Interne de mi estas la plej longa tago, la suno rondiras en klinantaj rondoj, ghi ne
subiras dum monatoj,
Strechite kun la tempo interne de mi, la noktomeza suno nur levighas super la horizonto
kaj sinkas denove,
Interne de mi, zonoj, maroj, kataraktoj, arbaroj, vulkanoj, grupoj,
Malajzio, Polinezio, kaj la grandaj insuloj de la Antiloj.

3

Kion vi audas Walt Whitman?

Mi audas la laboriston kantanta kaj la edzinon de la bienisto kantanta,
Mi audas en la malproksimo la sonojn de infanoj kaj de bestoj frue en la tago,
Mi audas rivalemajn kriojn de Australianoj, postkurantaj la sovaghajn chevalojn,
Mi audas la Hispanan dancon kun kastanjetoj en la kashtana ombro, je la ribeko kaj
gitaro,
Mi audas chiamajn ehhojn de la Tamiso,
Mi audas ferocajn Francajn liberecokantojn,
Mi audas de la Itala juladisto la muzikan recitativon de malnovaj poemoj,
Mi audas la lokustojn en Sirio, dum ili frapas la grenon kaj herbon per la pluvegoj de
iliaj teruraj nuboj,

Mi audas la koptan refrenon chirkau la sunsubiro, penseme falantan sur la bruston de la
 nigra respektinda vasta patrino Nilo,
 Mi audas la pepon de la Meksikia mulisto, kaj la sonorilojn de la mulo,
 Mi audas la Araban muezinon, vokantan de la supro de la moskeo,
 Mi audas la Kristanajn pastrojn che la altaroj de iliaj preghejoj, mi audas la respondajn
 bason kaj sopranon,
 Mi audas la krion de la Kozako, kaj la vohon de la maristo ekiranta maren che Okotsko,
 Mi audas la raslon de la sklavigajho dum la sklavoj antauenmarshas, dum la pezaj rotoj
 preterpasas duope kaj triope kunligitaj per pojnokatenoj kaj maleolokatenoj,
 Mi audas la Hebreon leganta siajn kronikojn kaj psalmojn,
 Mi audas la ritmajn mitojn de la Grekoj, kaj la fortajn legendojn de la Romanoj,
 Mi audas la rakonton de la dia vivo kaj sanga morto de la bela Dio la Kristo,
 Mi audas la Hinduon instruanta al sia favorata lernanto la amojn, militojn, sentencojn,
 transdonitajn sekure ghis chi tiu tago de poetoj kiuj verkis antau trimil jaroj.

4

Kion vi vidas Walt Whitman?

Kiu estas ili kiujn vi salutas, kaj kiuj unu post alia salutas vin?

Mi vidas grandan rondan mirindajhon, rulighantan tra spaco,
 Mi vidas etajn bienojn, vilaghetojn, ruinojn, tombeojn, malliberejojn, fabrikojn, palacojn,
 domachojn, hatojn de barbaroj, tendojn de nomadoj sur la surfaco,
 Mi vidas la ombratan parton sur unu flanko, kie la dormantoj dormas, kaj la sunlumatan
 parton sur la alia flanko,
 Mi vidas la kuriozan rapidan shanghadon de la lumo kaj ombro,
 Mi vidas malproksimajn landojn, tiel realaj kaj proksimaj al la loghantoj de ili kiel mia
 lando estas al mi.

Mi vidas abundajn akvojn,
 Mi vidas montajn pintojn, mi vidas la segilmontojn de Andoj kie ili etendighas,
 Mi vidas klare Himalajojn, Chian-Shaojn, Altajojn, Gautojn,
 Mi vidas la gigantajn suprojn de Elbruzo, Kazbeko, Bazardjhusio,
 Mi vidas Stiriajn Alpoj, kaj Karnakajn Alpoj,
 Mi vidas Piraneojn, Balkojn, Karpatojn, kaj norde Dofrafildojn, kaj mare Monton
 Hekla,
 Mi vidas Vesuvion kaj Etnon, la Montojn de la Luno, kaj la Rughajn Montojn de
 Madagaskaro,
 Mi vidas la Libian, Arabian, kaj Azian dezertojn,
 Mi vidas grandegajn timigajn Arktajn kaj Antarktajn glacimontojn,
 Mi vidas la superajn oceanojn kaj la malsuperajn, Atlantikan kaj Pacifikan, la Maron
 de Meksikio, la Brazilian Maron, la Maron de Peruo,
 La akvojn de Hindustano, la Chinan Maron, kaj la Golfon de Gvineo,
 La Japanajn akvojn, la belan golfon de Nagasakio, terchirkauita en siaj montoj,
 La etendighon de la Balta, Kaspia, Botnia, la Britajn bordojn, kaj la Golfon de Biskajo,
 Klarsunan Mediteraneon, kaj de unu al alia de ghiaj insuloj,
 La Blankan Maron, kaj la maron chirkau Groenlando.

Mi vidas la maristojn de la mondo,
Kelkaj estas en shtormoj, kelkaj en la nokto kun la gvatistaro gvatanta,
Kelkaj drivantaj senhelpe, kelkaj kun kontaghaj malsanoj.

Mi vidas la vel- kaj vaporshipojn de la mondo, kelkaj en amasoj en la haveno, kelkaj
vojaghantaj,
Kelkaj preterpasas la Kabon de Shtormoj, kelkaj la Kabon Verdan, aliaj la kabojn
Gvardafujo, Bono, au Bajhadoro,
Aliaj Kabon Dondran, aliaj pasas la Markolon de Sundo, aliaj Kabon Lopatkan, aliaj
la Markolon de Beringo,
Aliaj Kabon Hornan, aliaj velas la Golfon de Meksikio au lau Kubo au Haitio, aliaj la
Havenon de Hudsono au la Havenon de Bafino,
Aliaj pasas la Markolon Doveran, aliaj eniras la Lavon, aliaj la Fjordon de Solvajo, aliaj
chirkauiras la Kabon Klaran, aliaj la Finon Landan,
Aliaj trairas la Sudan Maron au la Sheldon,
Aliaj kiel venantoj kaj irantoj che Gibraltaro au Dardaneloj,
Aliaj severe sin pelas tra la nordaj vintro-amasoj,
Aliaj malsupreniras au supreniras Obion au Lenon,
Aliaj Nigheron au Kongon, aliaj Induson, Bramaputron kaj la Kamboghan,
Aliaj atendas kun plena vaporpremo pretaj ekveturi en la havenoj de Australio,
Atendas che Liverpolo, Glasgovo, Dublino, Marsejlo, Lisbono, Napolo, Hamburgo,
Bremeno, Bordofo, Hago, Kopenhago,
Atendas che Valparaiso, Rio-de-Jhanejro, Panamio.

5

Mi vidas la trakojn de la fervojoj de la tero,
Mi vidas ilin en Britio, mi vidas ilin en Europo,
Mi vidas ilin en Azio kaj en Afriko.

Mi vidas la elektrajn telegrafojn de la tero,
Mi vidas la paperstriojn de la novajhoj de la militoj, mortoj, perdoj, gajnoj, pasioj,
de mia gento.

Mi vidas la longajn riverostriojn de la tero,
Mi vidas Amazonon kaj la Paragvajan,
Mi vidas la kvar grandajn riverojn de Chinio, Amuron, la Flavan, Jangzion,
kaj la Perlan,
Mi vidas kie Sejno fluas, kaj kie Danubo, Luaro, Rodano, kaj Gvadalkviviro fluas,
Mi vidas la serpentumadojn de Volgo, Dnepro, Odro,
Mi vidas la Toskanon malsupreniranta lau Arno, kaj la Venecianon lau Pado,
Mi vidas la Grekan mariston veturanta el la Egea Golfo.

6

Mi vidas la siton de la malnova imperio de Asirujo, kaj tiun de Persujo, kaj tiun de

Hindujo,
Mi vidas la faladon de Gango super la alta rando de Saukaro.

Mi vidas la lokon de la ideo de la Dio enkarnigita de avataroj en homaj formoj,
Mi vidas la situojn de la sukcedoj da pastroj sur la tero, orakoloj, oferitoj, bramanoj,
sabianoj, lamaoj, monahoj, muftioj, admonantoj,
Mi vidas kie la druidoj marshis la boskojn de Mono, mi vidas la viskon kaj verbenon,
Mi vidas la templojn de la mortoj de la korpoj de Dioj, mi vidas la malnovajn
signifantojn.

Mi vidas la Kriston manghanta la panon de sia lasta vespermangho meze de junuloj kaj
maljunuloj,
Mi vidas kie la forta dieca juna viro la Herkulo laboregis fidele kaj longe kaj poste
mortis,
Mi vidas la lokon de la senkulpa richa vivo kaj malfelicha sorto de la bela nokta filo, la
plenmembra Bakhho,
Mi vidas Knefon, florantan, blue vestitan, kun la krono de plumoj sur la kapo,
Mi vidas Hermon, nesuspektatan, mortantan, forte amatan, diranta al la popolo Ne
ploru pro mi,
Chi tio ne estas mia vera lando, mi vivis ekzilita el mia vera lando, mi nun reiras tien,
Mi reiras al la chielaj sferoj, kien chiu iras siavice.

7

Mi vidas la batalkampojn de la tero, herbo kreskas sur ili kaj floroj kaj greno,
Mi vidas la spurojn de antikvaj kaj modernaj ekspedicioj.

Mi vidas la sennomajn masonajhojn, imponajn mesaghojn de l' nekonataj okazoj, herooj,
registrojn de la tero.

Mi vidas la lokojn de la sagaoj,
Mi vidas pinojn kaj abiojn, shiritajn de nordaj blovegoj,
Mi vidas granitajn shtonegojn kaj klifojn, mi vidas verdajn herbejojn kaj lagojn,
Mi vidas la tombkairnojn de Skandinavaj batalistoj,
Mi vidas ilin levitajn alte per shtonoj apud la rando de senripozaj oceanoj por ke la
spiritoj de la mortintoj, kiam ilin tedas iliaj kvietaj tomboj, povu levighi tra la
tumuloj kaj rigardi la jhetighantaj ondegojn, kaj esti refreshigataj de shtormoj,
grandegeco, libereco, agado.

Mi vidas la stepojn de Azio,
Mi vidas la tumulojn de Mongolio, mi vidas la tendojn de la Kalmukoj kaj Baskiroj,
Mi vidas la nomadajn tribojn kun herdoj da oksoj kaj bovinoj,
Mi vidas la altebenajhojn nohitajn de ravinoj, mi vidas la ghangalojn kaj dezertojn,
Mi vidas la kamelon, la sovaghan chevalon, la otidon, la dikvostan shafon, la antilopon,
kaj la tunelantan lupon.

Mi vidas la altajhojn de Abisinio,

Mi vidas arojn da kaproj pashtighantaj, mi vidas la figujon, tamarindujon, daktilujon,
Kaj vidas kampojn da teftritiko kaj lokojn de verdajho kaj oro.

Mi vidas la Brazilan vakeron,
Mi vidas la Bolivianon suprenirantan Monton Soratan,
Mi vidas la Gauchon transirantan la ebenajhon, mi vidas la nekompareblan rajdanton de
chevaloj kun sia lazo sur la brako,
Mi vidas tra la pampoj la postkuradon post sovaghaj brutoj por iliaj feloj.

8

Mi vidas la regionojn de negho kaj glacio,
Mi vidas la akravidan Samojedon kaj la Finnon,
Mi vidas la fokserchanton en sia boato pretigantan sian lancon,
Mi vidas la Siberianon sur sia malpeza sledo tirata de hundoj,
Mi vidas la focenchantojn, mi vidas la balenshipanarojn de la Suda Pacifiko kaj la
Norda Atlantiko,
Mi vidas la klifojn, glaciriverojn, torentojn, valojn, de Svislando – mi notas la longajn
vintrojn kaj la izolecon.

Mi vidas la urbojn de la tero kaj faras min hazarde parto de ili,
Mi estas vera Parizano,
Mi estas enloghanto de Vieno, Petroburgo, Berlino, Konstantinopolo,
Mi estas de Adelajdo, Sidnejo, Melburno,
Mi estas de Londono, Manchestro, Bristol, Edinburgo, Limeriko,
Mi estas de Madrido, Kadizo, Barcelono, Oporto, Liono, Bruselo, Berno, Frankforto,
Stutgarto, Turino, Florenco,
Mi apartenas al Moskvo, Krakovo, Varsovio, au norde en Kristianio au Stokholmo, au en
la Siberia Irkutsko, au en iu strato en Islando,
Mi malsupreniras sur chiujn tiujn urbojn, kaj levighas de ili denove.

10

Mi vidas vaporojn, elspirighantajn de neesploritaj landoj,
Mi vidas la sovaghulojn, la pafarkon kaj sagon, la venenitan sageton, la fetichon, kaj la
obion.

Mi vidas Afrikajn kaj Aziajn urbetojn,
Mi vidas Algheron, Tripolon, Dernon, Mogadoron, Timbaktuon, Monrovion,
Mi vidas la svarmojn de Pekino, Kantono, Benareso, Delhio, Kalikato, Tokio,
Mi vidas la Krumanon en sia hhato, kaj la Dahomanon kaj Ashantianon en siaj hhatoj,
Mi vidas la Turkon fumanta opion en Alepo,
Mi vidas la pitoreskajn homamasojn che la foiroj de Hhivo kaj tiuj de Herato,
Mi vidas Teheranon, mi vidas Maskaton kaj Medinon kaj la interkushantaj sablojn, mi
vidas la karavanojn penantaj antauen,
Mi vidas Egiptujon kaj la Egiptojn, mi vidas la piramidojn kaj obeliskojn,
Mi rigardas chizitajn historiojn, registrojn de venkantaj reghoj, dinastioj, tranchitajn en

slabojn de sabloshtono, au sur granitajn blokojn,
Mi vidas che Memfiso mumikavojn, enhavantajn mumiojn, balzamitajn, vinditajn en
tolo, kushintajn tie dum multe da jarcentoj,
Mi rigardas la falintan Tebanon, la grandglobajn okulojn, la flankenpendantan kolon, la
manojn kunmetitajn trans la brusto.

Mi vidas chiujn servistojn de la tero laborantaj,
Mi vidas chiujn prizonulojn en la prizonoj,
Mi vidas la difektajn homajn korpojn de la tero,
La blindajn, la surdajn kaj mutajn, idiotojn, ghibulojn, lunatikojn,
La piratojn, shtelistojn, perfidantojn, murdistojn, sklavfaristojn de la tero,
La senpovajn infanojn, kaj la senpovajn maljunajn virojn kaj virinojn.

Mi vidas masklajn kaj femalajn chie,
Mi vidas la serenajn fratecon de filozofoj,
Mi vidas la konstruemon de mia gento,
Mi vidas la rezultojn de la persistemo kaj laboremo de mia gento,
Mi vidas rangojn, kolorojn, barbarecojn, civilizojn, mi iras inter ili, mi enmiksas min
indiferente,
Kaj mi salutas chiujn enloĝantojn de la tero.

11

Vi kiu ajn vi estas!
Vi filino au filo de Anglujo!
Vi de la potencaj Slavaj triboj kaj imperioj! vi Ruso en Rusujo!
Vi malheldevena, nigra, dianima Afrikano, granda, fajnkapa, noble formita, superbe
destinita, egalrajta kun mi!
Vi Norvego! Svedo! Dano! Islandano! vi Pruso!
Vi Hispano de Hispanujo! vi Portugalano!
Vi Francino kaj Franco de Francujo!
Vi Belgo! vi liberecamanto de Nederlando! (vi raso de kiu mi mem devenis);
Vi fortika Austriano! vi Lombardo! Huno! Bohemo! bienisto de Stirujo!
Vi najbaro de Danubo!
Vi laboristo de Rejno, Elbo, au Vesero! vi laboristino ankaŭ!
Vi Sardo! vi Bavaro! Shvabo! Sakso! Valahho! Bulgaro!
Vi Romano! Napolano! vi Greko!
Vi supla matadoro en la areno che Sevilo!
Vi montano vivanta senleghe sur Tauruso au Kaukazo!
Vi Bohha chevalisto observanta viajn chevalinojn kaj virchevalojn pashtighantaj!
Vi belkorpa Perso, plenrapide sele pafanta sagojn al la celo!
Vi Chino kaj Chinino de Chinujo! vi Tartaro de Tartarujo!
Vi virinoj de la tero subalternaj che viaj taskoj!
Vi Judo vojaghanta en via maljunagho tra chiu risko por stari unu fojon sur Siria
grundo!
Vi aliaj Judoj atendantaj en chiuj landoj vian Mesion!
Vi enpenso Armeno, pripensanta apud iu rivereto de Eufrato! vi strabanta inter la ruinoj

de Ninevo! vi supreniranta la monton Ararato!
Vi dolorpieda pilgrimanto, bonveniganta la malproksiman brileton de la minaretoj de Mekko!
Vi shejkoj lau la etendo de Suezio al Bab-el-mandebo regantaj viajn familiojn kaj tribojn!
Vi olivkultivisto zorganta viajn fruktojn sur kampoj de Nazareto, Damasko, au Lago Tiberiada!
Vi Tibeta negocisto sur la larga landinterno au marchandanta en la magazenoj de Lasso!
Vi Japano au Japanino! vi enloghanto en Madagaskaro, Cejlono, Sumatro, Borneo!
Chiu vi kontinentanoj de Azio, Afriko, Europano, Australio, indiferece la loko!
Chiu vi sur la sennombraj insuloj de la arkipelagoj de la maro!
Kaj vi de jarcentoj de nun kiam vi auskultas min!
Kaj vi chiu kaj chie, kiun mi ne specifas sed inkludas tute same!
Sanon al vi! bonvolon al vi chiu, de mi kaj Ameriko senditan!
Chiu el ni neevitebla,
Chiu el ni senlima – chiu rajtigita sur la tero,
Chiu el ni povanta scii la eternajn signifojn de la tero,
Chiu el ni chi tie tute same diece kiel iu ajn estas chi tie.

12

Vi Hotentoto kun klaketanta palato! vi lanharaj hordoj!
Vi posedataj personoj lasantaj fali shvitgutojn au sanggutojn!
Vi homaj specoj kun la nekompreneblaj chiamimponaj vizaghoj de brutoj,
Vi kompatinda kobuo, kiun la plej malnoblaj de la ceteraj malestimas malgrau via tuta glimetanta lingvo kaj spiriteco!
Vi nana Kamchatkano, Groenlandano, Lapano!
Vi Australia negro, nuda, rugha, fulga, kun protruda lipo, rampanta, serchanta vian manghajhon!
Vi Kafro, Berbero, Sudanano!
Vi malgrasacha, kruda, neinstruita Bedueno!
Vi plagsvarmoj en Madraso, Nankino, Kabulo, Kajro!
Vi malklera vaganto de Amazonio! vi Patagoniano! vi Fighiano!
Mi ankau ne preferas aliajn tiel multe antau vi,
Mi ne diras ech unu vorton kontrau vi, tie malantaue kie vi staras,
(Vi antauenvenos kun tempo al mia flanko).

13

Mia spirito jam pasis kun kompato kaj rezoluteco chirkau la tuta tero,
Mi serchis egalulojn kaj amantojn kaj trovis ilin pretaj por mi en chiu landoj,
Mi pensas, ke ia dia harmonio egaligis min kun ili.

Vi vaporoj, mi pensas, ke mi levighis kun vi, formovighis al malproksimaj kontinentoj,
kaj defalis tien, pro kialoj,
Mi pensas, ke mi blovis kun vi, vi ventoj;
Vi akvoj mi fingrumis chiun bordon kun vi,
Mi trakuris kion iu rivero au markolo de la terglobo trakuris,

Mi starighis sur la bazoj de duoninsuloj kaj sur la altaj enfiksitaj rokoj, por krei de tie:

Saluton al la mondo!

Kiujn urbojn la lumo au varmo penetras, tiujn urbojn mi penetras mem,
Al chiuj insuloj al kiuj birdoj flugas sian vojon, mi flugas mian vojon mem.

Al vi chiuj, nome de Ameriko,
Mi alten levas la perpendikularan manon, mi faras la signalon,
Resti post mi chiam videblan,
Por chiuj frekventejoj kaj hejmoj de homoj.

KANTO DE LA VASTA VOJO

1

Surpiede kaj facilcore mi ekiras la vastan vojon,
Sana, libera, la mondo antau mi,
La longa bruna pado antau mi kondukanta kien ajn mi elektas.

De nun mi ne petas felichon, mi mem estas felicho,
De nun mi ploretos ne plu, prokrastos ne plu, bezonos nenion,
Forkonfesinte endomajn ghenojn, bibliotekojn, plendemajn kritikojn,
Forta kaj kontenta mi vojaghas la vastan vojon.

La tero, tio sufichas,
Mi ne deziras la konstelaciojn iom pli proksimaj,
Mi scias ke ili fartas tre bone kie ili estas,
Mi scias ke ili sufichas por tiuj kiuj apartenas al ili.

(Ankorau jen mi portas miajn malnovajn delicajn sharghojn,
Mi portas ilin, viroj kaj virinoj, mi portas ilin kun mi kien ajn mi iras,
Mi jhuras ke estas neeble al mi senigi min je ili,
Mi estas plenigata per ili, kaj mi replenigos ilin miaflanke.)

2

Vi vojo kiun mi suriras kaj chirkaurigardas, mi kredas ke vi ne estas chio kio estas chi
tie,
Mi kredas ke multo nevidata estas ankau chi tie.

Chi tie la profunda leciono de akceptado, nek prefero nek rifuzo,
La nigrulo kun sia lana kapo, la krimulo, la malsana, la analfabeta, ne estas rifuzataj;
La nasko, la hastado serchi la kuraciston, la pashachado de la almozulo, la
shancelighado de la ebrulo, la ridanta grupo da mehhanistoj,
La eskapinta junulo, la kalesho de la richulo, la dando, la forkuranta paro,
La frua vendejulo, la cherkveturilo, la translokigo de mebloj en la urbeton, la reveno el la

urbeto,
Ili pasas, mi ankau pasas, io ajn pasas, neniu povas esti rifuzataj,
Neniu ne estas akceptataj, neniu ne estos karaj al mi.

3

Vi aero, kiu provizas min per la spirajho paroli!
Vi objektoj, kiuj vokas de difuzo miajn signifojn kaj donas al ili formon!
Vi lumo, kiu volvas min kaj chiujn aferojn en delikataj serenaj dushoj!
Vi padoj, eroditaj en la malebenaj kavoj che la vojflankoj!
Mi kredas ke vi entenas latentajn nevidatajn ekzistajhojn, vi estas tiel karaj al mi.

Vi pavimplataj promenejoj de la urboj! vi fortaj trotuarrandoj!
Vi pramoj! vi diloj kaj fostoj de varfoj! vi trabtegitaj flankoj! vi malproksimaj shipoj!
Vi vicoj da domoj! vi fenestrotrapikitaj fasadoj! vi tegmentoj!
Vi porchoj kaj enirejoj! vi suprotavoloj kaj feraj shirmiloj!
Vi fenestroj, kies travideblaj platoj povus malkashi tiom!
Vi pordoj kaj suprenirantaj shtupoj! vi arkoj!
Vi grizaj shtonoj de senfinaj pavimoj! vi tretataj transirejoj!
De chio kio tushis vin, mi kredas ke vi prenis al vi, kaj nun volus doni la samon sekrete
al mi,
De la vivaj kaj mortaj vi homplenigis viajn senemociajn surfacojn, kaj la spiritoj de
ili volus esti evidentaj kaj amikecaj kun mi.

4

La tero ekspansianta dekstre kaj maldekstre,
La bildo vivanta; chiu parto en sia plej bona aspekto,
La muziko enfalanta kie ghi estas dezirata, kaj chesanta kie ghi estas ne dezirata,
La gaja vocho de la publika vojo, la gaja fresha sento de la vojo.

Ho shoseo kiun mi vojaghas, chu vi diras al mi Ne forlasu min?
Chu vi diras Ne risku – se vi forlasas min, vi pereos?
Chu vi diras Mi estas jam preparita, mi estas bone platbatita kaj agnoskita, tenu vin
che mi?
Ho publika vojo, mi rediras, Mi ne timas forlasi vin, tamen mi amas vin,
Vi esprimas min pli bone ol mi povas esprimi min,
Vi estos pli al mi ol mia poemo.

Mi pensas ke heroaj faroj estis chiuj konceptitaj subchiele, kaj chiuj liberaj poemoj ankau,
Mi pensas ke mi povus halti chi tie mem kaj fari miraklojn,
Mi pensas ke kion ajn mi renkontas sur la vojo tion mi amos, kaj kiu ajn vidos min tiu
amos min,
Mi pensas ke kiun ajn mi vidas tiu devas esti felicha.

5

De chi tiu horo mi proklamas min liberigita de limoj kaj imagaj shnuroj,
Iranta kien mi deziras, mia propra mastro, tuta kaj absoluta,
Auskultanta aliajn, konsideranta bone kion ili diras,
Pauzanta, serchanta, ricevanta, kontemplanta,
Milde, sed kun nefornegebla volo, seniganta min je la tenoj kiuj volus teni min.

Mi enspiras grandajn cherpojn da spaco,
La oriento kaj la okcidento estas miaj, kaj la nordo kaj la sudo estas miaj.

Mi estas pli vasta, pli bona, ol mi pensis,
Mi ne sciis ke mi tenas tiom da bono.

Chio shajnas al mi bela,
Mi povas ree ripeti al viroj kaj virinoj Vi faris tiom da bono al mi, mi volus fari la samon
al vi,
Mi varbos por mi kaj vi dum mi iras,
Mi disjhetos min inter viroj kaj virinoj dum mi iras,
Mi jhetos novajn ghojecon kaj krudecon inter ili,
Kiu ajn fornegos min, tio ne chagrenos min,
Kiu ajn akceptos min, li au shi estos benita kaj benos min.

6

Nun se mil perfektaj viroj aperus, tio ne mirigus min,
Nun se mil belaj formoj de virinoj aperus, tio ne mirigus min.

Nun mi vidas la sekreton de la farado de la plej bonaj personoj,
Ghi estas kreski subchiele kaj manghi kaj dormi kun la tero.

Chi tie granda persona faro havas spacon,
(Tia faro kaptas la korojn de la tuta raso de homoj,
Ghia elvershado de forto kaj volo superfortas leghon kaj mokas chiun autoritaton kaj
chiun argumenton kontrau ghi).

Jen la provo de sagho,
La sagho ne estas fine provata en skoloj,
La sagho ne povas esti pasigata de unu havanta ghin al alia ne havanta ghin,
La sagho estas de la animo, ghi ne estas elmetebla al pruvo, estas ghia propra pruvo,
Aplikighas al chiuj stadioj kaj objektoj kaj kvalitoj kaj estas kontenta,
Estas la certeco de la realeco kaj senmorteco de aferoj, kaj la bonegeco de aferoj;
Io estas en la floso de la vido de aferoj kio elvokas ghin el la animo.

Nun mi reekzamenas filozofiojn kaj religiojn,
Ili eble pruvighas bone en prelegchambroj, tamen tute ne pruvighas sub la vastaj nuboj
kaj lau la pejzagho kaj fluantaj riveroj.

Jen la konstato,

Jen homo registrita – li konstatas chi tie kion li havas en si,
La pasintecon, la estontecon, majeston, amon – se ili vakas pri vi, vi vakas pri ili.

Nur la kerno de chiu objekto nutras;
Kie estas li kiu deshiras la shelojn por vi kaj mi?
Kie estas li kiu malfiksas ruzojn kaj kovertojn por vi kaj mi?

Jen kuntenigho, ghi ne estas antaue formita, ghi estas rilata al la nuntempo;
Chu vi scias kio ghi estas dum vi pasas esti amata de nekonatoj?
Chu vi scias la diron de tiuj turnighantaj okulgloboj?

7

Jen la elfluo de l' animo,
La elfluo de l' animo venas de interne tra laubaj pordoj, chiam elvokante demandojn,
Chi tiuj sopiradoj, kial ili estas? chi tiuj pensoj en la mallumo, kial ili estas?
Kial estas viroj kaj virinoj tiaj ke dum ili estas proksime al mi la sunlumo dilatas mian
 sangon?
Kial kiam ili forlasas min miaj flagetoj de ghojo sinkas plataj kaj pendemaj?
Kial estas arboj sub kiuj mi neniam promenas sen tio ke vastaj kaj melodiaj pensoj
 malsupreniras sur min?
(Mi pensas ke ili pendas tie vintre kaj somere sur tiuj arboj kaj chiam lasas fali fruktojn
 dum mi pasas);
Kio estas tio kion mi intershanghas tiel subite kun fremduloj?
Kio, kun iu kondukisto dum mi veturas sur la sidloko apud li?
Kio, kun iu fishkaptisto tiranta sian sejnnon che la marbordo dum mi preteriras kaj
 pauzas?
Kio permesas al mi esti senghena al la bonvolo de virino kaj de viro? kio permesas al ili
 esti senghenaj al la mia?

8

La elfluo de l' animo estas felicho, jen felicho,
Mi pensas ke ghi trafenetas la subchielan aeron, atendente che chiu tempoj,
Nun ghi fluas al ni, ni estas ghuste sharghataj.

Jen levighas la fluida kaj alfiksighanta karaktero,
La fluida kaj alfiksighanta karaktero estas la fresheco kaj dolchecho de viro kaj virino,
(La herboj de la mateno sprosas neniel pli freshaj kaj dolchaj chiun tagon el la radikoj de
 si ol ghi sprosas fresha kaj dolcha konstante el si).

Al la fluida kaj alfiksighanta karaktero eksudas la shvito de la amo de junaj kaj maljunaj,
De ghi falas distilita la charmo kiu mokas belecon kaj atingojn,
Al ghi sin pushas la tremanta sopiranta doloro de kontakto.

9

Ni iru! kiu ajn vi estas venu vojaghi kun mi!
Vojaghante kun mi, vi trovas kio neniam tedas.

La tero neniam tedas,
La tero estas kruda, silenta, nekomprenebla komence, Naturo estas kruda kaj
nekomprenebla komence,
Ne malkuraghigu, persistu, estas diecaj aferoj bone kashitaj,
Mi jhuras al vi, estas diaj aferoj pli belaj ol vortoj povas diri.

Ni iru! ni ne devas halti chi tie,
Kiel ajn dolchaj chi tiuj rezervitajhoj, kiel ajn oportuna chi tiu loghejo, ni ne povas resti
chi tie,
Kiel ajn shirmata chi tiu haveno kaj kiel ajn kalmaj chi tiuj akvoj, ni ne devas ankrighi chi
tie,
Kiel bonvena la gastamo kiu chirkauas nin, estas al ni permesate ricevi ghin nur
mallongan tempon.

10

Ni iru! la instigoj estos pli grandaj,
Ni navigos senvojajn kaj sovaghajn marojn,
Ni iros kie ventoj blovas, vagoj jhetighas, kaj la Jankia klipero preterrapidas plenvele,
Ni iru! kun potenco, libero, la tero, la elementoj,
Sano, defio, gajeco, memrespekto, scivolemo;
Ni iru! de chiuj formuloj!
De viaj formuloj, ho blindokulaj kaj materialismaj pastroj.

La malfresha kadavro blokadas la pasejon – la enterigo ne plu povas esti prokrastata.

Ni iru! tamen prenu averton!
Li vojaghanta kun mi bezonas la plej bonan sangon, muskolojn, eltenivon,
Neniu povas veni al la provo ghis li au shi alportu kuraghon kaj sanon,
Ne venu chi tien se vi jam elcherpis la plej bonon de vi,
Nur tiuj povas veni kiuj venas en puraj kaj rezolutaj korpoj,
Nenia malsanulo, nenia rumtrinkanto au venerea korupto estas permesata chi tie.

(Mi kaj miaj ne konvinkas per argumentoj, komparfiguroj, rimoj,
Ni konvinkas per nia cheesto.)

11

Auskultu! mi estos honesta kun vi,
Mi ne ofertas la malnovajn glatajn premiojn, sed ofertas malglatajn novajn premiojn,
Chi tiaj estas la tagoj kiuj nepre okazos al vi:

Vi ne amasigos kio estas nomata richeco,
Vi disjhetos per malavara mano chion kion vi gajnas au atingas,
Vi apenau alvenas en la urbon al kiu vi estis survoja, vi apenau enloghigas vin
kontentige, antau ol vi estas vokata de nerezistebla voko foriri,
Vi estos submetata al la ironiaj ridetoj kaj moko de tiuj kiuj restas malantau vi,
Tiujn gestvokojn de amo kiujn vi ricevos vi nur respondos per pasiaj kisoj de disigho,
Vi ne permesos la tenon de tiuj kiuj malfermas siajn etenditajn manojn al vi.

12

Ni iru! serchante la grandajn Kompanojn, kaj por aparteni al ili!
Ili ankau estas sur la vojo – ili estas la rapidaj kaj majestaj viroj – ili estas la plej grandaj
virinoj,
Ghuantoj de kalmoj de maroj kaj shtormoj de maroj,
Navigantoj de multaj shipoj, marshantoj de multaj mejloj da tero,
Oftaj vizitantoj de multaj malproksimaj landoj, oftaj vizitantoj de malprosimegaj
loghejoj,
Fidantoj de viroj kaj virinoj, observantoj de urboj, solaj laborantoj,
Pauzantoj kaj kontemplantoj de tufoj, floroj, konkaj de la marbordo,
Dancantoj che edzighdancoj, kisantoj de novedzinoj, teneraj helpantoj de infanoj,
naskantoj de infanoj,
Soldatoj de ribeloj, starantoj apud gapantaj tomboj, mallevantoj de cherkoj,
Vojaghantoj tra sinsekvaj sezonoj, tra la jaroj, la kuriozaj jaroj, chiu eliranta el tiu kiu
antauis ghin,
Vojaghantoj kiel kun kompanoj, nome siaj propraj diversaj fazoj,
Elpashantoj de la latentaj nerealigitaj bebotoj,
Vojaghantoj gaje kun sia propra juneco, vojjaghantoj kun sia barba kaj bonreliefigita
vireco,
Vojaghantoj kun sia virineco, abunda, nesuperita, kontenta,
Vojaghantoj kun sia propra sublima maljuneco de vireco au virineco,
Maljuneco, trankvila, ekspansiinta, largha kun la fiera largheco de la universo,
Maljuneco, fluanta libere kun la delica proksima libereco de morto.

13

Ni iru! al kio estas senfina kiel ghi estis senkomenca,
Sperti multon, pashadojn de tagoj, ripozojn de noktoj,
Kunfandi chiujn en la vojjahadon al kiu ili emas, kaj en la tagojn kaj noktojn al kiuj ili
emas,
Denove kunfandi ilin en la komencon de superaj vojjahoj,
Vidi nenion ie sen ke vi povu atingi ghin kaj pasi ghin,
Koncepti nenian tempon, kian ajn malproksiman, sen ke vi povu atingi ghin kaj pasi
ghin,
Suprenrigardi au malsuprenrigardi nenian vojon sen ke ghi etendighas kaj atendas vin,
kiel ajn longan, sen ke ghi etendighas kaj atendas vin,
Vidi nenian estajhon, ne de Dio au ajnan, sen ke vi ankau iru tien,
Vidi nenian posedajhon sen ke vi povu posedi ghin, ghuante chion sen laboro au acheto,

proprigante la festenon, tamen ne proprigante ech unu partiklon de ghi,
Preni la plej bonajn de la bieno de la bienisto, kaj la elegantan vilaon de la richulo, kaj la
chastajn benojn de la bone geedzigita paro, kaj la fruktojn de fruktarbaroj kaj
florojn de ghardenoj,
Preni por via uzado el la amasighintaj urboj dum vi trapasas,
Kunporti konstruajhojn kaj stratojn kun vi poste, kien ajn vi iras,
Kolekti la mensojn de homoj el iliaj cerboj dum vi renkontas ilin, kolekti la amon el iliaj
koroj,
Kunpreni viajn amantojn sur la vojon kun vi, kvankam vi postlasu ilin post vi,
Koni la universon mem kiel vojon, kiel multajn vojojn, kiel vojojn por vojaghantaj
animoj.

Chio disighas antau la progreso de animoj,
Chiaj religioj, chiaj solidajhoj, artoj, registaroj — chio kio estis au estas videbla sur chi tiu
globo au iu globo falas en nichojn kaj angulojn antau la procesio de animoj lau la
grandaj vojoj de la universo.

De la progreso de la animoj de viroj kaj virinoj lau la grandaj vojoj de la universo chiaj
aliaj progresoj estas la bezonata emblemo kaj subteno.

Chiam vivantaj, chiam antaŭen,
Majestaj, solenaj, malghojaj, retirighemaj, konfuzitaj, frenezaj, turbulentaj, malfortaj,
nekontentaj,
Senesperaj, fieraj, amemaj, malsanaj, akceptataj de homoj, malakceptataj de homoj,
Ili iras! ili iras! mi scias ke ili iras, sed mi ne scias kien ili iras,
Sed mi scias ke ili iras al la plej bona — al io granda.

Kiu ajn vi estas, elvenu! au viro au virino, elvenu!
Vi ne devas resti dormanta kaj lantanta tie en la domo, kvankam vi konstruis ghin, au
kvankam ghi estas konstruita por vi.

El la malhela enfermo! el malantaŭ la ekrano!
Estas senutile protesti, mi scias chion kaj malkashas ghin.

Vidas tra vi tiel malbonan kiel tra la ceteraj,
Tra la ridado, dancado, tagmanghado, vespermanghado, de homoj,
Interne de vestoj kaj ornamajhoj, interne de tiuj lavitaj kaj pritonditaj vizaghoj,
Vidas sekretan silentan abomenon kaj malesperon.

Neniu edzo, neniu edzino, neniu amiko, fidata por audi la konfeson,
Alia mem, duplikato de chiu, kaurante kaj kashighante ghi iras,
Senforma kaj senvorta tra la stratoj de la urboj, ghentila kaj milda en la salonoj,
En la vagonoj de fervojoj, en vaporboatoj, en la publika asembleo,
Hejmen al la domoj de viroj kaj virinoj, che la tablo, en la dormochambro, chie,
Nete vestita, vizagho ridetanta, talio rekta, morto sub la brustostoj, infero sub la
kraniostoj,
Sub la drapo kaj gantoj, sub la rubandoj kaj artefaritaj floroj,

Konformanta al la kutimoj, parolanta ne silabon pri si mem,
Parolanta pri io alia sed neniam pri si mem.

14

Ni iru! tra luktoj kaj militoj!
La celo kiu estis nomita ne povas esti kontrauordonita.

Chu la pasintaj luktoj sukcesis?
Kio sukcesis? vi mem? via nacio? Naturo?
Nun komprenu min bone – estas provizite en la esenco de aferoj, ke el ia efektivigho de
sukceso, kia ajn, elvenos io por necesigi pli grandan lukton.

Mia voko estas voko de batalo, mi nutras la aktivan ribelon,
Li iranta kun mi devas iri bone armita,
Li iranta kun mi iras ofte kun malabunda dieto, malricho, koleraĵoj, dizertoj.

15

Ni iru! la vojo estas antaŭ ni!
Ghi estas sekura – mi provis ĝin – miaj propraj piedoj provis ĝin bone – ne detenu
vin!
Lasu la paperon resti sur la skribotablo neskribita, kaj la libron sur la breto
nemalfermita!
Lasu la ilojn resti en la metiejo! lasu la monon resti negajnita!
Lasu la lernejon resti! ne atentu la krion de la instruisto!
Lasu la predikiston prediki en sia predikejo! lasu la advokaton pledi en la tribunalo, kaj
la jughiston ekspliki la leĝon.

Kamarado, mi donas al vi mian manon!
Mi donas al vi mian amon, pli valorega ol mono,
Mi donas al vi min mem antaŭ predikado aŭ leĝo;
Chu vi donos al mi vin mem? chu vi venos vojaĝi kun mi?
Chu ni restos lojalaj unu al la alia tiel longe kiel ni vivos?

TRANSIRANTE BRUKLINPRAME

1

Fluso sub mi! mi vidas vin vizagho kontraŭ vizagho!
Nuboj de la okcidento – suno tie duonhoron alta – mi vidas vin ankaŭ vizagho kontraŭ
vizagho.

Amasoj da viroj kaj virinoj vestitaj en la kutimaj kostumoj, kiel kuriozaj vi estas al mi!
Sur la pramŝipoj la centoj kaj centoj kiuj transiras, revenante hejmen, estas pli kuriozaj
al mi ol vi supozas,

Kaj vi kiuj transiros de bordo al bordo jarojn de nun estas pli al mi kaj pli en miaj meditoj ol vi povus supozi.

2

La nepalpebla subteno de mi de chiuj aferoj je chiuj horoj de la tago,
La simpla, kompakta, bone kunmetita plano, mi mem apartigita, chiu apartigita, tamen parto de la plano,
La similajhoj de la pasinteco kaj tiuj de la estonteco,
La gloroj surfadenitaj kiel bidoj sur miaj plej malgrandaj vidoj kaj audioj, sur la promeno en la strato kaj la paso sur la rivero,
La fluo hastanta tiel rapide kaj naghanta kun mi en la malproksimon,
La aliaj sekvontaj min, la ligoj inter mi kaj ili,
La certeco de aliaj, vivo, amo, vido, audio de aliaj.

Aliaj eniros la pordojn de la pramo kaj transiros de bordo al bordo,
Aliaj observos la kuron de la fluso,
Aliaj vidos la shiparon de Manhatano norde kaj okcidente, kaj la altajhojn de Bruklino sude kaj oriente,
Aliaj vidos la insulojn, grandajn kaj malgrandajn;
Kvindek jarojn de nun aliaj vidos ilin, transirante, la suno duonhoron alta,
Cent jarojn de nun, au treege multajn cent jarojn de nun, aliaj vidos ilin,
Ghuos la sunsubiron, la envershighon de la fluso, la refaladon al la maro de la malfluso.

3

Ne gravas, tempo nek loko – malproksimeco ne gravas,
Mi estas kun vi, vi viroj kaj virinoj de generacio, au treege multaj generacioj de nun,
Ghuste kiel vi sentas vin kiam vi rigardas la riveron kaj la chielon, tiel mi sentis min,
Ghuste kiel iu el vi estas unu el vivanta amaso, mi estis unu el amaso,
Ghuste kiel vi estas refreshigata de la gajeco de la rivero kaj la hela fluo, mi estis refreshigata,
Ghuste kiel vi staras kaj apogas vin sur la barilo, tamen hastas kun la rapida fluo, mi staris tamen estis hastigata,
Ghuste kiel vi rigardas la sennombrajn mastojn de shipoj kaj la dikajn tubojn de vapor-boatoj, mi rigardis.

Mi ankau multajn kaj multajn fojojn transiradis la riveron malnovatempe,
Observis la Dekdua-monatajn mevojn, vidis ilin alte en la aero flosantaj per senmovaj flugiloj, osciligantaj siajn korpojn,
Vidis kiel la rebrilanta flavo lumigas partojn de iliaj korpoj kaj lasas la reston en forta ombro,
Vidis la malrapide radirantaj rondojn kaj la gradan movigheton al la sudo,
Vidis la speguladon de la somera chielo en la akvo,
Blindumighis de la trembrilantaj strioj de radioj,
Rigardis la fajnajn centrifugajn spokojn da lumo chirkau la formo de mia kapo en la sunlumigata akvo,

Rigardis la brumon sur la montetoj sude kaj sudokcidente,
 Rigardis la vaporon dum ghi flugis lanflope, nuancite de violo,
 Rigardis al la pli malalta haveno por rimarki la ŝipojn alvenantajn,
 Vidis ilian alproksimighon, vidis surŝipe tiujn kiuj estis proksime al mi,
 Vidis la blankajn velojn de skunoj kaj slupoj, vidis la ŝipojn ankritajn:
 La maristoj laborantaj en la rigo, au rajde sur la velstangoj,
 La rondaj mastoj, la svingighanta movo de la ŝipkorpoj, la mallarghaj serpentaj
 flagetoj,
 La grandaj kaj malgrandaj vaporsipoj movighantaj, la pilotoj en siaj navigejoj,
 La blanka poststrio lasita de la pasado, la rapida tremeta giro de la radoj,
 La flagoj de chiuj nacioj, la falo de ili che sunsubiro,
 La arkrandaj ondoj en la krepusko, la privershataj taso, la kapriolemaj krestoj kaj
 rebriletoj,
 La etendigho malproksime, pli kaj pli malhelighanta, la grizaj muroj de la granitaj
 staploj apud la doko,
 Sur la rivero la ombra grupo, la granda vaportrenŝipo proksime flankita chiuflanke
 de la barghoj, la fojnboato, la malfruighinta ŝarĝpramo,
 Sur la najbara bordo la fajroj de la fandejaj fumtuboj brulantaj alte kaj brilege en la
 nokton,
 Jhetantaj sia flagretado de nigro kontrastigata de sovagha rugha kaj flava lumo super la
 suprojn de domoj, kaj malsupren en la fendojn de stratoj.

4

Chi tiuj kaj chio cetera estis al mi la samaj, kiel ili estas al vi,
 Mi multe amis tiujn urbojn, multe amis la majestan kaj rapidan riveron,
 La viroj kaj virinoj kiujn mi vidis estis chiuj proksime al mi,
 Aliaj same – aliaj kiuj rigardas malantaŭen al mi pro tio ke mi rigardis antaŭen al ili,
 (La tempo venos, kvankam mi haltas chi tie hodiaŭ kaj hodiaŭ nokte.)

5

Kio estas do inter ni?
 Kio estas la kalkulo de la dudekoj au centoj da jaroj inter ni?

Kio ajn ghi estas ne gravas – malproksimeco ne gravas, kaj loko ne gravas,
 Mi ankau vivis, Bruklino de ampleksaj montetoj estis mia,
 Mi ankau iris la stratojn de l' insulo Manhatano, kaj banis min en la akvoj chirkau ghi,
 Mi ankau sentis la kuriozajn abruptajn demandadojn ekmovighi interne de mi,
 Dum la tago inter amasoj da homoj iam ili ekvenis al mi,
 Dum miaj iroj hejmen malfrue nokte, au dum mi kushis en mia lito, ili ekvenis al mi,
 Mi ankau estis stampita el la floso chiam tenata solvita,
 Mi ankau ricevis identecon per mia korpo,
 Kio mi estis, mi sciis ke ghi estis de mia korpo, kaj kio mi estos, mi sciis ke mi estos de
 mia korpo.

6

Ne estas sur vin solan, ke la mallumaj makuloj falas,
La mallumo dejhetis siajn makulojn sur min ankau,
La plej bona kion mi faris shajnis al mi malplena kaj suspektinda,
Miaj grandaj pensoj, kiel mi supozis ilin, chu ili ne estis reale nesufichaj?
Nek estas vi sola kiu scias kio estas esti malbona,
Mi estas li kiu sciis kio estas esti malbona,
Mi ankau nodis la kutiman nodon de kontraueco,
Babilis, rughighis, indignis, mensogis, shtelis, domaghis,
Havis trompemon, koleron, volupton, ardajn dezirojn kiujn mi ne audacis diri,
Estis kaprica, vanta, avara, malprofunda, ruza, malkuragha, malbonvola,
La lupo, la serpento, la porko, ne mankantaj en mi,
La fripona rigardo, la frivola vorto, la adulta deziro, ne mankantaj,
Rifuzoj, malamoj, prokrastoj, malnobleco, mallaboremo, neniuj el tiuj mankantaj,
Estis unu kun la ceteraj, la tagoj kaj okazoj de la ceteraj,
Estis nomata per mia plej intima nomo de klaraj lautaj vochoj de junaj viroj dum ili vidis
 min alvenanta au pasanta,
Sentis iliajn brakojn sur mia kolo dum mi staris, au la facilan apogadon de ilia karno
 kontrau mi dum mi sidis,
Vidis multajn kiujn mi amis, en la strato au pramo au publika kunigho, tamen neniam
 diris al ili vorton,
Vivis la saman vivon kun la ceteraj, kun la sama kutima ridado, ronghado, dormado,
Ludis la rolon kiu ankoraŭ rigardas malantaŭen al la aktoro au aktorino,
La saman kutiman rolon, la rolon kiu estas tia kia ni faras ghin, tiel granda kiel ni
 deziras,
Au tiel malgranda kiel ni deziras, au kaj granda kaj malgranda.

7

Ankoraŭ pli mi alproksimighas al vi,
Tian penson kian vi havas pri mi nun, mi havis tiom pri vi – mi staplis antaue,
Mi pripensis longe kaj serioze pri vi antaŭ ol vi naskighis.

Kiu estis scionta kio revenos al mi?
Kiu scias chu mi ne ghuas nun chi tion?
Kiu scias, malgrau la tuta malproksimeco, chu mi ne kvazau rigardas vin nun, kvankam
 vi ne povas vidi min?

8

Ha, kio povas iam esti pli digna kaj admirinda al mi ol mast-orlita Manhatano?
Rivero kaj sunsubiro kaj arkrandaj ondoj de la fluso?
La mevoj, osciligantaj siajn korpojn, la fojnboato en la krepusko, kaj la malfruighinta
 sharghpramo?
Kiaj dioj povas superi chi tiujn kiuj kaptas min che la mano, kaj per vochoj kiujn mi
 amas, vokas min senprokraste kaj laute per mia plej intima nomo dum mi
 alproksimighas?

Kio estas pli subtila ol chi tio kiu ligas min al la virino au viro kiu rigardas al mia vizagho?

Kio fandas min en vin nun, kaj vershas mian signifon en vin?

Ni komprenas do, chu ne?

Kion mi promesis, ne menciante ghin, chu vi ne akceptis?

Kion studado ne povis instrui – kion predikado ne povis efektivigi, estas efektivigita, chu ne?

9

Fluadu, rivero! fluu kun la fluso, kaj refluu kun la malfluso!

Kaprioladu, kresthavaj kaj arkrandaj ondoj!

Belegaj nuboj de la sunsubiro! privershu per via pompo min, au la virojn kaj virinojn generaciojn post mi!

Transiru de bordo al bordo, sennombraj amasoj da pasagheroj!

Starighu, altaj mastoj de Manahato! starighu, belaj montetoj de Bruklino!

Pulsadu, konfuzita kaj scivola cerbo! eljhetu demandojn kaj respondojn!

Shvebu chi tie kaj chie, eterna floso de solvajho!

Rigardadu, amantaj kaj soifantaj okuloj, en la domo au strato au publika asembleo!

Eksonu, vochoj de junaj viroj! laute kaj muzike voku min per mia plej intima nomo!

Vivu, kutima vivo! ludu la rolon kiu rigardas malantaŭen al la aktoro au aktorino!

Ludu la kutiman rolon, la rolon kiu estas granda au malgranda lau kia oni faras ghin!

Pripensu, vi kiuj tralegas min, chu mi ne povu en nekonataj manieroj rigardadi vin;

Estu fortika, barilo super la rivero, por subteni tiujn kiuj apogas sin senpene, tamen hastas kun la hastanta fluo;

Flugadu, marbirdoj! flugu flanken, au radiru en grandaj rondoj alte en la aero;

Ricevu la someran chielon, vi akvo, kaj fidele tenu ghin ghis chiuj malsuprenturnitaj okuloj havos la tempon preni ghin de vi!

Diverghu, fajnaj spokoj da lumo, de la formo de mia kapo, au ies kapo, en la sunlumigata akvo!

Alvenu, ŝipoj de la malsupra haveno! pasu supren au malsupren, blankvelaj skunoj, slupoj, sharghpramoj!

Paradadu, flagoj de chiuj nacioj! estu tauge mallevataj che sunsubiro!

Bruligu alte viajn fajrojn, fandejaj fumtuboj! jhetu nigrajn ombrojn che noktigho! Jhetu rugan kaj flavan lumon sur la suprojn de domoj!

Aperoj, nun au de nun, indiku kio vi estas,

Vi necesa tegajho, daurigu vian envolvon de la animo,

Chirkau mia korpo por mi, kaj via korpo por vi, estu elpendigataj plej diaj aromoj,

Prosperu, urboj – alportu vian frajton, alportu viajn elmontrajhojn, ampleksaj kaj sufichaj riveroj,

Ekspansiu, estante tio ol kio nenio alia eble estas pli spirita,

Retenu viajn lokojn, objektoj, ol kiuj nenio alia estas pli daura.

Vi atendis, vi chiam atendas, vi mutaj, belaj helpantoj,
Ni ricevas vin fine kun libera sensado, kaj estas de tiam nesatigeblaj,
Ne vi plu povos malsukcesigi nin, au reteni vin de ni,
Ni uzas vin, kaj ne flankenjhetas vin – ni plantas vin por chiam internen de ni,
Ni ne komprenas vin – ni amas vin – estas perfekteco en vi ankau,
Vi liveras viajn partojn al eterno,
Grandaj au malgrandaj, vi liveras viajn partojn al la animo.

KANTO DE LA RESPONDISTO

1

Nun auskultu mian matenan romancon, mi diras la signojn de la Respondisto,
Al la urboj kaj bienoj mi kantas, dum ili sternighas en la sunbrilo antau mi.

Juna viro venas al mi, portante mesaghon de sia frato,
Kiel la juna viro povu scii la chu kaj kiam de sia frato?
Diru al li sendi al mi la signojn.

Kaj mi staras antau la juna viro vizagho kontrau vizagho, kaj prenas lian dekstran
manon en mian maldekstran kaj lian maldekstran manon en mian dekstran,
Kaj mi respondas por lia frato kaj por homoj, kaj mi respondas por li kiu respondas por
chiuj, kaj sendas chi tiujn signojn.

Li kiun chiuj atendas, li al kiu chiuj cedas, lia vorto estas decida kaj fina,
Lin ili akceptas, en li ili banas sin, en li ili perceptas sin kiel meze de lumo,
Lin ili mergas kaj li mergas ilin.

Belaj virinoj, la plej orgojlaj nacioj, leghoj, la pejzagho, homoj, bestoj,
La profunda tero kaj ghiaj atributoj kaj la nekvieta oceano, (tiel mi rakontas mian
romancon de la mateno),
Chiuj ghuoj kaj proprietajhoj kaj mono, kaj tio kion ajn mono povas acheti,
La plej bonaj bienoj, aliaj laborantaj kaj plantantaj, kaj li neeviteble rikoltas,
La plej noblaj kaj multekostaj urboj, aliaj ebenantaj kaj konstruantaj, kaj li loghas tie,
Nenio por iu krom kio estas por li, proksime kaj malproksime estas por li, la shipoj en
la malproksimo,
La konstantaj manifestoj kaj marshoj sur la tero estas por li, se ili estas por iu.

Li metas aferojn en iliajn pozojn,
Li metas hodiau el si kun plastikeco kaj amo,
Li metas siajn proprajn tempojn, rememorajhojn, gepatrojn, gefratojn, asociighojn,
oficojn, politikojn, tiel ke la ceteraj neniam hontigu ilin poste, nek arogu komandi
ilin.

Li estas la Respondisto,
Kio povas esti respondata li respondas, kaj kio ne povas esti respondata li

montras kial ghi ne povas esti respondata.

Homo estas alvoko kaj instigo,
(Estas vane vin kashi – chu vi audas tiun mokadon kaj ridadon? chu vi audas la ironiajn ehhojn?).

Libroj, amikecoj, filozofoj, pastroj, agado, plezuro, fiero, klopodas tien kaj reen doni
kontentighon,
Li indikas la kontentighon, kaj indikas ankau tiujn kiuj klopodas tien kaj reen.

Kiu ajn la sekso, kiu ajn la sezono au loko, li povas iri freshe kaj milde kaj sekure tage au
nokte,
Li havas la chefshlosilon de koroj, al li la respondo de la klopedo de manoj sur la ansoj.

Lia bonveno estas universala, la fluo de belo ne estas pli bonvena au universala ol li
estas,
La persono kiun li favoras tage, au kun kiu li dormas nokte, estas benita.

Chiu ekzisto havas sian idiomon, chiu afero havas idiomon kaj lingvon,
Li transinterpretas chiujn lingvojn en sian propran kaj donacas ghin al homoj, kaj ajna
homo tradukas, kaj ajna homo tradukas sin mem ankau,
Unu parto ne kontraugas alian parton, li estas la kuniganto, li vidas kiel ili kunighas.

Li diras indiferece kaj simile Kiel vi fartas, amiko? al la Prezidento che sia akcepto,
Kaj li diras Bonan tagon, mia frato, al Kudgho, kiu sarkas en la sukerokampo,
Kaj ambau komprenas lin kaj scias ke lia parolo estas ghusta.

Li marshas kun perfekta trankvilo en la kapitulo,
Li marshas inter la Kongresanoj, kaj unu Rerezentanto diras al alia, Jen nia egalulo,
aperanta kaj nova.

Tiam la mehhanistoj prenas lin por mehhanisto,
Kaj la soldatoj supozas lin esti soldato, kaj la maristoj ke li okupighis pri la maro,
Kaj la autoroj prenas lin por aŭtoro, kaj la artistoj por artisto,
Kaj la laboristoj perceptas ke li povus labori kun ili kaj ami ilin,
Kia ajn la laboro, ke li estas tiu kiu okupighos pri ghi au jam okupighis,
Kia ajn la nacio, ke li povu trovi tie siajn fratojn kaj fratinojn.

La Angloj opinias ke li devenas el ilia Angla raso,
Judo al la Judo li shajnas, Ruso al la Ruso, kutima kaj proksima, forigita for de neniuj.

Kiun ajn li rigardas che la kafejo de la vojoghanto pretendas lin,
La Italo au Franco estas certa, la Germano estas certa, la Hispano estas certa, kaj la insula
Kubano estas certa,
La ingheniero, la ferdekhelpisto sur la Grandaj Lagoj, au sur Misisipio au Sankta-
Laurenco au Sakramento, au Hudsono au la Paumanoka markolo, pretendas lin.

La ghentlemano de perfekta sango agnoskas lian perfektan sangon,
La insultanto, la prostituitino, la kolerulo, la almozpetanto, vidas sin en la manieroj de li,
li strange transformas ilin,
Ili ne plu estas abomenaj, ili apenau konas sin, ili estas tiom kreskintaj.

2

La indikoj kaj registroj de tempo,
La perfekta prudento montras la majstron inter filozofoj,
La tempo, chiam sen rompo, indikas sin en partoj,
Kio chiam indikas la poeton estas la amaso de la placha kompanio de kantistoj, kaj
iliaj vortoj,
La vortoj de la kantistoj estas la horoj au minutoj de la helo au malhelo, sed la vortoj
de la faristo de poemoj estas la gherala helo kaj malhelo,
La faristo de poemoj determinas justecon, realecon, senmortecon,
Lia perceptivo kaj potenco chirkauas aferojn kaj la homan rason,
Li estas la gloro kaj ekstrakto ghis nun de aferoj kaj de la homa raso.

La kantistoj ne generas, nur la Poeto generas,
La kantistoj estas bonvenigataj, komprenataj, aperas sufiche ofte, sed malofta estis la
tago, same la loko, de la naskigho de la faristo de poemoj, la Respondisto,
(Ne chiu jarcento nek chiu kvin jarcentoj enhavis tian tagon, malgrau chiu siaj nomoj.)

La kantistoj de sinsekvaj horoj de jarcentoj eble havas shajnajn nomojn, sed la nomo de
chiu el ili estas unu el la kantistuloj,
La nomo de chiu estas, okulkantisto, orelkantisto, kapkantisto, dolchkantisto,
noktkantisto, salonkantisto, amkantisto, strangkantisto, au io alia.

Dum la tuta tempo kaj che chiu tempo atendas la vortoj de veraj poemoj,
La vortoj de veraj poemoj ne nur plachas,
La veraj poetoj ne estas sekvantoj de belo sed la majestaj majstroj de belo;
La grandeco de filoj estas la eksudo de la grandeco de patrinoj kaj patroj,
La vortoj de veraj poemoj estas la kresto kaj fina aplaudo de scienco.

La dia instinkto, la amplekso de vido, la legho de racio, sano, krudeco de korpo,
retirighemo,
Gajeco, sunbruno, aerdolcho, tiaj estas kelkaj el la vortoj de poemoj.

La maristo kaj vojaghisto subkushas la fariston de poemoj, la Respondiston,
La konstruisto, geometro, kemiisto, anatomo, frenologo, artisto, chiu tiuj subkushas la
fariston de poemoj, la Respondiston.

La vortoj de la veraj poemoj donas al vi pli ol poemojn,
Ili donas al vi formi por vi mem poemojn, religiojn, politikojn, militon, pacon,
konducon, historiojn, esojn, chiutagan vivon, kaj chion alian,
Ili ekvilibrigas rangojn, kolorojn, rasojn, kredojn, kaj la seksojn,
Ili ne serchas belon, ili estas serchataj,

Chiam tushante ilin au preskau atingante ilin sekvas la belo, sopiranta, volonta
ammalsana.

Ili preparas por morto, tamen ne estas la fino, sed male la komenco,
Ili alportas neniun al lia au shia finloko au esti kontenta kaj plena,
Kiun ili prenas, ili prenas en spacon por observi la naskigho de steloj, por lerni unu el la
signifoj,
Por lanchighi kun absoluta fido, por balaighi tra la senchesaj rondoj kaj neniam ree esti
kvieta.

NIA KUTIMA FOLIARO

Chiam nia kutima foliaro!
Chiam la verda duoninsulo de Florido – chiam la valorega delto de Luiziano – chiam la
kotonkampoj de Alabamo kaj Teksaso,
Chiam la oraj montetoj kaj valoj de Kalifornio, kaj la arghentaj montoj de
Novmeksikio – chiam mildspira Kubo,
Chiam la vasta deklivo, drenita de la Suda Maro, neapartigebla de la deklivoj,
drenitaj de la Orienta kaj Okcidenta Maroj,
La areo en la okdektria jaro de chi tiuj shtatoj, la tri kaj duona milionoj da kvadrataj
mejloj,
La dek-ok mil mejloj da marbordo kaj golfbordo apud la oceano, la tridek mil mejloj da
rivera navigado,
La sep milionoj da apartaj familioj kaj la sama nombro da loghejoj – chiam chi tiuj, kaj
pli, disbranchighantaj en sennombrajn branchojn,
Chiam la libera etendo kaj diverseco – chiam la kontinento de Demokratio;
Chiam la prerioj, pashtejoj, arbaroj, vastaj urboj, vojaghantoj, Kanado, la neghoj;
Chiam chi tiuj kunigitaj landoj, ligitaj che la koksoj per la zono shnuranta la grandegajn
ovalajn lagojn,
Chiam la Okcidento kun fortaj indighenaj personoj, la pligrandighanta denseco tie, la
enloghantoj, amikaj, minacaj, ironiaj, malestimantaj al invadantoj;
Chiuuj vidoj, Sude, Norde, Okcidente – chiuuj faroj, hazarde faritaj che chiuuj tempoj,
Chiuuj karakteroj, movoj, kreskoj, kelkaj rimarkitaj, miriadoj nerimarkitaj,
Tra la stratoj de Manahato mi promenanta, chi tiuj aferoj kolektighantaj,
Sur internaj riveroj nokte en la brilego de pinaj nodoj, vaporboatoj surprenantaj lignon,
Sunlumo tage sur la valo de Suskvehano, kaj sur la valoj de Potomako kaj Rapahanoko
kaj la valoj de Roanoko kaj Delavaro,
En siaj nordaj sovaghejoj rabobestoj, frekventantaj Adirondakojn la montetojn au
lekantaj la akvojn de Saginao por trinki,
En soleca kreko tadorno, perdita el la aro, sidanta sur la akvo, balancighanta silente,
En la tenejoj de bienistoj bovoj en la stalo, ilia rikolta laboro finita, ili ripozas starante,
ili estas tro lacaj,
Malproksime sur arktika glacio la rosmarino kushanta dormeme dum shiaj idoj ludas
chirkaue,
La falko naviganta kie homoj ankoraŭ ne navigis, la plej malproksima polusa maro,
krispa, kristala, libera, preter la bankizeroj,

Blanka drivglacio, ventpelata antaŭen, kie la ŝipo en la tempesto antaŭenrapidas,
 Sur la firma tero, kio estas farata en urboj, dum la sonoriloj batas meznokton kune,
 En primitiva arbaro la sonoj tie ankau sonantaj, la ululo de la lupo, la kriĉo de la
 pantero, kaj la rauka mughego de la alko,
 Vintre sub la malmola blua glacio de la Alkkapa Lago, somere videblaj tra la klaraj
 akvoj, la grandaj trutoj naghantaj,
 En pli malaltaj latitudoj en pli varma aero en la Karolinoj la granda nigra buteo flosanta
 malrapide alte preter la arbosuproj,
 Malsupre, la rugha cedro festonita de tilandrio, la pinoj kaj cipresoj elkreskantaj el la
 blanka sablo kiu etendiĝas plate kaj malproksimen,
 Krudaj boatoj malsuprenirantaj la grandan Pedeon, grim pantaj plantoj, parazitoj kun
 koloraj floroj kaj beroj kiuj envolvas grandegajn arbojn,
 La ondantaj drapirajhoj sur la vivkverko pendantaj longe malsupren, senbrue svingataj
 de la vento,
 La kampadejo de Georgiuj charistoj tuj post noktigho, la vespermanghaj fajroj kaj la
 kuirado kaj manghado de blankuloj kaj negroj,
 Tridek au kvardek grandaj charoj, la muloj, brutoj, chevaloj, manghantaj el trogoj,
 La ombroj, glimbriloj, supre sub la folioj de la maljunaj platanoj, la flamoj kun la nigra
 fumo de la peĉpino spiralanta kaj supreniranta;
 Sudaj fishkaptistoj fishantaj, la markoloj kaj krekoj de la marbordo de Nordkarolino, la
 alozfishejo kaj la haringfishejo, la grandaj bala-sejnoj, la vinĉoj sur la bordo
 funkciigataj de chevaloj, la malsharghejoj, prezervejoj, kaj pakejoj;
 Profunde en la arbaro inter la pinoj terebinto, falanta gute el la incizajhoj en la arboj, tie
 estas la terebintofabriko,
 Tie estas la negroj ĉe laboro, bonsanaj, la tero en ĉiuj direktoj estas kovrita de pin-
 pajlo;
 En Tenesio kaj Kentukio sklavo, okupitaj en la karbejoj, ĉe la forghejo, apud la
 fornoflamego, au ĉe la maizosensheligado,
 En Virginio, la filo de la plantisto, revenante post longa foresto, ghoje bonvenigata kaj
 kisata de la maljuna mulata vartistino,
 Sur riveroj boatistoj sekure alboldigitaj ĉe noktigho en siaj boatoj sub la shirmo de
 altaj bordoj,
 Kelkaj el la pli junaj viroj dancas je la sono de la bangho au violono, aliaj sidas sur la
 boatrando fumante kaj parolante;
 Malfrue posttagmeze la mokbirdo, la Amerika mimo, kantanta en la Granda Morna
 Marĉo,
 Tie estas la verdecaj akvoj, la rezinaodoro, la abunda musko, la cipreso, kaj la junipero;
 Norde, junaj viroj de Manahato, la pafad-roto revenanta hejmen vespere de ekskurso,
 ĉiuj musketbushoj portas arojn da floroj donacitaj de virinoj;
 Infanoj ĉe la ludo, au sur la sino de sia patro juna knabo ekdorminta, (kiel liaj lipoj
 moviĝas! kiel li ridetas en sia dormo!),
 La skolto rajdanta surchevale tra la ebenajhoj okcidente de Misisipo, li supreniras
 teraltajhon kaj chirkaubalaas la okulojn;
 La Kalifornia vivo, la ministro, barba, vestita en sia kruda kostumo, la lojala Kalifornia
 amikeco, la dolĉa aero, la tomboj kiujn oni pasante renkontas solaj tuj flanke de
 la chevalpado;
 Fore en Teksaso la kotonkampo, la negrokabanoj, pelistoj pelantaj mulojn au bovojn

antau krudaj charoj, kotongarboj amasigitaj sur riverbordoj kaj varfoj;
 Chirkauanta chion, vaste saganta chien, la Amerika animo, kun egalaj duonsferoj, unu
 Amo, unu Dilatigho au Fiero;
 En la fono la pacokunsido kun la Irokezoj la aborigenoj, la kalumeto, la pipo de bonvolo,
 arbitracio, kaj subteno,
 La tribestro blovanta la fumon unue kontraŭ la suno kaj poste kontraŭ la tero,
 La dramo de la skalpodanco, ludata kun shminkitaj vizaghoj kaj guturalaj ekkrioj,
 La ekiro de la militobando, la longa kaj shtelira marĉo,
 La unuopa defilo, la svingighantaj hakiletoj, la surprizo kaj buchado de malamikoj,
 Chiuj agoj, scenoj, manieroj, personoj, sintenoj de ĉi tiuj Shtatoj, rememoradoj,
 institucioj,
 Chiuj ĉi shtatoj kunigitaj, ĉiu kvadrata mejlo de ĉi tiuj Shtatoj sen escepto de ereto;
 Mi kontenta, vaganta en vojetoj kaj kamparaj kampoj, la kampoj de Paumanoko,
 Observanta la spiralan flugon de du malgrandaj flavaj papilioj, intermiksighantaj,
 suprenirantaj alten en la aero,
 La saganta hirundo, la detruanto de insektoj, la autuna vojaghanto suden sed revenanta
 norden frue en printempo,
 La kampara knabo ĉe la fermo de la tago, pelanta la gregon da bovinoj kaj krianta al ili,
 kiam ili lantase por pashtighi ĉe la vojflanko,
 La urba varfo, Bostono, Filadelfio, Baltimoro, Charlestono, Novorleano, San-Francisko,
 La forirantaj ŝipoj kiam la maristoj haulas ĉe la kapstano;
 Vespero – mi en mia ĉambro – la subiranta suno,
 La subiranta somera suno, brilanta tra mia malfermita fenestro, montranta la svarmon
 da mushoj, shvebantaj, ekvilibrantaj en la aero en la mezo de la ĉambro,
 sagantaj flanken, supren kaj malsupren, jhetantaj rapidajn ombrojn kiel
 makuletojn sur la kontraŭa muro, kie la brilo estas,
 La atleta Amerika matrono parolanta publike al amasoj da auskultantoj,
 Maskloj, femaloj, enmigrintoj, kombinoj, la abundo, la individueco de la Shtatoj, ĉiu
 por si mem – la mongajnantoj,
 Fabrikoj, mashinaro, la mehhanikaj fortoj, la vinĉo, levilo, pulio, ĉiuj certecoj,
 La certeco de spaco, pliigho, libereco, estonteco,
 En spaco la sporaduloj, la disjhetitaj insuloj, la steloj – sur la firma tero, la landoj, miaj
 landoj,
 Ho landoj! ĉiuj tiel karaj al mi – kio vi estas (kio ajn ĝi estas), mi metanta ĝin hazarde
 en ĉi tiujn kantojn, farighas parto de kio ajn ĝi estas,
 Suden tie, mi krichanta, kun flugiloj malrapide batantaj, kun la miriadoj da mevoj,
 travinrantaj laŭ la bordoj de Florido,
 Alivoje tie inter la bordoj de la Arkansasa, la Rivero Granda, Nueceso, Brazoso,
 Tombigbio, la Rivero Rugha, la Saskachevana, au la Osagha, mi ridanta kaj
 saltanta kaj kuranta kun la fontakvoj,
 Norde, sur la sabloj, en iu malprofunda golfeto de Paumanoko, mi kun bandoj da neghaj
 ardeoj vadanta en la malseko, serĉi vermojn kaj akvajn plantojn,
 Retirighanta, triumfe kvivitanta, la tiranobirdo, trapikinte la korvon per sia beko, por
 amuzo – kaj mi triumfe kvivitanta,
 La migranta grego da sovaghaj anseroj, surterighanta en autuno por sin refreshigi, la
 ĉefa parto de la grego manghas, la sentineloj ekstere ĉirkaumovighas kun
 erektaĵoj. observantaj, kaj estas de tempo al tempo anstataŭataj de aliaj

sentineloj – kaj mi manghanta kaj atendanta mian vicon kun la ceteraj,
 En Kanadaj arbaroj la alko, granda kiel bovo, enanguligita de chasistoj, levighanta
 senespere sur siaj malantauaj piedoj, kaj plonghanta per siaj antaupiedoj, la hufoj
 tiel akraj kiel tranchiloj – kaj mi, plonghanta kontraŭ la chasistojn, enanguligita
 kaj senespera,
 En la Manahato, stratoj, varfoj, ŝiparo, staploj, kaj la sennombraj laboristoj laborantaj en
 la laborejoj,
 Kaj mi ankau de la Manahato, kantanta pri ghi – kaj ne malpli en mi mem ol la tuto de la
 Manahato en si mem,
 Kantanta la kanton de Chi Tiuj, miaj chiamunuigitaj landoj – mia korpo ne pli neeviteble
 unuigita, parto al parto, kaj farita el mil diversaj kontribuoj unu identeco, iom pli
 ol miaj landoj estas neeviteble unuigitaj kaj faritaj UNU IDENTECO;
 Naskighoj, klimatoj, la herbo de la grandaj pashtistaj Ebenajhoj,
 Urboj, laboroj, morto, bestoj, produktoj, milito, bono kaj malbono – chi tiuj mi,
 Chi tiuj liverantaj, en chiuj iliaj apartajhoj, la kutiman foliaron al mi kaj al Ameriko, kiel
 mi povu fari malpli ol pasigi la shlosilon de la unio al ili, provizi la similajn al vi?
 Kiu ajn vi estu! kiel mi povu ne prezenti al vi diajn foliojn, ke vi ankau estu kompetenta,
 kiel mi estas?
 Kiel mi povu, chi tie kantante, ne inviti vin por vi mem kolekti bukedojn de la
 senkompara foliaro de chi tiuj Shtatoj?

KANTO DE GHOJOJ

Ho fari la plej jubilan kanton!
 Plenon de muziko – plenan de vireco, virineco, infaneco!
 Plenon de ordinaraj oficoj – plenan de greno kaj arboj.

Ho por la vochoj de bestoj – ho por la rapideco kaj ekvilibro de fishoj!
 Ho por la gutado de pluvogutoj en kanto!
 Ho por la sunbrilo kaj movigho de ondoj en kanto!

Ho la ghojo de mia spirito – ghi estas elkaghigita – ghi sagas kiel fulmo!
 Ne estas sufiche havi chi tiun globon au certan tempon,
 Mi volas havi milojn da globoj kaj tutan tempon.

Ho la ghojoj de la lokomotivestro! iri per lokomotivo!
 Audi la siblon de vapore, la gajan krichon, la vaporfajfilon, la ridantan lokomotivon!
 Pushi per nerezistebila movo kaj forrapidi en la malproksimon.

Ho la gaja promeno tra kampoj kaj deklivoj!
 La folioj kaj floroj de la plej ordinaraj herboj, la humida fresha silento de l' arbaro,
 La ekskvizita odoro de la grundo che tagigho kaj dum la tuta antautagmezo.

Ho la ghojoj de la rajdanto kaj la rajdantino!
 La selo, la galopo, la sida premo, la malvarmeta murmurado che la oreloj kaj haroj.

Ho la ghojoj de la fajrbrigadisto!
Mi audas la alarmon dum plena nokto,
Mi audas sonorilojn, kriojn! mi pasas la amason, mi kuras!
La vido de la flamoj frenezigas min de plezuro.

Ho la ghojo de la fortikega boksisto, alte staranta en la areno en perfekta stato, konscia
pri potenco, soifanta renkonti sian kontraŭulon.

Ho la ghojo de tiu vasta elementa simpatio kiun nur la homa animo kapablas generi kaj
eligi en konstantaj kaj senlimaj inundoj.

Ho la ghojoj de la patrino!
La observado, la eltenado, la kara amo, la angoro, la pacience produktita vivo.

Ho la ghojo de pliigho, kreskado, resanigho,
La ghojo de konsolado kaj pacigo, la ghojo de konkordo kaj harmonio.

Ho reiri al la loko kie mi naskighis,
Audi la birdojn kanti ankoraŭ unu fojon,
Vagi tra la domo kaj tenejo kaj sur la kampoj ankoraŭ unu fojon,
Kaj tra la fruktarbaro kaj lau la malnovaj vojetoj ankoraŭ unu fojon.

Ho esti edukata apud golfoj, lagunoj, krekoj, au lau la marbordo,
Dauri kaj labori tie mian tutan vivon,
La marakva kaj malsekaodoro, la bordo, la marherboj, elmetitaj che akvomalalto,
La laboro de fishkaptistoj, la laboro de la angilkaptisto kaj pektenkaptisto;
Mi venas kun mia pektena rasto kaj shpato, mi venas kun mia angila lanco,
Chu estas malfluse? mi alighas al grupo da pektenfosantoj sur la platejoj,
Mi ridas kaj laboras kun ili, mi shercas che mia laboro kiel spirita junulo;
Vintre mi prenas mian angilan korbon kaj lancon kaj elpashadas sur la glacio – mi havas
hakileton por tranchi truojn en la glacio,
Jen mi varmevestita, gaje iranta au revenanta posttagmeze, mia idaro da fortikaj knaboj
min akompananta,
Mia idaro da plenkreskintaj kaj partekreskintaj knaboj, kiuj amas esti kun neniu alia tiel
multe kiel ili amas esti kun mi,
Tage labori kun mi, kaj nokte dormi kun mi.

Alian fojon en varma vetero surmare en boato, levi la omarkorbojn kie ili estas mergitaj
per pezaj shtonoj, (mi konas la buojn),
Ho la dolcheco de la Kvina-monata mateno sur la akvo dum mi remas tuj antaŭ
sunlevigho ale al la buoj,
Mi suprentiras oblikve la vimenkorbojn, la malhelverdaj omaroj urghe luktas per siaj
pinchiloj, dum mi elprenas ilin mi enmetas lignajn kejlajn en la artikojn de iliaj
pinchiloj,
Mi iras al chiuj lokoj unu post la alia, kaj tiam reremas al la bordo,
Tie en grandega kaldrono da bolanta akvo la omaroj estos boligataj ghis ilia koloro ighos
skarlatato.

Alian fojon skombrokaptanta,
Voremaj, avidaj por la hoko, proksimaj al la surfaco, ili shajnas plenigi la akvon tra
mejlaj;
Alian fojon fishanta por shtonfishoj en Golfo Chesapika, mi unu el la brunvizagha
shipanaro;
Alian fojon, serchante blufishojn apud Paumanoko, mi staras kun apogita korpo,
Mia maldekstra piedo estas sur la boatrando, mia dekstra brako jhetas malproksimen la
buklojn da maldika shnuro,
Videbla chirkau mi la rapida turnighado kaj sagado de kvindek velboatoj, miaj
kompanoj.

Ho navigado sur la riveroj,
La vojagho lauflue sur la Sankta Laurenco, la superba pejzagho, la vaporshipoj,
La shipoj velantaj, la Mil Insuloj, la hazarda lignofluso kaj la flosistoj kun
longetendighantaj bala-remoj.
La kabanetoj sur la flosoj, kaj la fluo de fumo kiam oni kuiras la vespermanghon
vespere.

(Ho io pernicioza kaj timiga!
Io malproksime de malpotenca kaj pia vivo!
Io ne provita! io ensorchita!
Io eskapinta de la ankrejo kaj drivanta libere.)

Ho labori en minoj, au forghante feron,
Fandeja muldado, la fandejo mem, la kruda alta tegmento, la ampleksa kaj ombrita
spaco,
La forno, la varmega likvajho, elvershita kaj fluanta.

Ho resumi la ghojojn de soldato!
Senti la cheston de kuragha komandanta oficiro – senti lian simpation!
Vidi lian trankvilecon – esti varmigata en la radioj de lia rideto!
Iri al batalo – audi la klarionojn ludi kaj la tamburojn bati!
Audi la knalon de kanonaro – vidi la scintiladon de la bajonetoj kaj muskettuboj en la
suno!
Vidi virojn fali kaj morti kaj ne plendi!
Gustumi la sovaghan guston de sango – esti tiel diableca!
Fighoj tiel pri la vundoj kaj mortoj de la malamiko.

Ho la ghojoj de la balenisto! Ho mi krozas mian kutiman krozon denove!
Mi sentas la movon de la shipo sub mi, mi sentas la Atlantikajn ventetojn ventumi min,
Mi audas denove la krion desenditan de la mastosupro, Tie – shi blovas!
Denove mi saltas supren sur la rigon por observi kun la ceteraj – ni malsupreniras,
furiozaj de ekscitigho,
Mi saltegas en la mallevitajn boaton, ni remas kontrau nian predon, kie li kushas,
Ni aliras shtele kaj silente, mi vidas la montecan mason, letargian, sunghuantan,
Mi vidas la harpuniston starighi, mi vidas la armilon sagi de lia vigla brako;

Ho denove rapide malproksimen en la oceano la vundita baleno, subakvighante,
kurante alventen, trenas min,
Denove mi vidas lin levighi por spiri, ni remas proksimen denove,
Mi vidas lancon pelatan tra lia flanko, prematan profunden, turnatan en la vundo,
Denove ni retirighas, mi vidas lin subakvighi denove, vivo forlasas lin rapide,
Dum li levighas li shprucigas sangon, mi vidas lin naghi en rondoj pli kaj pli mallarghaj,
rapide tranchantan la akvon – mi vidas lin morti,
Li faras unu konvulsian saltegon en la centro de la rondo, kaj tiam falas plata kaj
senmova en la sangan shaumon.

Ho la malnova vireco de mi, mia plej nobla ghojo el chiuj!
Miaj infanoj kaj nepoj, miaj blankaj haroj kaj barbo,
Mia grandeco, trankvileco, majesto, el la longa etendigho de mia vivo.

Ho la maturighinta ghojo de virineco! ho felicho finfine!
Mi havas la aghon de pli ol okdek jaroj, mi estas la plej respektinda patrino,
Kiel klara estas mia menso – kiel chiuj homoj alproksimighas al mi!
Kiaj allogoj estas chi tiuj preter iaj antaue? kia florigho pli ol la florigho de juneco?
Kia beleco estas chi tiu, kiu malsupreniras sur min kaj levighas el mi?

Ho la ghojoj de la oratoro!
Aerplenigi la bruston, ruli la tondron de la vocho el la ripoj kaj gorgho,
Igi la popolon furiozi, plori, malami, deziri, kun vi mem,
Konduki Amerikon – subpremi Amerikon per granda lango.

Ho la ghojo de la aplomba apogado sur si de mia animo, ricevanta identecon per
materialoj kaj amanta ilin, observanta karakterojn kaj sorbanta ilin,
Mia animo, revibrigata al mi de ili, de vidado, audado, tushado, racio, artikado,
komparado, memorado, kaj la similaj,
La vera vivo de miaj sensoj kaj karno transcendantanta miajn sensojn kaj karnon,
Mia korpo forkonfesinta materialojn, mia vidado forkonfesinta miajn materialajn
okulojn,
Pruvita al mi chi tiun tagon preter kontesto ke ne estas miaj materialaj okuloj kiuj finfine
vidas,
Nek mia materiala korpo kiu finfine amas, marshas, ridas, krias, chirkaubrakas, generas.

Ho la ghojoj de la bienisto!
La ghojoj de la Ohiano, Ilinojsano, Viskonsinano, Kanadano, Iovaano, Kansasano,
Misuriano, Oregonano!
Levighi che la frua tagigho kaj elpashi vigle al la laboro,
Plugi teron autune por vintre semotaj rikoltoj,
Plugi teron printempe por maizo,
Dresi fruktartarojn, grefti la arbojn, kolekti pomojn autune.

Ho banighi en la naghejo, au en bona loko lau la bordo,
Plaudi la akvon! marshi ghismaleole, au kuregi nuda lau la bordo.

Ho konstati spacon!
La abundon de chio, ke ne estas limoj,
Elighi kaj esti pri la chielo, pri la suno kaj luno kaj flugantaj nuboj kiel unu kun ili.

Ho la ghojo de vireca mem!
Esti servuteca al neniu, cedi al neniu, ne al ia tirano, konata au nekonata,
Marshi kun erekta sinteno, pasho risorteca kaj elasta,
Rigardi per trankvila rigardo au per ekbrilanta okulo,
Paroli per plena kaj sonora vocho el largha brusto,
Alfronti per via personeco chiujn aliajn personecojn de la tero.

Chu vi konas la bonegajn ghojojn de juneco?
Ghojoj de la karaj kompanoj kaj de la gaja vorto kaj ridanta vizagho?
Ghojo de la gaja lumradianta tago, ghojo de l' vastspiraj ludoj?
Ghojo de l' dolcha muziko, ghojo de la lumita balejo kaj la dancantoj?
Ghojo de l' abunda vespermangho, forta dibochado kaj drinkado?

Ankorau, ho mia animo suprema!
Chu vi konas la ghojojn de l' pensema pensado?
Ghojoj de la libera kaj soleca koro, la tenera, morna koro?
Ghojoj de la soleca promeno, la spirito klinita sed fiera, de la suferado kaj la lukto?
La konkuraj penoj, la ekstazoj, ghojoj de la solenaj pripensoj tage au nokte?
Ghojoj de la penso de Morto, de la grandaj sferoj Tempo kaj Spaco?
Profetaj ghojoj de pli bonaj, pli noblaj idealoj de amo, la dia edzino, la dolcha, eterna,
perfekta kamarado?
Ghojoj tute viaj propraj, senmortulo, ghojoj, indaj vin, ho animo.

Ho dum mi vivas esti la reganto de vivo, ne sklavo,
Renkonti vivon kiel potenca venkanto,
Nenia kolero, nenia enuo, ne pli da plendoj au malestimaj kritikoj,
Al chi tiuj fieraj leghoj de l' aero, la akvo, kaj la grundo pruvantaj mian internan animon
nepenetrebla,
Kaj nenio ekstera iam ekregos min.

Por ne sole la ghojoj de vivo mi kantas, ripetanta – la ghojo de morto!
La bela tusho de Morto, kvietiganta kaj sensentiganta kelkajn momentojn, pro kialoj,
Mi malsharghanta mian ekskrementan korpon por esti bruligata, au polvigata, au
enterigata,
Mia reala korpo sendube lasita al mi por aliaj sferoj,
Mia ekskrementita korpo nenio pli al mi, revenante al la purigoj, pluaj oficoj, eternaj uzoj
de la tero.

Ho altiri per pli ol altiro!
Kia ghi estas mi ne scias – tamen jen! la io kiu obeas neniun el la ceteraj,
Ghi estas ofensiva, neniam defensiva – tamen kiel magnetite ghi tiras.

Ho lukti kontrau grandaj kontraushancoj, renkonti malamikojn sentime!

Esti tute sola kun ili, eltrovi kiom oni povas toleri!
Rigardi malpacon, torturon, la prizonon, la popolan malamon, vizagho kontraŭ vizagho!
Suriri la eshafodon, antaŭeniri al la bushoj de pafiloj kun perfekta senzorgeco!
Esti ja ia Dio!

Ho veli maren en ŝipo!
Forlasi ĉi tiun konstantan netolereblan landon,
Forlasi la lacigan samecon de la stratoj, la trotuaroj, kaj la domoj,
Forlasi vin, ho vi solida, senmova lando, kaj enirante ŝipon,
Veli kaj veli kaj veli!

Ho havi vivon de nun poemo de novaj ghojoj!
Danci, aplaudi, ghojegi, krii, salteti, salteti, ruladi, flosadi!
Esti maristo de la mondo survoje al ĉiuj havenoj,
Ŝipo mem, (vidu ja ĉi tiujn velojn kiujn mi sternas al la suno kaj aero),
Rapida kaj pufiĝa ŝipo plena de riĉaj vortoj, plena de ghojoj.

KANTO DE L' HAKILO

1

Armilo belforma, sen vest', polurita,
La kapo el la ventro de l' patrino tiritita,
La karno el ligno la ost' el metal', je nur unu, la membro, la lip' limigita,
Grizblua foli' per rughejt' kreskigita, tenil' produktita el semeto semita,
En la mezon de l' herb' hazarde metita,
Por esti klinita kaj surapogita.

Fortaj formoj kaj atributoj de fortaj formoj, masklaj metioj, vidajhoj, kaj sonoj,
Longa varia trenajho de emblemo, makuloj de muziko,
Fingroj de la orgenisto saltetantaj stakate sur la klavoj de la granda orgeno.

2

Bonvenaj estas ĉiuj landoj de la tero, ĉiu pro sia speco,
Bonvenaj estas landoj de pino kaj kverko,
Bonvenaj estas landoj de la citrono kaj figo,
Bonvenaj estas landoj de oro,
Bonvenaj estas landoj de tritiko kaj maizo, bonvenaj tiuj de la vinbero,
Bonvenaj estas landoj de sukero kaj rizo,
Bonvenaj la kotonaj landoj, bonvenaj tiuj de la terpomo kaj batato,
Bonvenaj estas montoj, ebenoj, sablejoj, arbaroj, prerioj,
Bonvenaj la riĉaj bordoj de riveroj, altplatajhoj, maldensejoj,

Bonvenaj la senmezuraj pashtighlandoj, bonvena la arboplena grundo de fruktarbaroj,
lino, mielo, kanabo;
Bonvenaj tiel same la aliaj pli malmolfacaj landoj,
Landoj richaj kiel landoj de oro au tritikaj kaj fruktaj landoj,
Landoj de minoj, landoj de la virecaj kaj krudaj ercoj,
Landoj de karbo, kupro, plumbo, stano, zinko,
Landoj de fero – landoj de la faro de la hakilo.

3

La shtipo che la shtiparo, la hakilo apogita de ghi,
La arbara kabano, la grimpoplanto super la pordejo, la spaco senveprigita por ghardeno,
La malregula batado de pluvo malsupren sur la folioj post kiam la shtormo ekchesis,
La ululado kaj ghemado je intertempoj, la penso pri la maro,
La penso de ŝipoj frapitaj en la shtormo kaj metitaj sur sian flankon, kaj la dehakado de mastoj,
La sento kauzita de la grandegaj traborj de malnovstilaj domoj kaj tenejoj,
La rememorata presbildo au rakonto, la aventura vojagho de viroj, familioj, varoj,
La elshipigho, la fondado de nova urbo,
La vojagho de tiuj kiuj serchis Novan Anglujon kaj trovis ghin, la ekiro ie ajn,
La setlementoj de la Arkansasa, Kolorada, Otova, Viljameta,
La malrapidaj progresoj, la malabunda nutrajho, la hakilo, fusilo, selsakoj;
La beleco de chiuj aventuremaj kaj audacaj personoj,
La beleco de arbaristoj junuloj kaj viroj kun iliaj senmakulaj, nerazitaj vizaghoj,
La beleco de sendependeco, forlaso, agoj, kiuj fidas je si mem,
La Amerika malestimo al statutoj kaj ceremonioj, la senlima malpacienco de sindetenado,
La svaga drivo de karaktero, la ideeto per hazardaj tipoj, la solidigho;
La buchisto en la buchejo, la maristoj sur skunoj kaj slupoj, la flosisto, la pioniro,
Arbhakistoj en sia vintra kampadejo, tagigho en la arbaro, strioj de negho sur la branchoj de arboj, la fojfoja ekrompigho,
La ghoja, klara sono de sia propra vocho, la gaja kanto, la natura vivo de la arbaro, la forta laboro de la tago,
La flamanta fajro nokte, la dolcha gusto de la vespermangho, la parolado, la lito de cugaj branchoj kaj la ursfelo;
La domkonstruisto che la laboro en urboj au ie,
La prepara artikado, ortigado, alsegado, mortezado,
La suprenhisado de traborj, la pusho de ili en iliajn lokojn, kushiganta ilin regule,
Sidigo de la fostoj per iliaj tenonoj en la mortezojn, lau tio kiel ili estis preparitaj,
La batoj de la maleoj kaj marteloj, la sintenoj de la viroj, iliaj kurbitaj membroj,
Fleksighantaj, starantaj, rajde sidantaj sur la traborj, enbatantaj kejlajn, alkrochantaj per fostoj kaj armaturoj,
La krochanta brako super la plato, la alia brako svinganta la hakilon,
La plankistoj preme alproksimigantaj la tabulojn najlotajn,
Iliaj sintenoj, malsuprenigantaj siajn armilojn sur la subportajhojn,
La ehhoj resonantaj tra la vaka konstruajho;
La grandega staplo, konstruata en la urbo, baldau kompletigota,

La ses framistoj, po du en la mezo kaj che chiu fino, zorge portantaj sur la shultro pezan
 stangon por transtrabo,
 La densa vico da masonistoj kun trulo en la dekstra mano rapide masonantaj la longan
 flankmuron, ducentfutan de fronto ghis malantaŭo,
 La fleksebla levigho kaj mallevigho de dorsoj, la ada klaketo de truloj batantaj la brikojn,
 La brikoj unu post alia, chiu masonata tiel sperte en sian lokon, kaj sidigata per bato de
 la trultenilo,
 La amasoj da materialoj, la mortero sur la mortertabuloj, kaj la konstanta replenigado
 de la portilistoj;
 La velstangfaristoj en la velstangkorto, la svarmanta vico da bonkreskintaj
 metilernantoj,
 La svingado de iliaj hakiloj sur la kvadrattonditan shtipon formanta ghin al la formo de
 masto,
 La vigla mallonga kraketo de la shtalo enbatata oblikve en la pinon,
 La buterkoloraj ligneroj deflugantaj en grandaj flokoj kaj splitoj,
 La supla movigho de fortikaj junaj brakoj kaj koksoj en senghenaj vestoj,
 La konstruisto de varfoj, pontoj, doko, septoj, flosiloj, bariloj kontraŭ la maro;
 La urba fajrbrigadisto, la fajro kiu subite ekflagras en la densa placo,
 La alvenantaj fajrkamionoj, la raukaj krioj, la vigla pashado kaj la audacado,
 La forta komando tra la fajrmegafonoj, la envicigho, la levigho kaj mallevigho de la
 brakoj pelantaj la akvon,
 La maldikaj, spasmaj, blueblankaj shprucoj, la aplika alportado de la hokoj kaj
 shtupetaroj kaj ilia utiligho,
 La krako kaj forhako de liganta lignajho, au tra plankoj, se la fajro subbrulas sub ili,
 La homamaso kun iliaj lumigataj vizaghoj, rigardantaj, la brilego kaj densaj ombroj;
 La forghisto che sia forghoforno kaj la uzanto de fero post li,
 La faristo de la hakilo, granda kaj malgranda, kaj la veldisto kaj hardisto,
 La elektisto, spiranta sian spiron sur la malvarman shtalon kaj provanta la eghon per sia
 polekso,
 Tiu kiu finformas la tenilon kaj sidigas ghin firme en la ingon;
 La ombrecaj procesioj de la portretoj de la pasinttempaj uzantoj ankaŭ,
 La praaj paciencaj mehhanistoj, la arkitektoj kaj inĝenieroj,
 La fora Asiria konstruajho kaj la Mizra konstruajho,
 La Romaj liktoroj, antaŭantaj la konsulojn,
 La antikva Europa batalisto kun sia hakilo en batalo,
 La suprenlevita brako, la klakado de batoj sur la kaskita kapo,
 La mortkriego, la malrigide falanta korpo, la hastado tien de la amiko kaj la malamiko,
 La siegho de ribelantaj vasaloj, rezolutaj por libereco,
 La admono kapitulaci, la batado che kastelaj pordegoj, la batalhalto kaj diskutado,
 La disrabado de malnova urbo siatempe,
 La enrompado de solduloj kaj severuloj, tumulto kaj malorda,
 Bruego, flamoj, sango, ebrio, frenezo,
 Varoj libere rabataj el domoj kaj temploj, kricoj de virinoj en la krocho de banditoj,
 Ruzado kaj rabado de armeakompanistoj, viroj kurantaj, maljunuloj malesperantaj,
 La infero de milito, la kruelecoj de kredoj,
 La listo de chiuj administraj faroj kaj vortoj, justaj au nejustaj,
 La potenco de personeco, justa au nejusta.

Muskolo kaj kuragho por chiam!
 Kio vigligas vivon vigligas morton,
 Kaj la mortaj antaŭeniras tiel multe kiel la vivaj antaŭeniras,
 Kaj la estonteco estas ne pli necerta ol la nuntempo,
 Ĉar la krudeco de la tero kaj de la homo enfermas tiel multe kiel la delikateco de la
 tero kaj de la homo,
 Kaj nenio dauras krom personaj kvalitoj.

Kio vi pensas ke dauras?
 Ĉu vi pensas ke granda urbo dauras?
 Au svarmanta fabrika ŝtato? au preparita konstitucio? au la plej bone konstruitaj
 vaporŝipoj?
 Au hoteloj el granito kaj fero? au iaj majstrajhoj de inĝenierarto, fuortoj, armajhoj?

For! ĉi tiuj ne estas amendaj pro si mem,
 Ili plenigas sian horon, la dancantoj dancas, la muzikantoj ludas por ili,
 La teatraĵo pasas, ĉio sufiĉe bone fartas, kompreneble,
 Ĉio tre bone fartas, ĝhis unu flagro de defio.

Granda urbo estas tiu kiu havas la plej grandajn virojn kaj virinojn,
 Ĝi se ĝi estu kelkaj krudaj hatoj, ĝi estas tamen la plej granda urbo en la tuta
 mondo.

La loko kie granda urbo staras ne estas sole la loko de longaj varfoj, doko, fabrikajhoj,
 deponajhoj de fruktoj kaj legomoj,
 Nek la loko de senĉesaj salutoj de novevenantoj au la ankrolevantoj de la forirantoj,
 Nek la loko de la plej altaj kaj plej karaj konstruaĵoj au butikoj, vendantaj varoj de la
 cetero de la tero,
 Nek la loko de la plej bonaj bibliotekoj kaj lernejoj, nek la loko, kie mono estas plej
 abunda,
 Nek la loko de la plej multnombra loĝantaro.

Kie la urbo staras kun la plej fortika raso de oratoroj kaj poetoj,
 Kie la urbo staras kiu estas amata de ĉi tiuj kaj amas ilin kompanse kaj komprenas ilin,
 Kie neniam monumentoj ekzistas al herooj sed nur en la vulgaraĵoj kaj faroj,
 Kie ŝparemo estas en sia taŭga loko, kaj prudento estas en sia taŭga loko,
 Kie la viroj kaj virinoj rigardas la legojn negravaj,
 Kie la sklavo ĉesas, kaj la mastro de sklavo ĉesas,
 Kie la popolo tuj levigas kontraŭ la neniam ĉesanta aŭdaco de elektitaj personoj,
 Kie ferocaj viroj kaj virinoj elvershighas kiel la maro ĉe la siblo de morto vershas siajn
 balaantaj kaj liberigatajn ondojn,
 Kie la eksterna aŭtoritato envenas ĉiam post la prioritato de la interna aŭtoritato,

Kie la civitano estas chiam la chefo kaj idealo, kaj Prezidento, Urbestro, Shtatestro, kaj
tiaj, estas agentoj por pago,
Kie infanoj estas edukataj esti leghoj per si mem, kaj dependi de si mem,
Kie trankvileco estas ilustrata en aferoj,
Kie spekulativoj pri la animo estas instigataj,
Kie virinoj marshas en publikaj procesioj en la stratoj same kiel viroj,
Kie ili eniras la publikan kunvenon kaj prenas lokojn same kiel viroj;
Kie la urbo de la plej fidelaj amikoj staras,
Kie la urbo de la pureco de la seksoj staras,
Kie la urbo de la plej sanaj patroj staras,
Kie la urbo de la plejbonkorpaj patrinoj staras,
Tie la granda urbo staras.

6

Kiel humilachaj shajnas argumentoj antau defia faro!
Kiel la sanaspekto de la materialoj de urboj shrumpas antau la rigardo de viro au virino!

Chio atendas au iras senatente, ghis forta estulo aperas;
Forta estulo estas la pruvo de la raso kaj de la kapablo de la universo,
Kiam li au shi aperas, materialoj estas superfortataj,
La disputo pri la animo chesas,
La malnovaj kutimoj kaj frazoj estas alfrontataj, returnataj, au formetataj.

Kio estas via mongajnado nun? kion ghi povas fari nun?
Kio estas via respektindo nun?
Kio estas via teologio, instruado, socio, tradicioj, statutlibroj nun?
Kio estas viaj kontestoj pri la animo nun?

7

Sterila pejzagho kovras la ercon, tie estas tiel bona kiel la plej bona, malgrau la tuta
malloga aspekto,
Tie estas la mino, tie estas la ministoj,
La forghforno estas tie, la fando estas efektivigita, la martelistoj estas apudaj kun siaj
preniloj kaj marteloj,
Kio chiam servis kaj chiam servas estas apuda.

Ol chi tio nenio pli bone servis, ghi servis chiujn,
Servis la flualangan kaj subtilmensan Grekon, kaj longe antau la Greko,
Servis konstruante la konstruajhojn kiuj dauras pli longe ol iaj,
Servis la Hebreon, la Person, la plej antikvan Hindustananon,
Servis la tumulkonstruanton che Misisipo, servis tiujn kies relikvoj restas en
Mezameriko,
Servis Albajn templojn en arbaroj au sur ebenajhoj, kun nehakitaj pilieroj, kaj la
Druidojn,
Servis la artifikajn fendojn, vastajn, altajn, silentajn, sur la neghkovritaj montetoj de

Skandinavujo,
Servis tiujn kiuj en la malproksima pratempo faris sur la granitaj muroj krudajn skizojn
de la suno, luno, steloj, ŝipoj, oceanaj ondoj,
Servis la irejojn de la invadoj de la Gotoj, servis la pashtistajn tribojn kaj nomadojn,
Servis la longe malproksiman Kelton, servis la vervajn piratojn de la Balta,
Servis antaŭ iuj el tiuj la respektindajn kaj nedangherajn homojn de Etiopujo,
Servis en la farado de rudriroj por la galeroj de plezuro kaj la farado de tiuj por milito,
Servis chiujn grandajn laborojn sur tero kaj chiujn grandajn laborojn sur maro,
Por la mezepokoj kaj antaŭ la mezepokoj,
Servis ne la vivajn sole, tiam kiel nun, sed servis la mortajn.

8

Mi vidas la European senkapigiston,
Li staras maskita, vestita en rugho, kun grandegaj gamboj kaj fortaj, nudaj brakoj,
Kaj apogas sin sur pezega hakilo.

(Kiun vi buchis lastatempe, Europa senkapigisto?
Kies estas tiu sango sur vi tiel malseka kaj glueca?)

Mi vidas la klarajn sunsubirojn de la martiroj,
Mi vidas la fantomojn, malsuprenirantajn de la eshafodoj,
Fantomojn de mortaj senjoroj, senkronigitaj senjorinoj, denunciataj ministroj,
malakceptitaj reghoj,
Rivaloj, perfiduloj, venenantoj, malhonoritaj estroj, kaj la ceteraj.

Mi vidas tiujn kiuj en ia lando mortis por la bona afero,
La semoj estas malmultaj, tamen la rikolto neniam elcherpighos,
(Vi rimarku, ho fremdaj reghoj, ho pastroj, la rikolto neniam elcherpighos.)

Mi vidas la sangon tute forlavata de sur la hakilo,
Klingo kaj tenilo estas ambau puraj,
Ili shprucigas ne plu la sangon de Europaj nobeloj, ili kaptas ne plu la kolon de reghinoj.

Mi vidas la senkapigiston retirighi kaj ighi senutila,
Mi vidas la eshafodon netretata kaj shima, mi vidas ne plu ian hakilon sur ghi,
Mi vidas la multpovan kaj afablan emblemon de la potenco de mia propra raso, la plej
nova, plej vasta raso.

9

(Ameriko! Mi ne fanfaronas mian amon al vi,
Mi havas kion mi havas.)

La hakilo saltas!
La solida arbaro donas fluidajn eldirojn,
Ili elfaladas, ili levighas kaj formighas,

Kabano, tendo, doko, observejo,
Drashilo, plugilo, piocho, levstango, shpato,
Shindo, relo, apogstango, murteĝajho, framflanko, lato, panelo, gablo,
Citadelo, plafono, drinkejo, akademio, orgeno, ekspoziciejo, biblioteko,
Kornico, pergolo, pilastro, balkono, fenestro, tureto, porcho,
Sarkilo, rastilo, forkego, krajono, charo, bastono, segilo, rabotilo, maleo, kojno, tenilo,
Segho, kuvo, rulringo, tablo, gicheto, padelo, fenestroklapo, planko,
Laborskatalo, kesto, kordinstrumento, boato, kadro, kaj tiel similaj,
Kapitoloj de Shtatoj, kaj la kapitolo de la lando de Shtatoj,
Longaj dignaj vicdomoj en avenuoj, hospitaloj por orfoj au por la malrichaj au malsanaj,
Manhatanaj vaporboatoj, kaj kliperoj, prenantaj la mezuron de chiuj maroj.

La formoj levighas!

Formoj de la uzado de hakiloj iamaniere, kaj la uzantoj, kaj chio kio najbaras ilin,
Dehakistoj de ligno kaj transportistoj de ghi al Penobskoto au Kenebeko,
Loghantoj en kabanoj inter la Kaliforniaj montoj au apud la malgrandaj lagoj au apud
la Kolumbia,
Loghantoj sude sur la bordoj de Gilo au la Rivero Granda, amikaj amasighoj, la tipoj kaj
amuzoj,
Loghantoj lau Sankta-Laurenco, au norde en Kanado, au tie apud la Flavashtona,
loghantoj sur bordoj kaj apud bordoj,
Fokkaptistoj, balenkaptistoj, arktikaj maristoj rompantaj pasejojn tra la glacio.

La formoj levighas!

Formoj de fabrikoj, arsenaloj, fandejoj, bazaroj,
Formoj de la dufadenaj trakoj de fervojoj,
Formoj de la shpaloj de pontoj, vastaj framoj, solivoj, arkoj,
Formoj de la flotoj da barghoj, trenshipoj, lagaj kaj kanalaj boatoj, riveraj boatoj,
Shipkonstruejoj kaj sekdokoj lau la Orienta kaj Okcidenta maroj, kaj en multaj gulfoj kaj
flanklokoj,
La vivkverkaj kilsonoj, la pinaj diloj, la sparoj, la larikaj radikoj por genuoj,
La shipoj mem sur siaj vojoj, la vicoj da skafaldoj, la laboristoj okupitaj ekstere kaj
interne,
La iloj dise kushantaj, la granda borilo kaj la malgranda borilo, la adzo, bolto, shnuro,
ortilo, gugho, kaj flanghorabotilo.

La formoj levighas!

La formo mezurita, segita, krikita, kunigita, tinkturita,
La cherkoformo por la morta, kushi en ghi en sia mortotuko,
La formo ellaborita en fostojn, en la litkadrajn fostojn, en la fostojn de la lito de la
novedzino,
La formo de la malgranda trogo, la formo de la balancarkoj sube, la formo de la lulilo de
la bebo,

La formo de la plankodiloj, la plankodiloj por la piedoj de la dancantoj,
La formo de la diloj de la familia hejmo, la hejmo de la amikaj gepatroj kaj infanoj,
La formo de la tegmento de la hejmo de la felicha juna viro kaj virino, la tegmento super
la bone geedzighinta juna viro kaj virino,
La tegmento super la vespermangho ghoje kuirata de la chasta edzino, kaj ghoje
manghata de la chasta edzo, kontenta post sia taga laboro.

La formoj levighas!
La formo de la loko de la malliberulo en la tribunalo, kaj li au shi sidanta en la loko,
La formo de la vershtabulo sur kiun sin klinas la juna rumtrinkanto kaj la maljuna
rumtrinkanto,
La formo de la hontigita kaj kolera shtuparo tretata de shtelirantaj piedpashoj,
La formo de la konanta kanapo, kaj la adulteca senmorala paro,
La formo de la vetluda tabulo kun ghiaj diablaj gajnoj kaj malgajnoj,
La formo de la shtupetaro por la konviktita kaj kondamnita murdinto, la murdinto kun
marasma vizagho kaj ligitaj brakoj,
La sherifo, chemane kun siaj deputitoj, la silenta kaj blanklipa homamaso, la svinga
pendo de la shnuro.

La formoj levighas!
La formoj de pordoj donantaj multajn elirojn kaj enirojn,
La pordo ellasanta la forpushitan amikon rughighintan kaj hastantan,
La pordo kiu enlasas bonajn novajhojn kaj malbonajn novajhojn,
La pordo de kiu la filo forlasis la hejmon memfida kaj plenblovita,
La pordo kiun li reeniris de longa kaj skandala foresto, malsana, disfalinta, sen chasto,
sen mono.

11

Shia formo levighas!
Shi malpli gardata ol iam, tamen pli gardata ol iam,
La krudaj kaj malpuraj inter kiuj shi iras ne faras shin kruda kaj malpura,
Shi scias la pensojn dum shi pasas, nenio estas kashita al shi,
Shi ne estas malpli kompleza au afabla pro tio,
Shi estas la plej multe amata, tio estas senescepta, shi havas nenian kialon timi kaj shi ne
timas,
Sakroj, malpacoj, singultataj kantoj, maldecaj esprimoj, estas senefikaj al shi dum shi
pasas,
Shi estas silenta, shi estas aplomba, ili ne ofendas shin,
Shi ricevas ilin kiel la leghoj de Naturo ricevas ilin, shi estas forta,
Shi ankau estas legho de Naturo – ne estas legho pli forta ol shi estas.

12

La chefaj formoj levighas!

Formoj de Demokratio totala, rezulto de jarcentoj,
Formoj chiam projekciantaj aliajn formojn,
Formoj de turbulentaj virecaj urboj,
Formoj de la amikoj kaj hejmdonantoj de la tuta tero,
Formoj apogataj la teron kaj apogataj per la tuta tero.

KANTO DE LA EKSPozICIO

1

(Ha, malmulte konscias la laboristo,
Kiel proksime lia laboro tenas lin al Dio,
La amanta Laboristo tra spaco kaj tempo.)

Tamen ne krei sole, nek fondi sole,
Sed alporti eble de malproksime kio estas jam fondita,
Doni al ghi nian propran identecon, mezan, senliman, liberan,
Plenigi la krudan torporan amason per vitala religia fajro,
Ne repeli au detruu tiom kiom akcepti, kunfandi, rebonstatigi,
Obei krom komandi, sekvi pli ol konduki,
Chi tiuj ankau estas la lecionoj de nia Nova Mondo;
Dum kiel malmulte la Nova tamen, kiel multe la Malnova, Malnova Mondo!

Longe kaj longe jam la herbo kreskas,
Longe kaj longe jam la pluvo falas,
Longe kaj longe jam la terглоbo chirkaurulighas.

2

Venu, Muzo, migru de Grekujo kaj Ionio,
Forstreku, mi petas, tiujn ege tropagitajn kontojn,
Tiun aferon de Trojo kaj la kolero de Ahhilo, kaj la vagadojn de Eneo kaj Odiseo,
Metu afishon "Transloghighinta" kaj "Luigota" sur la rokojn de via negha Parnaso,
Faru same en Jerusalemo, metu la anoncon alte sur la pordegon de Jafo kaj sur Monton
Morio,
Same sur la murojn de viaj Germanaj, Francaj, kaj Hispanaj kasteloj kaj Italaj kolektoj,
Char sciu ke pli bona, fresha, diligenta sfero, largha, neprovita regno atendas, postulas
vin.

3

Reagema al nia alvoko,
Au prefere al sia longe flegata emo,
Kunigita kun nerezistebla, natura gravito,
Shi venas! Mi audas la susuradon de shia robo,
Mi flaras la odoron de la delica aromo de shia spiro,

Mi rimarkas shian pashon dian, shiajn scivolajn okulojn turnighantaj, rulighantaj,
Sur chi tiun scenon mem.

La damo de la damoj! chu mi povas kredi do,
Ke tiuj antikvaj temploj, skulptajhoj klasikaj povis neniu el ili reteni shin?
Nek ombroj de Virgilio kaj Danto, nek miriadoj da memoroj, poemoj, malnovaj asocioj,
magnete altiri kaj tenadi shin?
Sed ke shi forlasis ilin chiujn – kaj chu chi tie?

Jes, se vi permesos al mi tion diri,
Mi, amikoj miaj, ech se ne vi, povas klare vidi shin,
La sama nemortanta animo de esprimado de la tero, de agado, de belo, de heroismo,
El shiaj evoluadoj chi tien veninta, finitaj la stratumoj de shiaj antaŭaj temoj,
Kashitaj kaj kovritaj de la hodiaŭaj, fondajho de la hodiaŭaj,
Finita, foririnta jam de longe, shia vocho apud la fontano de Kastalio,
Silenta la rompiltipa Sfinkso en Egiptujo, silentaj chiuj tiuj jarcentkontraustaraj tomboj.
Finitaj por chiam la epopeoj de la kaskoportaj batalistoj de Europo, Azio, finita la
primitiva voko de la muzoj,
La voko de Kaliopa por chiam fermita, Klinoa, Melpomena, Talia mortaj,
Finita la majesta ritmo de Una kaj Oriana, finita la sercho de la sankta Gralo,
Jerusalemo, manpleno da cindroj, blovataj de la vento, formortinta,
La fluoj da ombraj noktomezaj trupoj de la Krucistoj forpelitaj che l' sunlevigho,
Amadiso, Tankredo, tute for, Karlo la Granda, Rolando, Olivero for,
Palmerino, ogro, foririnta, malaperintaj la turetoj kiujn Usko de siaj akvoj spegulis,
Arturo malaperinta kun chiuj siaj prodoj, Merlino kaj Lanceloto kaj Galahado, chiuj for,
dissolvitaj komplete kiel elspiro;
Pasinta! pasinta! por ni, por chiam pasinta tiu iam tiel potenca mondo, nun nuligita,
senanima, fantoma mondo,
Brodita, blindumanta, fremda mondo, kun chiuj ghiaj belegaj legendoj, mitoj,
Ghiaj reghoj kaj kasteloj fieraj, ghiaj pastroj kaj militemaj senjoroj kaj elegantaj damoj,
Pasinta al ghia osteja kriptoj, encherkita kun korono kaj kiraso surhavataj,
Blazonita per la purpura pagho de Shekspiro,
Kaj prilamentataj de la dolchaj tristaj rimoj de Tenisono.

Mi diras ke mi vidas, amikoj miaj, ech se ne vi, la faman elmigrinton, (estas vere,
kvankam la saman, shanghighintan, sufiche vojaghintan, siatage),
Sin direktanta rekte al chi rendevuo, vigle malobstrukcanta vojon por si, vigle
marshanta tra la konfuzo,
De la bumo de mashinaro kaj la akra vaporfajfilo nekonsternita,
Tute ne perpleksigita de la drenotubo, gasmezuriloj, artefaritaj grasumoj,
Ridetanta kaj kontenta kun solida intenco resti,
Shi estas chi tie, instalita meze de la kuiriloj!

4

Sed haltu – chu mi ne forgesas etiketon?
Prezenti la fremduligon, (por kio alia mi vivas chanti?) al vi, Kolumbia;

Nome de libereco bonvenon senmortulo! manpremu unu kun la alia,
Kaj de nun fratinoj karaj estu ambau.

Ne timu ho Muzo! vere novaj manieroj kaj tagoj ricevas, chirkauas vin,
Mi malkasheme konfesas, kurioza, kurioza raso, de novaj manieroj,
Kaj tamen la sama kutima homa raso, la sama interne, ekstere,
Vizaghoj kaj koroj la samaj, sentoj la samaj, sopiroj la samaj,
La sama kutima amo, belo kaj uzo la samaj.

5

Ni ne kulpigas vin, pli maljuna Mondo, nek efektive apartigas nin de vi,
(Chu la filo volus apartigi sin de la patro?)
Retrorigardante al vi, vidante vin al viaj devoj, grandecoj, tra pasintaj epokoj
klinighanta, konstruanta,
Ni konstruas al niaj hodiau.

Pli potenca ol la tomboj de Egiptujo,
Pli bela ol la temploj de Grekujo, de Romo,
Pli fiera ol la statuhava, spajrohava katedralo de Milano,
Pli pitoreska ol la fortikajhoj de la Rejnlandaj kasteloj,
Ni planas jam nun konstrui, preter ili chiuj,
Vian grandan katedralon sankta industrio, nenian tombon,
Fortikajhon dumvivan por praktika inventado.

Kiel en maldorma vizio,
Ech dum mi chantas, mi vidas ghin levighi, mi esploras kaj profetas ekstere kaj interne,
Ghian multoblan ensemblon.

Chirkau palaco, pli alta, pli bela, pli vasta ol iu ghis nun,
La moderna mirindajho de la tero superanta la sep de la historio,
Alten levighanta vico sur vico kun vitraj kaj feraj fasadoj,
Gajiganta la sunon kaj chielon, kolora en plej gajaj koloroj,
Koloroj bronza, lilaka, rubekol-ova, mara, kaj karmezina,
Super kies ora tegmento pavos sub via standardo Libereco,
La standardoj de la Shtatoj kaj flagoj de chiu lando,
Idaro da altaj, belaj, sed malpli grandaj palacoj amasighos.

Ie inter iliaj muroj estos komencita chio kio antaueingas la perfektan homan vivon,
Provita, klera, progresinta, videble montrata.

Ne nur la tuta mondo de fabrikoj, komerco, produktoj,
Sed chiuj laboristoj de la mondo chi tie prezentotaj.

Chi tie vi spuros, en fluanta funkciado,
En chiu stato de praktika, laborema movighado, la rojojn de civilizo,
Materialoj chi tie sub via okulo shanghos sian formon kvazau per magio,

La kotono estos rikoltata, preskau en la sama kampo,
Estos sekigata, purigata, sensemigata, garbigata, shpinata en fadenon kaj tolon antau vi,
Vi vidos manojn che la laboro en chiuj malnovaj procezoj kaj chiuj novaj,
Vi vidos la diversajn grenojn, kaj kiel faruno estas farata kaj poste pano, bakata de la
 bakistoj,
Vi vidos la krudajn ercojn de Kalifornio kaj Nevado, antauenpasantaj ghis ili ighas
 ingotoj,
Vi observos kiel la presisto kompostas tipojn kaj lernos kio estas kompostujo,
Vi rimarkos mirigite la Hoe-an presilon girigantan siajn cilindrojn, defaligantan la
 presitajn foliojn konstante kaj rapide,
La foto, modelo, horlogho, pinglo, najlo, estos kreaaj antau vi.

En grandaj trankvilaj haloj, majesta muzeo instruos al vi la senlimajn lecionojn de
 mineraloj,
En alia, arbaroj, plantoj, vegetaĵoj estos ilustrataj – en alia animaloj, animala vivo kaj
 disvolvigho.

Unu majesta domo estos la muzika domo,
Aliaj por aliaj artoj – klereco, la sciencoj, estos chiuj chi tie,
Neniu estos neglektata, neniu ne estos chi tie honorata, helpata, ekzemplata.

6

(Tiu, tiu, kaj tiuj, Ameriko, estos viaj piramidoj kaj obeliskoj,
Viaj Aleksandria Faroso, ghardenoj de Babilono,
Via templo en Olimpio.)

La maskla kaj femala multoj ne laborantaj,
Chiam chi tie alfrontos la laborantan multon,
Kun valoregaj profitoj al ambau, gloro al chiuj,
Al vi Ameriko, kaj vi eterna Muzo.

Kaj chi tie vi loghos, potencaj Matronoj!
En via vasta shtato, pli vasta ol chiuj malnovaj,
Ehhataj tra longaj, longaj jarcentoj venontaj,
Soni de malsamaj, pli fieraj kantoj, kun pli fortaj temoj,
La praktika, paca vivo, la vivo de la popolo, la Popolo mem,
Levata, lumigata, banata en paco – ekzaltita, sekura en paco.

7

For la temojn de milito! for militon mem!
For de mia tremanta vido ne plu reveni tiun montrajhon de nigritaj, mutilitaj kadavroj!
Tiun inferon delasitan kaj atakon de sango, taugan por sovaghaj tigroj au por pendlangaj
 lupoj, ne raciaj homoj,

Kaj anstataŭ ĝi rapidas la kampanjoj de industrio,
Kun viaj nesenkuragigeblaj armeoj, inĝenierarto,
Viaj flagoj laboro, liberigitaj al la venteto,
Viaj klarigoj sonantaj laŭte kaj klare.

For la malnovan romantikecon!
For romanojn, intrigojn kaj dramojn de fremdaj kortegoj,
For la amversojn, sukeritajn per rimo, la komplotojn, amorojn de mallaboremuloj,
Taugajn nur por bankedoj de la nokto, kie dancantoj laŭ malfrua muziko glitadas,
La nesanaĵajn plezurojn, ekstravagancajn diboĉojn de la malmultaj,
Kun parfumoj, varmo, kaj vino, sub la blindumantaj lustroj.

Al vi, vi respektemaj prudentaj fratinoj,
Mi laŭtigas la voĉon por multe pli superbaj temoj por poetoj kaj por arto,
Ekzalti la nuntempan kaj la realan,
Instrui la mezan homon pri la gloro de lia taga promen' kaj metio,
Kanti en kantoj kiel ekzercado kaj la kemia vivo neniam estos malhelpataj,
Manlabori por ĉiu kaj ĉiuj, plugi, sarki, fosi,
Planti kaj prizorgi la arbon, la berujon, legomojn, florojn,
Por ĉiu viro priatenti ke li vere faru ion, por ĉiu virino ankaŭ;
Uzi la martelon kaj la segilon (lauvejnau au transtranĉan),
Kultivi emon por charpentado, gipsado, farbado,
Labori kiel tajloro, tajlorino, flegistino, gastejisto, portisto,
Inventi iom, ion inĝenieran, por helpi la lavadon, kuiradon, purigadon,
Kaj rigardi nenia honto partopreni mem en ili.

Mi diras, mi alportas al vi, Muzo, hodiaŭ kaj ĉi tie,
Ĉiujn profesiojn, devojn vastajn kaj malvastajn,
Laboron, sanan laboron kaj shviton, senfinan, senĉesatan,
La malnovajn, malnovajn praktikajn ŝarghojn, interesojn, ghojojn,
La familion, gepatrecon, infanecon, edzon kaj edzinon,
La domajn komfortojn, la domon mem kaj ĉiujn ĝiajn posedajhojn,
Nutrajhojn kaj ĝhian prezervadon, kemion aplikatan al ĝhi,
Kion ajn formas la mezan, fortan, kompletan, dolĉsangan viron au virinon, la perfektan
longvivan personecon,
Kaj helpas ĝhian nuntempan vivon al sano kaj felicho, kaj formas ĝhian animon,
Por la eterna reala vivo venonta.

Kun la plej lastaj ligigoj, faroj, la intertransportado de la mondo,
Vaporpotencon, la grandajn ekspresajn liniojn, gason, petrolon,
Ĉi tiujn triumfojn de nia tempo, la delikatan kablou de Atlantiko,
La Pacifikan fervojon, la Suezan kanalon, la Mont-Cenis kaj Gothardan kaj Husakan
tunelojn, la Bruklinan ponton,
Ĉi tiun teron tute transtenditan per feraj reloj, kun linioj de vaporŝipoj transirantaj
ĉiun maron,
Nian propran rondajhojn, la aktualan globon mi alportas.

Kaj vi, Ameriko,
 Viaj idoj starantaj tiel altege, tamen pli alte, Vi super chio staranta,
 Kun Venko che via maldekstro, kaj che via dekstra mano Legho;
 Vi Unio, tenanta chion, kunfandanta, sorbanta, toleranta chion,
 Vin, chiam vin, mi kantas.

Vi, ankau vi, unu Mondo,
 Kun chiuj viaj vastaj geografioj, multopaj, diferencaj, malproksimaj,
 Chirkaupremitaj de vi en unu – unu komunan astran lingvon,
 Unu komunan nedispesigeblan destinon por Chiuj.

Kaj je la sorchoj kiujn vi konfidas al tiuj viaj seriozaj servantoj,
 Mi chi tie personigas kaj vokas miajn temojn igi ilin pasi antau vi.

Jen, Ameriko! (kaj vi, respektindega gasto kaj fratino!)
 Por vi venas almarshante viaj akvoj kaj viaj landoj;
 Jen! viaj kampoj kaj bienoj, viaj malproksimaj arbaroj kaj montoj,
 Kiel en procesio venantaj.

Jen, la maro mem,
 Kaj sur ghia senlima, hulanta brusto, la shipoj;
 Vidu, kie iliaj blankaj veloj, pufighantaj en la vento, punktas la verdon kaj blunon,
 Vidu, la vaporshipoj venantaj kaj irantaj, vaporveturante en la havenon au el ghi,
 Vidu, malhelaj kaj ondantaj, la longaj flagoj de fumo.

Jen, en Oregono, malproksime en la nordo kaj okcidento,
 Au en Majno, malproksime en la nordo kaj oriento, viaj gajaj hakilistoj,
 Svingantaj la tutan tagon siajn hakilojn.

Jen, sur la lagoj, viaj pilotoj che siaj stirradoj, viaj remistoj,
 Kiel la frakseno fleksighas sub tiuj muskolaj brakoj.

Tie apud la forno, kaj tie apud l' amboso,
 Jen viaj fortikaj forghistoj svingantaj siajn martelegojn,
 Mansupre tiel konstante, mansupre ili turnighas kaj falas kun ghoja tintego,
 Kiel bruego da ridado.

Rimarku la spiriton de inventado chie, viajn rapidajn patentojn,
 Viajn konstantajn metiejojn, fandejojn, levighintajn au levighantajn,
 Vidu, de iliaj fumtuboj, kiel la altaj flamfajroj fluas.

Rimarku, viaj senfinaj bienoj, Norde, Sude,
 Viaj richaj filinoshtatoj, Orientaj kaj Okcidentaj,
 La diversaj produktoj de Ohio, Pensilvanio, Misurio, Georgio, Teksaso, kaj la ceteraj,
 Viaj senlimaj rikoltoj, herbo, tritiko, sukero, oleo, maizo, rizo, kanabo, lupolo,

Viaj tenejoj, chiuj plenigitaj, la senfina vartrajno kaj la shvela staplo,
La vinberoj kiuj maturighas sur viaj vitoj, la pomoj en viaj fruktarbaroj,
Viaj nekalkuleblaj konstruoligno, bovajho, porkajho, terpomoj, via karbo, via oro kaj
 arghento,
La neelcherpebla fero en viaj minoj.

Tute viaj, ho sankta Unio!
Shipoj, bienoj, butikoj, tenejoj, fabrikoj, minoj,
Urbo kaj Shtato, Norde, Sude, ero kaj aro,
Ni dedichas, timeginda Patrino, chion al vi!

Protektantino absoluta, vi! bastiono de chiuj!
Char bone ni scias ke dum vi donas al chiu kaj chiuj (malavara kiel Dio),
Sen vi nek chiuj nek chiu, nek lando, hejmo,
Nek shipo, nek mino, nek iuj chi tie tiun chi tagon sekuraj,
Nek io, nek ajnan tagon sekura.

9

Kaj vi, la Emblemo, flirtanta super chio!
Delikata belulino, vorton al vi (ghi povus esti salubra),
Memoru ke vi ne chiam estis kiel chi tie hodiau tiel komforte suverenigita,
En aliaj scenoj ol chi tiuj mi observis vin, flago,
Ne tute tiel bonorda kaj sendifekta kaj freshe floranta en faldoj de senmakula silko,
Sed mi vidis vin, flago, en chifonojn shirita sur via splitita stango,
Au alpremita al la brusto de iu juna flagportisto per malesperaj manoj,
Sovaghe priluktata, por vivo au morto, pribatalata longe,
Meze de tondroknalado de kanonoj kaj multaj sakroj kaj ghemoj kaj krioj, kaj fusilaj
 salvoj akre krakantaj,
Kaj movighantaj amasoj impetantaj kvazau sovaghaj demonoj, kaj vivoj riskataj kvazau
 nenio,
Por via nura restajho makulita de malpurajho kaj fumo kaj trempita en sango,
Por tio, mia belulino, kaj por ke vi povu lanti kiel nun sekura tie supre,
Multajn bonajn virojn mi vidis fali.

Nun chi tie kaj chi tiuj kaj de chi tie en paco, chiuj viaj, ho Flago!
Kaj chi tie kaj de chi tie por vi, ho universala Muzo! kaj vi por ili!
Kaj chi tie kaj de chi tie, ho Unio, chiuj laboroj kaj laboristoj viaj!
Neniu apartaj de vi – de nun Unu sole, ni kaj vi,
(Char la sango de la infanoj, kio ghi estas, nur la sango patrina?
Kaj vivoj kaj laboroj, kio ili chiuj estas finfine krom la vojoj al fido kaj morto?).

Dum ni rekonstatas nian senmezuran richecon, ghi estas por vi, kara Patrino,
Ni posedas ghin chion kaj diversan hodiau neapartigeblan en vi;
Ne rigardu nian kanton, nian manifeston, nur por produktoj krudaj au lukro fia – ghi
 estas por vi, la animo en vi, elektra, spirita!
Niajn bienojn, inventajhojn, rikoltojn, ni posedas en vi! urbojn kaj Shtatojn en vi!

Nian liberecon tutan en vi, niajn vivojn mem en vi!

KANTO DE LA SEKVOJO

1

Kalifornia kanto,
Profetajho kaj nerektajho, penso nepalpebla por spiri kiel aero,
Hhoro da driadoj, velkantaj, forirantaj, au hamadriadoj, forirantaj,
Murmuranta, fatala, giganta vocho, el la tero kaj chielo,
Vocho de potenca mortanta arb' en la densa sekvoja arbaro.

Adiau, miaj fratoj,
Adiau ho tero kaj chielo, adiau vi najbaraj akvoj,
Mia tempo jam finis, mia fino jam venis.

Lau la norda bordo,
Tuj malantaue de la roklimigita marbordo kaj la kavernoj,
En la sala aero de la maro en la Mendocina lando,
Kun la ondimpeto por bazo kaj akompano basa kaj rauka,
Kun kraketadaj batoj de hakiloj, sonantaj muzike, impetataj de fortaj brakoj,
Fendita profunde de la akraj langoj de la hakiloj, tie en la sekvoja arbaro densa,
Mi audis la potencan arbon sian mortchanton chantanta.

La hakantoj ne audis, la barakaj domachoj ne ehhis,
La lertorelaj kamionistoj kaj la chen-kaj-shraubkrik-istoj ne audis,
Dum la arbarspiritoj venis el siaj frekventejoj de mil jaroj alighi al la refreno,
Sed en mia animo mi klare audis.

Murmurighanta el ghiaj miriadoj da folioj,
Malsupren de ghia altega supro, levighinta ducent futojn alte,
El ghiaj fortikaj trunko kaj branchoj, el ghia futodika shelo,
Tiu chanto de la sezonoj kaj tempo, chanto ne de la pasinteco sole sed de la estonteco.

*Vi nekalkulebla vivo de mi,
Kaj chiuj vi respektindaj kaj senkulpaj ghojoj,
Multjara fortika vivo de mi kun ghojoj inter pluvo kaj multaj someraj sunoj,
Kaj la blankaj neghoj kaj la nokto kaj la sovaghaj ventoj;
Ho la grandaj paciencaj fortikaj ghojoj, la fortaj ghojoj de mia animo, nekonsciataj de la
homo,
(Char sciu, mi portas la animon konvenan al mi, mi ankau havas konscion, identecon,
Kaj chiuj rokoj kaj montoj havas, kaj la tuta tero),
Ghojoj de vivo konvena al mi kaj fratoj miaj,
Nia tempofino jam venis.*

*Nek cedas ni morne, majestaj fratoj,
Ni, kiuj grande plenigis nian tempon;
Kun la trankvila kontento de Naturo, kun silenta ghojego,
Ni bonvenigas tion por kio ni klopodis tra la pasinteco,
Kaj forlasas la kampon por ili.*

*Por ili, antaudirataj longe,
Por supera raso, ili ankau por grande plenigi sian tempon,
Por ili ni abdikas, en ili ni mem, vi arbaraj reghoj!
En ili chi tiuj chieloj kaj aeroj, chi tiuj montaj pintoj, Shasto, Nevadoj,
Chi tiuj krutegaj klifoj, chi tiu amplekso, chi tiuj valoj, malproksima Josemito,
Esti en ili sorbataj, asimilataj.*

*Tiam al pli alta tono,
Ankorau pli fiera, pli ekstaza levighis la chanto,
Kvazau la heredantoj, la dioj de la Okcidento,
Kunighante, kun mastrolango ekpartoprenus.*

*Ne palajn de la fetichoj de Azio,
Nek rughajn de la malnova dinastia buchejo de Europo,
(Loko de murdkomplotoj de tronoj, kun odoro restanta ankoraŭ de militoj kaj eshafodoj
chie),
Sed venintajn de la longaj kaj senkulpaj penoj de Naturo, pace konstruitajn tiel,
Chi tiujn virgajn landojn, landojn de la Okcidenta bordo,
Al la nova kulminanta homo, al vi, la nova empirio,
Kiun vi longe auguris, ni promesas, ni dedichas.*

*Vi okultaj profundaj voloĵoj,
Vi meza spirita vireco, celo de chio, aplomba sur vi mem, donanta ne ricevanta leghon,
Vi virineco dia, mastrino kaj fonto de chio, de kiu vivo kaj amo kaj chio kio venas de
vivo kaj amo,
Vi nevidata morala esenco de chiuĵ vastaj materialoj de Ameriko (epoko sur epoko
efikanta en morto same kiel en vivo),
Vi kiu, kelkfoje konata, pli ofte nekonata, vere formas kaj muldas la Novan Mondon,
ghustigante ghin al Tempo kaj Spaco,
Vi kashita nacia volo, kushanta en viaj abismoj, kashita sed chiam vigla,
Vi pasintaj kaj nuntempaj celoj, tenace postkurataj, eble nekonsciaj pri vi mem,
Nedeŭiigitaj de chiuĵ pasantaj eraroj, perturboj de la surfaco;
Vi vitalaj, universalaj, senmortaj ghermoj, sub chiuĵ kredoj, artoj, statutoj, literaturoj,
Chi tie konstruu viajn hejmojn por chiam, establu chi tie, chi tiujn regionojn tutajn,
landojn de la Okcidenta bordo,
Ni promesas, ni dedichas al vi.*

*Char homo de vi, via tipa raso,
Chi tie li fortika, dolcha, giganta kresku, chi tie alte staru proporcie al Naturo,
Chi tie grimpu la vastajn purajn spacojn, nelimigite, nehaltigite de muro au tegmento,
Chi tie ridu kun shtormo au suno, chi tie ghoju, chi tie pacience hardighu,*

*Chi tie atentu sin mem, disvolvu sin mem (ne la formulojn de aliaj atentu), chi tie
plenigu sian tempon,
Siatempe fali, helpi, nekonsciite fine,
Malaperi, servi.*

Tiel sur la norda bordo,
En la ehho de la vokoj de kamionistoj kaj la tintantaj chenoj, kaj la muziko de la hakiloj
de la hakistoj,
La falantaj trunko kaj branĉoj, la tondro, la obtuza kricho, la ghemo,
Tiaj vortoj, kunigitaj de el la sekvojo, kvazau de voĉoj ekstazaj, antikvaj, kaj susurantaj,
La jarcentdaŭraj, nevidataj driadoj, kantantaj, retirighantaj,
Chiuĵ siaj kashanguloj de arbaroj kaj montoj forlasantaj,
De la Kaskada montocheno al la Vasacho, au Idaho fora, au Utaho,
Al la dioj de la moderna de nun cedantaj,
La horo kaj indikoj, la vidoj de venanta homaro, la setlejoj, trajtojn ĉiujn,
En la Mendocina arbaro mi kaptis.

2

La flagranta kaj ora spektaklo de Kalifornio,
La subita kaj belega dramo, la sunaj kaj ampleksaj landoj,
La longa kaj diversa etendigo de la Pugheta markolo al Koloradio sude,
Landoj banataj en pli dolĉa, pli maldensa, pli saniga aero, valoj kaj montaj klifoj,
La kampoj de Naturo, longe preparataj kaj novalaj, la silenta cikla kemio,
La malrapidaj kaj seninterrompaj epokoj pezpashantaj, la neokupita surfaco
maturighanta, la riĉaj ercoj formighantaj sube,
Finfine la Nova, alvenanta, alprenanta, ekposedanta,
Svarmanta kaj laborema raso, setlanta kaj organizanta ĉie,
Ŝipoj, envenantaj de la tuta randa mondo kaj elirantaj al la tuta mondo,
En Hindujo kaj Ĉinujo kaj Australio kaj la mil insulaj paradizoj de Pacifiko,
Multloĝhataj urboj, la plej lastaj inventaĵoj, la vaporŝipoj sur la riveroj, la fervojoj, kun
multaj ekonomiaj bienoj, kun mashinaro,
Kaj lano kaj tritiko kaj uvo, kaj fosejoj de flava oro.

3

Sed pli en vi ol ĉi tiuj, landoj de la Okcidenta bordo,
(Ĉi tiuj nur la rimedoj, la aparato, la starejo),
Mi vidas en vi, certe venontan, la promeson de miloj da jaroj, ĝhis nun prokrastitan,
Promesita esti plenumata, nia komuna speco, la raso.

La nova socio finfine, proporcia al Naturo,
En la viro de vi, pli ol viaj montaj pintoj au bravaj arboj imperiaj,
En la virino pli, multe pli ol via tuta oro au vitoj, au eĉ la vitala aero.

Freshe venantan, al nova mondo ja, tamen longe preparatan,
Mi vidas la genion de la moderna, idon de la reala kaj ideala,

Malobstrukcanta la teron por vasta homaro, la vera Ameriko, heredinto de la
pasinteco tiel granda,
Por konstrui pli grandan estontecon.

KANTO POR PROFESIOJ

1

Kanto por profesioj!
En la laboro de motoroj kaj metioj kaj la laboro de kampoj mi trovas la disvolvigojn,
Kaj trovas la eternajn signifojn.

Laboristoj kaj Laboristinoj!
Se chiuj edukoj, praktikaj kaj ornamaj, estus bone elmontrataj el mi, kiel ghi rezultus?
Se mi estus kiel la chefinstruisto, karitata proprietulo, sagha shtatisto, kiel ghi rezultus?
Se mi estus al vi kiel la mastro, dunganta kaj paganta vin, chu tio kontentigus vin?

La kleraj, virtaj, karitataj, kaj la kutimaj kondichojoj,
Homo kiel mi kaj neniam kaj kutimaj kondichojoj.

Nek servanto nek mastro mi,
Mi prenas ne prefere grandan prezon ol malgrandan prezon, mi havos mian propran,
kiu ajn ghuas min,
Mi estos kvita kun vi kaj vi estos kvita kun mi.

Se vi staras che la laboro en laborejo mi staras tiel proksime kiel la plej proksima en la
sama laborejo,
Se vi donas donacojn al via frato au plej kara amiko, mi demandas tiom kiom ricevas via
frato au plej kara amiko,
Se via amanto, edzo, edzino, estas bonvena tage au nokte, mi devas esti persone tiel
bonvena,
Se vi ighas degenerinta, krima, malsana, tiam mi ighas tiel por vi,
Se vi memoras viajn malprudentajn kaj eksterleghajn farojn, chu vi pensas ke mi ne
povas memori miajn proprajn malprudentajn kaj eksterleghajn farojn?
Se vi dibochas che la tablo, mi dibochas che la kontraua fino de la tablo,
Se vi renkontas iun fremdulon en la stratoj kaj amas lin au shin, nu mi ofte renkontas
fremdulojn en la stratojn kaj amas ilin.

Nu kion vi opiniis pri vi mem?
Chu estas vi do kiu opiniis vin malpli?
Chu estas vi kiu opiniis la Prezidenton pli granda ol vi?
Au la ricajn pli bonhavaj ol vi? au la klerajn pli saghaj ol vi?

(Char vi estas grasa au akna, au estis foje ebria au shtelisto,
Au ke vi estas malsana, au reumata, au prostituitino,
Au el frivoleco au senpotenco, au ke vi estas nenia klerulo kaj neniam vidis vian nomon

presita,
Chu vi koncedas ke vi estas iom malpli senmorta?)

2

Animoj de viroj kaj virinoj! ne estas vi kiujn mi nomas nevidataj, neaŭdataj, netuŝeblaj,
kaj netuŝantaj,
Ne estas vi pri kiuj mi iras argumenti la por kaj la kontraŭ kaj decidi ĉu vi estas
vivantaj aŭ ne,
Mi agnoskas publike kiuj vi estas, eĉ se neniu alia agnoskas.

Plenkreskintajn, duonkreskintajn, kaj bebajn, de ĉi tiu lando kaj ĉiu lando, endome kaj
eksterdome, unu ĝuste tiom kiom la alian, mi vidas,
Kaj ĉion alian malantaŭ aŭ tra ili.

La edzino, kaj ŝi ne estas unu joton malpli ol la edzo,
La filino, kaj ŝi estas ĝuste tiel bona kiel la filo,
La patrino, kaj ŝi estas entute tiom kiom la patro.

Idoj de sensciaj kaj malriĉaj, knaboj lernoservantaj en metioj,
Junuloj laborantaj en bienoj kaj maljunuloj laborantaj en bienoj,
Maristoj, komercistoj, marbordistoj, enmigrantoj,
Ĉiujn ĉi tiujn mi vidas, sed pli proksime kaj pli malproksime la samajn mi vidas,
Neniu eskapos de mi kaj neniu deziros eskapi de mi.

Mi alportas kion vi multe bezonas tamen ĉiam havas,
Ne monon, amorojn, vestojn, manĝadon, erudicion, sed same tiel bonan,
Mi sendas nenian agenton aŭ peranton, ofertas nenian reprezentantajn de valoro, sed
ofertas la valoron mem.

Estas io kio venas al oni nun kaj konstante,
Ĝi ne estas tio kio estas presata, predikata, diskutata, ĝi evitas diskutadon kaj
presadon,
Ĝi ne estas por meti en libron, ĝi ne estas en ĉi tiu libro,
Ĝi estas por vi, kiu ajn vi estas, ĝi estas ne pli malproksima de vi ol via aŭdado kaj
vidado estas de vi,
Ĝi estas aludata de plej proksima, plej ordinara, plej ĉemana, ĝi estas ĉiam elvokata
de ili.

Vi povas legi en multaj lingvoj, tamen legi nenion pri ĝi,
Vi povas legi la mesaĝon de la Prezidento kaj legi nenion pri ĝi tie,
Nenion en la raportoj de la Shtata Departemento aŭ Fiska Departemento, aŭ en la
ĉiutagaj ĵurnaloj aŭ ĉiusemajnaj ĵurnaloj,
Aŭ en la censo aŭ enspezaj raportoj, prezoj kurantaj, aŭ iaj raportoj pri akcioj.

3

La suno kaj steloj kiuj shvebas en la libera aero,
La pomforma tero kaj ni sur ghi, certe la drivado de ili estas io granda,
Mi ne scias kio ghi estas krom ke ghi estas granda kaj ke ghi estas felicho,
Kaj ke la enfermanta signifo de ni chi tie ne estas spekulativo au dirado de spritajho au
 esplorado,
Kaj ke ghi ne estas io kio per shanco povus bone rezulti por ni, kaj sen shanco devas esti
 malsukceso por ni,
Kaj ne io kio povus ankoraŭ esti malkonfesata en ia eventualeco.

La lumo kaj ombro, la kurioza senso de korpo kaj identeco, la avareco kiu kun perfekta
 komplezo voras chiujn aferojn,
La senfina fiero kaj etendigho de homo, nedireblaj ghojoj kaj malghoj,
La mirindajho kiun chiu vidas en chiu alia kiun li vidas, kaj la mirindajhoj kiuj plenigas
 chiun minuton de tempo por chiam,
Por kio vi opiniis ilin, kamarado?
Chu vi opiniis ilin por via metio au kultivado? au por la profitoj de via magazeno?
Au por akiri al vi oficon? au por okupi la libertempon de sinjoro, au la libertempon de
 sinjorino?

Chu vi opiniis ke la pejzagho alprenis substancon kaj formon, por ke ghi povus esti
 penetrata en bildo?
Au viroj kaj virinoj, por ke ili povus esti priverkataj, kaj kantoj kantataj?
Au la alti-ro de gravito, kaj la grandaj leghoj kaj harmoniaj kombinajhoj kaj la fluidajhoj
 de la aero, kiel subjektoj por la kleruloj?
Au la bruna tero kaj la blua maro por mapoj kaj landkartoj?
Au la steloj por esti metataj en konstelaciojn kaj nomataj kuriozajn nomojn?
Au ke la kreskado de semoj estas por terkultura tabeloj, au terkulturo mem?

Malnovaj institucioj, tiuj artoj, bibliotekoj, legendoj, kolektoj, kaj la praktiko, transdonata
 en fabrikadoj, chu ni taksos ilin tiel alte?
Chu ni taksos nian monon kaj komercon alte? Mi ne objhetas,
Mi taksas ilin tiel alte kiel la plej alta – tiam infanon naskitan de virino kaj viro mi taksas
 preter chia takso.

Ni pensis nian Union granda, kaj nian Konstitucion granda,
Mi ne diras ke ili ne estas grandaj kaj bonaj, char ili estas,
Mi chi-tage ghuste tiom amas ilin kiel vi,
Do mi amas Vin, kaj chiujn miajn kunulojn sur la tero.

Ni rigardas bibliojn kaj religiojn diaj – mi ne diras ke ili ne estas diaj,
Mi diras ke ili elkreskis el vi kaj povus elkreski el vi ankoraŭ,
Ne estas ili kiuj donas vivon, estas vi kiu donas vivon,
Folioj estas ne pli eligataj de la arboj, au arboj de la tero, ol ili estas eligataj el vi.

La sumon de chiuj sciataj respektoj mi kalkulas en vi, kiu ajn vi estas,
La Prezidento estas tie en la Blanka Domo por vi, ne estas vi kiu estas chi tie por li,
La Sekretarioj agas en iliaj burooj por vi, ne vi chi tie por ili,
La Kongreso kunvenas chiun Dek-duan monaton por vi,
Leghoj, jughejoj, la formado de Shtatoj, la chartoj de urboj, la irado kaj venado de
komerco kaj poshtoj estas chiuj por vi.

Auskultu proksime, miaj lernantoj karaj,
Doktrinoj, politikoj, kaj civilizo elighas el vi,
Skulptajhoj kaj monumentoj kaj io surskribita ie estas registritaj en vi,
La senco de historiajhoj kaj statistikeroj, tiel malproksime malantaŭen kiel atingas la
registroj, estas en vi chi-hore, kaj mitoj kaj fabeloj same,
Se vi ne spirus kaj irus chi tie, kie ili chiuj estus?
La plej famekonataj poemoj estus cindroj, oratorajhoj kaj teatrajhoj estus vacuoj.

Tuta arkitekturo estas tio kion vi faras al ghi kiam vi rigardas al ghi,
(Chu vi pensis ke ghi estis en la griza au blanka shtono? au la konturoj de la arkoj kaj
kornicoj?)

Tuta muziko estas kio vekighas el vi kiam vi estas rememorigata de la instrumentoj,
Ghi ne estas la violonoj kaj la kornetoj, ghi ne estas la hobojo nek la batantaj tamburoj,
Nek la partituro de la baritonulo kantanta sian dolchan romancon nek tiu de la
vira hhoru, nek tiu de la virina hhoru,
Ghi estas pli proksima kaj pli malproksima ol ili.

5

Chu la tuto revenos do?
Chu chiu povas vidi signojn de la plej bona per rigardo en la spegulon? chu estas nenio
pli granda au pli?
Chu chio sidas tie kun vi, kun la mistika nevidata animo?

Stranga kaj malfacila tiu paradokso vera kiun mi donas,
Objektoj krudaj kaj la nevidata animo estas unu.

Domkonstruado, mezurado, segado de la tabuloj,
Ferforghistado, vitroblovado, najlofarado, barelistado, stantegmentado, shindaplikado,
Shipcharpentado, dokkonstruado, fishkonservado, pavimplatado de trotuaroj de
pavimplatistoj,
La pumpilo, la rammashino, la granda argano, la karbbakforno kaj la brikbakforno,
Karbominoj kaj chio kio estas tie malsupre, la lampoj en la mallumo, ehhoj, kantoj, kiaj
meditadoj, kiaj vastaj naturaj pensoj, rigardantaj tra fulgaj vizaghoj,
Ferfabrikoj, forghfajroj en la montaro au apud riverbordo, viroj chirkaue, palpantaj la
fandajhon per grandegaj levstangoj, buloj da erco, la tauga kombinado de erco,
kalkshtono, karbo,
La blovegforno kaj la pudloforno, la fandbulo fine che la fundo de la fandajho, la
rulmuelilo, la stumpaj stangoj de krudfero, la forta netforma T-relo por

fervoj,
 Olefabrikoj, silkfabrikoj, plumbblankfabrikoj, la sukerejo, vaporsegoj, la grandaj
 uzinoj kaj fabrikoj,
 Shtontajlado, belformaj garnajhoj por fasadoj au fenestro- au pordolinteloj, la maleo, la
 dentchizilo, la elstarajho por protekti la polekson,
 La shtopgarnfero, la kaldrono da bolanta volbcemento, kaj la fajro sub la kaldrono,
 La kotongarbo, la hoko de la stivisto, la sego kaj boko de la segisto, la muldilo de la
 muldisto, la labortranchilo de la buchisto, la glacisego, kaj tuta laboro je glacio,
 La laboro kaj iloj de la rigisto, graplisto, velfaristo, rulblokfaristo,
 Varoj el gutaperko, papermachajho, koloroj, brosoj, brosfarado, vitristiloj,
 La plakajho kaj glupoto, la ornamoj de la frandajhisto, la karafo kaj glasoj, la tondilego
 kaj platgladilo,
 La aleno kaj genurimeno, la pindmezuro kaj kvartmezuro, la vendotablo kaj altskabelo,
 la inkskribilo el plumo au metalo, la farado de chiaj eghizitaj iloj,
 La bierfarejo, bierfarado, la malto, la kuvegoj, chio kio estas farata de bierfaristoj,
 vinfaristoj, vinagrofariŝtoj,
 Ledpreparado, diligencfarado, bolujofarado, shnuregplektado, distilado,
 afishpentrado, kalkbruligado, kotonplukado, elektroplakado, elektrotipio,
 stereotipio,
 Daubmashinoj, rabotmashinoj, falchmashinoj, plugmashinoj, drashmashinoj,
 vaporvagonoj,
 La charo de la charisto, la omnibuso, la pezega platcharo,
 Pirotekniko, ellaso de koloritaj fajrajhoj nokte, fantaziaj figuroj kaj shprucoj,
 Bovajho sur la budo de la buchisto, la buchejo de la buchisto, la buchisto en siaj
 mortigvestoj,
 La enfermejoj de viva porkajho, la mortigmartelo, la porkohoko, la brogista kuvo,
 senintestigo, la fendista fendilo, la pakista maleo, kaj la abunda vintrolaboro de
 porkajhpakado,
 Farunfabrikoj, muelado de tritiko, sekalo, maizo, rizo, la bareloj kaj la duon- kaj kvaron-
 bareloj, la sharghitaj barghoj, la altaj amasoj sur varfoj kaj digoj,
 La viroj kaj la laboro de la viroj sur pramoj, fervojoj, bordboatoj, fishboatoj, kanaloj;
 La chiuhora rutino de via propra au ies vivo, la laborejo, korto, magazeno, au fabriko,
 Chi tiuj elmontrajhoj chiuj apud vi tage kaj nokte – laboristo! kiu ajn vi estas, via
 chiu taga vivo!
 En tiu kaj ili la pezo de la plej peza – en tiu kaj ili multe pli ol vi taksis (kaj multe malpli
 ankau),
 En ili realajhoj por vi kaj mi, en ili poemoj por vi kaj mi,
 En ili ne vi mem – vi kaj via animo enfermas chiujn aferojn, senkonsidere al takso,
 En ili la disvolvighado bona – en ili chiuj temoj, aludoj, ebloj.

Mi ne asertas ke kion vi vidas pretere estas vana, mi ne konsilas al vi chesi,
 Mi ne diras ke kondukoj kiujn vi pensis grandaj ne estas grandaj,
 Sed mi diras ke neniu kondukas al pli grandaj ol chi tiuj kondukas.

Chu vi volas serchi malproksime? vi certe revenas finfine,

En aferoj plej konataj al vi trovanta la plej bonan, au esence la plej bonan,
En homoj plej proksimaj al vi trovanta la plej dolchajn, plej fortajn, plej amemajn,
Felichon, scion, ne en alia loko sed en chi tiu loko, ne por alia horo sed por chi tiu horo,
La viron en la unua kiun vi vidas au tushas, chiam en amiko, frato, plej proksima
 najbaro – la virinon en patrino, fratino, edzino,
La popularaj gustoj kaj oficoj havantaj prioritaton en poemoj au ie,
Vi laboristinoj kaj laboristoj de chi tiuj Shtatoj, havantaj vian propran dian kaj fortan
 vicon,
Kaj chio alia cedanta al viroj kaj virinoj kiel vi.

Kiam la psalmo kantas anstatau la kantisto,
Kiam la skribajho predikas anstatau la predikisto,
Kiam la predikejo descendas kaj iras anstatau la chizisto kiu chizis la subtenan pupitron,
Kiam mi povas tushi la korpon de libroj nokte au tage, kaj kiam ili povas retushi mian
 korpon ree,
Kiam universitata kurso konvinkas kiel dormanta virino kaj infano konvinkas,
Kiam la stampita oro en la shloskamero ridetas kiel la filin' de la nokta gardisto,
Kiam rajtigaj aktoj lantase en seghoj kontraue kaj estas miaj amikaj kompanoj,
Mi intencas etendi al ili la manon, kaj tiom taksu ilin kiom mi taksas virojn kaj virinojn
 kiel vi.

KANTO DE LA RULIGHANTA TERO

1

Kanto de la rulighanta tero, kaj de vortoj akordantaj,
Chu vi pensis ke tiuj estis la vortoj, tiuj vertikalaj linioj? tiuj kurboj, anguloj, punktoj?
Ne, tiuj ne estas la vortoj, la substancaj vortoj estas en la grundo kaj maro,
Ili estas en la aero, ili estas en vi.

Chu vi pensis ke tiuj estis la vortoj, tiuj delicaj sonoj el la bushoj de viaj amikoj?
Ne, la veraj vortoj estas pli delicaj ol ili.

Homaj korpoj estas vortoj, miriadoj da vortoj,
(En la plej bonaj poemoj reaperas la korpo, de la viro au de la virino, bonforma, natura,
 gaja,
Kun chiu parto kapabla, aktiva, riceva, sen honto au la bezono de honto).

Aero, grundo, akvo, fajro – tiuj estas vortoj,
Mi mem estas vorto kun ili – miaj kvalitoj interpenetras kun iliaj – mia nomo estas nenio
 al ili,
Ech se ghi estus dirata en la tri mil lingvoj, kion sciuss aero, grundo, akvo, fajro pri mia
 nomo?

Sana cheesto, amika au komanda gesto, estas vortoj, diroj, signifoj,
La charmoj kiuj akompanas la nurajn aspektojn de iuj viroj kaj virinoj estas diroj kaj

signifoj ankau.

La fabrikado de animoj estas de tiuj neaudeblaj vortoj de la tero,
La majstroj konas la vortojn de la tero kaj uzas ilin pli ol audeblajn vortojn.

Plibonigo estas unu el la vortoj de la tero,
La tero nek lantast nek hastas,
Ghi havas chiujn atribuojn, kreskojn, efikojn, latentajn en ghi de la komenco,
Ghi ne estas duonbela sole, difektoj kaj elkreskajhoj montrighas ghuste tiom kiom
perfektajhoj montrighas.

La tero ne retenas, ghi estas sufiche malavara,
La veroj de la tero chiam atendas, ili ankau ne estas tiel kashitaj,
Ili estas trankvilaj, subtilaj, netrassendebaj per presajho,
Ili estas trapenetrataj de chiuj aferoj, volonte transdirantaj sin,
Transdirante senton kaj inviton, mi eldiras kaj eldiras,
Mi ne parolas, tamen se vi ne audas min, kiel mi utilas al vi?
Porti, plibonigi, mankante chi tiujn, kiel mi utilas al vi?

(Nasku! chiuj nasku!
Chu vi volas putrigi viajn proprajn fruktojn en vi mem tie?
Chu vi volas kauri kaj sufokighi tie?)

La tero ne argumentas,
Ghi ne estas kompatinda, havas neniam arangojn,
Ne krias, hastas, persvadas, minacas, promesas,
Faras neniam diskriminaciojn, havas neniam konceptebajn malsukcesojn,
Fermas neniam, rifuzas neniam, elbaras neniam,
Pri chiuj potencoj, objektoj, statoj, ghi sciigas, elbaras neniam.

La tero ne elmontras sin, nek rifuzas elmontri sin, posedas ankoraŭ sube,
Sub la senseblaj sonoj, la majesta horo de herooj, la ghemegoj de sklavo,
Persvadoj de amantoj, sakroj, anheloj de la mortantaj, ridado de junuloj, akcentoj de
marchandantoj,
Sub chi tiuj, posedanta vortojn kiuj neniam malsukcesas.

Al shiaj infanoj la vortoj de la elokventa muta granda patrino neniam malsukcesas,
La veraj vortoj ne malsukcesas, ĉar movo ne malsukcesas kaj reflekto ne malsukcesas,
Ankau la tago kaj nokto ne malsukcesas, kaj la vojaĝo al kiu ni nin dedikas ne
malsukcesas.

De la senfinaj fratinoj,
De la senĉesaj kotiljonoj da fratinoj,
De la centripetaj kaj centrifugaj fratinoj, la pli aghaj kaj pli junaj fratinoj,
La bela fratino kiun ni konas dancadas kun la ceteraj.

Kun sia larĝa dorso kontraŭ chiu rigardanto,

Kun la fascinadoj de juneco kaj la egalaj fascinadoj de maljuneco,
Sidas shi kiun mi ankau amas kiel la ceteraj, sidas neghenate,
Suprentenante en la mano kio havas la karakteron de spegulo, dum shiaj okuloj
 retrorigardas de ghi,
Rigardas dum shi sidas, invitante neniun, rifuzante neniun,
Tenante spegulon tage kaj nokte senlace antaŭ sia propra vizagho.

Vidataj chemane au vidataj de fore,
Tauge la dudek kvar aperas publike chiun tagon,
Tauge aliras kaj pasas kun siaj kompanoj au unu kompano,
Rigardante de neniaj vizaghoj propraj, sed de la vizaghoj de tiuj kiuj estas kun ili,
De la vizaghoj de infanoj au virinoj au la vira vizagho,
De la liberaj vizaghoj de bestoj au de senvivaj objektoj,
De la pejzagho au akvoj au de la ekskvizita apero de la chielo,
De niaj vizaghoj, mia kaj via, fidele redonante ilin,
Chiun tagon publike nepre aperante, sed neniam dufoje kun la samaj kompanoj.

Ampleksante homon, ampleksante chion, marshas la tricent sesdek kvin nerezisteble
 chirkau la suno;
Ampleksante chion, kvietigante, subtenante, sekvas tuj poste tricent sesdek kvin ofsetoj
 de la unua, certaj kaj necesaj kiel ili.

Rulighante antaŭen konstante, nenion timanta,
Sunbrilon, shtormon, malvarmon, varmegon, chiam kontraustarante, pasante, portante,
La realigon kaj determinon de la animo ankoraŭ heredante,
La fluidan vakuon chirkaŭe kaj antaŭe ankoraŭ enirante kaj dividante,
Nenia hezito retenanta, nenia ankro ankranta, sur nenan rokon frapanta,
Rapida, gaja, kontenta, nesenigita, nenion perdante,
Pri chio kapabla kaj preta en kiu ajn momento doni precizan kalkulon,
La dia ŝipo velas la dian maron.

2

Kiu ajn vi estas! movo kaj reflekto estas precipe por vi,
La dia ŝipo velas la dian maron por vi.

Kiu ajn vi estas! vi estas li au shi por kiu la tero estas solida kaj likva,
Vi estas li au shi por kiu la suno kaj luno pendas en la chielo,
Por neniŭ pli ol por vi estas la nuntempo kaj la pasinteco,
Por neniŭ pli ol por vi estas senmorteco.

Chiu viro al si kaj chiu virino al si estas la vorto de la pasinteco kaj nuntempo kaj la vera
 vorto de senmorteco;
Neniŭ povas akiri por alia – ne iu,
Neniŭ povas kreski por alia – ne iu.

La kanto estas al la kantanto, kaj revenas pleje al li,

La instruo estas al la instruanto, kaj revenas pleje al li,
La murdo estas al la murdanto, kaj revenas pleje al li,
La shtelo estas al la shtelanto, kaj revenas pleje al li,
La amo estas al la amanto, kaj revenas pleje al li,
La donaco estas al la donacanto, kaj revenas pleje al li – ghi ne povas malsukcesi,
La oratorajho estas al la oratoro, la aktorajho estas al la aktoro kaj aktorino, ne al la
 audantaro,
Kaj neniuj homoj komprenas ian grandecon aŭ bonecon krom sia propra, aŭ la indikon
 de sia propra.

3

Mi ĵuras ke la tero estos certe kompleta al li aŭ ŝi kiu estos kompleta,
La tero restas malglata kaj rompita nur al li aŭ ŝi kiu restas malglata kaj rompita.

Mi ĵuras ke ne estas grandeco aŭ potenco kiu ne imitas tiujn de la tero,
Povas esti nenia teorio inda ion se ghi ne konfirmas la teorion de la tero,
Nenia politiko, kanto, religio, konduto, aŭ ia afero estas inda se ghi ne kompareblas kun
 la amplekso de la tero,
Se ghi ne alfrontas la precizecon, vivecon, senpartiecon, justecon de la tero.

Mi ĵuras ke mi komencas vidi la amon kun pli dolchaj spasmoj ol kio respondas amon,
Ghi estas kio enhavas sin, kio neniam invitas kaj neniam rifuzas.

Mi ĵuras ke mi komencas vidi malmulton aŭ nenion en audeblaj vortoj,
Chio direktas sin al la prezento de la neparolataj signifoj de la tero,
Al li kiu kantas la kantojn de la korpo kaj de la veroj de la tero,
Al li kiu faras la vortarojn da vortoj kiujn preso ne povas tushi.

Mi ĵuras ke mi vidas kio estas pli bona ol diri la plej bonan,
Ghi estas ĉiam lasi la plej bonan nedirita.

Kiam mi penas diri la plej bonan, mi trovas ke mi ne povas,
Mia lango estas neefika sur siaj pivotoj,
Mia spiro ne volas obei al siaj organoj,
Mi ighas mutulo.

La plej bona de la tero ne povas esti dirata iel, ĉio aŭ io estas plej bona,
Ghi ne estas kion vi anticipis, ghi estas pli malkara, pli facila, pli proksima,
Aferoj ne estas forsenditaj de la lokoj kiujn ili antaŭe tenis,
La tero estas ĝuste tiel pozitiva kaj senpera kiel ghi estis antaŭe,
Faktoj, religioj, plibonigoj, politikoj, metioj, estas tiel realaj kiel antaŭe,
Sed la animo estas ankaŭ reala, ghi ankaŭ estas pozitiva kaj senpera,
Nenia rezonado, nenia pruvo demonstris ĝin,
Nenegebla kreskado demonstris ĝin.

4

Chi tiuj por ehhi la tonojn de animoj kaj la dirojn de animoj,
(Se ili ne ehhus la dirojn de animoj, kio ili estus do?
Se ili ne rilatus al vi aparte, kio ili estus do?).

Mi jhuras ke mi neniam de nun rilatos kun la kredo kiu diras la plej bonan,
Mi rilatos nur kun tiu kredo kiu lasas nedirita la plej bonan.

Diradu, dirantoj! kantadu, kantantoj!
Fosu! muldu! amasigu la vortojn de la tero!
Laboradu, epoko post epoko, nenio devas esti perdita,
Tio eble devos longe atendi, sed ghi certe efektivighos,
Kiam la materialoj estos chiuj preparitaj kaj pretaj, la arkitektoj aperos.

Mi jhuras al vi ke la arkitektoj nepre aperos,
Mi jhuras al vi ke ili komprenos vin kaj pravigos vin,
La plej granda inter ili estos li kiu plej bone konas vin kaj enfermas chiujn kaj estas fidela
al chiuj,
Li kaj la ceteraj ne forgesos vin, ili perceptos ke vi ne estas joton malpli ol ili,
Vi estos plene glorita per ili.

JUNECO, TAGO, MALJUNECO, KAJ NOKTO

Juneco, ampleksa, avida, amanta – juneco plena de gracio, forto, fascino,
Chu vi scias, ke Maljuneco povas veni post vi kun egala gracio, forto, fascino?

Tago plenflorinta kaj grandioza – tago de la enorma suno, agado, ambicio, ridado,
La Nokto sekvas tuj poste kun milionoj da sunoj, kaj dormo kaj revigliganta mallumo.

BIRDOJ DE MIGRADO

KANTO DE LA UNIVERSALO

1

Venu, diris la Muzo,
Kantu al mi kanton kiun neniu poeto ankoraŭ kantis,
Kantu al mi la universalon.

En chi tiu vasta tero nia,
Inter la senmezura krudeco kaj la skorio,
Enfermita kaj sekura interne de ghia centra koro,
Nestas la semo perfekteco.

Che chiu vivo porcio au pli au malpli,
Neniu naskita sen ke ghi estas naskita, kashite au nekashite, la semo atendas.

2

Jen! akrokula alte staranta scienco,
Kvazau de altaj pintoj la modernan rigardanta,
Sinsekvajn absolutajn dekretojn eliganta.

Tamen denove, jen! la animo, super tuta scienco,
Char ghi havas historion, kolektitan kiel semshelojn chirkau la globo,
Por ghi la tutaj stelmiriadoj rulighas tra la chielo.

En spiralaj kursoj per longaj chirkauiroj,
(Kiel multakanta shipo sur la maro),
Por ghi la parta al la daura fluanta,
Por ghi la reala al la ideala tendencas.

Por ghi la mistika evoluo,
Ne nur la prava pravigita, kion ni nomas malbona ankau pravigita.

Elen el siaj maskoj, ne gravas kio,
El la grandega putranta trunko, el ruzo kaj trompo kaj larmoj,
Sano elighi, kaj ghojo, ghojo universala.

El la maso, la morba kaj la malprofunda,
El la plejmulto malbona, la diversaj sennombraj fraudoj de homoj kaj shtatoj,
Elektra, antiseptika ech, fendanta, enfluanta chion,
Nur la bona estas universala.

3

Super la montkreskajhoj malsano kaj malghojo,
Nekaptita birdo estas chiam shvebanta, shvebanta,
Alte en la pli pura, pli felicha aero.

El la plej malhela nubo de neperfekto,
Elsagas chiam unu radio de perfekta lumo,
Unu ekbrilo de la gloro de l' chielo.

Al la diskordo de modo, de kutimo,
Al la freneza Babelbruego, la surdigaj festenoj,
Kvietigante chiun pauzion, melodio estas audata, apenau audata,
De iu fora bordo la finan refrenon sonante.

Ho la benitaj okuloj, la ghojaj koroj,
Kiuj vidas, kiuj konas la gvidan fadenon, tiel subtilan,
Lau la potenca labirinto.

4

Kaj vi, Ameriko,
Por la kulmino de la plano, ghia elpensado kaj ghia realeco,
Por chi tiuj (ne por vi mem) vi alvenis.

Vi ankau chirkauas chion,
Brakumante portante bonvenigante chion, vi ankau per vojoj vastaj kaj novaj,
Al la ideala tendencas.

La konstantaj kredoj de aliaj landoj, la grandecoj de l' pasinteco,
Ne estas por vi, sed la grandecoj propraj,
Diaj kredoj kaj grandecoj, sorbantaj, ampleksantaj chion,
Chiuj rajtantaj chion.

Chiuj, chiuj por senmorteco,
Amo kiel la lumo silente volvanta chiujn,
La plibonigho de Naturo benanta chiujn,
La floroj, fruktoj de epokoj, fruktarbaroj diaj kaj certaj,
Formoj, objektoj, kreskoj, homecoj al spiritaj bildoj maturighantaj.

Donu al mi, ho Dio, kanti tiun penson,
Donu al mi, donu al li au shi kiun mi amas tiun neestingeban fidon,
En Via ensemblo, kio alia retenita, tion ne retenu de ni,
Kredo je plano Via, enfermita en Tempo kaj Spaco,
Sano, paco, savo universala.

Chu ghi estas songho?
Ne, sed la manko de ghi la songho,
Kaj mankante ghin, scio kaj richo de vivo songho,

Kaj la tuta mondo songho.

PIONIROJ! HO PIONIROJ!

Venu, miaj brunvizaghaj infanoj,
Sekvu bone en ordo, pretigu viajn armilojn,
Chu vi havas viajn pistolojn? chu vi havas viajn akreghajjn hakilojn?
Pioniroj! ho pioniroj!

Char ni ne povas resti chi tie,
Ni devas marshi, miaj karuloj, ni devas elporti la chefforton de l' danghero,
Ni, la junecaj tendenaj rasoj, chiuj ceteraj de ni dependas,
Pioniroj! ho pioniroj!

Ho vi junuloj, Okcidentaj junuloj,
Tiel malpaciencaj, plenaj de agado, plenaj de virecaj fiero kaj amikeco,
Klare mi vidas vin, Okcidentaj junuloj, vidas vin pashantaj kun la plej antaŭaj,
Pioniroj! ho pioniroj!

Chu la pli maljunaj rasoj haltis?
Chu ili velkas kaj finas sian lecionon, lacigite tie transe preter la maroj?
Ni alprenas la taskon eternan, kaj la sharghon kaj la lecionon,
Pioniroj! ho pioniroj!

La tutan pasintecon ni lasas malantaŭe,
Ni elighas sur pli novan pli potencon mondon, diversan mondon,
Fresha kaj forta la mondo kiun ni kaptas, mondo de laboro kaj la marsho,
Pioniroj! ho pioniroj!

Ni tachmentojn konstante jhetantaj,
Lau la randoj, tra l' pasejoj, supren lau la montoj krutaj,
Venkantaj, tenantaj, defiantaj, riskantaj, dum ni iras la nekonatajn vojojn,
Pioniroj! ho pioniroj!

Ni praarbarojn faligantaj,
Ni la riverojn digantaj, ni ghenantaj kaj profunde penetrantaj la internajn minojn,
Ni la surfacon vastan esplorantaj, ni la virgan grundon levantaj,
Pioniroj! ho pioniroj!

Koloradaj homoj ni estas,
De la pintoj gigantaj, de la grandaj montaroj kaj la altaj platajhoj,
De la mino kaj de l' ravino, de la chasopado ni venas,
Pioniroj! ho pioniroj!

De Nebraska, de Arkansaso,
Centra landinterna raso ni estas, de Misurio, kun la kontinenta sango intermiksita,

Chiujn manojn de kamaradoj premantaj, chiujn Sudajn, chiujn Nordajn,
Pioniroj! ho pioniroj!

Ho nerezistebla neripozema raso!
Ho amata raso en chiuj! ho mia brusto doloras kun tenera amo por chiuj!
Ho mi funebras kaj tamen ghojegas, mi estas ravita kun amo por chiuj,
Pioniroj! ho pioniroj!

Levu la potencan patrinon mastrinon,
Svingante alte la delikatan mastrinon, super chio la stelhavan mastrinon (klinu la kapon
chiuj),
Levu la denthavan kaj militeman mastrinon, severan, serenon, armilhavan mastrinon,
Pioniroj! ho pioniroj!

Vidu, miaj infanoj, rezolutaj infanoj,
Che tiuj svarmoj che nia malantauo ni devas neniam cedi au shancelighi,
En pasintaj epokoj en fantomaj multegoj malridetante tie post ni urghantaj,
Pioniroj! ho pioniroj!

Antauen kaj antauen la kunigitaj vicoj,
Kun ekdehoroj chiam atendantaj, kun la lokoj de l' mortaj rapide plenigataj,
Tra l' batalo, tra malvenko, ankoraŭ movighantaj, neniam haltantaj,
Pioniroj! ho pioniroj!

Ho chu morti antauenirante!
Chu devas el ni iuj velki kaj morti? chu la horo venis?
Do marshante plej taŭge ni mortu, baldau kaj certe la brech' estas plenigata,
Pioniroj! ho pioniroj!

Chiu pulsoj de la mondo,
Envicighante ili batas por ni, kun la Okcidenta movado batas,
Starante kune au unuope, konstante movighante al la fronto, chiuj por ni,
Pioniroj! ho pioniroj!

La komplikaj kaj diversaj spektakloj de vivo,
Chiuj formoj kaj montroj, chiuj laboristoj che laboro,
Chiuj maruloj kaj teruloj, chiuj mastroj kun siaj sklavoj,
Pioniroj! ho pioniroj!

Chiuj fatalaj silentaj amantoj,
Chiuj prizonuloj en la prizonoj, chiuj virtaj kaj malvirtaj,
Chiuj ghojaj, chiuj malghojaj, chiuj vivantaj, chiuj mortantaj,
Pioniroj! ho pioniroj!

Mi ankau kun mia animo kaj mia korpo,
Ni, kurioza trio, zorge irantaj, vagantaj sur nia vojo,
Tra chi tiuj bordoj inter la ombroj, urghantaj kun la aperajhoj,

Pioniroj! ho pioniroj!

Jen, la saganta rulighanta astro!
Jen, la frataj astroj chirkaue, chiuj sunoj kaj planedoj kune,
Chiuj blindumantaj tagoj, chiuj mistikaj noktoj songhaj,
Pioniroj! ho pioniroj!

Tiuj estas de ni, ili estas kun ni,
Chiuj por praa bezona laboro, dum la sekvantoj embrie tie postatendas,
Ni la nunan procesion estrantaj, ni la vojaghokurson balaantaj,
Pioniroj! ho pioniroj!

Ho vi filinoj de l' Okcidento!
Ho vi junaj kaj maljunaj filinoj! ho vi patrinoj kaj vi edzinoj!
Neniam vi estu apartigitaj, en niaj vicoj vi movighas unuigitaj,
Pioniroj! ho pioniroj!

Menestreloj latentaj sur la prerioj!
(Mortvestitaj bardoj de aliaj landoj, vi povas ripozi, vi jam faris vian laboron),
Baldaŭ mi audas vin veni trilante, baldaŭ vi levighas kaj inter ni pashas,
Pioniroj! ho pioniroj!

Ne por frandajhoj dolchaj,
Ne la kuseno kaj pantoflo, ne la paca kaj la studema,
Ne la richo tedante sekura, ne por ni la milda ghuado,
Pioniroj! ho pioniroj!

Chu l' festenantoj voreme festenas?
Chu la dikaj dormantoj dormas? chu ili havas shlositajn, riglitajn pordojn?
Tamen estu nia la dieto severa, kaj la lankovrilo surtera,
Pioniroj! ho pioniroj!

Chu la nokto malsupreniris?
Chu la vojo estis laste tiel peniga? chu ni haltis senkuraghigite, kapklinante sur nia vojo?
Ankorau unu pasantan horon mi cedas al vi por forgesi paŭzi kie vi staras,
Pioniroj! ho pioniroj!

Ghis per sono de trumpeto,
Fore, tre fore la tagigho voku – auskultu! kiel laŭta kaj klara mi audas ghin soni,
Rapide! al la antaŭo de la armeo! – rapide! saltu al viaj lokoj,
Pioniroj! ho pioniroj!

AL VI

Kiu ajn vi estas, mi timas ke vi marshas la marshojn de songhoj,
Mi timas ke chi tiuj supozitaj realajhoj estas fandighontaj de sub viaj piedoj kaj manoj,

Ech nun viaj trajtoj, ghojoj, parolado, domo, metio, manieroj, zorgoj, malsaghajhoj,
kostumo, krimoj, disipighas for de vi,
Viaj vera animo kaj korpo aperas antau mi,
Ili apartighas el aferoj, el komerco, butikoj, laboro, bienoj, vestoj, la domo, achetado,
vendado, manghado, trinkado, suferado, mortado.

Kiu ajn vi estas, nun mi metas mian manon sur vi, ke vi estu mia poemo;
Mi flustras kun miaj lipoj proksime al via orelo,
Mi amis multajn virinojn kaj virojn, sed mi amas neniun pli multe ol vin.
Ho mi estis malagema kaj muta;
Mi devus aliri rekte al vi antau longe;
Mi devus babili nenion ol vin, mi devus chanti nenion ol vin.

Mi forlasos chion kaj venos kaj faros la himnojn de vi;
Neniu komprenis vin, sed mi komprenas vin;
Neniu juste traktis vin – vi ne juste traktis vin mem;
Neniu estis kiu ne trovis vin neperfekta – mi sola trovas nenan neperfektajhon en vi.
Neniu estis kiu ne subordigus vin, mi sola estas li kiu neniam konsentos subordigi vin,
Mi sola estas li kiu metas super vi nenan mastron, posedanton, plibonulon, Dion, preter
kio atendas imanente en vi mem.

Pentristoj pentris siajn svarmantajn grupojn kaj la centrofiguron de chio,
De la kapo de la centrofiguro sternante nimbon de orkolora lumo,
Sed mi pentras miriadojn da kapoj, sed pentras neniun kapon sen ghia nimbo de
orkolora lumo,
De mia mano de la cerbo de chiu viro kaj virino ghi elfluas, brile fluante por chiam.

Ho mi povus kanti tiajn majestojn kaj glorojn pri vi!
Vi ne sciis kio vi estas – vi dormadis sur vi vian tutan vivon,
Viaj palpebroj estis ghuste kiel fermitaj la plejparton de la tempo,
Kion vi faris jam revenas en mokadoj,
(Via ekonomio, scio, preghoj, se ili ne revenas en mokadoj, kia estas ilia reveno?)

Sed la mokadoj ne estas vi,
Sube de ili kaj interne de ili, mi vidas vin cheesti;
Mi postkuras vin tien kien neni alia postkuris vin.
Silento, la skribotablo, la frivola mieno, la nokto, la kutima rutino, se chi tiuj kashas vin
antau aliaj, au antau vi mem, ili ne kashas vin antau mi;
La razita vizagho, la vaganta okulo, la nepura kompleksio, se chi tiuj heziligas aliajn, ili
ne heziligas min;
La audacajn vestajhojn, la misformitan pozon, drinkemon, avarecon, la antautempan
morton, chiujn chi mi flankenseparas.

Ne estas dotajho en viro au virino kiu ne estas inkludita en vi;
Estas nenia virto, nenia belo en viro au virino, sed estas egale bona en vi;
Nenia kuragho au eltenivo en aliaj, sed estas egale bona en vi;
Nenia plezuro atendanta aliajn, sed egala plezuro atendas vin.

Kiel koncernas min, mi donas nenion al iu krom ke mi zorge donas simile al vi,
Mi kantas la kantojn de la gloro de neniuj, ech ne Dio, pli volonte ol mi kantas la kantojn
de la gloro de vi.

Kiu ajn vi estas! pretendu vian propran je kia ajn danghero!
Chi tiuj montrajhoj de la oriento kaj okcidento estas mildaj kompare kun vi,
Chi tiuj grandegaj kampoj – chi tiuj senfinaj riveroj – vi estas grandega kaj senfina kiel
ili,
Chi tiuj furiozoj, elementoj, shtormoj, movighoj de Naturo, agonio de shajna dissolvigho,
vi estas li au shi kiu estas mastro au mastrino super ili,
Mastro au mastrino proprarajte super Naturo, elementoj, doloro, pasio, dissolvigho.

La piedkatenoj falas de viaj maleoloj – vi trovas nemalsukcesantan sufichecon;
Maljuna au juna, maskla au femala, kruda, malalta, malakceptita de la ceteraj, kio ajn vi
estas diskonigas sin,
Tra nasko, vivo, morto, enterigo, la rimedoj estas provizitaj, nenio estas domaghita,
Tra koleroj, perdoj, ambicio, nescio, enuo, kio vi estas ek trovadas sian vojon.

FRANCIO

La 18an Jaron de chi tiuj Shtatoj

Granda jaro kaj loko,
Rauka disonanca naskigha kriego elsonanta, tushi la koron de la patrino pli trafe ol iu
ankorau.

Mi marshis la bordojn de mia Orienta maro,
Audis super la ondoj la vocheton,
Vidis la dian infanon kie shi vekighis, lamente ululanta, inter la rorado de kanonoj,
sakroj, krioj, krasho de falantaj konstruoj,
Ne estis tiel nauzita de la sango en la defluiloj fluanta, nek de la unuopaj kadavroj, nek
de tiuj en amasoj, nek de tiuj forportataj en la baskulcharoj,
Ne estis tiel malespera che la amasbuchoj de morto – ne estis tiel shokita che la ripeta
pafado de la pafiloj.

Pala, silenta, severa, kion mi povis diri al tiu longe kreskinta vengho?
Chu mi povis voli homaron malsama?
Chu mi povis voli la popolon farita el ligno kaj shtono?
Au ke estu nenia justeco en sorto au tempo?

Ho Libereco! ho parulino por mi!
Chi tie ankau la flamego, la kugletajho, kaj la hakilo, rezervitaj, elprenotaj se bezone,
Chi tie ankau, kvankam longe repremitaj, neniam povas esti detruitaj,
Chi tie ankau povus levighi finfine, murdantaj kaj ekstazaj,
Chi tie ankau postulantaj plenan repagon de vengho.

Tial mi montras chi tiun saluton trans la maron,
Kaj mi ne forneas tiun teruran rughan naskon kaj bapton,
Sed memoras la voheton kiun mi audis ululanta, kaj atendas kun perfekta fido, kiel ajn
longe,
Kaj de hodiau, trista kaj konscia mi tenas la testamentitan motivon, kiel por chiuj landoj,
Kaj sendas chi tiujn vortojn al Parizo kun mia amo,
Kaj mi supozas ke iuj kantistoj tie komprenos ilin,
Char mi supozas ke estas latentaj muziko ankoraŭ en Francio, inundoj da ghi,
Ho mi jam audas la eksonon de instrumentoj, ili baldau superbruos chion kio volus
interrompi ilin,
Ho mi pensas, ke la orienta vento alportas triumfan kaj liberan marshon,
Ghi atingas chi tien, ghi shvelas min al ghoja frenezo,
Mi kuros transponi ghin en vortojn, por pravigi ghin,
Mi ankoraŭ kantas kanton por vi, mia sinjorino.

MI MEM KAJ MIA

Mi mem kaj mia chiam gimnastikaj,
Elteni la malvarmon au varmon, bone celi per pafilo, veli boaton, regi chevalojn, generi
superbajn infanojn,
Paroli facile kaj klare, senti nin kiel hejme inter ordinaraj homoj,
Kaj bone elteni en teruraj situacioj sur tero kaj maro.

Ne por brodisto,
(Estos chiam sufiche da brodistoj, mi bonvenigas ilin ankau),
Sed por la fortikeco de aferoj kaj por imanentaj viroj kaj virinoj.

Ne por chizi ornamajhojn,
Sed por chizi kun libera tusho la kapojn kaj membrojn de abundaj supremaj Dioj, ke la
Shtatoj povu realigi ilin marshantaj kaj parolantaj.

Mi faru lau mia arbitro,
La aliaj diskonigu la leghojn, mi ne atentis pri la leghoj,
La aliaj laudu eminentulojn kaj subtenu pacon, mi subtenas agiton kaj konflikton,
Mi laudas neniam eminentulon, mi riprochas al lia vizagho tiun kiun oni opiniis plej
inda.

(Kiu vi estas? kaj pri kio vi estas sekrete kulpa vian tutan vivon?
Chu vi forturnos vin vian tutan vivon? chu vi servutos kaj babilos vian tutan vivon?
Kaj kiu vi estas, klachanta senpripense, jarojn, paghojn, lingvojn, rememorojn,
Nescianta hodiau ke vi ne scipovas ghuste paroli ech unu vorton?)

La aliaj finpretigu specimenojn, mi neniam finpretigas specimenojn,
Mi komencas ilin per neelcherpeblaj leghoj, kiel faras Naturo, freshaj kaj modernaj
konstante.

Mi donas nenion kiel devojn,
Kion aliaj donas kiel devojn, mi donas kiel vivantajn impulsojn,
(Chu mi donu la agadon de la koro kiel devon?).

La aliaj finaranghu demandojn, mi finaranghas nenion, mi elvokas nerespondeblajn
demandojn,
Kiuj estas ili kiujn mi vidas kaj tushas, kaj kio pri ili?
Kio pri tiuj similuloj de mi kiuj min tiras tiel proksima per teneraj rektajhoj kaj
nerektaĵoj?

Mi alvokas al la mondo malfidi la raportojn de miaj amikoj, sed auskulti al miaj
malamikoj, kiel mi mem faras,
Mi ordonas vin ke vi chiam pripensu, tiuj kiuj volus ekspliki min, ĉar mi ne povas
ekspliki min mem,
Mi ordonas ke estu nenia teorio au skolo fondita el mi,
Mi vin ordonas lasi ĉion libera, kiel mi lasis ĉion libera.

Post mi, elvido!
Ho mi vidas ke vivo ne estas mallonga, sed nemezureble longa,
Mi de nun pashas la mondon ĉasta, modera, frua levighanto, konstanta kreskanto,
Kun ĉiu horo la spermo de jarcentoj, kaj ankoraŭ de jarcentoj.

Mi devas sekvadi tiujn konstantajn lecionojn de la aero, akvo, grundo,
Mi perceptas ke ne estas al mi tempo por malshpari.

JARO DE METEOROJ (1859-60)

Jaro de meteoroj! meditema jaro!
Mi volus ligi en vortoj retrospektivaj iom da viaj faroj kaj signoj,
Mi volus kanti vian konkurson por la 19a Prezidenteco,
Mi volus kanti, kiel maljunulo, alta, kun blankaj haroj, suriris la skafaldon en Virginio,
(Mi cheestis, silenta mi staris kun la dentoj preme fermitaj, mi observis,
Mi staris tre proksime al vi, maljunulo, kiam aplomba kaj indiferenta, sed tremante de
maljuneco kaj viaj neresanighintaj vundoj, vi suriris la skafaldon);
Mi volus kanti en mia abunda kanto viajn censajn raportojn de la Shtatoj,
La tabelojn de loghateco kaj produktoj, mi volus kanti pri viaj ŝipoj kaj iliaj kargoj,
La fieraj nigraj ŝipoj de Manhatano alvenantaj, iuj plenaj de enmigrantoj, iuj de la istmo
kun kargoj de oro,
Kantojn pri tio mi volus kanti, al ĉio kio ĉi tien venas mi volus diri bonvenon,
Kaj vin mi volus kanti, bela junulo! bonvenon al vi de mi, juna princo de Anglujo!
(Chu vi memoras impetantajn amasojn de Manhatano, dum vi pasis kun via
akompanantaro de nobeloj?
Tie en la amasoj mi staris, kaj elektis vin kun alfikso);
Nek forgesas mi kanti pri la mirindaĵo, la ŝipo, dum ŝi suprennaghis tra mia golfo,

Bonforma kaj majesta la Granda Orienta suprennaghis tra mia golfo, shi estis 600 futojn
 longa,
 Shian rapidan movighon, chirkauite de miriadoj da malgrandaj boatoj, mi ne forgesas
 kanti;
 Nek la kometon kiu venis neanoncite el la nordo, flamante en la chielo,
 Nek la strangan grandegan meteorprocesion, blindumantan kaj klare impetantan super
 niaj kapoj,
 (Momenton, momenton longe ghi velis siajn bulojn da netereca lumo super niaj kapoj,
 Tiam foriris, defalis en la nokto, kaj estis for);
 Pri tiaj, kaj maldaura kiel ili, mi kantas – per briloj de ili mi volus briligi kaj makuligi chi
 tiujn chantojn,
 Viajn chantojn, ho jaro, tute makulita per malbono kaj bono – jaro de auguroj!
 Jaro de kometoj kaj meteoroj, efemeraj kaj strangaj – jen! ech chi tie unu egale efemera
 kaj stranga!
 Dum mi flugas tra vi haste, baldau falonte kaj forironte, kio estas chi tiu chanto,
 Kio mi estas mem, se ne unu el viaj meteoroj?

KUN ANTECEDENTOJ

1

Kun antecedentoj,
 Kun miaj patroj kaj patrinoj kaj la amasighoj pasintepokaj,
 Kun chio, se ne estinta, mi ne estus nun chi tie, kiel mi estas,
 Kun Egiptho, Hindujo, Fenicio, Grekujo, kaj Romo,
 Kun la Kelto, la Skandinavo, la Albano, kaj la Sakso,
 Kun antikvaj maraj entreprenoj, leghoj, metiistajhoj, militoj, kaj vojaghoj,
 Kun la poeto, la skaldo, la sagao, la mito, kaj la orakolo,
 Kun la vendo de sklavoj, kun entuziasmuloj, kun la trobadoro, la krucisto, kaj la
 monahho,
 Kun tiuj malnovaj kontinentoj de kiuj ni venis al chi tiu nova kontinento,
 Kun la velkantaj regnoj kaj reghoj tie transe,
 Kun la velkantaj religioj kaj pastroj,
 Kun la malgrandaj bordoj al kiuj ni retrorigardas de niaj propraj grandaj kaj cheestantaj
 bordoj,
 Kun sennombraj jaroj sin tirantaj antauen kaj alvenintaj al chi tiuj jaroj,
 Vi kaj mi alvenintaj – Ameriko alveninta kaj faranta chi tiun jaron,
 Chi tiun jaron! sin sendanta antauen por sennombraj jaroj venontaj.

2

Ho sed ne estas la jaroj – estas mi, estas Vi,
 Ni tushas chiujn leghojn kaj registras chiujn antecedentojn,
 Ni estas la skaldo, la orakolo, la monahho, kaj la prodo, ni facile inkludas ilin kaj pli,
 Ni staras meze de tempo senkomenca kaj senfina, ni staras meze de malbono kaj bono,
 Chio svingighas chirkau ni, estas tiom da mallumo kiom da lumo,

La suno mem svingas sin kaj sian sistemon de planedoj chirkau ni,
Ghia suno kaj ankoraŭ ties, chiuj svingighas chirkau ni.

Koncerne min (shiritan, shtorman, meze de chi tiuj tumultaj tagoj),
Mi havas la ideon de chio, kaj estas chio kaj kredas je chio,
Mi kredas ke materiismo estas vera kaj spiritualismo estas vera, mi malakceptas
neniun parton.

(Chu mi forgesis iun parton? iun aferon en la pasinteco?
Venu al mi kiu ajn kaj kio ajn, ke mi donu al vi agnoskon.)

Mi respektas Asirion, Chinujon, Teutonion, kaj la Hebreojn,
Mi adoptas chiun teorion, miton, dion, kaj duondion,
Mi vidas, ke la malnovaj rakontoj, biblioj, genealogioj, estas veraj, sen escepto,
Mi asertas, ke chiuj pasintaj tagoj estis kio ili devis esti,
Kaj ili povis neniel esti pli bonaj ol ili estis,
Kaj ke hodiaŭ estas kio ghi devas esti, kaj ke Ameriko estas same,
Kaj ke hodiaŭ kaj Ameriko povus neniel esti pli bonaj ol ili estas.

3

Nome de chi tiuj Shtatoj kaj nome de vi kaj mi, la Pasinta tempo,
Kaj nome de chi tiuj Shtatoj kaj nome de vi kaj mi, la Estanta tempo.

Mi scias ke la pasinta estis granda kaj la estonta estos granda,
Kaj mi scias ke ambau kurioze kunighas en la estanta tempo,
(Por li kiun mi tipigas, por la ordinara meza homo, por vi, se vi estas li),
Kaj ke, kie mi estas au vi estas chi tiun aktualan tagon, tie estas la centro de chiuj tagoj,
chiuj rasoj,
Kaj tie estas la signifo al ni de chio kio iam venis de rasoj kaj tagoj, au iam venos.

BROADVEJA SPEKTAKLO

1

Trans la Okcidentan maron chi tien de Nipono veninte,
Ghentilaj, la malhelvangaj duglavaj senditoj,
Malantauenklinighante en siaj malfermitaj kaleshoj, nudkapaj, senemociaj,
Veturas hodiaŭ tra Manhatano.

Libereco! mi ne scias chu aliaj vidas kion mi vidas,
En la procesio kune kun la nobeloj de Nipono, la irtaskfarantoj,
Gardanta la malantauo, shvebanta supre, chirkaue, au en la vicoj marshanta,
Sed mi kantos al vi kanton de kion mi vidas, Libereco.

Kiam milionpieda Manhatano liberigite malsupreniras al siaj pavimoj,

Kiam la tondrokrakantaj pafiloj ekscitas min per la fiera roro kiun mi amas,
Kiam la rondbushaj pafiloj el la fumo kaj odoro kiujn mi amas krachas siajn salutojn,
Kiam la fajreflagrantaj pafiloj min tute atentigis, kaj chielnuboj baldakenas mian urbon
per delikata maldensa brumo,
Kiam belegaj la sennombraj rektaj tigoj, la arbaroj che la varfoj, densighas per koloroj,
Kiam chiu shipo, riche vestita, portas sian standardon che la pinto,
Kiam flagetoj trenighas kaj stratfestonoj pendas de la fenestroj,
Kiam Broadvejo estas tute fordonita al piedpashantoj kaj piedstarantoj, kiam la amaso
estas plej densa,
Kiam la fasadoj de la domoj estas vivaj de homoj, kiam okuloj spektadas fiksite, dekoj da
miloj samtempe,
Kiam la gastoj de la insuloj antaueniras, kiam la spektaklo antauenmovighas videble,
Kiam la alvoko estas farata, kiam la respondo kiu atendis milojn da jaroj respondas,
Mi ankau levighante, respondante, malsupreniras al la pavimoj, kunfandighas kun la
amaso, kaj spektadas kun ili.

2

Superbvizagha Manhatano!
Kamaradoj Amerikanoj! al ni, do finfine, la Oriento venas.

Al ni, mia urbo,
Kie niaj altsupraj marmoraj kaj feraj beloj etendighas che kontrauj flankoj, lasante
marshi en la spaco intera,
Hodiau nia Antipodo venas.

La Iniciatantino venas,
La nesto de lingvoj, la testamentanto de poemoj, la raso de antikveco,
Rughvanga per sango, pensema, ravita per meditoj, arda per pasio,
Alloga per parfumo, kun ampleksaj kaj fluantaj vestoj,
Kun sunbrunigita vizagho, kun intensa animo kaj scintilantaj okuloj,
La raso de Bramo venas.

Vidu mia kanteblulo! tiuj kaj pli ekbrilas al ni de la procesio,
Dum ghi movighas shanghante, kalejdoskopoj dia, ghi movighas shanghante antau ni.

Char ne nur la senditoj nek la sunbrunigita Japano de sia insulo,
Supla kaj silenta la Hindu aperas, la Azia kontinento mem aperas, la pasinteco, la mortaj,
La malhela noktmateno de miro kaj fabelo nepenetrebla,
La envolitaj misteroj, la maljunaj kaj nekonataj abelujoabeloj,
La nordo, la shvitanta sudo, orienta Asirio, la Hebreoj, la antikva de la antikvaj,
Vastaj dezertigitaj urboj, la glisanta nuntempo, chiu tiuj kaj pli estas en la spektaklo-
procesio.

Geografio, la mondo, estas en ghi,
La Granda Maro, la idaro de insuloj, Polinezio, la bordo pretere,
La bordo kiun vi de nun alfrontas – vi Libereco! de viaj Okcidentaj oraj plaghoj,

La landoj tie kun siaj loghantoj, la milionoj amase estas kurioze chi tie,
La svarmantaj bazaroj, la temploj kun idoloj, etenditaj lau la flankoj au che la fino,
 bonzo, bramano, kaj lamao,
Mandareno, bienisto, komercisto, mehhanisto, kaj fishkaptisto,
La kantanta knabino kaj la dancanta knabino, la ekstazaj personoj, la izolitaj
 imperiestroj,
Konfuceo mem, la grandaj poetoj kaj herooj, la batalistoj, la kasto, chiu,
Almarshantaj, amasighantaj el chiu direkto, de la Altajaj montoj,
De Tibeto, de la kvar sinuantaj kaj malproksimenfluantaj riveroj de Chinujo,
De la sudaj duoninsuloj kaj la duonkontinentaj insuloj de Malajzio,
Tiu kaj kio ajn apartenas al ili palpeble elmontras sin al mi, kaj estas kaptataj de mi,
Kaj mi estas kaptata de ili, kaj amike tenata de ili,
Ghis kiel chi tie ilin chiu mi chantas, Libereco! por ili mem kaj por vi.

Char mi ankau, lautigante mian vochon, alighas al la vicoj de tiu spektaklo,
Mi estas la chantanto, mi chantas laute super la spektaklo,
Mi chantas la mondon sur mia Okcidenta maro,
Mi chantas abunde la insulojn pretere, densajn kiel steloj en la chielo,
Mi chantas la novan imperion, pli grandan ol iu antaue, kiel en vizio ghi venas al mi,
Mi chantas Amerikon la mastrino, mi chantas pli grandan suverenecon,
Mi chantas projekciitajn mil florantajn urbojn ankoraŭ en tempon sur tiuj grupoj da
 marinsuloj,
Miaj velshipoj kaj vaporshipoj tredantaj la arkipelagon,
Miaj steloj kaj strioj flirtantaj en la vento,
Komerco malfermighanta, la dormo de epokoj fininta sian laboron, rasoj renaskitaj,
 refreshigitaj,
Vivoj, laboroj rekomencitaj – la celon mi ne scias – sed la malnova, la Azia renovigita,
 kiel ghi devas esti,
Komencighante de chi tiu tago, chirkauita de la mondo.

3

Kaj vi Libereco de la mondo!
Vi sidas en la mezo sufiche aplomba milojn kaj milojn da jaroj,
Kiel hodiaŭ de unu flanko la nobeloj de Azio venas al vi,
Kiel morgaŭ de la alia flanko la reghino de Anglujo sendas sian plej aghan filon al vi.

La signo estas inversighanta, la globo estas enfermita,
La ringo estas chirkauirita, la vojaĝo estas finita,
La fermoplato de la skatolo estas nur ete malfermita, tamen la parfumo elvershigas
 abunde el la tuta skatolo.

Juna Libereco! kun la respektinda Azio, la chiopatrino,
Estu komplezema kun shi nun kaj chiam, arda Libereco, char vi estas chio,
Klinu vian fieran kolon al la lontana patrino, nun sendanta mesaghojn super la
 arkipelagoj al vi,
Klinu vian fieran kolon chi-foje malalten, juna Libereco.

Chu la infanoj vagis okcidenten tiel longe? tiel vasta la pashado?
Chu la antaŭaj malhelaj epokoj elighis okcidenten el Paradizo tiel longe?
Chu la jarcentoj konstante piediris tien, la tutan tempon nesciate, pro vi, pro kialoj?

Ili estas pravigitaj, ili estas lertaj, ili nun estos turnitaj alidirekten ankau, de tie vojaghi
cele al vi,
Ili nun ankau marshos obeeme orienten por vi Libereco.

MARDRIVO

EL LA LULILO SENFINE LULATA

El la lulilo senfine lulata,
El la gorgo de'l mokbirdo, la muzika naveto,
El la Naua-monata noktmezo,
Tra la sterilaj sabloj kaj la kampoj pretere, kie la infano, lasinte sian liton, vagis sola,
 nudkape, nudpiede,
Malsupren de la shprucigita nimbo,
Supren de la mistika ludo de ombroj, interplektighe tordighantaj, kvazau ili vivadus,
El la bedoj de dornarbustoj kaj rubusoj,
De la memoroj de la birdo kiu kantis al mi,
De viaj memoroj, trista frato, de la maltrankvilaj levighoj kaj faloj kiujn mi audis,
De sub tiu flava duonluno, malfrulevighinta kaj shvela, kvazau per larmoj,
De tiuj komencaj notoj de sopiro kaj amo tie en la nebulo,
De la mil respondoj de mia koro, neniam chesontaj,
De la miriado da elvokitaj de tio vortoj,
De la vorto pli forta kaj delica ol iu,
De tiaj, kiam nun ili komencas la scenon reviziti,
Kiel grego, kvivitantaj, levighantaj, au supre pasantaj,
Portataj chi tien, antau ol chio eskapas de mi, haste,
Viro, tamen per tiuj chi larmoj knabeto denove,
Min jhetanta sur la sablon, alfrontanta la ondojn,
Mi, chantisto de doloroj kaj ghojoj, kunigisto de chi tie kaj post chi tie,
Prenante chiujn sugestojn por utili ilin, sed rapide saltante preter ilin,
Rememoron kantas.

Unufoje Paumanoko,
Kiam la lilakodoro estis en la aero kaj Kvina-monata herb' kreskadis,
Supren lau chi tiu marbordo en dornarbustaro,
Du plumhavaj gastoj el Alabamo, du kunaj,
Kaj ilia nesto, kaj kvar helverdaj ovoj, makulitaj per bruno,
Kaj chiun tagon la virbirdo tien kaj reen proksime chemane,
Kaj chiun tagon la birdino kauranta sur sia nesto, silenta, kun brilaj okuloj,
Kaj chiun tagon mi, scivola knabo, neniam tro proksima, neniam ilin ghenanta,
Zorge strabanta, sorbanta, tradukanta.

Brilu! brilu! brilu!
Devershu vian varmon, granda suno!
Dum ni sunghuas, ni du kune.

Du kunaj!
Ventoj blovas sude, au ventoj blovas norde,
Tago venu blanka, au nokto venu nigra,
Hejme, au je riveroj kaj montoj for de la hejmo,

*Kantantaj la tutan tempon, atentantaj nenian tempon,
Dum ni du restas kunaj.*

Ghis subite,
Eble mortigite, nesciate al sia parulo,
Unu antautagmezon la birdino ne kauris sur sia nesto,
Nek revenis tiun posttagmezon, nek la sekvantan,
Nek iam reaperis.

Kaj de tiam la tutan someron en la sono de la maro,
Kaj nokte sub la pleno de la luno en pli trankvila vetero,
Super la rauka ondado de la maro,
Au flirtanta de dornarbusto al dornarbusto tage,
Mi vidis, mi audis je intertempoj la restanton, la virbirdon,
La solecan gaston el Alabamo.

*Blovu! blovu! blovu!
Ekblovu, marventoj, lau la bordo de Paumanoko;
Mi atendas kaj atendas, ghis vi blovos mian parulinon al mi.*

Jes, kiam la steloj scintilis,
La tutan nokton sur la brancheto de musk-inkrustita paliso,
Malsupre preskau inter la plaudantaj ondoj,
Sidis la soleca kantanto, mirinde kauxante larmojn.

Li alvokis sian parulinon,
Li elvershis la signifojn kiujn mi el chiu homoj konas.

Jes, mia frato, mi konas,
La ceteraj povus ne koni, sed mi shategis chiun noton,
Char pli ol unufoje, malhele malsupren al la marbordo glisante,
Silente, evitante la lunradiojn, kunfandante min kun la ombroj,
Rememorante nun la obskurajn formojn, la ehhojn, la sonojn kaj vidojn lau iliaj specoj,
La blankajn brakojn for en la shaumondo, senlace jhetighantaj,
Mi, kun nudaj piedoj, infano, la vento blovanta miajn harojn,
Auskultis longe kaj longe.

Auskultis por reteni, por kanti, jen tradukante la notojn,
Sekvante vin, mia frato.

*Konsolu! konsolu! konsolu!
Proksime al sia ondo konsolas la ondo malantaue,
Kaj ancorau alia malantaue, brakumante kaj plaudante, chiu proksime,
Sed mia amo konsolas ne min, ne min.*

*Malalte pendas la luno, ghi levighis malfrue,
Ghi postighas – ho mi pensas ghi estas peza kun amo, kun amo.*

*Ho freneze la maro pushas sur la teron,
Kun amo, kun amo.*

*Ho nokto! chu mi ne vidas mian amatinon papiliumi tie for inter la shaumondoj?
Kio estas tiu nigrajheto kiun mi vidas tie en la blanko?*

*Laute! laute! laute!
Laute mi vokas al vi, mia amatino.*

*Alte kaj klare mi pafas mian vochon super la ondojn,
Certe vi devas scii kiu estas chi tie, chi tie,
Vi devas scii kiu mi estas, mia amatino.*

*Malalte pendanta luno!
Kio estas tiu malhela makulo en via bruna flavo?
Ho ghi estas la formo, la formo de mia parulino!
Ho luno, ne tenu shin for de mi iom pli longe.*

*Tero! tero! ho tero!
Kien ajn mi turnighas, ho mi pensas ke vi povus redoni al mi mian parulinon se vi nur
volus,
Char mi estas preskau certa ke mi vidas shin malklare kien ajn mi rigardas.*

*Ho levighantaj steloj!
Eble tiu kiun mi tiel deziras, levighos, levighos kun iuj el vi.*

*Ho gorgho! ho tremanta gorgho!
Sonu pli klare tra la atmosfero!
Trapenetru la arbaron, la teron,
Ie auskultanta por kapti vin devas esti tiu kiun mi deziras.*

*Elskuu karolojn!
Solecaj chi tie, karoloj de la nokto!
Karoloj de soleca amo! karoloj de morto!
Karoloj sub la postighanta, flava, malkreskanta luno!
Ho sub tiu luno kie shi velkas preskau malsupren en la maron!
Ho malprudentaj malesperaj karoloj.*

*Sed softe! sinku malalten!
Softe! mi nur murmuru,
Kaj vi atendu momenton, vi rauka-brua maro,
Char ie, mi pensas, mi audis mian parulinon respondi al mi,
Tiel malforte, mi devas silenti, silenti por auskulti,
Sed ne tute silenti, char tiam shi eble ne venus tuj al mi.*

*Chi tien mia amatino!
Jen mi! jen!*

*Per chi tiu jhusdaurigata noto mi anoncas min al vi,
Chi tiu milda voko estas por vi, mia amatino, por vi.*

*Ne estu allogata aliloken,
Tio estas la fajfo de la vento, ghi ne estas mia vocho,
Tio estas la flirtado, la flirtado de la shpruco,
Tiuj estas la ombroj de la folioj.*

*Ho mallumo! ho vane!
Ho mi estas tre malsana kaj malghoja.*

*Ho bruna nimbo en la chielo proksime al la luno velkanta sur la maron!
Ho maltrankvila reflekto en la maro!
Ho gorgho! ho pulsadanta koro!
Kaj mi kantanta senutile, senutile la tutan nokton.*

*Ho pasinteco! ho felicha vivo! ho kantoj de ghojo!
En la aero, en la arbaro, tra kampoj,
Amata! amata! amata! amata! amata!
Sed mia parulino ne plu, ne plu kun mi!
Ni du kunaj ne plu.*

*La ario sinkanta,
Chio alia dauranta, la steloj brilantaj,
La ventoj blovantaj, la notoj de la birdo daure ehphantaj,
Per koleraj ghemoj la sovagha maljuna patrino senchese ghemanta,
Sur la sabloj de la bordo de Paumanoko, grizaj kaj susurantaj,
La flava duonluno pligrandighinta, defleksighanta malsupren, velkanta, la vizaghon de
la maro preskau tushanta,
La knabo ekstaza, kun liaj nudaj piedoj la ondoj, kun liaj haroj la atmosfero ludanta,
La amo en lia koro longe enfermita, nun libera, nun finfine tumulte elighanta,
La signifon de l' ario, la oreloj, la animo, rapide deponantaj,
La strangaj larmoj malsupren lau la vangoj fluantaj,
La kolokvo tie, la trio, chiu eldiranta,
La fontono, la sovagha maljuna patrino senchese ploranta,
Al la demandoj de l' animo de l' knabo moroze lautakte, ian dronintan sekreton
siblanta,
Al la komencanta bardo.*

*Dajmono au birdo! (diris la animo de la knabo),
Chu ja al via parulino vi kantas? au efektive al mi?
Char mi, kiu estis infano, la uzo de mia lango dormanta, nun mi audis vin jam,
Nun en momento mi scias por kio mi estas, mi vekighas,
Kaj jam mil kantantoj, mil kantoj, pli klaraj, pli lautaj, kaj pli malghojaj ol viaj,
Mil triladaj ehhoj ekvivis interne de mi, neniam mortontaj.*

*Ho vi kantanto soleca, kantanta sola, projekcianta min,
Ho soleca mi auskultanta, neniam plu mi chesos vin daurigi,*

Neniam plu mi eskapos, neniam plu la reehoj,
Neniam plu la krioj de nekontentigita amo forestos de mi,
Neniam plu lasos min esti la trankvila infano kiu mi estis antaŭ tio kion tie en la nokto,
Apud la maro sub la flava kaj defleksighanta luno,
La mesaghisto tie vekis, la fajron, la dolchan inferon interne,
La nekonatan deziron, la destinon de mi.

Ho donu al mi la indicon! (ghi kashiras en la nokto ie ĉi tie),
Ho se mi rajtas havi tiom, lasu min havi pli!

Vorton do (ĉar mi venkos ĝhin),
La vorto fina, supera al ĉio,
Subtila, suprendata – kio ĝhi estas – mi auskultas;
Ĉu vi flustras ĝhin, flustradas dum la tuta tempo, vi marondoj?
Ĉu tio estas ĝhi de viaj likvaj randoj kaj malsekaj sabloj?

Respondante al kio, la maro,
Ne prokrastante, ne hastante,
Flustris al mi tra la nokto, kaj tre klare antaŭ tagiĝo,
Flustris al mi la mallautan kaj delican vorton mort',
Kaj ree mort', mort', mort', mort',
Siblante melodie, nek kiel la birdo nek kiel mia ekscitita koro de infano,
Sed rampante proksimen kiel private por mi, susurante ĉe miaj piedoj,
Rampante de tie konstante supren al miaj oreloj, kaj banante min milde ĉie,
Mort', mort', mort', mort', mort',
Kiun mi ne forgesas,
Sed kunfandas la kanton de mia malhela dajmono kaj frato,
Kiun li kantis al mi en la lunlumo sur la griza plago de Paumanoko,
Kun la mil respondaj kantoj hazardaj,
Miaj propraj kantoj vekitaj ekde tiu horo,
Kaj kun ili la indico, la vorto supren de la ondoj,
La vorto de la plej dolcha kanto kaj ĉiuj kantoj,
Tiu forta kaj delica vorto kiun, rampante al miaj piedoj,
(Au kiel ia maljunegulino, lulanta la lulilon, vestita en dolchaj vestoj, sin
flankenklinante),
La maro al mi flustris.

DUM MI MALFLUSIS KUN LA OCEANO DE VIVO

1

Dum mi malfluis kun la oceano de vivo,
Dum mi promenis la bordojn kiujn mi konas,

Dum mi marshis kie la ondetoj konstante lavas vin, Paumanoko,
Kie ili suprensuras raukaj kaj siblaj,
Kie la sovagha maljuna patrino senchese ploras pro siaj shipropuloj,
Mi meditante malfrue en la autuna tago, rigardadante suden,
Tenate de chi tiu elektra mem el kies fiero mi eldiras poemojn,
Estis kaptita de la spirito kiu tramovighas en la linioj subpiede,
La rando, la sedimento, kiu reprezentas la tutan akvon kaj la tutan teron de la globo.

Fascinitaj, miaj okuloj returnighinte de la sudo, malsuprenrigardis sekvi tiujn maldikajn
ventamasojn,
Brano, pajlo, splitoj de ligno, trudherboj, kaj fuko,
Rekremento, skvamoj de brilantaj rokoj, folioj de sallaktuko, lasitaj de la tajdo,
Mejloj da promenado, la sono de rompighantaj ondoj aliflanke de mi,
Paumanoko tie kaj tiam, dum mi pensis la kutiman penson de similajhoj,
Tiujn vi prezentis al mi, vi fishforma insulo,
Dum mi promenis la bordojn kiujn mi konas,
Dum mi marshis kun tiu elektra mem, serchante specojn.

2

Dum mi promenas al la bordoj kiujn mi ne konas,
Dum mi auskultas la ve-kanton, la vochojn de viroj kaj virinoj pereigitaj,
Dum mi enspiras la nepalpeblajn ventetojn kiuj ektrafas min,
Dum la oceano, tiel mistera, rulighas kontraŭ min pli kaj pli proksimen,
Mi ankau nur signifas pleje malgrandan surlavitan drivajhon,
Iom da sabloj kaj mortaj folioj kolekti,
Kolekti, kaj kunfandi min kiel parton de la sabloj kaj drivajho.

Ho konfuzita, frustrita, fleksita al la tero mem,
Premita pri mi ke mi audacis malfermi la bushon,
Konscia nun ke inter tiu tuta babilaĉo kies ehhoj resaltas sur min mi ankoraŭ ne unu
fojon havis la plej malgrandan ideon kiu au kio mi estas,
Sed antaŭ chiuj miaj arogantaj poemoj la reala Mi staras, ankoraŭ netushite, nedirite,
tute neatingite,
Malproksimen retirighinte, min mokante per mokgratulaj signoj kaj riverencoj,
Per sonoradoj da fora ironia ridado je chiu vorto kiun mi skribis,
Montrante silente al chi tiuj kantoj, kaj tiam al la sablo sube.

Mi perceptas, ke mi ankoraŭ ne vere komprenis ian aferon, ne unu objekton, kaj ke
neniu homo iam povas,
Natura chi tie en la vidproksimo de la maro, ekspluatanta min por sagi sur min kaj piki
min,
Pro tio ke mi audacis nur malfermi la bushon kaj kanti.

3

Vi oceanoj ambau, mi akordas kun vi,

Ni murmuras simile, riproche rulante sablojn kaj drivajhon, ne sciante kial,
Chi tiuj fragmentoj ja signantaj vin kaj min kaj chion.

Vi rompebla bordo kun spuroj de disrompajho,
Vi fishforma insulo, mi prenas kio estas sube,
Kio estas via estas mia, mia patro.

Mi ankau, Paumanoko,
Mi ankau elbobelis, flosis la senmezuran flosadon, kaj surbordighis sur viaj bordoj,
Mi ankau estas nur spuro de drivajho kaj disrompajho,
Mi ankau lasas malgrandajn vrakojn sur vi, vi fishforma insulo.

Mi jhetas min sur vian bruston, mia patro,
Mi alkrochighas al vi tiel ke vi ne povas malfiksi min,
Mi tenas vin tiel firme ghis vi respondos al mi ion.

Kisu min, mia patro,
Tushu min per viaj lipoj kiel mi tushas tiujn kiujn mi amas,
Spiru al mi dum mi tenas vin proksime la sekreton de la murmurado kiun mi envias.

4

Malflusu, oceano de vivo (la fluso revenos),
Ne chesigu vian ghemadon, vi sovagha maljuna patrino,
Senchese ploru pro viaj shipromptuloj, sed ne timu, ne fornegu min,
Ne eksusuru tiel rauke kaj kolere kontrau miaj piedoj dum mi tushas vin au kolektas el
vi.

Mi intencas tenere al vi kaj chiuj,
Mi kolektas por mi mem kaj por chi tiu fantomo malsuprenrigardanta tien kien ni
kondukas, kaj sekvanta min kaj miajn.

Mi kaj miaj, senordaj ventamasoj, malgrandaj kadavroj,
Shaumo, neghe blanka, kaj bobeloj,
(Vidu, de miaj mortaj lipoj la eksudajho eksudanta finfine,
Vidu, la prismaj koloroj, scintilantaj kaj rulighantaj),
Tufoj da fojno, sabloj, fragmentoj,
Flosigitaj chi tien de multaj humoroj, unu kontraudiranta la alian,
De la shtormo, la longa kalmo, la malhelo, la hulo,
Meditantaj, pripensantaj, spiro, sala larmo, dabo da likvo au grundo,
Supren ghuste tiel multe el nesondeblaj faradoj, fermentitaj kaj jhetitaj,
Velkinta floro au du, shiritaj, ghuste tiel multe super ondoj flosantaj, drivigitaj hazarde,
Ghuste tiel multe por ni tiu ploranta ve-kanto de Naturo,
Ghuste tiel multe de kie ni venas tiu sonego de la nubtrumpetoj,
Ni, kapricaj, alportitaj chi tien ni ne scias de kie, dissternitaj antau vi,
Vi tie supre marshanta au sidanta,
Kiu ajn vi estas, ni ankau kushas en drivajhoj che viaj piedoj.

LARMOJ

Larmoj! larmoj! larmoj!
En la nokto, en soleco, larmoj,
Sur la blanka bordo gutantaj, gutantaj, ensuchitaj de la sablo,
Larmoj, ech ne unu stelo brilanta, chio malluma kaj morna,
Humidaj larmoj de la okuloj de shalvolvita kapo;
Ho kiu estas tiu fantomo? tiu formo en la mallumo, kun larmoj?
Kia senforma maso estas tio, klinighinta, kauranta tie sur la sablo?
Fluantaj larmoj, plorantaj larmoj, doloregoj, plenigitaj per sovaghaj krioj;
Ho shtormo, enkorpigita, levighanta, ireganta per rapidaj pashoj lau la plagho!
Ho sovagha kaj malgaja nokta shtormo, kun vento – ho ruktanta kaj urgha!
Ho fantomo tiel sopra kaj deca tage, kun trankvila mieno kaj reglata pashado,
Sed for en la nokto kiam vi flugas, neniu rigardanta – ho tiam la liberigita oceano,
De larmoj! larmoj! larmoj!

AL LA FREGATOBIRDO

Vi kiu dormis la tutan nokton dum la shtormo,
Vekighanta renovigita sur viaj flugilegoj,
(Chu ekfuriozis la feroca shtormo? super ghin vi ascendis,
Kaj ripozis sur la chielo, via sklavo kiu lulis vin),
Nun blua punkto, for, for en la chielo flosanta,
Dum che la lumo elighanta chi tie sur la ferdeko mi rigardas vin,
(Mi mem makuleto, punkto sur la flosanta vasto de la mondo).

For, for en la maro,
Post kiam la ferocaj drivajhoj de la nokto sternis la bordon per vrakoj,
Kun la reaperanta tago kiel nun tiel ghoja kaj serena,
La roza kaj elasta tagigho, la ekbrilanta suno,
La klara sternigho de la aer' lazura,
Vi ankau reaperas.

Vi naskita konkuri kun la ventego (vi estas tuta flugiloj),
Trakti chielon kaj teron kaj maron kaj uraganon,
Vi shipo de la aero kiu neniam ferlas siajn velojn,
Tagojn, ech semajnojn nelaca kaj antauen, tra spacoj, regnoj giranta,
Kiu rigardas che krepusko Senegalon, che mateno Amerikon,
Kiu ludas inter la fulmekbrilo kaj tondronubo,
En ili, en viaj spertoj, se vi havus mian animon,
Kiaj ghojoj! kiaj ghojoj estus viaj!

SURSHIPE CHE DIREKTILO

Surshipe che direktilo,
Juna direktisto zorge direktanta.

Tra nebulo apud marbordo malghoje sonoranta,
Oceana sonorilo – ho averta sonorilo, lulata de la ondoj.

Ho vi ja donas bonan averton, vi sonorilo che la marrifoj sonoranta,
Sonoranta, sonoranta, foraverti la shipon for de ghia pere-loko.

Char, dum atentege, ho direktilisto, vi atentas la lautan admonon,
La pruoj turnighas, la sharghita shipo takante forrapidas sub siaj grizaj veloj,
La bela kaj nobla shipo kun sia tuta valorega richo forrapidas gaje kaj sekure.

Sed ho la shipo, la senmorta shipo! ho shipo surshipe!
Shipo de la korpo, shipo de l' animo, vojaghanta, vojaghanta, vojaghanta.

SUR LA PLAGHO NOKTE

Sur la plagho nokte,
Staras infanino kun sia patro,
Rigardante la orientan, la autunan chielon.

Supren tra la mallumo,
Dum predantaj nuboj, la enterigaj nuboj, en nigraj amasoj sternighante,
Morozaj kaj rapidaj mallevigas lau la chiel' malsupren,
Meze de travidebla klara zono de etero, ankoraŭ restanta en la oriento,
Supreniras granda kaj trankvila la mastrostelo, Jupitero,
Kaj proksime chemane, nur iomete supre,
Naghas la delikataj fratinoj, la Plejadoj.

De la plagho la infanino, tenante la manon de sia patro,
Tiujn enterigajn nubojn kiuj mallevigas triumfaj baldau chion vorontajn,
Rigardante, silente ploras.

Ne ploru, infano,
Ne ploru, mia karulino,
Per chi tiuj kisoj, mi forigu viajn larmojn,
La predantaj nuboj ne longe estos triumfaj,
Ili ne longe posedos la chielon, ili voras la stelojn nur shajne,
Jupitero elighos, estu pacienca, rigardu denove alian nokton, la Plejadoj elighos,
Ili estas senmortaj, chiuj tiuj steloj kaj arghentaj kaj oraj ekbrilos denove,
La grandaj steloj kaj la malgrandaj ekbrilos denove, ili dauras,
La vastaj senmortaj sunoj kaj la longedauraj pensemaj lunoj denove brilos.

Do plej kara infano, chu vi funebras nur pro Jupitero?

Chu vi konsideras sole la enterigon de la steloj?

Io estas,
(Per miaj lipoj kvietigante vin, aldone mi flustras,
Mi donas al vi la unua sugestion, la problemon kaj nerektajhon),
Io estas, pli senmorta, ech ol la steloj,
(Multaj la enterigoj, multaj la tagoj kaj noktoj forpasantaj),
Io kio pli longe dauros, ech ol brila Jupitero,
Pli longe ol ia suno au ia chirkauranta satelito,
Au la radiantaj fratinoj la Plejadoj.

LA MONDO SUB LA SALAKVO

La mondo sub la salakvo,
Arbaroj che la fundo de la maro, la branĉoj kaj folioj,
Marlaktuko, vastaj likenoj, strangaj floroj kaj semoj, la densa implikajho, aperturoj, kaj
roza torfo,
Diversaj koloroj, pala grizo kaj verdo, purpuro, blanko, kaj oro, la ludo de lumo tra la
akvo,
Mutaj naghantoj tie inter la rokoj, koralo, fuko, herbo, junkoj, kaj la nutrajho de la
naghantoj,
Malviglaj ekzistajhoj, pashtighantaj tie suspensiigite, au malrapide rampantaj proksime
al la fundo,
La kachaloto che la surfaco, blovanta aeron kaj shprucajhon, au kapriolanta per siaj
plaudiloj,
La plumbokula sharko, la rosmaro, la hhelonio, la vila marleopardo, kaj la torpedo,
Pasioj tie, militoj, postkuroj, triboj, vidado en tiuj oceanprofundoj, spirantaj tiun dens-
spiran aeron, kiel tiom multe faras,
La shanghigho de tie al la vidado chi tie, kaj al la subtila aero, spirata de estajhoj kiel ni,
kiu iras chi tiun sferon,
La shanghigho antauen de la nia al tiu de estajhoj kiuj iras aliajn sferojn.

SUR LA PLAGHO NOKTE SOLA

Sur la plagho nokte sola,
Dum la maljuna patrino shancelighas per sia tien kaj reen, kantante sian raukan kanton,
Dum mi rigardas la helajn stelojn brili, mi pensas penson de la shlosilo de la universo
kaj de la estonteco.

Vasta simileco interkupas chion,
Chiuj sferoj, kreskintaj, nekreskintaj, malgrandaj, grandaj, sunoj, lunoj, planedoj,
Chiuj distancoj de loko, kiaj ajn larghaj,
Chiuj distancoj de tempo, chiuj senvivaj specoj,
Chiuj animoj, chiuj vivaj korpoj, kvankam ili estu malsamegaj, au en malsamaj mondoj,
Chiuj gasaj, akvaj, vegetaj, mineralaj procezoj, la fishoj, la bestoj,

Chiuj nacioj, koloroj, barbarajhoj, civilizoj, lingvoj,
Chiuj identecoj kiuj jam ekzistis au povus ekzisti sur chi tiu globo, au ia globo,
Chiuj vivoj kaj mortoj, chiuj de la pasinteco, nuntempo, estonteco,
Chi tiu vasta simileco transportas ilin, kaj chiam transportis,
Kaj por chiam transportos ilin kaj kompakte tenos kaj enfermos ilin.

KANTO POR CHIUJ MAROJ, CHIUJ SHIPOJ

Hodiau kruda kurta recitativo,
De shipoj veturantaj la marojn, chiu kun sia aparta flago au shipsignalo,
De nenomataj herooj en la shipoj – de ondoj sternighantaj kaj sternighantaj
malproksimen, kiel povas atingi la okulo,
De pelighanta shprucajho, kaj la ventoj fajfantaj kaj blovantaj,
Kaj el chi tiuj, chanto por la maristoj de chiuj nacioj,
Spasma, kiel impeto.

De markapitanoj, junaj au maljunaj, kaj de l' maatoj, kaj de chiuj sentimaj maristoj,
De la malmultaj, tre selektitaj, silentemaj, kiujn la sorto neniam povas surprizi, nek
la morto konsterni,
Selektitaj shpareme sen bruo de vi, maljuna oceano, elektitaj de vi,
Vi maro, kiu selektas kaj kolektas la rason en tempo, kaj unuigas naciojn,
De vi mamnutritaj, maljuna rauka nutristino, enkorpigantaj vin,
Neregeblaj, nemalsovaghigeblaj kiel vi.

(Chiam la herooj sur akvo au sur tero, unuope au duope aperantaj,
Chiam la raso konservata kaj neniam perdita; kvankam rara, sufiche por semoj
konservata.)

2

Elparadu, ho maro, viajn apartajn flagojn de nacioj!
Elparadu, videblajn kiel iam, la diversajn shipsignalojn!
Sed vi rezervu precipe por vi kaj por la animo de homo unu flagon super chiuj ceteraj,
Spirita teksita signalo por chiuj nacioj, emblemo de homo suprenigita super morton,
Simbolo de chiuj kuraghaj kapitanoj kaj chiuj sentimaj maristoj kaj maatoj,
Kaj chiuj, kiuj dronis, farante sian devon,
Rememoriga de ili, plektita el chiuj sentimaj kapitanoj, junaj au maljunaj,
Standardo universala, subtile flirtanta la tutan tempon, super chiuj kuraghaj maristoj,
Chiuj maroj, chiuj shipoj.

PATROLANTE BARNEGATON

Sovagha, sovagha la shtormo, kaj la maro alte flusanta,
Konstanta la mugho de la ventego, per senchesa subton' murmuranta,
Krioj de demono ridado, spasme trapikantaj, sonorantaj,

Ondoj, aero, noktomezo, per sia plej sovagha triunuo vipantaj,
Ekstere tie en la ombroj, laktoblankaj krestoj kuregantaj,
Al la plaghaj neghakvo kaj sablo neghostrioj feroce sin klinantaj,
Kie tra la malhelo la orientan mortventon alfrontantaj,
Tra tranchantaj kirlajho kaj shprucajho garde kaj firme antauenirantaj,
(Tio en la malproksimo! chu tio estas vrako? chu la rugha signalo flagras?)
Neghakvon kaj sablon de la plagho senlace ghis taglumo trairantaj,
Konstante, malrapide, tra la rauka mugho, neniam cedantaj,
Lau la noktomeza rando apud tiuj laktoblankaj krestoj kuregantaj,
Grupo da malklaraj, strangaj formoj, luktantaj, la nokton alfrontantaj,
Tiun sovaghan triunuon garde observantaj.

POST LA MARSHIPO

Post la marshipo, post la siblantaj ventoj,
Post la blankegrizaj veloj strechitaj sur siaj stangoj kaj shnuroj,
Malsupre, miriad-miriado da ondoj hastantaj, suprenlevantaj siajn kolojn,
Tendencantaj en senchesa fluo al la spuro de la shipo,
Ondoj de la oceano bobelantaj kaj gluglantaj, gaje gvatantaj,
Ondoj, ondantaj ondoj, likvaj, neebenaj, rivalemaj ondoj,
En direkto al tiu giranta fluo, ridanta kaj flosiva, kun kurboj,
Kie la granda shipo, veturante kaj takante, dismetis la surfacon,
Pli grandaj kaj pli malgrandaj ondoj en la etendo de la oceano sopire fluantaj,
La disondo de la marshipo post kiam shi pasas ekbrilanta kaj kapriolema sub la suno,
Diversa procesio kun multaj shaumamasoj kaj multaj fragmentoj,
Sekvantaj la majestan kaj rapidan shipon, en la disondo sekvantaj.

CHE LA VOJFLANKO

BOSTONA BALADO

(1854 – che pompa rekondukado de eskapinta sklavo, Anthony Burns)

Por plej baldau eniri en Boston-urbon mi levighis chi-matenon frue,
Jen bona loko che la angulo, mi devas stari kaj vidi la elmontrajhon.

Malobstrucu la vojon tie Jonatano!
Vojon por la marshalo de la Prezidento – vojon por la kanonoj de la registaro!
Vojon por la Federala infanterio kaj dragonoj (kaj la aperajhoj abunde rulfalantaj).
Mi amas rigardi la Stelojn kaj Striojn, mi esperas ke la fifroj ludos Janki' -Dudelon.
Kiel hele brilas la sabretoj de la plej antaŭaj trupoj!
Chiu viro tenas sian revolveron, marshante rigida tra Boston-urbo.

Nebulo sekvas, antikvuloj de tiu sama venas lamante,
Kelkaj shajnas lignokruraj, kaj kelkaj shajnas bandaghitaj kaj sensangaj.

Nu chi tio estas ja elmontrajho – ghi elvokis la mortajn el la tero!
La malnovaj tombejoj de la montetoj hastis por vidi!
Fantomoj! fantomoj sennombraj flanke kaj poste!
Trikornaj chapeloj el tinea shimo – lambastonoj el nebulpluvo!
Brakoj en skarpaj – maljunuloj sin apogantaj sur la shultroj de junuloj.

Kio malkvietigas vin, vi Jankiaj fantomoj? kio estas tiu tuta klaketado de nudaj gingivoj?
Chu la tremfebros konvulsiigas viajn membrojn? chu vi prenas viajn lambastonojn por
musketoj kaj celumas ilin?

Se vi blindigas viajn okulojn per larmoj, vi ne vidus la marshalon de la Prezidento,
Se vi ghemas tiajn ghemojn, vi eble heziligos la registarajn kanonojn.

Fi al vi, maljunaj maniuloj – mallevu tiujn levitajn brakojn kaj lasu viajn blankajn harojn,
Chi tie gapas viaj pranepoj, iliaj edzinoj rigardas ilin de la fenestroj,
Vidu kiel bone vestitaj, vidu kiel orde ili kondukas.

Pli kaj pli malbone – chu vi ne povas elteni ghin? chu vi retretas?
Chu chi tiu horo kun la vivaj estas tro morta por vi?

Retretu do – pelmele!
Al viaj tomboj – reen – reen al la montetoj, maljunaj lamantoj!
Mi ne opinias, chiuokaze, ke vi apartenas chi tie.
Sed estas unu afero, kiu apartenas chi tie – chu mi diru al vi kio ghi estas, sinjoroj de
Bostono?

Mi flustros ghin al la Urbestro, li sendos komitaton al Anglujo,
Ili ricevos aprobon de la Parlamento, iros kun charo al la regha kriptoj,

Elfosoj la cherkon de la Regho Georgo, malvolvos lin rapide el liaj tombovestoj,
enskatoligos liajn ostojn por vojagho,
Trovos rapidan Jankian kliperon – jen frajto por vi, nigra ventra klipero,
Supren vian ankron – elskuu viajn velojn – stiru rekte al la Bostona golfo.

Nun voku por la marshalo de la Prezidento denove, elportu la registarajn kanonojn,
Hejmenportu la rorulojn de la Kongreso, faru alian procesion, gardu ghin per infanterio
kaj dragonoj.

Chi tiu chefornamajho por ili,
Rigardu, chiuj bonkonduktaj civitanoj – rigardu de la fenestroj, virinoj!

La komitato malfermu la skatolon, muntu la reghajjn ripojn, gluu tiujn kiuj ne
alfiksighos,
Alfrapu la kranion sur la supron de la ripoj, kaj alfrapu kronon sur la supron de l'
kranio.

Vi jam akiris vian venghon, maljuna gravulacho – la krono jam ricevas sufichan
agnoskon, kaj pli ol sufichan.

Ekshovu la manojn en la poshojn, Jonatano – vi estas sukcesulo ekde chi tiu tago,
Vi estas tre sagaca – kaj jen unu el viaj bonachetoj.

EUROPO

La 72an kaj 73an Jarojn de Chi Tiuj Shtatoj

Subite el sia mucida kaj somnola kushejo, la kushejo de sklavoj,
Kiel fulmo ghi elsaltis, duone ektimigite je si mem,
Ghiaj piedoj sur la cindroj kaj chifonoj, ghiaj manoj firme sur la gorghoj de reghoj.

Ho espero kaj fido!
Ho dolora dozo de la vivoj de ekzilitaj patriotoj!
Ho multaj chagrenitaj koroj!
Returnu al chi tiu tago kaj faru vin denove.

Kaj vi, pagitaj por profani la Popolon – vi mensoguloj, rimarku!
Ne pro sennombraj doloregoj, murdoj, voluptoj,
Pro kortega shtelado en ghiaj multoblaj malnoblaj formoj, shtelachante je lia naiveco la
salajron de la malrichulo,
Pro multaj promesoj, jhuritaj de reghaj lipoj, kaj rompita kaj priridita che la rompo,
Tiam en sia potenco ne pro chiuj chi la frapoj frapis venghon, au la kapoj de la nobeloj
falas;
La Popolo maltimis la ferocon de reghoj.

Sed la dolcheco de kompato fermentigis maldolchan detruon, kaj la timigitaj monarhhoj
revenas,

Chiu venas elmontrate kun sia sekvantaro, pendumisto, pastro, impostisto,
Soldato, advokato, senjoro, prizonisto, kaj jesulo.

Tamen malantau chio, mallevighanta shteliranta, jen, formo,
Svaga kiel la nokto, drapirita senfine, kapo, fronto, kaj formo, en skarlataj faldoj,
Kies vizaghon kaj okulojn neniu povas vidi,
El ghiaj roboj nur chi tio, la rughaj roboj levitaj de la brako,
Unu fingro kurbita, indikanta alte super la supro, kiel la kapo de serpento aperas.

Dume kadavroj kushas en nove faritaj tomboj, sangaj kadavroj de junaj viroj,
La shnuro de la pendumilo peze pendas, la kugloj de princoj flugas, la kreitoj de potenco
laute ridas,
Kaj chiuj tiuj aferoj alportas fruktojn, kaj ili estas bonaj.

Tiuj kadavroj de junaj viroj,
Tiuj martiroj kiuj pendas de la pendumiloj, tiuj koroj trapikitaj de la griza plumbo,
Malvarmaj kaj senmovaj, kiel ili shajnas, vivas aliloke kun nebuchita viveco.

Ili vivas en aliaj junaj viroj, ho reghoj!
Ili vivas en fratoj denove pretaj vin defii,
Ili estis purigitaj de morto, ili estis instruitaj kaj altigitaj.

Ne iu tombo de la murditaj por libereco kiu ne kreskigas semon por libereco, siavice
naskonta semon,
Kiun la ventoj portas malproksimen kaj resemas, kaj la pluvoj kaj neghoj nutras.

Nenian elkorpigitan spiriton povas la armiloj de tiranoj liberigi,
Kiu ne shteliradas nevideble tra la tuta tero, frustrante, konsilante, avertante.

Libereco, aliaj malesperu pri vi – mi neniam malesperas pri vi.

Chu la domo estas fermita? chu la mastro estas for?
Tamen, estu pretaj, ne estu lacaj de vachado,
Li baldau revenos, liaj mesaghistoj tuj venos.

MANSPEGULO

Suprentenu ghin severe – vidu chi kion ghi resendas (kiu ghi estas? chu vi?)
Ekstere bela kostumo, interne cindroj kaj malpurajho,
Ne plu ekbrila okulo, ne plu sonora vocho au elasta pasho,
Nun la okulo, vocho, manoj, pasho de ia sklavo,
Spirajho de ebriulo, vizagho de manghanto de nesanigajhoj, karno de venere-ulo,
Pulmoj forputrantaj poere, stomako acida kaj lezoza,
Artikoj reumataj, intestoj shtopitaj per abomenajho,
Sango cirkulanta je malhelaj kaj venenaj rojoj,
Vortoj babilo, audado kaj tushado nesentivaj,

Nenia cerbo, nenia koro restantaj, nenia magneteco de sekso;
Tiaj de unu rigardo en chi tiu spegulo antau ol vi foriras,
Tia rezulto tiel frue – kaj de tia komenco!

DIOJ

Amanto dia kaj perfekta Kamarado,
Atendanta kontenta, nevidebla ankoraŭ, sed certa,
Vi estu mia Dio.

Vi, vi, la Ideala Homo,
Justa, kapabla, bela, kontenta, kaj amema,
Kompleta korpe kaj ampleksa spirite,
Vi estu mia Dio.

Ho Morto (char Vivo jam servis siavice),
Malfermanto kaj kondukanto al la chiela domo,
Vi estu mia Dio.

Io, io de plej potenca, plej bona kion mi vidas, konceptas, au konas,
(Por rompi la stagnan ligan – vin, vin liberigi, ho animo),
Vi estu mia Dio.

Chiu grandaj ideoj, la aspiroj de la raso,
Chiu heroajhoj, faroj de ravitaj entuziasmuloj,
Vi estu miaj Dioj.

Au Tempo kaj Spaco,
Au formo de Tero dia kaj mirinda,
Au ia bela formo kiun mi vidante adoras,
Au brila astro de suno au stelo nokte,
Vi estu miaj Dioj.

GHERMOJ

Formoj, kvalitoj, vivoj, homeco, lingvo, pensoj,
Tiuj konataj, kaj tiuj nekonataj, tiuj sur la steloj,
La steloj mem, iuj formitaj, aliaj neformitaj,
Mirindajhoj kiel de tiuj landoj, la grundo, arboj, urboj, enloĝantoj, kio ajn ili estu,
Grandiozaj sunoj, la lunoj kaj ringoj, la sennombraj kombinoj kaj efikoj,
Tiaj, kaj virtuale tiaj, videblaj chi tie au ie, staras priprovizitaj en manpleno da spaco,
kiun mi etendas mian brakon kaj duonenfermas per mia mano,
Tio enhavanta la komencon de chiu kaj chio, la kvaliton, la ghermojn de chio.

PENSO

De posedo – kvazau iu tauga posedi aferojn ne povus lauplache eniri chion, kaj
enkorpiĝi ilin en sin;
De vidado – supozu ian vidon malantaŭen tra la formdona haaoso, premisante la
kreskon, plenecon, vivon, nun atingitajn en la vojagho,
(Sed mi vidas la vojon daurigata, kaj la vojaghon chiam daurigata);
De kio iam mankis sur la tero kaj kun tempo estis liverita – kaj de kio ankoraŭ estos
liverata,
Ĉar chion kion mi vidas kaj scias mi opinias havi sian precipan signifon en kio ankoraŭ
estos liverata.

KIAM MI AUDIS LA DOKTAN ASTRONOMON

Kiam mi audis la doktan astronomon,
Kiam la pruvoj, la figuroj, estis etenditaj en kolumnoj antaŭ mi,
Kiam al mi estis montritaj la grafikajhoj kaj diagramoj por ilin sumigi, dividi, kaj mezuri,
Kiam mi sidante audis la astronomon kie li prelegis kun multa aplaudo en la prelegejo,
Kiel baldau neeksplikeble mi ighis laca kaj nauza,
Ĝhis, levighante kaj elglisante, mi forvadis sola,
En la mistika malseketa nokta aero, kaj de tempo al tempo,
Suprenrigardis en perfekta silento al la steloj.

PERFEKTECOJ

Nur ili mem komprenas sin mem kaj la similajn de si mem,
Kiel animoj nur komprenas animojn.

HO MI! HO VIVO!

Ho mi! ho vivo! pri la demandoj pri ĉi tiuj, ripetighantaj,
Pri la senfinaj procesioj de la senkredaj, pri urboj plenigitaj per la malsaghaj,
Pri mi mem, chiam riprochanta min mem (ĉar kiu pli malsagha ol mi, kaj kiu pli
senkreda?),
Pri okuloj kiuj vane avidas la lumon, pri la malnoblaj celoj, pri la lukto chiam renovigata,
Pri la senvaloraj rezultoj de chio, pri la pezpashantaj kaj abomenaj amasoj kiujn mi vidas
chirkau mi,
Pri la sensignifaj kaj senutilaj jaroj de la ceteraj, kun la ceteraj mi interplektita,
La demando, ho mi! tiel malghoja, ripetighanta – Kia bono inter tiuj, ho mi, ho vivo?

Respondo

Ke vi estas ĉi tie – ke vivo ekzistas kaj identeco,

Ke la potenca dramo dauras, kaj vi povas kontribui verson.

AL PREZIDENTO

Chio kion vi faras kaj diras estas al Ameriko svinge pendigataj miraghoj,
Vi ne lernis de Naturo – de la politiko de Naturo vi ne lernis la grandan amplekson,
ghustecon, senpartiecon,
Vi ne vidis ke nur tiaj kiel ili estas por chi tiuj Shtatoj,
Kaj ke kio estas malpli ol ili devas pli-malpli frue forlevighi de chi tiuj Shtatoj.

MI SIDAS KAJ ELRIGARDAS

Mi sidas kaj elrigardas al chiuj malghoj de la mondo, kaj al chiuj premoj kaj hontoj,
Mi audas sekretajn konvulsiajn plorsingultojn de junaj viroj, angoraj pri si mem,
memriprochaj post faroj faritaj,
Mi vidas en la malnobla vivo la patrinon, mistraktatan de siaj infanoj, mortantan,
neglektatan, malgrasegan, senesperan,
Mi vidas la edzinon, mistraktatan de sia edzo, mi vidas la perfidan delogiston de junaj
virinoj,
Mi rimarkas la rankorigojn de jhaluzo kaj neredonita amo kiujn oni penas kashi, mi
vidas chi tiujn vidajhojn sur la tero,
Mi vidas la rezultojn de batalado, pesto, tiraneco, mi vidas martirojn kaj prizonulojn,
Mi observas malsategon sur la maro, mi observas la maristojn loti kiu estu mortigita por
konservi la vivojn de la ceteraj,
Mi observas la malrespektojn kaj malhonorajn jhetatajn de arogantuloj sur laboristojn,
sur la malricajn, kaj sur negrojn, kaj similajn;
Al chiuj chi – al chiuj malnoblajhoj kaj suferegoj sen fino mi sidante elrigardas,
Vidas, audas, kaj silentas.

AL RICHAJ DONANTOJ

Kion vi donas al mi mi ghoje akceptas,
Iom da vivtenado, dometon kaj ghardenon, iom da mono, dum mi rendevuas kun miaj
poemoj,
Loghejon kaj matenmanghon de vojaghanto dum mi vojaghas tra la Shtatoj, – kial mi
hontu posedi tiajn donacojn? reklami por ili?
Char mi mem ne estas iu kiu donas nenion al homo kaj homino,
Char mi donas al ia ajn homo au homino la eniron al chiuj donacoj de la universo.

LA AMORADO DE LA AGLOJ

Dum randiro de la rivervojo, (mia antautagmeza promeno, mia ripozo),

Chielen en aero subita obtuza sono, la amorado de la agloj,
La hastanta amora kontakto alte en spaco kune,
La alfiksighantaj kunkuplighthantaj ungegoj, vivanta, feroça, giranta rado,
Kvar batantajflugiloj, du bekoj, turbula amaso firme krochighanta,
En rulfalantaj turnighantaj sinsekvaj lopoĵ, rekte malsupren falanta,
Ghis super la rivero ekvilibrinta, la du ankoraŭ unu, paŭzo de momento,
Senmova kvieta ekvilibro en la aero, tiam apartighante, ungegojn malfiksante,
Supren denove sur malrapidfirmajflugiloj klinlevighante, sian apartan diversan
flugadon,
Shi sian, li sian, sekvantaj.

VAGANTE EN PENSO (Post legado de HEGELO)

Vagante en penso tra la Universo, mi vidis la malmulton kiu estas Bono konstante
hastanta al senmorteco,
Kaj la vastan chion kiu estas nomata Malbono mi vidis hastanta kunfandi sin kaj farighi
perdita kaj morta.

BIENA BILDO

Tra la vasta malfermita pordo de la trankvila kampara tenejo,
Sunlumigata pashteja kampo kun bovoj kaj chevaloj pashtighantaj,
Kaj brumo kaj vasta vidajho, kaj la malproksima horizonto forvelkanta.

LA MIRO DE INFANO

Silenta kaj mirigita, ech kiam malgranda knabo,
Mi memoras ke mi audis la predikiston chiun dimanĉon meti Dion en siajn dirojn,
Kvazau luktanta kontraŭ ia estajho au influo.

LA KURISTO

Sur plata vojo kuras la bone trejnita kuristo,
Li estas malgrasa kaj tendeneca kun muskolaj gamboj,
Li estas maldike vestita, li klinighas antaŭen dum li kuras,
Kun leghere fermitaj pugnoj kaj brakoj parte levitaj.

BELAJ VIRINOJ

Virinoj sidas au movighas tien kaj reen, kelkaj maljunaj, kelkaj junaj,

La junaj estas belaj – sed la maljunaj estas pli belaj ol la junaj.

PATRINO KAJ BEBO

Mi vidas la dormantan bebon alpremetanta sin al la brusto de sia patrino,
La dormanta patrino kaj bebo – silente, mi observadas ilin longe kaj longe.

PENSO

Pri obeemo, fido, kuntenigho;
Dum mi staras aparteme kaj rigardas, estas al mi io profunde afekcia en tio ke
grandaj amasoj da homoj sekvas la komandon de tiuj kiuj ne kredas je homoj.

VIZIERITA

Masko, chiama natura kashantajho de shia mem,
Kashanta shian vizaghon, kashanta shian formon,
Shanghoj kaj transformoj chiun horon, chiun momenton,
Falantaj sur shin, ech kiam shi dormas.

PENSO

Pri Justeco – kiel se Justeco povas esti io krom la sama ampleksa legho prezentita de
naturaj jughistoj kaj savistoj,
Kiel se ghi povas esti tiu afero au tiu afero, lau decidoj.

GLISANTE SUR CHIO

Glisante sur chio, tra chio,
Tra Naturo, Tempo, kaj Spaco,
Kiel shipo sur la akvoj antaueniranta,
La vojaghon de l' animo – ne vivon sole,
Morton, multajn mortojn mi kantos.

CHU NENIAM VENIS AL VI HORO

Chu neniam venis al vi horo,
Subita brilo dia, dejhetanta, kreviganta chiujn chi bobelojn, modojn, richojn?
Chi tiujn avidajn komercajn celojn – librojn, politikojn, artajhojn, amorojn,

Al kompleta nenieco?

PENSO

Pri Egaleco – kiel se malutilas al mi doni al aliaj la samajn shancojn kaj rajtojn kiel mi mem havas – kiel se ne estas nemalhaveble al miaj propraj rajtoj ke aliaj posedu la samajn.

AL MALJUNECO

Mi vidas en vi la estuaron kiu plilarghigas kaj etendas sin grande dum ghi vershighas en la grandan maron.

LOKOJ KAJ TEMPOJ

Lokoj kaj tempoj – kio estas en mi kiu trafas ilin chiujn, kiam ajn kaj kie ajn, kaj sentigas min hejme,
Formoj, koloroj, densecoj, odoroj – kio estas en mi kiu respondas al ili?

OFEROJ

Mil perfektaj viroj kaj virinoj aperas,
Chirkau chiu amasighas aro da amikoj, kaj gajaj infanoj kaj junuloj, kun oferoj.

AL LA SHTATOJ

Por Identigi la 16an, 17an, au 18an Prezidentecon

Kial klinighantaj, pridemandantaj? kial mi mem kaj chiuj dormetantaj?
Kia malhelighanta krepusko – rekremento flosanta sur la akvoj,
Kiuj ili estas kiel vespertoj kaj strigoj malfidindaj en la kapitolo?
Kia fia Prezidenteco! (ho Sudo, viaj varmegaj sunoj! ho Nordo, viaj arktaj frostighoj!),
Chu tiuj estas vere Kongresanoj? chu tiuj estas la grandaj Jughistoj? chu tiu estas la Prezidento?
Do mi iom dormos ankoraŭ, ĉar mi vidas ke chi tiuj Shtatoj dormas, pro kialoj;
(Kun amasighanta malhelo, kun murmuranta tondro kaj flagrantaj sagadoj ni chiuj devige vekighas,
Sudo, Nordo, Oriento, Okcidento, landinterno kaj marbordo, ni certe vekighos.)

TAMBURBATOJ

UNUE HO KANTOJ POR PRELUDO

Unue ho kantoj por preludo,
Leghere batu sur la strechita timpano fieron kaj ghojon pri mia urbo,
Kiel shi kondukis la ceterajn sin armi, kiel shi donis la replikon,
Kiel tuj kun supraj membroj neatendante ech momenton shi saltis,
(Ho superba! ho Manhatano, mia propra, mia senegala!
Ho plej forta vi en la horo de danghero, en krizo! ho pli fidinda ol shtalo!)
Kiel vi saltis – kiel vi dejhetis la kostumojn de paco kun indiferenta mano,
Kiel via milda opermuziko shanghighis, kaj la tamburo kaj fifro estis audataj anstataue,
Kiel vi kondukis al la milito (tio servos por nia preludo, kantoj de soldatoj),
Kiel Manhatanaj tamburbatoj kondukis.

Jam kvardek jarojn mi en mia urbo vidis soldatojn paradantoj,
Kvardek jarojn kiel spektaklo, ghis neatendite la sinjorino de chi tiu svarmanta kaj
turbulenta urbo,
Sendorma inter siaj shipoj, siaj domoj, sia nekalkulebla richo,
Kun sia miliono da infanoj chirkau si, subite,
Dum plena nokto, che novajho de la sudo,
Indignigita batis per pugnigita mano la pavimon.

Shoko elektra, la nokto suferis ghin,
Ghis kun minaca zumo nia abelujo che tagigho elvershis siajn miriadojn.

De la domoj tiam kaj la metiejoj, kaj tra chiuj pordoj,
Saltis ili tumultaj, kaj jen! Manhatano sin armanta.

Je la tamburbatoj senprokrastaj,
La junaj viroj envicighantaj kaj sin armantaj,
La mehhanistoj sin armantaj (la trulo, la rabotilo, la martelo de la forghisto
flankenjhetitaj haste),
La advokato forlasanta sian oficejon kaj sin armanta, la jughisto eliranta el la tribunalo,
La veturigisto forlasanta sian kaleshon en la strato, desaltanta, dejhetanta la
bridrimenojn abrupte sur la dorsojn de la chevaloj,
La vendisto forlasanta la butikon, la chefo, kontisto, portisto, chiuj forlasantaj;
Rotoj amasighas chie je komuna konsento kaj armas sin,
La novaj rekrutoj, ech knaboj, la maljunaj viroj montras al ili kiel porti sian ekipajhon, ili
bukas la rimenojn zorge,
Ekstere sin armantaj, interne sin armantaj, la ekbrilo de la muskettuboj,
La blankaj tendoj amasighas en tendejoj, la armitaj gardostarantoj chirkaue, la
sunlevighaj kanonoj kaj denove che sunsubiro,
Armitaj regimentoj alvenas chiun tagon, pasas tra la urbo, kaj enshipighas de la varfoj,
(Kiel bone ili aspektas dum ili pashas malsupren al la rivero, shvitaj, iliaj pafiloj sur la
shultroj!

Kiel mi amas ilin! kiel mi povus chirkaupremi ilin, kun siaj brunaj vizaghoj kaj siaj vestoj
kaj tornistroj kovritaj de polvo!),
La sango de la urbo ekscitita – armitaj! armitaj! la krio chie,
La flagoj elmetitaj el la spajroj de preghejoj kaj el chiuj publikaj konstruajhoj kaj
magazenoj,
La larma apartigho, la patrino kisas sian filon, la filo kisas sian patrinon,
(Malvolonta estas la patrino apartighi, tamen ne diras vorton por lin deteni),
La tumulta eskorto, la vicoj da policistoj antaŭantaj, malobstrukcantaj la vojon,
La ellasita entuziasmo, la sovaghaj huraoj de la amaso por siaj preferatoj,
La artilerio, la silentaj kanonoj helaj kiel oro, tirataj laulonge, leghere rulsonas sur la
shtonoj,
(Silentaj kanonoj, baldau chesigontaj vian silenton,
Baldau liberigotaj komenci la rughan aferon);
La tuta murmurado de preparado, la tuta rezoluta sinarmado,
La hospitala servo, la charpio, bandaghoj, kaj medikamentoj,
La virinoj sin proponantaj kiel flegistinojn, la laboro por kio estas serioze komencite,
nenia nura parado nun;
Milito! armita raso antaŭeniras! la bonvenigo por batalo, nenia forturnado;
Milito! chu ghi estu semajnoj, monatoj, au jaroj, armita raso antaŭeniras ghin bonvenigi.

Manahata marshanta – kaj estas ho por bone kanti ghin!
Estas ho por vireca vivo en la barakejo.

Kaj la fortika artilerio,
La pafiloj helaj kiel oro, la laboro por gigantoj, bone servi la pafilojn,
Liberigu ilin! (ne plu kiel la pasintajn kvardek jarojn por salutoj por komplezoj sole,
Enmetu ion nun krom pulvo kaj vato).

Kaj vi, sinjorino de ŝipoj, vi Manahata,
Maljuna matrono de chi tiu fiera, amika, turbulenta urbo,
Ofte en paco kaj richo vi estis pensema au kashe malridetis inter chiuj viaj infanoj,
Sed nun vi ridetas, ghoje ghojegante, maljuna Manahata.

DEK-OK CENT SESDEK UNU

Armita jaro – jaro de la lukto,
Neniaj delikataj rimoj au sentimentalaj amversoj por vi, terura jaro,
Ne vi, kiel ia pala poeteto, sidanta che skribotablo, leghere lispanta kadencojn,
Sed kiel forta viro erekta, vestita en bluaj vestoj, antaŭeniranta, portanta fusilon sur via
shultro,
Kun bone tendenhava korpo kaj sunbrunigitaj vizagho kaj manoj, kun tranchilo en la
rimeno che via flanko,
Dum mi audis vin krianta laute, via sonora vocho sonoranta trans la kontinenton,
Via vira vocho, ho jaro, kiel levighanta inter la grandaj urboj,
Inter la viroj de Manhatano mi vidis vin kiel unu el la laboristoj, la loghantoj en
Manhatano,

Au per grandaj pashoj transiranta la preriojn el Ilinojso kaj Indianio,
Rapide transiranta la Okcidenton kun elasta iro kaj malsupreniranta la Aleganojn,
Au malsupren de la Grandaj Lagoj au en Pensilvanio, au sur ferdeko lau Rivero Ohia,
Au suden lau Rivero Tenesia au Kumberlanda, au che Chatanugo sur la montosupro,
Mi vidis vian iron kaj mi vidis viajn tendeneajn membrojn, vestitajn en bluo, portantajn
armilojn, fortika jaro,
Audis vian rezolutan vochon, ellanchatan ree kaj ree,
Jaro kiu subite kantis per la bushoj de la rondlipaj kanonoj,
Mi ripetas vin, hastanta, kolizianta, malghoja, distrita jaro.

BATU! BATU! TAMBURUOJ!

Batu! batu! tamburoj! – blovu! klarionoj! blovu!
Tra la fenestroj – tra pordoj – elrompighu kiel senindulga forto,
En la solenan preghejon, kaj disigu la preghejaron,
En la lernejon, kie la lernanto lernas;
Ne lasu trankvilon al la novedzo – nenian felichon li devas havi nun kun sia novedzino,
Nek al la pacama bienisto ian pacon, pluganta sian kampon au rikoltanta sian grenon,
Tiel feroce vi zumadas kaj batadas, vi tamburoj – tiel stride vi klarionoj blovas.

Batu! batu! tamburoj! – blovu! klarionoj! blovu!
Tra la trafiko de urboj – tra la rulsonado de radoj en la stratoj;
Chu litoj estas preparitaj por dormantoj nokte en la domoj? neniam dormantoj devas
dormi en tiuj litoj,
Neniam marchandadoj de marchandantoj tage – neniam makleristoj au spekulantoj – chu
ili volus daurigi?
Chu la parolantoj volus paroli? chu la kantisto volus provi kanti?
Chu la advokato volus levighi en la tribunalo por diri sian argumentaron antaŭ la
jughisto?
Tiam klakadu pli rapide, pli forte, tamburoj – vi klarionoj pli sovaghe blovu.

Batu! batu! tamburoj! – blovu! klarionoj! blovu!
Faru nenian diskuton – chesu pro nenia protesto,
Ne atentu la timemajn – ne atentu la ploranton au preghanton,
Ne atentu la maljunan viron petegantan la junan viron,
Ne lasu la vochon de l' infano esti audata nek la petegojn de l' patrino,
Igu ech la stablojn skui la mortajn kie ili kushas atendante la cherkveturilojn,
Tiel forte vi bumias, ho teruraj tamburoj – tiel laute vi klarionoj blovas.

DE PAUMANOKO KOMENCANTE, MI FLUGAS KIEL BIRDO

De Paumanoko komencante, mi flugas kiel birdo,
Chirkaue kaj chirkaue por sori por kanti la ideon de chiuj,
Norden min direktante por kanti tie arktajn kantojn,

Al Kanado ghis mi sorbas Kanadon en min mem, tiam al Michigano,
Al Viskonsino, Iovao, Minesoto, por kanti iliajn kantojn (ili estas neimiteblaj),
Tiam al Ohio kaj Indianio por kanti iliajn, al Misurio kaj Kansaso kaj Arkansaso por
kanti iliajn,
Al Tenesio kaj Kentukio, al la Korolinoj kaj Georgio por kanti iliajn,
Al Teksaso kaj pluiranta tiel al Kalifornio, por vagi akceptate chie;
Por kanti unue (je la bato de la milittamburo, se necesas),
La ideon de chiu, de la Okcidenta mondo unu kaj nedisigebla,
Kaj tiam la kanton de chiu membro de chi tiuj Shtatoj.

KANTO DE LA STANDARDO CHE TAGIGHO

Poeto.

Ho nova kanto, libera kanto,
Flirtanta, flirtanta, flirtanta, flirtanta, per sonoj, per vochoj pli klara,
Per la vocho de la vento kaj tiu de la tamburo,
Per la vocho de la standardo kaj vocho de infano kaj vocho de maro kaj vocho de patro,
Malalte sur la tero kaj alte en la aero,
Sur la tero, kie staras patro kaj infano,
En la suprena aero kien iliaj okuloj turnighas,
Kie la standardo che tagigho flirtadas.

Vortoj! librovortoj! kio vi estas?
Vortoj ne plu, char auskultu kaj vidu,
Mia kanto estas tie en la libera aero, kaj mi devas kanti,
Kun la standardo kaj flago flirtanta.

Mi teksos la akordon kaj enplektos,
Deziron de la viro kaj deziron de la bebo, mi enplektos ilin, mi enmetos vivon,
Mi enmetos la scintilantan pinton de l' bajoneto, mi lasos kuglojn kaj kuglegojn sibli,
(Kiel iu, portanta simbolon kaj minacon malproksimen en la estontecon,
Krianta per klariona vocho, Veku kaj avertu! Avertu kaj veku!),
Mi vershos la versojn kun rojoj da sango, plenajn de volo, plenajn de ghojo,
Tiam malfiksighos, forlanchighos, por iri kaj konkuri,
Kun la standardo kaj flago flirtanta.

Flago.

Suprenvenu chi tien, bardo, bardo,
Suprenvenu chi tien, animo, animo,
Suprenvenu chi tien, ho kara infaneto,
Por flugi en la nuboj kaj ventoj kun mi, kaj ludi kun la senmezura lumo.

Infano.

Patro, kio estas tio en la chielo min gestvokanta per longa fingro?
Kaj kion ghi diras al mi la tutan tempon?

Patro.

Nenion, mia bebo, vi vidas en la chielo,
Kaj tute nenion ghi diras al vi – sed vi rigardu, mia bebo,
Rigardu tiujn mirigajn aferojn en la domoj, kaj vidu la monejojn malfermighi,
Kaj vidu la veturilojn, sin preparantaj rampi laŭ la stratoj kun varoj;
Chi tiuj, ha chi tiuj, kiel estimataj kaj alstrebitaj chi tiuj!
Kiel eniataj de la tuta mondo.

Poeto.

Fresha kaj rozruga la suno supreniras alten,
Flosadas la maro en malproksima bluo, rapidante tra siaj kanaloj,
Flosadas la vento super la brusto de l' maro, sin direktante al tero,
La granda konstanta vento de uesto au suduesto,
Flosanta tiel flosive kun lakte blanka shaumo sur la akvoj.

Sed mi ne estas la maro nek la rugha suno,
Mi ne estas la vento kun knabineca rido,
Ne la grandega vento kiu fortigas, ne la vento kiu vipas,
Ne la spirito kiu chiam vipas sian propran korpon al teruro kaj morto,
Sed mi estas kio nevidate venas kaj kantas, kantas, kantas,
Tiu kiu babilas en rojetoj kaj hastas en pluvoj sur la tero,
Tiu kiun la birdoj konas en la arbaro matene kaj vespere,
Kaj la bordosabloj konas kaj la siblanta ondo, kaj tiu standardo kaj flago,
Supre tie flirtanta kaj flirtanta.

Infano.

Ho patro, ghi vivas – ghi estas plena de homoj – ghi havas infanojn,
Ho nun shajnas al mi ke ghi parolas al siaj infanoj,
Mi audas ghin – ghi parolas al mi – ho ghi estas mirinda!
Ho ghi etendighas – ghi disvastighas kaj kuras tiel rapide – ho mia patro,
Ghi estas tiel largha, ghi kovras la tutan chielon.

Patro.

Chesu, chesu, mia fola bebo,
Kion vi diras chagrenas min, multe malplachas al mi,
Rigardu kun la ceteraj denove mi diras, rigardu ne standardojn kaj flagojn supre,
Sed la bone preparitajn pavimojn rigardu, kaj rimarku la solidmurajn domojn.

Standardo kaj Flago.

Parolu al la infano, ho poeto el Manhatano,
Al niaj infanoj chiuj, au norde au sude de Manhatano,
Montru chi-tage, lasante chiujn ceterajn, al ni precipe – kaj tamen ni ne scias kial,
Char kio ni estas, nuraj strioj da shtofoj, profitigante neniel,
Nur flirtantaj en la vento?

Poeto.

Mi audas kaj vidas ne striojn da shtofoj sole,
Mi audas la pashadon de armeoj, mi audas la pripostulantan sentinelon,
Mi audas la jubilajn kriojn de milionoj da homoj, mi audas Liberecon!
Mi audas la tamburojn bati kaj la trumpetojn blovi,
Mi mem movighas ekstere, rapide levighante, flugante tiam,
Mi uzas la flugilojn de la terbirdo kaj uzas la flugilojn de la marbirdo, kaj
 malsuprenrigardas kiel de altejo,
Mi ne fornegas la valoregajn rezultojn de paco, mi vidas homplenajn urbojn kun richo
 nekalkulebla,
Mi vidas sennombrajn bienojn, mi vidas bienistojn laborantaj en siaj kampoj au
 tenejoj,
Mi vidas mehhanistojn laborantaj, mi vidas konstruajhojn chie fundamentataj,
 konstruataj, au finitaj,
Mi vidas trajnojn da vagonoj rapide rapidantaj lau fervojaj trakoj, trenatajn de
 lokomotivoj,
Mi vidas la magazenojn, deponejojn, de Bostono, Baltimoro, Charlestono, Nov-Orleano,
Mi vidas malproksime en la Okcidento la grandegan regionon de greno, mi restas iom
 shvebante,
Mi pasas al la lignarbaroj de la Nordo, kaj denove al la Suda bieno, kaj denove al
 Kalifornio;
Traflugante la tuton, mi vidas la nekalkuleblan profiton, la aferoplenajn homamasojn,
 lukritajn salajrojn,
Vidas la Identecon formitan el tridek ok spacoplenaj kaj fieraj Shtatoj (kaj multe pli
 venontaj),
Vidas fortikajhojn sur la bordoj de havenoj, vidas ŝipojn veturantaj enen kaj elen;
Tiam super chio (jes! jes!), mia malgranda kaj plilongigita flago, glavforma,
Rapide suprenkuras, indikante militon kaj defion – kaj nun la hisiloj jam levis ghin,
Flanko de mia standardo, largha kaj blua, flanko de mia stela standardo,
Formetanta pacon tra la tuta maro kaj lando.

Standardo kaj Flago.

Ankorau pli laute, pli akute, pli forte, bardo! ancorau pli foren, pli vasten penetru!
Ne plu niaj infanoj rigardu nin richo kaj paco sole,
Ni povas esti teruro kaj buchado, kaj estas tia nun,
Ne nun ni estas iu el chi tiuj spacohavaj kaj fieraj Shtatoj (nek iuj kvin, nek dek),
Nek vendejo nek deponejo ni, nek monbanko en la urbo,

Sed chi tiuj kaj chio, kaj la bruna kaj etendighanta lando, kaj la minoj malsupre, estas
niaj,
Kaj la bordoj de la maro estas niaj, kaj la riveroj, grandaj kaj malgrandaj,
Kaj la kampoj kiujn ili akvumas, kaj la rikoltoj kaj la fruktoj estas niaj,
Golfoj kaj kanaloj kaj ŝipoj, veturantaj enen kaj elen estas niaj – dum ni tra chio,
Tra la regiono etendita malsupre, la tri au kvar milionoj da kvadrataj mejloj, la chefurboj,
La kvardek milionoj da homoj – ho bardo! en vivo kaj morto suverena,
Ni, ghuste ni, de nun elparadas mastre, alte supre,
Ne por la nuntempo sole, por mil jaroj, kantantaj per vi,
Chi tiun kanton al la animo de unu kompatinda infaneto.

Infano.

Ho mia patro, mi ne shatas la domojn,
Ili neniam estos al mi ia afero, nek shatas mi monon,
Sed supreniri tien mi shatus, ho patro kara, tiun standardon mi shatas,
Tiu flago mi volus esti kaj devas esti.

Patro.

Infano mia vi plenigas min per angoro,
Esti tiu flago estus tro terura,
Malmulte vi scias kio ghi estas chi tagon, kaj post chi tago, por chiam,
Ghi estas gajni nenion, sed riski kaj defii chiun aferon,
Antaue stari antau militoj – kaj ho tiaj militoj! – kiel vi rilatas al ili?
Kun pasioj de demonoj, buchado, antautempa morto?

Standardo.

Demonojn kaj morton do mi kantas,
Enmetos chion, jes chion enmetos mi, glavoforma flago por milito,
Kaj plezuro nova kaj ekstaza, kaj la babilata sopiro de infanoj,
Kunmiksita kun la sonoj de la paca lando kaj la likva lavo de la maro,
Kaj la nigraj ŝipoj batalantaj sur la maro, envolvitaj en fumo,
Kaj la glacia malvarmo de la fora, fora nordo, kun susurantaj cedroj kaj pinoj,
Kaj la zumado de tamburoj kaj la sono de soldatoj marshantaj, kaj la varmega suno,
brilanta sude,
Kaj la plaghvagoj, kombantaj tra la plagho sur mia Orienta bordo, kaj sur mia Okcidenta
bordo same,
Kaj chio inter tiuj bordoj, kaj mia chiamkuranta Misisipo kun fleksoj kaj faloj,
Kaj miaj Iliojasaj kampoj, kaj miaj Kansasaj kampoj, kaj miaj kampoj de Misurio,
La Kontinento, dedichante la tutan identecon, ne flankenmetante atomon,
Envershigu! dronigu kio demandas, kio kantas, per chio kaj la produkto de chio,
Kunfandante kaj tenante, pretendante, vorante la tuton,
Ne pli per tenera lipo, nek muzika labiala sono,
Sed el la nokto elighante por chiam, nia vocho ne plu persvadema,
Grakanta kiel korvoj chi tie en la vento.

Poeto.

Miaj membroj, miaj vejnoj dilatighas, mia temo estas klara finfine,
Standardo tiel vasta, antaŭvenanta el la nokto, mi kantas vin fieraj kaj rezoluta,
Mi trarompas kie mi atendis longe, tro longe, surdigita kaj blindigita,
Mia audado kaj lango jam venis al mi (infaneto instruis min),
Mi audas de supre, ho flago de milito, vian ironian vokon kaj postulon,
Nesensiva! nesensiva! (tamen mi chiuokaze chantas vin), ho standardo!
Ne domoj de paco ja vi estas, nek iom da nek ilia tuta prospero (se necesas, vi havos
denove chiujn tiujn domojn por detruj ilin,
Vi pensis ne detruj tiujn valorajn domojn, starantajn firme, plenajn de komforto,
konstruitajn per mono,
Chu ili povas stari firme, do? ne ekzistas horo kiam vi ne estas super ili kaj chiuj staras
firme);
Ho standardo, ne mono tiel valorega vi estas, ne bienaj produktoj vi, nek la materiala
bona nutrajho,
Nek bonegaj staplajhoj, surterigitaj sur varfoj el la ŝipoj,
Nek la superbaj ŝipoj kun velmovado au vapormovado, prenantaj kaj portantaj
kargojn,
Nek mashinaroj, veturiloj, komerco, nek enspezoj – sed vi kiel de nun mi vidas vin,
Suprenkuranta el la nokto, portanta vian amason da steloj (chiam plivastighantaj steloj),
Apartiganto de tagigho vi, tranchanta la aeron, tushata de la suno, mezuranta la chielon,
(Pasio vidata kaj sopirata de unu kompatinda infaneto,
Dum aliaj restas okupitaj au saghe parolantaj, chiam instruantaj ŝparemon,
ŝparemon);
Ho vi tie supre! ho flago! kie vi serpentumas kiel serpento, siblante tiel kurioze,
Ekster atingo, ideo sole, tamen furioze pribatalata, je risko de sanga morto, amata de mi,
Tiel amata – ho vi standardo, estranta la tagon per steloj alportitaj el la nokto,
Senpreza, celo de okuloj, super chio kaj postulanta chion – (absoluta posedanto de
chion) – ho standardo kaj flago!
Mi ankau forlasas la ceteron – granda kiel ghi estas, ghi estas nenio – domoj, mashinoj
estas nenio – mi ne vidas ilin,
Mi vidas nur vin, ho militema flago! ho standardo tiel largha, kun strioj, mi kantas vin
sole,
Flirtanta tie supre en la vento.

LEVIGHU HO TAGOJ EL VIAJ NESONDEBLAJ PROFUNDOJ

Levighu ho tagoj el viaj nesondeblaj profundoj, ghis vi pli altcele, pli feroce impetas,
Longe por mia animo, malsatanta gimnastike, mi voris kion la tero donis al mi,
Longe mi vagis la arbarojn de la nordo, longe mi rigardis Niagaron vershanta,
Mi vojaghadis tra la prerioj kaj dormis sur ilia brusto, mi transiris la Nevadojn, mi
transiris la platajhojn,
Mi supreniris la turantajn rokojn lau Pacifiko, mi elvelis maren,
Mi velis tra la shtormo, mi estis refreshigita de la shtormo,

Mi rigardis kun ghojo la minacantajn faukegojn de la ondoj,
Mi rimarkis la blankajn krestojn kie ili kuregis tiel alten kuspighante,
Mi audis la venton fifranta, mi vidis la nigrajn nubojn,
Vidis de malsupre kio levighis kaj supreniris (ho superba! ho sovagha kiel mia koro,
kaj potenca!),
Audis la dauran tondron dum ghi mughegis post la fulmo,
Rimarkis la maldikajn kaj zigzagajn fadenojn da fulmo dum subite kaj rapide meze de la
bruego ili chasis unu la alian trans la chielon;
Chi tiujn, kaj tiajn kiel chi tiuj, mi, ekzaltita, vidis – vidis kun miro, tamen pensema kaj
mastreca,
La tuta minacanta potenco de la globo levighinta chirkau mi,
Tamen tie kun mia animo mi manghis, mi manghis kontente, orgojle.

2

Ghi estis bone, ho animo – ghi estis bona preparo kiun vi donis al mi,
Nun ni antaueniras nian latentan kaj pli ampleksan malsaton plenigi,
Nun ni eliras ricevi kion la tero kaj maro neniam donis al ni,
Ne tra la potencaj arbaroj ni iras, sed tra la pli potencaj urboj,
Io por ni vershighas nun pli ol Niagaro vershighas,
Torentoj da homoj (fontoj kaj rojoj de la Nordokcidento, chu vi estas ja neelcherpeblaj?),
Kio, kompare kun pavimoj kaj hejmbienoj chi tie, kio estis tiuj shtormoj de la montoj kaj
maroj?
Kion, kompare kun pasioj kiujn mi observas chirkau mi hodiau, atingis la maro?
Chu la vento fifradis la fifron de morto sub la nigraj nuboj?
Jen! de profundoj pli nesondeblaj, io pli letala kaj sovagha,
Manhatano levighanta, antaueniranta kun minacanta fronto – Cincinato, Chikago,
malkatenitaj;
Kio estis tiu hulo kiun mi vidis sur la oceano? rigardu kio venas chi tien,
Kiel ghi grimpas per audacaj piedoj kaj manoj – kiel ghi kuregas!
Kiel la vera tondro mughegas post la fulmo – kiel helaj la flagroj de fulmo!
Kiel Demokratio kun urgha vengha sinteno pashegadas, montrite tra la mallumo per tiuj
flagroj de fulmo!
(Tamen lamentan ululon kaj mallautan plorsingulton mi imagis ke mi audis tra la
mallumo,
En pauzo de la surdiga konfuzo.)

3

Tondradu! pashegadu, Demokratio! frapu per vengha frapo!
Kaj pli alten levighu vi ol iam antaue, ho tagoj, ho urboj!
Impetu pli peze, pli peze ancorau, ho shtormoj! vi utilis al mi,
Mia animo, preparita en la montoj, sorbas vian senmortan fortan nutrajhon,
Longe jam mi iris tra miaj urboj, lau miaj kamparaj vojoj tra bienoj, nur duonsatigita,
Unu dubo nauze ondadante serpente, rampis sur la tero antau mi,
Konstante antaunte miajn pashojn, ofte min ekatakante, ironie softe siblante;
La urbojn kiujn mi tiel multe amis mi forlasis, mi rapidis al la certecoj taugaj al mi,

Malsatante, malsatante, malsatante por praaj energioj kaj la sentimeco de Naturo,
Mi refreshigis min per ghi sola, mi povis ghui ghin solan,
Mi atendis la elrompighon de la enfermita fajro – sur la akvo kaj aero mi atendis longe;
Sed nun mi ne plu atendas, mi estas plene satigita, mi estas supersatigita,
Mi jam vidis la veran fulmon, mi vidis miajn urbojn elektrajn,
Mi jam vivis vidi homon elrompighi kaj militeman Amerikon levighi,
De nun mi ne plu serchos la nutrajhon de la nordaj solecaj ventoj,
Ne plu la montojn vagados au velos la shtorman maron.

VIRGINIO – LA OKCIDENTO

La nobelan sinjoron, alvenintan al malbonaj tagoj,
Mi vidis kun mano levita, minacanta, svinganta,
(Memorajhoj malnovaj estas suspenditaj, amo kaj fido estas suspenditaj),
La frenezan tranchilon kontrau la Patrino de Chiuj.

La nobelan filon sur tendenecaj piedoj antauenirantan,
Mi vidis, el la lando de prerioj, lando de la Ohiaj akvoj kaj de Indianio,
Al la savo la rezolutan giganton hastigi siajn abundajn idojn,
Vestitajn en bluo, portantajn siajn fidindajn fusilojn sur la shultroj.

Tiam la Patrino de Chiuj, per trankvila vocho parolanta,
Pri vi Ribelema (mi shajnis audi shin diri), kial strebi kontrau mi, kaj kial voli forpreni
mian vivon?
Kiam vi mem chiam provizas min defendi?
Char vi provizis min per Washingtono – kaj nun chi tiuj ankau.

URBO DE SHIPOJ

Urbo de shipoj!
(Ho la nigraj shipoj! ho la ferocaj shipoj!
Ho la belaj akrapruaj vaporshipoj kaj velshipoj!)
Urbo de la mondo! (char chiuj rasoj estas chi tie,
Chiuj landoj de la tero faras kontribuojn chi tie),
Urbo de la maro! urbo de hastantaj kaj scintilantaj tajdoj!
Urbo, kies ghjojplenaj tajdoj konstante flusas au malflusas, impetante enen kaj elen kun
kirlighoj kaj shaumo!
Urbo de varfoj kaj staploj – urbo de altaj fasadoj el marmoro kaj fero!
Fiera kaj pasia urbo – spirita, freneza, ekstravaganca urbo!
Suprensaltu, ho urbo – ne por paco sola, sed estu ja vi mem, militema!
Ne timu – submetighu al neniam modeloj krom viaj propraj, ho urbo!
Vidu min – enkorpigis min, kiel mi enkorpigis vin!
Mi malakceptis nenion kion vi proponis al mi – kiun vi adoptis, mi adoptis,
Bonan au malbonan mi neniam pridubas vin – mi amas chion – mi ne kondamnas ian
aferon,

Mi kantas kaj solenas chion kio estas via – tamen pacon ne plu,
En paco mi kantis pacon, sed nun la tambur' de milito estas mia,
Milito, rugha milito estas mia kanto tra viaj stratoj, ho urbo!

LA HISTORIO DE LA CENTJARULO

(Volontulo de 1861-2, che Parko Vashingtona, Bruklino, helpanta la Centjarulon.)

Donu al mi la manon, maljuna Revoluciulo,
La deklivosupro estas proksime, nur kelkajn pashojn (faru lokon, sinjoroj),
Supren lau la pado vi bone sekvis min, malgrau viaj cent jaroj kaj pli,
Vi povas ja marshi, maljunulo, kvankam viaj okuloj estas preskau finitaj,
Viaj kapabloj servas vin, kaj baldau mi devas igi ilin servi min.

Ripozu dum mi al vi diros kion signifas la amaso chirkau ni,
Sur la ebenajho malsupre varbitoj trejnighas kaj ekzercighas,
Tie estas la barakejo, unu regimento foriros morgau,
Chu vi audas la oficiojn doni siajn ordonojn?
Chu vi audas la tintegon de la musketoj?

Nu kio ekestas al vi nun, maljunulo?
Kial vi tremas kaj krochas mian manon tiel konvulsie?
La trupoj nur trejnighas, ili estas ancorau chirkauitaj de ridetoj,
Chirkau ili apude la bone vestitaj amikoj kaj la virinoj,
Dum belega kaj varma la posttagmeza suno brilas malsupren,
Verda la somermeza verdajho kaj fresha blovas la ludanta venteto,
Tra la fieraj kaj pacemaj urboj kaj la markolo intere,
Sed trejnado kaj parado estas finitaj, ili remarshas al la barako,
Nur audu tiun aprobon de manoj! audu, kia aplaudado!

Forirante, la amasoj nun apartighas kaj disighas – sed ni, maljunulo,
Ne por nenio mi kondukis vin chi tien – ni devas resti,
Vi por paroli viavice, kaj mi por auskulti kaj diri.

La Centjarulo.

Kiam mi krochis vian manon, ghi ne estis kun teruro,
Sed subite vershighante chirkau mi chiuflanke,
Kaj malsupre tie kie la knaboj trejnighadis, kaj supren lau la deklivoj ili kuris,
Kaj, kie la tendoj estas starigitaj, kaj kie ajn vi vidas suden kaj sud-eosten, kaj sud-uesten,
Trans altajhojn, trans malaltajhojn, kaj el la randoj de arbaroj,
Kaj lau la bordoj, en marcho (nun supre plenigita) venis denove kaj subite furiozis,
Kiel antau okdek kvin jaroj nenia nura parado, ricevita kun aplaudo de amikoj,
Sed batalo en kiu mi mem partoprenis – jes, kvankam antau longa tempo, mi en ghi

partoprenis,
Marshante tiam chi tiun altajhon, chi tiun saman grundon.

Jes, chi tio estas la grundo,
Miaj blindaj okuloj, ghuste dum mi parolas, ghin vidas rehomigita el la tomboj,
La jaroj retroiras, pavimoj kaj dignaj domoj malaperas,
La krudaj fortikajhoj reaperas, la malnovaj ringegpafiloj estas muntitaj,
Mi la vicojn vidas da levita grundo, sin etendantaj de la rivero al la golfo,
Rimarkas mi la vidon de la akvoj, rimarkas la altejojn kaj deklivojn,
Chi tie ni bivakadis, tio estis chi tiun tempon en somero ankau.

Dum mi parolas mi chion rememoras, rememoras la Deklarajhon,
Ghi estis legata chi tie, la tuta armeo paradis, ghi estis al ni legata chi tie,
De sia stabo chirkauite, la Generalo en la mezo, li suprentenis sian elingitan glavon,
Ghi scintilis en la suno en la plena vido de l' armeo.

Ghi estis audaca ago tiam — la anglaj militshipoj jhus alvenis,
Ni povis rigardi ghis la ekstera golfo kie ili staris ankrite,
Kaj la transportajn shipojn, svarmantajn per soldatoj.

Kelkajn tagojn plu kaj ili alterighis, kaj tiam la batalo.

Dudek mil estis alportitaj kontrau ni,
Veterana forto, provizita per bona artilerio.

Mi ne diras nun la tuton de l' batalo,
Sed unu brigado, frue en la antautagmezo ordonita antauen ataki la rughfrakulojn,
Pri tiu brigado mi diras, kaj kiel firme ghi marshis,
Kaj kiel longe kaj bone ghi staris, alfrontante morton.

Kiuj, vi pensas, estis marshantaj firme, severe alfrontantaj morton?
Estis la brigado de la plej junaj viroj, forta je dumil,
Edukitaj en Virginio kaj Marilando, kaj la plejparto el ili konataj persone al la Generalo.

Brave antauen ili iris per rapida pashado al la akvoj de Govanuso,
Ghis subite, neobservite de defilintoj tra la arbaro, dumnokte penetrata,
La Britoj avancantaj, chirkauvenante de la oesto, feroce pafante per siaj pafiloj,
Tiu brigado de la plej junaj estis forbarita kaj en la manoj de l' malamiko.

La General' observis ilin de tiu chi altajho,
Ili faris adajn urghajn penojn rompi sian medion,
Poste sin dense kuntiris, tre kompaktaj, ilia flago flirtanta en la mezo,
Sed ho de la altajhoj kiel la kanonoj malabundigis kaj malabundigis ilin!

Ghi nauzas min ankorau, tiu buchado!
Mi vidis la shviton kolektighi gute sur la vizagho de l' Generalo.
Mi vidis kiel li tordis la manojn angore.

Dume la Britoj manovris eltiri nin por altrudita batalo,
Sed ni ne kuraghis fidi la shancojn de altrudita batalo.

Ni batalis la batalon en tachmentoj,
Atakelirante ni batalis che kelkaj lokoj, sed en chiu la shanco estis kontrau ni,
Nia malamiko, avancante, konstante superante, repushis nin al la terajhoj sur tiu chi
altajho,
Ghis ni turnis nin, minacante tie chi, kaj tiam li forlasis nin.

Tiu estis la eliro de la brigado de la plej junaj viroj, forta je dumil,
Malmultaj revenis, preskau chiu restas en Bruklino.

Tiu kaj tie chi la unua batalo de mia Generalo,
Neniaj observantaj virinoj, nek sunbrilo por ghui, ghi ne finighis kun aplaudado,
Neniu aplaudis chi tie tiam.

Sed en mallumo en nebulo sur la tero sub malvarma pluvo,
Lacaj tiun nokton ni kushis frustritaj kaj morozaj,
Dum malestime ridis multaj arogantaj lordoj, bivakantaj kontrau ni,
Sufiche audproksimaj, festenantaj, kuntintigantaj vinglasojn je sia venko.

Tiel malvigle kaj malseke kaj alia tago,
Sed la nokton de tiu, nebulo levighinta, pluvo chesinta,
Silenta kiel fantomo dum ili pensis ke ili certe venkos lin, mia Generalo retretis.

Mi vidis lin che la riverflanko,
Malsupre che la pramo, lumigita de torchoj, hastiganta la enshipighon,
Mia Generalo atendis ghis la soldatoj kaj vunditoj estis chiu transpasintaj,
Kaj tiam (estis jhus antau sunlevigho), chi tiuj okuloj vidis lin por la lasta fojo.

Chiu alia shajnis plenigita de malgajo,
Multaj sendube pensis pri kapitulaco.

Sed kiam mia Generalo pasis min,
Dum li staris en sia boato kaj rigardis en la direkto de la venanta suno,
Mi vidis ion malsaman ol kapitulacon.

Fino.

Sufiche, la historio de la Centjarulo finighas,
La du, la pasinteco kaj la nuntempo, intershanghighis,
Mi mem kiel liganto, kiel kantanto de granda estonteco, nun parolas.

Kaj chu chi tiu estas la grundo kiun Vashingtono tretis?
Kaj tiuj akvoj kiujn mi apatie tage transiras, chu chi tiuj estas la akvoj kiujn li transiris?
Tiel rezoluta en malvenko kiel aliaj generaloj en iliaj plej fieraj triumfoj?

Mi devas kopii la historion, kaj sendi ghin orienten kaj okcidenten,
Mi devas konservi tiun rigardon kiel ghi lumis sur vin riverojn de Bruklino.

Vidu – dum la jara rondiro revenas, la fantomoj revenas,
Estas la 27a de Augusto kaj la Britoj alterighis,
La batalo komencighas kaj iras kontrau ni, vidu tra la fumo la vizaghon de Vashingtono,
La brigado de Virginio kaj Marilando elmarshis por interkapti la malamikon,
Ili estas forbaritaj, murdema artilerio de la altajhoj direktighas sur ilin,
Vico post vico falas dum super ili silente velkas la flago,
Baptita tiun tagon en la sangaj vundoj de multaj junaj viroj,
En morto, malvenko, kaj la larmoj de fratinoj kaj patrinoj.

Ha, altajhoj kaj deklivoj de Bruklino! mi perceptas ke vi estas pli valoraj ol viaj
posedantoj supozis;
Meze de vi staras bivako tre malnova,
Staras por chiam la bivako de tiu morta brigado.

KAVALERIO TRANSIRANTA TRAVADEJON

Linio en longa vico kie ili sinuas inter verdaj insuloj,
Ili prenas serpentan kurson, iliaj armiloj scintilas en la suno – auskultu la muzikan
tinton,
Vidu la arghentan riveron, en ghi la plaudantaj chevaloj lantante haltas por trinki,
Vidu la brunvizaghajn virojn, chiu grupo, chiu persono bildo, la indiferentan sidon sur
la seloj,
Kelkaj eliras sur la kontraua bordo, aliaj jhus eniras la travadejon – dum,
Skarlataj kaj bluaj kaj neghe blankaj,
La identflagoj flirtas gaje en la vento.

BIVAKO SUR MONTA FLANKO

Mi vidas antau mi nun vojaghantan armeon haltintan,
Malsupre fekunda valo sternita, kun tenejoj kaj la fruktarbaroj de somero,
Malantaue, la terasaj flankoj de monto, abruptaj, en lokoj alten levighantaj,
Rompitaj, kun rokoj, kun alkrochantaj cedroj, kun altaj figuroj malklare vidataj,
La multaj kampadfajroj sternitaj apude kaj fore, kelkaj supre sur la monto,
La ombrecaj formoj de viroj kaj chevaloj, aperegantaj, grandaj, flagretantaj,
Kaj super chio la chielo – la chielo! tute, tute neatingeblaj, sternitaj, ekaperantaj, la
eternaj steloj.

ARMEA KORPUSO MARSHANTA

Kun ghia nubo da ekbatalantoj antaue,

Kun jen la sono de unuopa pafo, knalanta kiel vipo, kaj jen malregula salvo,
La svarmantaj vicoj shovighas antauen kaj antauen, la densaj brigadoj shovighas
antauen,
Scintilante malklare, penegante sub la suno – la polvkovritaj viroj,
Kolumne levighas kaj mallevighas je la ondado de la tero,
Kun artilerio intersternita – la radoj rulsonadas, la chevaloj shvitas,
Dum la armea korpuso antaueiras.

CHE LA FLAGRA FLAMO DE L' BIVAKO

Che la flagra flamo de l' bivako,
Procesio preterpasanta chirkau mi, solena kaj dolcha kaj lanta – sed unue mi rimarkas,
La tendojn de la dormanta armeo, la malklaran konturon de la kampoj kaj arbaro,
La malhelon, lumigatan de lokoj de ekbruligita fajro, la silenton,
Kiel fantomon, fore au apude hazardan figuron movighantan,
La arbustojn kaj arbojn (kiam mi levas la okulojn, ili shajnas kashe rigardi min),
Dum preterpasas en procesio pensoj, ho teneraj kaj mirindaj pensoj,
De vivo kaj morto, de hejmo kaj la pasintaj kaj amataj, kaj de tiuj kiuj estas
malproksimaj;
Solena kaj lanta procesio tie dum mi sidas sur la tero,
Che la flagra flamo de l' bivako.

VENU CHI TIEN DE LA KAMPOJ, PATRO

Venu chi tien de la kampoj, patro, jen letero de nia Pechjo,
Kaj venu al la antaŭa pordo, patrino, jen letero de via kara filo,
Jen, estas autuno,
Jen, kie la arboj, pli malhele verdaj, pli flavaj kaj pli rughaj,
Friskigas kaj dolchigas la vilaghojn de Ohio per folioj, flirtantaj en la modera vento,
Kie pomoj, maturaj en la fruktarbaroj, pendas kaj vinberoj sur la pergolitaj vitoj,
(Chu vi flaras la odoron de la vinberoj sur la vitoj?
Chu vi flaras la fagopiron kie la abeloj laste zumadis?)

Super chio, jen, la chielo tiel trankvila, tiel travida post la pluvo, kaj kun mirindaj nuboj,
Malsupre ankau, chio trankvila, chio vigla kaj bela, kaj la bieno bone prosperas.

Tie en la kampoj chio bone prosperas,
Sed nun de la kampoj venu, patro, venu je la voko de la filino,
Kaj venu al la eniro, patrino, al la antaŭa pordo venu tuj.

Rapide kiel shi povas, shi hastas, io misaugura, shiaj pashoj tremante,
Shi ne lantas por glatigi la harojn nek ghustigi la chapon.

Malfermu la koverton rapide,
Ho tio ne estas la skribado de nia filo, tamen lia nomo estas subskribita,

Ho fremda mano skribas por nia kara filo, ho la trafita animo de la patrino!
Chio turnighas antaŭ shiaj okuloj, flagras per nigro, ŝi trafas la chefajn vortojn sole,
Frazojn rompitaĵajn, pafovundo en la brusto, kavaleria ekbatalo, alportita al la hospitalo,
Nun malsanega, sed baldaŭ plisanighos.

Ha nun la unuopa figuro por mi,
Meze de la multloĝata kaj riĉa Ohio kun ĉiuj ĝhiaj urboj kaj bienoj,
Malsane blanka je la vizagho kaj malvigla je la kapo, tre malforta,
Ĉe la framflanko de pordo klinighas.

Ne tiel funebru, kara patrino (la ĵhus plenkreskinta filino diras tra siaj plorsingultoj),
La malgrandaj fratinoj kunpremighas apude, senparolaj kaj konsternitaj),
Vidu, plej kara patrino, la letero diras, Pechjo baldaŭ plisanighos.

Ho ve la kompatinda knabo, li neniam plisanighos (nek eble bezonas plisanighi, tiu
kuragha kaj simpla animo),
Dum ili staras hejme ĉe la pordo, li estas jam morta,
La sola filo estas morta.

Sed la patrino bezonas plisanighi,
Ŝi kun maldika formo nun vestita en nigro,
Tage ŝiaj manghoj netushitaj, tiam nokte sporade dormanta, ofte maldormanta,
Meznokte maldormanta, ploranta, sopiranta per unu profunda sopiro,
Ho ke ŝi povu retirighi nerimarkite, silente de vivo eskapi kaj retirighi,
Sekvi, serĉi, esti kun ŝia kara morta filo.

GARDON STRANGAN MI TENIS SUR LA KAMPO UNU NOKTON

Gardon strangan mi tenis sur la kampo unu nokton;
Kiam vi mia filo kaj mia kamarado falis ĉe mia flanko tiun tagon,
Nur unu rigardon mi donis, kiun viaj karaj okuloj redonis per rigardo, kiun mi neniam
forĝesos,
Unu tusho de via mano al mia, ho knabo, suprenetendita dum vi kushis sur la tero,
Tiam antaŭen mi rapidis en la batalon, la egalkonkursan batalon,
Ĝhis, malfrue en la nokto delasite, al la loko finfine mi redirektis la vojiron,
Trovis vin en morto tiel malvarma, kara kamarado, trovis vian korpon, filo de
respondantaj kisoj (neniam denove sur la tero respondantaj),
Nudigis vian vizaghon en la stellumo, kurioza la sceno, friske blovis la modera
noktovento,
Longe tie kaj tiam garde mi staris, malhele ĉirkau mi la batalkampojn sternighanta,
Gardo mirinda kaj gardo dolĉa tie en la aroma silenta nokto,
Sed nenia larmo, eĉ ne longe tirata suspiro, longe, longe mi fiksrigardis,
Tiam sur la tero, parte klinighanta, sidis ĉe via flanko, apogante la mentonon en la
manoj,
Pasigante dolĉajn horojn, senmortajn kaj mistikajn horojn kun vi, plej kara kamarado –
nenia larmo, nenia vorto,

Gardo de silento, amo, kaj morto, gardo por vi, mia filo kaj mia soldato,
 Dum daure silente steloj supre, orienten novaj supren kashiris,
 Gardo fina por vi, kuragha knabo (mi ne povis savi vin, rapida estis via morto,
 Mi fidele amis vin kaj prizorgis vin vivanta, mi pensas, ni certe renkontighos denove),
 Ghis, je l' plej malfrua restado de la nokto, ja jhus kiam aperis la tagigho,
 Mian kamaradon mi volvis en lian lankovrilon, bone envolvis lian formon,
 Faldis la lankovrilon bone, shovante ghin zorge super kapon kaj zorge sub piedojn,
 Kaj tie kaj tiam kaj banata de la levighanta suno, mian filon en lian tombon, en lian
 krude fositan tombon mi metis,
 Finante mian gardon strangan che tio, gardon de nokto kaj bataalkampo malhela,
 Gardon por knabo de respondantaj kisoj (neniam denove sur la tero respondantaj),
 Gardon por kamarado rapide mortigita, gardon kiun mi neniam forgesas, kiel dum la
 tago plihelighis,
 Mi levighis de la malvarma grundo kaj faldis mian soldaton bone en lian lankovrilon,
 Kaj enterigis lin kie li falis.

MARSHO EN LA VICOJ FORTE PREMATAJ, KAJ LA VOJO NEKONATA

Marsho en la vicoj forte premataj, kaj la vojo nekonata,
 Kurso tra densa arbaro kun obtuzaj pashoj en la mallumo,
 Nia armeo malsukcesigita je perdo severa, kaj la moroza restajho retretanta,
 Ghis post noktomezo glimetas sur nin la lumiloj de malhele lumita konstruajho,
 Ni venas al aperta spaco en la arbaro, kaj haltas che la malhele lumita konstruajho,
 Ghi estas granda malnova preghejo che la vojkrucigho, nun improvizita hospitalo,
 Enirante nur por minuto, mi vidas vidajhon preter chiuj bildoj kaj poemoj iam faritaj,
 Ombroj de la plej profunda nigro, nur lumigataj de movighantaj kandeloj kaj lampoj,
 Kaj de unu granda pecha torcho, senmova kun sovagha rugha flamo kaj nuboj de fumo,
 Per tiuj, amasojn, grupojn da formoj svage mi vidas sur la planko, kelkajn en la benkejoj
 kushigitajn,
 Che miaj piedoj pli klare soldaton, nuran junulon, en danghero morti de sangado (li
 estas trafita en la abdomeno),
 Mi shtopas la sangadon provizore (la vizagho de la junulo estas blanka kiel lilio),
 Tiam, antau ol mi foriras, mi chirkaurigardas la tutan scenon, deziras ghin tutan sorbi,
 Vizaghoj, specoj, sintenoj preter priskribo, la plejparto en obskuro, kelkaj el ili mortaj,
 Kirurgoj operaciantaj, helpantoj tenantaj lumilojn, la odoro de etero, la odoro de sango,
 La amaso, ho la amaso de la sangaj formoj, la korto ekstere ankau plenigita,
 Kelkaj sur la nuda grundo, kelkaj sur tabuloj au brankardoj, kelkaj en la agonio
 shvitantaj,
 Harzarda kricho au krio, la kriataj ordonoj au alvokoj de la kuracisto,
 La scintilo de la malgrandaj shtalaj instrumentoj, kaptanta la glimadon de la torchoj,
 Chi tiujn mi reprenas dum mi kantas, mi revidas la formojn, mi flaras la odoron,
 Tiam audas ekstere la ordonojn donatajn, Envicighu, miaj soldatoj, envicighu;
 Sed unue mi klinighas al la mortanta junulo, liaj okuloj malfermitaj, duonrideton al mi li
 donas,
 Tiam la okuloj fermighas, trankvile fermighas, kaj mi forrapidas al la mallumo,

Rekomencante, marshante, chiam en mallumo marshante, antauen en la vicoj,
La nekonatan vojon ankoraŭ marshante.

VIDAJHO EN LA TENDARO CHE LA TAGIGHO GRIZA KAJ MALHELA

Vidajho en la tendaro che la tagigho griza kaj malhela,
Dum de mia tendo mi elighas tiel frue sendorma,
Dum malrapide mi marshas en la friska fresha aero la padon apud la hospitala tendo,
Tri formojn mi vidas kushantaj sur brankardoj, portitajn tien eksteren, neprizorgate
kushantaj,
Sur chiuj la kovrilo sternita, ampleksa bruneta lana kovrilo,
Griza kaj peza kovrilo, enfaldanta, kovranta chion.

Scivola mi haltas kaj silente staras,
Tiam per legheraj fingroj mi de la vizagho de la plej proksima la unua nur levas la
kovrilon;
Kiu vi estas, maljunulo, tiel malgrasa kaj malgaja, kun forte grizighintaj haroj, kaj karno
tute kava chirkau la okuloj?
Kiu vi estas, mia kara kamarado?

Tiam al la dua mi pashas – kaj kiu vi estas mia infano kaj karulo?
Kiu vi estas dolcha knabo kun vangoj ankoraŭ florantaj?

Tiam al la tria – vizagho nek infana nek maljuna, tre trankvila, kiel el bela flaveblanka
eburo,
Juna viro, mi pensas ke mi konas vin – mi pensas, chi tiu vizagho estas la vizagho de la
Kristo mem,
Morta kaj dia kaj frato de chiuj, kaj chi tie denove li kushas.

DUM PENE MI VAGIS LA ARBAROJN DE VIRGINIO

Dum pene mi vagis la arbarojn de Virginio,
Je la muziko de susurantaj folioj, shovataj de miaj piedoj (char estis autuno),
Mi rimarkis che la piedo de arbo la tombon de soldato,
Mortige vundita li kaj enterigita dum la retreto (facile chion mi povis kompreni),
La halto de tagmeza horo, kiam ek! nenia tempo perdi – tamen chi tiu signo lasita,
Sur tabelo skribachita kaj najlita sur la arbo che la tombo,
Kuragha, atenta, fidela, kaj mia amanta kamarado.

Longe, longe mi meditas, tiam sur mian vojon iras vagi,
Multaj shanghplenaj sezonoj sekvontaj, kaj multaj scenoj de vivo,
Tamen fofoje tra shanghplenaj sezonoj kaj scenoj, subite, sola, au en la homplena
strato,

Venas antau min la tombo de la nekonata soldato, venas la surskribo kruda en la arbaro
de Virginio,
Kuragha, atenta, fidela, kaj mia amanta kamarado.

NE LA PILOTO

Ne la piloto taskis sin venigi sian shipon havenen, kvankam repushita kaj multajn fojojn
malhelpita,
Ne la vojtrovanto, penetrante landinternen lace kaj longe,
De dezertoj sekegigite, de neghoj fridegigite, de riveroj malsekigite, persistas ghis li
atingassian celitan lokon,
Pli ol mi taskis min, atentite au neatentite, komponi marshon por chi tiuj Shtatoj,
Por batalalvoko, incitanta sin armi, se necese, jarojn, jarcentojn de nun.

JARO KIU TREMIS KAJ SHANCELIGHIS SUB MI

Jaro kiu tremis kaj shancelighis sub mi!
Via somera vento estis sufiche varma, tamen la aero kiun mi spiris min frostigis,
Densa tenebro falis tra la sunbrilo kaj malheligis min,
Chu mi devas shanghi miajn triumfajn kantojn? mi diris al mi mem,
Chu mi ja devas lerni chanti la malvarmajn lamentojn de la malhelpitaj?
Kaj morozajn himnojn de malvenko?

LA VUNDPANSANTO

1

Maljunulo klinighanta, mi venas inter novajn vizaghojn,
Jarojn retrorigardante resumante responde al infanoj,
Venu diri al ni, maljunulo, tiel de junuloj kaj junulinoj, kiuj amas min,
(Incitita kaj kolera, mi intencis bati la alarmilon, kaj urghi al senkompata milito,
Sed baldau miaj fingroj fiaskis al mi, mia vizagho velkis, kaj mi resignaciis,
Sidi apud la vunditoj kaj kvietigi ilin, au silente maldormi apud la mortaj);
Jarojn fore de chi tiuj scenoj, de chi tiuj furiozaj pasioj, chi tiuj shancoj,
De nesuperitaj herooj (chu unu flanko estis tiel kuragha? la alia estis egale kuragha);
Nun estu atestanto denove, pentru la plej potencajn armeojn de la tero,
Pri tiuj armeoj tiel rapidaj kaj mirindaj, kion vi vidis por diri al ni?
Kio restas kun vi plej laste kaj plej profunde? pri kuriozaj panikoj,
Pri forte batalataj interbataloj au grandegaj sieghoj, kio plej profunde restas?

2

Ho junulinoj kaj junuloj kiujn mi amas kaj kiuj amas min,

Kiujn vi petas el miaj tagoj, tiujn la plej strangajn kaj subitajn via parolado revokas,
Soldato vigla, mi alvenas post longa marŝo, kovrite de ŝvito kaj polvo,
Ghustatempe mi venas, plonĝas en la batalon, laute krias en la impeto de sukcesa
sturmo,
Eniras la kaptitan remparon – tamen jen, kiel rapidfluanta rivero ili malaperadas,
Pasas kaj estas for ili malaperadas – mi ne paroladas pri la dangheroj au ghojoj de
soldatoj,
(Ambau mi bone memoras – multe la malfacilajhoj, malmulte la ghojoj, tamen mi estis
kontenta).

Sed en silento, en la projekcioj de songhoj,
Dum la mondo de gajno kaj ŝajno kaj gajo dauras,
Tiel baldau kio finighis forgesita, kaj ondoj lavas la spurojn for de la sablo,
Per ĉarniraj genuoj revenante, mi eniras la pordojn (dum por vi tie supre,
Kiu ajn vi estas, sekvu sen bruo kaj estu de forta kuragho).

Portante la bandaghojn, akvon, kaj spongon,
Rekte kaj rapide al miaj vunditoj mi iras,
Kie ili kushas sur la tero, post la batalo enportite,
Kie ilia senpreza sango rughigas la herbon la teron,
Au al la vicoj de la hospitala tendo, au sub la tegmentita hospitalo,
Al la longaj vicoj da litetoj lau la tuta longo de chiu flanko mi revenas,
Al chiu kaj chiuj unu post la alia mi alproksimighas, ne unu mi maltrafas,
Helpanto sekvas, tenante pleton, li portas forjhetajhsitelon,
Baldau plenigotan per koagulaĵhaj ĉifonoj kaj sango, malplenigotan, kaj replenigotan.

Mi antaueniras, mi haltas,
Per ĉarniraj genuoj kaj firma mano por pansi vundoj,
Mi estas firma kun chiu, la ekdoloroj estas akraj tamen neeviteblaj,
Unu turnas al mi siajn petegantajn okulojn – kompatinda knabo! mi neniam konis vin,
Tamen mi pensas, mi ne povus rifuzi ĉi tiun momenton morti por vi se tio vin savus.

3

Antauen, antauen mi iras (malfermighu, pordoj de tempo! malfermighu, hospitalaj
pordoj!),
La dispremitan kapon mi pansas (kompatinda frenezigita mano, ne forshiru la
bandaghon),
La kolon de la kavaleriano kun la kuglo tute trae mi ekzamenas,
Malfacile la spirado stertoras, tute vitra jam la okulo, tamen vivo luktas forte,
(Venu dolĉa morto! estu persvadita ho bela morto!
En kompatato venu rapide.)

De la stumpo de la brako, la amputita mano,
Mi malfiksas la koagulaĵhan ĉarĉion, forigas la disaĵhojn, forlavas la puson kaj sangon,
Malantauen sur sia kapkuseno la soldato fleksighas kun kurba kolo kaj flankenfalanta
kapo,

Lia okuloj estas fermitaj, lia vizagho estas pala, li ne kuraghas rigardi la sangon
stumpon,
Kaj ankoraŭ ne rigardis ghin.

Mi pansas vundon en la flanko, profundan, profundan,
Nur tagon aŭ du pluajn, ĉar vidu la korpon, tute marasman kaj mortighantan,
Kaj la flavebluan vizaghon vidu.

Mi pansas la perforitan shultron, la piedon kun la kuglovundo,
Purigas tiun kun ronghanta kaj putra gangreno, tiel nauza, tiel abomena,
Dum la helpanto staras malantaŭe apud mi, tenante la pleton kaj sitelon.

Mi estas fidela, mi ne elĉerpighas,
La frakturita femuro, la genuo, la vundo en la abdomeno,
Ĉi tiujn kaj pli mi pansas per senemocia mano (tamen profunde en mia brusto fajro,
brulanta flamo).

4

Tiel en silento en la projekcioj de songhoj,
Revenante, rekomencante, mi tredas min tra la hospitaloj,
La lezitaĵoj kaj vunditaĵoj mi pacigas per kvietiga mano,
Mi sidas apud la senripozaj la tutan nokton, iuj estas tiel junaj,
Iuj tiom suferas, mi rememoras la sperton dolĉan kaj malgajan,
(La amaj brakoj de multaj soldatoj ĉirkaŭ ĉi tiu kolo krucighis kaj kushis,
La kiso de multaj soldatoj restas sur ĉi tiuj barbaj lipoj).

LONGE, TRO LONGE, AMERIKO

Longe, tro longe, Ameriko,
Vojaghante vojojn tute ebenajn kaj pacajn, vi lernis de ghojoj kaj prospero sole,
Sed nun, aĥh nun, lerni de krizoj de angoro, antaŭenirante, luktante kun la plej terura
sorto kaj ne retirighante,
Kaj nun koncepti kaj montri al la mondo kio viaj infanoj amase vere estas,
(Ĉar kiu krom mi ankoraŭ konceptis kio viaj infanoj amase vere estas?).

DONU AL MI LA BRILEGAN SILENTAN SUNON

1

Donu al mi la brilegan silentan sunon kun ĉiuj liaj radioj tute blindumantaj,
Donu al mi la sukoplenajn autunajn fruktojn, maturaj kaj rughaj de la fruktarbaro,
Donu al mi kampon, kie la netondita herbo kreskas,
Donu al mi laubon, donu al mi la pergolitan viton,
Donu al mi freshan maizon kaj tritikon, donu al mi serene movighantaj bestojn,

instruantajn kontenton,
Donu al mi noktojn, perfekte silentajn, kiel sur altaj platajhoj, okcidente de Misisipo, kaj
mi rigardanta la stelojn,
Donu al mi odoran che sunlevigho ghardenon da belaj floroj kie mi povas promeni
senghene,
Donu al mi por edzigho dolchaspiran virinon pri kiu mi neniam enuus,
Donu al mi perfektan infanon, donu al mi fore flanke de la bruo de la mondo, kamparan
hejman vivon,
Donu al mi por trili spontaneajn kantojn ermite che mi, por miaj propraj oreloj sole,
Donu al mi solecon, donu al mi Naturon, donu al me denove, ho Naturo, viajn praajn
prudentojn!
Chi tiujn postulanta havi ilin (laca de senchesa ekscito, kaj torturita de la
militokonflikto),
Chi tiujn akiri senchese petanta, levighantaj en krioj de mia koro,
Dum ankoraŭ senchese petanta, tamen mi restas lojala al mia urbo,
Tago post tago kaj jaro post jaro, ho urbo, marshanta viajn stratojn,
Kie vi tenas min katenita, certan tempon, rifuzante min liberigi,
Tamen donante por igi min supersata, richigita anime, vi donas al mi chiam vizaghojn;
(Ho mi vidas kion mi provis eskapi, alfrontanta, inversiganta miajn kriojn,
Mi vidas mian propran animon malsuprentretanta kion ghi petis).

2

Retenu vian brilegan silentan sunon,
Retenu viajn arbarojn, ho Naturo, kaj la kvietajn lokojn apud la arbaroj,
Retenu viajn kampojn de trifolio kaj fleo, kaj viajn maizkampojn kaj fruktarbarojn,
Retenu la florantaj fagopirajn kampojn, kie la Naua-monataj abeloj zumas;
Donu al mi vizaghojn kaj stratojn – donu al mi tiujn fantomojn, senchesajn kaj senfinajn
lau la trotuaroj!
Donu al mi la senfinajn okulojn – donu al mi virinojn – donu al mi kamaradojn kaj
amantojn milope!
Lasu min vidi novajn chiun tagon – lasu min teni novajn je la mano chiun tagon!
Donu al mi tiajn manifestajhojn – donu al mi la stratojn de Manhatano!
Donu al mi Broadvejon, kun la soldatoj marshantaj – donu al mi la sonon de la
trumpetoj kaj tamburoj!
(La soldatoj en kompanioj au regimentoj – kelkaj ekforirantaj, rughvangaj kaj temeraraj,
Kelkaj, ilia deghoro finita, revenantaj kun maldensigitaj vicoj, junaj tamen tre maljunaj,
eluzitaj, marshantaj, rimarkantaj nenion);
Donu la mi la bordojn kaj varfojn dense franghitajn de nigraj shipoj!
Ho tiaj por mi! ho intensa vivo, plena ghis plenpleno kaj diversa!
La vivo de la teatro, drinkejo, grandega hotelo, por mi!
La salono de la vaporshipo! kaj homplena ekskurso por mi! la torcholuma procesio!
La densa brigado ekironta al la milito, kun alte sharghitaj armeaj charegoj sekvantaj;
Homoj, senfinaj, fluantaj, kun fortaj vochoj, pasioj, spektakloj,
Manhatanaj stratoj kun siaj potencaj pulsadoj, kun batantaj tamburoj kiel nun,
La senfina kaj brua hghoro, la klakado kaj tintado de musketoj (ech la vido de la

vunditoj),
Manhatanaj amasoj, kun sia turbulenta muzikeca horo,
Manhatanaj vizaghoj kaj okuloj chiam por mi.

FUNEBRA KANTO POR DU VETERANOJ

La lasta sunradio
Leghere falas de la finita Sabato,
Sur la pavimon chi tie, kaj tien pretere ghi rigardas,
Malsupren en nove faritan duoblan tombon.

Jen, la luno supreniranta,
Supren de la okcidento la arghenta ronda luno,
Bela super la domsuproj, makabra, fantoma luno,
Grandega kaj silenta luno.

Mi vidas malgajan procesion,
Kaj mi audas la sonon de venantaj plenklavaj klarionoj,
Chiujn kanalojn de la urbaj stratoj ili inundas,
Kiel per vochoj kaj per larmoj.

Mi audas la grandajn tamburojn batantaj,
Kaj la malgrandajn tamburojn konstante zumantaj,
Kaj chiu bato de la grandaj konvulsiaj tamburoj,
Frapas min ghisoste.

Char la filo estas alportata kun la patro,
(En la plej antaŭaj vicoj de la feroca atako ili falis,
Du veteranoj, filo kaj patro, falintaj kune,
Kaj la duobla tombo atendas ilin).

Nun pli proksime blovas la klarionoj,
Kaj la tamburoj frapas pli konvulsie,
Kaj la taglumo super la pavimo estas tute malaperinta,
Kaj la forta mortomarŝo envolvas min.

En la orienta chielo suprenighante,
La malghoja vasta fantomo movighas lumata,
(Ghi estas la granda travidebla vizagho de ia patrino,
En la chielo plihelighanta).

Ho forta mortomarŝo vi plachas al mi!
Ho luno grandega kun via arghenteca vizagho, vi kvietigas min!
Ho miaj soldatoj du! ho miaj veteranoj, pasantaj al entombigho!
Kion mi havas, mi ankau donas al vi.

La luno donas al vi lumon,
Kaj la klarionoj kaj la tamburoj donas al vi muzikon,
Kaj mia koro, ho miaj soldatoj, miaj veteranoj,
Mia koro donas al vi amon.

SUPER LA MASAKRON VOCHO LEVIGHIS PROFETA

Super la masakron vocho levighis profeta,
Ne malesperu, amemo solvos la problemojn de libereco finfine,
Tiuj kiuj sin amas unu la alian ighos nevenkeblaj,
Ili finfine igos Kolumbion triumfa.

Filoj de la Patrino de Chiuj, vi finfine triumfos,
Vi finfine priridos malestime la atakojn de la tuta cetero de la tero.

Nenia danghero hezitigos la amantoj de Kolumbio,
Se necese, mil severe oferos sin por unu.

Unu de Masachuseco estos kamarado de Misuriano,
De Majno kaj de varmega Karolino, kaj alia, Oregonano, estos amikoj triopaj,
Pli karegaj unu al la aliaj ol chiuj richoj de la tero.

Al Michegano Floridaj parfumoj tenere venos,
Ne la parfumoj de floroj, sed pli dolchaj, kaj alblovetataj preter morto.

Estos kutime en la domoj kaj stratoj vidi virecan amemon,
La plej sentimaj kaj krudaj tushighos vizagho al vizagho leghere,
La dependo de Libereco estos amantoj,
La daurigo de Egaleco estos kamaradoj.

Chi tiuj ligos vin kaj kunigos vin pli forte ol ringegoj el fero,
Mi, ekstaza, ho partneroj! ho landoj! per la amo de amantoj ligas vin.

(Chu vi atendis esti kuntenitaj de advokatoj?
Au per konsento sur papero? au per armiloj?
Ne, nek la mondo, nek ia vivantajho, tiel koheros.)

MI VIDIS LA MALJUNAN GENERALON ENANGULITA

Mi vidis la maljunan Generalon enangulita,
(Maljuna kiel li estis, liaj grizaj okuloj ankoraŭ elbrilis en batalo kiel steloj),
Lia malgranda forto estis nun tute enbarita, en liaj terajhoj,
Li vokis por volontuloj kuri la liniojn de la malamiko, urgha krizo,
Mi vidis cent kaj pli elpashi el la vicoj, sed du au tri estis selektitaj,
Mi vidis ilin ricevi siajn ordonojn flanke, ili aukultis kun zorgo, la adjutanto estis tre

serioza,
Mi vidis ilin foriri kun gajeco, libere riskante sian vivon.

LA VIZIO DE LA ARTILERIISTO

Dum mia edzino che mia flanko kushas dormante, kaj la militoj estas jam longe finitaj,
Kaj mia kapo sur la kuseno ripozas hejme, kaj la vaka noktomezo pasas,
Kaj tra la silento, tra la mallumo, mi audas, apenau audas, la spiron de mia infano,
Tie en la chambro, dum mi maldormas, chi tiu vizio premas sur mi;
La batalo komencighas tuj en fantazio nereala,
La antaubatalantoj komencas, ili rampas singarde antauen, mi audas la hazardan klak!
klak!
Mi audas la sonojn de la diversaj misiloj, la mallongan t-h-t! t-h-t! de la fusilkugloj,
Mi vidas la obusojn eksplodi, lasante malgrandajn blankajn nubojn, mi audas la
grandajn obusojn shriki, dum ili pasas,
La kugletoj kiel la zumado de vento tra la arboj (tumulte nun la lukto furiozas),
Chiuj scenoj che la baterioj levighas detale antau mi denove,
La tondrado kaj fumado, la fiero de la viroj pri siaj pecoj,
La chefkanonisto ghusteklinas kaj celumas sian pecon kaj elektas mechon de la ghusta
tempo,
Post pafado mi vidas lin flankenclinighi kaj alrigardi avide por rimarki la efikon;
Aliloke mi audas la krimon de regimento sturmanta (la juna kolonelo antaueas mem chifoj
kun svingata glavo),
Mi vidas la brechojn, tranchitajn de la salvoj de la malamiko (rapide plenigitaj, nenia
prokrasto),
Mi spiras la sufokan fumon, tiam la plataj nuboj shvebas malalte, kashante chion,
Jen stranga paizo dum kelkaj sekundoj, tute nenia pafado sur ambau flankoj,
Tiam rekomencita la hhaoso pli laute ol iam, kun avidaj voko kaj ordonoj de oficiroj,
Dum de iu malproksima parto de la kampo la vento alblovetas al miaj oreloj krimon de
aplaudo (ia speciala sukceso),
Kaj chiam la sono de la kanonoj malproksimaj au proksimaj (vekanta ech en songhoj
diablan ghojigon kaj la tutan frenezan ghojon en la profundoj de mia animo),
Kaj chiam la hastado de la infanterio, shanghanta poziciojn, baterioj, kavalerio,
movighantaj tien kaj reen,
(La falantaj, mortantaj, mi ne atentis, la vunditajn, gutantaj kaj rughajn, mi ne
atentis, kelkaj en la malantaueo lamadas),
Malpurajho, varmego, hastado, adjutantoj pretergalopantaj au plene kurantaj,
Kun la klaketado de malgrandaj armiloj, la avertanta s-s-t de la fusiloj (chi tiujn en mia
vizio mi audas au vidas),
Kaj bomboj eksplodantaj en aero, kaj nokte la diverskoloraj raketoj.

ETIOPUJO SALUTANTA LA KOLOROJN

Kiu vi estas virino ebena, tiel antikva, apenau ja homa,
Kun nudaj ostaj piedoj, turbanita kap' lanblanka,

Levighanta vojflanke, la kolorojn salutanta?

(Dum iras nia arme' tra Karolinoj, tra la sabloj kaj la pinoj,
El la pordo de via domach' vi Etiopujo venas al mi,
Dum sub brava Sherman al la maro marshas ni.)

Min, mastro, antau cent' da jaroj disigitan for de la gepatroj,
Oni min infaneton kaptis kiel kaptighas sovagha besto,
Kaj trans la maron alportis la kruela sklavisto.

Ne plu vorton dirante, la tutan tagon restante,
Shi rulas la malhelajn okulojn, la turbanit- alteportitan kapon balancas,
Kaj al regimentoj kaj flagoj preterpasantaj shi riverencas.

Kio ghi estas virino fantoma, tiel nebula, apenau ja homa?
Kial svingi vian kapon, volvitan per turbano, kiu flavas rughas kaj verdas?
Chu la aferoj estas tiel strangaj kaj mirindaj kiujn vi jam vidis au vidas?

NE JUNECO APARTENAS AL MI

Ne juneco apartenas al mi,
Nek delikateco, mi ne povas pasigi la tempon per parolo,
Mallerta en la salono, nek dancisto nek eleganta,
En la klera koterio sidanta limigita kaj silenta, char per klereco mi ne estas dotita,
Per belo, scio, mi ne estas dotita – tamen estas du au tri aferoj per kiuj mi estas dotita,
Mi nutris la vunditojn kaj kvietigis multajn mortantajn soldatojn,
Kaj de tempo al tempo, atendante au meze de tendaro,
Komponis chi tiujn kantojn.

RASO DE VETERANOJ

Raso de veteranoj – raso de venkantoj!
Raso de la grundo, preta por konflikto – raso de la konkerantoj, marshu!
(Ne plu la raso de kredemo, tolertemperamenta raso),
Raso de nun agnoskanta nenian leghon krom la legho de si mem,
Raso de pasio kaj shtormo.

MONDO, ZORGE ATENTU

Mondo, zorge atentu, arghentaj steloj velkantaj,
Lakta koloro shirita, teksajho de blanko apartighanta,
Bragheroj tridek ok, misauguraj kaj brulantaj,
Skarlataj, signifoplenaj, for la manojn avertantaj,
Nun kaj de nun elmontrataj de chi tiuj bordoj.

HO BRUNVIZAGHA PRERIKNABO

Ho brunvizagha preriknabo,
Antau ol vi venis al la tendaro, venis multaj bonvenaj donacoj,
Laudoj kaj donacoj venis kaj nutra manghajho, ghis finfine inter la varbitoj,
Vi venis, silentema, kun nenio por doni – ni nur rigardis unu la alian,
Kiam jen! pli ol chiujn donacojn de la mondo vi donis al mi.

MALSUPREN-RIGARDU, BELA LUNO

Malsuprenrigardu, bela luno, kaj banu chi tiun scenon,
Vershu milde malsupren la nimbofluojn de nokto sur vizaghojn, makabrajn, shvelintajn,
purpurajn,
Sur la mortajn sur iliaj dorsoj kun brakoj larghetenditaj,
Devershu vian senchesan nimbon, sankta luno.

REPACIGHO

Vorto super chio, bela kiel la chielo,
Bele ke la milito kaj chiuj ghiaj faroj de buchado devas kun la tempo esti komplete
perdita,
Ke la manoj de la fratinoj Morto kaj Nokto senchese milde lavas denove, kaj chiam
denove, chi tiun malpurigitan mondon;
Char mia malamiko estas morta, homo, dia kiel mi mem, estas morta,
Mi rigardas tien kie li kushas blankvizagha kaj silenta en la cherko – mi alproksimighas,
Klinighas kaj tushas leghere per la lipoj la blankan vizaghon en la cherko.

KIEL SOLENA, DUM UNU POST UNU (Urbo Vashingtono, 1865)

Kiel solena, dum unu post unu,
Dum la vicoj, revenantaj eluzitaj kaj shvitaj, dum la viroj preterdefilas kie mi staras,
Dum la vizaghoj la maskoj aperas, dum mi ekrigardas la vizaghojn, studante la maskojn,
(Dum mi ekrigardas supren el chi tiu pagho, studante vin, kara amiko, kiu ajn vi estas),
Kiel solena la penso de mia flustranta animo al chiu en la vicoj, kaj al vi,
Mi vidas malantau chiu masko tiun mirindajhon, parenca animon,
Ho la kuglo neniam povus mortigi kio vi vere estas, kara amiko,
Nek la bajoneto piki kio vi vere estas,
La animo! vin mem mi vidas, granda kiel iu ajn, bona kiel la plej bona,
Atendanta sekura kaj kontenta, kiun la kuglo neniam povus mortigi,
Nek la bajoneto piki, ho amiko.

DUM MI KUSHIS KUN MIA KAPO SUR VIA SINO, KAMARADO

Dum mi kushis kun mia kapo sur via sino, kamarado,
La konfeson kiun mi faris mi ripetas, kion mi diris al vi kaj la libera aero mi ripetas,
Mi scias ke mi estas senripoza kaj igas aliajn tia,
Mi scias ke miaj vortoj estas armiloj, plenaj de danghero, plenaj de morto,
Ĉar mi alfrontas pacon, sekuron, kaj chiujn firmigitajn leghojn, por malfirmigi ilin,
Mi estas pli rezoluta tial ke chiuj fornegas min ol mi povus iam esti se chiuj akceptus
min,
Mi ne atentis kaj neniam atentis nek spertojn, avertojn, plejmultojn, nek mokadon,
Kaj la minaco de kio estas nomata infero estas malmulte au nenio al mi,
Kaj la allogo de kio estas nomata chielo estas malmulte au nenio al mi;
Kara kamarado! mi konfesas ke mi urghis vin antaŭen kun mi, kaj ankoraŭ urghas vin,
sen la plej malgranda ideo kio estas nia ircelo,
Au ĉu ni estos triumfaj, au tute subpremitaj kaj venkitaj.

DELIKATA ARO

Delikata aro! flago de pululanta vivo!
Kovranta chiujn miajn landojn – chiujn miajn marbordojn lauiranta!
Flago de morto! (kiel mi observis vin tra la fumo de batalo urghanta!
Kiel mi audis vian klakon kaj susuron, tuko defia!),
Flago chielblua – suna flago, per la orboj de nokto aspergita!
Ha mia arghenta belulino – ha mia lana blanko kaj karmezino!
Ha por kanti la kanton pri vi, mia matrono potenca!
Mia sankta, mia patrino.

AL CERTA CIVILULO

Ĉu vi demandis dolchajn rimojn de mi?
Ĉu vi serĉis la pacajn kaj langvorantajn rimojn de la civilulo?
Ĉu vi trovis kion mi kantis ghis nun tiel malfacile sekvebla?
Nu mi ne kantis ghis nun por ke vi sekvu, komprenu – nek tiel kantas nun;
(Mi estas naskita de la sama kiel la milito estis naskita,
La klakado de la tamburkorpuso estas chiam por mi dolcha muziko, mi forte amas la
militan funebrokanon,
Kun tirata ululo kaj konvulsia pulsado antaŭantan la funebran procesion de la oficiro);
Kio iel al tia kiel vi tia poeto kiel mi? tial lasu miajn verkojn,
Kaj iru luli vin per kion vi povas kompreni, kaj per pianomelodioj,
Ĉar mi lulas neniun, kaj vi neniam komprenos min.

JEN, VENKINTINO SUR LA MONTPINTOJ

Jen, Venkintino sur la montpintoj,
Kie vi, kun potenca brovo rigardante la mondon,
(La mondon, ho Libereco, kiu vane konspiris kontraŭ vi),
El ghiaj sennombraj sieghantaj klopodoj, post malsukcesigado de ili chiuj,
Superreganta, kun la blindumanta suno chirkau vi,
Paradas nun nedifektita en senmorta sano kaj florigho – jen, en chi tiuj horoj superegaj,
Nenian poemon fieran mi chantante alportas al vi, nek la ekstazan version de mastreco,
Sed amason, enhavantan la noktan malhelon kaj sanggutantajn vundojn,
Kaj psalmojn de la mortaj.

SPIRITO, KIES LABORO ESTAS FINITA (Urbo Vashingtono, 1865)

Spirito, kies laboro estas finita – spirito de teruraj horoj!
Forironte, malaperighadas antaŭ miaj okuloj viaj arbaroj da bajonetoj,
Spirito de plej mornaj timoj kaj duboj (tamen antaŭen chiam neshancelighe urghanta),
Spirito de multaj solenaj tagoj kaj multaj sovaghaj scenoj – elektra spirito,
Kiu kun murmuranta vocho tra la milito nun finita, kiel senlaca fantomo flirtis,
Vigligante la landon per spiro de flamo dum vi batis kaj batis la tamburon,
Nun dum la sono de la tamburo, kava kaj kruda ghisfine, reehhighas chirkau mi,
Dum viaj vicoj, viaj senmortaj vicoj, revenas, revenas de la bataloj,
Dum la musketoj de la junaj viroj ankoraŭ klinighas sur iliaj shultroj,
Dum mi rigardas la bajonetojn, hirtajn sur iliaj shultroj,
Dum tiuj klinitaj bajonetoj, tutaj arbaroj de ili aperantaj en la malproksimo,
alproksimighas kaj preterpasas, revenante hejmen,
Movighante per firma movo, shancelighante tien kaj reen dekstren kaj liven,
Unuforme leghere levighante kaj mallevighante dum la pashoj lautaktas;
Spirito de horoj kiujn mi konis, tute haste rughaj unu tagon, sed palaj kiel morto la
sekvantan tagon,
Tushu mian bushon antaŭ ol vi foriras, premu miajn lipojn strikte,
Lasu al mi viajn pulsojn de furiozo – testamentu ilin al mi – plenigu min per konvulsiaj
fluoj,
Lasu ilin brulvundegi el miaj kantoj kiam vi estos for,
Lasu ilin identigi vin al la estonteco en chi tiuj kantoj.

ADIAU AL SOLDATO

Adiau, ho soldato,
Vi de la kruda kampanjado (kiun ni dividis),
La rapida marsho, la vivo de la tendaro,
La arda luktado de kontraŭantaj frontoj, la longa manovro,

Rughaj bataloj kun ilia buchado, la stimulo, la forta terura ludo,
Tempo de chiuj kuraghaj kaj virecaj koroj, la procesioj de tempo per vi kaj viaj similaj
tute plenigitaj,
Per milito kaj la esprimado de milito.

Adiaŭ, kara kamarado,
Via komisio estas plenumita – sed mi, pli militema,
Mi mem kaj chi tiu kverelema animo mia,
Ankorau direktataj al nia propra kampanjado,
Tra neprovitaj vojoj, per embuskoj kontraŭuloj borderitaj,
Tra multaj akraj malvenkoj kaj multaj krizoj, ofte malhelpataj,
Chi tie marshante, chiam antaŭen marshante, militon elbatalas – ja chi tie,
Al pli ferocaj, pli gravaj bataloj donas esprimadon.

TURNU VIN, HO LIBERECO

Turnu vin, ho libereco, ĉar la milito estas finita,
De ghi kaj de chio, de nun ekspansiante, dubante ne plu, rezolute, traŭrante la mondon,
Turnu vin de landoj rigardantaj retroen, registrantaj pruvojn de la pasinteco,
De la kantistoj kiuj kantas la trenighantajn glorojn de la pasinteco,
De la ĉantoj de la feuda mondo, la triumfoj de reghoj, sklaveco, kasto,
Turnu vin al la mondo, la triumfoj rezervitaj kaj venontaj – forkonfesu tiun
malprogreseman mondon,
Forlasu la kantistojn de ghis nun, donu al ili la trenighantan pasintecon,
Sed kio restas restas por kantistoj por vi – militoj venontaj estas por vi,
(Jen, kiel la militoj de la pasinteco estis tauge via heredajho, kaj la militoj de la nuntempo
estas ankaŭ via heredajho);
Do turnu vin, kaj ne estu timigita, ho Libereco – turnu vian senmortan vizagho,
Al tie, kie la estonteco, pli granda ol la tuta pasinteco,
Rapide, nepre preparas sin por vi.

AL LA FERMENTIGITA GRUNDO KIUN ILI TRETIS

Al la fermentigita grundo kiun ili tretis vokante mi kantas jam por la lasta fojo,
(El mia tendo elighante por chiam, malstrikigante, malligante la tendoshnurojn),
En la fresho de la antaŭtagmeza aero, en la malproksimetendighantaj ĉirkauajhoj kaj
vidajhoj denove restauritaj al paco,
Al la fajraj kampoj eligemaj kaj la senfinaj vidajhoj pretere, Sude kaj Norde,
Al la fermentigita grundo de la ĝenerala Okcidenta mondo por atesti miajn kantojn,
Al la Alegantaj montetoj kaj la senlaca Misisipo,
Al la rokoj mi vokante kantas, kaj al chiuj arboj en la arbaro,
Al la ebenajhoj de la poemoj de herooj, al la prerioj vaste sternighantaj,
Al la fora maro kaj la nevidataj ventoj, kaj la prudenta nepalpebla aero;
Kaj respondante ili respondas chiuj (sed ne per vortoj),
La averagha tero, la observanto de milito kaj paco, agnoskas mute,

La prero tiras min strikte, kiel la patro al la largha brusto la filon,
La Norda glacio kaj pluvo kiu komencis min nutras min ghis la fino,
Sed la varmega suno de la Sudo estas plene maturigonta miajn kantojn.

MEMOROJ PRI PREZIDENTO LINKOLNO

KIAM LILAKOJ LASTE EN LA DOMKORTETO FLORIS

1

Kiam lilakoj laste en la domkorteto floris,
Kaj la granda stelo frue velkis en la okcidenta chielo en la nokto,
Mi funebris, kaj ankoraŭ funebros kun chiamrevenanta printempo.

Chiamrevenanta printempo, triunuon certan al mi vi portas,
Lilako floranta chiuĵare kaj velkanta stelo en la okcidento,
Kaj la penso pri li kiun mi amas.

2

Ho potenca okcidenta falinta stelo!
Ho ombroj de nokto – ho morna, larma nokto!
Ho granda stelo malaperinta – Ho nigra malhelo kiu kashas la stelon!

Ho kruelaj manoj, kiuj tenas min senpotenca – ho senpova animo de mi!
Ho severa chirkauanta nubo kiu ne liberigos mian animon.

3

En la domkorteto, frontanta malnovan biendomon proksime de la kalkolaktitaj palisaroj,
Staras la lilakujo, altkreskanta kun korformaj folioj de richa verdo,
Kun multaj pintaj floraroj, levighantaj delikataj, kun la parfumo forta kiun mi amas,
Kun chiu folio miraklo – kaj de chi tiu arbedo en la domkorteto,
Kun delikatkoloraj floraroj kaj korformaj folioj de richa verdo,
Brancheton kun ghia floraro mi derompas.

4

En la marcho en izolitaj anguloj,
Timida kaj kashita birdo trilas kanton.

Soleca la turdo,
La ermito, retirita al si mem, evitanta la setlejojn,
Kantas sola che si kanton.

Kanto de la sanganta gorgho,
Mortelira kanto de vivo (char bone, kara frato, mi scias,
Se al vi ne estus permesite kanti, vi nepre mortus).

5

Tra la brusto de printempo, la lando, meze de urboj,
Meze de vojetoj kaj tra malnovaj arbaroj, kie laste la violoj rigardetis el la grundo,
makulante la grizan disrompajhon,
Meze de la herbo en la kampoj sur ambau flankoj de la vojetoj, pasante la senfinan
herbon,
Pasante la flavspikan tritikon, chiu grajno el sia mortotuko en la malhelbrunaj kampoj
levighinte,
Pasante la pomarbajn florojn de blanko kaj rozo en la pomarbaroj,
Portante kadavron tien kie ghi ripozos en la tombo,
Nokte kaj tage vojaghas cherko.

6

Cherko, kiu pasas tra vojetoj kaj stratoj,
Tra tago kaj nokto kun la granda nubo malheliganta la landon,
Kun la pompo de la envolvitaj flagoj kun la urboj drapiritaj en nigro,
Kun la elmontrajho de la Shtatoj mem, kiel de krepvualitaj virinoj starantaj,
Kun procesioj longaj kaj sinuantaj kaj la torchoj de la nokto,
Kun lumigo el sennombraj torchoj, kun la silenta maro da vizaghoj kaj la nudigitaj kapoj,
Kun la atendanta stacidomo, la alvenanta cherko, kaj la malgajaj vizaghoj,
Kun funebroantoj tra la nokto, kun la mil vochoj levighantaj fortaj kaj solenaj,
Kun chiuj funebraj vochoj de la funebroantoj vershataj chirkau la cherko,
La malhele lumitaj preghejoj kaj la tremantaj orgenoj – kie meze de tiuj vi vojaghas,
Kun la konstanta sonorego de la sonorantaj sonorantaj sonoriloj,
Jen, cherko, kiu malrapide pasas,
Mi donas al vi mian brancheton da lilako.

7

(Nek por vi, por unu sola,
Florojn kaj branchojn verdajn al cherkoj chiuj mi alportas,
Char freshan kiel la mateno, tiel mi volus chanti kanton por vi, ho sana kaj sankta morto.

Chie bukedoj da rozoj,
Ho morto, mi plenkovras vin per rozoj kaj fruaj lilioj,
Sed pleje kaj nun per lilako, kiu floras la unua,
Abunde mi rompas, mi rompas la branchetojn de sur la arbetoj,
Kun sharghitaj brakoj mi venas, vershante por vi,
Por vi kaj la cherkoj chiuj de vi, ho morto!)

8

Ho okcidenta orbo velanta la chielon,
Nun mi scias kion vi devis voli diri dum monaton antaue mi marshis,
Dum mi marshis en silento la travideblan ombran nokton,
Dum mi vidis ke vi havis ion diri, kiam vi klinighis al mi nokto post nokto,

Dum vi velkis de la chielo profunde malsupren, kvazau al mia flanko (dum la aliaj steloj
chiuj observis),
Dum ni vagis kune la solenan nokton (char io, mi ne scias kio, tenis min el dormo),
Dum la nokto antaueniris, kaj mi vidis sur la rando de la okcidento kiel plena vi estis de
veo,
Dum mi staris sur la levighanta tero en la venteto en la malvarmeta travidebla nokto,
Dum mi observis kie vi pasis kaj perdighis en la malaltan nigron de la nokto,
Dum mia animo en ghia zorgo malkontente sinkis, kiel, kie vi, malgaja orbo,
Finis, falis en la nokto, kaj estis for.

9

Kantadu tie en la marcho,
Ho kantanto kashighema kaj tenera, mi audas viajn notojn, mi audas vian vokon,
Mi audas, mi venos tuj, mi komprenas vin,
Nur momenton mi lantas, char la brila stelo detenas min,
La stelo mia foriranta kamarado tenas kaj detenas min.

10

Ho kiel mi trilos mem por la morta tie kiun mi amis?
Kaj kiel mi ornamos mian kanton por la granda dolcha animo kiu foriris?
Kaj kio estos mia parfumo por la tombo de li kiun mi amas?

Marventoj blovataj el oriento kaj okcidento,
Blovataj el la Orienta maro kaj blovataj el la Okcidenta maro ghis tie sur la prerioj
renkontantaj,
Tiuj kaj per tiuj kaj la spiro de mia chanto,
Mi parfumos la tombon de li kiun mi amas.

11

Ho kion mi pendigos sur la chambraj muroj?
Kaj kio la bildoj estos kiujn mi pendigu sur la muroj,
Por ornami la tombodomon de li kiun mi amas?

Bildoj de kreskanta printempo kaj bienoj kaj hejmoj,
Kun la Kvara-monata vespero che sunsubiro, kaj la griza fumo lucida kaj hela,
Kun inundoj de la flava oro de la belega, mallaborema, sinkanta suno, bruliganta,
dilatanta la aeron,
Kun la fresha dolcha herbaro subpiede, kaj la pale verdaj folioj de la arboj fekundaj,
En la malproksimo la fluanta glazuro, la brusto de la rivero, kun ventomakuleto tie kaj
tie,
Kun etendighantaj montetoj sur la bordoj, kun multaj linioj kontrau la chielo, kaj ombroj,
Kaj la urbo en la proksimo kun loghejoj tiel densaj, kaj aroj da fumtuboj,

Kaj chiuj scenoj de vivo kaj la metiejoj, kaj la metiistoj hejmen revenantaj.

12

Jen, korpo kaj animo – chi tiu lando,
Mia propra Manhatano kun spajroj, kaj la scintilantaj kaj hastantaj tajdoj, kaj la ŝipoj,
La diversa kaj ampleksa lando, la Sudo kaj la Nordo en la lumo, la bordoj de Ohio kaj
 flagranta Misuro,
Kaj la chiam forensternighantaj prerioj kovritaj de herbo kaj maizo.

Jen, la plej bonega suno tiel trankvila kaj fiera,
La viola kaj purpura mateno kun apenaŭsentataj ventetoj,
La milda mole naskita senmezura lumo,
La miraklo sternighanta bananta chion, la plenumita tagmezo,
La venanta vespero delica, la bonvena nokto kaj la steloj,
Super miaj urboj brilantaj chiuj, envolvantaj homon kaj landon.

13

Kantadu, kantadu, vi grizebruna birdo,
Kantu de la marĉoj, la kashanguloj, vershu vian kanton el la arbetoj,
Senliman el la malhelo, el la cedroj kaj pinoj.

Kantadu, plej kara frato, trilu vian anĉan kanton,
Lautan homan kanton, per voĉo de plej kompleta veo.

Ho likva kaj libera kaj tenera!
Ho sovagha kaj disa al mia animo – ho mirinda kantanto!
Vin solan mi audas – tamen la stelo tenas min (sed baldau foriros),
Tamen la lilako kun maŝtranta odoro tenas min.

14

Nu kiam mi sidis en la tago kaj elrigardis,
En la fermo de la tago kun ghia lumo kaj la kampoj de printempo, kaj la bienistoj,
 preparantaj siajn rikoltotajhojn,
En la granda nekonscia pejzagharo de mia lando kun ghiaj lagoj kaj arbaroj,
En la chiala aera beleco (post la perturbitaj ventoj kaj la ŝtormoj),
Sub la arkighanta chielo de la posttagmezo, rapide pasanta, kaj la voĉoj de infanoj kaj
 virinoj,
La multmovantaj martajdoj, kaj mi vidis la ŝipojn, kiel ili velighis,
Kaj la someron, alvenantan kun richeco, kaj la kampojn, tute okupitajn de laboro,
Kaj la senfinajn apartajn domojn, kiel ili chiuj daurigis, chiu pri siaj manghoj kaj detaletoj
 de chiutagaj kutimoj,
Kaj la stratojn, kiel iliaj pulsadoj pulsadis, kaj la urbojn enfermitajn – jen, subite,
Falante sur ilin chiujn kaj inter ilin chiujn, envolvante min kun la ceteraj,

Aperis la nubo, aperis la longa nigra pado,
Kaj mi konis morton, ghian penson, kaj la sanktan scion de morto.

Tiam kun la kono de morto, kiel marshanta unuflanke de mi,
Kaj la penso de morto, proksim-marshanta aliflanke de mi,
Kaj mi en la mezo, kiel kun kompanoj, kaj kiel tenanta la manojn de kompanoj,
Mi forfughis al la kashanta ricevanta nokto kiu ne parolas,
Malsupren al la bordoj de la akvo, la pado apud la marcho en la malhelo,
Al la solenaj ombraj cedroj kaj fantomaj pinoj tiel silentaj.

Kaj la kantanto, tiel kashighema al la ceteraj, ricevis min,
La grizebruna birdo, kiun mi konas, ricevis nin, kamaradojn tri,
Kaj li kantis la karolon de morto, kaj verson por li kiun mi amas.

De profundaj izolitaj kashanguloj,
De la aromaj cedroj kaj la fantomaj pinoj tiel silentaj,
Venis la karolo de la birdo.

Kaj la charmo de la karolo ravis min,
Dum mi tenis, kvazau je iliaj manoj, miajn kamaradojn en la nokto,
Kaj la vocho de mia spirito registris la kanton de la birdo.

*Venu, bela kaj kvietiga morto,
Ondadu chirkau la mondo, serene alvenante, alvenante,
Tage, nokte, al chiuj, al chiu,
Pli malpli baldau, milda morto.*

*Laudata estu la nesondebla universo,
Pro vivo kaj ghojo, kaj pro objektoj kaj scio kuriozaj,
Kaj pro amo, dolcha amo – sed laudu! laudu! laudu!
Pro la certe-envolvantaj brakoj de malvarmet-brakumanta morto.*

*Malhela patrino chiam glisanta proksimen per softaj piedoj,
Chu neniuj chantis por vi chanton de plej plena bonvenigo?
Do mi chantas ghin por vi, mi glorigas vin super chio,
Mi alportas al vi kanton, ke, kiam vi devas ja veni, vi venu nehezite.*

*Alproksimighu, forta savantino,
Kiam estas tiel, kiam vi jam prenis ilin, mi ghoje kantas la mortajn,
Perditajn en la amanta flosanta oceano de vi,
Lavitajn en la fluso de via beato, ho morto.*

*De mi al vi ghojaj serenadoj,
Dancojn por vi mi proponas, salutantajn vin, ornamajhojn kaj festenadojn por vi,
Kaj la vidajhoj de la libera pejzagho kaj la alte sternita chielo taugas,
Kaj vivo kaj kampoj, kaj la grandega kaj pensema nokto.*

La nokto en silento sub multaj steloj,

*La oceana bordo kaj la rauka frustranta ondo, kies vochon mi konas,
Kaj la animo sin turnanta al vi, ho vasta kaj bone vualita morto,
Kaj la korpo dankeme alkushanta proksime al vi.*

*Super la arbosuprojn mi flosigas al vi kanton,
Super la levighantaj kaj sinkantaj ondojn, super la miriadojn da kampoj kaj la larghajn
preriojn,
Super la dense plenigitajn urbojn chiujn kaj la svarmantajn varfojn kaj vojojn,
Mi flosigas chi tiun karolon kun ghojo, kun ghojo al vi, ho morto.*

15

Al la registro de mia animo,
Laute kaj forte daurigis la grizebruna birdo,
Per puraj impetaj notoj pristernante plenigante la nokton.

Laute en la pinoj kaj cedroj malhelaj,
Klare en la fresho humida kaj la marchoparfumo,
Kaj mi kun miaj kamaradoj tie en la nokto.

Dum mia vidpovo kiu estis ligita en miaj okuloj malfermighis,
Koncerne longajn panoramojn da vizioj.

Kaj mi vidis flanke la armeojn,
Mi vidis kiel en senbruaĵoj centojn da batalflagoj,
Portataj tra la fumo de la bataloj kaj trapikitaj de misiloj mi vidis ilin,
Kaj portataj tien kaj tien tra la fumo, kaj shiritaj kaj sangaj,
Kaj finfine nur kelkaj shirstrioj restantaj sur la stangoj (kaj chio en silento),
Kaj la stangoj tute splititaj kaj rompigitaj.

Mi vidis batalkadavrojn, miriadojn da ili,
Kaj la blankajn skeletojn de junaj viroj, mi vidis ilin,
Mi vidis la restajhon kaj restajhon de chiuj mortigitaj soldatoj de la milito,
Sed mi vidis ke ili ne estis kiel opiniate,
Ili mem estis plene en ripozo, ili ne suferis,
La vivantoj restis kaj suferis, la patrino suferis,
Kaj la edzino kaj infano kaj la meditanta kamarado suferis,
Kaj la armeoj kiuj restis suferis.

16

Pasante la viziojn, pasante la nokton,
Pasante, lasante la tenon de la manoj de miaj kamaradoj,
Pasante la kanton de la ermito birdo kaj la registran kanton de mia animo,
Triumfa kanto, elira kanto de morto, tamen varianta, chiam shanghighanta kanto,
Kiel mallauta kaj ulula, tamen klaraj la notoj, levighantaj kaj mallevighantaj, inundantaj

la nokton,
Malghoje sinkanta kaj velkanta, kiel avertanta kaj avertanta, kaj tamen denove
eksplostanta per ghojo,
Kovranta la teron kaj pleniganta la etendon de la chielo,
Kiel tiu potenca psalmo en la nokto kiun mi audis de kashanguloj,
Pasante, mi lasas vin, lilako kun korformaj folioj,
Mi lasas vin tie en la domkorteto, florantan, revenantan kun printempo.

Mi chesas de mia kanto por vi,
De mia rigardo al vi en la okcidento, frontanta la okcidenton, komuniighanta kun vi,
Ho kamarado brila kun arghenta vizagho en la nokto.

Tamen chiun reteni kaj chiujn, reprenajhoj el la nokto,
La kanto, la mirinda kanto de la grizebruna birdo,
Kaj la registra kanto, la ehho elvokita en mia animo,
Kun la brila kaj velkanta stelo kun vizagho plena de veo,
Kun la tenantoj tenantaj mian manon, alproksimighanta al la voko de la birdo,
Kamaradoj miaj kaj mi en la mezo, kaj ilian memoron chiam reteni, por la morta kiun mi
tiel multe amis,
Por la plej dolcha, plej sagha animo de chiuj miaj tagoj kaj landoj – kaj chi tio por li kara,
Lilako kaj stelo kaj birdo, interplektitaj kun la kanto de mia animo,
Tie en la aromaj pinoj kaj cedroj malhelaj kaj mallumaj.

HO KAPITAN'! MIA KAPITAN'!

Ho Kapitan'! mia kapitan'! la terura vojagh' finighis,
La shipo chion kontraustaris, serchatan premion atingis,
Haven' proksimighas, sonorad' audighas, popolo nun ghojanta,
Okuloj sekvas kilon stabilan de l' severa ship' venkanta,
Sed ho kor'! kor'! kor'!
Ho la sanga rugho forta,
Sur la ferdek' la Kapitan',
Falinta fride morta.

Ho Kapitan'! mia Kapitan'! levighu jen sonorad';
Levighu – por vi la standard' tie – por vi la trumpetad',
Por vi bukedoj kaj girlandoj – por vi la svarmaj bordoj,
Por vi avidmiene vokas la grandaj popolaj hordoj,
Jen Kapitano! kara patro!
La brako kapoporta!
Chu ia songh', ke sur la ferdek',
Vi falis fride morta?

Mia Kapitano ne respondas, la lipojn li ne movas,
Mia patro ne sentas brakon mian, pulson plu ne havas,
La shipo estas sekurankrita, la vojaghon sukcese fininte,

De l' terurvojagh' alvenis ghi, venkinte, celgajninte;
Ghojegu ho bordoj, sonoru sonoril'!
Sed mi kun premo gorgha,
Pashas apud la Kapitan',
Falinta fride morta.

SILENTAJ ESTU LA TENDAROJ HODIAU
(La 4an de Majo, 1865)

Silentaj estu la tendaroj hodiau,
Kaj soldatoj, ni kovru per tukoj niajn milit-eluzitajn armilojn,
Kaj chiu kun meditanta animo retirighu por soleni,
La morton de nia kara komandanto.

Ne plu por li la shtormaj konfliktoj de vivo,
Nek venko, nek malvenko – ne plu la malhelaj okazoj de tempo,
Sturmantaj kiel senchesaj nuboj trans la chielon.

Sed kantu, poeto, en nia nomo,
Kantu pri la amo, kiun ni sentis al li – char vi, loghanto en tendaroj, scias ghin vere.

Dum oni enkriptigas la cherkon tie,
Kantu – dum oni fermas la pordojn de tero sur lin – unu verson,
Por la pezaj koroj de soldatoj.

CHI TIU POLVO ESTIS IAM LA VIRO

Chi tiu polvo estis iam la viro,
Milda, simpla, justa, kaj rezoluta, sub kies zorga mano,
Kontrau la plej fia krimo en la historio konata en ia lando au epoko,
Estis savita la Unio de chi tiuj Shtatoj.

CHE LA BORDO DE LA BLUA ONTARIO

1

Che la bordo de la blua Ontario,
Dum mi meditis pri tiuj militecaj tagoj kaj pri paco reveninta, kaj la mortaj, kiuj revenas
ne plu,
Fantomo giganta superba, kun severa vizagho ekparolis al mi,
Chantu al mi la poemon, ghi diris, kiu venas de la animo de Ameriko, chantu al mi la
karolon de venko,
Kaj ekmarshigu la marshojn de Libereco, marshojn ankoraŭ pli potencajn,

Kaj kantu al mi antaŭ ol vi foriros la kanton de la suferegoj de Demokratio.

(Demokratio, la destinita venkanto, tamen perfidaj lip-ridetoj chie,
Kaj morto kaj malfideleco che chiu pasho.)

2

Nacio sin anoncanta,
Mi mem faras la solan kreskajhon per kiu mi povas esti shatata,
Mi malakceptas neniujn, akceptas chiujn, tiam reproduktas chiujn en miaj propraj
formoj.

Raso kies pruvo estas en tempo kaj faroj,
Kio ni estas ni estas, nasko estas respondo suficha al objhetoj,
Ni svingas nin mem kiel armilo estas svingata,
Ni estas potencaj kaj grandegaj en ni mem,
Ni estas administraj en ni mem, ni estas sufichaj en la diverseco de ni mem,
Ni estas la plej belaj al ni mem kaj per ni mem,
Ni staras ekvilibrantaj en la mezo, disbranchighantaj de tie tra la mondo,
De Misurio, Nebrasko, au Kansaso, priridantaj atakojn je malestimo.

Nenio estas peka al ni ekster ni mem,
Kio ajn aperas, kio ajn ne aperas, ni estas belaj au pekaj en ni mem sole.

(Ho Patrino – ho Fratinoj karaj!
Se ni estas perditaj, nenia venkinto tamen detruis nin,
Estas per ni mem ke ni malsupreniras en eternan nokton.)

3

Chu vi pensis ke povas esti sola suvereno?
Povas esti ia ajn nombro da suverenoj – unu ne detruas alian iom pli ol unu vidpovo
detruas alian, au unu vivo detruas alian.

Chio rajtas al chio,
Chio estas por individuoj, chio estas por vi,
Nenia stato estas malpermesita, ne tiu de Dio au ia ajn.

Chio venas per la korpo, nur sano metas vin en komunikado kun la universo.

Produktu grandajn Personojn, la cetero sekvas.

4

Pieco kaj konformeco al tiuj kiuj deziras,

Paco, graso, alianco, al tiuj kiuj deziras,
Mi estas li kiu defie devigas virojn, virinojn, naciojn,
Kriante, Saltu de viaj sidlokoj kaj luktu por viaj vivoj!

Mi estas li kiu marshas tra la Shtatoj kun pikila lango pridemandante chiun kiun mi
renkontas,
Kiu vi estas kiu volis nur ke oni diru al vi kion vi jam antaue sciis?
Kiu vi estas kiu volis nur libron por kunighi kun vi en via sensensajho?

(Kun ekdoloroj kaj krioj kiel viaj, ho naskantino de multe da infanoj,
Tiujn chi sovaghajn klamojn al raso de fiero mi donas.)

Ho landoj, chu vi volus esti pli liberaj ol chio kio jam estis antaue?
Se vi volus esti pli liberaj ol chio kio jam estis antaue, venu auskulti min.

Timu gracion, eleganton, civilizon, delikatecon,
Timu la mildan dolchon, la suchadon de mielosuko,
Gardu vin kontrau la antaueniranta mortiga maturigo de Naturo,
Gardu vin kontrau kio antaue la putradon de la fortikeco de shtatoj kaj homoj.

5

Epokoj, antaŭirantoj, jam longe amasigas nedirektitajn materialojn,
Ameriko alportas konstruantojn, kaj alportas siajn proprajn stilojn.

La senmortaj poetoj de Azio kaj Europon jam faris sian laboron kaj pasis al aliaj sferoj,
Laboro restas, la laboro de superado de chio kion ili faris.

Ameriko, suspektema al fremdaj karakteroj, staras, subtenante sian propran je chiaj
shancoj,
Staras apartigita, spacoplana, kunmetita, sana, iniciatas la veran uzon de antaŭirantoj,
Ne repushas ilin au la pasintecon au kion ili produktis sub siaj formoj,
Prenas la lecionon kun trankvileco, perceptas la kadavron malrapide portatan el la
domo,
Perceptas ke gi atendas momente en la pordo, ke ghi estis plej tauga por siaj tagoj,
Ke ghia vivo malsuprenvenis al la brava kaj bone formita heredanto kiu alproksimighas,
Kaj ke tiu estos plej tauga por siaj tagoj.

Dum iu ajn epoko unu nacio devas estri,
Unu lando devas esti la promeso kaj fido de la estonteco.

Chi tiuj Shtatoj estas la plej ampleksa poemo,
Chi tie estas ne nur nacio, sed svarmanta Nacio de la nacioj,
Chi tie la faradoj de homoj respondas al la disjhetataj faradoj de la tago kaj nokto,
Chi tie estas kio movighas en grandiozaj amasoj, senzorgaj pri detaloj,
Chi tie estas la kruduloj, barboj, amikeco, batalemo kiujn la animo amas,
Chi tie la fluantaj trenajhoj, chi tie la amasoj, egaleco, diverseco kiujn la animo amas.

Lando de la landoj kaj bardoj por konfirmi!
 El ili starantan inter ili, oni levas al la lumo okcident-breditan vizaghon,
 Al li la hereda vizagho testamentita, tiel de la patrino kiel de la patro,
 Liaj unuaj partoj substancoj, tero, akvo, bestoj, arboj,
 Konstruita el la ĝenerala stoko, havanta spacon por malproksimo kaj proksimo,
 Kutimanta formeti aliajn landojn, enkarniganta chi tiun landon,
 Altiranta ĝhin korpe kaj anime al si, pendanta sur ĝhia kolo kun nekomparebla amo,
 Plonghiganta sian seman muskolon en ĝhiajn meritojn kaj malmeritojn,
 Faranta ĝhiajn urbojn, komencojn, eventojn, diversecojn, militojn, voĉojn en li,
 Faranta ĝhiajn riverojn, lagojn, golfojn, enbushojn en li,
 Misisipo kun ĉiuĵaraj inundoj kaj shanghighantaj flankkanaloj, Kolumbio, Niagaro,
 Hudsono, sin vershantaj ame en li,
 Se la Atlantika bordo etendighu au la Pacifika bordo etendighu, li etendighanta kun ili
 Norde au Sude,
 Transpontante inter ili Orienton kaj Okcidenton, kaj tushante kio ajn estas inter ili,
 Kreskajhoj kreskante de li por kopii la kreskajhojn de pino, cedro, cugo, vivkverko,
 robinio, kashtanujo, hikorio, deltoido, oranghujo, magnolio,
 Implikajhoj tiel implikitaj en li kiel ia kanejo au marĉo,
 Li similanta flankojn kaj pintojn de montoj, arbarojn tegitajn de la norda travidebla
 glacio,
 De sur li pashtejoj dolĉaj kaj naturaj kiel savano, altejo, prerio,
 Per li flugoj, giroj, kriegoj, respondantaj tiujn de la fishfalko, mokbirdo, nokt-ardeo, kaj
 aglo,
 Lia spirito ĉirkauanta la spiriton de lia lando, nefermita al bono kaj malbono,
 Ĉirkauanta la esencojn de realaj aferoj, malnovajn tempojn kaj estantajn tempojn,
 Ĉirkauanta ĵhus trovitajn bordojn, insulojn, tribojn da rughaj aborigenoj,
 Veterobotitajn ŝipojn, elshipighejojn, setlejojn, embriajn staturon kaj muskolojn,
 La fieregan defion en la Jaro Unu, militon, pacon, la formadon de la Konstitucio,
 La apartajn Shtatojn, la simplan elastan planon, la enmigrantojn,
 La Union ĉiam svarmantan per babilachantoj kaj ĉiam sekuran kaj nepenetreblan,
 La neesploritan internon, shtipdomojn, maldensejojn, shovaghajn bestojn, chasistojn,
 kaptilistojn,
 Ĉirkauanta la multspecajn agrikulturon, minojn, temperaturon, la gravedecon je novaj
 Shtatoj,
 La Kongreson, kunvenantan ĉiun Dek-duan monaton, la anoj tauge alvenantaj de la
 plej foraj partoj,
 Ĉirkauanta la noblan karakteron de mehhanistoj kaj kulturistoj, precipe la junaj viroj,
 Reflektanta iliajn manierojn, parolon, kostumon, amikecojn, la irmanieron kiun ili havas
 de personoj kiuj neniam sciis kiel al ili sentighas stari en la ĉeesto de superuloj,
 La freshecon kaj honestecon de ilia fiziognomio, la abundecon kaj decidemon de ilia
 frenologio,
 La pitoreskan malstrechecon de ilia sinteno, ilian ferocecon kiam ofenditaj,
 La fluecon de ilia parolo, ilian delektighon je muziko, iliajn scivolemon, bonan
 temperamenton kaj malavarecon, la tutan kunmetitan fabrikajhon,

La regantan ardon kaj entreprenon, la vastan amemon,
La perfektan egalecon de la femalo kun la masklo, la fluidan movighon de la
enloĝantoj,
La superan ŝiparon, liberan komercon, fishejojn, balenkaptadon, or-fosadon,
Varf-orlitan urbojn, fervojajn kaj vaporboatajn liniojn, intersekciajn chiujn punktojn,
Fabrikojn, la komercan vivon, laborŝparantajn mashinojn, la Nord-orienton, Nord-
okcidenton, Sud-okcidenton,
Manhatanajn fajrbrigadistojn, la Jankian intershanghon, la sudan bienegan vivon,
Sklavecon – la murdan, perfidan konspiron levi ghin sur la ruinoj de la tuta cetero,
Antauen kaj antauen al la lukto kun ghi – Murdisto! do via vivo au nia estu la celo, kaj
pauzo ne plu.

7

(Jen, alten chielon, chi tiun tagon,
Libereco, de la kampo de la konkerintino reveninta,
Mi rimarkas la novan aureolon chirkau via kapo,
Ne plu el mola astraro, sed blindumantan kaj ferocan,
Per la flamoj de milito kaj la flagraj fulmoj ludantan,
Kaj vian sintenon nemoveblan kie vi staras,
Kun ankoraŭ la neestingeblo rigardo kaj la pugnigita kaj levita mano,
Kaj vian piedon sur la kolo de la minacanto, la malestimanto tute dispremita sub vi,
La minacanta arogantulo, kiu pashegis kaj antaueniris kun sia sensenca malestimo,
portante la murdeman tranchilon,
La largeshvelanto, la fanfaronulo, kiu volis hierau fari tiom,
Hodiaŭ kadavrajho, morta kaj damnita, la malestimegito de la tuta tero,
Viscerajho fetora, de la mushlarvoj de la sterkamaso rifuzita.)

8

Aliaj prenas finon, sed la Respubliko estas chiam konstruema kaj chiam tenas
perspektivon,
Aliaj ornamas la pasintecon, sed vi, ho tagoj de la nuntempo, mi ornamas vin,
Ho tagoj de la estonteco, mi kredas je vi – mi izolas min pro vi,
Ho Ameriko, tial ke vi konstruas por homaro, mi konstruas por vi,
Ho multamataj shtontajlistoj, mi kondukas ilin kiuj planas kun decidemo kaj scio,
Kondukas la nuntempon kun amika mano direkte al la estonteco.

(Braveojn al chiuj impulsoj sendi mense sanajn infanojn al la sekvanta erao!
Sed damnu kio pasigas sin kun nenia konsidero de la makulo, doloroj, konsterno,
malforteco kiujn ghi testamentas.

9

Mi auskultis la Fantomon che la bordo de Ontario,
Mi audis la voĉon levighantan, postulantan bardojn,
Per ili, tute indighenaj kaj grandaj, per ili sole povas chi tiuj Shtatoj esti kunfanditaj en la

kompaktan organismon de Nacio.

Kunteni homojn per papero kaj sigelo au per devigo estas senvalore,
Nur tio kuntenas homojn kio agregas chiujn en vivantan principon, kiel la teno de la
membroj de la korpo au la fibroj de plantoj.

El chiuj rasoj kaj eraoj chi tiuj Shtatoj kun vejnoj plenaj de poeziajho pleje bezonas
poetojn, kaj devas havi la plej grandajn kaj uzi ilin plej grande,
Iliaj Prezidentoj ne estos ilia komuna arbitracianto tiom kiom iliaj poetoj estos.

(Animo de amo kaj lango de fajro!
Okulo trapiki la plej profundajn profundajhojn kaj chirkaurigardi la mondon!
Ahh Patrino, fekunda kaj krome plena de chio, tamen kiel longe senfrukta, senfrukta?)

10

De chi tiuj Shtatoj la poeto estas la egalanima homo,
Ne en li sed for de li aferoj estas groteskaj, strangaj, malsukcesas doni siajn plenajn
redonajhojn,
Nenio el sia loko estas bona, nenio en sia loko estas malbona,
Li donas al chiu objekto au kvalito ghian taugan proporcion, nek pli nek malpli,
Li estas la arbitracianto de la diversaj, li estas la shlosilo,
Li estas la egaliganto de sia epoko kaj lando,
Li liveras kio bezonas liveradon, li kontrolas kio bezonas kontroladon,
En paco el li parolas la spirito de paco, granda, richa, shparema, konstruanta
multloghatajn urbojn, instiganta agrikulturon, artojn, komercon, lumiganta la
studadon de la homo, la animo, sano, senmorteco, regado,
En milito li estas la plej bona subtenanto de la milito, li alportas artilerion tiel bonan
kiel tiu de la ingheniero, li povas igi chiun vorton kiun li diras eltiri sangon,
La jarojn erarvagantajn al malfideleco li detenas per sia konstanta fido,
Li estas nenia argumentanto, li estas jugho (Naturo akceptas lin absolute),
Li ne jughas kiel la jughisto jughas, sed kiel la suno falanta chirkau senhelpan objekton,
Pro tio ke li vidas la plej malproksimen, li havas la plej multe da fido,
Liaj pensoj estas la himnoj de la laudo de aferoj,
En la disputo pri Dio kaj eterno li silentas,
Li vidas eternon malpli kiel teatrajhon kun prologo kaj finigho,
Li vidas eternon en viroj kaj virinoj, li ne vidas virojn kaj virinojn kiel songhojn au
punktojn.

Por la granda Ideo, la ideo de perfektaj kaj liberaj individuoj,
Por tio, la bardo marshas antaue, kondukisto de la kondukistoj,
La sinteno lia konsolas sklavojn kaj hororigas fremdajn despotojn.

Sen estingo estas Libereco, sen retropasho estas Egaleco,
Ili vivas en la sentoj de junaj viroj kaj la plej bonaj virinoj,
(Ne por nenio la nebrideblaj estroj de la tero chiam estis pretaj fali por Libereco).

Por la granda Ideo,
Tio, ho miaj fratoj, tio estas la komisio de poetoj.

Kantoj de severa defio chiam pretaj,
Kantoj de la rapida armado kaj la marŝo,
La flago de paco rapidfaldita, kaj anstataue la flago kiun ni konas,
Militema flago de la granda Ideo.

(Kolera tolo kiun mi vidis tie salteganta!
Mi staras denove en plomba pluvo, viajn flirtajn faldojn salutante,
Mi kantas vin super chio, flugantan gestvokantan tra la batalo – ho forte priluktata
batalo!

La kanonoj malfermas sian rozeflagrantan bushegon – la jhetegitaj kuglegoj kriegas,
La batalfronto formighas meze de la fumo – la salvoj verŝighas senchese de la linio,
Auskultu, la sonanta vorto Sturmu! – jen la lukto kaj la furiozaj frenezigaj kriegoj,
Jen la kadavroj ekfalas arkigite sur la grundon,
Malvarmaj, malvarmaj en morto, pro valorega vivo via,
Kolera tolo kiun mi vidis tie salteganta!)

Chu vi estas li kiu volus alpreni oficon instrui au esti poeto chi tie en la Shtatoj?
La ofico estas majesta, la kondiĉoj necedemaj.

Kiu volus alpreni instrui chi tie povus ja prepari sin korpe kaj mense,
Li povus ja esplori, primediti, armi, fortigi, hardi, supligi sin mem,
Li certe estos pridemandata antaue de mi per multaj kaj severaj demandoj,
Kiu vi estas ja kiu volus paroli au kanti al Ameriko?
Chu vi elstudis la landon, ghiajn idiomojn kaj homojn?
Chu vi lernis la fiziologion, frenologion, politikon, geografion, fierecon, liberecon,
amikecon de la lando? ghiajn substratumojn kaj objektojn?
Chu vi konsideris la organan pakton de la unua tago de la unua jaro de Sendependeco,
subskribitan de la Komisiitoj, ratifikitan de la Shtatoj, kaj legitan de Vashingtono
antau la armeo?
Chu vi posedigis al vi la Federalan Konstitucion?
Chu vi vidas tiujn kiuj lasis chiujn feudajn procedojn kaj poemojn malantau si, kaj
alprenis la poemojn kaj procedojn de Demokratio?
Chu vi estas fidela al aferoj? chu vi instruas kion la lando kaj maro, la korpoj de homoj,
virineco, amoremo, heroaj koleroj instruas?
Chu vi rapidis tra maldauraj kutimoj, popularecoj?
Chu vi povas teni vian manon kontraŭ chiuj delogoj, stultecoj, giroj, ferocaj disputoj?
chu vi estas tre forta? chu vi estas vere de la tuta Popolo?
Chu vi ne estas de ia koterio? ia skolo au nura religio?
Chu vi jam forkonfesis reviziojn kaj kritikojn de vivo? simpatiante nun al vivo mem?
Chu vi vivigis vin de la patrineco de chi tiuj Shtatoj?

Chu vi havas ankau la malnovan chiam freshan sindetenon kaj senpartiecon?
Chu vi tenas la similan amon por tiuj hardighantaj al matureco? por la laste naskitaj?
malgrandaj kaj grandaj? kaj por la erarvagantaj?

Kio estas chi tio kion vi alportas al mia Ameriko?
Chu ghi konformas al mia lando?
Chu ghi ne estas io kio estis pli bone dirita au farita antaue?
Chu vi ne importis chi tion au la spiriton de ghi en ia shipo?
Chu ghi ne estas nura fabelo? rimo? beleteco? – chu la bona malnova afero estas en ghi?
Chu ghi ne longe pendis svinge che la kalkanoj de la poetoj, politikistoj, literatoroj, de la
landoj de malamikoj?
Chu ghi ne premisas ke kio estas nepre for estas ancorau chi tie?
Chu ghi respondas universalajn bezonojn? chu ghi plibonigos konduton?
Chu ghi sonas per trumpetvocho la fieran venkon de la Unio en tiu secesia milito?
Chu via prezento povas fronti la liberajn kampojn kaj la marflankon?
Chu ghi sorbighos en min kiel mi sorbas nutrajhon, aeron, reaperi en mia forto, iro,
vizagho?
Chu veraj oficoj kontribuis al ghi? originalaj farantoj, ne nuraj sekretarioj?
Chu ghi respondas modernajn malkovrajhojn, kalibroj, faktojn, vizagho kontrau
vizagho?
Kion ghi signifas al Amerikaj personoj, progresoj, urboj? Chikago, Kanado, Arkansaso?
Chu ghi vidas malantau la shajnaj prizorgantoj la realajn prizorgantojn, starantajn,
minacantajn, silentajn, la mehhanistojn, Manhatananojn, Okcidentanojn,
Sudanojn, simile gravajn en sia apatio, kaj en la tujeco de sia amo?
Chu ghi vidas kio finfine okazas kaj chiam fine okazis, chiun provizoriston, flikiston,
eksterulon, partiiston, alarmemulon, nekredanton kiu iam petis ion de Ameriko?
Kian mokadon kaj malestiman neglektemon?
La spuro surshutita per la polvo de skeletoj,
Che la vojflanko aliaj malshate jhetitaj.

13

Rimoj kaj rimistoj forpasas, poemoj distilitaj de poemoj forpasas,
La svarmoj de la reflektantoj kaj la ghentilaj forpasas, kaj lasas cindrojn,
Admirantoj, importantoj, obeemuloj, faras nur la grundon de literaturo,
Ameriko sin pravigas, donu al ghi tempon, nenia alivestajho povas ghin trompi au kashi
antau ghi, ghi estas sufiche senemocia,
Nur al la similoj de si ghi antaueniros por renkonti ilin,
Se ghiaj poetoj aperos, ghi siatempe antaueniros por renkonti ilin, estas nenia timo pri
eraro,
(La pruvo de poeto devas esti severe prokrastata ghis lia lando lin sorbos tiel ameme,
kiel li sorbis ghin.)

Li mastras kies spirito mastras, li gustas plej dolche kiu rezultas plej dolche finfine,
La sango de la forto amata de tempo estas mallimigo;
En la bezono de kantoj, filozofio, tauga indighena grand-opero, shipmetio, ia ajn metio,
Li au shi estas plej granda kiu kontribuas la plej grandan originalan praktikan

ekzemplon.

Jam neimpresighema raso, silente elighante, aperas sur la stratoj,
La homaj lipoj salutas nur farantojn, amantojn, plenumantojn, pozitivajn sciantojn,
Baldau ne plu estos pastroj; mi diras, ilia laboro estas finita,
Morto estas sen krizoj chi tie, sed vivo estas konstantaj krizoj chi tie,
Chu via korpo, tagoj, manieroj, estas superbaj? post morto vi estos superba,
Justeco, sano, memrespekto, malobstrukcas la vojon kun nerezistebla potenco;
Kiel vi audacas meti ion ajn antau homon?

14

Envicighu malantau min, Shtatoj!
Homo antau chio – mi mem, tipa, antau chio.
Donu al mi la pagon por kiu mi servis,
Donu al mi kanti la kantojn de la granda Ideo, prenu la tutan ceteron,
Mi amis la teron, sunon, bestojn, mi malestimis richon,
Mi donis almozon al chiu kiu petis, defendis la stultajn kaj frenezajn, dedichis mian
 enspezon kaj laboron al aliaj,
Malamis tiranojn, ne argumentis rilate Dion, paciencis kaj indulgis al la popolo, respekte
 deprenis mian chapelon al nenio konata au nekonata,
Iris libere kun potencaj needukitaj personoj kaj kun la junaj, kaj kun la patrinoj de
 familioj,
Legis chi tiujn foliojn al mi mem en la libera aero, provis ilin che arboj, steloj, riveroj,
Malakceptis kio ajn insultis mian propran animon au profanis mian korpon,
Pretendis nenion al mi kion mi ne zorge pretendis por aliaj egalrajte,
Rapidis al la tendaroj, kaj kamaradojn trovis kaj akceptis de chiu Shtato,
(Sur chi tiu brusto multaj mortantaj soldatoj klinis por spiri sian lastan spiron,
Chi tiu brako, chi tiu mano, chi tiu vocho, nutris, levis, restauris,
Al vivo revokante multajn malsane kushantajn korpojn);
Mi voluntas atendi por esti komprenata per la kresko de la gusto de mi mem,
Malakceptante neniun, permesante chiujn.

(Diru, ho Patrino, chu mi ne estis fidela al via pensado?
Chu mi ne tra vivo tenis vin kaj viajn antau mi?).

15

Mi jhuras mi komencas vidi la signifon de chi tiuj aferoj,
Ne estas la tero, ne estas Ameriko, kiu estas tiel granda,
Estas mi kiu estas granda au estos granda, estas Vi tie supre, au iu ajn,
Estas marshi rapide tra civilizoj, registaroj, teorioj,
Tra poemoj, spektakloj, elmontrajhoj, por formi individuojn.

Sub chio, individuoj,
Mi jhuras ke nenio estas bona al mi nun kiu malatentas individuojn,
La Amerika interkonsento estas tute kun individuoj,

La sola registaro estas tiu kiu detale konsideras individuojn,
La tuta teorio de la universo estas direktita senerare al unu sola individuo – nome al Vi.

(Patrino! kun subtila sento severa, kun la nuda glavo en via mano,
Mi vidis vin finfine rifuzi trakti individuojn krom senpere.)

16

Sub chio, Naskigho,
Mi jhuras ke mi restos fidela al mia propra naskigho, kiel pia au malpia ghi estu;
Mi jhuras ke mi estas charmata de nenio krom naskigho,
Viroj, virinoj, urboj, nacioj, estas belaj nur pro naskigho.

Sub chio estas la Esprimado de amo por viroj kaj virinoj,
(Mi jhuras mi vidis sufiche da malnoblaj kaj senpotencaj manieroj esprimi amon por
viroj kaj virinoj,
Post chi tiu tago mi prenos miajn proprajn manierojn esprimi amon por viroj kaj virinoj).

Mi jhuras mi havos chiun kvaliton de mia raso en mi mem,
(Parolu kiel vi volus, nur li taugas por chi tiuj Shtatoj kies manieroj similas la audacon
kaj subliman turbulentecon de la Shtatoj).

Sub la lecionoj de aferoj, spiritoj, Naturo, registaroj, posedrajtoj, mi jhuras ke mi
perceptas aliajn lecionojn,
Sub chio al mi estas mi mem, al vi vi mem (la sama monotona malnova kanto).

17

Ho mi vidas flagranta ke chi tiu Ameriko estas nur vi kaj mi,
Ghiaj potenco, armiloj, atesto, estas vi kaj mi,
Ghiaj krimoj, mensogoj, shteloj, transiroj, estas vi kaj mi,
Ghia Kongreso estas vi kaj mi, la oficiroj, kapitoloj, armeoj, shipoj, estas vi kaj mi,
Ghiaj senfinaj gravedecoj je novaj Shtatoj estas vi kaj mi,
La milito (tiu milito tiel sanga kaj severa, la milito kiun mi volas de nun forgesi), estis vi
kaj mi,
Naturaj kaj artefaritaj estas vi kaj mi,
Libereco, lingvo, poemoj, oficoj, estas vi kaj mi,
Pasinteco, nuntempo, estonteco, estas vi kaj mi.

Mi ne audacas neglekti iun parton de mi mem,
Ne iun parton de Ameriko, bonan au malbonan,
Ne konstrui por tio kio konstruas por homaro,
Ne ekvilibrigi rangojn, kompleksiojn, kredojn, kaj la seksojn,
Ne pravigi sciencon nek la marshon de egaleco,
Nek nutri la arogantan sangon de la karno, amata de tempo.

Mi estas por tiuj kiuj neniam estis mastritaj,

Por viroj kaj virinoj kies temperamentoj neniam estis mastritaj,
Por tiuj kiujn leghoj, teorioj, konvencioj, neniam povas mastri.

Mi estas por tiuj kiuj marshas flank-al-flanke kun la tuta tero,
Kiuj inauguras unu por inauguri chiujn.

Mi ne lasos min venki de la fiksrigardo de neraciaj aferoj,
Mi penetros kio estas en ili, kio estas sarkasma kontraŭ mi,
Mi igos urbojn kaj civilizojn cedi al mi,
Jen kion mi lernis de Ameriko — ghi estas la kvanto, kaj ghin mi instruas denove.

(Demokratio, dum armiloj estis chie celumitaj al via brusto,
Mi vidis vin serene naski senmortajn infanojn, vidis en songhoj vian dilatighantan
figuron,
Vidis vin per sternighanta mantelo kovranta la mondon.)

18

Mi alfrontos chi tiujn elmontrajhojn de la tago kaj nokto,
Mi scios chu mi estos malpli ol ili,
Mi vidos chu mi ne estas tiel majesta kiel ili,
Mi vidos chu mi ne estas tiel subtila kaj reala kiel ili,
Mi vidos chu mi estos malpli malavara ol ili,
Mi vidos chu mi havas nenian signifon, dum la domoj kaj ŝipoj havas signifon,
Mi vidos chu la fishoj kaj birdoj estos sufichaj por si mem, kaj mi ne estos suficha por mi
mem.

Mi kontrauigas mian spiriton kontraŭ viaj, vi orboj, kreskoj, montoj, brutoj,
Malgrau via abundo, mi sorbas vin chiujn en min mem, kaj ighas mem la mastro,
Ameriko, izolita sed enkorpiganta chion, kio ghi estas finfine krom mi mem?
Chi tiuj Shtatoj, kio ili estas krom mi mem?

Mi scias kial la tero estas kruda, tantaliga, malica, tio estas por mi,
Mi prenas vin speciale por esti miaj, vi teruraj, krudaj formoj.

(Patrino, klinighu, klinu proksimen al mi vian vizaghon,
Mi ne scias la celon de chi tiuj komplotoj kaj militoj kaj prokrastoj,
Mi ne scias la sukceson de realigho, sed mi scias ke tra milito kaj krimado via laboro
dauras, kaj devas ankoraŭ daŭri.)

19

Tiel che la bordo de la blua Ontario,
Dum la ventoj ventumis min kaj la ondoj venis soldatate en mia direkto,
Mi ekscitighis je la pulsadoj de potenco, kaj la sorcho de mia temo tushis min,
Ghis la histoj kiuj tenis min chesigis siajn ligadojn sur mi.

Kaj mi vidis la liberajn animojn de poetoj,
La plej noblaj bardoj de pasintaj epokoj pashegis antaŭ mi,
Strangaj grandaj viroj, longe nevekitaĵ, nemalkashitaĵ, estis malkashitaĵ al mi.

20

Ho miaj ravitaj versoj, mia alvoko, ne moku min!
Ne por la bardoj de la pasinteco, ne por envoki ilin mi lanchis vin for,
Eĉ ne por voki tiujn noblajn bardojn ĉi tien ĉe la bordoj de la blua Ontario,
Mi kantis tiel kaprice kaj laute mian sovaghan kanton.

Bardojn por mia propra lando sole mi envokas,
(Ĉar la milito la milito estas finita, la kampo estas prilevita),
Ĝhis oni komencos marŝojn de nun triumfajn kaj antaŭenajn,
Por gajigi, ho Patrino, vian senliman atendantan animon.

Bardoj de la granda Ideo! bardoj de la pacaj inventaĵoj! (ĉar la milito, la milito estas finita)!
Tamen bardoj de latentaj armeoj, miliono da soldatoj atendantaj ĉiampretaj,
Bardoj kun kantoj kiel el brulanta brago aŭ la forkitaj strioj de la fulmo!
La bardoj de la vasta Ohio, de Kanado – bardoj de Kalifornio! landinternaj bardoj –
bardoj de la milito!
Vin per mia sorĉo mi envokas.

INVERSIGOJ

Iru malantaŭe kio staris antaŭe,
Antaŭeniru al la antaŭo kio estis malantaŭe,
Proponu novajn proponojn fanatikuloj, stultuloj, malpuruloj,
Estu prokrastitaj la malnovaj proponoj,
Serĉu viro plezuron ĉie krom en si mem,
Serĉu virino felichon ĉie krom en si mem.

AUTUNAJ ROJOJ

REZULTE DE, KTP.

Rezulte de provizo da someraj pluvoj,
Au kapricaj rojoj fluantaj en autuno,
Au la disfluoj de multaj riveretoj borderitaj de herboj,
Au la subteraj mar-rojetoj sin direktantaj al la maro,
Kantojn de daurigitaj jaroj mi kantas.

La chiammodernaj kaskadetoj de vivo unue (baldau, baldau kunmiksighontaj,
Kun la malnovaj fluoj de morto).

Kelkaj sin tredantaj tra la agroj au la arbaroj de Ohio,
Kelkaj malsupren lau la kanjonoj de Kolorado el fontoj de eterna negho,
Kelkaj duonkashitaj en Oregono, au fore sude en Teksaso,
Kelkaj en la nordo trovantaj sian vojon al Erio, Niagaro, Otavo,
Kelkaj al la golfoj de Atlantiko, kaj tiel al la granda sala maravko.

En vi, kiu ajn vi estas, mian libron rigardanta,
En mem mi, en la tuta mondo, chi tiuj fluoj fluantaj,
Chiuj al la mistika oceano tendencantaj.

Fluoj por komenci novan kontinenton,
Salutoj senditaj al la solida el la likva,
Kunfandigho de oceano kaj tero, teneraj kaj pensemaj ondoj,
(Ne sekuraj kaj pacaj sole, ondoj ekscititaj kaj minacaj ankau,
El la profundoj de la abismaj ondoj de la shtormo, kiu scias de kie?
Furiozantaj super la vastejo, kun multaj rompigitaj velstangoj kaj chifonitaj veloj).

Au de la maro de Tempo, kolektanta vastiganta chion, mi alportas,
Ventamasan drivajhon da marherboj kaj konkoj.

Ho konketoj, tiel kuriozhelicaj, tiel klarmalvarmaj kaj senvochaj,
Chu vi ne, konketoj, al la timpanoj de tempioj tenate,
Murmurojn kaj ehhojn ankoraŭ elvokos, la muzikon de eterno, malfortan kaj foran,
Alblovetatajn landinternen, senditajn de la rando de Atlantiko, sonojn por la animo de la
prerioj,
Flustratajn reehhojn, akordojn por la orelo de la Okcidento ghoje sonantajn,
Viajn sciigojn malnovajn, tamen chiam novajn kaj netradukeblajn,
Infinitezimojn el mia vivo, kaj multaj vivoj,
(Char ne mian vivon kaj jarojn sole mi donas – chion, chion mi donas),
Chi tiujn senhejmulojn de la profundo, jhetitajn senhelpaj,
Portitajn de la akvo sur la marbordoj de Ameriko?

LA REVENO DE LA HEROOJ

1

Por la landoj kaj por chi tiuj pasiaj tagoj kaj por mi mem,
Nun mi por iom da tempo retirighas al vi, ho grundo de autunaj kampoj,
Klinighante sur vian bruston, donante min al vi,
Respondante la pulsadojn de via sana kaj egalanima koro,
Agordante verson por vi.

Ho tero, kiu havas nenian vochon, konfidu al mi vochon,
Ho rikolto de miaj teroj – ho senlimaj someraj kreskoj,
Ho malavara bruna akushema tero – ho senfina svarmanta utero,
Kanto por rakonti vin.

2

Chiam sur chi tiu scenejo,
Estas ludata la trankvila chiujara dramo de Dio,
Belegaj procesioj, kantoj de birdoj,
Sunlevigho, kiu plej plene nutras kaj plej multe freshigas la animon,
La hulanta maro, la ondoj sur la bordo, la muzikaj, fortaj ondoj,
La arbaro, la bravaj arboj, la sveltaj, mallarghighantaj arboj,
La liliputaj sennombraj armeoj de la herbo,
La varmo, la ekpluvoj, la senmezuraj pashtejoj,
La pejzaghoj de la neghoj, la libera orkestro de la ventoj,
La etendighanta malpeze pendita tegmento de nuboj, la klara lazuro kaj la arghentaj
franghoj,
La altaj ekspansiantaj steloj, la serenaj gestvokantaj steloj,
La movighantaj gregoj kaj herdoj, la ebenajhoj kaj smeraldaj herbejoj,
La elmontrajhoj de chiuj diversaj teroj kaj chiuj kreskoj kaj produktajhoj.

3

Fekunda Ameriko – hodiau,
Vi estas chie primetita per naskoj kaj ghojoj!
Vi knaras pro richajhoj, via richo vestas vin kiel vindovesto,
Vi ridas laute kun doloro de grandaj posedajhoj,
Miriada chirkauvolvighanta vivo kiel interplektighantaj grimpoplantoj kunligas vian
tutan vastan bienon,
Kiel ia grandega shipo, sharghita ghis la akvorando, vi veturas enhavenen,
Kiel pluvo falas de chielo kaj vaporoj levighas de tero, tiel la valoregaj valoroj falis sur
vin kaj levighis el vi;
Vi envio de la globo! vi miraklo!
Vi, banata, sufokata, naghanta en abundo,
Vi felicha Mastrino de la trankvilaj tenejoj,
Vi Preria Damo, kiu sidas en la mezo kaj elrigardas sur la mondon, kaj rigardas Orienten

kaj rigardas Okcidenten,
Disdonantino, kiu per vorto donas mil mejlojn, mil bienojn, kaj maltrafas nenion,
Vi chiuakceptantino – vi gastama (vi sola estas gastama, kiel Dio estas gastama).

4

Kiam laste mi kantis, malghoja estis mia vocho,
Malghojaj estis la elmontrajhoj chirkau mi kun surdigaj bruoj de malamo kaj fumo de
 milito;
Meze de la konflikto, la herooj, mi staris,
Au pasis per malrapidaj pashoj tra la vunditaj kaj mortantaj.

Sed nun mi kantas ne militon,
Nek la ritman marshadon de soldatoj, nek la tendojn de tendaroj,
Nek la regimentojn, haste alvenantajn disetendighantajn en linion de batalo;
Ne plu la malghojajn, nenaturajn elmontrajhojn de milito.

Chu petis spacon tiuj ardaĵ senmortaj vicoj, la unuaj elpashantaj armeoj?
Petas spacon, ho ve, la makabraĵ vicoj, la armeoj teruraj, kiuj sekvis.

(Pasu, pasu, vi fieraj brigadoj, kun viaj pashegantaj tendeneĉaj gamboj,
Kun viaj shultroj, junaj kaj fortaj, kun viaj tornistroj kaj viaj musketoj;
Kiel ekzaltite mi staris kaj observis vin tie kie, komencante, vi marshis.

Pasu – tiam klakadu tamburoj denove,
Char armeo ekaperas, ho alia kolektighanta armeo,
Svarmanta, trenighanta en la malantaŭo, ho vi terura kreskadanta armeo,
Ho vi regimentoj tiel kompatindaj, kun via mortiga diareo, kun via febro,
Ho la kripligitaj karuloj de mia lando, kun la abunda sanga bandagho kaj la lambastono,
Jen, via palega armeo sekvas.)

5

Sed en ĉi tiujn tagojn de heleco,
Sur la malproksim-etendighanta belan pejzaghon, la vojojn kaj vojetojn, la
 altesharshitajn bien-ĉarojn, kaj la fruktojn kaj tenejojn,
Chu la mortaj devus sin trudi?

Ahh la mortaj lau mi ne difektas, ili bone sidas en Naturo,
Ili tre bone sidas en la pejzagho sub la arboj kaj herbo,
Kaj lau la rando de la ĉielo en la fora marghenon de la horizonto.

Nek forgesas mi vin, Foririntoj,
Nek en vintro au somero, miaj perditaj,
Sed precipe en la libera aero kiel nun, kiam mia animo estas ekzaltita kaj trankvila, kiel
 plachaj fantomoj,
Viaj memoroj, levighante, glitas silente preter mi.

Mi vidis tiun tagon la revenon de la herooj,
 (Tamen la herooj neniam superitaj neniam revenos,
 Ilin tiun tagon mi ne vidis).

Mi vidis la senfinajn korpusojn, mi vidis la procesiojn de armeoj,
 Mi vidis ilin alvenantaj, defilantaj lau siaj divizioj,
 Fluantaj norden, ilia laboro finita, starantaj tendare iom da tempo en amasoj da potencaj
 tendaroj.

Neniaj feriaj soldatoj — junecaj, tamen veteranoj,
 Ellacitaj, malhelaj, belaj, fortaj, de la raso de hejmbieno kaj metiejo,
 Harditaj de multaj longaj kampanjoj kaj shvitaj marshoj,
 Alkutimigitaj sur multaj forte pribatalataj sangaj kampoj.

Pauzo — la armeoj atendas,
 Miliono da ardaj batalintaj konkerantoj atendas,
 La mondo ankau atendas, tiam milde kiel la noktighanta nokto kaj certe kiel la tagigho,
 Ili fandighas, ili malaperas.

Ghojegu, ho landoj! venkintaj landoj!
 Ne tie via venko sur tiuj rughaj tremantaj kampoj,
 Sed chi tie kaj de nun via venko.

Fandighu, forfandighu, vi armeoj — disighu, vi bluestitaj soldatoj,
 Reintermiksigu, formetu por chiam viajn mortigajn armilojn,
 Aliaj la armiloj la kampoj de nun por vi, au Sudo au Nordo,
 Kun pli sanaj militoj, dolchaj militoj, vivdonaj militoj.

Laute, ho mia gorgo, kaj klare, ho animo!
 La sezono de dankoj kaj la vocho de plenliverado,
 La kanto de ghojo kaj potenco por senlima fekundeco.

Chiu kultivataj kaj nekultivataj kampoj vastighas antau mi,
 Mi vidas la verajn arenojn de mia raso, au unuajn au lastajn,
 La senkulpajn kaj fortajn arenojn de la homo.

Mi vidas la heroojn che aliaj laboroj,
 Mi vidas bone-svingataj en iliaj manoj la pli bonajn armilojn.

Mi vidas, kie la Patrino de Chiu,
 Per plenesploranta okulo elrigardas, restas longe,
 Kaj kalkulas la diversan kolektadon de la produktoj.

Okupita, la malproksima, la sunlumita panoramo,
Prerio, fruktarbaro, kaj flava greno de la Nordo,
Kotono kaj rizo de la Sudo kaj la Luiziana kano,
Malfermitaj neprisemitaj novaloj, richaj kampoj de trifolio kaj fleo,
Bovinoj kaj chevaloj pashtighantaj, kaj gregoj da shafoj kaj porkoj,
Kaj multaj majestaj riveroj fluantaj kaj multaj gajaj rojoj,
Kaj sanaj altejoj kun herbe parfumitaj ventetoj,
Kaj la bona verda herbo, tiu delikata miraklo la chiam reaperanta herbo.

8

Laboradu, herooj! rikoltu la produktojn!
Ne sole sur tiuj militemaj kampoj la Patrino de Chiuj,
Kun pufighinta formo kaj flagrantaj okuloj observis vin.

Laboradu, herooj! laboru bone! manipulu la armilojn bone!
La Patrino de Chiuj, ankoraŭ chi tie, kiel chiam, shi observas vin.

Tre kontenta, Ameriko, vi vidas,
Tute tra la kampoj de la Okcidento tiujn rampantajn monstrojn,
La homajn-diajn inventaĵojn, la laborshparajn instrumentojn,
Vidas movighantaj en chiu direkto penetritaj kiel per vivo la rotaciantajn fojnrastilojn,
La vapormovatajn rikoltmashinojn kaj la chevalmovatajn mashinojn,
La motorojn, drashilojn de greno kaj purigilojn de greno, bone apartigantaj la pajlon, la
viglan laboron de la forkegmashino,
Vidas la pli novan segejon, la sudan koton-sensematoron, kaj la rizpurigilon.
Sub via rigardo, ho Patrino,
Per chi tiuj kaj aliaj kaj per siaj propraj fortaj manoj la herooj rikoltas.

Chiuj kolektas kaj chiuj rikoltas,
Tamen krom pro vi, ho Potenca, nenia falchilo svingighus kiel nun en sekureco,
Nenia maiztrunketo svinge pendigus kiel nun ghiajn silkajn kvastojn en paco.

Sub vi sole ili rikoltas, ech nur filamenton da fojno, sub via granda vizagho sole,
Rikoltas la tritikon de Ohio, Iliojso, Viskonsino, chiun aristan spikon sub vi,
Rikoltas la maizon de Misurio, Kentukio, Tenesio, chiu spiko en ghia helverda shelo,
Kolektas la fojnon al ghiaj miriadoj da subtegmentoj en la odoraj trankvilaj tenejoj,
Avenon al ghiaj ujoj, la terpomon, la fagopiron de Michigano, al iliaj;
Kolektas la kotonon en Misisipio au Alabamo, elfosas kaj akumulas la oran bataton de
Georgio kaj la Karolinoj,
Tondas la lanon de Kalifornio kaj Pensilvanio,
Falchas la linon en la Mezaj Shtatoj, au kanabon au tabakon en la Landlimejoj,
Plukas la pizon kaj la fabon, au tiras pomojn de sur la arboj au grapolojn da uvoj de sur
la vitoj,
Au ion ajn kio maturighas en chiuj tiuj Shtatoj au Nordaj au Sudaj,
Sub la brilanta suno kaj sub vi.

ESTIS INFANO KIU ELIRIS

Estis infano kiu eliris chiun tagon,
Kaj la unua objekto kiun li rigardis, tiu objekto li farighis,
Kaj tiu objekto farighis parto de li por la tago au certa parto de la tago,
Au por multe da jaroj au etendighantaj cikloj da jaroj.

La fruaj lilakoj farighis parto de chi tiu infano,
Kaj herbo kaj blankaj kaj rughaj ipomeoj, kaj blankaj kaj rughaj trifolioj, kaj la kanto de la
fibibirdo,
Kaj la Tria-monataj shafidoj kaj la rozeta idaro de la porkino, kaj la chevalido de la
chevalino kaj la bovido de la bovino,
Kaj la brua idaro de la stalkorto au che la marcho de la lagetflanko,
Kaj la fishoj sin suspensiigantaj tiel kurioze tie malsupre, kaj la bela kurioza likvo,
Kaj la akvoplantoj kun siaj graciaj plataj kapoj, chiuj farighis parto de li.

La kamposprosoj de Kvara-monato kaj Kvina-monato farighis parto de li,
Vintrogrenaj sprosoj kaj tiuj de la heleflava maizo, kaj la mangheblaj radikoj de la
ghardeno,
Kaj la pomarboj, kovritaj de floroj kaj la fruktoj poste, kaj arbarberoj, kaj la plej
ordinaraj herbachoj apud la vojo,
Kaj la maljuna drinkulo, shancelighanta hejmen de la ekstera necesejo de la drinkejo de
kiu li laste sin levis,
Kaj la instruistino kiu pasis sur sia vojo al la lernejo,
Kaj la amikaj knaboj kiuj pasis, kaj la kverelemaj knaboj,
Kaj la netaj kaj freshvangaj knabinoj, kaj la nudpiedaj negraj knabo kaj knabino,
Kaj chiuj shanghighoj de urbo kaj kamparo, kien ajn li iris.

Liaj propraj gepatroj, li kiu generis lin, kaj shi kiu koncipis lin en sia utero kaj naskis lin,
Ili donis al chi tiu infano pli de si mem ol tion,
Ili donis al li poste chiun tagon, ili farighis parto de li.

La patrino hejme kviete metanta la telerojn sur la vespermanghan tablon,
La patrino kun mildaj vortoj, puraj shia chapo kaj robo, sana odoro deighanta de shiaj
persono kaj vestoj dum shi preteriras,
La patro, forta, memsuficha, vireca, malafabla, kolera, nejusta,
La bato, la rapida lauta vorto, la avara marchandado, la ruza logo,
La familiaj kutimoj, la lingvo, la kompanio, la mebloj, la sopiranta kaj shvelanta koro,
Amemo kiu ne lasas sin kontraudiri, la sento de kio estas reala, la penso chu malgrau
chio ghi montrighos nereala,
La duboj de la tagohoroj kaj la duboj de la noktohoroj, la kuriozaj chu kaj kiel,
Chu kio shajnas tia estas tia, au chu ghi estas tute ekbriloj kaj eretoj?
Viroj kaj virinoj amasighantaj rapide en la stratoj, se ili ne estas ekbriloj kaj eretoj, kio ili
estas?
La stratoj mem kaj la fasadoj de domoj, kaj varoj en la fenestroj,

Veturiloj, jungitaroj, la peztabulaj varfoj, la grandega transirantaro che la pramoj,
La vilagho sur la altejo, vidata de malproksime che sunsubiro, la rivero intere,
Ombroj, aureolo, kaj nebulo, la lumo falanta sur tegmentojn kaj gablojn de blanko au
bruno du mejlojn for,
La skuno proksima dormeme malsupreniranta lau la tajdo, la malgranda boato
loztrenata malantaue,
La hastantaj rulfalantaj ondoj, rapide rompataj krestoj, plaudantaj,
La stratumoj de kolorigitaj nuboj, la longa streko de brunpurpuro fore sola, la etendigho
de pureco en kiu ghi kushas senmove,
La rando de la horizonto, la fluganta markorvo, la odoro de marmarcho kaj bordkoto,
Chi tiuj farighis parto de tiu infano kiu eliris chiun tagon, kaj kiu nun eliras, kaj chiam
eliros chiun tagon.

MALNOVA IRLANDO

Fore de chi tie meze de insulo de mirinda beleco,
Kauranta super tombo, antikva malghoja patrino,
Antaue reghino, nun magra kaj chifona, sidanta sur la grundo,
Shiaj maljunaj blankaj haroj pendantaj tautite chirkau shiaj shultroj,
Che shiaj piedoj ne-uzata regha harpo falinta,
Longe silenta, shi ankaŭ longe silenta, funebranta sian morttuke envolvitan esperon kaj
heredanton,
De chiuj sur la tero shia koro plej plena de malghojo, char plej plena de amo.

Tamen vorto, antikva patrino,
Vi bezonas kauri tie ne plu sur la malvarma grundo kun la fronto inter la genuoj,
Ho vi ne bezonas sidi tie vualite en viaj maljunaj blankaj haroj tiel tautitaj,
Char sciŭ vi ke tiu kiun vi funebras ne estas en tiu tombo,
Estis iluzio, la filo kiun vi amas ne estis vere morta,
La Sinjoro ne estas morta, li levighis denove juna kaj forta en alia lando,
Ghuste kiam vi ploris tie apud via falinta harpo apud la tombo,
Tio pri kio vi ploris estis translaciita, pasigita de el la tombo,
La ventoj favoris kaj la maro veligis ghin,
Kaj nun kun roza kaj nova sango,
Movighas hodiaŭ en nova lando.

LA URBA MORTODOMO

Apud la urba mortodomo apud la pordego,
Senokupe promenante irante mian vojon for de la bruado,
Mi scivole pauzas, char jen, formo de elpelitino, kompatinda morta prostituitino
alportata,
Shian kadavron oni demetas nedepostulita, ghi kushas sur la malseka brika pavimo,
La dia virino, shia korpo, mi vidas la korpon, mi rigardas ghin sola,
Tiun domon iam plenan de pasio kaj beleco, chion alian mi ne rimarkas,

Nek silento tiel malvarma, nek fluanta akvo el la krano, nek odoroj mortaj impresas
min,
Sed la domo sola – tiu mirinda domo – tiu delikata bela domo – tiu ruino!
Tiu senmorta domo pli ol chiuj vicoj da loghejoj iam konstruitaj!
Au blankkupola kapitolo kun majesta figuro supre, au chiuj malnovaj altspajraj
katedraloj,
Tiu malgranda domo sola pli ol ili chiuj – kompatinda, senespera domo!
Bela, timiga vrako – loghejo de animo – ghi mem animo,
Nedepostulita, evitata domo – prenu unu spiron de miaj tremantaj lipoj,
Prenu unu larmon, faligitan flanken, kiam mi ekiras, pro penso de vi,
Morta domo de amo – domo de folo kaj peko, chifita, dispremita,
Domo de vivo, antaue parolanta kaj ridanta – sed ahh, kompatinda domo, morta ech
tiam,
Monatojn, jarojn, ehanta, garnita domo – sed morta, morta, morta.

CHI TIU KOMPOSHTO

1

Io ekkonsternas min kie mi pensis ke mi estis plej sekura,
Mi retirighas de la silenta arbaro kiun mi amis,
Mi ne iros nun sur la pashtejojn promeni,
Mi ne deprenos la vestojn de mia korpo por renkonti mian amanton, la maron,
Mi ne tushigos mian karnon al la tero, kiel al alia karno, por renovigi min.

Ho kiel estas eble ke la grundo mem ne malsanighas?
Kiel vi povas esti vivaj, vi kreskajhoj de printempo?
Kiel vi povas liveri sanon, vi sango de herboj, radikoj, fruktarbaroj, greno?
Chu oni ne konstante metas malsanecajn kadavrojn en vin,
Chu chiu kontinento ne estas traktata ree kaj ree per putraj mortaj?

Kien vi formetis iliajn kadavrojn?
Tiujn drinkemulojn kaj manghegulojn de tiom da generacioj?
Kien vi deherpis la tutan fian likvon kaj viandon?
Mi ne vidas iom de ghi sur vi hodiau, au eble mi eraras,
Mi kurigos sulkon per mia plugilo, mi premos mian shpaton tra la grundo kaj
suprenturnos ghin de sube,
Mi certas ke mi malkashos iom de la fia viando.

2

Rigardu chi tiun komposhton! rigardu ghin bone!
Eble chiu ereto iam konstituis parton de malsanulo – tamen rigardu!
La herbo de printempo kovras la preriojn,

La fabo ekeligas senbrue tra la grundo en la ghardeno,
La delikata lanco de la cepo trapikas supren,
La pomburghonoj kunamasighas sur la pombranĉoj,
La resurekto de la tritiko aperas kun pala vizagho el ghiaj tomboj,
La koloreto vekighas chie sur la saliko kaj la moruso,
La virbirdoj karolas matene kaj vespere, dum la birdinoj sidas sur sia nesto,
La idoj de kortbirdoj trarompas tra la kovitaj ovoĵ,
La novnaskitoj de bestoj aperas, la bovido naskita de el la bovino, la chevalido de el la
chevalino,
El ghia altajheto fidele levighas la malhelverdaj folioj de la terpomo,
El ghia teramaso levighas la flava maiztrunketo, la lilakoj floras en la domkortetoj,
La somera kreskado estas naiva kaj senzorga super chiuj tiuj stratumoj da putraj mortaj.

Kia kemio!
Ke la ventoj estas vere ne infektaj,
Ke chi tiu estas nenia trompulo, chi tiu travidebla verd-lavo de la maro kiu tiel ame
serchas min,
Ke estas sekure lasi ghin leki mian nudan korpon chie kaj chie per ghiaj langoj,
Ke ghi ne endangherigos min per la febroj kiuj metis sin en ghin,
Ke chio estas pura por chiam kaj chiam,
Ke la malvarmeta trinko de la puto gustas tiel bone,
Ke rubusberoj estas tiel bongustaj kaj sukoplenaj,
Ke la fruktoj de la pomarbaro kaj la orangharbaro, ke melonoj, vinberoj, persikoj, prunoj,
neniuj venenos min,
Ke kiam mi ripozas sur la herbo, mi ne malsanighas je ia malsano,
Kvankam vershajne chiu tigo de herbo levighas el kio iam estis kontagha malsano.

Nun min teruras la tero, ghi estas tiel trankvila kaj pacienca,
Ghi kreskigas tiajn dolchajn aferojn el tiaj putrajhoj,
Ghi giras sendifekta kaj senmakula sur sia akso, kun tiaj senfinaj sinsekvoj da malsanaj
kadavroj,
Ghi distilas tiajn ekskvizitajn ventojn el tia infuzita fetoro,
Ghi renovigas kun tiaj sensciaj rigardoj siajn abundegajn chiujarajn luksajn rikoltojn,
Ghi donas tiajn diajn materialojn al homoj, kaj akceptas tiajn postlasachojn de ili finfine.

AL MALSUKCESIGITA EUROPA REVOLUCIULO

Kuraghon ankoraŭ, mia frato au mia fratino!
Daurigu – Libereco estas subtenenda, kio ajn okazas;
Tio ne estas afero kiu estas subpremata de unu au du malsukcesoj, au ia nombro da
malsukcesoj,
Au de la indiferenteco au nedankemo de la popolo, au de ia nefideleco,
Au la elmontrado de la dentegoj de potenco, soldatoj, kanonoj, punaj statutoj.

Tio je kio ni kredas, atendas latentaj por chiam chie sur chiuj kontinentoj,
Invitas neniun, promesas nenion, sidas en kvieto kaj lumo, estas pozitiva kaj trankvila,

scias nenian malkuraghighon,
Atendante pacience, atendante sian tempon.

(Ne kantoj de lojaleco sola estas chi tiuj,
Sed kantoj de insurekcio ankau,
Char mi estas la jhurinta poeto de chiu sentima ribelulo chie en la mondo,
Kaj li kiu iras kun mi postlasas pacon kaj rutinon post li,
Kaj riskas perdi sian vivon je iu momento.)

La batalo furiozas kun multaj lautaj alarmoj kaj oftaj avancoj kaj retretoj,
La nekredanto triumfas, au supozas ke li triumfas,
La prizono, eshafodo, strangolilo, mankateno, fera koliero kaj plumbaj kugloj faras sian
laboron,
La nomitaj kaj nenomitaj herooj pasas al aliaj sferoj,
La grandaj prelegistoj kaj verkistoj estas ekzilitaj, ili kushas malsanaj en malproksimaj
landoj,
La afero dormas, la plej fortaj gorghoj estas sufokitaj per sia propra sango,
La junaj viroj mallevas siajn palpebrojn al la tero kiam ili renkontighas;
Sed malgrau chio chi, Libereco ne eliris el la loko, nek eniris la nekredanto en plenan
posedon,
Kiam libereco eliras el loko, ghi ne estas la unua iri, nek la dua au tria iri,
Ghi atendas, ghis chio cetera iros, ghi estas la lasta.

Kiam estas neniom pli da memoroj de herooj kaj martiroj,
Kaj kiam chiuj vivajhoj kaj chiuj animoj de viroj kaj virinoj estos forigitaj de iu parto de
la tero,
Tiam sole libereco au la ideo de libereco estos forigita de tiu parto de la tero,
Kaj la nekredanto venos al plena posedo.

Do kuraghon, Europa ribelanto, ribelantino!
Char ghis chio chesos, vi ankau ne devas chesi.

Mi ne scias por kio vi estas (mi ne scias por kio mi estas mem, nek por kio ia afero
estas),
Sed mi serchos zorge por ghi, ech en malsukcesigho,
En malvenko, malricho, miskompreno, malliberigho – char ili ankau estas grandaj.

Chu ni opiniis venkon granda?
Tia ghi estas – sed nun shajnas al mi, kiam ghi ne povas esti evitata, ke malvenko estas
granda,
Kaj ke morto kaj malsukceso estas grandaj.

NENOMITAJ LANDOJ

Nacioj dek mil jarojn antau chi tiuj Shtatoj, kaj multoble dek mil jarojn antau chi tiuj
Shtatoj,

Kunkolektitaj amasoj da epokoj, kiam viroj kaj virinoj kiel ni elkreskis kaj vojaghis sian
kurson, kaj forpasis,
Kiaj vastkonstruitaj urboj, kiaj ordemaj respublikoj, kiaj pashtistaj triboj kaj nomadoj,
Kiaj historioj, regantoj, herooj, eble transcendantaj chiujn aliajn,
Kiaj legĥoj, kutimoj, richecoj, artoj, tradicioj,
Kia edzeco, kiaj kostumoj, kiaj fiziologio kaj frenologio,
Kio pri libereco kaj sklaveco inter ili, kion ili pensis pri morto kaj la animo,
Kiuj estis spritaj kaj sagĥaj, kiuj belaj kaj poetaj, kiuj brutecaj kaj nedisvolvigĥintaj,
Nenia marko, nenia registro restas – kaj tamen ĥio restas.

Ho mi scias ke tiuj viroj kaj virinoj ne estis por nenio iom pli ol ni estas por nenio,
Mi scias ke ili apartenas al la plano de la mondo tiom multe kiom ni nun apartenas al
ghi.

Malproksime ili staras, tamen proksime al mi ili staras,
Kelkaj kun ovalaj vizagĥoj, kleraj kaj trankvilaj,
Kelkaj nudaj kaj sovaghaj, kelkaj kiel grandegaj kolektoj da insektoj,
Kelkaj en tendoj, gregistoj, patriarkoj, triboj, rajdistoj,
Kelkaj shtelvagantaj tra arbaroj, kelkaj vivantaj pace sur bienoj, laborantaj, rikoltantaj,
plenigantaj tenejojn,
Kelkaj trairantaj pavimitajn avenuojn, inter temploj, palacoj, fabrikoj, bibliotekoj,
elmontrajĥoj, kortegoj, teatroj, mirindaj monumentoj.

Chu tiuj miliardoj da viroj vere estas foririntaj?
Chu tiuj virinoj de la malnova sperto de la tero estas foririntaj?
Chu iliaj vivoj, urboj, artoj, restas sole kun ni?
Chu ili atingis nenion daŭran por si mem?

Mi kredas pri ĥiuj tiuj viroj kaj virinoj kiuj plenigis la nenomitajn landojn ke ĥiu
ekzistas ĥi tiun horon ĥi tie au aliloke, nevidebla al ni,
Precize proporcie al tio de kio li au shi kreskis en vivo, kaj el kion li au shi faris,
sentis, farighis, amis, pekis, en vivo.

Mi kredas ke tio ne estis la fino de tiuj nacioj au iu persono de ili iom pli ol ĥi tio estos
la fino de mia nacio au de mi;
De iliaj lingvoj, registaroj, edzeco, literaturo, produktoj, ludoj, militoj, manieroj, krimoj,
prizonoj, sklavoj, herooj, poetoj,
Mi suspektas ke iliaj rezultoj kurioze atendas en la ankoraŭ nevidata mondo,
kontraŭpartoj de kio aldonighis al ili en la vidata mondo,
Mi suspektas ke mi renkontos ilin tie,
Mi suspektas ke mi tie trovos ĥiun malnovan detalon de tiuj nenomitaj landoj.

KANTO DE PRUDENTO

La stratojn de Manhatano mi promenis meditante,

Pri Tempo, Spaco, Realo – pri tiaj kiel chi tiuj, kaj flank-al-flanke kun ili pri Prudento.

La fina ekspliko chiam restas esti farata pri prudento,
Malgranda kaj granda same falas kviete flanken de la prudento kiu taugas al
senmorteco.

La animo estas de si mem,
Chio konverghas al ghi, chio rilatas al kio sekvas,
Chio kion persono faras, diras, pensas, chio gravas,
Nenian agon povas viro au virino fari kiu tushas lin au shin en tago, monato, iu parto de
la senpera vivodauro au la horo de morto,
Sen tio ke la samo tushas lin au shin antaŭen poste tra la pera vivodauro.

La pera estas ghuste tiom kiom la senpera,
La spirito ricevas da la korpo ghuste tiom kiom ghi donas al la korpo, se ne pli.

Nenia vorto au faro, nenia venerea ulcero, miskolorigho, privateco de la onanisto,
Putreco de voremuloj au rumtrinkantoj, malversacio, ruzeco, perfido, murdo, delogo,
prostituado,
Ne havas rezultojn preter morto tiel reale kiel antaŭ morto.

Karitato kaj persona forto estas la solaj investajhoj kiuj ion valoras.

Nenia specifado estas necesa, chio kion masklo au femalo faras, kio estas vigla,
bonfarema, pura, estas tiom da profito al li au shi,
En la neshancelebla ordo de la universo kaj tra la tuta amplekso de ghi por chiam.

Kiu estis sagha, ricevas interezon,
Sovaghulo, krimulo, Prezidento, jughisto, bienisto, maristo, mehhanisto, literatoro, juna,
maljuna, estas same,
La interezo alvenos – chio alvenos.

Unuo, tutece, tushi nun, tushis siatempe, chiam tushos, la tutan pasintecon kaj la
tutan nuntempon kaj la tutan estontecon,
Chiaj kuraghaj agoj de milito kaj paco,
Chiaj helpoj donitaj al parencoj, fremduloj, la malrichaj, maljunaj, malghojaj, junaj
infanoj, vidvinoj, la malsanaj, kaj al evitataj personoj,
Chiaj abnegacioj, kiuj staris firme kaj fiere sur vrakoj, kaj vidis aliajn plenigi la sidlokojn
de la boatoj,
Chiaj oferado de materialo au vivo por la bona malnova afero, au por amiko, au por
opinio,
Chiaj penoj de entuziasmoj priridataj de iliaj najbaroj,
Chiaj senlima dolcha amo kaj valorega suferado de patrinoj,
Chiaj honestaj homoj, malhelpitaj en klopodoj registritaj au neregistritaj,
Chiaj grandeco kaj bono de antikvaj nacioj, kies fragmentojn ni heredas,
Chiaj bonajhoj de la dek-duoj da antikvaj nacioj, nesciataj al ni lau nomo, dato, situo,
Chio kio iam estis virece komencita, chu ghi sukcesis au ne,

Chiaj sugestoj de la dia menso de homo au de la dieco de lia busho, au de la formado el
liaj grandaj manoj,
Chio kio estas bone pensata au dirata chi tiun tagon sur iu parto de la globo, au sur iu el
la vagantaj steloj, au sur iu el la fiksitaj steloj, de tiuj tie kiel ne estas tie chi,
Chio kio estas de nun pensota au farota de vi, kiu ajn vi estas, au de iu ajn,
Tiuj estas, estis, estos heredajhoj de la identecoj de kiuj ili elighis, au elighos.

Chu vi konjektis ke ia afero vivas nur ghian momenton?
La mondo ne ekzistas tia, neniam partoj palpeblaj au nepalpeblaj ekzistas tiaj,
Nenia elplenumo ekzistas sen tio ke ghi estas de ia longe antaŭa elplenumo, kaj tiu de iu
alia,
Sen tio ke la plej malproksima konceptebla venas iom pli proksime al la komenco ol iu.

Kio ajn satigas animojn estas vera;
Prudento tute satigas la avidon kaj malsaton de animoj,
Nur ghi mem fine satigas la animon,
La animo havas tiun senmezuran fieron kiu ribelas de chiu leciono krom sia propra.

Nun mi frustras la vorton de la prudento kiu marshas flank-al-flanke kun tempo, spaco,
realo,
Kiu respondas la fieron kiu rifuzas chiun lecionon krom sia propra.

Kio estas prudento estas nedividebla,
Rifuzas apartigi unu parton de la vivo de chiu parto,
Ne apartigas la justajn de la nejustaj au vivajn de la mortaj,
Parigas chiun penson au agon per ghia korelativo,
Scias neniam eblan pardonemon au deputitan pekliberighon,
Scias ke la juna viro kiu trankvile endangherigis sian vivon kaj perdis ghin faris treege
bone por si mem sendube,
Ke li kiu neniam endangherigis sian vivon, sed retenas ghin ghis la maljunagho en richo
kaj ripozo, verŝajne atingis nenion por si mem kiu estas menciinda,
Scias ke nur tiu vere lernis kiu lernis preferi rezultojn,
Kiu favoras korpon kaj animon same,
Kiu perceptas ke la pera nepre sekvas la senperan,
Kiu en sia spirito en ia ajn krizo nek hastas nek evitas morton.

LA KANTANTINO EN LA PRIZONO

1

Ho vidajho de kompatato, hont' kaj malestim'!
Ho terura penso – konviktita anim'.
Sonoris la refreno lau la koridoro, la prizono,
Levighis al la tegmento, al la volboj de chielo supre,
Vershigante en inundoj da melodio en tonoj tiel penseme dolchaj kaj fortaj de kiuj la
similaj neniam estis audataj,

Atingante la malproksiman sentinelon kaj la armitajn gardistojn, kiuj chesigis sian
pashadon,
Haltigante la pulson de l' audanto pro ekstazo kaj ghojo.

2

La suno estis malalte en la okcidento unu vintran tagon,
Kiam lau mallarga trairejo inter la shtelistoj kaj banditoj de la lando,
(Tie kelkcentope sidantaj, velkintvizaghaj murdistoj, ruzaj monfalsistoj,
Kolektitaj al dimanĉa diservo inter prizonaj muroj, la gardistoj chirkaue,
Abundaj, bone armitaj, observantaj per atentaj okuloj),
Trankvile virino marshis, tenante per chiu mano po unu malgranda senkulpa infano,
Kiujn sidigante sur iliaj skabeloj apud shi sur la podio,
Shi, unue enkondukante per la instrumento mallautan kaj melodian preludon,
Per voĉo superanta chiujn, elkantis kuriozan malnovan himnon.

Animo enfermita de bendoj kaj stangoj,
Krias, helpu! ho helpu! kaj tordighas la manoj,
Blinditaj shiaj okuloj, shia brusto sanganta,
Nek pardon' trovighas, nek balzam' kvietiganta.

Senchese shi pashas tien kaj re,
Ho kormalsanaj tagoj! ho noktoj de ve'!
Nek mano de amiko, nek vizagho kompata,
Nek favor' venanta, nek vort' moligata.

Ne estis mi kiu tiel pekis ghin,
La senkompata korpo entrenis min;
Kvankam longe mi strebis kun kuragho,
Mi restis de l' korp' nur kunportita bagagho.

Mallibera anim' elportu dum spaco,
Ĉar frue au malfrue la certa graco;
Por viaj liberigo kaj hejmenporto,
Venos la chiela pardonisto morto.

Konviktito ne plu, nek hont', nek malestim'!
Foriru – Di-rajtigita anim'!

3

La kantantino chesis,
Unu ekrigardo pasis de shiaj klaraj trankvilaj okuloj tra chiuj tiuj suprenturnitaj
vizaghoj,
Stranga maro da prizonaj vizaghoj, mil diversaj, ruzaj, brutaj, sulkitaj kaj belaj vizaghoj,
Tiam levighante, repasante lau la mallargha trairejo inter ili,
Dum shia robo tushis ilin, susurante en la silento,

Shi malaperis kun siaj infanoj en la malhelon.

Dum sur chiujn, konviktitojn kaj armitajn gardistojn, antaŭ ol ili ekmovighis,
(Konviktito forgesanta prizanon, gardisto sian ŝargitan pistolon),
Silentego kaj paŭzo defalis mirindan minuton,
Kun profundaj duonsufokitaj plorsingultoj kaj sono de malbonaj viroj, klinitaj kaj
emociitaj al plorado,
Kaj la konvulsiaj spiradoj de la junulo, memoroj de hejmo,
La voĉo de la patrino en lulkanto, la vartado de la fratino, la felicha infaneco,
La longe enfermita spirito vekita al rememoro;
Mirinda minuto tiam – sed poste en la soleca nokto, al multaj, multaj tie,
Jarojn poste, eĉ en la horo de morto, la malgaja refreno, la melodio, la voĉo, la vortoj,
Rekomencitaj, la granda trankvila virino marshas la mallarghan trairejon,
La ululantan melodion denove, la kantantino en la prizono kantas,

Ho vidajho de kompato, hont' kaj malestim'!
Ho terura penso – konviktita anim'.

TRILADO POR LILAKTEMPO

Triladu al mi nun pro ghojo de lilaktempo (revenanta en rememoro),
Elektu al mi ho lango kaj lipoj por Naturo, rememorojn de plej frua somero,
Kolektu la bonvenigajn signojn (kiel infanoj kun shtonetoj au surfadenantaj konkojn),
Enmetu Aprilon au Majon, la hilojn kvakantajn en la laĝetoj, la elastan aeron,
Abelojn, papiliojn, la paseron kun ghiaj simplaj notoj,
Sialion kaj sagantan hirundon, ne forgesu la kolapton, flagrigantan siajn orajn flugilojn,
La trankvilan sunan brumon, la proksimighantan fumon, la vaporon,
Trembrilon de akvoj kun fishoj en si, la lazuran supre,
Chion kio estas ghaja kaj scintilanta, la rojojn fluantajn,
La acerarbaron, la freshajn Februarajn tagojn kaj la sukerfaradon,
La rubekolon kie li saltetas, brilokulan, brunbrustan,
Kun muzika klara voko che sunlevigho, kaj denove che sunsubiro,
Au flirtantan inter la arboj de la pomarbaro, konstruantan la neston de sia parulino,
La degelantan neghon de marto, la salikon eligantan siajn flavverdajn shosojn,
Ĉar printempo jam estas! la somero jam estas! kaj kio estas ĉi tio en ghi kaj de ghi?
Vi, animo, liberigita – la senripozeco por mi ne scias kio;
Ek, ni ne plu lantu ĉi tie, ni estu levighintaj kaj for!
Ho se oni nur povus flugi kiel birdo!
Ho eskapi, forveli kiel en ŝipo!
Glisi kun vi, ho animo, sur ĉio, en ĉio, kiel ŝipo sur la akvoj;
Kolektante ĉi tiujn sugestojn, la preludojn, la bluan ĉielon, la herbon, la matenajn
gutojn da roso,
La lilakaromon, la arbetojn kun malhelverdaj korformaj folioj,
Arbarvioletojn, la malgrandajn delikatajn palajn florojn nomatajn senkulpeco,
Specimenojn kaj specojn ne por ili solaj, sed por ilia etoso,
Por ornami la arbeton kiun mi amas – por kanti kun la birdoj,

Trilado pro ghojo pri lilaktempo, revenanta en rememoro.

SKIZOJ POR TOMBO
(George Peabody, Entombigita 1870)

1

Kion ni chantu, ho vi interne de chi tiu tombo?
Kiajn tabelojn, skizojn, pendigu por vi, ho milionulo?
La vivon kiun vi vivis ni ne konas,
Krom tio ke vi marshis viajn jarojn en komercado, meze de la frekventejoj de makleristoj,
Nek heroismo estis via, nek milito, nek gloro.

2

Silenta, mia animo,
Kun mallevighintaj palpebroj, kiel atendanta, meditis,
Turnighante de chiuj specimenoj, monumentoj de herooj.

Dum tra la internaj vidajhoj,
Senbrua levighis, fantomaj (kiel nokte Auroroj de la nordo),
Flagrantaj scenoj, profetaj, senkorpaj scenoj,
Spiritaj projekcioj.

En unu, inter la stratoj de la urbo domo de laboristo aperis,
Post lia taglaboro farita, pura, dolchaera, la gaslumilo brulanta,
La tapisho balaita kaj fajro en la gaja stovo.

En unu, la sankta naska sceno,
Felicha sendolora patrino naskis perfektan infanon.

En unu, che abunda matena mangho,
Sidis pacaj gepatroj kun kontentaj filoj.

En unu, duope kaj trioje, junaj homoj,
Centoj amasighantaj, marshis la padojn kaj stratojn kaj vojojn,
Al altkupola lernejo.

En unu, trio bela,
Avino, ama filino, filino de ama filino, sidis,
Babilante kaj kudrante.

En unu, lau chambraro nobla,
Meze de multaj libroj kaj gazetoj, pentrajhoj sur la muroj, finaj statuetoj,

Estis grupoj da amikaj submajstroj, mehhanistoj junaj kaj maljunaj,
Legante, interparolante.

Chiu, chiu elmontrajhoj de la laborada vivo,
Urba kaj kampara, de virinoj, viroj, kaj infanoj,
Iliaj bezonoj provizitaj, koloritaj en la suno, kaj nuancitaj chi-foje per ghojo,
Edzigho, la strato, la fabriko, bieno, la domchambro, loghchambro,
Laboro kaj peno, la bano, gimnastikejo, ludejo, biblioteko, kolegio,
La studento, knabo au knabino, antauenkondukata por esti instruata,
La malsanaj flegataj, la senshuaj shuataj, la orfo patrata kaj patrinata,
La malsataj nutrataj, la sendomaj domataj;
(La intencoj perfektaj kaj diaj,
La funkcioj, detaloj, bonsorte humanaj).

3

Ho vi, interne de chi tiu tombo,
De vi tiaj scenoj, vi senchesa, abunda donanto,
Registranta la donacojn de la tero, granda kiel la tero,
Via nomo iu tero, kun montoj, kampoj, kaj tajdoj.

Nek per viaj rojoj sole, vi riveroj,
Per vi, viaj bordoj, Konektikuto,
Per vi kaj via tuta svarmanta vivo, maljuna Tamiso,
Per vi, Potomako, lavanta la grundon kiun Vashingtono tretis, per vi Patapsko,
Vi Hudsono, vi senfina Misisipo – nek vi sole,
Sed al la profundaj maroj lanchighu, mia penso, lia memoro.

EL MALANTAU CHI TIU MASKO (Alfronti Portreton)

1

El malantau chi tiu kurbighanta krudtranchita masko,
Chi tiuj lumoj kaj ombroj, chi tiu dramo de la tuto,
Chi tiu kutima kurteno de la vizagho, enhavata en mi por mi, en vi por vi, en chiu por
chiu,
(Tragedioj, malghoj, ridado, larmoj – ho chielo!
La pasiaj svarmantaj ludoj kiujn kashis chi tiu kurteno!),
Chi tiu glazuro de la plej serena chielo de Dio,
Chi tiu tegajho de la svarmanta kavo de Satano,
Chi tiu mapo de la geografio de la koro, chi tiu senlima malgranda kontinento, chi tiu
nesondebla maro;
El la volvajhoj de chi tiu globo,
Chi tiu pli subtila astronomia orbo ol suno au luno ol Jupitero, Venuso, Marso,
Chi tiu kondensajho de la universo (ne, chi tie la sola universo,

Chi tie la ideo, tute en chi tiu mistika manpleno volvita);
Chi tiuj gravuritaj okuloj, flagranta al vi pasi al la estonta tempo,
Lanchi kaj giri tra spaco, rotacianta flanken, el chi tiuj elveni,
Al vi, kiu ajn vi estas – rigardo.

2

Vojaghanto de pensoj kaj jaroj, de paco kaj milito,
De juneco longe for kaj mezagho dekadencanta,
(Kiel la unua volumo de rakonto trarigardita kaj formetita, kaj chi tiu la dua,
Kantoj, aventuroj, spekulativoj, tuj fermighontaj),
Lantante momenton chi tie kaj nun, al vi mi kontraue turnighas,
Kiel sur la vojo au che ia porda aperturo hazarde, au malfermita fenestro,
Pauzante, klinighante, nudigante mian kapon, vi speciale mi salutas,
Tiri kaj krochi vian animon chi-foje neapartigeble kun la mia,
Tiam vojaghi vojaghi antauen.

VOCHISMO

Vochismo, mezuro, koncentrigho, rezoluteco, kaj la dia povo paroli vortojn;
Chu vi estas plenpulma kaj supla-lipa el longa provo? el vigla praktikado? el korp-
naturu?
Chu vi movighas en chi tiuj vastaj landoj, tiel vasta kiel ili?
Venas taue al la dia potenco por paroli vortojn?
Char nur finfine post multe da jaroj, post chasteco, amikeco, generado, prudento, kaj
nudeco,
Post tretado de teroj kaj alfrontado al riveroj kaj lagoj,
Post liberigita gorgho, post sorbado de eraoj, temperamentoj, rasoj, post scio, libereco,
krimoj,
Post kompleta fido, post klarigoj, levoj, kaj forigo de obstrukcoj,
Post chi tiuj kaj pli, estas apenau eble ke venas al viro, al virino, la dia potenco paroli
vortojn;
Tiam al tiu viro au al tiu virino rapide hastas chiuj – neniuj malkonsentas, chiuj
auskultas,
Armeoj, ŝipoj, antikvajhoj, bibliotekoj, pentrajhoj, mashinoj, urboj, malamo, malespero,
amikeco, doloro, shtelado, murdo, aspirado, kunvicighas en densaj vicoj,
Ili elighas, kiam ili estas dezirataj, marshi obeeme tra la busho de tiu viro au tiu virino.

2

Ho kio estas en mi, kio min tiel tremigas antau vochoj?
Certe kiu ajn parolas al mi per la ghusta vocho, lin au shin mi sekvos,
Kiel la akvo sekvas la lunon, silente, per fluidaj pashoj, ien chirkau la globo.

Chio atendas la ghustajn vochojn;

Kie estas la ekzercita kaj perfekta organo? kie estas la disvolvita animo?
Char mi vidas ke chiu vorto dirita de tie havas pli profundajn, pli dolchajn, novajn
sonojn, neeblajn per malpli grandaj kondicho.

Mi vidas cerbojn kaj lipojn fermitajn, timpanojn kaj tempiojn nefrapitajn,
Ghis tio venas kio havas la kvaliton frapi kaj malfermi,
Ghis tio venas kio havas la kvaliton eligi kio dormadas chiam preta en chiuj vortoj.

AL LI KIU ESTIS KRUCUMITA

Mia spirito al via, kara frato,
Ne zorgu pro tio ke multaj kiuj sonas vian nomon ne komprenas vin,
Mi ne sonas vian nomon, sed mi komprenas vin,
Mi specifas vin kun ghojo, ho mia kamarado, saluti vin, kaj saluti tiujn kiuj estas kun vi,
antaue kaj poste, kaj tiuj venontaj ankau,
Ke ni chiuj laboru kune, transdonante la saman komision kaj sekvantaron,
Ni malmultaj egaluloj, indiferentaj pri landoj, indiferentaj pri tempoj,
Ni, enfermantoj de chiuj kontinentoj, de chiuj kasto, permesantoj de chiuj teologioj,
Kompatantoj, perceptantoj, harmonio de homoj,
Ni marshas silentaj inter disputoj kaj asertoj, sed ne malakceptas la disputantojn nek ion
kio estas asertata,
Ni audas la kriadon kaj bruegon, ni estas atingataj de dividoj, jhaluzoj, kontrauriprochoj
sur chiu flanko,
Ili kunighas decide sur nin por chirkaui nin, mia kamarado,
Tamen ni marshas netenitaj, liberaj, tra la tuta mondo, vojaghante tien kaj reen ghis ni
faros nian neforskrapeblan markon sur tempo kaj la diversaj eraoj,
Ghis ni saturos tempon kaj eraojn, ke la viroj kaj virinoj de raso, en epokoj venontaj,
montrighu fratoj kaj amantoj, kiel ni estas.

VI KRIMEGULOJ, JUGHOTAJ EN TRIBUNALOJ

Vi krimeguloj, jughotaj en tribunaloj,
Vi konviktitoj en prizoncheloj, vi kondamnitaj murdistoj, pied- kaj mankatenoj per fero,
Kiu mi estas do ke mi ne estas jughota au en prizono?
Mi senindulga kaj diabla kiel iu ajn ke miaj pojnoj ne estas katenitaj per fero, au miaj
maleoloj per fero?

Vi prostituitinoj, paradantaj lau la trotuaroj au obscenaj en viaj chambroj,
Kiu mi estas ke mi nomu vin pli obscenaj ol mi mem?

Ho kulpa! mi agnoskas – mi malkashas!
(Ho admirantoj, ne laudu min – ne komplimentu min – vi igas min grimaci,
Mi vidas kion vi ne vidas – mi konas kion vi ne konas).

Interne de chi tiuj brustostoj mi kushas makulita kaj sufokita,

Sub chi tiu vizagho kiu shajnas tiel senemocia, la tajdoj de l' infero konstante fluas,
Voluptoj kaj malboncoj estas akcepteblaj al mi,
Mi marshas kun deliktuloj kun pasia amo,
Mi sentas ke mi estas el ili – mi apartenas mem al tiuj konviktitoj kaj prostituitinoj,
Kaj de nun mi ne fornegoj ilin – char kiel mi povas fornegi min mem?

LEGHJOJ POR KREAJHOJ

Leghoj por kreaĵoj,
Por fortaj artistoj kaj kondukantoj, por freshaj idaroj da instruistoj kaj perfektaj literatoroj
por Ameriko,
Por noblaj kleruloj kaj venontaj muzikistoj.

Chiuj devas rilati al la tuto de la mondo, kaj al la kompakta vero de la mondo,
Ne estos subjekto tro emfazita – chiuj verkoj ilustras la dian leghon de nerektajhoj.

Kio vi supozas ke kreado estas?
Kio vi supozas ke kontentigos la animon krom marshi libera kaj havi nenian superulon?
Kion vi supozas ke mi konsciigus al vi en cent manieroj, krom tion, ke viro au virino
esence egalas Dion?
Kaj ke estas nenia Dio iom pli dia ol Vi Mem?
Kaj ke estas tio kion la plej malnovaj kaj plej novaj mitoj fine signifas?
Kaj ke vi au iu devas aliri al kreaĵoj per tiaj leghoj?

AL ORDINARA PROSTITUITINO

Estu trankvila – estu senghena kun mi – mi estas Walt Whitman, tolerema kaj volupta
kiel Naturo,
Dum la suno ne elbaras vin, mi ne elbaras vin,
Dum la akvoj ne rifuzas scintili por vi kaj la folioj susuri por vi, miaj vortoj ne rifuzas
scintili kaj susuri por vi.

Mia knabino, mi fiksas kun vi rendezuon, kaj mi komisias vin ke vi faru preparon esti
inda renkonti min,
Kaj mi komisias vin ke vi estu pacienca kaj perfekta ghis mi venos.

Ghis tiam mi salutas vin per signifoplena rigardo, ke vi ne forgesu min.

MI SERCHADIS LONGATEMPE

Mi serchadis longatempe por Intencoj,

Por shlosilo al la historio de la pasinteco por mi mem, kaj por chi tiuj chantoj – kaj nun
mi trovis ghin,
Ghi ne estas en tiuj paghitaj fabeloj en la bibliotekoj (tiujn mi nek akceptas nek
malakceptas),
Ghi estas ne pli en la legendoj ol en chio alia,
Ghi estas en la nuntempo – ghi estas chi tiu tero hodiau,
Ghi estas en Demokratio – (la signifo kaj celo de la tuta pasinteco),
Ghi estas en la vivo de unu viro au unu virino hodiau – la meza homo de hodiau,
Ghi estas en chiu lingvoj, sociaj kutimoj, literaturoj, artoj,
Ghi estas en la ampleksa elmontrajho de artefaritaj aferoj, shipoj, mashinaroj, politiko,
kredoj, modernaj plibonigajhoj, kaj la intershanghado de nacioj,
Chio por la moderna – chio por la meza homo de hodiau.

PENSO

Pri personoj alvenintaj al altaj oficoj, ceremonioj, richo, erudicioj, kaj la similaj;
(Lau mi chio kion tiuj personoj atingis forsinkas de ili krom kiel ghi efikas sur iliaj korpoj
kaj animoj,
Tiel ke ofte lau mi ili shajnas marasmaj kaj nudaj,
Kaj ofte lau mi chiu mokas la aliajn, kaj mokas sin mem,
Kaj de chiu la kerno de vivo, nome felicho, estas plena de la putra ekskremento de
larvoj,
Kaj ofte lau mi tiuj viroj kaj virinoj pasas nekonscie la verajn realajhojn de vivo, kaj
iras en direkto al falsaj realajhoj,
Kaj ofte lau mi ili entuziasmas pri kion kutimo provizis al ili, sed pri nenio alia,
Kaj ofte lau mi ili estas malghojaj, hastemaj, nevekitaj somnambuloj, marshantaj la
krepuskon).

MIRAKLOJ

Nu, kiu donas multe da graveco al miraklo?
Lau mi, mi scias nenion alian ol miraklojn,
Chu mi marshas la stratojn de Manhatano,
Chu mi sagigas mian vidon super la tegmentojn de domoj al la chielo,
Chu mi vadas per nudaj piedoj lau la plagho ghuste en la rando de la akvo,
Chu mi staras sub la arboj en la arbaro,
Chu mi parolas tage kun iu ajn kiun mi amas, chu mi dormas en la lito nokte kun iu ajn
kiun mi amas,
Chu mi sidas chetable che tagmangho kun la ceteraj,
Chu mi rigardas fremdulojn kontrau mi veturantajn en la vagono,
Chu mi observas mielabelojn okupitajn chirkau la abelujo dum somera antautagmezo,
Chu bestojn pashtighantaj en la kampoj,
Chu birdojn, chu la mirindecon de insektoj en la aero,
Chu la mirindecon de la sunsubiro, au de steloj brilantaj tiel kviete kaj hele,

Chu la ekskvizitan delikatan maldikan kurbon de la novluno en printempo;
Chi tiuj kun la ceteraj, chiu ajn, estas lau mi mirakloj,
La tuton rilatantaj, tamen chiu distinga kaj lau sia loko.

Lau mi chiu horo de la helo kaj malhelo estas miraklo,
Chiu kuba colo da spaco estas miraklo,
Chiu kvadrata jardo de la surfaco de la tero estas pristernita per la samo,
Chiu futo de la interno svarmas per la samo.

Lau mi la maro estas konstanta miraklo,
La fishoj kiuj naghas – la rokoj – la movo de la ondoj – la shipo kun homoj en si,
Kiaj pli strangaj mirakloj estas?

SCINTILOJ DE LA RADO

Kie la senchesa homamaso de la urbo movighas dum la teda tago,
Retirite mi alighas al grupo da infanoj observantaj, mi paugas flanke kun ili,
Che la trotuarrando proksime al la rando de la pavimshtonoj,
Tranchilakrigisto laboras che sia rado, akrigante grandan tranchilon,
Klinighante, li zorge tenas ghin kontrau la shtonon, apud la piedo kaj genuo,
Per mezurita tretado li turnas rapide, dum li premas per malpeza sed firma mano,
Tiam elighas en abundaj oraj shprucoj,
Scintiloj de la rado.

La sceno kaj chiu ghiaj apartenajhoj, kiel do ili kaptas kaj tushas min,
La malgaja akramentona maljunulo kun eluzitaj vestoj kaj larga shultrobendo el ledο,
Mi mem emociversha kaj fluida, fantomo kurioze flosanta, jen chi tie absorbita kaj
haltigita,
La grupo (neprizorgita punkto lokita en vasta chirkauajho),
La atentaj, silentaj infanoj, la lauta, fiera, malkvieta baso de la stratoj,
La mallauta rauka ronrono de la giranta shtono, la malpeze premita klingo,
Difuzighantaj, defalantaj, flankensagantaj, en etaj dushoj da oro,
Scintiloj de la rado.

AL LERNANTO

Chu reformado estas bezonata? chu ghi estos per vi?
Ju pli granda la reformado bezonata des pli granda la Personeco kiun vi bezonas por
efektivigi ghin.
Vi! chu vi ne vidas kiel servus havi okulojn, sangon, kompleksion, purajn kaj dolchajn?
Chu vi ne vidas kiel servus havi tian korpon kaj animon ke, kiam vi eniras la amason,
atmosfera de deziro kaj ordono eniras kun vi, kaj chiu estas impresita per via
Personeco?

Ho la magneto! la karno ree kaj ree!

Iru, kara amiko, se necese, fordonu chion ceteran, kaj komencu hodiau hardi vin al
kuragho, realo, memrespekto, difiniteco, leviteco,
Ne ripozu ghis vi alfikos kaj publikigos vin mem pri via propra Personeco.

DISFALDITE EL LA FALDOJ

Disfaldite el la faldoj de la virino, la viro venas disfaldita, kaj estas chiam venonta
disfaldita,
Disfaldite nur el la plej superba virino de la tero, estas venonta la plej superba viro de la
tero,
Disfaldite el la plej amika virino, estas venonta la plej amika viro,
Disfaldite nur el la perfekta korpo de virino, povas viro esti formata kun perfekta korpo,
Disfaldite nur el la neimiteblaj poemoj de la virino, povas veni la poemoj de la viro (nur
de tie venis miaj poemoj);
Disfaldite el la forta kaj aroganta virino kiun mi amas, nur de tie povas aperi la forta
kaj aroganta viro kiun mi amas,
Disfaldite el la fortmuskolaj chirkauprenoj de la plenumskola virino kiun mi amas, nur
de tie venas la fortmuskolaj chirkauprenoj de la viro,
Disfaldite el la faldoj de la cerbo de la virino, venas la faldoj de la cerbo de la viro, tauge
obeemaj,
Disfaldite el la justeco de la virino, tuta justeco estas disfaldita,
Disfaldite el la kompato de la virino, estas tuta kompato;
Viro estas granda afero sur la tero kaj tra la eterno, sed la tuta grandeco de la viro estas
disfaldita el la virino;
Unue la viro estas formata en la virino, li povas tiam esti formata en si mem.

KIO MI ESTAS MALGRAU CHIO

Kio mi estas malgrau chio krom infano, kontenta je la sono de mia propra nomo?
ripetanta ghin ree kaj ree;
Mi staras flanke por audi – ghi neniam tedas min.

Al vi via nomo ankau;
Chu vi pensis ke estas nenio krom du au tri prononcoj en la sono de via nomo?

KOSMO

Kiu inkludas diversecon kaj estas Naturo,
Kiu estas la amplekso de la tero, kaj la krudeco kaj sekseco de la tero, kaj la granda
karitato de la tero, kaj la ekvilibro ankau,
Kiu ne elrigardis de la fenestroj la okuloj pro nenio, nek kies cerbo tenis audiencon kun
mesaghistoj pro nenio,
Kiu enhavas kredantojn kaj malkredantojn, kiu estas la plej majesta amanto,
Kiu tauge tenas sian triunuecan proporcion de realismo, de spritualismo, kaj de la

estetika au intelekta,
Kiu, konsiderinte la korpon, trovas chiujn ghiajn organojn kaj partojn bonaj,
Kiu, el la teorio de la tero kaj de sia korpo, komprenas per subtilaj analogioj chiujn aliajn teoriojn,
La teorion de urbo, de poemo, kaj de la largha politiko de chi tiuj Shtatoj;
Kiu kredas ne nur je nia globo kun ghia suno kaj luno, sed je aliaj globoj kun iliaj sunoj kaj lunoj,
Kiu, konstruante la domon de si mem, ne por unu tago sed por la tuta tempo, vidas rasojn, eraojn, datojn, generaciojn,
La pasinteco, la estonteco, loghantaj tie, kiel spaco, neapartigeblaj kune.

ALIAJ POVAS LAUDI KION ILI VOLAS

Aliaj povas laudi kion ili volas;
Sed mi, de la bordoj de la kuranta Misuro, laudas nenion en arto au io alia,
Ghis ghi bone enspiris la atmosferon de chi tiu rivero, ankau la okcidentan preriaromon,
Kaj tute eligas ghin denove.

KIU LERNAS MIAN LECIONON KOMLETE?

Kiu lernas mian lecionon komplete?
Chefo, submajstro, lernoknabo, preghejano kaj ateisto,
La stulta kaj la sagha pensanto, gepatroj kaj idoj, komercisto, komizo, portisto, kaj kliento,
Redaktisto, verkisto, artisto, kaj lernejano – alproksimighas kaj komencas;
Ghi estas nenia leciono – ghi demetas la barojn al bona leciono,
Kaj tiu al alia, kaj chiu al alia ancorau.

La grandaj leghoj aplikighas kaj elvershas sen argumentado,
Mi estas de la sama stilo, char mi estas ilia amiko,
Mi amas ilin, jen chio, mi ne haltas kaj faras riverencojn.

Mi kushas reve kaj audas belajn rakontojn pri aferoj kaj la kialoj de aferoj,
Ili estas tiel belaj ke mi kubutpushetas min auskulti.

Mi ne povas diri al iu persono kion mi audas – mi ne povas diri al mi mem – ghi estas tre mirinda.

Ghi estas nenia malgranda afero, chi tiu ronda kaj delica globo movighanta tiel precize en ghia orbito chiam kaj chiam, sen ia ekskuo au la malvero de unuopa sekundo,
Mi ne pensas ke ghi estis farita en ses tagoj, nek en dek mil jaroj, nek en dek miliardoj da jaroj,
Nek planita kaj konstruita unu afero post alia, kiel arkitekto planas kaj konstruas domon.

Mi ne pensas ke sepdek jaroj estas la tempo de viro au virino,
Nek ke sepdek milionoj da jaroj estas la tempo de viro au virino,
Nek ke jaroj iam chesigos la ekziston de mi, au iu alia.

Chu estas mirinde ke mi estu senmorta? kiel chiu estas senmorta;
Mi scias ke ghi estas mirinda, sed mia vidpovo estas egale mirinda, kaj kiel mi estis
koncipita en la utero de mia patrino estas egale mirinde,
Kaj pasigita de bebo en la rampanta tranco de kelkaj someroj kaj vintroj artikulacii kaj
marshi – chio chi estas egale mirinda.

Kaj ke mia animo chirkaubrakas vin chi-hore, kaj ni tushas unu la alian, ne iam vidante
unu la alian, kaj eble neniam vidonte unu la alian, estas tute egale tiel mirinde.

Kaj ke mi povas pensi tiajn pensojn kiel chi tiujn estas egale mirinde,
Kaj ke mi povas rememorigi vin kaj vi pensas ilin kaj scias ilin esti veraj, estas egale
mirinde.

Kaj ke la luno chirkauiras chirkau la tero kaj kune kun la tero, estas egale mirinde,
Kaj ke ili ekvilibrigas sin kun la suno kaj steloj estas egale mirinde.

KRITERIOJ

Chiu submetighas al ili kie ili sidas, internaj, sekuraj, nealireblaj al analizo en la animo,
Ne tradicioj, ne la eksteraj aŭtoritatoj estas la jughantoj,
Ili estas la jughantoj de eksteraj aŭtoritatoj kaj de chiu tradicioj,
Ili konfirmas en sia iro nur kio konfirmas ilin mem, kaj tushas ilin mem;
Malgrau chio tio, ili havas chiam en si mem la povon konfirmi malproksime kaj
proksime sen unu escepto.

LA TORCHO

Sur mia Nordokcidenta bordo meze de la nokto fishkaptistaro staras rigardante,
Malproksime sur la lago kiu etendighas antau ili, aliaj lancas salmojn,
La kanuo, malklara ombra afero, movighas tra la nigra akvo,
Portante torchon flamantan che la pruo.

HO STELO DE FRANCUJO

1870-71.

Ho stelo de Francujo,
La heleco de via espero kaj forto kaj famo,
Kiel iu fiero ŝipo kiu antaŭis la floton tiel longe,
Shajnas hodiaŭ vrako pelita de la ventego, senmasta korpego,

Kaj meze de ghiaj svarmantaj frenezigitaj duondronigitaj amasoj,
Nek direktilo nek direktilisto.

Malhela frapita stelo,
Orbo ne de Francujo sole, pala simbolo de mia animo, ghiaj plej karaj esperoj,
La lukto kaj la kuragho, furiozo dia por libereco,
De aspiroj al la malproksima idealo, revoj de la entuziasmulo pri frateco,
De teruro al la tirano kaj la pastro.

Stelo krucumita – de perfiduloj vendita,
Stelo anhelanta super lando de morto, heroa lando,
Stranga, pasia, mokanta, frivola lando.

Mizera! tamen viajn erarojn, vantajhojn, pekojn, mi ne nun riprochos al vi,
Viaj eksterordinaraj veoj kaj doloroj subpremis ilin chiujn,
Kaj lasis vin sankta.

Pro tio ke meze de viaj multaj difektoj vi chiam celis alten,
Pro tio ke vi ne volis vin efektive vendi, kiel ajn granda la prezo,
Pro tio ke vi certe vekighis plorante de via narkotita dormo,
Pro tio ke inter viaj fratinoj vi, gigantino, disshiris tiujn kiuj hontigis vin,
Pro tio ke vi ne povis, ne volis, porti la kutimajn katenojn,
Chi tiun krucon, vian lividan vizaghon, viajn trapikitajn manojn kaj piedojn,
La lancon enshovitan en vian flankon.

Ho stelo! ho shipo de Francujo, rebatata kaj malhelpata longe!
Kuraghe vin tenu, ho frapita orbo! ho shipo, ekdaurigu!

Certe kiel la shipo de chio, la Tero mem,
Produkto de mortiga fajro kaj turbula hhaoso,
For de ghiaj spasmoj de furiozo kaj ghiaj venenoj,
Eliranta finfine en perfekta potenco kaj beleco,
Antauen sub la suno, sekvanta ghian kurson,
Tiel vi, ho shipo de Francujo!

Finitaj la tagoj, la nuboj dispelitaj,
La lukto finita, la longe serchata malimpliko,
Kiam jen! renaskita, alte super la Europa mondo,
(En ghojo respondante de tie, kiel vizagho kontrau vizagho, spegulante nian,
Kolumbion),
Denove via stelo, ho Francujo, bela brila stelo,
En chiela paco, pli klara, pli hela ol iam,
Radios senmorta.

LA BOVODRESISTO

En fora norda konteo en la trankvila pashtista regiono,
 Loghas mia bienisto amiko, la temo de mia recito, fama dresisto de bovoj,
 Tie oni alportas al li la trijaraghajn kaj la kvarjaraghajn por humiligi ilin,
 Li prenos la plej sovaghan bovon en la mondo kaj humiligos lin kaj malsovaghigos lin,
 Li iros sentima senvipa tien kie la juna virbovo malpacience iras tien kaj reen lau la
 korto,
 La kapo de la virbovo jhetighas iritite alten en la aeron kun furiozantaj okuloj,
 Tamen vidu vi! kiel baldau lia furiozo kvietighas – kiel baldau lia dresanto lin
 malsovaghigas;
 Vidu vi! en la bienoj chi-apude cent bovoj, junaj kaj maljunaj, kaj li estas la viro kiu
 malsovaghigis ilin,
 Ili chiuj konas lin, chiuj estas amaj al li;
 Vidu vi! kelkaj estas tiel belaj bestoj, tiel noblaspektaj;
 Kelkaj estas chamkoloraj, kelkaj makulitaj, unu havas blankan linion lau la dorso, kelkaj
 estas malhelstrietaj,
 Kelkaj havas larghe elkurbighantajn kornojn (bona auguro) – vidu vi! la helaj feloj,
 Vidu, la du kun stelo sur la frunto – vidu, la rondaj korpoj kaj larghaj dorsoj,
 Kiel rekte kaj firme ili staras sur la kruroj – kiaj bonegaj sagacaj okuloj!
 Kiel ili observas sian dresanton – ili volas lin proksime al si – kiel ili turnighas por
 rigardi post li!
 Kia sopiranta mieno! kiel maltrankvilaj ili estas kiam li formovighas de ili;
 Nun mi miras kia povas esti ke li shajnas al ili (libroj, politiko, poemoj foriras – chio alia
 foriras),
 Mi konfesas ke mi envias nur lian fascinadon – mia silenta, analfabeta amiko,
 Kiun cent bovoj amas tie en lia vivo en bienoj,
 En la norda konteo for, en la trankvila pashtista regiono.

PENSO DE MALJUNULO PRI LERNEJO

Por la Inauguro de Publika Lernejo, Kamdeno, Novjherzeo, 1874.

Penso de maljunulo pri lernejo,
 Maljunulo kolektanta junecajn memorojn kaj florojn, kiujn juneco mem ne povas.

Nun sole mi konas vin,
 Ho belaj auroraj chieloj – ho matena roso sur la herbo!

Kaj chi tiujn mi vidas, chi tiujn scintilantajn okulojn,
 Chi tiujn staplojn da mistika signifo, chi tiujn junajn vivojn,
 Konstruantaj, ekipighantaj kiel floto da shipoj, senmortaj shipoj,
 Baldau ekvelontaj tra la senmezuraj maroj,
 Por la vojagho de la animo.

Nur grupo da knaboj kaj knabinoj?
 Nur la tedaj klasoj de literumado, skribado, kalkulado?
 Nur publika lernejo?
 Ha pli, infinite pli;

(Kiel George Fox levis sian avertan krion, “Chu estas chi tiu amaso da brikoj kaj mortero,
chi tiuj mortaj plankoj, fenestroj, balustradoj, kiujn vi nomas la preghejo?
Nu chi tio tute ne estas la preghejo – la preghejo estas vivaj, chiam vivaj animoj”.)

Kaj vi, Ameriko,
Chu vi kalkulas la realan kalkulon por via nuntempo?
Por la helajhoj kaj ombroj de via estonteco, bonaj au malbonaj?
Al knabineco, knabeco rigardu, al la instruisto kaj la lernejo.

VAGANTE CHE MATENIGHO

Vagante che matenigho,
Elighante el la nokto, el malgajaj pensoj, kun vi en miaj pensoj,
Sopirante al vi, harmonia Unio! vi, kantanta birdo dia!
Vi, volvita en malbonaj tempoj, mia lando, kun ruzo kaj nigra konsterno, kun chia
malnobleco, perfido shovitaj sur vin,
Chi tiun ordinaran mirindajhon mi vidis – la gepatran turdon mi observis nutranta
ghiajn idojn,
La kantantan turdon kies tonoj de ghojo kaj fido ekstaziaj,
Ne malsukcesas certigi kaj gajigi mian animon.

Tie meditis, sentis mi,
Se vermoj, serpentoj, abomenaj larvoj, povas en dolchajn spiritajn kantojn esti
shanghataj,
Se bestetachoj tiel transponataj, tiel uzataj kaj benataj povas esti,
Do mi povas fidi al vi, al viaj sortoj, tagoj, mia lando;
Kiu scias, sed chi tiuj povus esti la lecionoj taugaj por vi?
De chi tiuj via estonta kanto povus levighi kun ghojaj triloj,
Destinita plenigi la mondon.

ITALA MUZIKO EN DAKOTO

[“La Dek-sepa – la plej bona Regimenta Bando kiun mi iam audis.”]

Tra la mola vespera aero envolvanta chion,
Rokojn, arbarojn, kanonojn, pashantajn sentinelojn, senfinajn sovaghejojn,
En dolchaj fluoj, en flutaj kaj kornetaj notoj,
Elektra, pensiga, turbulenta, artefarita,
(Tamen strange tauga ech chi tie, signifoj nekonataj antaue,
Pli subtilaj ol iam, pli da harmonio, kvazau naskita chi tie, rilata chi tie,
Ne al la freskohavaj chambroj de l’ urbo, ne al la audantaro de l’ operejo,
Sonoj, ehhoj, vagantaj melodioj, kiel vere hejme chi tie,
La naiva amo de Sonnambula, trio kun la angoro de Norma,
Kaj via ekstazia horo, Poliuto);
Lumita en la radioj de l’ klara flava klinita sunsubiro,
Muziko, Itala muziko en Dakoto.

Dum Naturo, suverena en chi tiu tubereca regno,
Kaurante en kashitaj barbaraj malgajaj anguloj,
Agnoskante akordon, kiel ajn malproksiman,
(Kiel ia maljuna radiko au terogrundo ghian finnaskitan floron au frukton),
Auskultas tute kontentigite.

KUN CHIUJ VIAJ DONACOJ

Kun chiuj viaj donacoj, Ameriko,
Staranta sekure, rapide prizorganta, observanta la mondon,
Potenco, richo, etendo, garantiitaj al vi – kun chi tiuj kaj la similaj de chi tiuj garantiitaj al
vi,
Kio, se unu donaco mankas al vi? (la finan homan problemon neniam solvanta),
La donaco de perfektaj virinoj, taugaj por vi – kio, se tiu donaco de la donacoj mankas al
vi?
La alte staranta femala de vi? la belo, sano, kompletigo, taugaj por vi?
La patrinoj taugaj por vi?

MIA BILDOGALERIO

En malgranda domo mi tenas bildojn pendigitaj, ghi ne estas fiksita domo,
Ghi estas ronda, estas nur kelkaj coloj de unu flanko al la alia;
Tamen rigardu, ghi havas spacon por chiuj elmontrajhoj de la mondo, por chiuj
memoroj!
Chi tie la scenoj de vivo, kaj chi tie la grupigoj de morto,
Chi tie, chu vi konas chi tiun? estas chichero mem,
Kun fingro levita li montras la prodigajn bildojn.

LA PRERIAJ SHTATOJ

Pli nova ghardeno de kreado, nenia praa soleco,
Densa, ghoya, moderna, milionoj da homoj, urboj kaj bienoj,
Per fero interplektita, kunmetita, ligita, multaj en unu,
De la tuta mondo alkontribuita – la socio de legho, libereco, kaj ekonomio,
La krono kaj svarmanta paradizo, ghis nun, de la akumuloj de tempo,
Por pravigi la pasintecon.

FIERA MUZIKO DE LA SHTORMO

1

Fiera muziko de la shtormo,
 Blovego, kiu kuregas tiel libera, fajfante trans la preriojn,
 Forta zumo de arbaraj arbosuproj – vento de la montoj,
 Personigitaj malklaraj figuroj – vi kashitaj orkestroj,
 Vi serenadoj de fantomoj kun instrumentoj viglaj,
 Kunmiksantaj kun la ritmo de Naturo chiujn lingvojn de nacioj;
 Vi akordoj lasitaj kiel de vastaj komponistoj – vi hhoroj,
 Vi senformaj, liberaj, religiaj dancoj – vi el la Oriento,
 Vi subtono de riveroj, mugho de vershantaj kataraktoj,
 Vi sonoj de malproksimaj pafiloj kun galopanta kavalerio,
 Ehhoj de tendaroj kun chiaj diversaj klarionsonadoj,
 Marshantaj tumultaj, plenigantaj la noktomezon malfruan, fleksantaj min senpotenca,
 Enirantaj mian solecan dormochambron, kial vi estas kaptintaj min?

2

Venu antaŭen, ho mia animo, kaj la ceteraj retirighu,
 Auskultu, ne perdu, estas al vi ke ili sin direktas,
 Fendante la noktomezon, enirante mian dormochambron,
 Por vi ili kantas kaj dancas, ho animo.

Festivala kanto,
 La dueto de la novedzo kaj la novedzino, edzigha marsho,
 Kun lipoj de amo, kaj koroj de amantoj, plenplenigitaj per amo,
 La rughighintaj vangoj kaj parfumoj, la akompanantaro, svarmante plena de amikaj
 vizaghoj, junaj kaj maljunaj,
 Je la klaraj notoj de flutoj kaj la flukanto de la sonantaj harpoj.

Nun lautaj alvenantaj tamburoj,
 Venko! chu vi vidas en la pulvofumo la standardojn shiritajn sed flirtantajn? la
 disvenkadon de la konfuzitaj?
 Chu vi audas tiujn kriojn de venkanta armeo?

(Ha animo, la plorsingulto de virinoj, la vunditaj ghemantaj en dolorego,
 La siblo kaj kraketado de flamoj, la nigritaj ruinoj, la brago de urboj,
 La ve-kanto kaj afliktiteco de homaro.)

Nun arioj antikvaj kaj mezepokaj plenigas min,
 Mi vidas kaj audas malnovajn harpistojn kun iliaj harpoj che Kimraj festivaloj,
 Mi audas la minnekantistojn kantantaj siajn poemojn de amo,
 Mi audas la menestrelojn, parti-kantantojn, trobadorojn, de la mezepoko.

Nun la granda orgeno sonas,
 Tremeta, dum sube (kiel la kashitaj piedtenejoj de la tero,
 Sur kiuj levighante sin apogas, kaj al kiuj forsaltante fidas,

Chiuj formoj de belo, gracio, kaj forto, chiuj koloroj, kiujn ni konas,
Verdaj tigoj de herbo kaj triladantaj birdoj, infanoj kiuj kapriolas kaj ludas, la nuboj de
 chielo supre),

La forta baso staras kaj ghiajn pulsadojn ne interrompas,
Banante, subportante, kunfandante la tutan ceteron, patrineco de la tuta cetero,
Kaj kun ghi, chiu instrumento en amasoj,
La ludantoj ludantaj, chiuj muzikistoj de la mondo,
La solenaj himnoj kaj mesoj ekcitantaj adoron,
Chiuj pasiaj kor-chantoj, malghojaj petegoj,
La senmezuraj dolchaj kantistoj de epokoj,
Kaj por sia solvenzo pretigantaj la diapazonon de la tero mem,
De ventoj kaj arbaroj kaj potencaj oceanaj ondoj,
Nova kunmetita orkestro, kunliganto de jaroj kaj regionoj, dekobla renoviganto,
Kiel de la malantauegaj tagoj kiujn la poetoj pridiras, de la Paradizo,
La forvagado de tie, la aparteco longa, sed nun la vagado finita,
La vojagho finita, la vojaghanto hejmenveninta,
Kaj homo kaj arto denove kunfanditaj kun Naturo.

Chiu! por tero kaj chielo;
(La Chiopotenca kondukisto chifoje signalis per la bastono).

La vireca strofo de la edzoj de la mondo,
Kaj chiuj edzinoj respondantaj.

La langoj de violonoj,
(Mi pensas, ho langoj, vi pridiras chi tiun koron kiu ne povas pridiri sin mem,
Chi tiun mediteman sopirantan koron kiu ne povas pridiri sin mem).

3

Ha de infaneto,
Vi konas, animo, kiel al mi chiuj sonoj farighis muziko,
La vocho de mia patrino en lulkanto au himno,
(La vocho, ho teneraj vochoj, la amaj vochoj de memoro,
Fina miraklo de chiuj, ho vochoj de la plej kara patrino, fratino);
La pluvo, la kreskanta maizo, la venteto inter la longfolia maizo,
La ritma marakvo batanta sur la sablo,
La pepetanta birdo, la akuta kricho de la falko,
La notoj de la sovaghbirdo en nokto, flugante malalte, migranta norden au suden,
La psalmo en la kampara preghejo au meze de la grupighantaj arboj, la subchiela
 kampkunveno,
La violonisto en la taverno, la parti-kanto, la longe surfadenita maristkanto,
La mughantaj bovoj, la blekantaj shafoj, la kokerikanta koko che matenigho.

Chiu! kantoj de nunaj landoj eksonas chirkau mi,
La Germanaj arioj de amikeco, vino, kaj amo,
Irlandaj baladoj, gajaj ghigoj kaj dancoj, Anglaj triladoj,

Kantoj de Francujo, Skotaj melodioj, kaj superaj al la aliaj,
La senegalaj komponaĵoj de Italujo.

Trans la scenejon kun paleco sur la vizagho, tamen kun arda pasio,
Pashegas Norma, minace tenante la ponardon en la mano.

Mi vidas la nenaturan brileton de la okuloj de la kompatinda frenezigita Lucia,
Shiaj haroj malsupren lau shia dorso falas liberaj kaj tautitaj.

Mi vidas, kie Ernani, irante tra la edzinigha ghardeno,
Meze de laodoro de noktorozoj, radianta, tenante sian novedzinon je la mano,
Audas la inferan vokon, la mortopromeson de la korno.

Je krucighantaj glavoj kaj grizaj haroj nudigitaj al la chielo,
La klaraj elektraĵoj basulo kaj baritonulo de la mondo,
La trombona duo, Libereco por chiam!

De la densa ombro de hispanaj kashtanarboj,
Apud malnovaj kaj pezaj monahhinejaj muroj ulula kanto,
Kanto de perdita amo, de la torcho de juneco kaj vivo, estingata en malespero,
Kanto de la mortanta cigno, la koro de Fernando krevas.

Vekighante de siaj veoj finfine la reprenita Amina kantas,
Abundaj kiel steloj kaj gajaj kiel la matena lumo la torentoj de shia ghojo.

(La pululanta damo venas,
La gloran orbon, Veneran kontraltulinon, la florantan patrinon,
Fratinon de la plej altaj dioj, Alboni mem mi audas.)

4

Mi audas tiujn odojn, simfoniojn, operojn,
Mi audas la Vilhelmo Tell, la muzikon de ekscitita kaj kolera popolo,
Mi audas Hugenotoj, la Profeto, au Roberto de Meyerbeer,
Faust de Gounod, au Don Giovanni de Mozart.

Mi audas la dancmuzikon de chiuĵ nacioj,
La valson, iun delican mezuron, pauzantan, banantan min en beato,
La boleron je tintantaj gitaroj kaj klakadantaj kastanjetoj.

Mi vidas religiajn dancojn, malnovajn kaj novajn,
Mi audas la sonon de la Hebrea liro,
Mi vidas la krucistojn marshantaj portantaj la krucon alte, je la milita sonorego de
cimbaloj,
Mi audas dervishojn monotone kantantaj, intershutante frenezajn kriojn, dum ili giras
turnighante chiam en direkto al Mekko,
Mi vidas la ravajn religiajn dancojn de la Persoj kaj Araboj,

Denove, che Eleuziso, hejmo de Ceresa, mi vidas la modernajn Grekojn dancantaj,
Mi audas ilin plaudantaj per la manoj dum ili klinas siajn korpojn,
Mi audas la metran trenpashadon de iliaj piedoj.

Mi revidas la sovaghan malnovan Koribantan dancon, la dancantoj vundantaj unu alian,
Mi vidas la Romajn junulojn, je la akra sono de flagholetoj, jhetantaj kaj kaptantaj siajn
armilojn,
Dum ili falas sur la genuojn kaj relevighas.

Mi audas de la Muzulmana moskeo la muezinon vokanta,
Mi vidas la kultantojn interne, nek formon nek predikon, nek argumenton nek vorton,
Sed silentajn, strangajn, piajn, levitajn, lumetantajn kapojn, ekstaziajn vizaghojn.

Mi audas la Egiptajn harpojn de multe da kordoj,
La primitivajn kantojn de la nilaj boatistoj,
La sanktajn imperiajn himnojn de Chinujo,
Je la delikataj sonoj de la kingo (la frapataj ligno kaj shtono),
Au je Hindaj flutoj kaj la ululaj ekvibroj de la vinao,
Bandon da bajaderoj.

5

Nun Azio, Afriko forlasas min, Europo ekkaptante pufigas min,
Je orgenoj grandegaj kaj bandoj mi audas, kiel de vastaj kunfluoĵ da voĵoj,
La fortan himnon de Lutero Eine feste Burg ist unser Gott,
La Stabat Mater dolorosa de Rossini,
Au flosantan en ia alta malhela katedralo kun belegaj koloraj fenestroj,
La pasian Agnus Dei au Gloria in Excelsis.

Komponistoj! potencaj majstroj!
Kaj vi, dolchaj kantistoj de malnovaj landoj, sopranuloj, tenoruloj, basuloj!
Al vi nova bardo, karolanta en la Okcidento,
Riverencante, sendas sian amon.

(Tiaj kondukis al vi, ho animo,
Chiuĵ sensoj, montraĵoj, kaj objektoj kondukas al vi,
Sed nun shajnas al mi ke sono antaŭas super chiuĵ ceteraĵ.)

Mi audas la chiuĵaran kantadon de la infanoj en la Katedralo de Sankta Paulo,
Au, sub la alta tegmento de ia kolosa halo, la simfoniojn, oratoriojn de Betoveno,
Handelo, kaj Hajdeno,
La Kreo en ondegoj da dieco lavas min.

Donu min por teni chiuĵn sonojn (mi freneze luktante krias),
Plenigu min per chiuĵ voĵoj de l' universo,
Dotu min per iliaj pulsadoj, per tiuj de Naturo ankaŭ,
La tempestojn, akvojn, ventojn, operojn kaj chantojn, marŝojn kaj dancojn,

Eligu, envershu, char mi volus preni ilin chiujn!

6

Tiam mi vekighis milde,
Kaj pauzante, pridemandante iom la muzikon de mia songho,
Kaj pridemandante chiujn tiujn rememorojn, la tempeston en ghia furiozo,
Kaj chiujn kantojn de sopranuloj kaj tenoruloj,
Kaj tiujn ravajn orientajn dancojn de religia fervoro,
Kaj la dolchajn diversajn instrumentojn, kaj la diapazonon de orgenoj,
Kaj chiujn naivajn plendojn de amo kaj malghojo kaj morto,
Mi diris al mia silenta scivola animo el la lito de la dormochambro,
Venu, char mi trovis la shlosilon kiun mi tiel longe serchis,
Ni eliru refreshigite meze de la tago,
Gaje registrante vivon, irante la mondon, realon,
Nutrite de nun de nia chiela songho.

Kaj mi diris, krome,
Eble tio, kion vi audis, ho animo, ne estis la sono de ventoj,
Nek songho de furioza shtormo, nek la batantaj flugiloj de marfalko, nek rauka kriego,
Nek vochajho de sunbrila Italujo,
Nek Germana orgeno majesta, nek vasta kunfluo da vochoj, nek tavoloj da harmonioj,
Nek strofoj de edzoj kaj edzinoj, nek sono de marshantaj soldatoj,
Nek flutoj, nek harpoj, nek la klarionsonadoj de tendaroj,
Sed je nova ritmo, tauga por vi,
Poemoj transpontantaj la vojon de Vivo al Morto, svage alblovetataj en nokta aero,
 nekaptitaj, neskribitaj,
Kiujn ni eliru en la radiantata tago kaj skribu.

PASADO AL HINDUJO

1

Kantanta miajn tagojn,
Kantanta la grandajn atingojn de la nuntempo,
Kantanta la fortajn legherajn laborojn de inĝenieroj,
Niajn modernajn mirindajhojn (la antikvaj gravaj Sep superitaj),
En la Malnova Mondo la oriento la Kanal' Sueza,
La Nova, per ghia potenca fervojo transpontita,
La maroj, prienkushigitaj per elokventaj mildaj dratoj;
Tamen unue soni, kaj chiam soni, la krion per vi, ho animo,
La Pasinteco! la Pasinteco! la Pasinteco!

La Pasinteco – la malhela nesondita retrospektivo!
La svarmanta abismo – la dormantoj kaj la ombroj!
La pasinteco – la infinita granda de la pasinteco!

Char kio estas la nuntempo malgrau chio krom elkresko el la pasinteco?
(Kiel jhetajho formita, pelita, pasante certan linion, ankoraŭ daurigas,
Tiel la nuntempo, tute formita, pelita de la pasinteco.)

2

Pasado, ho animo, al Hindujo!
Klarigu la mitojn Aziajn, la primitivajn fabelojn.

Ne vi solaj, fieraj veroj de la mondo,
Nek vi solaj, vi faktoj de moderna scienco,
Sed mitoj kaj fabeloj antikvaj, fabeloj de Azio, Afriko,
La malproksimsagantaj radioj de la spirito, la liberigitaj revoj,
La profundplonghantaj biblio kaj legendoj,
La audacaj intrigoj de la poetoj, la pli malnovaj religioj;
Ho vi temploj, pli belaj ol lilioj, privershataj de la levighanta suno!
Ho vi fabeloj, forpushantaj la sciatan, evitantaj la tenon de la sciata, suprenirantaj al la
 chielo!
Vi altegaj kaj blindumantaj turoj, pinaklitaj, rughaj kiel rozoj, briligitaj per oro!
Turoj de fabeloj senmortaj, faritaj el mortemulaj revoj!
Vin ankaŭ mi bonvenigas kaj plene same kiel la ceterajn!
Vin ankaŭ kun ghojo mi kantas.

Pasado al Hindujo!
Jen, animo, chu vi ne vidas la celon de Dio de la komenco?
La tero esti transportata, kunigata per retajho,
La rasoj, najbaroj, edzighi kaj esti edzigataj,
La oceanoj esti transirataj, la malproksima esti proksimigata,
La landoj esti kunveldataj.

Kulton novan mi kantas,
Vi kapitanoj, vojaghantoj, esploristoj, vian,
Vi inĝenieroj, vi arkitektoj, mashinistoj, vian,
Vi, ne por komerco au transportado sole,
Sed nome de Dio, kaj por vi, ho animo.

3

Pasado al Hindujo!
Jen, animo, por vi el scenoj du,
Mi vidas unu, la Kanalon Suezan komencatan, malfermatan,
Mi vidas la procesion da vaporshipoj, kun tiu de la Imperiestrino Eugena antaŭanta la
 antaŭon,
Mi notas de la ferdeko la strangan pejzaghon, la puran chielon, la ebenan sablon en la
 malproksimo,
Mi pasas rapide la pitoreskajn grupojn, la laboristojn amasighintajn,
La gigantajn dragilojn.

En ankoraŭ unu, malsama (tamen via, tute via, ho animo, same),
Mi vidas tra mia propra kontinento la Fervojon Pacifikan superanta chiun obstaklon,
Mi vidas konstantajn trajnojn da vagonoj sinuantaj laŭ Platto, portantaj frajton kaj
pasagherojn,
Mi audas la lokomotivojn hastantaj kaj mughantaj, kaj la akran vaporfajfilon,
Mi audas la ehhojn reehi tra la plej majesta pejzaghara en la mondo,
Mi trairas la ebenajhon Laramia, mi notas la rokojn en groteskaj formoj, la platmontojn,
Mi vidas la abundajn delfiniojn kaj sovaghajn cepojn, la malfekundajn, senkolorajn
artemizidezertojn,
Mi ekvidadas malproksimajn aŭ alte starantaj tuj super mi la grandajn montojn, mi
vidas la Riveron Vento kaj la Montojn Vasacho,
Mi vidas la Monton Monumento kaj la Neston de l'Aglo, mi pasas la Promontoron, mi
supreniras la Nevadajn,
Mi ekzamenas la noblan Monton Alko kaj sinuas chirkau ghia bazo,
Mi vidas la montaron Humboldt, mi tredas la valon kaj transiras la riveron,
Mi vidas la klarajn akvojn de lago Taho, mi vidas la arbarojn da majestaj pinoj,
Aŭ transirante la grandan dezerton, la alkalajn ebenajhojn, mi vidas charmajn miraghojn
de akvoj kaj herbejoj,
Markanta tra tiuj kaj post chiuj, per duoblaj maldikaj linioj,
Transportanta la tri aŭ kvar mil mejlojn da tervojaghadado,
Liganta la Orientan al la Okcidenta maro,
La vojo inter Europo kaj Azio.

(Ha Ghenovano, via revo! via revo!
Jarcentojn post kiam vi estis metita en vian tombon,
La bordo kiun vi trovis verigas vian revon.)

4

Pasado al Hindujo!

Luktoj de multaj kapitanoj, rakontoj pri multaj maristoj mortaj,
Super mian humoron shtelirante kaj sternighante ili venas,
Kiel nuboj kaj nubetoj en la neatingita chielo.

Lau tuta historio, malsupren laŭ la deklivoj,
Kiel rojo kuranta, jen sinkanta, kaj jen denove al la surfaco levighanta,
Senchese penso, varia serio – jen, animo, al vi, via vido, ili levighas,
La planoj, la vojaghoj denove, la ekspedicioj;
Denove Vasko da Gama forvelas,
Denove la scio akirata, la kompasoj de l' maristo,
Landoj trovataj kaj nacioj naskataj, vi naskita, Ameriko,
Por vasta celo, la longa provtempo de homo plenigita,
Vi chirkaurado de la mondo finfine plenumita.

Ho vasta Rondajho naghanta en spaco,
 Kovrita chie per videbla belo kaj potenco,
 Alternaj lumo kaj tago kaj la svarmanta spirita mallumo,
 Nedireblaj altaj procesioj de suno kaj luno kaj nekalkuleblaj steloj supre,
 Malsupre, la multoblaj herbo kaj akvoj, bestoj, montoj, arboj,
 Kun mistera celo, ia kashita profeta intenco,
 Nun unue shajnas ke mia penso komencas ampleksi vin.

Malsupren de la ghardenoj de Azio, malsuprenirantaj, radiantaj,
 Adam kaj Eva aperas, tiam iliaj miriadaj idoj post ili,
 Vagantaj, sopirantaj, scivolaj, kun senripozaj esploroj,
 Kun demandadoj, konfuzitaj, senformaj, frenezaj, kun neniamfelichaj koroj,
 Kun tiu malgaja senchesa refreno, Kial, nekontentigita animo? kaj Kien, ho mokanta
 vivo?

Ahh kiu kvietigos chi tiujn frenezajn infanojn?
 Kiu pravigos chi tiujn senripozajn esplorojn?
 Kiu diros la sekreton de l' senemocia tero?
 Kiu aligos ghin al ni? kio estas chi tiu aparta Naturo, tiel nenatura?
 Kio estas chi tiu tero al niaj amemoj? (neamanta tero, sen pulsado por respondi niajn,
 Malvarma tero, la loko de tomboj).

Tamen, animo, estu certa, ke la unua intenco restas, kaj estos plenumita,
 Eble ech nun la tempo estas alveninta.

Post kiam la maroj estas chiuj transiritaj (kiel ili shajnas jam transiritaj),
 Post kiam la grandaj kapitanoj kaj inghenieroj plenumis sian laboron,
 Post la noblaj inventistoj, post la sciencistoj, la kemiisto, la geologo, etnologo,
 Fine venos la poeto inda tiun nomon,
 La vera filo de Dio venos kantante siajn kantojn.

Tiam ne viaj faroj solaj, ho vojaghantoj, ho sciencistoj kaj inventistoj, estos pravigitaj,
 Chiuj tiuj koroj, kiel de chagrenitaj infanoj, estos kvietigitaj,
 Chia amo estos plene respondita, la sekreto estos dirita,
 Chiuj chi apartigoj kaj brechoj estos pritraktitaj kaj kunkrochitaj kaj kunligitaj,
 La tuta tero, chi tiu malvarma, senemocia, senvocha tero, estos komplete pravigita,
 La trioblo dia estos glore plenumita kaj kompaktigita de la vera filo de Dio, la poeto,
 (Li ja pasos la markolojn kaj venkos la montojn,
 Li chirkauevos la Kabon Bonesperan por ia bona celo),
 Naturo kaj Homo ne plu estos apartigitaj kaj disigitaj,
 La vera filo de Dio nepre kunfandos ilin.

Jaro, che kies plene malfermita pordo mi kantas!
Jaro de la celo plenumita!
Jaro de la edzigho de kontinentoj, klimatoj, kaj oceanoj!
(Nenia nura dogho de Venecio nun edzighanta al la Adriatiko),
Mi vidas, ho jaro, en vi la vastan terakvan globon al kiu kaj de kiu chio estas donata,
Europo al Azio, Afriko kunigita, kaj ili al la Nova Mondo,
La landoj, geografioj, dancantaj antau vi, tenante festivalan girlandon,
Kiel novedzinoj kaj novedzoj man-en-mane.

Pasado al Hindujo!
Friskigaj aeraj de Kaukazo fora, kvietiga lulilo de l' homo,
La rivero Eufrato fluanta, la pasinteco denove lumigata.

Jen, animo, la retrospektivo venigita antauen,
La malnovaj, plej multloghataj, plej richaj de la landoj de la tero,
La fluoj Induso kaj Gango kaj iliaj multaj enfluantoj,
(Mi miajn bordojn de Ameriko marshante hodiau vidas, ripetante chion),
La rakonto de Aleksandro en siaj militemaj marshoj subite mortanta,
Unuflanke Chinujo kaj aliflanke Persujo kaj Arabujo,
Sude la grandaj maroj kaj Golfo Bengala,
La fluantaj literaturoj, enormaj epopeoj, religioj, kasto,
Maljuna okulta Brama senfine fore malantaue, la tenera kaj pli juna Budho,
Centraj kaj sudaj imperioj kaj chiu iliaj apartenajhoj, posedantoj,
La militoj de Timur, la regado de Aurangzebo,
La komercistoj, regantoj, esploristoj, Islamanoj, Venezianoj, Bizanco, la Araboj,
Portugaloj,
La unuaj vojagantoj, famaj ankoraŭ, Marko Polo, Batuta la Mauro,
Duboj solvendaj, la mapo nekonata, blankejoj plenigendaj,
La piedo de homo, nehaltigita, la manoj neniam en ripozo,
Vi mem, ho animo, kiu ne toleros defion.

La mezepokaj navigantoj levighas antau mi,
La mondo de 1492, kun ghia vekigita entrepreno,
Io shvelanta en homaro nun kiel la suko de la tero en printempo,
La sunsubira pompo de kavalireco dekadencanta.

Kaj kiu vi estas, malghoja fantomo?
Giganta, vizia, vi mem viziulo,
Kun majestaj membroj kaj piaj radiantaj okuloj,
Chirkausternanta kun chiu rigardo via oran mondon,
Koloranta ghin per belegaj koloroj.

Kiel la chefa aktoro,
Malsupren al la planklumo marshas en ia granda sceno,
Superreganta la ceterojn mi vidas la Admiralon mem,
(La historia tipo de kuragho, agado, fido),

Vidu lin veli de Paloso, kondukanta sian malgrandan flosan,
Lian vojaghon vidu, lian revenon, lian grandan famon,
Liajn misfortunojn, kalumniantojn, vidu lin prizonulo, katenita,
Vidu lian deprimon, malrichecon, morton.

(Scivola en tempo mi staras, notante la klopodojn de herooj,
Chu la prokrasto estas longa? amara la kalumnio, malricheco, morto?
Chu la semo kushas neatendata dum jarcentoj en la grundo? jen, che la tauga okazo de
Dio,
Levighante en la nokto, ghi shosas, floras,
Kaj plenigas la teron per utilo kaj belo.)

7

Pasado ja, ho animo, al praa pensado,
Ne landoj kaj maroj solaj, via propra klara fresheco,
La juna matureco de idaro kaj shosaro,
Al regnoj de burghonantaj biblio.

Ho animo, nesubpremebla, mi kun vi kaj vi kun mi,
Vian chirkaunavigadon de la mondo komencu,
De homo, la vojagho de la reveno de lia menso,
Al la frua paradizo de racio,
Reen, reen al la naskigho de sagho, al naivaj intuicioj,
Ree kun bela kreado.

8

Ho ni povas ne plu atendi,
Ni ankau enshipighas, ho animo,
Ghojaj ni ankau ekvelas sur senvojajn marojn,
Sentimaj por nekonataj bordoj sur ondoj de ekstazio veli,
Meze de la alblovetantaj ventoj (vi premanta min al vi, mi vin al mi, ho animo),
Karolantaj libere, kantantaj nian kanton de Dio,
Chantantaj nian chanton de agrabla esplorado.

Kun ridado kaj multaj kisoj,
(Lasu aliajn mallaudi, lasu aliajn plori pro peko, rimorso, humiligho),
Ho animo, vi plachas al mi, mi al vi.

Ha pli ol ia pastro, ho animo, ni ankau kredas je Dio,
Sed per la mistero de Dio ni ne audacas ludi.

Ho animo, vi plachas al mi, mi al vi,
Velantaj chi tiujn marojn au sur la montetoj, au maldormantaj en la nokto,
Pensoj, silentaj pensoj, pri Tempo kaj Spaco kaj Morto, kiel akvoj, fluantaj,
Portas min ja kiel tra la regionoj infinitaj,

Kies aeron mi spiras, kies ondetojn mi audas, lavu min chie,
Banu min, ho Dio, en vi, suprenirantaj al vi,
Mi kaj mia animo por atingi en atingodistancon de vi.

Ho vi transcenda,
Sennoma, la fibro kaj la spiro,
Lumo de la lumo, forfaliganta universojn, vi centro de ili,
Vi pli potenca centro de la vera, la bona, la ama,
Vi morala, spirita fontano – la fonto de amo – vi rezervujo,
(Ho pensema animo mia – ho soifo ne satigita – ne atendas tie?
Ne atendas eble por ni ie tie la Kamarado perfekta?).
Vi pulsado – vi motivo de la steloj, sunoj, sistemoj,
Kiuj, rondirante, movighas en ordo, sekuraj, harmoniaj,
Rajde sur la senformaj vastejoj de spaco,
Kiel mi pensus, kiel spirus unuopan spiron, kiel parolus, se, el mi mem,
Mi ne povus lanchi, al tiuj, superajn universojn?

Rapide mi velkus je la penso de Dio,
Je Naturo kaj ghiaj mirindajhoj, Tempo kaj Spaco kaj Morto,
Krom tio ke mi, turnighante, vokas al vi, ho animo, vi efektiva Mi,
Kaj jen, vi milde mastras la orbojn,
Vi matigas Tempon, ridetas kontenta pri Morto,
Kaj plenigas, shveligas plenaj la vastejojn de Spaco.

Pli granda ol steloj au sunoj,
Resaltante, ho animo, vi elvojaghas;
Kia amo ol via kaj nia povus pli vaste ampleksighi?
Kiaj aspiruoj, deziroj, superrivalas viajn kaj niajn, ho animo?
Kiaj revoj de la idealo? kiaj planoj de puro, perfekto, forto?
Kia ghoja volonteco por aliaj fordoni chion?
Por aliaj suferi chion?

Antaukalkule, ho animo, kiam vi, la tempo alvenita,
Chiuj maroj transiritaj, travivitaj la kabloj, la vojagho finita,
Chirkauita, eltenas, frontas Dion, cedas, la celo atingita,
Dum plenigite per amikeco, amo kompleta, la Pli Maljuna Frato trovita,
La Pli Juna fandighas ameme en liajn brakojn.

9

Pasado al pli ol Hindujo!
Chu viaj flugiloj estas plumitaj ja por tiaj foraj flugoj?
Ho animo, chu vi vojaghas ja vojaghojn kiel tiuj?
Chu vi distras vin sur akvoj kiel tiuj?
Chu vi sondas sub la Sanskrita kaj la Vedoj?
Tiam igi liberigi vian inklinon.

Pasado al vi, al viaj bordoj, vi maljunaj ferocaj enigmoj!
Pasado al vi, al mastrado de vi, vi strangolantaj problemoj!
Vi, pristernitaj per la vrakoj de skeletoj, kiuj, vivante, neniam atingis vin.

Pasado al pli ol Hindujo!
Ho sekreto de la tero kaj chielo!
De vi, ho akvoj de la maro! ho sinuantaj rojoj kaj riveroj!
De vi, ho arbaroj kaj kampoj! de vi, fortaj montoj de mia lando!
De vi, ho prerioj! de vi grizaj rokoj!
Ho matena rugho! ho nuboj! ho pluvoj kaj neghoj!
Ho tago kaj nokto, pasado al vi!

Ho suno kaj luno kaj chiuj vi steloj! Siriuso kaj Jupitero!
Pasado al vi!

Pasado, tuja pasado! la sango brulas en miaj vejnoj!
For, ho animo, hisu tuj la ankron!
Tranchu la hauserojn – elvelu – priskuu chiun velon!
Chu ni ne staris chi tie kiel arboj en la tero sufiche longe?
Chu ni ne rampis chi tie sufiche longe, manghante kaj trinkante kiel nuraj brutoj?
Chu ni ne stultigis kaj stuporigis nin per libroj sufiche longe?

Elvelu – stiru por la profundaj akvoj sole,
Sentimaj, ho animo, esplorantaj, mi kun vi, kaj vi kun mi,
Char ni iradas tien kien maristo ancorau ne audacis iri,
Kaj ni riskos la shipon, nin mem, kaj chion.

Ho mia kuragha animo!
Ho pli foren pli foren velu!
Ho audaca ghojo, sed sekura! chu ili ne estas chiuj la maroj de Dio?
Ho pli foren, pli foren, pli foren velu!

PREGHO DE KOLUMBO

Batvundita, frakasita maljunulo,
Jhetita sur chi tiun sovaghan bordon, malproksime malproksime de hejmo,
Bridita de la maro kaj malhelaj ribelemaj brovoj dek du mornajn monatojn,
Dolora, rigida pro multe da penegoj, malsanigita kaj proksime al morto,
Mi elektas por mi vojon lau la rando de l' insulo,
Elvershante pezan koron.

Mi estas tro plena de veo!
Eble mi ne vivos pluan tagon,
Mi ne povas ripozi, ho Dio, mi ne povas manghi au trinki au dormi,
Ghis mi elmetos min mem, mian preghon, ancorau unu fojon al Vi,
Spiros, banos min ancorau unu fojon en Vi, komuniighos kun Vi,

Raportos min ancorau unu fojon al Vi.

Vi scias miajn jarojn tutajn, mian vivon,
Mian longan kaj aferoplenan vivon de aktiva laboro, ne adoradon sole;
Vi scias la preghojn kaj maldormojn de mia juneco,
Vi scias la solenajn kaj viziajn meditojn de mia vireco,
Vi scias kiel antau ol mi komencis mi dedichis chion por veni al Vi,
Vi scias ke mi en la maljunagho ratifikis chiujn tiujn votojn kaj rigore tenis ilin,
Vi scias ke mi ne unu fojon perdis nek fidon nek ekstazon al Vi,
En katenoj, enprizonigita, en malfavoro, ne plendanta,
Akceptanta chion de Vi, kiel tauge venintan de Vi.

Chiuj miaj entreprenoj estis plenigitaj per Vi,
Mi spekulativoj, planoj, komencitaj kaj daurigitaj en pensoj de Vi,
Velado de la profundo au vojaghadado de la tero por Vi,
Intencoj, pretendoj, aspiroj miaj, lasante rezultoj al Vi.

Ho mi estas certa, ili vere venis de Vi,
La urgho, la ardo, la nevenkebla volo,
La potencia, sentata, interna komando, pli forta ol vortoj,
Mesagho de la Chielo, flustranta al mi ech en dormo,
Chi tiuj rapidigis min antauen.

De mi kaj chi tiuj la laboro ghis nun plenumita,
De mi la enuigataj kaj sufokataj pli maljunaj landoj de l' tero vigligitaj, liberigitaj,
De mi la duonsferoj chirkauritaj kaj ligitaj, la nekonata al la konata.

La finon mi ne konas, ghi estas tute en Vi,
Au malgrandan au grandan, mi ne konas – eble tiaj larghaj kampoj, tiaj teroj,
Eble la bruteca senmezura homa subkreskajho kiujn mi konas,
Transplantitaj tien povus levighi al alteco, scio indaj Vin,
Eble la glavoj kiujn mi konas povus tie ja esti shanghitaj en rikoltilojn,
Eble la senviva kruco kiun mi konas, la morta kruco de Europo, povus burghoni kaj flori
tie.

Unu penon plu, mia altaro chi tiu morna sablo;
Ke Vi, ho Dio, mian vivon lumigis,
Per radio da lumo, konstanta, neesprimebla, bonvole donita de Vi,
Lumo rara nedirebla, lumiganta la lumon mem,
Preter chiuj signoj, priskriboj, lingvoj;
Pro tio, ho Dio, ghi estu mia plej lasta vorto, chi tie sur miaj genuoj,
Maljuna, malricha, kaj paralizita, mi dankas Vin.

Kun mia fino proksime,
La nuboj jam kuntirighantaj sur min,
La vojagho obstrukcita, la kurso kontestita, perdita,
Mi cedas miajn shipojn al Vi.

Miaj manoj, miaj membroj sennervighas,
Mia cerbo sentas sin trostrechita, perpleksigita,
Lasu la malnovajn laborojn disighi, mi ne disighos,
Mi firme alkrochighos al Vi, ho Dio, kvankam la ondoj sku-batadu min,
Vin, Vin almenau mi konas.

Chu tio estas la penso de l' profeto kion mi parolas, au chu mi deliras?
Kion mi scias pri vivo? kion pri mi mem?
Mi ne scias ech mian propran laboron, pasintan au nuntempan,
Malhelaj, chiam ekmovighantaj konjektoj pri ghi sternighas antau mi,
Pri pli novaj pli bonaj mondoj, ilia potenca naskigho,
Mokante, konsternante min.

Kaj chi tiuj aferoj kiujn mi subite vidas, kion ili signifas?
Kvazau ia miraklo, ia mano dia malobturus miajn okulojn,
Ombrecaj vastaj formoj ridetas tra la aero kaj chielo,
Kaj sur la malproksimaj ondoj velas nekalkuleblaj ŝipoj,
Kaj himnojn en novaj lingvoj mi audas salutantaj min.

LA DORMANTOJ

1

Mi vagas la tutan nokton en mia vizio,
Pashante per malpezaj piedoj, rapide kaj senbrue pashante kaj haltante,
Klinighante kun malfermitaj okuloj super la fermitaj okuloj de dormantoj,
Vaganta kaj konfuzita, perdita al mi mem, malbone ordigita, kontraudira,
Pauzanta, fiksrigardanta, klinighanta, kaj haltanta.

Kiel solenaj ili aspektas tie, sternitaj kaj kvietaj,
Kiel mallaute ili spiras, la infanetoj en sia lulilo.

La mizeraj trajtoj de enuigitoj, la blankaj trajtoj de kadavroj, la lividaj vizaghoj de
drinkuloj, la malsangrizaj vizaghoj de onanistoj,
La tranchvunditaj korpoj sur batalkampoj, la frenezaj en siaj fortikpordaj chambroj, la
sanktaj idiotoj, la novnaskitaj elighantaj el pordoj, kaj la mortantaj elighantaj el
pordoj,
La nokto trapenetas ilin kaj envolvas ilin.

La edzighinta paro dormas trankvile en sia lito, li kun la polmo sur la kokso de la
edzino, kaj ŝi kun la polmo sur la kokso de la edzo,
La fratinoj dormas ame flank-al-flanke en sia lito,
La viroj dormas ame flank-al-flanke en sia,
Kaj la patrino dormas kun sia infaneto zorge volvita.

La blindaj dormas, kaj la surdaj kaj mutaj dormas,
La prizonulo dormas bone en la prizono, la forkurinta filo dormas,
La murdinto, kiu estas pendigota la sekvantan tagon, kiel li dormas?
Kaj la murdito, kiel li dormas?

La femalo kiu amas senredone dormas,
Kaj la masklo kiu amas senredone dormas,
La kapo de la mongajnanto kiu komplotis la tutan tagon dormas,
Kaj la furiozaj kaj perfidaj temperamentoj, chiuuj, chiuuj dormas.

Mi staras en la mallumo kun mallevitaj okuloj apud la plej forte suferantaj kaj la plej
senripozaj,
Mi pasigas miajn manojn kvietige tien kaj reen kelkajn kolorojn de ili,
La senripozaj sinkas en siajn litojn, ili maltrankvile dormas.

Nun mi trapikas la mallumon, novaj estajhoj aperas,
La tero retirighas de mi en la nokton,
Mi vidis ke ghi estas bela, kaj mi vidas ke kio ne estas la tero estas bela.

Mi iras de litflanko al litflanko, mi dormas proksime al la aliaj dormantoj, chiu laŭvice,
Mi songhas en mia songho chiuajn songhojn de la aliaj songhantoj,
Kaj mi farighas la aliaj songhantoj.

Mi estas danco – ludu tie supre! la paroksismo min girigas rapide!

Mi estas chiamridanta – estas nova luno kaj krepusko,
Mi vidas la kashadon de dolchecoj, mi vidas lertajn fantomojn en chiu direkto en kiu mi
rigardas,
Kasho kaj kasho denove profunde en la grundo kaj maro, kaj kie estas nek grundo nek
maro.

Bone ili faras siajn taskojn tiuj submajstroj diaj,
Nur antaŭ mi ili povas kashi nenion, kaj ne kashus, se ili povus,
Mi kalkulas ke mi estas ilia chefo kaj ili dorlotas min krome,
Kaj chirkauas min kaj kondukas min kaj kuras antaŭen kiam mi marshas,
Por levi siajn ruzajn kovrilojn por signifi min per etenditaj brakoj, kaj rekomenci la
vojon;
Antaŭen ni movighas, gaja bando da kanajloj! kun amuzega muziko kaj sovaghe
flirtantaj flagoj de ghojo!

Mi estas la aktoro, la aktorino, la voĉdonanto, la politikisto,
La elmigranto kaj la ekzilito, la krimulo kiu staris en la atestejo,
Li kiu estis fama, kaj li kiu estos fama post hodiaŭ,
La balbutanto, la bone formita persono, la forvelkinta au malforta persono,
Mi estas shi kiu ornamis sin kaj kunfaldis la harojn atende,
Mia forvaginta amanto jam venis, kaj estas mallume.

Faldu vin kaj ricevu min, mallumo,
Ricevu min kaj mian amanton ankau, li ne lasos min iri sen li.

Mi rulas min sur vi kiel sur lito, mi rezignacias al la krepusko.

Li kiun mi vokas respondas al mi kaj anstatauas mian amanton,
Li levighas kun mi silente de la lito.

Mallumo, vi estas pli milda ol mia amanto, lia karno estis shvita kaj anhelanta,
Mi sentas la varmegan malsekon ankoraŭ kiun li lasis al mi.

Miaj manoj estas etenditaj, mi pasigas ilin en chiuj direktoj,
Mi volus prizoni la ombran bordon al kiu vi vojaghas.

Atentu, mallumo! jam kio ghi estis, kiu tushis min?
Mi pensis, ke mia amanto foriris, alie mallumo kaj li estas unu,
Mi audas la korbatadon, mi sekvas, mi malaperighas.

2

Mi malsupreniras mian okcidentan kurson, miaj tendenoj estas lacaj,
Parfumo kaj juneco fluas tra mi kaj mi estas ilia postvojo.

Estas mia vizagho, flava kaj faltita, anstataŭ tiu de la maljunulino,
Mi sidas malalte en pajlfunda segho kaj zorge flikas la shtrumpojn de mia nepo.

Estas mi ankau, la sendorma vidvino, elrigardanta al la vintra noktomezo,
Mi vidas la scintilojn de stelbrilo sur la glacia kaj pala tero.

Mortotukon mi vidas kaj mi estas la mortotuko, mi volvas korpon kaj kushas en la
cherko,
Estas mallume chi tie sub la tero, ne estas malbone au dolore chi tie, estas senafere chi
tie, pro kialoj.

(Shajnas al mi ke chiu afero en la lumo kaj aero devus esti felicha,
Kiu ajn ne estas en sia cherko kaj en la malluma tombo, sciigu al li ke li havas sufiche.)

3

Mi vidas belan gigantan naghanton, naghanta nuda tra la kirlofluo de la maro,
Liaj brunaj haroj kushas proksime kaj ebene al lia kapo, li ekiradas per kuraghaj brakoj,
li urghadas sin per la kruroj,
Mi vidas lian blankan korpon, mi vidas liajn sentimajn okulojn,
Mi malamas la rapidfluantajn kirlofluojn kiuj volus jhetegi lin kapantaŭe sur la rokojn.

Kion vi faras, vi brutule rughgutaj ondoj?
Chu vi volas mortigi la kuraghan giganton? chu vi volas mortigi lin en la cheftempo de

lia mezagho?

Konstante kaj longe li baraktas,
Li estas frapata, kontuzata, konfuzata, li eltenas, dum lia forto eltenas,
La plaudantaj kirlofluoj estas malkulataj per lia sango, ili forportas lin, ili rulas lin,
svingas lin, turnas lin,
Lia bela korpo estas portata en la rondirantaj kirlofluoj, ghi estas konstante kontuzata
sur la rokoj,
Rapide kaj for de l' okuloj estas portata la kuragha kadavro.

4

Mi turnighas sed ne malimplikas min,
Konfuzita, iu pasintecolegado, alia, sed ancorau kun mallumo.

La marbordo estas tranchata de la razila glacivento, la vrakpafiloj sonas,
La tempesto pauzas, la luno venas, baraktetante tra la drivoj.

Mi rigardas tien kie la ŝipo senhelpe direktighas finoantaue, mi audas la knalon kiam
shi ektrafas, mi audas la ululojn de konsternigho, ili pli kaj pli malfortighas.

Mi ne povas helpi per miaj tordighantaj fingroj,
Mi nur povas hasti al la ondaro kaj lasi ghin saturi min kaj glaciighi sur mi.

Mi serchas kun la amaso, neniŭ el la ŝipanaro estas flosigita al ni vivanta,
Matene mi helpas levi la mortintojn kaj kushigi ilin en vicoj en tenejo.

5

Nun pri la pli malnovaj milittagoj, la malvenko che Bruklino,
Vashingtono staras interne de la linioj, li staras sur la trancheizitaj altajhoj meze de
amaso da oficiroj,
Lia vizagho estas malvarma kaj humida, li ne povas subpremi la plorajn gutojn,
Li levas la teleskopon konstante al siaj okuloj, la koloro forlasis liajn vangojn,
Li vidas la masakron de la sudaj bravuloj, konfiditaj al li de iliaj gepatroj.

La sama finfine kaj finfine, kiam paco estas deklarita,
Li staras en la chambro de la malnova taverno, la forte amataj soldatoj chiuĵ trapasas,
La oficiroj, senparolaj kaj senhastaj, alproksimighas siavice,
La chefo chirkaubrakas ilian kolon kaj kisas ilin sur la vango,
Li leghere kisas la malsekajn vangojn unu post la alia, li manpremas kaj adiauas al la
arneo.

6

Nun kion mia patrino diris al mi unu tagon dum ni sidis kune che tagmangho,
Pri kiam shi estis preskau elkresinta knabino, loghanta hejme kun la gepatroj en la

malnova hejmbieno.

Rughulino indianino venis unu fojon dum la matenmangho al la malnova hejmbieno,
Sur la dorso shi portis faskon da junkoj por la junkfundigo de seghoj,
Shiaj haroj, rektaj, brilaj, maldelikataj, nigraj, abundaj, duonkashis shian vizaghon,
Shia pasho estis libera kaj elasta, shia vocho sonis ekskvizite dum shi parolis.

Mia patrino rigardis ravite kaj mire al la fremdulino,
Shi rigardis la freshecon de shia altportita vizagho kaj fortaj flekseblaj membroj,
Ju pli shi rigardis al shi, des pli shi amis shin,
Neniam antaue shi vidis tian mirindan belecon kaj purecon,
Shi igis shin sidi sur benkon che la framflanko de la kameno, shi kuiris manghajhon por
shi,
Shi havis nenian laboron por doni al shi, sed shi donis al shi rememoron kaj amon.

La rughulino indianino restis la tutan antautagmezon, kaj chirkau la mezo de la
posttagmezo shi foriris,
Ho mia patrino estis malvolonta koncerne shian foriron,
La tutan semajnon shi pensis pri shi, shi observadis por shi multe da monatoj,
Shi rememoris shin multe da vintroj kaj multe da someroj,
Sed la rughulino indianino neniam revenis nek reokazis tie famo pri shi.

7

Montrajho de la somera moleco – kontakto de io nevidata – amoro de la lumo kaj aero,
Mi estas jhaluza kaj supervershita de amikeco,
Kaj iros chirkaufestadi mem kun la lumo kaj aero.

Ho amo kaj somero, vi estas en la songhoj kaj en mi,
Autuno kaj vintro estas en la songhoj, la bienisto iras kun sia ekonomio,
La brutaroj kaj rikoltoj kreskas, la tenejoj estas sufiche plenigitaj.

Elementoj kunfandighas en la nokto, shipoj faras takojn en la songhoj,
La maristo velas, la ekzilito revenas hejmen,
La fughinto revenas nedifektita, la elmigrinto estas returne preter monatoj kaj jaroj,
La malricha Irlandano loghas en la simpla domo de sia infaneco kun la bone konataj
najbaroj kaj vizaghoj,
Ili varme bonvenigas lin, li estas nudpieda denove, li forgesas ke li estas prospera,
La Nederlandano vojaghas hejmen, kaj la Skoto kaj la Kimro vojaghas hejmen, kaj la
indigheno de Mediteraneo vojaghas hejmen,
Al chiu haveno de Anglujo, Francujo, Hispanujo, eniras sufiche plenigitaj shipoj,
La Sviso pashas al siaj montoj, la Pruso iras sian vojon, la Hungaro sian vojon, kaj la Polo
sian vojon,
La Svedo revenas, kaj la Dano kaj Norvego revenas.

La hejmenirantaj kaj la elirantaj,
La bela perdita naghanto, la enuighinto, la onanisto, la femalo kiu amas neredone, la

mon-gajnanto,
La aktoro kaj aktorino, tiuj finintaj siajn rolojn, kaj tiuj atendantaj komenci,
La amema knabo, la edzo kaj edzino, la voĉdonanto, la kandidato kiu estas elektita, kaj
kandidato kiu malsukcesis,
La grandulo jam konata kaj la grandulo iame post hodiaŭ,
La balbutanto, la malsanulo, la perfektformulo, la malbelulo,
La krimulo kiu staris en la atestejo, la juĝisto kiu sidis kaj kondamnis lin, la flue
parolantaj advokatoj, la ĵurio, la audantaro,
La ridanto kaj la ploranto, la dancanto, la meznokta vidvino, la rughulino indianino,
La ftizulo, la erizipelulo, la idioto, la mistraktito,
La antipodoj, kaj ĉiuj inter ĉi tie kaj tiuj en la mallumo,
Mi ĵuras ke ili estas averagigitaj nun – unu estas neniel pli bona ol la alia,
La nokto kaj dormo similigis ilin kaj revigligis ilin.

Mi ĵuras ili estas ĉiuj belaj,
Ĉiu kiu dormas estas bela, ĉio en la duonhela lumo estas bela,
La plej sovagha kaj plej sanga estas finita, kaj ĉio estas paco.

Paco estas ĉiam bela,
La mito de ĉielo indikas pacon kaj nokton.

La mito de ĉielo indikas la animon,
La animo estas ĉiam bela, ĝi aspektas pli au ĝi aspektas malpli, ĝi venas au ĝi
postigas,
Ĝi venas de sia lauba ĝardeno kaj rigardas afable al si mem kaj enfermas la mondon,
Perfektaj kaj puraj la generaj organoj ĵus shprucigitaj, kaj perfekta kaj pura la utero
respondanta,
La kapo bone kreskinta proporcia kaj ĝusta, kaj la intestoj kaj artikoj proporciaj kaj
ĝustaj.

La animo estas ĉiam bela,
La universo estas taŭge en ordo, ĉiu afero estas en sia loko,
Kio jam alvenis estas en sia loko, kaj kio atendas estos en sia loko,
La tordita kranio atendas, la akvoza au putra sango atendas,
La infano de la voremulo au venere-ulo atendas longe, kaj la infano de la drinkulo
atendas longe, kaj la drinkulo mem atendas longe,
La dormantoj kiuj vivis kaj mortis atendas, la tre antaŭaj estas irontaj antaŭen siavice,
kaj la tre malantaŭaj estas venontaj antaŭen siavice,
La diversaj estos ne malpli diversaj, sed ili fluos kaj unuighos – ili unuighas nun.

8

La dormantoj estas tre belaj dum ili kushas senvestaj,
Ili fluas mano en mano tra la tuta tero de oriento al okcidento dum ili kushas senvestaj,
La Aziano kaj kaj Afrikano estas mano en mano, la Europano kaj Amerikano estas mano
en mano,
Kleraj kaj malkleraj estas mano en mano, kaj masklo kaj femalo estas mano en mano,

La nuda brako de la junulino krucas la nudan bruston de shia amanto, ili forte
kunpremighas sen volupto, liaj lipoj premas shian kolon,
La patro tenas la elkreskintan au neelkreskintan filon en la brakoj kun senmezura amo,
la filo tenas la patron en la brakoj kun senmezura amo,
La blankaj haroj de la patrino brilas sur la blanka pojno de la filino,
La spiro de la knabo iras kun la spiro de la viro, amiko estas brakumata de amiko,
La lernanto kisas la instruiston kaj la instruisto kisas la lernanton, la mistraktito estas
reghustigata,
La voko de la sklavo estas en akordo kun la voko de la mastro, kaj la mastro salutas la
sklavon,
La krimogulo elpashas el la prizono, la mensmalsana ighas sana, la suferado de
malsanuloj estas kvietigata,
La shvitadoj kaj febroj chesas, la gorgho kiu estis malsana estas sana, la pulmoj de la
ftizulo estas rekomencataj, la kompatinda konsternita kapo estas libera,
La artikoj de la reumatulo movighas tiel glate kiel iam, kaj pli glate ol iam,
Sufokoj kaj pasejoj malfermighas, la paralizitaj ighas supraj,
La shvelitaj kaj konvulsiantaj kaj kongestitaj vekighas al si mem en bonstato,
Ili pasas la vigligadon de la nokto kaj la kemion de la nokto, kaj vekighas.

Mi ankau pasas de la nokto,
Mi restos iom da tempo for, sed mi revenos al vi denove kaj amos vin.

Kial mi timus konfidi min al vi?
Mi ne timas, mi estas bone antaŭenportita de vi,
Mi amas la riĉe kurantan tagon, sed mi ne forlasas shin en kiu mi tiel longe kushis,
Mi ne scias kiel mi venis de vi, kaj mi ne scias kien mi iros kun vi, sed mi scias ke mi
venis bone kaj iros bone.

Mi restos nur iom da tempo kun la nokto, kaj levighos frue,
Mi tauge pasigos la tagon, ho mia patrino, kaj tauge revenos al vi.

TRANSPONOJ

La reformistoj malsupreniru de la podioj kie ili senchese kriachas – idioto au frenezulo
aperu che chiu flanko de la podioj;
La jughistoj kaj krimuloj estu transponitaj – la provosoj estu metitaj en la prizono – tiuj
kiuj estis prizonuloj prenu la shlosilojn;
Tiuj kiuj malfidas naskon kaj morton konduku la ceterajn.

PENSI PRI TEMPO

1

Pensi pri tempo – pri tiu tuta retrorigardado,
Pensi pri hodiaŭ, kaj la epokoj daurigataj de nun.

Chu vi konjektis ke vi mem ne dauros?
Chu vi timegis tiujn tenebriojn?
Chu vi timis ke la estoneco estos nenio al vi?

Chu hodiaŭ estas nenio? chu la senkomenca pasinteco estas nenio?
Se la estonteco estas nenio, ili estas ĝuste tiel certe nenio.

Pensi ke la suno levighis en la oriento – ke viroj kaj virinoj estis flekseblaj, realaj,
vivantaj – ke ĉiu afero estis vivanta,
Pensi ke vi kaj mi ne vidis, sentis, pensis, nek partoprenis,
Pensi ke ni estas nun ĉi tie kaj partoprenas.

2

Neniu tago pasas, neniu minuto aŭ sekundo sen akusho,
Neniu tago pasas, neniu minuto aŭ sekundo sen kadavro.

La enuigaj noktoj pasas kaj la enuigaj tagoj pasas ankau,
La ulceriĝo de tioma kushado en la lito pasas,
La kuracisto post longa prokrasto donas la silentan kaj teruran rigardon kiel respondon,
La infanoj venas hastantaj kaj plorantaj, kaj oni sendas venigi la fratojn kaj fratinojn,
Medikamentoj staras ne-uzitaj sur la breto (la kamforodoro longe trapenetris la
chambrojn),
La fidela mano de la vivanta ne forlasas la manon de la mortanta,
La ekspasmantaj lipoj premas leĝhere sur la frunton de la mortanta,
La spirado chesas kaj la pulsado de la koro chesas,
La kadavro sternighas sur la lito kaj la vivantaj rigardas ĝhin,
Ĝhi estas palpebla, kiel la vivantaj estas palpeblaj.

La vivantaj rigardas la kadavron per sia vidpovo,
Sed sen vidpovo restadas malsama vivanto kaj rigardas kurioze la kadavron.

3

Pensi la penson de morto, kunfanditan kun la penso de materialoj,
Pensi pri ĉiuj tiuj mirindajhoj de urbo kaj kamparo, kaj aliaj forte interesighantaj pri ili,
kaj ni tute ne interesighantaj pri ili.

Pensi pri kiel avidaj ni estas en la konstruado de niaj domoj,
Pensi ke aliaj estos ĝuste tiel avidaj, kaj ni tute indiferentaj.

(Mi vidas iun konstruanta la domon kiu servas al li por kelke da jaroj, aŭ sepdek aŭ
okdek jaroj pleje,
Mi vidas iun konstruanta la domon kiu servas al li pli longe ol tio.)

Malrapide movighantaj kaj nigraj linioj rampas tra la tuta tero – ili neniam chesas – ili

estas la entombigaj linioj,
Li kiu estis la Prezidento estis entombigita, kaj li kiu estas nun la Prezidento certe estos entombigita.

4

Rememoro de la vulgara sorto,
Ofta specimeno de la vivo kaj morto de laboristoj,
Chiu lau sia speco.

Malvarma jhetversho de ondoj che la pramvarfo, negho kaj glacio en la rivero, duon-glaciigita koto en la stratoj,
Griza malkuraghigita chielo supre, la mallonga lasta taglumo de Decembro,
Cherkveturilo kaj dilighencoj, la funebra procesio de maljuna Broadveja dilighencveturigisto, la funebrantaro plejparte veturigistoj.

Konstanta la trotado al la tombejo, tauge klakadas la mortsonorilo,
La pordo estas pasata, che la nove fosita tombo la veturilo estas haltigata, la vivantaj elighas, la veturilo malfermighas,
La cherko estas elpasigata, mallezata, kaj enlokigata, la vipo estas metata sur la cherkon, la grundo estas rapide enshovelata,
La tumulto supre estas platigata per la shpatoj – silento,
Minuto – neniu movighas au parolas – estas farite,
Li estas dece formetita – chu estas io pli?

Li estis bonulo, liberparola, kolerema, ne malbelaspekta,
Preta kun vivo au morto por amiko, shatanta la virinojn, vetludis, manghis verve, drinkis verve,
Sciis kia estas monhavado, ighis deprimita ghis la fino, malsanighis, estis helpita de kontribuo,
Mortis havante la aghon de kvardek unu jaroj – kaj tio estis lia funebra procesio.

La polekso etendita, fingro levita, antautuko, mantelo, gantoj, rimeno, malsekveteraj vestoj, vipo zorge elektita,
Chefo, observanto, startigisto, gastejestro, iu mallaboranta che vi, vi mallaboranta che iu alia, progreso, homo antaue kaj homo malantaue,
Bona laboro de tago, malbona laboro de tago, preferata veturilo, acha veturilo, unue ekstere, laste ekstere, enveturigado nokte,
Pensi ke chi tiuj estas tiom kaj tiel proksimaj al aliaj veturigistoj, kaj li tie tute ne interesighas pri ili.

5

La merkatoj, la registaro, la salajro de laboristo, pensi kian valoron ili havas tra niaj noktoj kaj tagoj,
Pensi ke aliaj laboristoj atribuos al ili ghuste tiel grandan valoron, tamen ni atribuas malmultan au nenian valoron.

La trivialaj kaj la bonedukitaj, kion vi nomas peko, kaj kion vi nomas boneco,
pensi kiel vasta la diferenco,
Pensi ke la diferenco ankoraŭ daŭros por aliaj, tamen ni situas preter la diferenco.

Pensi kiom da plezuro estas,
Chu vi amuzas vin en la urbo? au okupite pri komerco? au planante kandidatigon kaj
elekton? au kun via edzino kaj familio?
Au kun via patrino kaj fratinoj? au che virineca domlaboro? au la belaj patrinaj zorgoj?
Chi tiuj ankau fluas antaŭen al aliaj, vi kaj mi fluas antaŭen,
Sed kun la tempo vi kaj mi malpli interesighos pri ili.

Via bieno, profitoj, rikoltoj – pensi kiel okupita vi estas,
Pensi ke ankoraŭ estos bienoj, profitoj, rikoltoj, tamen por vi kiel utilos?

6

Kio estos estos bona, ĉar kio estas estas bona,
Interesighi estas bone, kaj ne interesighi estos certe bone.

La hejmaj ghojoj, la taga domlaboro au komercado, la konstruo de domoj ne estas
fantomoj, ili havas pezon, formon, lokon,
Bienoj, profitoj, rikoltoj, merkatoj, salajro, registaro estas neniu el ili fantomoj,
La diferenco inter peko kaj boneco estas nenia iluzio,
La tero ne estas ehho, homo kaj lia vivo kaj ĉiuj aferoj de lia vivo estas bone rigardataj.

Vi ne estas jhetita al la ventoj, vi kolektas certe kaj sekure ĉirkau vi mem,
Vi mem! vi mem! vi mem, por ĉiam kaj ĉiam!

7

Ne estas por difuzi vin ke vi estis naskita de via patrino kaj patro, estas por identigi vin,
Ne estas ke vi devus esti nedecidita, sed ke vi devus esti decidita,
Io longe preparighanta kaj senforma estas alveninta kaj formita en vi,
Vi estas de nun sekura, kio ajn venas au iras.

La fadenoj kiuj estis ŝpinitaj estas kolektitaj, la vefto krucas la varpon, la desegno estas
sistema.

La preparoj estas ĉiuj pravigitaj,
La orkestranoj ŝufiche agordis siajn instrumentojn, la bastono jam donis la signalon.

La gasto kiu venis, li longe atendis, li estas nun loghigita,
Li estas unu el tiuj kiuj estas belaj kaj felichaj, li estas unu el tiuj kiujn rigardi kaj kun
kiuj esti ŝufichas.

La legĥo de la pasinteco ne povas esti eskapata,

La legho de la nuntempo kaj estonteco ne povas esti eskapata,
La legho de la vivantaj ne povas estis eskapata, ghi estas eterna,
La legho de evoluigo kaj transformado ne povas esti eskapata,
La legho de herooj kaj bonfarantoj ne povas esti eskapata,
La legho de drinkuloj, denunciatoj, malnobluloj, ne unu joto de ghi povas esti eskapata.

8

Malrapide movighantaj kaj nigraj linioj iras senchese tra la tero,
Nordano iras portata kaj Sudano iras portata, kaj ili sur la Atlantika flanko kaj ili sur la
Pacifika,
Kaj ili intere, kaj tute tra la Misisipa lando, kaj tute tra la tero.

La grandaj majstroj kaj kosmo estas bone dum ili iras, la herooj kaj bonfarantoj estas
bone,
La konataj estroj kaj inventistoj kaj la richaj posedantoj kaj la piaj kaj eminentaj povas
esti bone,
Sed estas plia raporto ol tio, estas severa raporto pri chio.

La senfinaj hordoj de la malkleraj kaj malbonaj ne estas nenio,
La barbaruloj de Afriko kaj Azio ne estas nenio,
La konstantaj sinsekvoj de malprofundaj homoj ne estas nenio dum ili iras.

De kaj en chiuj chi aferoj,
Mi songhis ke ni ne estas iom shanghendaj, nek la legho de ni shanghenda,
Mi songhis ke la herooj kaj bonfarantoj estos sub la estanteca kaj estinteca legho,
Kaj ke murdistoj, drinkuloj, mensoguloj estos sub la estanteca kaj estinteca legho,
Char mi songhis ke la legho sub kiu ili nun estas sufichas.

Kaj mi songhis ke la celo kaj esenco de la konata vivo, la maldaura,
Estas formi kaj decidi identecon por la nekonata vivo, la daura.

Se chio venus nur al cindroj de fekajho,
Se mushlarvoj kaj ratoj finis nin, tiam Alarmo! char ni estas perfiditaj,
Tiam ja suspekto pri morto.

Chu vi suspektas morton? se mi suspektus morton, mi mortus nun,
Chu vi pensas ke mi povus marshi kompleze kaj kontentigita al neniigo?

Kompleze kaj kontentigita mi marshas,
Kien mi marshas mi ne povas difini, sed mi scias ke ghi estas bona,
La tuta universo indikas ke ghi estas bona,
La estinteco kaj estanteco indikas ke ghi estas bona.

Kiel belaj kaj perfektaj estas la bestoj!
Kiel perfekta la tero, kaj la plej eta objekto sur ghi!
Kio estas nomata bona estas perfekta, kaj kio estas nomata malbona estas ghuste tiel

perfekta,
La vegetaĵoj kaj mineraloj estas ĉiuj perfektaj, kaj la nepeseblaj fluoj perfektaj,
Senhaste kaj sekure ili alĉi tiu, kaj senhaste kaj sekure ili ankoraŭ alĉi tiu.

9

Mi ĵuras ke mi pensas nun ke ĉiu afero senescepte havas eternan animon!
La arboj havas, enradikigitaj en la tero! la herboj de la maro havas! la bestoj!

Mi ĵuras ke mi pensas ke estas nenio krom senmorteco!
Ke la ekskvizita plano estas por ghi, kaj la nebula floso estas por ghi, kaj la koherado
estas por ghi!
Kaj tuta preparado estas por ghi – kaj identeco estas por ghi – kaj vivo kaj materialoj
estas tute por ghi!

FLUSTROJ DE CHIELA MORTO

CHU VI KURAGHAS, HO ANIMO

Chu vi kuraghas, ho animo,
Elmarshi kun mi al la nekonata regiono,
Kie nek grundo estas por la piedoj nek ia pado por sekvi.

Nenia mapo tie, nek gvidanto,
Nek vocho sonanta, nek tusho de homa mano,
Nek vizagho kun luma karno, nek lipoj, nek okuloj, estas en tiu lando.

Mi ne konas ghin, ho animo,
Nek vi, chio estas blanko antau ni,
Chio atendas neprirevite en tiu regiono, tiu nealirebla lando.

Ghis, kiam la ligoj malfiksighos,
Chiuuj krom la ligoj eternaj, Tempo kaj Spaco,
Nek mallumo, gravito, sento, nek iaj limoj limigantaj nin.

Tiam ni ekelighos, ni flosos,
En Tempo kaj Spaco, ho animo, preparitaj por ili,
Sufichaj, ekipitaj finfine (ho ghojo! ho frukto de chio!) ilin plenumi, ho animo.

FLUSTROJN DE CHIELA MORTO

Flustrojn de chiela morto murmuratajn mi audas,
Labiala klacho de nokto, siblaj hhoraloj,
Piedpashoj milde suprenirantaj, mistikaj ventetoj, alblovetataj molaj kaj mallautaj,
Ondetoj de nevidataj riveroj, tajdoj de fluo fluanta, chiam fluanta,
(Au chu ghi estas la plaudado de larmoj? la senmezuraj akvoj de homaj larmoj?)

Mi vidas, apenau vidas chielen, grandajn nubamasojn,
Funebre malrapide ili rulighas, silente shvelante kaj miksighante,
Kun foje duonmalheligita malghojigita malproksima stelo,
Aperanta kaj malaperanta.

(Ia akusho pli ghuste, ia solena senmorta naskigho;
Sur la loghlimoj, nepenetrebaj al okuloj,
Iu animo transpasas.)

KANTANTA LA KVADRATON DIHAVAN

1

Kantanta la kvadraton dihavan, el la Unu antaueniranta, el la flankoj,
 El la malnova kaj nova, el la kvadrato tute dia,
 Solida, kvarflanka (chiuj flankoj bezonataj), de chi tiu flanko Jehovo estas mi,
 Maljuna Bramo mi, kaj mi Saturno estas;
 Ne Tempo tushas min – mi estas Tempo, maljuna, moderna kiel iu,
 Nepersvadebla, senceda, ekzekucianta justajn jughojn,
 Kiel la Tero, la Patro, la bruna maljuna Krono, kun leghoj,
 Agha preter kalkulo, tamen chiam nova, chiam kun tiuj potencaj leghoj rulighanta,
 Senceda mi pardonas neniun homon – tiu kiu ajn pekas mortas – mi prenos la vivon de
 tiu homo;
 Tial neniun atendu kompaton – chu havas la sezonoj, gravito, la asignitaj tagoj,
 kompaton? ne pli mi,
 Sed kiel la sezonoj kaj gravito, kaj kiel chiuj asignitaj tagoj kiuj ne pardonas,
 Mi disdonas de chi tiu flanko jughojn nedeturneblajn sen la plej eta rimorso.

2

Konsolanto plej milda, la pripromesito antauenighanta,
 Kun milda mano etendita, la pli potenca Dio estas mi,
 Antaŭdirita de profetoj kaj poetoj en iliaj plej ravitaj profetajhoj kaj poemoj,
 De chi tiu flanko, jen! la Sinjoro Kristo rigardas – jen! Hermo mi – jen! mia estas la
 vizagho de Herkulo,
 Tutan malghojon, laboron, suferadon, mi, registrante ghin, ghin sorbas en min mem,
 Multajn fojojn mi estis malakceptata, mokata, metata en prizono, kaj krucumata, kaj
 ankoraŭ multajn fojojn mi estos,
 La tutan mondon mi fordonis por miaj karaj fratoj kaj fratinoj, por la animo,
 Irante mian vojon tra la hejmoj de homoj, richaj au malrichaj, kun la kiso de amo,
 Char mi estas amo, mi estas la ghojalportanta Dio, kun espero kaj chioampleksanta
 karitato,
 Kun indulgaj vortoj kiel al infanoj, kun freshaj kaj sanaj vortoj, la miaj sole,
 Juna kaj forta mi pasas, bone sciante ke mi estas mem destinita al frua morto;
 Sed mia karitato havas nenian morton – mia sagho ne mortas, nek frue nek malfrue,
 Kaj mia dolcha amo, testamentita chi tie kaj aliloke, neniam mortas.

3

Malintimema, malkontenta, prikomplotanta ribelon,
 Kamarado de krimuloj, frato de sklavoj,
 Ruza, malestimegata, servutulo, malklera,
 Kun shudra vizagho kaj lacigita brovo, nigra, sed en la profundo de mia koro, fiera kiel
 iu,
 Levita nun kaj chiam kontraŭ tiu kiu ajn malestimante arogas regi min,
 Moroza, plena de trompemo, plena de rememoroj, meditema, kun multaj artifikoj,
 (Kvankam estis pensate ke mi estis malhelpita kaj forpelita, kaj ke miaj artifikoj estis
 finitaj, sed tio neniam estos),

Defia, mi, Satano, ankoraŭ vivas, ankoraŭ eldiras vortojn, en novaj landoj tauge aperanta
(kaj malnovaj ankau),
Daura chi tie de mia flanko, militema, egala kun iuj, reala kiel iuj,
Nek tempo nek shangho iam shanghos min au miajn vortojn.

4

Sankta Spirito, spiranto, vivo,
Preter la lumo, pli luma ol lumo,
Preter la flamoj de infero, ghoja, saltanta facile super inferon,
Preter Paradizo, parfumita sole per mia propra parfumo,
Inkludanta tutan vivon sur tero, tushanta, inkludanta Dion, inkludanta Savonton kaj
Satanon,
Etera, trafenetranta chion (char sen mi, kio estus chio? kio estus Dio?),
Esenco de formoj, vivo de la realaj identecoj, daura, pozitiva (nome la nevidata),
Vivo de la granda ronda mondo, la suno kaj steloj, kaj de homo, mi, la ghegenerala
animo,
Chi tie la kvadraton finante, la solidan, mi la plej solida,
Spiras mian spiron ankau tra chi tiuj kantoj.

PRI LI KIUN MI AMAS TAGE KAJ NOKTE

Pri li kiun mi amas tage kaj nokte, mi songhis ke mi audis ke li estas morta,
Kaj mi songhis ke mi iris tien kie oni entombigis lin kiun mi amas, sed li ne estis en tiu
loko,
Kaj mi songhis ke mi vagis, serchante inter entombigejoj por trovi lin,
Kaj mi trovis ke chiu loko estas entombigejo;
La domoj, plenaj de vivo, estis egale plenaj de morto (chi tiu domo estas tiel nun),
La stratoj, la shiparo, la amuzejoj, la Chikago, Bostono, Filadelfio, la Manahato, estis tiel
plenaj de la mortaj kiel de la vivaj,
Kaj pli plenaj, ho vaste pli plenaj de la mortaj ol de la vivaj;
Kaj kion mi songhis mi de nun diros al chiu persono kaj epoko,
Kaj mi staras de nun ligita al kion mi songhis,
Kaj nun mi voluntas malatenti entombigejojn kaj ne plu konsideri ilin,
Kaj se la memorigajhoj pri la mortaj estus starigitaj indiferente chie, ech en la chambro,
kie mi manghas au dormas, mi estus kontenta,
Kaj se la kadavro de iu kiun mi amas, au mia propra kadavro, estu tauge reduktita je
pulvoro kaj vershita en la maron, mi estos kontenta,
Au se ghi estu disjhetita al la ventoj, mi estos kontenta.

TAMEN, TAMEN, VI DEPRIMITAJ HOROJ

Tamen, tamen, vi deprimitaj horoj, mi konas vin ankau,
Peziloj de plumbo, kiel vi obtuze klakadas che miaj maleoloj,
Tero en chambron de funebrado shanghighas – mi audas la arogantan mokantan

vochon,
Materio estas venkanto – materio, triumfa sole, daurigas antaŭen.

Malesperaj krioj flosas senfine al mi,
La voko de mia plej proksima amanto, elmetata, timigita, necerta,
La maron mi tuj velos, venu diri al mi,
Venu diri al mi kien mi rapidas, diru al mi mian celon.

Mi komprenas vian angoron, sed mi ne povas helpi vin,
Mi aliras, audas, vidas, la malghoja busho, la rigardo el la okuloj, via muta demando,
Kien mi iros de la lito sur kiu mi kushas, venu diri al mi;
Maljunagho, timigita, necerta – vocho de juna virino, peteganta min por konsolo;
Vocho de juna viro, Chu mi ne eskapos?

KVAZAU FANTOMO KARESIG MIN

Kvazau fantomo karesis min,
Mi pensis ke mi ne estas sola, promenante ĉi tie ĉe la marbordo;
Sed tiu pri kiu mi pensis ke li estas kun mi dum mi promenas nun ĉe la marbordo, tiu
kiun mi amis, kiu karesis min,
Dum mi klinighas kaj rigardas tra la lumetanta lumo, tiu jam tute malaperis,
Kaj tiuj aperas kiuj estas abomenaj al mi kaj mokas min.

SENDUBIGOJ

Mi bezonas neniajn sendubigojn, mi estas homo kiu estas absorbita de sia propra animo;
Mi ne dubas ke de sub la piedoj kaj apud la manoj kiujn mi konas nun rigardas vizaghoj
kiujn mi ne konas, trankvilaj kaj efektivaj vizaghoj,
Mi ne dubas ke la majesto kaj beleco de la mondo estas latentaj en iu ajn joto de la
mondo,
Mi ne dubas ke mi estas senlima, kaj ke la universoj estas senlimaj, vane mi penas pensi
kiel senlimaj,
Mi ne dubas ke la orboj kaj sistemoj de orboj ludas siajn rapidajn ludojn tra la aero
intence, kaj ke mi iun tagon rajtos fari tiom, kiom ili, kaj pli ol ili,
Mi ne dubas ke provizoraj aferoj dauras kaj dauras por milionoj da jaroj,
Mi ne dubas ke internaj havas siajn internajn, kaj eksterajn havas siajn eksterajn, kaj
ke la vidado havas alian vidadon, kaj la audado alian audadon, kaj la vocho alian
vochon,
Mi ne dubas ke la pasie priploritaj mortoj de junaj viroj estas prizorgataj, kaj la mortoj de
junaj virinoj kaj la mortoj de infanetoj estas prizorgataj,
(Chu vi pensis ke Vivo estas tiel bone prizorgata, kaj Morto, la signifo de tuta Vivo, ne
estas bone prizorgata?)

Mi ne dubas ke vrakoj che la maro, malgrau iliaj hororoj, malgrau kies edzino, infano,
edzo, amanto, malsupreniris, estas prizorgataj ghis la plej detalaj punktoj,
Mi ne dubas ke kio ajn povas eble okazi ie iam estas prizorgata en la imanentajhoj de
aferoj,
Mi ne pensas ke Vivo prizorgas chion kaj Tempon kaj Spacon, sed mi kredas ke Chiela
Morto prizorgas chion.

FLUSABLAJ JAROJ

Flusablaj jaroj kiuj girigas min mi ne scias kien,
Viaj planoj, politikoj, malsukcesas, shnuroj rompighas, substancoj mokas kaj eskapas
min,
Nur la temo kiun mi kantas, la granda kaj forta obsedita animo, ne eskapas,
La Memo devas neniam cedi – tio estas la fina substanco – tio el chio estas certa,
El politikoj, triumfoj, vivo, kio finfine restas?
Kiam montrajhoj disrompighas, kio krom la Memo estas certa?

TIUN MUZIKON CHIAM CHIRKAU MI

Tiun muzikon chiam chirkau mi, senchesan, senkomencan, ankoraŭ longe neinstruita,
mi ne audis,
Sed nun la hhoron mi audas kaj estas ekzaltita,
Tenorulon, fortan, suprenirantan kun potenco kaj sano, kun gajaj notoj de tagigho mi
audas,
Sopranulinon intertempe, velantan flosive super la suproj de grandegaj ondoj,
Travideblan basulon, vibrantan rave sub kaj tra la universo,
La triumfaj tutti, la funebraj ululoj per dolchaj flutoj kaj violonoj, per chiuj chi mi
plenigas min,
Mi ne nur audas la volumenojn de sono, mi estas tushata de la ekskvizitaj signifoj,
Mi aukultas la diversajn vochojn, sinuantajn enen kaj elen, strebantajn, konkurantajn
kun fajra fervoro superi unu la alian emocie;
Mi ne pensas ke la prezentistoj konas sin mem – sed nun mi pensas ke mi komencas
koni ilin.

KIU SHIPO, PERPLEKSIGITA CHEMARE

Kiu shipo, perpleksigita chemare, studas por la vera kalkulo?
Au envenante, por eviti la barojn kaj sekvi la veran shanelon perfektan piloton bezonas?
Jen maristo! jen, sipo! surshipigu la plej perfektan piloton,
Kiun, en malgranda boato, debordante kaj remante, mi, alvokante vin, proponas.

SENBRUA PACIENCA ARANEO

Senbrua pacienca araneo,
Mi remarkis kie sur malgranda promontoro ghi staris izolite,
Rimarkis, kiel por esplori la vakan vastan chirkauon,
Ghi eligis filamenton, filamenton, filamenton, el si mem,
Chiam malvolvante ilin, chiam senlace eljhetante ilin.

Kaj vi, ho mia animo, kie vi staras,
Chirkauita, malfiksita, en senmezuraj oceanoj da spaco,
Senchese meditante, entreprenante, jhetante, serchante la sferojn por kunigi ilin,
Ghis la ponto kiun vi bezonos estos formita, ghis la direktebla ankro ektenos,
Ghis la filandra fadeno kiun vi jhetas ekkaptos ie, ho mia animo.

HO VIVANTA CHIAM, CHIAM MORTANTA

Ho vivanta chiam, chiam mortanta!
Ho la entombigoj de mi pasintaj kaj nuntempaj,
Ho mi, dum mi pashegas antauen, materia, videbla, tiranema kiel chiam;
Ho mi, kio mi estis por jaroj nun morta (mi ne lamentas, mi estas kontenta);
Ho por liberigi min de tiuj kadavroj de mi kiujn mi turnighas kaj rigardas kie mi jhetis
ilin,
Por pasi antauen (ho vivanta! chiam vivanta!) kaj lasi la kadavrojn malantaue.

AL IU TUJ MORTONTA

El chiuj ceteraj mi elelektas vin, havante mesaghon por vi,
Vi estas mortonta – aliaj diru al vi kio plachas al ili, mi ne povas mensogi,
Mi estas ghusta kaj senkompata, sed mi amas vin – estas nenia eskapo por vi.

Milde mi metas mian dekstran manon sur vin, vi apenau sentas ghin,
Mi ne argumentas, mi klinas mian kapon proksimen kaj duonkovras ghin,
Mi sidas kviete apude, mi restas fidela,
Mi estas pli ol flegisto, pli ol gepatro au najbaro,
Mi absolvas vin de chio krom vi mem spiritkorpe, kiu estas eterna, vi mem certe
eskaos,
La kadavro kiun vi postlasos estos nur ekskrementa.

La suno ektrudas sin en neatenditaj direktoj,
Fortaj pensoj plenigas vin kaj konfido, vi ridetas,
Vi forgesas ke vi estas malsana, kiel mi forgesas ke vi estas malsana,
Vi ne vidas la medikamentojn, vi ne atentis la plorantajn amikojn, mi estas kun vi,
Mi ekskludas aliajn de vi, estas nenio kompatenda,
Mi ne kompatas, mi gratulas vin.

NOKTO SUR LA PRERIOJ

Nokto sur la prerioj,
La vespermangho estas finita, la fajro sur la tero brulas feble,
La lacigitaj elmigrantoj dormas, volvitaj en siaj lankovriloj,
Mi marshas sola – mi staras kaj rigardas la stelojn, pri kiuj mi pensas nun ke mi neniam
vere rimarkis ilin antaue.

Nun mi sorbas senmortecon kaj pacon,
Mi admiras morton kaj provas propoziciojn.

Kiel abundaj! kiel spiritaj! kiel resumaj!
La sama kutima homo kaj animo – la samaj kutimaj aspiroj, kaj la sama enhavo.

Mi rigardis la tagon plej belega ghis mi vidis kion la ne-tago elmontris,
Mi rigardis chi tiun globon suficha ghis elsaltis tiel senbrue chirkau mi miriadoj da aliaj
globoj.

Nun, kiam la grandaj pensoj de spaco kaj eterno plenigas min, mi mezuros min per ili,
Kaj nun, tusite de la vivoj de aliaj globoj, alvenitaj tiel malproksimen kiel tiuj de la tero,
Au atendantaj alveni, au pasintaj pli malproksimen ol tiuj de la tero,
Mi de nun ne pli malatentas ilin ol mi malatentas mian propran vivon,
Au la vivojn de la tero alvenintajn tiel malproksimen kiel la mia, au atendantajn alveni.

Ho mi vidas nun ke vivo ne povas elmontri chion al mi, kiel la tago ne povas,
Mi vidas ke mi devas atendi kio estos elmontrata de morto.

PENSO

Dum mi sidas kun aliaj che granda festeno, subite, dum la muziko estas ludata,
Al mia menso (de kie ghi venas, mi ne scias), fantoma en nebulo de vrako che l' maro,
De certaj shipoj, kiel ili velas el la haveno kun flirtantaj flagrubandoj kaj jhetataj kisoj, kaj
tio estas la fino pri ili,
De la solena kaj malhela mistero pri la sorto de la Prezidento,
De la floro de la mara scienco de kvindek generacioj, sinkanta apud la Nordorienta
bordo kaj alfundighanta – de la vaporshipo Arktiko alfundighanta,
De la vualita sceno – virinoj, kunighintaj sur la ferdeko, palaj, heroaj, atendantaj la
momenton kiu tiel rapide alproksimighas – ho la momento!
Grandega plorsingulto – kelkaj bobeloj – la blanka shaumo suprenshprucanta – kaj tiam
la virinoj for,
Alfundighantaj tie, dum la senpasia malseko fluadas – kaj mi nun pripensanta, Chu tiuj

virinoj estas ja for?
Chu animoj estas tiel dronataj kaj detruataj?
Chu nur materio estas triumfa?

LA LASTA ALPREGHO

Finfine, tenere,
De la muroj de la potenca fortigita domo,
De la alkrocho de la fermitaj seruroj, de la teno de la bone fermitaj pordoj,
Mi estu aeren jhetita.

Mi glisu senbrue for;
Per la shlosilo de moleco malshlosi la pordojn – per flustro,
Malfermi la pordojn, ho animo.

Tenere – ne estu senpacienca,
(Forta estas via teno, ho mortema karno,
Forta estas via teno, ho amo).

DUM MI RIGARDIS LA PLUGANTON PLUGANTA

Dum mi rigardis la pluganton pluganta,
Au la semanton semanta en la kampoj, au la rikoltanton rikoltanta,
Mi vidis tie ankau, ho vivo kaj morto, viajn analogiojn;
(Vivo, vivo estas la kultivo, kaj Morto estas la rikolto responda).

PENSEMA KAJ HEZITEMA

Pensema kaj hezitema,
La vortojn la Mortaj mi skribas,
Char vivantaj estas la Mortaj,
(Eble la solaj vivantaj, solaj realaj,
Kaj mi la miragho, mi la fantomo).

VI PATRINO KUN VIA EGALA IDARO

1

Vi Patrino kun via egala idaro,

Vi diversa cheno da malsamaj Shtatoj, tamen unu identeco sole,
Specialan kanton, antaŭ ol mi iros, mi volus kanti antaŭ chiuj ceteraj,
Por vi, la estonteco.

Mi volus semi semon por vi de senfina Nacieco,
Mi volus formi vian tuton, inkluzive korpon kaj animon,
Mi volus montri multe antaŭtempe vian veran Union, kaj kiel ghi povus esti atingata.

La padojn al la domo mi intencas fari,
Sed lasi al tiuj venontaj la domon mem.

Kredon mi kantas kaj preparon;
Pro tio ke Vivo kaj Naturo ne estas grandaj rilate la nuntempon sole,
Sed ankoraŭ pli grandaj de kio estas ankoraŭ venonta,
El tiu formulo por vi mi kantas.

2

Kiel forta birdo sur flugiloj liberaj,
Ghoja, la plej ampleksajn spacojn chielen fendanta,
Tia estu la penso kiun mi volus pensi pri vi, Ameriko,
Tia estu la recitativo kiun mi volus alporti por vi.

La konceptaĵojn de la poetoj de aliaj landoj mi ne volus alporti al vi,
Nek la komplimentojn kiuj tiel longe servis siavice,
Nek rimon, nek la klasikajhojn, nek parfumon de fremda kortego au endoma biblioteko;
Sed odoron mi volus alporti kiel de pinarbaroj en Majno, au elspiro de Ilinojsa prerio,
Kun liberaj aroj de Virginio au Georgio au Tenesio, au de Teksasaj altejoj, au la marĉoj
de Florido,
Au la nigra fluo de Sagenajo, au la largha blua etendo de Hurono,
Kun prezento de la scenoj de Jelostono, au Josemito,
Kaj submurmurante, trapenetrante chion, mi volus alporti la susurantan marsonon,
Kiu senfine sonas de la du Grandaj Maroj de la mondo.

Kaj por viaj pli subtila sento pli subtilaj refrenoj, timata Patrino,
Preludoj de intelekto, registrantaj chi tiujn kaj vin, mensformuloj taŭgaj por vi, realaj, kaj
sanaj, kaj grandaj, kiel chi tiuj kaj vi,
Vi! supreniranta pli alten, plonghanta pli profunden ol ni sciis, vi transcenda Unio!
Per vi la fakto pravigota, kunmiksota kun la penso,
Penso de homo pravigota, kunmiksota kun Dio,
Per via ideo, jen, la senmorta realeco!
Per via realeco, jen, la senmorta ideo!

3

Cerbo de la Nova Mondo, kia tasko estas via,
Formuli la Modernan – el la senegala majesto de la moderna,

El vi mem, ampleksante sciencon, remuldi poemojn, preghejojn, arton,
(Remuldi, eble formeti ilin, fini ilin – eble ilia laboro estas ne plu bezonata, kiu scias?),
Per vidado, mano, koncepto, sur la fono de la potenca pasinteco, la mortaj,
Pentri kun absoluta fido la potencan vivantan nuntempon.

Kaj tamen, vi vivanta cheestanta cerbo, heredanto de la morta, la Malnov-Monda
cerbo,

Vi, kiu kushis volvite, kiel nenaskita bebo en ghiaj faldoj tiel longe,
Vi, zorge preparata de ghi tiel longe – eble vi nur disvolvas ghin, nur maturigas ghin,
Ghi efektiviĝi en vi – la esenco de la pasinta tempo enhavata en vi,
Ghiaj poemoj, preghejoj, artoj, nekonsciaj al si mem, destinitaj rilate al vi;
Vi nur la pomoj, longe, longe, longe kreskadantaj,
La frukto de la tuta Malnova maturanta hodiau en vi.

4

Velu, velu vian plejlertan, shipo de Demokratio,
Valora estas via shargho, ghi ne estas la Nuntempo sole,
La Pasinteco estas ankau staplita en vi,
Vi ne tenas la entreprenon de vi mem sole, nek de la Okcidenta kontinento sole,
La resumo tuta de la tero flosas sur via kilo, ho shipo, estas stabiligita de viaj sparoj,
Kun vi Tempo vojaghas konfide, la antaŭaj nacioj dronos au naghos kun vi,
Kun chiuj iliaj antikvaj luktoj, martiroj, herooj, epopeoj, militoj, vi portas la aliajn
kontinentojn,
Ilia, ilia tiom, kiom via, la celhaveno triumfa;
Direktu do kun bona forta mano kaj singarda okulo, ho direktilisto, vi portas grandajn
kunulojn,
Respektinda pastreca Azio velas hodiau kun vi,
Kaj regha feuda Europo velas kun vi.

5

Bela mondo de nova pli superba naskiĝo, kiu levighas al miaj okuloj,
Kiel senlima ora nuboj, pleniganta la okcidentan chielon,
Emblemo de la għenerala patrineco, levita super chio,
Sankta figuro de la naskantino de filinoj kaj filoj,
El via svarmanta utero viaj gigantaj idoj en senchesaj procesioj elighantaj,
Ekdejhorentaj de tia gravedeco, prenantaj kaj donantaj konstantan forton kaj vivon,
Mondo de la reala – mondo de la du en unu,
Mondo de la animo, naskita de la mondo el la reala sole, kondukata al identeco, korpo,
de ghi sole,
Tamen en komenco sole, nekalkuleblaj amasoj da kunmetitaj altvaloraj materialoj,
De la cikloj de l' historio transsenditaj, de chiu nacio, lingvo, chi tien senditaj,
Pretaj, kolektitaj chi tie, pli libera, vasta, elektra mondo konstruota chi tie,
(La vera Nova Mondo, la mondo de l' orba scienco, moraloj, literaturoj venonta),
Vi mirmondo ankoraŭ nedifinita, neformita, nek mi vin difinas,

Kiel mi povu trapenetri la nepenetreblan blankon de la estonteco?
Mi sentas vian minacan grandecon tiel ankau malbona kiel bona,
Mi observas vin antaueniranta, sorbanta la nuntempon, transcendanta la pasintecon,
Mi vidas vian lumon lumanta, kaj vian ombron ombranta, kvazau la tutan terglobon,
Sed mi ne entreprenas difini vin, apenau kompreni vin,
Mi nur vin nomas, vin profetas, kiel nun,
Mi nur vin ekkrias!

Vin en via estonteco,
Vin en via sola daura vivo, kariero, via propra liberigita menso, via soranta spirito,
Vin kiel alia egale bezonata suno, brila, flamanta, rapidmovighanta, fruktiganta chion,
Vin levighintan en potenca gajeco kaj ghojo, en senfina granda gajego,
Disiganta por chiam la nubon kiu pendis tiel longe, kiu pezis tiel longe sur la menso de
l' homo,
La dubon, suspekton, timegon, de grada, certa dekadenco de l' homo;
Vin en via pli multa, pli sana idaro de la femala, maskla – vin en viaj atletoj, moralaj,
spiritaj, Sude, Norde, Okcidente, Oriente,
(Al viaj senmortaj mamoj, Patrino de Chio, via chiu filino, filo, amatigita same, chiam
egala),
Vin en viaj propraj muzikistoj, kantistoj, artistoj, nenaskitaj ancorau, sed certaj,
Vin en via morala richeco kaj civilizacio (ghis kiuj via plej fiera materia civilizacio devas
resti vana),
Vin en via chioliveranta, chioenfermanta kultado – vin en nenia sola biblio, savanto,
sole,
Viaj savantoj nekalkuleblaj, latentaj interne de vi mem, viaj biblio, senchesaj interne de
vi mem, egalaj al iuj, diaj kiel iuj,
(Via soranta kurso vin formulanta, ne en viaj du grandaj militoj, nek en la videbla kresko
de via jarcento,
Sed multe pli en chi tiuj folioj kaj chantoj, viaj chantoj, granda Patrino!),
Vin en edukado kreskigita de vi, en instruistoj, studoj, studentoj, naskitaj de vi,
Vin en viaj demokratiaj festoj amase, viaj altaj originalaj festivaloj, operoj, prelegantoj,
predikantoj,
Vin en viaj finajhoj (la preparoj nur nun kompletigataj, la konstruo sur sekuraj
fundamentoj fiksata),
Vin en viaj kulminoj, intelekto, pensado, viaj plej altaj raciaj ghojoj, via amo kaj dieca
aspirado,
En viaj brilegaj venontaj literatoroj, viaj plenpulmaj oratoroj, viaj pastrecaj poetoj,
kosmaj kleruloj,
Chi tiujn! chi tiujn en vi (certe venontajn), hodiau mi profetas.

6

Lando, toleranta chiujn, akceptanta chiujn, ne por la bonaj sole, chiuj bonaj por vi,
Lando en la regnoj de Dio, esti regno per vi mem,
Sub la reguloj de Dio, esti regulo per vi mem.

(Jen, kie levighas tri senegalaj steloj,

Esti viaj naskaj steloj, mia lando, Ensemblo, Evoluo, Libereco,
Muntitaj en la chielo de Legho.)

Lando de senprecedenta fido, la fido de Dio,
Via grundo, via subgrundo mem, tute suprenlevita,
La għenerala interna tero tiel longe tiel diligente superkovrita, nun de nun por tio por
kio ghi estas audace nudigita,
Malfermita de vi al la lumo de l' chielo por bono au malbono.

Ne por sukceso sole,
Ne por chiam senzorge veli seninterrompe,
La shtormo frapos vian vizaghon, la malhelo de milito kaj pli malbona ol milito
trakovros vin tute,
(Chu vi kapablis militon, ghiajn luktojn kaj afliktojn? kapablu pacon, ghiajn afliktojn,
Char la luktoj kaj mortiga strecho de nacioj venas finfine en prospera paco, ne milito);
En multaj ridetantaj maskoj morto alvenos, logante vin, vi en malsano varmegos,
La livida kancero etendos siajn terurajn ungegojn, alkrochante viajn mamojn, provante
frapi vin profunde interne,
Ftizo de la plej malbona, la morala ftizo, rughigos vian vizaghon per furiozo,
Sed vi alfrontos viajn sortojn, viajn malsanojn, kaj superos ilin chiujn,
Kio ajn ili estas hodiau kaj kio ajn tra la tempo ili estu,
Ili chiu kaj chiu levighos kaj forpasos kaj chesos for de vi,
Dum vi, la spiralojn de Tempo chirkaurante, el vi mem, vin mem ankoraŭ
malimplikante, fandante,
Egalanima, natura, mistika Unio vi (la mortema kun la senmorta kunmiksita),
Soros al la plenumo de la estonteco, la spirito de la korpo kaj la menso,
La animo, ghiaj destinoj.

La animo, ghiaj destinoj, la reala reala,
(Signifo de chiu tiuj aperajhoj de la reala);
En vi, Ameriko, la animo, ghiaj destinoj,
Vi globo de la globoj! vi mirindajho nebula!
De multaj ekdoloroj de varmo kaj malvarmo konvulsiigita (per tiuj vin mem
solidiganta),
Vi mensa, morala orbo – vi Nova, ja nova, Spirita Mondo!
La Nuntempo ne tenas vin – por tia vasta kreskado kiel via,
Por tia senkompara flugado kiel via, tia idaro kiel via,
La ESTONTECO sole tenas vin kaj povas teni vin.

PAUMANOKA BILDO

Du boatoj kun retoj, kushantaj apud la marplagho, tute senmovaj,
Dek fishkaptistoj atentantaj – ili malkovras densan aron da menhejdenoj fishoj – ili lasas
fali la kunigitajn sejnfinojn en la akvon,
La boatoj apartighas kaj forremas, chiu sur sia chirkauranta kurso al la plagho,
enfermante la menhejdenojn,

La reto estas entrenata per vincho de tiuj kiuj venis surteren,
Iuj el la fishkaptistoj ripozas en siaj boatoj, aliaj staras ghismaleole en la akvo,
ekvilibrantaj sur fortaj gamboj,
La boatoj parte suprentiritaj, la akvo plaudanta kontraŭ ili,
Sternitaj sur la sablo en amasoj kaj vicoj, tute el la akvo, la verddorsaj, makulitaj
menhejdenoj.

DE TAGMEZO AL STELA NOKTO

VI ORBO SUPRE, TUTE BLINDUMANTA

Vi orbo supre, tute blindumanta! vi varmega Oktobra tagmezo!
Inundanta per brila lumo la grizan plaghan sablon,
La sibla proksima maro kun malproksimaj vidajhoj kaj shaumo,
Kaj flavbrunaj strioj kaj ombroj kaj etendighanta bluo;
Ho suno de tagmezo brilega! mia speciala vorto al vi.

Audu min, eminenta!
Via amanto mi, ĉar ĉiam mi amis vin,
Eĉ kiel sunghuanta bebo, poste felicha knabo sola ĉe ia arbara rando, viaj malproksim-
tushantaj radioj sufichaj,
Au viro maturighinta, au juna au maljuna, dum nun mi al vi lanchas mian alpreghon.

(Vi ne povas per via muteco trompi min,
Mi scias, ke antaŭ la tauga homo tuta Naturo cedas,
Kvankam ne respondante per vortoj, la ĉieloj, arboj, audas lian voĉon – kaj vi, ho
suno,
Koncerne viajn ekstrebojn, viajn perturbojn, subitajn elpushojn kaj faskojn da flamo
giganta,
Mi komprenas ilin, mi konas tiujn flamojn, tiujn perturbojn bone.)

Vi, kiu per fruktiga varmo kaj lumo,
Super miriadoj da bienoj, super teroj kaj akvoj Norde kaj Sude,
Super la senfina kurso de Misisipo, super la herbaj ebenajhoj de Teksaso, la arbaroj de
Kanado,
Super la tuta globo, kiu turnas sian vizaghon al vi, brilanta en spaco,
Vi, kiu senpartie inkludas ĉion, ne nur kontinentojn, marojn,
Vi, kiu al vinberoj kaj trudherboj kaj malgrandaj sovaghfloroj donas tiel malavare,
Vershu, vershu vin sur la miajn kaj min, per nur efemera radio el viaj milionoj da
milionoj,
Trafrapu ĉi tiujn ĉantojn.

Nek nur lanchu vian subtilan blindumadon kaj vian forton por ĉi tiuj,

Preparu la pli malfruan posttagmezon de mi mem – preparu miajn plilongighantajn ombrojn,
Preparu miajn stelajn noktojn.

VIZAGHOJ

1

Promenantaj la pavimon au veturantaj la kamparan flankvojon, jen, tiaj vizaghoj!
Vizaghoj de amikeco, precizo, singardo, komplezo, idealeco,
La spiriteca-antaŭscia vizagho, la chiam bonvena ofta bonvola vizagho.
La vizagho de la kantado de muziko, la grandaj vizaghoj de naturaj advokatoj kaj
jughistoj, larghaj che la dorssupro,
La vizaghoj de chasistoj kaj fishkaptistoj, elstaraj che la brovoj, la razitaj blankigitaj
vizaghoj de ortodoksaj civitanoj,
La pura, ekstravaganca, sopiranta, demandanta vizagho de artisto,
La malbela vizagho de iu bela animo, la bela malshategata au malestimata vizagho,
La sanktaj vizaghoj de infanoj, la lumigita vizagho de la patrino de multe da idoj,
La vizagho de amoro, la vizagho de respekto,
La vizagho kvazau de songho, la vizagho de senmova roko,
La vizagho senigita je ghia bono kaj malbono, kastrita vizagho,
Sovagha falko, liaj flugiloj stucitaj de la stucisto,
Virchevalo, kiu cedis finfine al la lachegoj kaj tranchilo de la kastristo.

Promenantaj la pavimon tiel, au transirantaj senchesprame, vizaghoj kaj vizaghoj kaj
vizaghoj,
Mi vidas ilin kaj ne plendas kaj estas kontenta pri chiuj.

2

Chu vi supozas ke mi povus esti kontenta pri chiuj se mi rigardus ilin ilia propra finalo?

Chi tiu nun estas tro lamentinda vizagho por viro,
Ia mizera pediko, petanta permeson esti, timkauranta por tio,
Ia laktaza larvo, benanta kio lasas ghin tordrampi al ghia truo.

Chi tiu vizagho estas hundnazego snufanta por forjhetajho,
Serpentoj nestas en tiu busho, mi audas la siblan minacon.

Chi tiu vizagho estas nebulo pli malvarmega ol la arktika maro,
Ghij dormemaj kaj shancelighantaj glacimontoj knaras irante.

Chi tiu estas vizagho de amaraj herboj, chi tiu vomigilo, ili bezonas nenian etiketon,

Kaj pli de la drogbreto, laudano, kauchuko, au porkgraso.

Chi tiu vizagho estas iu epilepsio, ghia senvorta lango eligas la pretermundan krion,
Ghiaj vejnoj lau la kolo shvelas, ghiaj okuloj rulighas, ghis ili vidigas nenion ol siajn
blankojn,
Ghiaj dentoj kunpremighas, la polmoj de la manoj estas tranchitaj de la enturnitaj ungoj,
La viro falas luktante kaj shaumante al la tero, dum li bone konjektas.

Chi tiu vizagho estas mordita de bestachoj kaj vermoj,
Kaj chi tiu estas la tranchilo de ia murdisto kun duontirita ingo.

Chi tiu vizagho shuldas al la sakristiano lian plej malgajan pagon,
Senchesa mortsonorilo sonoras tie.

3

Trajtoj de miaj egaluloj, chu vi volus trompi min per via sulkigita kaj kadavra marsho?
Nu vi ne povas trompi min.
Mi vidas vian chirkaurantan neniam forigitan fluon,
Mi vidas sub la randojn de viaj marasmaj kaj malnoblaj maskumoj.

Etendighu kaj tordighu kiel vi volus, pushu per la implikantaj antaŭoj de fishoj au ratoj,
Vi estos senmaskigitaj, vi certe estos.

Mi vidis la vizaghon de la plej fi-shmirita kaj salivuma idioto kiun oni havis che la
frenezulejo,
Kaj mi sciis por mia konsolo kion oni ne sciis,
Mi sciis pri la agantoj kiuj malplenigis kaj detruis mian fraton,
La samaj atendas por forporti la rubajhon de la disfalinta apartamentaro,
Kaj mi rerigardos post unu au du dudekoj da epokoj,
Kaj mi renkontos la realan mastron perfekta kaj nedifektita, je chiu colo tiel bona kiel
mi mem.

4

La Sinjoro antaŭeniras, kaj ankoraŭ antaŭeniras,
Chiam kun la ombro antaŭe, chiam kun la etendita mano, alkolektanta la malviglulojn.

El chi tiu vizagho eligas standardoj kaj chevaloj – ho superbe! mi vidas kio venas,
Mi vidas la altajn pionirchapojn, vidas bastonojn de kurantoj, malobstrucantaj la vojon,
Mi audas venkintajn tamburojn.

Chi tiu vizagho estas savboato,
Chi tiu estas la vizagho komandanta kaj barba, la certeraj ne koncernas ghin,
Chi tiu vizagho estas bongusta frukto, preta por manghi,
Chi tiu vizagho de sana deca knabo estas la programo de tuta bono.

Chi tiuj atestas, dormantaj au maldormaj,
Ili montras sian devenon de la Majstro mem.

De la vorto kiun mi parolis mi esceptas ech ne unu – rughaj, blankaj, nigraj, chiu estas
diaj,
En chiu domo estas la ovo, ghi elvenas post mil jaroj.

Makuloj au fendoj che la fenestroj ne ghenas min,
Alta kaj suficha staras malantaue kaj signas al mi,
Mi legas la promeson kaj pacience atendas.

Chi tiu estas la vizagho de plenkreskinta lilio,
Shi alparolas la suplakoksan viron proksime de la palisaro de la ghardeno,
Venu chi tien shi rughighe alvokas, Venu proksimen al mi, suplakoksa viro,
Starighu che mia flanko ghis mi klinas min tiel alte kiel mi povas super vi,
Plenigu min per blanketa mielo, klinighu malsupren al mi,
Frotu al mi per via frota barbo, frotu al mia brusto kaj shultroj.

5

La maljuna vizagho de la patrino de multe da infanoj,
Chit! mi estas tute kontenta.

Lulata kaj malfrua estas la fumo de la Unua-taga mateno,
Ghi pendighas malalte super la vicoj da arboj apud la bariloj,
Ghi pendighas maldense apud la sasafroso kaj sovaghcherizo kaj dornarbusto sub ili.

Mi vidis la richulinojn lukse vestitajn che la vesperfestoj,
Mi audis kion la kantistoj kantis tiel longe,
Audis kiu elsaltis en karmezina juneco el la blanka shaumo kaj la akvo blua.

Jen virino!
Shi elrigardas el sia kvakera chapo, shia vizagho estas pli klara kaj bela ol la chielo.

Shi sidas en brakseghe sub la ombrita porcho de la biendomo,
La suno apenau brilas sur shian maljunan blankan kapon.

Shia ampleksa robo estas el kremkolora linajho,
Shiaj nepoj kreskigis la linon, kaj shiaj nepinoj shpinis ghin per la spindelo kaj la rado.

La melodia karaktero de la tero,
La fino preter kiu filozofio ne povas iri kaj ne volas iri,
La pravigita patrino de homoj.

LA MISTIKA TRUMPETISTO

1

Auskultu, ia sovagha trompetisto, ia stranga muzikisto,
Shvebante nevidata en la aero, vibras kapricajn melodiojn chi-nokte.

Mi audas vin, trompetisto, aukultante vigle, mi kaptas viajn notojn,
Jen vershigantajn, girantajn kiel tempesto chirkau mi,
Jen mallautajn, mildajn, jen en la malproksimo perditajn.

2

Venu pli proksimen, senkorpulo, eble en vi resonas
Iu morta komponisto, eble via pensema vivo
Estis plena de aspiroj altaj, neformitaj idealoj,
Ondoj, oceanoj muzikaj, hhaose impetantaj,
Kiujn nun, ekstazia fantomo, proksime al mi klinighanta, via korneto, ehante,
sonorante,
Eldonas al nenies oreloj krom miaj, sed libere donas al miaj,
Ke mi povu vin traduki.

3

Blovu trompetisto libere kaj klare, mi sekvas vin,
Dum, je via likva preludo, gaja, serena,
La maltrankvila mondo, la stratoj, la bruaj tagaj horoj retirighas,
Sankta trankvilo malsupreniras kiel roso sur min,
Mi marshas en malvarmeta refreshiganta nokto la marshojn de Paradizo,
Mi flaras la herbon, la humidan aeron, kaj la rozojn;
Via kanto ekspansiigas mian sensentigitan ligitan spiriton, vi liberas, lanchas min,
Flosanta kaj sunghuanta sur la lago de chielo.

4

Blovu denove, trompetisto! kaj por miaj sentivaj okuloj,
Alportu la malnovajn spektaklojn, montru la feudan mondon.

Kian sorchon via muziko faras! vi pasigas antau mi,
Damojn kaj kavalirojn longe mortajn, baronoj estas en siaj kastelohaloj, la trobadoroj
kantas,
Armitaj kavaliroj eliras por reghustigi maljustajhojn, kelkaj serchante la sanktan Gralon;
Mi vidas la turniron, mi vidas la konkursantojn enfermitajn en peza kiraso, sidantaj sur
majestaj machantaj chevaloj,
Mi audas la kriojn, la sonojn de batoj kaj frapanta shtalo;
Mi vidas la tumultajn armeojn de la Krucmilitantoj – auskultu, kiel sonoregas la
cimbaloj,
Jen, kie la monahhoj marshas antaue, portante la krucon alte.

5

Blovu denove, trumpetisto! kaj por via temo,
 Prenu nun la enfermantan temon de chio, la solvanton kaj la lokejon,
 Amon, kiu estas la pulso de chio, la subteno kaj la instigo,
 La koro de la vir' kaj de la virino tute por amo,
 Nenian alian temon ol amon – la kunligantan, enfermantan, chie difuzighantan amon.

Ho kiel la senmortaj fantomoj venas dense chirkau min,
 Mi vidas la vastan alambikon chiam funkciantan, mi vidas kaj konas la flamojn kiuj
 hejtas la mondon,
 La ardon, la rughon, la batantajn korojn de amantoj,
 Tiel beate felichaj kelkaj, kaj kelkaj tiel silentaj, mallumaj, kaj proksimaj al morto;
 Amo, kiu estas la tuta tero al amantoj – amo, kiu mokas tempon kaj spacon,
 Amo, kiu estas tago kaj nokto – amo, kiu estas suno kaj luno kaj steloj,
 Amo, kiu estas karmezina, luksa, troabunda je parfumo,
 Neniaj aliaj vortoj krom vortoj de amo, nenia alia penso krom amo.

6

Blovu denove, trumpetisto – aperigu la alarmojn de milito.

Rapide je via sorcho tremanta zumo rulighas kiel malproksima tondro,
 Jen, kie la armitaj viroj hastas – jen, meze de l' nuboj de polvo la rebril' de bajonetoj,
 Mi vidas la fulgvizaghajn kanonistojn, mi rimarkas la rozan ekbrilon meze de l' fumo,
 mi audas la krakadon de l' pafiloj;
 Ne milito sole – via timiga muzikkanto, sovagha ludisto, alportas chiun vidon de tim',
 La faroj de banditoj senkompataj, rabo, murdo – mi audas la kriojn por helpo!
 Mi vidas shipojn, dronantajn chemare, observas surferdeke kaj malsupre la terurajn
 scenojn.

7

Ho trumpetisto, mi pensas, ke mi mem estas la instrumento kiun vi ludas,
 Vi fandas mian koron, mian cerbon – vi movas, tiras, shanghas ilin lauvole,
 Kaj nun viaj malgajaj notoj sendas mallumon tra mi,
 Vi forprenas tutan gajigan lumon, tutan esperon,
 Mi vidas la sklavigitajn, la renversitajn, la vunditajn, la premitajn de la tuta tero,
 Mi sentas la senmezurajn honton kaj humilighon de mia raso, ili ighas tute la miaj,
 Miaj ankau la venghoj de homaro, la maljustajhoj de l' epokoj, konfuzitaj kvereloj kaj
 malamoj,
 Kompleta malvenko sur mi pezas – chio perdita – la malamiko triumfa,
 (Tamen meze de l' ruinoj Fiero kolosa staras nemalkvietigita ghisfine,
 Elteno, rezoluto ghisfine).

8

Nun, trumpetisto, por via finado,
Promesu pli altan melodion ol iujn ankoraŭ,
Kantu al mia animo, renovigu ghian forvelkantan fidon kaj esperon,
Veku mian malrapidan kredon, donu al mi ian vizion de la estonteco,
Donu al mi chifoje ghiajn profetadon kaj ghojon.

Ho gaja, ghojega, kulmina kanto!
Forteco pli ol tiu de la tero estas en viaj notoj,
Marshoj de venko – la homo liberigita – la venkinto finfine,
Himnoj al la universala Dio de la universala homo – chio ghoj’!
Renaskita raso aperas – perfekta mondo, chio ghoj’!
Virinoj kaj viroj en sagho senkulpeco kaj sano – chio ghoj’!
Tumultaj ridaj bakhhofestoj, plenigitaj de ghoj’!
Milito, malghojo, suferado for – la putra tero purigita – nenio restanta krom ghoj’!
La oceano plenigita de ghoj’ – la atmosfero tute ghoj’!
Ghoj’! ghoj’! je libereco, kultado, amo! ghoj’ je la ekstazo de vivo!
Sufiche nur esti! sufiche spiri!
Ghoj’! ghoj’! chie ghoj’!

AL LOKOMOTIVO EN VINTRO

Vin por mia recitativo,
Vin en la pelanta shtormo ghuste kiel nun, la negho, kun la vintra tago finighanta,
Vin en via panoplio, via regula duopa pulsado kaj via takto konvulsia,
Via nigra cilindra korpo, ora latuno, kaj arghenta shtalo,
Viaj pezegaj flankostangoj, paralelaj bielaj kunighantaj, girantaj, navetantaj che viaj
flankoj,
Via metra anhelad’ kaj roro, jen shvelanta, jen mallautighanta en la malproksimo,
Via granda elstara lanterno, fiksita antaue,
Viaj longaj, palaj, flosantaj vaporoflagoj, nuancitaj de delikata purpuro,
La densaj kaj malhelaj nuboj, elruktighantaj el via fumtubo,
Via kunplektita framo, viaj risortoj kaj valvoj, la trema scintilo de viaj radoj,
Via vagonaro poste, obeema, gaje sekvanta,
Tra ventego au kalmo, jen rapide, jen malrapide, tamen konstante kureganta;
Tipo de la moderna – emblemo de movo kaj potenco – pulso de l’ kontinento,
Chifoje venu servi la Muzon kaj fandu en versojn, ghuste kia mi chi tie vidas vin,
Kun shtormo kaj skubataj ventekblovoj kaj falanta negho,
Tage la avertanta sonorilo via, soni siajn notojn,
Nokte svingighi viaj silentaj signallampoj.

Sovaghgorgha belajho!
Rulighu tra mia chanto kun via tuta senlegha muziko, viaj svingighantaj lampoj nokte,
Via freneze fajfata ridad’, ehhanta, rulanta kiel tertremo, ekcitantanta chion,
Legho de vi mem kompleta, firme tenanta vian propran trakon,
(Nenia dolchec’ afabla de larma harp’ au flua piano via),
Viaj shrikotriloj redonataj de rokoj kaj montetoj,

Lanchataj tra la larghaj prerioj, trans la lagojn,
Al la vastaj chieloj, liberigitaj kaj gajaj kaj fortaj.

HO MAGNETOSUDO

Ho magneto-Sudo! ho scintilanta parfumita Sudo! mia Sudo!
Ho rapida kuragho, richa sango, impulso kaj amo! bono kaj malbono! ho chiuj karaj al mi!
Ho karaj al mi miaj naskighaferoj—chiuj movighantajhoj kaj la arboj kie mi estis naskita—la grenoj, plantoj, riveroj,
Karaj al mi miaj propraj malrapidaj malviglaj riveroj, kie ili fluas, malproksime, sur ebenajhoj de arghentaj sabloj au tra marchoj,
Karaj al mi Roanoko, Savano, Altamaho, Pedeo, Tombigbio, Santio, Kuso, kaj Sabino,
Ho pensema, fore vagante, mi revenas per mia animo frekventi denove iliajn bordojn,
Denove en Florido mi flosas sur travideblaj lagoj, mi flosas sur Okichobio, mi transiras la marcharbarojn au tra agrablaj senarbejoj au densaj arbaroj,
Mi vidas la papagojn en la arbaroj, mi vidas la papauon kaj la florantan tition;
Denove, velante en mia marbordshipo ferdeke, mi marbordvelas apud Georgio, mi marbordvelas lau la Karolinoj,
Mi vidas kie la vivkverko kreskas, mi vidas kie la flavpino, la odora lauro, la citronujo kaj oranghujo, la cipreso, la gracia palmeto,
Mi pasas krudajn kabojn kaj eniras Markolon Pamlikan tra kreko, kaj sagigas mian vidadon landinternen;
Ho la kotonplanto! la kreskantaj kampoj de rizo, sukero, kanabo!
La kakto, gardita de dornoj, la lauroarbo kun grandaj blankaj floroj,
La stepo malproksima, la richeco kaj malfekundeco, la malnovaj arbaroj plenaj de visko kaj pendanta longmusko,
La pinaodoro kaj la tenebro, la impona natura silenteco (chi tie en chi tiuj densaj marchoj la flibustro portas sian pafilon, kaj la fughinto havas sian kashitan kabaneton);
Ho la stranga fascino de chi tiuj duonkonataj duon-netrapaseblaj marchoj, infestitaj de rampuloj, resonantaj per la mughego de la aligatoro, la malgajaj bruoj de la noktuo kaj la linko, kaj la zumado de la sonserpento,
La mokbirdo, la Amerika imitisto, kantanta la tutan antautagmezon, kantanta tra la lunlumata nokto,
La kolibro, la sovagha meleagro, la prociono, la didelfo;
Kentukia maizkampo, la alta, gracia, longfolia maizo, svelta, klakanta, helverda, kun kvastoj, kun belaj spikoj, chiu bone eningita en sia shelo;
Ho mia koro! ho teneraj kaj ferocaj ekdoloroj, mi ne povas ilin elteni, mi foriros;
Ho esti Virginiano kie mi elkreskis! ho esti Karolinano!
Ho sopiroj nerepremeblaj! ho mi reiros al la malnovtempa Tenesio kaj neniam plu vagos.

MANAHATO

Mi petis ion specifan kaj perfektan por mia urbo,
 Je kio jen! suprensaltis la pratempa nomo.
 Nun mi vidas kio estas en nomo, vorto, likva, sana, nebridebla, muzika, memsuficha,
 Mi vidas ke la vorto de mia urbo estas tiu vorto de la pratempo,
 Char mi vidas tiun vorton nestigita en nestoj de akvogolfoj, superba,
 Richa, chirkauita dense chie chirkau de velshipoj kaj vaporshipoj, insulo dek ses
 mejlojn longa, solide fundamentita,
 Sennombraj homoplenaj stratoj, altaj kreskajhoj de fero, sveltaj, fortaj, helaj, grandioze
 suprenlevighantaj al klaraj chieloj,
 Tajdoj rapidaj kaj ampleksaj, forte amataj de mi, chirkau sunsubiro,
 La fluantaj marfluo, la malgrandaj insuloj, pli grandaj apudaj insuloj, la altejoj, la
 vilaoj,
 La sennombraj mastoj, la blankaj bordvaporshipoj, la gabaroj, la pramoj, la nigraj mar-
 vaporshipoj bone konstruitaj,
 La urbinternaj stratoj, la oficejoj de la pograndistoj, la oficejoj de la shipkomercistoj kaj
 monmakleristoj, la riveraj stratoj,
 Enmigrantoj alvenantaj, po dek kvin au dudek mil en semajno,
 La charoj portantaj varojn, la vireca raso de veturigistoj de chevaloj, la brunvizaghaj
 maristoj,
 La somera aero, la brila suno brilanta, kaj la velantaj nuboj supre,
 La vintraj neghoj, la sledsonoriloj, la rompita glacio en la rivero, trapasado supren au
 malsupren kun la fluso au malfluso,
 La mehhanistoj de la urbo, la majstroj, bonformaj, belvizaghaj, rigardantaj al vi rekte en
 la okulojn,
 Homplenaj trotuaroj, veturiloj, Broadvejo, la virinoj, la butikoj kaj teatrajhoj,
 Miliono da homoj – manieroj liberaj kaj superbaj – liberaj vochoj – gastamo – la plej
 kuraghaj kaj amikaj junaj viroj,
 Urbo de hastantaj kaj scintilantaj akvoj! urbo de spajroj kaj mastoj!
 Urbo nestigita en golfoj! mia urbo!

CHIO ESTAS VERO

Ho mi, homo de malforta kredo tiel longe,
 Staranta aparteme, neanta porciojn tiel longe,
 Nur konscia hodiau pri kompakta chiea vero,
 Ekkonscianta hodiau ke estas neniu mensogo au speco de mensogo, kaj povas esti neniu,
 kiu ne kreskas tiel nepre sur si kiel la vero kreskas sur si,
 Au kiel iu legho de la tero au iu natura produktajho de la tero kreskas.

(Chi tiu estas kurioza kaj eble ne estos tuj ekkonsciita, sed ghi devas esti ekkonsciita,
 Mi sentas en mi mem ke mi prezentas malverojn egale kun la ceteraj,
 Kaj ke la universo ilin prezentas.)

Kie malsukcesis perfekta redono, indiferece pri mensogoj au la vero?
 Chu estas sur la grundo, au en akvo au fajro? au en la spirito de l' homo? au en la karno
 kaj sango?

Meditante inter mensogantoj kaj retirighante severe en min mem, mi vidas ke estas efektive neniaj mensogantoj au mensogoj malgrau chio,
Kaj ke nenio maltrafas ghian perfektan redonon, kaj ke kio estas nomata mensogoj estas perfektaj redonoj,
Kaj ke chiu afero precize prezentas sin mem kaj kio antaŭis ghin,
Kaj ke la vero ampleksas chion, kaj estas kompakta, ghuste tiom kiom spaco estas kompakta,
Kaj ke estas nenia difekto au vakuo en la kvanto de la vero – sed ke chio estas vero senescepte;
Kaj de nun mi iros celebri ian ajn aferon kiun mi vidas au estas,
Kaj kantos kaj ridos kaj neos nenion.

ENIGMOKANTO

Kio eskapas chi tiun verson kaj ian verson,
Neaudata de la plej sentiva orelo, neformita en la plej klara okulo au plej sagha menso,
Nek scio nek famo, nek felicho nek richo,
Kaj tamen la pulso de chiu koro kaj vivo tra la tuta mondo senchese,
Kion vi kaj mi kaj chiu, serchante, chiam chiam maltrafas,
Malfermita sed ankoraŭ sekreto, la realo de la realo, iluzio,
Senkosta, permesita al chiu, tamen homo neniam la posedanto,
Kion poetoj vane penas meti en rimon, historiistoj en prozon,
Kion skulptisto ankoraŭ ne chizis, nek pentristo pentris,
Kion kantisto neniam kantis, nek oratoro nek aktoro iam eldiris,
Envokante chi tie kaj nun, mi defias por mia kanto.

Indiferente, meze de publikaj, privataj lokoj, en soleco,
Malantau la monto kaj la arbaro,
Kompano de la plej okupitaj stratoj de l' urbo, tra la kunigho,
Ghi kaj ghiaj radioj konstante glisas.

En rigardoj de belaj nekonsciaj beboj,
Au strange en la encherkigitaj mortaj,
Au montrajho de ektagigho au steloj nokte,
Kiel ia solvighanta delikata tavolo da revoj,
Kashighanta tamen restadanta.

Du spiretoj da vortoj ampleksantaj ghin,
Du vortoj, tamen chio de unua al lasta ampleksata en ghi.

Kiel arde por ghi!
Kiom da ŝipoj velis kaj dronis por ghi!
Kiom da vojaghantoj ekiris de siaj hejmoj kaj neniam revenis!
Kiom da genio kuraghe riskita kaj perdita por ghi!
Kiaj sennombraj provizoj de belo, amo, riskitaj por ghi!
Kiel chiu plej superbaj faroj de post kiam Tempo komencighis estas spurebla al ghi – kaj

estos ghis la fino!
Kiel chiuj heroaj martirigoj al ghi!
Kiaj, pravigitaj de ghi, la hororoj, malbonoj, bataloj de la tero!
Kiel la helaj fascinaj flagraj flamoj de ghi, en chiu epoko kaj lando, altiris la okulojn de
homoj,
Richa kiel sunsubiro sur la Norvega bordo, la chielo, la insuloj, kaj la klifoj,
Au la silentaj lumetantaj nordlumoj de meznokto neatingeblaj.

Eble la enigmo de Dio ghi, tiel svaga kaj tamen tiel certa,
La animo por ghi, kaj la tuta videbla universo por ghi,
Kaj chielo finfine por ghi.

EXCELSIOR

Kiu iris plej malproksimen? char mi volus iri pli malproksimen,
Kaj kiu estis justa? char mi volus esti la plej justa persono de la tero,
Kaj kiu plej zorgema? char mi volus esti pli zorgema,
Kaj kiu estis plej felicha? ho mi pensas ke estas mi – mi pensas ke neniu estis iam pli
felicha ol mi,
Kaj kiu donis chion? char mi donas konstante la plej bonan kion mi havas,
Kaj kiu plej fiera? char mi pensas ke mi pravas esti la plej fiera filo vivanta – char mi
estas la filo de la fortika kaj altsupra urbo,
Kaj kiu estis audaca kaj lojala? char mi volus esti la plej audaca kaj lojala estajho de la
universo,
Kaj kiu bonfarema? char mi volus montri pli da bonfaremo ol chiuj ceteraj,
Kaj kiu ricevis la amon de la plejmulto da amikoj? char mi scias kio estas ricevi la
pasian amon de multe da amikoj,
Kaj kiu posedas perfektan kaj amatan korpon? char mi ne pensas ke iu posedas pli
perfektan au amatan korpon ol la mia,
Kaj kiu pensas la plej ampleksajn pensojn? char mi volus chirkau tiujn pensojn,
Kaj kiu faris himnojn taugajn por la tero? char mi frenezas per konsumanta ekstazo fari
ghojajn himnojn por la tuta tero.

HA MALRICHECOJ, KUNTIRIGHOJ, KAJ PAUTAJ RETIRIGHOJ

Ha malrichecoj, kuntirigoj, kaj pautaj retirigoj,
Ha vi malamikoj kiuj en konflikto venkis min,
(Char kio estas mia vivo au ies vivo krom konflikto kontrau malamikoj, la malnova, la
senchesa milito?),
Vi malhonoroj, vi lukto kontrau pasioj kaj apetitoj,
Vi doloroj de neplenumitaj amikecoj (ha vundoj la plej akraj el chiuj!),
Vi peno de doloraj kaj sufokitaj eldiroj, vi malnoblajhoj,
Vi malprofundaj paroladoj chetable (la miaj la plej malprofundaj el iuj);
Vi neplenumitaj intencoj, vi torturantaj koleroj, vi subpremitaj enuoj!

Ha ne pensu ke vi fine triumfas, mia vera memo estas ankoraŭ elvenonta,
Ghi ankoraŭ elmarshos superante, ghis chio kushos sub mi,
Ghi ankoraŭ ekstaros la soldato de la fina venko.

PENSOJ

Pri la popolopinio,
Pri trankvila kaj serena dekreto pli-malpli baldau (kiel senemocia! kiel certa kaj fina!),
Pri la Prezidento kun pala vizagho sekrete sin demandante Kion diros finfine la popolo?
Pri la frivola jughisto – pri la koruptita Kongresano, shtatestro, urbestro – pri tiaj kiel chi
tiuj starantaj senhelpaj kaj malkashitaj,
Pri la murmuranta kaj krieganta pastro (baldau, baldau forlasita),
Pri la malpliigho jaro post jaro de respektindo, kaj pri la diroj de funkciuloj, statutoj,
predikejoj, skoloj,
Pri la levighado chiam pli altaj kaj fortaj kaj larghaj de la intuicioj de viroj kaj virinoj, kaj
de Memrespekto kaj Personeco,
Pri la vera Nova Mondo – pri la Demokratioj, brilegaj amase,
Pri la konformigho de politiko, terarmeoj, mararmeoj, al ili,
Pri la brilanta suno che ili – pri la imanenta lumo, pli granda ol la ceteraj,
Pri la envolvo de chio de ili, kaj la elversho de chio el ili.

MEDIUMOJ

Ili estighos en la Shtatoj,
Ili raportos Naturon, leghojn, fiziologion, kaj felichon,
Ili ilustras Demokration kaj la kosmon,
Ili estos alimentaj, amemaj, perceptemaj,
Ili estos kompletaj virinoj kaj viroj, ilia sinteno muskola kaj supla, ilia trinko akvo, ilia
sango pura kaj klara,
Ili plene ghuos materialismon kaj la vidon de produktajhoj, ili ghuos la vidon de la
bovajho, segligno, panajhoj, de Chikago la granda urbo,
Ili trejnos sin iri publike farighi oratoroj kaj oratorinoj,
Fortaj kaj dolchaj estos iliaj langoj, poemoj kaj materialoj de poemoj venos de iliaj vivoj,
ili estos faristoj kaj trovistoj,
De ili kaj de iliaj laboroj elighos diaj transdiristoj, por transdiri evangeliojn,
Karakteroj, okazoj, retrorigardoj estos transdirataj en evangelioj, arboj, bestoj, akvoj
estos transdirataj,
Morto, la estonteco, la nevidebla kredo estos chiuj transdirataj.

ENTEKSU, MIA FORTIKA VIVO

Enteksu, enteksu, mia fortika vivo,
Enteksu ankoraŭ soldaton fortan kaj plenan por grandaj kampanjoj venontaj,
Enteksu rughan sangon, tendonojn kiel shnuregojn, la sentojn, vidadon enteksu,

Teksu daurige sekure, teksu tage kaj nokte la vefton, la varpon, senchese teksu, ne
lacighu,
(Ni ne scias kio estas la utilo, ho vivo, nek scias la celon, nek vere scias ion ajn,
Sed scias la laboron, la bezono dauras kaj dauros, la mortenvolvita marsho de paco kaj
ankau de milito dauras),
Por grandaj kampanjoj de paco la samajn la dratecajn fadenojn teksu,
Ni ne scias kial au kio, tamen teksu, chiam teksu.

HISPANUJO, 1873-74

El la malhelo de plej densaj nuboj,
El la feudaj vrakoj kaj amasigitaj skeletoj de reghoj,
El tiu tuta malnova Europa rubo, la frakasitaj histrionajhoj,
Ruinigitaj katedraloj, dispecighoj de palacoj, tomboj de pastroj,
Jen, la trajtoj de Libereco freshe lumigitaj elrigardas – la sama senmorta vizagho
elrigardas;
(Ekvido, kiel de la vizagho de via Patrino, Kolumbio,
Ekbrilo signifplena kiel de sabro,
Radianta al vi).

Nek pensu ke ni forgesas vin patrinan;
Chu vi prokrastis tiel longe? chu la nuboj fermos denove sur vin?
Ha, sed vi nun mem aperis al ni – ni konas vin,
Vi donis al ni certan pruvon, la ekvidon de vi mem,
Vi atendas tie, kiel chie, vian tempon.

CHE LA BORDO DE LA LARGHA POTOMAKO

Che la bordo de la largha Potomako, denove maljuna lango,
(Ankorau eldiranta, ancorau ekkrianta, chu vi povas neniam chesigi chi tiun
babiladon?),
Denove maljuna koro tiel gaja, denove al vi, via sento, la plena abunda printempo
revenanta,
Denove la fresheco kaj la odoroj, denove la somera chielo de Virginio, klare blua kaj
arghenta,
Denove la antautagmeza purpuro de la montetoj,
Denove la senmorta herbo, tiel senbrue mola kaj verda,
Denove la sangrughaj rozoj florantaj.

Parfumu chi tiun mian libron, ho sangrughaj rozoj!
Lavu subtile per viaj akvoj chiun linion, Potomako!
Donu al mi da vi, ho printempo, antau ol mi finos, por meti inter ghiajn paghojn!
Ho antautagmeza purpuro de la montetoj, antau ol mi finos, da vi!
Ho senmorta herbo, da vi!

DE LA KANJONOJ DE MALPROKSIMA DAKOTO

25an de Junio, 1876

De la kanjonoj de malproksima Dakoto,
Teroj de la sovagha ravino, la malhela Siuo, la soleca etendo, la silento,
Eble hodiau morna ululo, eble trumpetnoto por herojoj.

La batalbulteno,
La Indiana embusko, la ruzeco, la pereiga medio,
La kavaleriaj kompanioj batalantaj ghismorte en plej severa heroeco,
Meze de sia malgranda rondo, kun siaj buchitaj chevaloj por barikado,
La falo de Kustero kaj chiuj liaj oficiroj kaj soldatoj.

Dauras ancorau la malnovega legendo de nia raso,
La plej nobla de vivo subtenita de morto,
La antikva standardo perfekte konservita,
Ho leciono oportuna, ho kiel mi bonvenigas vin!

Dum mi sidas en mallumaj tagoj,
Sola, morna, tra la densa malhelo de tempo serchante vane lumon, esperon,
De neatenditaj lokoj feroce kaj tuja pruvo,
(La suno tie che la centro tamen kashita,
La elektra vivo chiam che la centro),
Subite ekfulmas.

Vin de la flavecaj fluantaj haroj en batalo,
Mi jhus vidis, kun la kapo rekta, chiam premantan fronte, portantan brilan glavon en la
mano,
Jen bone finantan en morto la grandiozan febron de viaj faroj,
(Mi alportas nenian funebrokanton por ghi au vi, mi alportas ghojan triumfan soneton),
Urghan kaj gloran, jes en malvenko urghegan, gloregan,
Post viaj multaj bataloj, en kiuj neniam forcedante pafilon au standardon,
Lasante post vi memoron dolchan al soldatoj,
Vi forcedis vin mem.

MALNOVAJ MILITOSONGHOJ

En meznokta dormo pri multaj vizaghoj de angoro,
Pri la ekrigardo de la mortige vundita (pri tiu nepriskribebla ekrigardo),
Pri la mortaj sur la dorso kun brakoj disetenditaj,
mi songhas, songhas, songhas.

Pri scenoj de Naturo, kampoj kaj montoj,
Pri chieloj tiel belaj post shtormo, kaj nokte la luno tiel neterece brila,
Brilanta dolche, brilanta malsupren, kie ni fosas la trancheojn kaj kolektas la amasojn,

mi songhas, songhas, songhas.

Antau longe ili pasis, vizaghoj kaj trancheoj kaj kampoj,
Kie tra la masakro mi movighis kun hardita kvieto, au for de la falintaj,
Antauen mi hastis tiutempe – sed nun pri iliaj figuroj nokte,
mi songhas, songhas, songhas.

DENSE ASPERGITA FLAGO

Dense aspergita flago! flago de steloj!
Longa ancorau via vojo, fatala flago – longa ancorau via vojo, kaj surshutita de sanga
morto,
Char la premio, kiun mi vidas decidota finfine, estas la mondo,
Chiujn ghiajn aferojn mi vidas intertekstaj kun viaj fadenoj, avida standardo;
Chu revataj denove la flagoj de reghoj, plej alte portataj, por paradi nekunrivalataj?
Ho hastu, flago de l' homo – ho per sekura kaj konstanta pasho, pasanta la plej altajn
flagojn de reghoj,
Marshu plej supera al la chielo, potenca simbolo – suprenhisighu super ilin chiujn,
Flago de steloj! dense aspergita flago!

TIO PLEJ BONA KION MI VIDAS EN VI Al U. S. Grant, reveninta de sia Monda Vojaĝo

Tio plej bona kion mi vidas en vi,
Ne estas tio ke vi movighis lau la grandaj shoseoj de historio,
Chiam nemalbriligite de tempo, impetas la blindumo de venko militema,
Au ke vi sidis kie Washingtono sidis, regante la landon en paco,
Au vi la homo kiun feuda Europo celebris, impona Azio sursvarmis,
Kiu marshis egalpashe kun reghoj la promenadon de l' ronda mondo;
Sed ke en fremdaj landoj, en chiuj viaj marshoj kun reghoj,
Tiuĵ preiaj suverenuloj de la Okcidento, Kansaso, Misurio, Ilinojso,
La milionoj de Ohio, Indiano, kamaradoj, bienistoj, soldatoj, chiuĵ en la antaŭo,
Nevideble kun vi marshante egalpashe kun reghoj la promenadon de l' ronda mondo,
Estis chiuĵ tiel pravigitaj.

SPIRITO KIU FORMIS CHI TIUN VIDAĴHON Skribita en la Kanjono Platte, Kolorado

Spirito kiu formis chi tiun vidaĵhon,
Chi tiuĵn rulfalintajn rokamasojn, sovaghajn kaj rughajn,
Chi tiuĵn chielambiciajn pintojn,
Chi tiuĵn ravinojn, turbulkklarajn riveretojn, chi tiun nudan freshecon,
Chi tiuĵn senformajn sovaghajn aregojn, pro iliaj propraj kialoj,
Mi konas vin, sovagha spirito – ni interkomunikis unu al la alia,

Miaj ankau tiaj sovaghaj aregoj, pro iliaj propraj kialoj;
Chu estis imputita al miaj chantoj ke ili forgesis arton?
Fandi en si ghiajn precizajn regulojn kaj delikatecon?
La ritma takto de la lirikisto, la gracio de la ellaborita templo – kolono kaj polurita arto
forgesitaj?
Sed vi kiu festas chi tie – spirito kiu formis chi tiun vidajhon,
Ili memoris vin.

DUM MI MARSHAS CHI TIUJN VASTAJN MAJESTAJN TAGOJN

Dum mi marshas chi tiujn vastajn majestajn tagojn de pacho,
(Char la milito, la lukto de sango finita, en kiu, ho terura Idealo,
Kontrau malfavoregaj shancoj jhus glore gajninta,
Nun vi pashas antauen, tamen eble kun la tempo al pli intensaj militoj,
Eble partopreni kun tempo en ankoraŭ pli teruraj konkursoj, dangheroj,
Pli longaj kampanjoj kaj krizoj, laboroj preter chiuj aliaj),
Chirkau mi mi audas tiun klakadon de la mondo, politikon, produktajhon,
La anoncojn de agnoskitaj aferoj, scienco,
La aprobata kreskado de urboj kaj la disvastigho de inventajhoj.

Mi vidas la shipojn (ili dauros kelkajn jarojn),
La vastajn fabrikojn kun iliaj chefoj kaj laboristoj,
Kaj audas la subtenon de chio, kaj ne objhetas al ghi.
Sed mi ankau anoncas solidajn aferojn,
Scienco, shipoj, politiko, urboj, fabrikoj ne estas nenio,
Kiel granda procesio, je muziko de malproksimaj klarionoj vershighanta, triumfe
movighanta, kaj pligrandaspekte alproksimighanta,
Ili signas realajhojn – chio estas kiel ghi devus esti.

Tiam miaj realajhoj;
Kio alia estas tiel reala kiel miaj?
Libereco kaj la dia mezo, libereco al chiu sklavo chie sur la tero,
La ardaĵoj kaj lumigoj de profetoj, la spirita mondo, chi tiuj jarcentojdaŭraj
kantoj,
Kaj niaj vizioj, la vizioj de poetoj, la plej solidaj anoncoj el chiuj.

KLARA NOKTOMEZO

Chi tiu estas via horo, ho Animo, via libera flugo en la senmortan,
For de libroj, for de arto, la tago forvishita, la leciono finita,
Vi plene elighanta, silenta, rigardanta, meditanta la temojn kiujn vi plej multe amas,
Nokton, dormon, morton, kaj la stelojn.

KANTOJ DE DISIGHO

DUM LA TEMPO ALPROKSIMIGHAS

Dum la tempo alproksimighas, malgajigante nubo,
Pretera timo de mi ne scias kio, mallumigas min.

Mi eliros,
Mi trairos la Shtatojn iom da tempo, sed mi ne povas diri kien au kiel longe,
Eble baldau iun tagon au nokton dum mi kantas mia vocho subite chesos.

Ho libro, ho chantoj! chu chio devas do sumighi nur al chi tio?
Chu ni devas apenau alveni al chi tiu komenco de ni? – kaj tamen ghi sufichas, ho
 animo;
Ho animo, ni pozitive aperis – tio sufichas.

JAROJ DE LA MODERNA

Jaroj de la moderna! jaroj de la neludita,
Via horizonto levighas, mi vidas ghin disapartighanta por pli majestaj dramoj,
Mi vidas ne Amerikon sole, ne nur la nacion de Libereco sed aliajn naciojn preparantaj,
Mi vidas grandegajn enirojn kaj elirojn, novajn kombinaĵojn, la solidarecon de rasoj,
Mi vidas tiun forton antaueniranta kun nerezistebla potenco sur la scenejon de la
 mondo,
(Chu la malnovaj fortoj, la malnovaj militoj jam ludis siajn rolojn? chu la aktoj taugaj al
 ili estas jam fermitaj?),
Mi vidas Liberecon, komplete armita kaj triumfa kaj tre fiera, kun Legho che unu flanko
 kaj Paco che l' alia,
Kolosa trio chiu elirantaj kontraŭ la ideo de kasto;
Kiaj historiaj rezultoj estas chi tiuj kiujn ni tiel rapide aliras?
Mi vidas homojn marshantaj kaj kontraumarshantaj po rapidaj milionoj,
Mi vidas la limojn de la malnovaj aristokratioj rompataj,
Mi vidas la monumentojn de Europaj reghoj forigataj,
Mi vidas chi tiun tagon la Popolon komencanta siajn monumentojn (chiuj aliaj cedas);
Neniam estis tiaj akraj demandoj metitaj kiel chi tiun tagon,
Neniam la meza homo, lia animo, pli energia, pli kiel iu Dio,
Jen, kiel li urghas kaj urghas, lasante al la amasoj nenian ripozon!
Lia kuragha piedo estas sur tero kaj maro chie, li kolonias Pacifikon, la arkipelagojn,
Per la vaporŝipo, la elektra telegrafo, la ĵurnalo, la amasaj mashinoj de milito,
Per chi tiuj kaj la tutmonden disvastighantaj fabrikoj li interligas tutan geografion, chiujn
 landojn;
Kiaj flustroj estas tiuj chi, ho landoj, kurantaj antaŭ vi, pasantaj sub la maroj?
Chu chiu nacioj interkomunikas? chu estos nur unu koro al la globo?
Chu homaro kunvicighas amase? ĉar jen, tiranoj tremas, kronoj malhelighas,
La tero, ribelema, alfrontas novan eraon, eble ghegeneralan dian militon,

Neniu scias kio sekvos, tiaj antausignoj plenigas la tagojn kaj noktojn;
Jaroj profetaj! la spaco antaue, dum mi marshas, dum mi vane penas penetri ghin, estas
plena de fantomoj,
Nenaskitaj faroj, aferoj baldau estontaj, projekcias siajn formojn chirkau min,
Chi tiu mirinda impeto kaj varmo, chi tiu stranga ekstazia febro de songhoj, ho jaroj!
Viaj songhoj, ho jaroj, kiel ili penetras tra mi! (mi ne scias chu mi dormas au maldormas);
La luditaj Ameriko kaj Europo malklarighas, retirighante en ombro malantau mi,
La neluditaj, pli gigantaj ol iam, antauenvenas, antauenvenas, al mi.

CINDROJ DE SOLDATOJ

Cindroj de soldatoj, Sudaj au Nordaj,
Dum mi meditas retrospektive, murmurante kanton pense,
La milito rekomencas, denove al mia sento viaj formoj,
Kaj denove la avanco de la armeoj.

Senbrua kiel nebuloj kaj vaporoj,
De iliaj tomboj en la trancheoj suprenirantaj,
De tombejoj chie tra Virginio kaj Tenesio,
De chiu kompasdirekto el la sennombraj tomboj,
En alblovataj nuboj, en miriadoj grandaj, au en rotoj el duoj au trio au unuope ili
venas,
Kaj silente amasighas chirkau mi.

Nun sonu nenian noton, ho trumpetistoj,
Ne che la antaue de mia kavalerio, paradanta sur spiritaj chevaloj,
Kun sabroj elingitaj kaj scintilantaj, kaj karabinoj che iliaj femuroj (ha miaj bravaj
rajdantoj!
Miaj belaj brunvizaghaj rajdantoj! kia vivo, kia ghojo kaj fiero,
Kun chiuj dangheroj estis viaj).

Nek vi, tamburistoj, nek che la veksignalo che l' matenigho,
Nek la longa rulado alarmanta la tendaron, nek ech la dampita takto por enterigo,
Nenio de vi chi-foje ho tamburistoj portantaj miajn militemajn tamburojn.

Sed flanke de chi tiuj kaj la merkatoj de richeco kaj la homplena promenejo,
Akceptante chirkau mi kamaradojn intimajn, nevidatajn de la ceteraj kaj senvojajn,
La mortigitaj denove gajaj kaj vivaj, la polvo kaj rubo vivaj,
Mi chantas chi tiun chanton de mia silenta animo nome de chiuj mortaj soldatoj.

Vizaghoj tiel palaj kun mirindaj okuloj, tre karaj, kunighas ankoraŭ pli proksimen,
Alproksimighas, sed ne parolas.

Fantomoj de sennombraj perditaj,
Nevideblaj al la ceteraj de nun ighas miaj kompanoj,
Sekvas min por chiam – ne forlasas min, dum mi vivas.

Dolchaj estas la florantaj vangoj de la vivantaj – dolchaj estas la muzikaj voĉoj sonantaj,
Sed dolchaj, ah dolchaj, estas la mortaj kun siaj silentaj okuloj.

Plej karaj kamaradoj, chio estas finita kaj de longe for,
Sed amo ne estas finita – kaj kia amo, ho kamaradoj!
Parfumo de batalejoj levighanta, supren de la fetoro levighanta.

Parfumu tial mian chanton, ho amo, senmorta amo,
Donu min por bani la memorojn de ĉiuj mortaj soldatoj,
Envolu ilin, balzamu ilin, kovru ilin ĉie per tenera fiero.

Parfumu chion – faru chion saniga,
Faru ĉi tiujn cindrojn por nutri kaj flori,
Ho amo, solvu chion, fruktigu chion per la fina kemio.

Donu min neelĉerpeble, faru min fontano,
Ke mi elspiru amon el mi kien ajn mi iras, kiel humidan ĉiaman roson,
Por la cindroj de ĉiuj mortaj soldatoj Sudaj au Nordaj.

PENSOJ

1

Pri ĉi tiuj jaroj mi kantas,
Kiel ili pasas kaj pasis tra konvulsiaj doloroj, kiel tra akushoj,
Kiel Ameriko ilustras la naskighon, la muskolan junecon, la promeson, la certan
plenumon la absolutan sukceson, spite de homoj – ilustras tiel ankaŭ malbonon
kiel bonon,
La fervoran lukton tiel ferocan por unueco en la mem;
Kiel multe tenas malesperante ankoraŭ al la modeloj foririntaj, kasto, mitoj, obeo,
devigo, kaj al malfidelo,
Kiel malmulte vidas la alvenintajn modelojn, la atletojn, la Okcidentajn Shtatojn, au
vidas liberecon au spiritecon, au fidas je rezultoj,
(Sed mi vidas la atletojn, kaj mi vidas la rezultojn de la milito gloraj kaj neeviteblaj kaj
ili denove kundukantaj al aliaj rezultoj).

Kiel la grandaj urboj aperas – kiel la Demokratiaj amasoj, turbulentaj, obstinaj, kiel mi
amas ilin,
Kiel la giro, la konkurso, la lukto de malbono kun bono, la sonado kaj resonado dauras
kaj dauras,
Kiel socio atendas neformite, kaj estas dum iom da tempo inter aferoj finitaj kaj aferoj
komencitaj,
Kiel Ameriko estas la kontinento de gloroj, kaj de la triumfo de libereco kaj de la
Demokratioj, kaj de la fruktoj de socio, kaj de ĉio, kio estas komencata,
Kaj kiel la Shtatoj estas kompletaj en si mem – kaj kiel triumfoj kaj gloroj estas kompletaj

en si mem, por konduki antaŭen,
Kaj kiel chi tiuj de mi kaj de la Shtatoj siavice konvulsios, kaj servos aliajn akushojn kaj
transpasojn,
Kaj kiel chiuj homoj, vidajhoj, kombinoj, la demokratiaj amasoj ankau, servas – kaj kiel
chui fakto, kaj milito mem, kun chiuj siaj hororoj, servas,
Kaj kiel nun au iam ajn chiu servas la ekskvizitan transpason de morto.

2

Pri semoj falantaj en la teron, pri naskoj,
Pri la konstanta koncentriĝo de Ameriko, landinternen, supren, al nepenetreblaj kaj
svarmantaj lokoj,
Pri kio Indiano, Kentukio, Arkansaso, kaj la ceteraj estas estontaj,
Pri kion kelke da jaroj montros tie en Nebraska, Kolorado, Nevado, kaj la ceteraj,
(Au malproksime, supreniranta la Nordan Pacifikon al Sitko au Alasko),
Pri tio por kio la foliaro de Ameriko estas la preparo – kaj pri kio estas chiuj vidajhoj,
Norde, Sude, Oriente, kaj Okcidente,
Pri chi tiu Unio, veldita per sango, pri la solena prezo pagita, pri la nenomataj perditaj,
chiam chestantaj en mia menso;
Pri la provizora uzo de materialoj por identeco,
Pri la nuntempo, pasanta, foriranta – pri la kreskado de pli kompletaj homoj ol iuj ghis
nun,
Pri chio deklivanta tien malsupren kie la fresha libera donanto la patrino, Misisipo,
fluas,
Pri potencaj landinternaj urboj ankoraŭ neesploritaj kaj nekonjektitaj,
Pri la novaj kaj bonaj nomoj, pri la modernaj disvolvajhoj, pri neforigeblaj hejmbienoj,
Pri libera kaj originala vivo tie, pri simpla dieto kaj pura kaj dolcha sango,
Pri supleco, majestaj vizaghoj, klaraj okuloj, kaj perfekta korpoformo tie,
Pri grandegaj spiritaj rezultoj en estontaj jaroj en la malproksima Okcidento, chiuflanke
de Anahuakoj,
Pri chi tiuj kantoj, bone komprenataj tie (faritaj por tiu regiono),
Pri la indighena malestimo de fieco kaj gajno tie,
(Ho ghi kashighas en mi nokte kaj tage – kio estas gajno malgrau chio al sovagheco kaj
libereco?).

KANTO CHE SUNSUBIRO

Grandiozo de finata tago flosiganta kaj pleniganta min,
Horo profeta, horo resumanta la pasintecon,
Aerigante mian gorghon, vin, dian mezon,
Vin, teron kaj vivon, ghis la lasta radio brilas, mi kantas.

Malfermita busho de mia animo eliganta gajecon,
Okuloj de mia animo vidantaj perfektecon,
Natura vivo de mi fidele laudanta aferojn,
Konfirmanta por chiam la triumfon de aferoj.

Eminenta chiu!
Eminenta tio kion ni nomas spaco, sfero de sennombraj spiritoj,
Eminenta la mistero de movo en chiuj estajhoj, ech la plej eta insekto,
Eminentaj la kapablo de parolo, la sensoj, la korpo,
Eminenta la pasanta lumo – eminenta la pala reflektio sur la novluno en la okcidenta
 chielo,
Eminenta tio kion ajn mi vidas au audas au tushas, senescepte.

Bono en chio,
En la kontento kaj aplombo de bestoj,
En la jara reveno de la sezonoj,
En la gajeco de juneco,
En la forto kaj ardo de vireco,
En la granda kaj ekskviziteco de maljunagho,
En la superbaj elvidoj de morto.

Mirinde foriri!
Mirinde cheesti!
La koro, pulsigi la chiesimilan kaj senkulpan sangon!
Spiri la aeron, kiel delice!
Paroli – marshi – kapti ion per la mano!
Prepari por dormo, por enlitigho, rigardi mian rozkoloran karnon!
Konscii mian korpon, tiel kontenta, tiel granda!
Esti chi tiu mirinda Dio kiu mi estas!
Esti elirinta inter aliaj Dioj, chi tiuj viroj kaj virinoj kiujn mi amas.

Mirinde, kiel mi celebras vin kaj min!
Kiel miaj pensoj ludas subtile che la spektakloj chirkaue!
Kiel la nuboj pasas silente supre!
Kiel la tero sagas antauen kaj antauen! kaj kiel la suno, luno, steloj sagas antauen kaj
 antauen!
Kiel la akvo ludas kaj kantas! (certe ghi vivas!),
Kiel la arboj levighas kaj ekstaras, kun fortaj trunkoj, kun branchoj kaj folioj!
(Certe estas io pli en chiu arbo, ia vivanta animo).

Ho miro de aferoj – ech la plej eta korpusklo!
Ho spiriteco de aferoj!
Ho melodio muzika, fluanta tra epokoj kaj kontinentoj, nun atinganta min kaj
 Amerikon!
Mi prenas viajn fortajn akordojn, intersemas ilin, kaj gaje pasigas ilin antauen.

Mi ankau karolas la sunon, alkondukatan au che tagmezo, au kiel nun, subirantan,
Mi ankau pulsas je la cerbo kaj belo de la tero kaj de chiuj kreskajhoj de la tero,
Mi ankau sentis la nerezisteblan vokon de mi mem.

Dum mi vaporveturis malsupren lau Misisipo,

Dum mi vagis tra la prerioj,
Dum mi vivis, dum mi rigardis tra miaj fenestroj miaj okuloj,
Dum mi elvenis matene, dum mi vidis la eklumighon en la oriento,
Dum mi banis min sur la plagho de la Orienta Maro kaj denove sur la plagho de la
Okcidenta Maro,
Dum mi vagis la stratojn de landinterna Chikago, kiujn ajn stratojn mi vagis,
Au urbojn au silentajn arbarojn, au ech meze de la vidajhoj de milito,
Kie ajn mi estis mi sharghis min per kontento kaj triumfo.

Mi kantas ghisfine la egalecojn, modernajn au malnovajn,
Mi kantas la senfinajn finalojn de aferoj,
Mi diras Naturo dauras, gloro dauras,
Mi laudas per elektra vocho,
Char mi ne vidas ech unu neperfektecon en la universo,
Kaj mi ne vidas ech unu kauzon au rezulton prilamentindan finfine en la universo.

Ho subiranta suno! kvankam la tempo jam venis,
Mi ankoraŭ trilas sub vi, ech se neniu alia faras tion, nemalfortigitan adoron.

DUM CHE VIAJ PORDOJ ANKAU, MORTO

Dum che viaj pordoj ankau, morto,
Enironta viajn suverenajn, malklarajn, nelimeblajn terojn,
Al memoroj de mia patrino, al la dia kunmiksado, patrineco,
Al shi, enterigita kaj foririnta, tamen ne enterigita, ne foririnta de mi,
(Mi vidas denove la trankvilan benignan vizaghon, freshan kaj belan ankoraŭ,
Mi sidas apud la formo en la cherko,
Mi kisas kaj kisas konvulsie denove la dolchajn maljunajn lipojn, la vangojn, la fermitajn
okulojn en la cherko);
Al shi, la ideala virino, praktika, spirita, el chio de tero, vivo, amo, al mi la plej bona,
Mi gravuras monumentan linion, antau ol mi iros, meze de chi tiuj kantoj,
Kaj starigas tomboshtonon chi tien.

MIA TESTAMENTAJHO

La komercisto la akiranto vasta,
Post asiduaj jaroj da esplorado de rezultoj, preparado por foriro,
Testamentas domojn kaj terojn al siaj infanoj, testamentas akciojn, varojn, monprovizojn
por lernejo au hospitalo,
Postlasas monon al certaj kompanoj achi signojn, memorajhojn el gemoj kaj oro,

Sed mi, mian vivon esplorante, fermante,
Kun nenio videbla por testamenti de ghiaj vanaj jaroj,
Nek domoj nek teroj, nek signoj el gemoj kaj oro por miaj amikoj,
Tamen certajn memorojn de la milito por vi, kaj post vi,

Kaj malgrandajn memorajhojn de tendaroj kaj soldatoj, kun mia amo,
Mi kunligas kaj testamentas en chi tiu pako da kantoj.

PENSEMAN AL SIAJ MORTAJ RIGARDANTAN

Penseman al siaj mortaj rigardantan mi audis la Patrionon de Chiuj,
Senespere al la shiritaj korpoj, al la formoj kovrantaj la batalkampojn rigardantan,
(Kiam la lasta pafilo chesis, sed la odoro de la pulvofumo restadis),
Dum shi vokis al sia tero kun funebra vocho, pashadante,
Sorbu ilin bone, ho mia tero, shi kriis, mi admonas vin, ne perdu miajn filojn, ne perdu
ech atomon,
Kaj vi riveroj, sorbu ilin bone, prenante ilian karan sangon,
Kaj vi lokoj, kaj vi aeraj kiuj naghos supre leghere nepalpeblaj,
Kaj chiuj vi esencoj de grundo kaj kresko, kaj vi, la profundajhoj de miaj riveroj,
Kaj vi, montflankoj, kaj la arbaroj, kie la sango de miaj karaj infanoj fluetante rughigis,
Kaj vi arboj, malsupre en viaj radikoj por testamenti al chiuj estontaj arboj,
Miajn mortajn sorbu au Sudajn au Nordajn – la korpojn de miaj junaj viroj sorbu, kaj
ilian karegan karegan sangon,
Kion tenante konfide por mi, fidele al mi redonu multajn jarojn de nun,
En nevidata esenco kaj odoro de surfaco kaj herbo, jarcentojn de nun,
En blovataj aeraj de la kampoj denove al mi redonu miajn karulojn, donu miajn
senmortajn heroojn,
Ilin elspiru al mi jarcentojn de nun, alspiru al mi ilian spiron, ne lasu ke ech atomo
perdighu,
Ho jaroj kaj tomboj! ho aero kaj grundo! ho miaj mortaj, aromo dolcha!
Elspiru ilin, chiama dolcha morto, jarojn, jarcentojn de nun.

TENDAROJ DE VERDO

Ne sole tiuj tendaroj de blanko, malnovaj kamaradoj de la militoj,
Kiam komanditaj antauen, post longa marsho,
Pieddoloraj kaj lacaj, tuj kiam la lumo malpliighas, ni haltas por la nokto,
Kelkaj el ni, tiel lacigitaj de portado de la pafilo kaj tornistro, falantaj ekdorminte,
kie ni staras,
Aliaj muntantaj la malgrandajn tendojn, kaj la ekfaritaj fajroj komencas scintili,
Antaupostenuloj starigitaj chirkaue viglaj tra la mallumo,
Kaj vorto liverita por signalrespondo, pro zorgo por sekureco,
Ghis che voko de la tamburistoj che tagigho, laute batantaj la tamburojn,
Ni levighas refreshigitaj, kun la nokto kaj dormo preterpasintaj, kaj rekomencas nian
vojaghon,
Au antaueniras al batalo.

Jen, la tendaroj de la tendoj de verdo,

Kiujn la tagoj de paco plenigadas, kaj la tagoj de milito plenigadas,
Per mistika armeo (chu ghi ankau estas komandita antauen? chu ghi ankau haltas nur
iom da tempo,
Ghis nokto kaj dormo preterpasos?).

Nun en tiuj tendaroj de verdo, en iliaj tendoj, disvastigitaj tra la mondo,
En la gepatroj, infanoj, edzoj, edzinoj en ili, en la maljunaj kaj junaj,
Dormantaj sub la sunlumo, dormantaj sub la lunlumo, kontentaj kaj silentaj tie finfine,
Vidu la potencon bivakokampon kaj atendtendaron de chiuj,
De la korpusoj kaj generaloj chiuj, kaj la Prezidento super la korpusoj kaj generaloj chiuj,
Kaj de chiu el ni, ho soldatoj, kaj de chiu kaj chiuj en la vicoj kiujn ni batalis,
(Tie sen malamo ni chiuj, chiuj renkontighas).

Char baldau, ho soldatoj, ni ankau entendighos en nia loko en la bivaktendaroj de verdo,
Sed ne necesas ke ni provizu nin per antaupostenuloj, nek per vorto por signalrespondo,
Nek per tamburisto por bati la matenan tamburon.

LA PLORSINGULTADO DE LA SONORILOJ

(Noktomezo, Sept. 19a-20a, 1881, che la morto de Prezidento Garfield, pro kuglo de murdisto.)

La plorsingultado de la sonoriloj, la subita mortnovajho chie,
La dormantojn vekas, la rilaton de la Popolo,
(Tute bone ili scias la mesaghon en la mallumo,
Tute bone revenas, respondas interne de iliaj brustoj, ilia cerboj, la malghojaj reehoj),
La pasiaj sonorado kaj tintego – urbo al urbo, kunigantaj, sonantaj, pasantaj,
Tiujn korbatojn de Nacio en la nokto.

KIAM ILI BALDAU FINIGHOS

Kiam ili baldau finighos,
Pri kio subkushas la antauintajn kantojn – pri miaj celoj en ili,
Pri la semo kiun mi penis planti en ili,
Pri ghojo, dolcha ghojo, tra multaj jaroj, en ili,
(Por ili, por ili mi vivis, en ili mia laboro estas farita),
Pri multaj aspiroj karaj, pri multaj revoj kaj planoj;
Tra Spaco kaj Tempo kunfanditaj en chanto, kaj la fluanta eterna identeco,
Al Naturo ampleksanta chi tiujn, ampleksanta Dion – al la ghoja, elektra tuto,
Al la senco de Morto, kaj akceptado ghojego pri Morto, siavice la sama kiel vivo,
La eniro de homo por kanti;
Vin amasigi, vi foririntaj, diversaj vivoj,
Rilatigi la montojn kaj rokojn kaj riverojn,
Kaj la ventojn de la nordo, kaj la arbarojn de kverko kaj pino,
Kun vi, ho animo.

GHOJ', SAMSHIPANO, GHOJ'!

Ghoj', samshipano, ghoj'!
(Kontentigite al mia animo che mort' mi krias),
Nia vivo estas fermata, nia vivo komencighas,
La longan, longan ankrejon ni forlasas,
La shipo estas libera finfine, shi saltas!
Shi rapide kuregas de la bordo,
Ghoj', samshipano, ghoj'.

LA NEDIRITAN DEZIRON

La nediritan deziron, de viv' kaj ter' neniam plenumitan,
Nun, vojaghanto, vi elvelu serchi kaj trovi.

PORTALOJ

Kio estas tiuj de la konata krom por supreniri kaj eniri la Nekonatan?
Kaj kio estas tiuj de vivo krom por Morto?

CHI TIUJ KAROLOJ

Chi tiujn karolojn, kantitajn por gajigi mian pasadon tra la mondo kiun mi vidas,
Por kompletigo mi dedichas al la Nevidata Mondo.

NUN FINALE AL LA BORDO

Nun finale al la bordo,
Nun lando kaj vivo finale kaj adiaŭ,
Nun Vojaghanto foriru (multe, multe por vi ankoraŭ atendas),
Sufiche ofte vi aventuris sur la maroj,
Singarde krozante, studante la mapojn,
Tauge denove al haven' kaj hauserligo revenante,
Sed nun obe-u la sekretan en kor' konservitan deziron,
Chirkaubraku l' amikojn, lasu chion en ordo,
Al haven' kaj hauserligo ne plu revenonte,
Foriru por via senfina krozo, maljuna Maristo.

ADIAU!

Por fini mi anoncas kio venos post mi.

Mi memoras ke mi diris ke, antaŭ ol miaj folioj iom ajn ekkreskis,
Mi levos la voĉon gaja kaj forta rilate efektivigojn.

Kiam Ameriko faros kio estis promesita,
Kiam tra ĉi tiuj Ŝtatoj marŝas cent milionoj da superbaj personoj,
Kiam la ceteraj dispartighos por superbaj personoj kaj kontribuos al ili,
Kiam rasoj de la plej perfektaj patrinoj signas Amerikon,
Tiam al mi kaj miaj nia tuga efektivigo.

Mi trapersistis miaflanke,
Mi kantis la korpon kaj la animon, militon kaj pacon mi kantis, kaj la kantojn de vivo kaj
morto,
Kaj kaj kantojn de naskigo, kaj montris ke estas multe da naskigoj.

Mi proponis mian stilon al ĉiu, mi vojaĝis per memfida paŝo;
Dum mia plezuro estas ankoraŭ je pleno, mi flustras Adiaŭ!
Kaj prenas la manon de la juna virino kaj la manon de la juna viro por la lasta fojo.

Mi anoncas naturajn personojn levighi,
Mi anoncas justecon triumfa,
Mi anoncas neshanceblan liberecon kaj egalecon,
Mi anoncas la pravigon de verdiremo kaj la pravigon de fiero.

Mi anoncas ke la identeco de ĉi tiuj Ŝtatoj estas unuopa identeco sole,
Mi anoncas la Union pli kaj pli kompakta, nedisigebla,
Mi anoncas pompojn kaj majestecojn kiuj faros ĉiujn antaŭajn politikojn de la tero
bagatelaj.

Mi anoncas kuntenighon, mi diras ke ĝi estos senlima, liberigita,
Mi diras ke vi ankoraŭ trovos la amikon por kiu vi serĉis.

Mi anoncas la venadon de viro aŭ virino, eble vi estas tiu (Adiaŭ!),
Mi anoncas la grandan individuon, fluidan kiel Naturo, ĉastan, ameman, kompatan,
plene armitan.

Mi anoncas vivon kiu estos abunda, fervora, spirita, audaca,
Mi anoncas finon kiu leghere kaj ghoje renkontos ĝian tradukon.

Mi anoncas miriadojn da junuloj, belaj, gigantaj, dolĉsangaj,
Mi anoncas rason de grandiozaj kaj sovaghaj maljunaj viroj.

Ho pli densa kaj pli rapida — (Adiaŭ!),
Ho kunpremiĝanta tro proksimen sur min,
Mi antaŭvidas tro multe, ĝi signifas pli multe ol mi pensis.
Ŝajnas al mi ke mi mortas.

Hastu, gorgho, kaj sonigu vian laston,
Salutu min – salutula la tagojn ankoraŭ unu fojon. Sonoru la malnovan krion ankoraŭ
unu fojon.

Krieganta elektre, la atmosferon uzanta,
Hazarde ekrigardanta, chiun rimarkatan sorbanta,
Rapide antaŭen, sed por iom da tempo surterighanta,
Kuriozajn kovertitajn mesaghojn liveranta,
Scintilojn ardajn, semon eteran, malsupren en la grundon faliganta,
Mi mem nescianta, mian komision obeanta, ghin pridemandi neniam audacanta,
Al epokoj kaj epokoj ankoraŭ la kreskigon de la semoj lasanta,
Al soldatoj el la milito levighanta, ili la taskojn kiujn mi starigis diskonigantaj,
Al virinoj certajn flustrojn de mi mem testamentanta, ilian amemon mi pli klare
eksplikanta,
Al junaj viroj miajn problemojn proponanta – nenia lantanto mi – mi la muskolaron de
iliaj cerboj provanta,
Tiel mi pasas, iom da tempo vocha, videbla, kontraŭa,
Poste melodia ehho al kiu oni pasie klinighas (morto faranta min vere nemortanta),
La plej bona de mi do kiam ne plu videbla, ĉar por tio mi senĉese preparadis.

Kio pli estas ke mi malviglighas kaj paŭzas kaj kauras etendite kun nefermita busho?
Ĉu estas unu fina adiaŭo?

Miaj kantoj chesas, mi forlasas ilin,
De malantaŭ la ekrano kie mi min kashis, mi antaŭeniras persone sole al vi.

Kamarado, ĉi tio estas nenia libro,
Kiu tushas ĉi tion, tushas homon,
(Ĉu estas nokto? ĉu ni kunestas ĉi tie solaj?),
Estas mi kiun vi tenas, kaj kiu tenas vin,
Mi saltas el la paghoj en viajn brakojn – morto min elvokas.

Ho kiel viaj fingroj kvietigas min,
Via spiro falas ĉirkau mi kiel roso, via pulso lulas la timpanojn de miaj oreloj,
Mi sentas min mergita de kapo al piedo,
Delice, sufiche.

Sufiche, ho faro spontanea kaj sekreta,
Sufiche, ho glitanta estanteco – sufiche, ho resumita pasinteco.

Kara amiko, kiu ajn vi estas, prenu ĉi tiun kison,
Mi donas ghin speciale al vi, ne forgesu min,
Mi sentas min kiel iu kiu jam faris la taskon tagan por iom ripozi,
Mi ricevas nun denove de miaj multaj tradukoj, de miaj atavaroj supreniranta, dum aliaj
sendube atendas min,
Nekonata sfero, pli reala ol mi revis, pli senpera, sagigas vekantajn radiojn ĉirkau mi,
Adiaŭ!

Memoru miajn vortojn, mi povus denove reveni,
Mi amas vin, mi foriras de materialoj,
Mi estas kiel iu senkorpigita, triumfa, morta.

UNUA ANEKSAJHO

SABLOJ CHE SEPDEK

MANAHATO

La tauga kaj nobla nomo de mia urbo resumita,
Elektinda aborigena nomo, kun mirinda beleco, signifo,
Rokbazita insulo – bordoj kie chiam gaje jhetvershighas la venantaj, irantaj, hastantaj
marondoj.

PAUMANOKO

Marbelulo! etendita kaj sunghuanta!
Unu flankon via landinterna oceano lavanta, larghan, kun abunda komerco,
vaporshipoj, veloj,
Kaj unu la vento de Atlantiko karesanta, feroa au milda – fortegaj shipkorpoj
malklarginantaj en la malproksimo,
Insulo de dolchaj rojoj da trinkakvo – saniga aero kaj grundo!
Insulo de la marbordo kaj vento kaj oceano!

DE MONTAUKA PINTO

Mi staras kiel sur la beko de ia potenca aglo,
Orienten la maron sorbante, observante (nenio krom maro kaj chielo),
La jhetighantaj ondoj, la shaumo, la shipoj en la malproksimo,
La sovagha malkvieto, la neghaj, krispighantaj ondokapoj – tiu enirema urgho kaj urgho
de ondoj,
Serchantaj la bordojn chiam.

AL TIUJ KIUJ MALSUKCESIS

Al tiuj kiuj malsukcesis en aspiro vasta,
Al nenomitaj soldatoj falintaj antaue en la fronto,
Al trankvilaj, sindonaj inghenieroj – al troardaj vojaghantoj – al pilotoj sur iliaj shipoj,
Al multaj noblaj kantoj kaj bildoj sen aprobo – mi volus starigi laurokovritan
monumenton,
Alte, alte super la ceteraj – al chiuj detranчитaj antau sia ghusta tempo,
Poseditaj de ia stranga spirito de fajro,
Estingitaj de frua morto.

KAROLO CHE L' FINO DE SESDEK NAU

Karolo che l' fino de sesdek nau – resumo – ripeto,
Miaj linioj en ghojo kaj espero daŭrantaj pri la samo,
Pri vi, ho Dio, Vivo, Naturo, Libereco, Poezio;
Pri vi, mia Lando – viaj riveroj, prerioj, Shtatoj – vi, stelhava Flago kiun mi amas,
Via agregajho konservita tuta – de nordo, sudo, oriento, okcidento, viaj eroj chiuj;
Pri mi mem – la gaja koro ankoraŭ batanta en mia brusto,
La korpo ruinigita, maljuna, malricha, kaj paralizita – la stranga inercio falanta
cherkotuke chirkau mi,
La brulantaj fajroj tie en mia malvigla sango ankoraŭ ne estingitaj,
La ne malpliigita kredo – la grupoj da amaj amikoj.

LA PLEJ KURAGHAJ SOLDATOJ

Kuraghaj, kuraghaj estis la soldatoj (alte nomataj hodiaŭ) kiu transvivis la batalon,
Sed la plej kuraghaj rapidigis sin al la fronto kaj falis nenomataj, nekonataj.

TIPARO

Chi tiu latentata mino – chi tiuj nelanchitaj vochoj – pasiaj potencoj,
Kolero, argumento, au laudo, au komika rigardacho, au pregho pia,
(Ne nonparejlo, breviero, burghojso, longprimero sole),
Chi tiuj oceanaj ondoj, inciteblaj al furiozo kaj al morto,
Au kvietigitaj al ripozo kaj hela sunlumo kaj dormo,
Interne de la palaj stangetoj dormantaj.

DUM MI SIDAS SKRIBANTE CHI TIE

Dum mi sidas skribante chi tie, malsana kaj maljunighinta,
Ne mia malpleja shargho estas ke malakreco de maljunagho, plendemoj,
Malafablaj melankolioj, doloroj, letargio, konstipo, ploretanta enuo,
Povus enfiltrighi en miajn tagajn kantojn.

MIA KANARIO

Chu ni kalkulis grande, ho animo, penetri la temojn de potencaj libroj,
Sorbante profunde kaj plene de pensoj, dramoj, konjektoj?
Sed nun de vi al mi, enkaghigita birdo, senti vian ghojan triladon,
Plenantan la aeron, la solecan chambron, la longan antautagmezon,
Chu ne estas ghuste tiel grande, ho animo?

DEMANDOJ AL MIA SEPDEKA JARO

Alvenante, alproksimighante, kurioza,
Vi malklara, nedifinita fantomo – chu vi alportas vivon au morton?
Forton, malforton, blindecon, pli da paralizo, kaj pli gravan?
Au trankvilajn chielojn kaj sunon? Chu vi agitos la akvojn ankoraŭ?
Au eble ekhaltigos min por chiam? Au lasos min chi tie kiel nun,
Malvigla, papageca kaj maljuna, kun rauka vocho gurdanta, krichanta?

LA VALABAUTAJ MARTIROJ

[En Bruklino, en malnova kelo, markita per nenia difinita signo, kushas amase je chi tiu momento la sendube autentikaj restajhoj de la plej lojalaj kaj plej fruaj revoluciaj patriotoj el la Britaj prizonshipoj kaj prizonoj de la tempoj de 1776-83, en kaj chirkau Novjorko, kaj de chie en Longa Insulo; komence enterigitaj – multaj miloj da ili – en trancheoj en la Valabautaj sabloj.]

Pli grandaj ol memoro de Ahhilo au Uliso,
Pli, pli je multo al vi ol tombo de Aleksandro,
Tiuj charsharghoj da malnovaj kadavraj cindroj, skvamoj kaj splitoj de shimaj ostoj,
Iam vivantaj homoj – iam rezoluta kuragho, aspiro, forto,
La pashoshtonoj al vi hodiaŭ kaj chi tie, Ameriko.

LA UNUA LEONTODO

Simpla kaj fresha kaj bela el la fino de vintro elighanta,
Kvazau nenia artifiko de modo, komerco, politiko iam estus,
El ghia suna anguleto de shirmita herbo – naiva, ora, trankvila kiel la tagigho,
La unua leontodo de printempo montras ghian fideman vizaghon.

AMERIKO

Centro de egalaj filinoj, egalaj filoj,
Chiuuj, chiuuj simile karaj – kreskintaj, nekreskintaj, junaj, au maljunaj,
Forta, suficha, bela, eltena, kapabla, richa,
Daura kun la Tero, kun Libereco, Legho, kaj Amo,
Granda, prudenta, turanta, sidanta Patrino,
Seghita en la adamanto de Tempo.

MEMOROJ

Kiel dolchaj la silentaj respuroj!
La vagadoj kiel en songhoj – la meditado pri la malnovaj tempoj rekomencita – iliaj amoj
ghoj, personoj, vojaghoj.

HODIAU KAJ VI

La asignitaj gajnontoj en longedaura ludo;
La kurso de Tempo kaj nacioj – Egiptujo, Hindujo, Grekujo, kaj Romo;
La pasinteco tuta, kun chiuj ghiaj herooj, historioj, artoj, eksperimentoj,
Ghia provizo de kantoj, inventajhoj, vojaghoj, instruistoj, libroj,
Enkolektita por nun kaj vi – Ghin pripensi!
La heredo tute konverghinta en vi!

POST LA BLINDUMO DE TAGLUMO

Post la blindumo de taglumo,
Nur la malluma, malluma nokto montras al miaj okuloj la stelojn;
Post la sonego de orgeno majesta, au hhoru, au perfekta bando,
Silenta, sur mia animo, movighas la simfonio vera.

ABRAHAM LINKOLNO, NASKITA 12AN DE FEB., 1809

Hodiau, de chiu kaj chiuj, spiro de pregho – pulso de penso,
Je memoro de Li – je nasko de Li.
Publikigita 12an de Feb., 1889.

EL LA MONTRAJHOJ DE MAJO ELELEKTITAJ

Pomarbaroj, la arboj chiuj kovritaj de floroj;
Tritikkampoj tapishitaj malproksime kaj proksime per vitala smeralda verdo;
La eterna, neelcherpebla fresho de chiu frumateno;
La flava, ora, travidebla nebuleto de la varma posttagmeza suno;
La aspirantaj lilakarbustoj kun abundaj purpuraj au blankaj floroj.

ALCIONAJ TAGOJ

Ne de sukcesa amo sole,
Nek richo, nek honorita mezagho, nek venkoj en politiko au milito;
Sed dum vivo velkas, kaj chiuj turbulentaj pasioj trankvilighas,
Dum belegaj, vaporaj, silentaj koloroj kovras la vesperan chielon,
Dum moleco, pleneco, ripozo, traplenigas la korpon, kiel pli fresha, pli milda aero,
Dum la tagoj surmetas pli malakran lumon, kaj la pomo finfine pendas vere finita kaj
mallaboreme matura sur la arbo,
Tiam por la multegaj plej kvietaj, plej felichaj tagoj el chiuj!
La bonpensaj kaj beataj alcionaj tagoj!

FANTAZIOJ CHE NAVESINKO

La Piloto en la Nebulo

Vaporveturado tra la nordaj kaskadetoj – (malnova Sankta-Laurenca rememoro,
Subita memoreklumo revenas, mi ne scias kial,
Chi tie atendante la sunlevighon, rigardante de chi tiu monteto*);
Denove estas ghuste che materigho – forta nebulo luktas kun tagigho,
Denove la tremanta, klopodanta shipo ekturnadas min – mi hastas tra shaumplaudataj
 rokoj kiuj preskau tushas min,
Denove mi rimarkas kie malantaue la malgranda, maldika Indiana direktilisto
Alte staras en la nebulo, kun lerta brovo kaj reganta mano.

Se Mi Povus Elekti

Se mi povus elekti registri la plej grandajn bardojn,
Pentri iliajn portretojn, dignajn, belajn, kaj rivali lauvole,
Homeron kun chiuj siaj militoj kaj militistoj – Hektoro, Ahhilo, Ajakso,
Au la ve-implikitajn Hamleton, Learon, Otelon de Shekspiro – la belajn damojn de
 Tenisono,
Metron au spriton la plej bonan, au elektindan koncepton manipuli en perfekta rimo,
 delico de kantistoj;
Chi tiujn, chi tiujn, ho maro, chiujn chi tiujn mi volonte intershanghus,
Se vi l' ondodon de unu ondo, ghian arton al mi transdonus,
Au spirus unu spiron sur miajn poemojn,
Kaj tie lasus ghian odoron.

Vi Tajdoj kun Senchesa Hulo

Vi tajdoj kun senchesa hulo! vi potenco kiu faras chi tiun laboron!
Vi nevidata forto, centripeta, centrifuga, tra la etendo de spaco,
Akordo de suno, luno, tero, kaj chiuj konstelacioj,
Kiaj estas la mesaghoj per vi de malproksimaj steloj al ni? kiaj de Siriuso, kiaj de
 Kaprino?
Kia centra koro – kaj vi la pulso – vivigas chion? kia senlima agregajho de chio?
Kia subtila nerektajho kaj signifo en vi? kia shlosilo al chio en vi? kia fluida, vasta
 identeco,
Tenanta la universon kun chiuj ghiaj partoj kiel unu – kiel velantan en shipo?

Fino de Malfluso, kaj Taglumo Malpliighanta

* Navesinko – mar-flanka monto, che la malsupra enirejo de la Novjorka Golfo.

Fino de malfluso kaj taglumo malpliighanta,
Aroma marmalvarmo teren iranta, odoroj de karekso kaj salo envenantaj,
Kun multaj duonkaptitaj voĉoj suprensensendataj el la akvokirloj,
Multaj dampitaj konfesoj – multaj plorsingultoj kaj frustrataj vortoj,
Kiel de parolantoj malproksimaj au kashitaj.
Kiel ili rapidegas malsupren kaj eksteren! kiel ili murmuris!
Poetoj nenomataj – artistoj, plej grandaj el iuj ajn, kun amataj perditaj desegnajhoj,
La nerespondo al amo – hĥoro de maljunaghaj plendoj – la finaj vortoj de espero,
La malesperanta krio de iu memmortigulo, *For al la senlima dezerto, kaj neniam reveni.*

Antauen al forgeso do!
Antauen, antauen, kaj faru vian taskon, vi subiganta, malflusanta tajdo!
Antauen por via tempo, vi furioza elfluanto!

Kaj Tamen Ne Vi Solaj

Kaj tamen ne vi solaj, krepusko kaj subiganta malfluso,
Ne vi, vi perditaj desegnajhoj solaj – nek malsukcesoj, aspiroj;
Mi konas, diaj trompemuloj, la shajnon de via sorĉo;
Tauge per vi, de vi, la tajdo kaj lumo denove – tauge la ĉarniroj turnighantaj,
Tauge la bezonataj diskordpartoj kompensantaj, kunmiksantaj,
Teksantaj de vi, de Dormo, Nokto, Morto mem,
La ritmon de Naskigho eterna.

Fiere la Fluso Envenas

Fiere la fluso envenas, vokante, shaumante, avancante,
Longe ghi tenas sin alte, kun largha brusto elshvelanta,
Chio pulsas, dilatighas – la bienoj, arbaroj, stratoj de urboj – laboristoj ĉe l' laboro,
Ĉefveloj, topveloj, jhiboj aperas en la malproksimo – flagrubandoj de fumo de
vaporshipoj – kaj sub la antautagmeza suno,
Sharghita per homaj vivoj, gaje la elen-iraj, gaje la enen-iraj,
Paradanta de multaj sparoj la flago kiun mi amas.

De Tiu Longa Vico de Ondoj

De tiu longa vico de ondoj, mi mem revokita, resumita sur min,
En chiu kresto ia ondadanta lumo au ombro – ia retrorigardo,
Ghojoj, vojaghoj, studoj, silentaj panoramoj – scenoj efemeraj,
La de longe pasinta milito, la bataloj, hospitalaj vidajhoj, la vunditaj kaj la mortaj,
Mi mem tra chiu pasinta fazo – mia mallaborema juneco – maljunagho proksime,
Miaj tri dekduoj da jaroj da vivo resumitaj, kaj pli, kaj pasintaj,
Per ia ajn granda idealo taksite, senintencaj, la tuto ia nenio,
Kaj eble ankoraŭ ia guto interne de la ensemblo de la plano de Dio – ia ondo, au parto de
ondo,
Kiel unu el viaj, vi multegeca oceano.

Tiam Laste el Chio

Tiam laste el chio, ekviditaj de chi tiuj bordoj, chi tiu monteto,
De vi, ho tajdoj, la mistika homa signifo:
Nur per via legho, via hulo kaj malfluso, enfermanta min la samo,
La cerbo kiu formas, la vocho kiu kantas chi tiun kanton.

ELEKTOTAGO, NOVEMBRO, 1884

Se mi bezonus nomi, ho Okcidenta Mondo, vian plej potencon kaj elmontrajhon,
Ne estus vi, Niagaro – nek vi, vi senlimaj prerioj – nek viaj grandegaj kanjonaj fendoj,
Kolorado,
Nek vi, Josemito – nek Jelostono, kun chiuj ghiaj spasmaĵoj, suprenirantaj al
la chieloj, aperantaj kaj malaperantaj,
Nek la blankaj konusoj de Oregono – nek la Hurona zono de potencaj lagoj – nek la
fluego de Misisipo:
– La homaron de chi tiu svarmanta hemisfero, kiel nun, mi volus nomumi – la kvietan
vocheton vibrantan – la elektan tagon de Ameriko,
(La koro de ghi ne en la elektitoj – la ago mem la chefa afero, la chiukvarjara elektado),
La etendajho de Nordo kaj Sudo vekita – marbordo kaj landinterno – Teksaso ghis
Majno – la Preriaj Shtatoj – Vermonto, Virginio, Kalifornio,
La fina balotilpluvego de Oriento al Okcidento – la paradokso kaj konflikto,
La sennombraj neghflokoj falantaj – (senglava konflikto,
Tamen pli ol chiuj militoj malnovtempaj de Romo, au tiuj de la moderna Napoleono);
chies paca elektado,
Au bona au malbona homaro – bonveniganta la pli sinistran shancon, la fatrason:
– Chu shaumas kaj fermentas la vino? tio servas por purigi – dum la koro anhelas, dum
vivo ardas:
Chi tiuj shtormaj ekblovoj kaj ventoj impulsas altvalorajn shipojn,
Shveligis la velojn de Washingtono, Jhefersono, Linkolno.

KUN RAUKORGOJLAJ LIPOJ, HO MARO!

Kun raukorgojlaj lipoj, ho maro!
Kie tage kaj nokte mi vagas vian ondbatatan bordon,
Imagante al mia menso viajn diversajn strangajn sugestiojn,
(Mi vidas kaj klare listigas vian paroladon kaj konferencadon chi tie),
Viaj trupoj da blankkolharaj kureguloj, kuregantaj al la celo,
Via ampleksa, ridetanta vizagho, aspergita per la scintilantaj kavetoj de la suno,
Via kolera malrida kaj malhelo – viaj malbriditaj uraganoj,
Via nesubigeblo, kapricoj, obstino;
Granda kiel vi estas super la ceteraj, viaj multaj larmoj – manko dum tuta eterno en via

kontento,
 (Nenio krom la plej grandaj luktoj, malpravoj, malvenkoj, povus fari vin la plej granda
 –nenio malpli povus fari vin),
 Via soleca stato – io kion vi chiam serchas kaj serchas sed neniam gajnas,
 Certe ian rajto detenita – ia vocho, en grandega monotona furiozo, de liberecamanto
 enfermita,
 Ia vasta koro, kiel de planedo, katenita kaj malpacientanta en tiuj romp-ondoj,
 Per plilongigita hulo, kaj spasma, kaj anhelanta spiro,
 Kaj ritma raspado de viaj sabloj kaj ondoj,
 Kaj serpenta siblo, kaj sovaghaj sonoroj de ridado,
 Kaj subtonoj de malproksima leona mugho,
 (Sonanta, peteganta al la surda orelo de la chielo – sed nun akordo chifoje,
 Fantomo en la nokto via konfidenculo chifoje),
 La unuan kaj lastan konfeson de la globo,
 Elimpetantan, murmurantan el la abismoj de via animo,
 La rakonton de kosma elementa pasio,
 Vi diras al anim' simila.

MORTO DE GENERALO GRANTO

Dum unu post unu retirighas la noblaj aktoroj,
 De tiu granda dramo sur la scenejo eterna de historio,
 Tiu sensacia partia akto de milito kaj paco – de malnovo kaj novo luktantaj,
 Pribatalata tra kolerego, timoj, sinistraj chagrenoj, kaj multaj longaj suspensoj;
 Tute forpasinta – kaj poste, en sennombraj tomboj retirighantaj, mildighantaj,
 De venkinto kaj venkito – de Linkolno kaj Lee – nun vi kun ili,
 Homo de la potencaj tagoj – kaj kapabla por la tagoj!
 Vi de la prerioj! – implikita kaj multvejna kaj malfacila estis via rolo,
 Admirinde ghi estis ludata!

RUGH-JAKO (DE SUPRE)

[Improvizitajho pri la monumento de Buffalo City al, kaj la reentombigo de la maljuna Irokeza oratoro, 9an Oktobro, 1884.]

Che chi tiu sceno, chi tiu elmontrajho,
 Liverata hodiau de modo, scio, richo,
 (Nek kaprice sole – iuj grajnoj de plej profunda signifo),
 Eble, supre (kiu scias), de la kunfanditaj formoj de malproksimaj chielnuboj,
 Kiel ia maljuna arbo, au roko, au klifo, entuziasmigite pri sia animo,
 Produkto senpera de la suno, steloj, tero de Naturo – alte staranta homa formo,
 En chaschemizo el ledo, armite per fusilo, duonironia rideto kurbiganta ghiajn
 fantomajn lipojn,
 Kiel unu el la fantomoj de Osiano malsuprenrigardas.

LA WASHINGTONA MONUMENTO, FEBRUARO, 1885

Ahh, ne chi tiu marmoro, morta kaj malvarma:
 Malproksimen de ghia bazo kaj fusto ekspansianta – la rondajn zonojn chirkauanta,
 ampleksanta,
 Vi, Vashingtono, estas de la tuta mondo, de chiu kontinentoj – ne via sola, Ameriko,
 De Europo tiel same, en chiu regiono, kastelo de senjoro au dometo de laboristo,
 Au frosta Nordo, au humidvarma Sudo – de la Afrikano – de la Arabo en sia tendo,
 De la malnova Azio tie kun respektinda rideto, sidanta meze de siaj ruinoj;
 (Chu salutas la antikva la heroon novan? estas nur la samo – la heredanto legitima,
 daurigita konstante,
 La nevenkebla koro kaj brako – pruvoj de la neniam rompita linio,
 Kuragho, vicleco, pacienco, fido, la samo – ech en malvenko ne venkita, la samo):
 Kie ajn velas shipo, au domo estas konstruata sur tero, au tage au nokte,
 Tra svarmantaj stratoj de urboj, endome au ekster, fabrikoj au bienoj,
 Nun, au venonte, au pasinte – kie la voloj de patriotoj ekzistis au ekzistas,
 Kie ajn Libereco, ekvilibrigita de Toleremo, movata de Legho,
 Staras au levighas via vera monumento.

DE TIU GAJA GORGHO VIA

[Pli ol okdek tri gradojn norde – proksimume je distanco de la Poluso, tra kiu unu el niaj
 rapidaj oceanaj shipoj povus vaporveturi dum tuta tago en klara akvo – Greely la esploristo
 audis la kanton de sola neghbirdo gaje sonantan tra la dezerteco.]

De tiu gaja gorgho via el arkto blanke morna,
 Mi atentos la lecionon, soleca birdo – mi bonvenigu ankaŭ frostigantajn drivojn,
 Ech la plej profundan froston, kiel nun – torporan pulson, cerbon konsternitan,
 Maljunaghon glacienermitan en sia vintra golfo – (fride, fride, ho fride!),
 Chi tiujn neghajn harojn, mian malfortan brakon, miajn frostigitajn piedojn,
 Por ili vian fidon, vian principon mi prenas, kaj ghin gravuras ghis la fino;
 Ne la zonojn de somero solajn – ne kantojn de junagho, au la varmajn tajdojn de la sudo
 solajn,
 Sed tenite de malrapidaj bankizeroj, pakite en la norda glacio, la amasigho de jaroj,
 Tiujn chi kun gaja koro mi ankaŭ kantas.

BROADVEJO

Kiaj hastantaj homaj tajdoj, au tage au nokte!
 Kiaj pasioj, gajnoj, perdoj, ardoj, naghlas viajn akvojn!
 Kiaj giroj da malbono, beato kaj malghojo, envolvas vin!
 Kiaj kuriozaj demandaj ekrigardoj – rebriloj de amo!
 Firigardo, envio, malestimo, esperado, aspirado!
 Vi portalo – vi areno – vi de la miriadoj da longetenditaj viclinioj kaj grupoj!
 (Se viaj trotuaraj shtonplatoj kaj randoj, viaj fasadoj, nur povus diri siajn neimiteblajn
 rakontojn;
 Viaj fenestroj richaj, kaj grandegaj hoteloj – viaj trotuaroj larghaj);

Vi de la senfinaj glitantaj, afektmarshantaj, trenmarshantaj piedoj!
Vi, kiel la makulkolora mondo mem – kiel senfina, svarma, mokanta vivo!
Vi vizierhava, vasta, neesprimebla montrajho kaj leciono!

POR AKIRI LA FINAN RITMECON DE KANTOJ

Por akiri la finan ritmecon de kantoj,
Penetri la plej internan scion de poetoj – koni la potenculojn,
Ijobon, Homeron, Eskilon, Danton, Shekspiron, Tenisonon, Emersonon;
Diagnozi la movighedelikatajn nuancojn de amo kaj fiero kaj dubo – vere kompreni,
Por ampleksi chi tiujn, la lasta akra kapablo kaj enirprezo,
Maljunagho, kaj kion ghi alportas de chiuj ghiaj pasintecaj spertoj.

MALJUNA MARISTO KOSABONO

Malproksime malantaue, parenca sur la flanko de mia patrino,
Maljuna Maristo Kosabono, mi diros al vi kiel li mortis:
(Estis maristo lian tutan vivon – havis preskau 90 – loghis kun sia edzinighinta nepino,
Jheni;
Domo sur altajho, kun vidajho de la golfo proksime, kaj malproksima kabo, kaj
etendajho al la libera maro);
La lastan de postagmezoj, la vesperajn horojn, dum multe da jaroj lia konstanta kutimo,
En sia granda braksegho che la fenestro sidanta,
(Iam, ja, tra duono de la tago),
Observante la venadon, iradon de la shipoj, li murmuris al si mem – Kaj nun la fino de
chio:
Unu luktanta eliranta brigo, unu tagon, malhelpate longtempe – kructajdoj kaj multo
misighanta,
Finfine che noktigho trafas la venton ghuste, shia tuta shanco ektornighanta,
Kaj rapide chirkauiranta la kabon, la mallumon fiere eniranta, fendanta, dum li rigardas,
“Shi estas libera – shi iras al sia celo” – chi tiuj la finaj vortoj – kiam Jheni venis, li sidis
tie morta,
Nederlanda Kosabono, Maljuna Maristo, parenca sur la flanko de mia patrino, antau
multe da jaroj.

LA MORTA TENORULO

Kvazau lau la scenejo denove,
Kun Hispana chapelo kaj plumoj, kaj marshmaniero neimitebla,
Reen de la velkantaj lecionoj de la pasinteco, mi vokus, mi dirus kaj agnoskus,
Kiel multe de vi! la malkasho de la kanta vocho de vi!
(Tiel firma – tiel likvamola – kaj denove tiu tremeta, vireca tembro!
La perfekta kanta vocho – plej profunda el chio la leciono – provo kaj pruvo de chio):
Kiel tra tiuj melodioj distilitaj – kiel la ravitaj oreloj, la animo mia, sorbantaj

La koron de *Fernando*, la pasian vokon de *Manrico*, de *Ernani*, de l' dolcha *Gennaro*,
Mi envolvas de tiam, au penas involvi, en miajn chantojn transformante,
La liberigitan cantabile de Libereco, kaj Amo, kaj Fido,
(Kiel la korelativon de parfumo, koloro, sunlumo):
De chi tiuj, por chi tiuj, kun chi tiuj, hastigata linio, morta tenorulo,
Alblovetita autuna folio, faligata en la fermighantan tombon, la shovelitan teron,
Je memoro de vi.

KONTINUAJHOJ

[El konversacio kiun mi havis lastatempe kun Germana spiritisto.]

Nenio estas iam vere perdita, au povas esti perdita,
Nenia nasko, identeco, formo – nenia objekto de la mondo.
Nek vivo, nek forto, nek ia videblajho;
Shajno ne devas malsukcesigi, nek flankenmovita sfero konfuzi vian cerbon.
Ampleksaj estas tempo kaj spaco – ampleksaj la kampoj de Naturo.
La korpo, malvigla, maljuna, malvarma – la brago lasita el pli fruaj fajroj,
La lumo en la okulo, malhelighinta, siatempe ekflamos denove;
La suno, nun malalte en la okcidento, levighas por matenoj kaj por tagmezoj konstantaj;
Al frostigitaj terbuloj chiam la nevidebla legho de printempo revenas,
Kun herbo kaj floroj kaj someraj fruktoj kaj maizo.

JONONDIO

[La signifo de la vorto estas lamento pri la aborigenoj. Ghi estas Irokeza termino; kaj estis uzata por persona nomo.]

Kanto, poemo per si mem – la vorto mem lamentokanto,
Meze de la sovaghejoj, la rokoj, la shtormo, kaj vintra nokto,
Al mi tiajn nebulajn, strangajn scenojn la silaboj elvokantaj;
Jonondio – mi vidas, malproksime en la okcidento au nordo, senliman ravinon, kun
 ebenajhoj kaj montoj malhelaj,
Mi vidas svarmojn da bravaj tribestroj, kuracviroj, kaj batalistoj,
Kiam, preterflugetante kiel nuboj da fantomoj, ili pasas kaj estas for en la krepusko,
(Raso de la arbaroj, liberaj pejzaghoj, kaj akvofaloj!
Nenia bildo, poemo, diro, pasiganta ilin al la estonteco):
Jonondio! Jonondio! – nepentrite ili malaperas;
Hodiau cedas sian lokon, kaj velkas – la urboj, bienoj, fabrikoj velkas;
Dampita sonora sono, ululanta vorto estas portata tra la aero momente,
Tiam blanka kaj silenta kaj for, kaj komplete perdita.

VIVO

Chiam la nesenkuraghigita, rezoluta, luktanta animo de la homo;
(Chu antaŭaj armeoj malsukcesis? do ni sendas freshajn armeojn – kaj freshajn denove);
Chiam la kunluktata mistero de chiuj epokoj de la tero, malnovaj au novaj;
Chiam la avidaj okuloj, huraoj, la bonvenigplaudantaj manoj, la lauta aplaudo;

Chiam la animo nekontenta, scivola, nekonvinkita finfine;
Luktanta hodiaŭ same – batalanta same.

“IRANTAJ IEN”

Mia scienca amikino, mia plej nobla amikino,
(Nun enterigita en Angla tombo – kaj chi tio memorfolio por shi, la kara),
Finis nian paroladon – “La resumo, sumiginte chion kion ni scias pri malnova au
moderna scio, intuicioj profundaj,
Pri chiuj Geologioj – Historioj – pri tuta Astronomio – pri Evoluo, Metafiziko tuta,
Estas ke ni estas chiuj antauen, antauen, veturantaj malrapide, certe plibonighantaj,
Vivo, vivo senfina marsho, senfina armeo (nenia halto, au jen, ghi finighis),
La mondo, la raso, la animo – en spaco kaj tempo la universo,
Chiuj celantaj kiel konvenas al chiu – chiuj certe irantaj ien.”
De la 1867a eldono de F. de H.

MALGRANDA LA TEMO DE MIA CHANTO

Malgranda la temo de mia Chanto, tamen la plej granda – nome, La Mem – simpla,
aparta persono. Tion, por la uzo de la Nova Mondo, mi kantas.
La fiziologion de la homo kompletan, de verto al piedo, mi kantas. Ne fizionomio sola
au cerbo sola estas inda por la Muzo; – Mi diras, la Formo kompleta estas multe
pli inda. Kaj la Femalan kaj la Masklan egale mi kantas.
Nek chesas che la temo de La Mem. Mi parolas la vorton de la moderna, la vorton
Amase.
Miajn Tagojn mi kantas kaj la Landojn – dum interspaceto mi konis malfelichan Militon.
(Ho amiko, kiu ajn vi estas, finfine alvenante chi tien por komenci, mi sentas tra chiu
folio la premon de via mano, kiun mi redonas.
Kaj tiel por nia vojagho, alpashante la vojon, kaj pli ol unufoje, kaj kunigite, ni iru.)

VERAJ KONKERANTOJ

Maljunaj bienistoj, vojaghantoj, laboristoj (ne gravas, kiel kripligitaj au kurbigitaj),
Maljunaj maristoj, el multaj dangheraj vojaghoj, shtormoj, kaj frakaso,
Maljunaj soldatoj el kampanjoj, kun chiuj iliaj vundoj, malvenkoj, kaj cikatroj;
Sufiche ke ili nur postvivis – la neshanceblaj de la longa vivo!
El iliaj luktoj, provoj, bataloj, esti nur elighintaj – pro tio sola,
Veraj konkerantoj super chiuj ceteraj.

LA UNUIGHINTAJ SHTATOJ AL LA MALNOVMONDAJ KRITIKANTOJ

Chi tie unue la devoj de hodiaŭ, la lecionoj de la konkreta,
Richo, ordo, vojaghado, shirmado, produktoj, abundo;
Kiel pri la konstruado de ia varia, vasta, chiamdaŭra konstruajho,

De kiu levighi neeviteble en la tempo, la alte starantaj tegmentoj, la lampoj,
La solidfiksitaĵoj spajroj altaj, sagantaj al la steloj.

LA TRANKVILIGA PENSO EL CHIUJ

Ke antaŭenkuregante, kio ajn la konjektoj de homoj,
Meze de la shanghighantaj skoloj, teologioj, filozofioj,
Meze de la kriegantaj prezentadoj, novaj kaj malnovaj,
La silentaj, viglaj legĥoj, faktoj, modaloj de la ronda tero dauras.

DANKON EN MALJUNAGHO

Dankon en maljunagho – dankon antaŭ ol mi iros,
Pro sano, la tagmeza suno, la nepalpebla aero – por vivo, nura vivo,
Pro karegaj chiamrestadantaj memoroj (pri vi, mia patrino kara – vi, patro – vi fratoj,
fratinoj, amikoj),
Pro chiuj miaj tagoj – ne tiuj de paco solaj – la tagoj de milito same,
Pro mildaj vortoj, karesoj, donacoj el fremdaj landoj,
Pro shirmo, vino, kaj nutrajĥo – pro dolĥa shatado,
(Vi malproksimaj, svagaj nekonatoj – au junaj au maljunaj – sennombraj, nedifinitaj,
legantoj amataj,
Ni neniam renkontighis, kaj neniam renkontighos – kaj tamen niaj animoj sin brakumas,
longe, kunpreme, kaj longe);
Pro estajĥoj, grupoj, amo, faroj, vortoj, libroj – pro koloroj, formoj,
Pro chiuj kuraghaj fortaj viroj – sindonaj, fortikaj viroj – kiuj antaŭensaltis helpe al
libereco, ĥe chiuj jaroj, chiuj landoj,
Pro pli kuraghaj, pli fortaj, pli sindonaj viroj – (speciala lauro antaŭ ol mi iros, al la
elektitoj de la milito de vivo,
La kanonistoj de kanto kaj penso – la grandaj artileriistoj – la unuaj ĥefoj, kapitanoj de
la animo):
Kiel soldato reveninta de finita milito – Kiel vojaghanto el miriadoj, al la longa procesio
retrospektiva,
Dankon – ghojan dankon! – dankon de soldato, vojaghanto.

VIVO KAJ MORTO

La du malnovaj, simplaj problemoj ĥiam interplektitaj,
Proksime tushantaj, evitemaj, ĥeestantaj, konfuzitaj, kunluktitaj,
De ĥiu sinsekva epoko nesolveblaj, transdonitaj,
Al nia hodiaŭ – kaj ni transdonas same.

LA VOCHO DE LA PLUVO

Kaj kiu vi estas? diris mi al la mallaute falanta pluvdusho,
Kiu, strange diri, donis al mi respondon, kiel chi tie tradukita:
Mi estas la Poemo de Tero, diris la vocho de la pluvo,
Eterne mi levighas nepalpebla el la tero kaj la senfunda maro,
Supren al chielo, de kiu, svage formita, tute shanghita, kaj tamen la sama,
Mi malsupreniras por lavi sekecojn, skeletojn, polvotavolojn de la globo,
Kaj chio tio en ili sen mi estus semoj solaj, latentaj, nenaskitaj;
Kaj chiam, tage kaj nokte, mi redonas vivon al mia propra origino, kaj purigas kaj
beligas ghin;
(Char la kanto, elighanta el ghia naskighloko, post plenumigho, vagado,
Prizorgate au neprizorgate, tauge kun amo revenas.)

BALDAU ESTOS CHI TIE LA MALHELPO AL VINTRO

Baldau estos chi tie la malhelpo al vintro;
Baldau mallighos kaj degelos chi tiuj glaciaj ligoj – iom da tempo,
Kaj aero, grundo, ondo, trafenetrigos per moleco, florado, kaj kreskado – mil formoj
levighos
De chi tiuj mortaj terbuloj kaj frostoj kiel de malaltaj enterigaj tomboj,
Viaj okuloj, oreloj – chiuj viaj plej bonaj ecoj – chio kio ekkonas la naturan belecon,
Vekighos kaj plenighos. Vi perceptos la simplajn elmontrajhojn, la delikatajn miraklojn
de tero,
Leontodojn, trifolion, la smeraldan herbon, la fruajn odorojn kaj florojn,
La arbuton subpiede, la flavverdon de l' saliko, la florantan prunon kaj cherizon;
Kun chi tiuj la rubekolo, alaudo, kaj turdo, kantantaj siajn kantojn – la flirtanta blubirdo;
Char tiaj la scenoj kiujn la chiuvara teatraĵo alportas.

NE LA PASINTECON FORGESANTE

Ne la pasintecon forgesante,
Hodiau, almenau, malpaco tute subigita – paco, frateco levighintaj;
Por signo reciproka niaj Nordaj, Sudaj manoj,
Metas sur la tombojn de chiuj mortaj soldatoj, Nordaj au Sudaj,
(Nek por la pasinteco sole – por signifoj al la estonteco),
Girlandojn de rozoj kaj branĉojn de palmo.
Publikigita 3an de Majo, 1888.

LA MORTANTA VETERANO

[Long-Insula incidento – frua parto de la nuna jarcento.]

Meze de chi tiuj tagoj de ordo, ripozo, prospero,
Meze de la kurantaj kantoj de belo, paco, deco,
Mi jhetas rememoron – (kredeble ghi ofendos vin,

Mi audis ghin en mia knabagho): – Antau pli ol generacio,
 Stranga maljuna sovagha viro, batalanto sub Washingtono mem,
 (Granda, brava, purema, ekscitighema, nenia babilemulo, iom spiritisma,
 Batalis en la vicoj – batalis bone – cheestis tra la tuta Revolucia milito),
 Kushis mortante – filoj, filinoj, preghejdiakonoj ame flegantaj lin,
 Akrigantaj sian sentadon, siajn orelojn, al liaj murmuraj, duonkaptataj vortoj:
 “Mi revenu denove al miaj militotagoj,
 Al la vidajhoj kaj scenoj – al la formado de la batallinio,
 Al la skoltoj antaue rekognoskantaj,
 Al la kanonoj, la kruela artilerio,
 Al la galopantaj adjutantoj, portantaj ordonojn,
 Al la vunditaj, la falintaj, la ardo, la suspenso,
 La parfumo forta, la fumo, la surdiga bruoj;
 For vian vivon de paco! – viajn ghojojn de paco!
 Redonu al mi mian malnovan batalovivon!”

PLI FORTAJ LECIONOJ

Chu vi lernis lecionojn nur de tiuj kiuj admiris vin, kaj estis teneraj kun vi, kaj staris
 flanke por vi?
 Chu vi ne lernis grandajn lecionojn de tiuj kiuj malakceptas vin, kaj sin fortikigas
 kontrau vi? au kiuj traktas vin kun malestimo, au disputas la pasejon kun vi?

PRERIA SUNSUBIRO

Privershita per oro, brunrugho, kaj violo, blindumanta arghento, smeraldo, flavbruno,
 La tuta amplitudo de la tero kaj la multforma potenco de Naturo konsignitaj chifoj al
 koloroj;
 La lumo, la ghenerala aero posedataj de ili – koloroj ghis nun nekonataj,
 Nenia limo, enfermo – ne la Okcidenta chielo sola – la alta kulmino – Norda, Suda, chio,
 La pura luma koloro batalanta la silentajn ombrojn ghismorte.

DUDEK JAROJ

Tie sur la antikva varfo, la sablo, mi sidas, kun novveninto babilante:
 Li surshipighis kiel novicknabo, kaj forvelis (ekkaptis lin ia subita, fervora deziro);
 De tiam, dudek jaroj kaj pli chirkauris chirkaue kaj chirkaue,
 Dum li la globon chirkauris chirkaue kaj chirkaue – kaj nun revenas:
 Kiel shanghita la loko – chiu malnovaj orientiloj forighintaj – la gepatroj mortaj;
 (Jes, li revenas por stari havene por chiam – por resti – havas bonplenigitan monujon –
 nenia loko taugos krom chi tiu);
 La malgrandan boaton kiu deremis lin de la slupo nun tenata shnure mi vidas,
 Mi audas la plaudantaj ondojn, la senripozajn kilon, la rulighadon en la sablo,
 Mi vidas la maristan ekipajhon, la drelikan sakon, la grandan skatolon, kunligitan per

latuno,
Mi esploras la vizaghon, tute berobrunan kaj barban – la larghfortan korpon,
Vestitan en sia rughbruna kompleto el bona Skota drapo:
(Nu kio la tuta historio de tiuj dudek jaroj? Kio pri la estonteco?)

ORANGHBURGHONOJ POSHTE EL FLORIDO

[Voltero fermis faman argumenton, asertante ke militoshipo kaj la grand-opero
sufichas kiel pruvoj de la progreso de civilizo kaj de Francujo, liatempe.]

Pli malgranda pruvo ol tiu de la malnovtempa Voltero, tamen pli granda,
Pruvo el chi tiu nuna tempo, kaj vi, via granda vastajho, Ameriko,
Al mia ordinara Norda kabano, en eksteraj nuboj kaj negho,
Alportitaj sekure mil mejlojn trans teron kaj maron,
Antau chirkau tri tagoj sur sia propra grundo vivsprosantaj,
Nun chi tie ilian dolchecon tra mia chambro disvolvantaj,
Bukedo da oranghburghonoj poshte el Florido.

KREPUSKO

La molaj voluptamaj opiajhaj ombroj,
La suno jhus forighinta, la avida lumo dispelita – (mi ankau baldau estos forighinta,
dispelita),
Nebulo – nirvano – ripozo kaj nokto – forgeso.

VI RESTADANTAJ MALABUNDAJ FOLIOJ DE MI

Vi restadantaj malabundaj folioj de mi sur vintroalproksimighantaj branĉoj,
Kaj mi ia multetondita arbo de kampo au fruktarbaro;
Vi signoj malmultaj kaj mornaj – (ne nun la ardo de la trifolia florad' de Majo au Juli' –
nenia greno de Augusto nun);
Vi palaj flagstangoj – vi flagetoj senvaloraj – vi preterrestintoj en tempo,
Tamen miaj animplejkaraj folioj, konfirmantaj chiujn ceterajn,
La plej fidelaj – plej harditaj – lastaj.

NE MAGRAJ, LATENTAJ BRANĤOJ, SOLE

Ne magraj, latentaj branĉoj sole, ho kantoj! (skvamaj kaj nudaj, kiel fingroj de agloj),
Sed eble por iu suna tago (kiu scias?) iu estonta printempo, iu somero – elrompighonta,
Je verdaj folioj, au shirmanta ombro – je nutra frukto,
Pomoj kaj vinberoj – la bravaj branĉoj de arboj elighantaj – la fresha, libera, ekstera aer',
Kaj amo kaj fido, florantaj kiel aromaj rozoj.

LA MORTA IMPERIESTRO

Hodiaŭ, kun klinighantaj kapo kaj okuloj, vi, ankau, Kolumbio,
Malpli por la potenca krono, malsuprenmetita en malghojo – malpli por la Imperiestro,
Vian veran kondolencon elspiras, elsendas trans multajn salmarajn mejlojn,
Funebrante bonan maljunulon – fidelan shafgardiston, patrioton.
Publikigita 10an de Marto, 1888 (morto de Imperiestro Vilhelmo de Germanujo).

KIEL LA SIGNALFLAMO DE L' GREKO
[Por la okdeka naskightago de Whittier, 17an Decembro, 1887.]

Kiel la signalflamo de l' Greko, de l' antikva kroniko pridirita,
Levighis de la montetsupro, kiel aplaudado kaj gloro,
Bonvenigante en famon iun specialan veteranon, heroon,
Per roza nuanco rughigante la landon kiun li servis,
Tiel mi supren de la shipfranghita bordo de Manahato,
Alten levas ekbruligitan torchon por vi, Maljuna Poeto.

LA MALMUNTITA SHIPO

En ia ne-uzata laguno, ia sennoma golfo,
Sur malviglaj, solecaj akvoj, ankrita proksime al la bordo,
Malnova, senmastigita, griza, kaj batdifektita shipo, senpovigita, finita,
Post liberaj vojaghoj al chiuj maroj de l' tero, hisita finfine kaj hauserita firme,
Kushas rustante, putrante.

NUN, ANTAUINTAJ KANTOJ, ADIAU

Nun, antauintaj kantoj, adiau – je chiu nomo adiau,
(Sekvantaroj de shancelighanta vico en multaj strangaj procesioj, charoj,
El felichoj kaj malfelichoj – kun intertempoj – el pli maljunaj jaroj, mezagho, au juneco),
“En Kajutaj Shipoj”, au “Vi, Malnova Afero”, au “Poetoj Venontaj”
Au “Paumanoko”, “Kanto de Mi Mem”, “Kalamo”, au “Adam”,
Au “Batu! Batu! Tamburoj!” au “Al la Fermentigita Grundo, Kiun Ili Tretis”,
Au “Kapitan’! Mia Kapitan’!” “Kosmo”, “Flusablaj Jaroj”, au “Pensoj”,
“Vi Patrino kun Via Egala Idaro”, kaj multaj, multaj pli nespecifitaj,
De fortika koro mia – de gorgho kaj lango – (La varma pulsanta sango de mia vivo,
La persona urgho kaj formo por mi – ne nur papero, automata tiparo, kaj inko),
Chiu kanto mia – chiu eldiro en la pasinteco – havanta sian longan, longan historion,
De vivo au morto, au vundo de soldato, au perditajho au sekureco de la lando,
(Ho chielo! kia ekbrilo kaj komencita senfina sekvantaro de chiuj! komparata ja al tio!
Kia mizera chifono ech che la plej bonaj el chiuj!).

VESPERA PAUZO

DUA ANEKSAJHO

ADIAU, MIA FANTAZI'

ANTAUPAROLA NOTO AL DUA ANEKSAJHO FINANTA F. DE H. – 1891.

Chu ne estus pli bona ke mi detenu (en chi tiu maljunagho kaj paralizo de mi) tiajn malgrandajn chifonojn kaj franghpunktojn (eble makuletojn, malpurajhojn) kiaj sekvas longan kaj polvan vojaghon kaj atestas pri ghi poste? Mi vershajne ne sufiche timis senzorgajn tushojn, de la komenco – kaj ne timas nun – nek papagecajn ripetojn – nek banalajhojn kaj la ordinaran. Eble mi estas tro demokratia por tiaj evitoj. Krome, chu la versfako, kiel origine planita de mia teorio, ne estas nun sufiche ilustrita – kaj ghustatempe por mi silente emeritighi? – (ja meze de nenia lauta voko au merkato por mia speco de poezia eldiro).

Responde, au plighuste, spite, tian bone metitan pridemandadon, jen venas chi tiu malgranda poemaro, kaj fino de miaj antaŭaj poemaroj. Kvankam tute ne klare ke, kiel chi tie alkolektita, ghi valoras la presadon (certe mi havas nenion freshan skribi) – mi pasigas la horojn de mia 72a jaro – horojn de devigita enfermo en mia chambro – ordigante chi tiun malgrandan maljunaghan kolekton:

Lastaj gutetoj de kaj post spontanea pluvo,
De multaj klaraj distilajhoj kaj pasintaj dushoj;
(Chu ili ghermigis ion? nuraj elspiroj, kiel ili chiu estas – de la lando kaj de la
maro – de Ameriko;
Chu ili filtrighos al ia profunda emocio? ia koro kaj cerbo?).

Kiel ajn tio povus esti, mi inklinas profiti la shancon kaj strechon de hodiau. Dum la lastaj du jaroj mi elsendis, en la paŭzoj de malsano kaj ellacigho, certajn pepojn – restadantaj-mortighantaj vershajne (sendube) – kiujn nun mi povas chiuokaze kolekti kaj meti en bonan tiparon, dum kapabla ghuste vidi – (char miaj okuloj klare avertas min ke ili malakrighas, kaj mia cerbo pli kaj pli rimarkeble malatentas au rifuzas, monato post monato, ech etajn taskojn au reviziojn).

Fakte, jen mi en chi tiuj aktualaj jaroj 1890 kaj '91 (chiun sinsekvan dusemajnon farighante pli rigida kaj pli profunde enkavigita), multe kiel ia malmoltegajha kaduka malgaja antikva molusko au tempbatita konkulo (neniaj gamboj, absolute netranslokigha) suprenjhetita senhelpa sur la bordaj sabloj, nekapabla movighi ien – nenio restanta krom konduti kviete kaj forpasigi la tagojn ankoraŭ asignitajn kaj malkovri, chu estas io por la dirita malgaja kaj tempbatita konkulo akiri finfine el hereditaj bonhumoro kaj praaj elastaj centropulsoj tie profunde malsupre interne de lia grizmalklarigita maljuna konko.....(Leganto, vi devas permesi iom da humuro chi tie – pro tio ke unue estas tro da sekvantaj poemetoj pri morto, ktp., kaj krome la pasantaj horoj (5an de Julio, 1890) estas tiel sune-belaj. Kaj maljuna kiel mi estas, mi sentas min hodiau preskau parto de ia kapriolema ondo, au preta ludi ankoraŭ kiel

kaprido au katido – vershajne strio da korpa alghustigho kaj perfektigho ghuste nun. Mi kredas ke mi havas tion en mi konstante chiuokaze.)

Tiam malantau chio, la profundega konsolo (ghi estas ia malgaja, sed mi ne audacas bedauri la kauzon de ghi en la pasinteco, nek min forteni de priinsistado, ech fanfaronado chi tie che la fino), ke chi tiu lastajare paralizita maljuna senula kaj konkula kondicho de mi estas la senduba rezulto kaj kresko, nun chirkau de post 20 jaroj, de tro fervora, tro daurigita korpa kaj emocia ekcitigho kaj agado tra la tempoj de 1862, '3, '4, kaj '5, vizitante kaj flegante vunditajn kaj malsanajn armeajn volontulojn, de ambau flankoj, en kampanjoj au luktoj, au post ili, au en hospitaloj au kampoj sude de l' Urbo Vashingtono, au en tiu loko au aliloke – tiuj ardaĵ, malghojaj, tordantaj tempoj – la armeoj volontuloj, chiuj Shtatoj – au Nordaj au Sudaj – la vunditaj, suferantaj, mortantaj – la ellacigaj, shvitaj someroj, marshoj, bataloj, buchado – tiuj trancheoj haste priamasigitaj per kadavromiloj, precipe nekonataj – Chu la Ameriko de l' estonteco – chu chi tiu vasta richa Unio iam konscios kion ghi mem kostis, finfine tie malantaue? – tiujn hekatombojn da batalmortoj – Tiuj tempoj pri kiuj, ho fora leganto, chi tiu tuta libro estas ja finfine nur retrospektiva memorigajho el tiam de mi al vi?

ELVELU POR CHIAM, FANTOMA JAHHTO!

Suprenhau la ankron,
Levu chefvelon kaj jhibon – elstiru,
Ho malgranda blankkorpa slupo, nun rapidu sur vere profundaj akvoj,
(Mi ne nomos ghin nia finanta voĵagho,
Sed ekiro kaj certa eniro al la plej vera, plej bona, plej matura);
Foriru, foriru de solida tero – ne plu revenante al chi tiuj bordoj,
Nun antauen por chiam nian senfinan liberan entreprenon irante,
Rifuzante chiujn ankoraŭ provitajn havenojn, marojn, hauserojn, densecojn, gravitojn,
Elvelu por chiam, fantoma jahhto de mi!

RESTADANTAJ LASTAJ GUTOJ

Kaj de kie kaj kial vi venas?

Ni ne scias de kie (estis la respondo),
Ni nur scias, ke ni drivas chi tien kun la ceteraj,
Ke ni restadis kaj prokrastis – sed estis alblovetaĵ finfine, kaj nun cheestas,
Fari la finantajn gutojn de la pasanta dusho.

ADIAU, MIA FANTAZIO

Adiau*, mia fantazio – (mi havis vorton diri,
Sed ne estas ghuste la tempo – La plej bona de l' vorto au diro de iu homo,
Estas kiam ghia ghusta loko alvenas – kaj por ghia signifo,
Mi retenas la mian ghis la fino).

ANTAUEN, ANTAUEN SAME, VI GAJA DUO!

Antauen, antauen same, vi gaja duo!
Mia vivo kaj recitativo, enhavantaj naskighon, junecon, mezaghajn jarojn,
Maltrankvilaj kiel diverslangoj da flamo, nedisigeble interplektitaj kaj kunfanditaj en
unu – kombinantaj chion,
Mia unuopa animo – celoj, konfirmoj, malsukcesoj, ghojoj – Nek unuopa animo sole,
Mi kantas la gravegan stadion de mia nacio (de Ameriko, eble de homaro) – la aflikto
granda, la venko granda,
Klerigho stranga de chiuj amasoj pasinttempaj, la orienta mondo, la antikva, mezepoka,
Chi tie, chi tie el vagadoj, eraroj, lecionoj, militoj, malvenkoj – chi tie che la okcidento
vocho triumfa – praviganta chion,
Ghoja sonoranta krio – kanto chifoj de pleja fiero kaj kontento;
Mi chantas per ghi la ordinaran amason, la ghegeneralan mezan hordon (la plej bonajn ne
prefere al la plej malbonaj) – kaj nun mi chantas maljunaghon,
(Miajn versojn, skribitajn unue por la antautagmeza vivo, kaj por la periodo de somero,
de autuno,
Mi pasigas al neghblankaj haroj same, kaj donas al pulsoj vintromalvarmigataj same);
Dum chi tie senzorge trilantaj, mi kaj miaj recitativoj, kun fido kaj amo,
Alblovetataj al alia laboro, al nekonataj kantoj, kondichojoj,
Antauen, antauen, vi gaja duo! daurigu antauen same!

MIA 71A JARO

Post pasado de tri dudekoj kaj dek,
Kun chiuj iliaj shancoj, shanghoj, perdoj, malghojoj,
La mortoj de miaj gepatroj, la svagecoj de mia vivo, la multaj shirantaj pasioj de mi, la
milito de '63 kaj '4,
Kiel ia maljuna kaduka soldato, post longa, varmega, laciga marsho, au eble post batalo,

* Malantau Adiauo sin kashas multo de la saluto de alia komenco – al mi, Evoluo, Kontinueco, Senmorteco, Transformigho, estas la chefaj vivsignifoj de Naturo kaj Homeco, kaj estas la neprajho de chiuj faktoj, kaj chiu fakto. Kial homoj konsideradas tiel ame la lastajn vortojn, konsilon, aspekton de la forirantoj? Tiuj lastaj vortoj ne estas specimenoj de la plej bonaj, kiuj postulas vivforton en ghia pleneco, kaj ekvilibron, kaj perfektajn regadon kaj amplekson. Sed ili estas valoraj pretermezure por konfirmi kaj subteni la variajn sekvantajharon, faktojn, teoriojn, kaj kredon de la tuta antaŭa vivo.

Hodiaŭ che krepusko, lamiranta, respondanta la rotan nomvokadon, Che, kun vigla vocho,
Ankorau min prezentanta, ancorau salutanta la Oficiron super chio.

SHAJNOJ

Svaga nebuleto restadanta che duono de la paghoj:
(Iam kiel strange kaj klare al la animo,
Ke chiuj tiuj solidaj aferoj estas ja nur shajnoj, konceptoj, nerealajhoj).

LA PALA GIRLANDO

Iel mi ne povas ghin ancorau delasi, malgrau ghia funebreco,
Lasi ghin resti tie malantaue sur sia najlo pendigita,
Kun rozkoloro, bluo, flavo, chiuj blankigitaj, kaj la blanko nun griza kaj cindreca,
Unu velkinta rozo metita antaŭ multaj jaroj por vi, kara amiko;
Sed mi ne forgesas vin. Chu vi do velkis?
Chu laodoro estas elspirita? Chu la koloroj, viklecoj estas mortaj?
Ne, dum memoroj subtile ludas – la pasinteco viveca kiel iam;
Char nur lastanokte mi vekighis, kaj en tiu fantoma rondo vidis vin,
Viaj rideto, okuloj, vizagho, trankvilaj, silentaj, amaj kiel iam:
Do la girlando pendu kviete iom da tempo interne de mia okulatingo,
Ghi ancorau ne estas morta por mi, nek ech pala.

FINITA TAGO

La kvietigaj racieco kaj gajeco de kompletigo,
La pompo kaj hastigataj konkursbrilego kaj kurego estas finitaj;
Nun triumfo! transformigho! jubilu!*

* NOTO. – Somera kampara vivo. – Kelkaj jaroj. – En miaj vagadoj kaj esploradoj mi trovis arbarecan lokon proksime al la rojo kie ial la birdoj en ghoja humoro shajnis viziti en nekutimaj nombroj. Precipe che la komenco de la tago, kaj denove en la vespero, mi estis certa akiri tie plej abundajn bird-koncertojn. Mi iradis tien ofte che sunlevigho – kaj ankau che sunsubiro, au tuj antaue...Iam la demando ekestis en mi: Kiu estas la plej bona kantado, la unua au la plej lasta. La unua chiam gajigis, kaj eble shajnis pli ghoja kaj pli forta; sed mi chiam rigardis la sunsubirajn au malfruposttagmezajn sonojn pli penetraj kaj pli dolchaj – ili shajnis tushi la animon – ofte la vesperaj turdoj, du au tri el ili, respondantaj kaj eble kunmiksantaj. Kvankam mi maltrafis kelkajn matenojn, mi trovis min farighanta tute akurata che la vesperaj elkantoj.
ALIA NOTO. – “Li eliris kun la tajdo kaj la sunsubiro” estis frazo, kiun mi audis de kirurgo, priskribanta la morton de maljuna maristo sub speciale mildaj kondicho.
Dum la Secesia Milito, 1863 kaj ‘4, vizitante la Armeajn Hospitalojn chirkau Vasingtono, mi akiris la kutimon, kaj daurigis ghin ghisfine, kiam ajn la malflusa au flusa tajdo komencighis la lastan parton de la tago, de akurata vizitado de tiuj che tiu tempo homplenaj fakoj de suferantaj viroj. Iel (au mi tiel pensis) la efiko de la horo estis palpebla. Kutime, la grave vunditaj akiris ian

LA SHIPO DE MALJUNAGHO KAJ TIU DE RUZA MORTO

De oriento kaj okcidento trans la randon de l' horizonto,
Du potencaj mastrecaj ŝipoj velantoj shteliras al ni:
Sed ni konkursos iom da tempo sur la maroj – batalkonkurso ankoraŭ! viglu tie!
(Niaj ghojoj de lukto kaj audac-agado ghisfine!)
Metu sur la malnovan ŝipon ŝian tutan potencon hodiaŭ!
Levu kune la topvelon, la bramvelon, kaj la reghajn helpvelojn,
Elen provokon kaj defion – paradaj flagoj aldonitaj,
Dum ni direktas nin al la vasto – direktas nin al la plej profundaj, plej liberaj akvoj.

AL LA OKAZONTA JARO

Chu mi havas nenian armilvorton por vi – ian mesaghon koncizan kaj ferocan?
(Chu mi ne jam elbatalis kaj ja elfinis la batalon?) Chu estas nenia pafo restanta,
Por chiuj viaj afektoj, dirachoj, malestimoj, multobla stulteco?
Nek por mi mem – mia propra ribelema mem en vi?

Malsupren, malsupren, fiera gorgho! – kvankam sufokas vin;
Vian barban eksteron kaj altportatan frunton al la defluejo;
Klinu malalten vian kolon al almozaj donacoj.

LA CHIFRO DE SHEKSPIRO-BAKON'

Mi ne dubas ghin – do pli, multe pli;
En chiu malnova kanto testamentita – en chiu nobla pagho au teksto,
(Malsama – io neatentita antaŭe – ia nekonjektita aŭtoro),
En chiu objekto, monto, arbo, kaj stelo – en chiu naskigho kaj vivo,
Kiel parto de chiu – evoluinta el chiu – signifoj, malantau la aperoj,
Mistika chifro atendas nedisvolvita.

LONGE, LONGE DE NUN

Post longa, longa kurso, centoj da jaroj, fornegoj,
Akumuloj, vekitaj amo kaj ghojo kaj pensado,
Esperoj, deziroj, aspiroj, meditoj, venkoj, miriadoj da legantoj,

kvietighon, kaj inklinis paroli iomete, au esti alparolataj. La intelektaj kaj emociaj naturoj estis en ilia plej bona stato: Mortoj estis chiam pli facilaj; medikamentoj ŝajnis pli bone efiki kiam donataj tiam, kaj kvietiga atmosfero disvastighis tra la fakoj.
Similaj influoj, similaj cirkonstancoj kaj horoj, tagofinigho, post grandaj bataloj, ech kun chiuj iliaj hororoj. Mi havis pli ol unu fojon la saman sperton sur la kampoj kovritaj de falintaj au mortaj.

Tegantaj, ampleksantaj, kovrantaj – post inkrustadoj de epokoj kaj epokoj,
Tiam sole chi tiuj kantoj povas atingi fruktadon.

BRAVE, PARIZA EKSPozICIO!

Aldonu al via elmontrajho, antau ol vi fermos ghin, Francujo,
Kun la tuta cetero, videbla, konkreta, temploj, turoj, varoj, mashinoj, kaj ercoj,
Nia sento albloveta de multe da milionoj da korpulsoj, eteraj sed solidaj,
(Ni nepoj kaj pranepoj ne forgesas viajn prapatrojn),
De kvindek Nacioj kaj nebulaj Nacioj, kunigitaj, senditaj transmaren hodiau,
La aplaudo, amo, memoroj, kaj bonvolo de Ameriko.

INTERPOLAJ SONOJ

[Generalo Filipino Sheridanano estis entombigita che la Katedralo, Vashingtono, D.K.,
Auguston, 1888, kun la tuta pompo, muziko, kaj ceremonioj de la Rom-Katolika
diservo.]

Super kaj tra la entombiga chanto,
Orgeno kaj solena diservo, prediko, klinighantaj pastroj,
Al mi venas interpolaj sonoj ne en la elmontrajho – klare la mi, amasighante supren lau
la flanknavo kaj de la fenestro,
De la hastado kaj raukaj bruoj de la subita batalo – la severa ludo de milito al la vido kaj
orelo serioze;
La skolto alvokita al sia tasko – la generalo rajdanta kaj liaj adjutantoj chirkau li – la
nove-alportita sciigo – la tuja ordono eldonita;
La fusila krako – la kanona tondro – la elhastado de viroj el iliaj tendoj;
La tintego de kavalerio – la stranga rapideco de formado de vicoj – la minca klariona
noto;
La sono de chevalhufoj forirantaj – seloj, armiloj, ekipajho.*

AL LA SUNSUBIRA VENTETO

* NOTO. – KAMDENO, N.J., 7an, Augusto, 1888. – Walt Whitman petas la New York Herald “aldoni
lian tributon al Sheridanano”: “En la granda konstelacio de kvin au ses nomoj, sub la prezidenteco
de Linkolno, kiun historio portos dum epokoj en sia firmamento kiel markantan la lastajn viv-
pulssojn de secesio, kaj brilantan sur ghiajn mortantajn anhelojn, tiu de Sheridanano estos hela. Unu
konsidero estighanta el la ekzemplo de la nun morta soldato kiel ghi trapasas mian menson,
indas rimarki. Se la milito daurus ian longan tempon, chi tiuj Shtatoj, miaopinie, montrus kaj
pruvus la plej decidigajn militajn talentojn iam manifestitajn de iu nacio sur la tero. Ke ili posedis
armean plebon antau chiuj aliaj konatan pri kvalito kaj senlimeco de nombro estas facile
agnoskate. Sed ni havas, ankau, la kapablon organizi, trakti, kaj komandi egalan al neniu alia.
Chi tiuj du, kun modernaj armiloj, transportado, kaj la inventa Amerika genio, farus la
Unuighintajn Shtatojn, serioze, ne nur kapabla kontraustari la tutan mondon, sed konkeri tiun
mondon, unuigitan kontrau nin.”

Ahh, frustranta, io denove, nevidata,
 Kie malfrue chi tiun varmigitan tagon vi eniras che mia fenestro, pordo,
 Vi, lavanta, moderiganta chion, malvarmet-freshiganta, milde vigliganta
 Min, maljunan, solan, malsanan, malfort-premitan, fand-lacigitan de shvito;
 Vi, premkaresanta, premanta firme tamen mole, kompano pli bona ol parolo, libro, arto,
 (Vi havas, ho Naturo! elementojn! eldiron al mia koro preter la cetero – kaj chi tio estas
 de ili),
 Tiel dolche vian primitivan guston enspiri – tiel dolchaj viaj kvietigaj fingroj sur mia
 vizagho kaj manoj,
 Vi, mesaghisto, magie stranga, alportanto al korpo kaj spirito de mi,
 (Distancoj malsukcesigitaj – okultaj medikamentoj min penetrantaj de kapo al piedo),
 Mi sentas la chielon, la preriojn vastajn – mi sentas la potencajn nordajn lagojn,
 Mi sentas la oceanon kaj la arbaron – iel mi sentas la globon mem rapide naghanta en
 spaco;
 Vi blovita de lipoj tiel amitaj, nun foririntaj – eble de senfina rezervajho, Diosendita,
 (Char vi estas spirita, Dia, pleje el chio konata al mia sento),
 Agento paroli al mi, aktuale, kion vorto neniam diris, kaj ne povas diri,
 Chu vi ne estas la distilajho de la universala konkreto? la lasta rafinajho de Legho, de
 tuta Astronomio?
 Chu vi havas nenian animon? Chu mi ne povas koni, identigi vin?

MALNOVAJ CHANTOJ

Antikvan kanton, recitanta, finanta,
 Unufoje rigardanta al vi, Patrino de Chio,
 Meditanta, serchanta temojn taugajn por vi,
 Akceptu por mi, vi diris, la pli malnovajn baladojn,
 Kaj nomu por mi, antau ol vi iros, chiun antikvan poeton.

(El multe da shuldoj nekalkuleblaj,
 Eble la plej chefa shuldo de nia nova mondo estas al la malnovaj poemoj.)

Malproksimege antaue, antauintaj vin, Ameriko,
 Malnovaj chantoj, Egiptaj pastroj, kaj tiuj de Etiopujo,
 La Hinduaj epopeoj, la Grekaj, Chinaj, Persaj,
 La Bibliaj libroj kaj profetoj, kaj profundaj idilioj de la Nazaretano,
 La Iliado, Odiseado, komplotoj, faroj, vagadoj de Eneo,
 Hesiodo, Eskilo, Sofokleso, Merlino, Arturo,
 La Cido, Rolando che Roncevaloj, la Nibelungoj,
 La trobadoroj, menestreloj, minnekantistoj, skaldoj,
 Chaucero, Danto, aroj da kantantaj birdoj,
 La Lima Menestrelaro, la pasintaj baladoj, feudaj rakontoj, eseoj, dramoj,
 Shekspiro, Shilero, Valtero Skoto, Tenisono,
 Kiel iaj vastaj mirinde misteraj songhaperajhoj,
 La grandaj ombrecaj grupoj amasighantaj chirkaue,

Sagigantaj siajn potencajn majstrecajn okulojn antauen al vi,
Vi! kun kiel nun via klinighanta kolo kaj kapo, kun ghentila mano kaj vorto,
supreniranta,
Vi! haltanta momenton, mallevanta viajn okulojn al ili, kunmiksita kun ilia muziko,
Tute kontenta, akceptanta chiujn, kurioze anticipita de ili,
Vi eniras che via enireja porcho.

KRISTNASKA SALUTO
De Norda Stel-Grupo al Suda. 1889-'90.

Bonvenu, Brazila frato – via ampleksa loko estas preta;
Ama mano – rideto el la nordo – suna tuja saluto!
(La estonteco zorgu pri si mem, kie ghi montras siajn problemojn, malhelpojn,
Niaj, niaj la nuna doloro, la democratia celo, la akcepto, kaj la fido);
Al vi hodiau nia etendighanta brako, nia turnighanta kolo – al vi de ni la atendanta
okulo,
Vi grupo libera! vi brila hela! vi, lernanta bone,
La veran lecionon de la lumo de nacio en la chielo,
(Pli brila ol la Kruco, pli ol la Krono),
La alteco esti superba homaro.

SONOJ DE VINTRO

Ankau sonoj de vintro,
Sunbrilo sur la montoj – multaj malproksimaj sonoj
De gaja fervoja trajno – de pli proksima kampo, tenejo, domo,
La flustranta aero – ech la mutaj rikoltajhoj, kolektitaj pomoj, maizo,
La tonoj de infanoj kaj virinoj – ritmo de multaj bienistoj kaj de la drashilo,
La babilemaj lipoj de maljunulo inter la ceteraj, Ne pensu ke ni jam paneas,
El chi tiuj neghaj haroj ni ankoraŭ daurigas la ritmon.

KREPUSKA KANTO

Dum mi sidas en la krepusko malfrue sola apud la flagretanta kverkoflamo,
Meditante pri longe forpasintaj militaj scenoj – pri la nekalkuleblaj enterigitaj nekonataj
soldatoj,
Pri la vakantaj nomoj, kiel tiuj de la nemarkitaj aero kaj maro – pri la nerevenintaj,
La mallonga halto post batalo, kun malgajaj enterigo-rotaj, kaj la profunde plenigitaj
trancheoj
De kolektitaj mortaj de tuta Ameriko, Norda, Suda, Orienta, Okcidenta, de kie ili
alvenis,

De la arbara Majno, la bienoj de Nov-Anglujo, de la fekundaj Pensilvanio, Ilinojso,
Ohio,
De la senmezura Okcidento, Virginio, la Sudo, la Karolinoj, Teksaso,
(Ech chi tie en miaj chambro-ombroj kaj la duonlumoj en la senbrujaj flagretantaj flamoj,
Denove mi vidas la bravajn vicajn defilantaj, levighantaj – mi audas la ritman tretadon
de la armeoj);
Vi miliono da neskribitaj nomoj chiuj, chiuj – vi malhela testamento de la tuta milito,
Speciala verso por vi – ekfaro de devo, longe malatentita – via mistika registro kurioze
kolektita chi tie,
Chiu nomo revokata de mi de el la mallumo kaj la cindroj de morto,
De nun esti, profunde, profunde en mia koro registrata, por multaj estontaj jaroj,
Via mistika registro kompleta de nekonataj nomoj, au Nordaj au Sudaj,
Balzamita kun amo en chi tiu krepuska kanto.

KIAM VENIS LA PLENKRESKA POETO

Kiam venis la plenkreska poeto,
Ekparolis kontentigita Naturo (la ronda senemocia globo, kun chiuj ghiaj montraĵoj de
tago kaj nokto), dirante, Li estas mia;
Sed ekparolis ankaŭ la Animo de l' homo, fiera, envia, kaj neakordigita, Ne, li estas mia
sole;
– Tiam la plenkreska poeto ekstaris inter la du kaj prenis chiun che la mano;
Kaj hodiaŭ kaj chiam tiel staras, kiel kunmiksanto, unuiganto, firme tenante la manojn,
Kiujn li neniam delasos, ghis li akordigos la du,
Kaj tute kaj ghoje kunmiksos ilin.

OSCEOLA

[Kiam mi estis preskaŭ kreskinta al vireco en Bruklino, Novjorko (meze de 1838),
mi renkontis unu el la revenintaj Usonaj Marinfanterianoj de Fuorto Moultrie, Sud-
Karolino, kaj havis longajn interparoladojn kun li – ekkonis la okazon malsupre pri-
skribitan – la morton de Osceola. Chi lasta estis juna, kuragha estranta Seminolo en la
Florida milito de tiu tempo – estis transdonita al niaj trupoj, enprizonigita, kaj litero
mortis de “rompita koro” che Fuorto Moultrie. Li malsanighis de sia enfermo – la kura-
cisto kaj oficiroj faris chiun indulgon kaj afablajhon eblajn por li; tiam la fino:]

Kiam lia horo por morto estis veninta,
Li malrapide levis sin de la lito sur la planko,
Surmetis sian militovestaron, chemizon, gamashojn, kaj zonis la zonon chirkau sian
talion,
Vokis por sia punca farbo (lia spegulo estis tenata antaŭ li),
Farbis duonon de sia vizagho, siajn pojnojn, kaj mandorsojn.
Metis la skalptranchilon zorge en sian zonon – tiam, kushighinte, ripozinte momenton,
Levighis denove, duonside, ridetis, donis silente sian etenditan manon al chiu kaj chiuj,
Sinkis svene malalten al la planko (firme krochante la tenilon tomahokan),
Fiksis sian rigardon al sia edzino kaj infanetoj – la lastan:

(Kaj chi tie linio memore al lia nomo kaj morto.)

VOCHO DE EL MORTO

(La kataklismo de Johnstown, Pensilvanio, 31an de Majo, 1889)

Vocho de el Morto, solena kaj stranga, en lia tuta etendo kaj potenco,
Per subita, nepriskribebla bato – urboj dronitaj – homoj milope mortigitaj,
La fanfaronitaj farajhoj de ekonomio, varoj, loghejoj, forghejo, strato, fera ponto,
Jhetegataj pelmele de la bato – tamen la jam komencita vivo dauradanta,
(Meze de la cetero, meze de la hastanta, giranta, sovagha rubo,
Suferanta virino savita – bebo sekure naskita!).

Kvankam mi venas kaj neanoncite, horore kaj angore,
En vershantaj inundo kaj fajro, kaj amasa elementa krasho (chi tiu vocho tiel solena,
stranga),
Mi ankau servanto de Dio.

Jes, Morto, ni klinas niajn vizaghojn, vualas niajn okulojn al vi,
Ni funebras la maljunajn, la junajn neghustatempe tiritajn al vi,
La belajn, la fortajn, la bonajn, la kapablajn,
La hejmon ruinigitan, la edzon kaj la edzinon, la englutitan forghiston en sia forghejo,
La kadavrojn en la dronigaj akvoj kaj la koto,
La kolektitajn milojn al iliaj enterigaj tumuloj, kaj milojn neniam trovitajn au kolektitajn.

Tiam post enterigo, funebrado de la mortaj,
(Fidela al ili, trovitaj au netrovitaj, ne forgesanta, portanta la pasintecon, nun nove
meditanta),
Tago – pasanta momento au horo – Ameriko mem klinighas malalten,
Silenta, rezignacia, cedema.

Militon, morton, kataklismon kiel chi tiu, Ameriko,
Prenu profunde al via fiera prospera koro.

Ech dum mi chantas, jen! el morto, kaj el fango kaj shlimo,
La floroj rapide florantaj, kompato, helpo, amo,
De Okcidento kaj Oriento, de Sudo kaj Nordo kaj transmаре,
Siajn arde spronitajn korojn kaj manojn homaro al homa helpo movadas,
Kaj de interne penso kaj leciono ankoraŭ.

Vi chiam saganta Globo! tra Spaco kaj Aero!
Vi akvoj, kiuj chirkauas nin!
Vi, kiu en la tuta vivo kaj morto de ni, en agado kaj en dormo!
Vi leghoj nevideblaj kiuj trafenetas ilin kaj chion,
Vi, kiu en chio, kaj super chio, kaj tra kaj sub chio, senchesa!
Vi! vi! la vitala, universala, giganta forto nerezistebla, sendorma, trankvila,
Tenanta Homaron kiel en via malfermita mano, kiel ian efemeran ludilon,

Kiel malbone iam forgesi vin!

Char mi ankau forgesis,
(Envolvite en chi tiuj malgrandaj potencoj de progresado, politiko, kulturo, richo,
inventoj, civilizo),
Perdis mian rekonon de via silenta chiam superfortanta potenco, vi potencaj, elementaj
fortoj,
En kiuj kaj sur kiuj ni flosas kaj chiu el ni estas flosigita.

PERSA LECIONO

Por sia chioamplaksanta kaj lasta leciono la grizbarba sufio,
En la freshaodoro de la mateno subchiele,
Sur la deklivo de abunda Persa rozghardeno,
Sub antikva kashtanarbo, larghe disiganta siajn branchojn,
Parolis al la junaj pastroj kaj studentoj.

“Fine, miaj infanoj, por involvi chiun vorton, chiun parton de la cetero,
Alaho estas chio, chio, chio – estas imanenta en chiu vivo kaj objekto,
Eble che multaj kaj multaj pliaj apartigiloj – tamen Alaho, Alaho, Alaho estas tie.

“Chu la erarvaganto jam vagis malproksimen? Chu la kialo estas strange kashita?
Chu vi volus sondi malsupren de la senripoza oceano de la tuta mondo?
Chu vi volus scii la malkontenton? la urghon kaj spronon de chiu vivo;
La ion neniam kvietigitan – neniam tute for? la nevideblan bezonon de chiu semo?

“Ghi estas la centra urgho en chiu atomo,
(Ofte senkonscia, ofte malbona, defalinta),
Reveni al sia dia fonto kaj origino, kiel ajn malproksima,
Latenta same en subjekto kaj en objekto, sen iu escepto.”

LA ORDINARAN

La ordinaran mi kantas;
Kiel malmultekosta estas sano! kiel malmultekosta nobleco!
Abstino, nenia mensogo, nenia manghegemo, volupto;
La subchielon mi kantas, liberecon, toleremon,
(Prenu chi tie la chefan lecionon – malpli de libroj – malpli de la skoloj),
La ordinaran tagon kaj nokton – la ordinaran teron kaj akvojn,
Vian bienon – viajn laboron, metion, oficon,
La demokratian saghon sube, kiel solidan bazon por chio.

“ LA PLENA DIA KATALOGO KOMPLETA ”

[Dimanchon, – . – – Mi iris chi tiun antaŭtagmezon al la preghejo. Kolegia profesoro,

Pastro D-ro —, donis al ni fajnan predikon, dum kiu mi ekaudis la suprajn vortojn;
sed la pastro inkludis en sia “plena katalogo” litere kaj spirite, nur la estetikajn aferojn,
kaj tute ignoris kion mi nomas en la sekvantajho:]

La diablaj kaj la mallumaj, la mortantaj kaj la malsanaj,
La sennombraj (dek nau dudekonoj) malnoblaj kaj malbonaj, krudaj kaj sovaghaj,
La frenezaj, prizonuloj en prizono, la hororaj, fetoraj, malicaj,
Veneno kaj malpuro, serpentoj, la malsategaj sharkoj, mensogistoj, la dibochaj;
(Kia estas la rolo kiun la malbonaj kaj la abomenaj ludas en la ampleksa plano de la
tero?)
Tritoj, rampajhoj en shlimo kaj koto, venenoj,
La malfekunda grundo, la malbonaj homoj, la skorio kaj hida putro.

MIRAGHOJ

(Notita lauvorte post vespermangha interparolado subchiele en Nevado kun du
maljunaj ministoj.)

Pli da spertoj kaj vidajhoj, fremdulo, ol vi anticipus;
Ree kaj ree, nun plejparte tuj post sunlevigho au antau sunsubiro,
Kelkfoje en printempo, pli ofte en autuno, perfekte klara vetero, klare videble,
Tendaroj malproksime au proksime, la homplenaj stratoj de urboj kaj la butikfrontoj,
(Ekspliki ghin au ne — kredi au ne — ghi estas tute vera,
Kaj mia amiko tie povus diri al vi la same — ni ofte interparolis pri ghi),
Homoj kaj scenoj, bestoj, arboj, koloroj kaj linioj, klaraj kiel povus esti,
Bienoj kaj domkortetoj, padoj borderitaj per buksoj, lilakoj en anguloj,
Edzighoj en preghejoj, dankfestaj manghoj, revenoj de longe forestantaj filoj,
Malgajaj funebraj ceremonioj, la krepvualitaj patrino kaj la filinoj,
Procesoj en tribunaloj, jhurio kaj jughisto, la akuzito en la atestejo,
Konkursantoj, bataloj, amasoj, pontoj, varfoj,
Fojfoje rimarkitaj vizaghoj de malghojo au ghojo,
(Mi povus rekoni ilin chi tiun momenton se mi revidus ilin),
Montritaj al mi tuj supre dekstre en la chielorando,
Au klare tie maldekstre sur la montetsuproj.

LA INTENCO DE F. DE H.

Ne ekskludi au dislimi, au selekti malbonojn el iliaj teruraj amasoj (ech malkashi ilin),
Sed aldoni, kunfandi, kompletigi, etendi — kaj celebri la senmortan kaj la bonan.

Fiera chi tiu kanto, ghiaj vortoj kaj amplekso,
Transetendi vastajn regnojn de spaco kaj tempo,
Evoluon — la amasighan — kreskojn kaj generaciojn.

Komencitan en maturigita juneco kaj konstante daurigatan,
Vagante, observante, traktante pri chio — militon, pacon, tagon kaj nokton sorbante,

Neniam ech por unu mallonga horo forlasante mian taskon,
Mi finas ghin chi tie en malsaneco, malricheco, kaj maljuneco.

Mi kantas pri vivo, tamen bone konsideras morton,
Hodiau la ombra Morto sekvadas miajn pashojn, mian sidantan formon, kaj sekvadis
jam dum jaroj –
Foje alproksimighas al mi, kiel vizagho al vizagho.

LA NEESPRIMITA

Kiel oni audacas diri ghin?
Post la cikloj, poemoj, kantistoj, dramoj,
Tiuj de la prifanfaronitaj Ionio, Hindujo – Homero, Shekspiro – la dense punktitaj vojoj,
regionoj, de la longaj, longaj tempo,
La brilaj amasoj kaj la Laktaj Vojoj de steloj – la pulsoj de Naturo rikoltitaj,
Chiu retrospektivaj pasioj, herooj, milito, amo, adorado,
La lodoj de chiuj epokoj faligitaj al siaj plejaj profundoj,
Chiu homaj vivoj, gorghoj, deziroj, cerboj – la eldiroj de chiuj spertoj;
Post la nenombreblaj kantoj, au longaj au mallongaj, chiuj lingvoj, chiuj landoj,
Ankorau io ne dirita en la vocho au preso de poezio – io mankanta,
(Kiu scias? la plej bona ancorau neesprimita kaj mankanta).

GRANDA ESTAS LA VIDATA

Granda estas la vidata, la lumo, al mi – grandaj estas la chielo kaj steloj,
Granda estas la tero, kaj grandaj estas la daurantaj tempo kaj spaco,
Kaj grandaj iliaj leghoj, tiel multformaj, enigmaj, evoluaj;
Sed pli granda je multo la nevidata animo de mi, komprenanta, dotanta chiujn tiujn,
Lumiganta la lumon, la chielon kaj stelojn, fosanta la teron, velanta la maron,
(Kio estus chiuj tiuj, ja, sen vi, nevidata animo? kiom sen vi?)
Pli evolua, vasta, enigma, ho mia animo!
Pli multforma je multo – pli daura vi ol ili.

NEVIDATAJ BURGHONOJ

Nevidataj burghonoj, senfinaj, kashitaj bone,
Sub la negho kaj glacio, sub la mallumo, en chiu kvadrata au kuba colo,
Ghermaj, ekskvizitaj, en delikata punto, mikroskopaj, nenaskitaj,
Kiel beboj en uteroj, latentaj, falditaj, kompaktaj, dormantaj;
Miliardoj da miliardoj, kaj duilionoj da duilionoj da ili atendantaj,
(Surtere kaj en la maro – la universo – la steloj tie en la chielo),
Urghighantaj malrapide, firme antauen, formighantaj senfine,
Kaj atendantaj chiam pli, chiam pli multe poste.

ADIAU, MIA FANTAZI'!

Adiau, mia Fantazi'!
Adiau kara kunulo, kara amato!
Mi foriras, mi ne scias kien,
Au al kia sorto, au chu mi povus vin iam revidi,
Do Adiau, mia Fantazi'.

Nun por mia lasto – mi retrorigardu momenton;
La pli malrapida, pli mallauta tiktako de l' horlogho estas en mi,
Eliro, noktigho, kaj baldau la korbatado chesighanta.

Longe ni vivis, ghojis, karesis kune;
Delica! – nun apartigho – Adiau mia Fantazi'.

Tamen mi ne estu tro hasta,
Longe ja ni vivis, dormis, interfiltrighis, vere kunmiksighis en unu;
Tiam, se ni mortos, ni mortos kune (jes, ni restos unu),
Se ni iros ien, ni iros kune por renkonti kio okazos,
Eble ni estos pli prosperaj kaj gajaj, kaj lernos ion,
Eble estas vi mem nun vere kondukanta min al la veraj kantoj (kiu scias?)
Eble estas vi la mort-anson vere malfiksanta, turnanta – do nun fine,
Adiau – kaj saluton! mia Fantazi'.

RETROA RIGARDO TRA VOJAGHITAJ VOJOJ

Eble la plej bono el kantoj auditaj, au el ia kaj chia vera amo, au el la plej belaj epizodoj de vivo, au el la afliktaj scenoj sur tero au maro de mar-, tersoldatoj estas la resume de ili, au de iuj el ili, longe poste, rigardante al la efektivaĵoj longe pasintaj, kun ĉiuj iliaj praktikaj instigoj for. Kiel la animo amas flosi meze de tiaj rememoroj!

Do jen mi sidas, klachante en la frua kandellumo de maljunagho – mi kaj mia libro – jhetante retroajn rigardojn tra nia vojaghita vojo. Fininte, kvazau, la vojaghon – (varian ekskurson de jaroj, kun multaj haltoj kaj intertempaj breĥoj – au ian plilongigitan shipvojaghon, en kiu pli ol unufoje la fina horo shajne jam alvenis, kaj shajnis ke ni certe subakvighos – tamen atingis la havenon en suficha maniero tra ĉiuj malkomfortajhoj finfine) – Post kompletigado de miaj poemoj, mi estas scivola reekzameni ilin en la lumo de iliaj propraj (che la tempo senkonsciaj, au plejparte senkonsciaj) intencoj, kun certaj disvolvigoj de la tridek jaroj kiujn ili penas enkorpiĝi. Ĉi tiuj linioj, tial, vershajne intermiksos la vefton de unuaj celoj kaj konjektoj, kun la varpo de tiu sperto poste, chiam alportanta strangajn disvolvigojn.

Rezulte de sep au ok stadioj kaj luktoj, etendighantaj tra preskau tridek jaroj (dum mi, proksime al miaj tri dudekoj da jaroj kaj dek, vivas plejparte per memoro), mi rigardas “Folioj de Herbo”, nun finita ghis la fino de siaj shancoj kaj potencoj, kiel mian definitivan karton de vizito al la venontaj generacioj de la Nova Mondo,* se mi povas pretendi tiel diri. Ke mi ne gajnis la akcepton de mia propra tempo, sed min returnis al amataj revoj pri la estonteco – anticipoj – (“ankorau vivas la kanto, kvankam Regnar mortas”) – Ke el monda kaj komerca vidpunkto “Folioj de Herbo” estis pli malbona ol fiasko – ke publika kritikado pri la libro kaj mi mem kiel aŭtoro de ghi montras klaran koleron kaj malestimon pli ol ion alian – (“Mi trovas solidan linion de malamikoj al vi ĉie,” – letero de W.S.K., Bostono, 28an de Majo, 1884) – Kaj ke sole pro tio ke mi publikigis ghin, mi estis la celo de du au tri iom gravaj specialaj instancaj tuzadoj – estas ĉio vershajne ne pli ol mi devus atendi. Mi havis la elektopovon kiam mi komencis. Mi petis nek por mildaj oracioj, nek por grandaj monenspezoj, nek por la aprobo de ekzistantaj skoloj au konvencioj. Kiel plenumita, au parte plenumita, la plej bona trankviligo de la tuta afero (post malgranda bando de la plej karaj amikoj kaj subtenantoj, iam bonvole donitaj al homo au afero – sendube des pli fidelaj kaj senkompromisaj – ĉi tiu malgranda falango! – pro tio ke ili estas tiel malmultaj) estas ke, nehaltigite kaj nedistordite de ia influo ekstere de la animo en mi, mi povis diri kion mi volas, tute en mia propra maniero, kaj registri ghin tute senerare – la valoro de tio taksota de tempo.

En la taksado de tiu decido, William O’Connor kaj D-ro Bucke estas multe pli aplombaj ol mi. Malantau ĉio alia kio povas esti dirita, mi rigardas “Folioj de Herbo” kaj ghian teorion eksperimentaj – kiel, en la plej profunda senco, mi rigardas nian

* Kiam Champollion, sur sia mortolito, enmanigis al la presisto la reviziitan provajhon de sia “Egipta Gramatiko”, li diris gaje, “Estu zorgema pri ĉi tio – ghi estas mia karto de vizito al posteularo.”

Amerikan respublikon mem, kun ghia teorio. (Mi pensas ke mi havas almenau sufiche da filozofio ne esti tro absolute certa pri io, au iaj rezultoj.) Due, la volumo estas atakeliro – chu montrighi triumfa, kaj konkeri sian fakon de celo kaj komenco kaj konstruo, nenio malpli ol cent jaroj de nun povas plene respondi. Mi opinias ke tio ke mi pozitive gajnis auskultadon faras multe pli ol kompensi iajn kaj chiajn mankojn kaj retenojn. Esence, tio estis de la komenco, kaj restis tra la tuto, la chefa celo. Nun ke ghi shajnas esti atingita, mi estas certe kontenta malatenti iajn alie gravegajn malavantaghojn kiel nekonsiderindajn. Malkasheme kaj senpasie reekzamenante chiujn miajn intencojn, mi sentas ke ili estis meritaj – kaj mi akceptas la rezulton, kio ajn ghi estu.

Post konstanta persona ambicio kaj penado, kiel junulo, eniri kun la ceteraj en konkursadon por la kutimaj premioj, komercaj, politikaj, literaturaj, ktp. – partopreni en la granda miksbatalo, kaj por la premio de venkado kaj por iom bonfari – Post jaroj de tiuj celoj kaj strebadoj, mi trovis ke mi restis posedita, che la agho de tridek unu ghis tridek tri, de speciala deziro kaj konvinko. Au pli ghuste, por esti tute preciza, deziro kiu flirtadis tra mia antaŭa vivo, au shvebadis che la flankoj, plejparte nedifinita ghis tiam, konstante avancis al la fronto, difinis sin, kaj fine superregis chion alian. Chi tio estis sento au ambicio eldiri kaj fidele esprimi en literatura au poezia formo, kaj senkompromise, mian propran korpan, emocian, moralan, intelektan, kaj estetikan Personecon, meze de, kaj enkalkulante, la gravegan spiriton kaj faktojn de ghiaj senperaj tagoj, kaj de la aktuala Ameriko – kaj ekspluati tiun Personecon, identigitan kun loko kaj dato, en multe pli malkashema kaj ampleksa senco ol iu ghisnuna poemo au libro.

Eble chi tio estas mallonge chio kion mi strebis fari, au sugestas ghin. Donita la Dek-naŭa Jarcento, kun la Unuighintaj Shtatoj, kaj tio kion ili liveras kiel regionon kaj vidpunktojn, “Folioj de Herbo” estas, au strebas esti, simple fidela kaj sendube obstina registro. Meze de chio, ghi donas de unu homo – de la aŭtoro – la identecon, ardojn, observojn, kredojn, kaj pensojn, preskau tute ne nuancitajn de aliaj kredoj au aliaj identecoj. Abundaj kantoj jam estis kantataj – belaj, senegalaj kantoj – alghustigitaj al aliaj landoj ol chi tiuj – alia spirito kaj stadio de evoluo; sed mi volis kanti, kaj ellasi au enmeti, tute sole rilate al Ameriko kaj hodiaŭ. Moderna scienco kaj demokratio shajnis eljheti sian defion al poezio enmeti ilin en siajn dirojn kontraste al la kantoj kaj mitoj de la pasinteco. Kiel mi ghin vidas nun (eble tro malfrue), mi senkonscie akceptis tiun defion kaj faris provon je tiaj diroj – kion mi certe ne alprenus fari nun, sciante pli klare kion ghi signifas.

Por bazo por “Folioj de Herbo”, kiel poemo, mi forlasis la konvenciajn temojn kiuj ne aperas en ghi: nenio el la kutima ornamajho, au preferataj intrigoj de amo au milito, au altaj, maloftaj personoj de Malnov-Mondaj kantoj; nenio, kiel mi povus diri, por beleco – nenia legendo, au mito, au romano; nek eufemismo, nek rimo. Sed la plej largha mezo de homoj kaj iliaj identecoj en la nun maturighanta Dek-naŭa Jarcento, kaj precipe en chiu iliaj sennombraj ekzemploj kaj praktikaj okupoj en la Unuighintaj Shtatoj hodiaŭ.

Unu chefa kontrasto de la ideoj malantaŭ chiu pagho de miaj versoj, kompare kun konvenciaj poemoj, estas ilia malsama rilata sinteno al Dio, al la objektiva universo, kaj ankoraŭ plie (pense, krede, supoze, ktp.) la sufiche shanghita sinteno de la egoo, tiu kiu kantas au parolas, al si mem kaj al siaj kunhomoj. Estas certe la tempo por Ameriko, antaŭ chio, komenci chi tiun realghustigon en la amplekso kaj baza vidpunkto de

poezio; char chio alia jam shanghighis. Dum mi skribas, mi vidas en artikolo pri Wordsworth en unu el la aktualaj Anglaj revuoj la liniojn, “Antau kelke da semajnoj eminenta Franca kritikisto diris ke, pro la speciala inklino al scienco kaj ghia chiovoranta forto, poezio chesos esti legata post kvindek jaroj”. Sed mi anticipas la malon mem. Nur pli firma, vaste pli largha, nova regiono komencas ekzisti – ne, jam estas formita – al kiu la poezia genio devas elmigri. Kia ajn eble estis la afero en la pasintaj jaroj, la vera uzo por la imaga kapablo de modernaj tempoj estas por doni finan vivigon al faktoj, al scienco, kaj al ordinaraj vivoj, dotante ilin per la briloj kaj gloroj kaj finaj eminentecoj, kiuj apartenas al chiu reala afero kaj al realaj aferoj sole. Sen tiu fina vivigo – kiun la poeto au alia artisto sole povas doni – realo shajnus nekompleta, kaj scienco, demokratio, kaj vivo mem, finfine vanaj.

Malmulte sufiche estimas la moralajn revoluciojn, nian epokon, kiuj estis multe pli profundaj ol la materialaj au inventaj au militoproduktitaj. La Dek-naua Jarcento, nun preskau che ghia fino (kaj maturiganta en fruktojn la semojn de la du antaŭvenintaj jarcentoj*) – la ribeloj de naciaj amasoj kaj movighoj de limlinioj – la historiaj kaj aliaj elstaraj faktoj de la Unuighintaj Shtatoj – la milito de la provita Secesio – la shtorma impeto kaj hasto de nebulaj fortoj – neniam povos estontaj jaroj vidi pli da ekcitingho kaj bruego de luktado – neniam pli kompletan shanghighon de arma fronto lau la tuta linio, la tuta civilizita mondo. Char chiuj tiuj novaj kaj evoluaj faktoj, signifoj, celoj, novaj poeziaj mesaghoj, novaj formoj kaj esprimoj, estas neeviteblaj.

Mia Libro kaj mi – kian periodon ni arogis al ni transtendi! tiujn tridek jarojn de 1850 al ‘80 – kaj Ameriko en ili! Fieraj, fieraj ja povas ni esti se ni cherpis sufiche da tiu periodo en ghia propra spirito por inde albloveti kelkajn vivajn spirojn de ghi al la estonteco!

Mi ne audacu, chi tie au ie, por miaj propraj celoj, au iaj celoj, provi la difinon de Poezio, nek respondi la demandon kio ghi estas. Kiel Religio, Amo, Naturo, kvankam chi tiuj terminoj estas necesegaj, kaj ni chiuj donas sufiche precizan signifon al ili, miaopinie nenia difino, iam farita, sufiche enfermas la nomon Poezio; nek povas ia regulo de konvencio iam tiel absolute regi, sen tio ke ia granda escepto povus estighi kaj malatenti kaj renversi ghin.

Ankau devas esti zorge memorata, ke unuaranga literaturo ne brilas per ia lumeco propra; nek ghiaj poemoj. Ili kreskas el cirkonstancoj, kaj estas evoluaj. La efektiva vivanta lumo estas chiam kurioze de aliloke – sekvas neklarigeblajn fontojn, kaj estas luna kaj relativa en la plej bona okazo. Estas, mi scias, certaj regantaj temoj kiuj shajnas senfine alproprigataj al la poetoj – kiel milito, en la pasinteco – en la Biblio, religia raviteco kaj adorado – chiam amo, belo, ia fajna intrigo, au pensema au alia emocio. Sed, kiel ajn strange ghi povus shajni komence, mi volas diri ke estas io kio penetras multe pli profunden kaj turas multe pli alte ol tiuj temoj por la plej bonaj elementoj de la moderna kanto.

Ghuste kiel chiuj malnovaj imagaj verkoj kushas, lau sia speco, sur longaj serioj da antausupojoj, ofte tute nemenciitaj per si mem, tamen liverantaj la plej gravajn

* La fermentado kaj ghermado ech en la Unuighintaj Shtatoj hodiau, datighanta de, kaj miaopinie precipe bazita sur, la Elizabeta epoko en Angla historio, la epoko de Francisko Bakono kaj Shekspiro. Ja, kiam ni postserchas ghin, kia kreskado au okazo ekzistas kiu ne datighas retroen, retroen, ghis perdita – eble ghiaj plej tantaligaj shlosiloj perditaj – en la retirighintaj horizontoj de la pasinteco?

bazojn de ili, kaj sen kiuj ili povus havi nenian estkialon, tiel “Folioj de Herbo”, antaŭ ol unu linio estis skribita, antausupozis ion malsaman ol io alia, kaj, kiel ghi staras, estas la rezulto de tiaj antausupozoj. Mi dirus, ja, ke estus senutile peni legi la libron, ne unue zorge registrinte tiun preparan fonon kaj kvaliton en la menso. Pensu pri la Unuighintaj Shtatoj hodiaŭ – la faktoj de chi tiuj tridek ok au kvardek imperioj kunfanditaj en unu – sesdek au sepdek milionoj da egaluloj, kun siaj vivoj, siaj pasioj, sia estonteco – chi tiuj nekalkuleblaj, modernaj, Amerikaj, svarmantaj multnombroj chirkau ni, de kiuj ni estas neapartigeblaj partoj! Pensu, kompare, pri la bagatela chirkauajho kaj limita regiono de la poetoj de la pasinta au nuntempa Europo, kia ajn granda ilia genio. Pensu pri la foresto kaj nescio, en chiuj kazoj ghis nun, pri la multeco, vikleco, kaj la senprecedentaj stimuloj de hodiaŭ kaj chi tie. Preskau shajnas kvazau poezio kun kosmaj kaj dinamikaj trajtoj de grandeco kaj senlimeco, taugaj al la homa animo neniam antaŭe estus ebla. Estas certe ke poezio de absoluta fido kaj egaleco por la uzo de la demokratiaj amasoj neniam estis.

Por taksu unuarangan kanton, suficha Nacieto, au, aliflanke, kio povas esti nomata la negativo kaj manko de ghi (kiel en la kazo de Goeto, kelkfoje shajnas al mi), estas ofte, sed ne chiam, la unua elemento. Oni bezonas nur iom da penetremo por vidi, pli malpli indifere, la materialojn faktojn de sia lando kaj radiuso, kun la nuanco de la humoroj de homaro che la koncernata tempo, kaj ghiaj malgajaj au esperemaj perspektivoj, malantaŭ chiuj poetoj kaj chiu poeto, kaj formigantajn iliajn “hautmakulojn”. Mi tre bone scias ke miaj “Folioj” tute ne povus elighi au esti farataj au kompletigataj, el ia alia erao, ol la lasta duono de la Dek-naŭa Jarcento, nek ia alia lando, ol demokratia Ameriko, kaj el la absoluta triumfo de la Naciaj Uniaj armiloj.

Kaj chu miaj amikoj pretendas tion por mi au ne, mi sufiche bone scias, ankau, ke, rilate al bilda talento, dramaj situacioj, kaj precipe en vorta melodio kaj la tuta konvencia tekniko de poezio, ne nur la diaj verkoj kiuj hodiaŭ staras antaŭe en la legado de la mondo, sed dekduoj pli, transcendas (kelkaj el ili nemezureble transcendas) chion kion mi faris, au povus fari. Sed shajnis al mi, pro tio ke la objektoj en Naturo, la temoj de estetiko, kaj chiuj specialaj ekspluatadoj de la menso kaj animo, koncernas ne nur sian propran immanentan kvaliton, sed la kvaliton, ghuste tiel immanentan kaj gravan, de sia vidpunkto,* la tempo jam venis speguli chiujn temojn kaj aferojn, malnovajn kaj novajn, en la lumoj jhetitaj sur ilin de la alveno de Ameriko kaj demokratio – kanti tiujn temojn per la eldirado de unu, ne nur la dankema kaj respektega heredinto de la pasinteco, sed naskita infano de la Nova Mondo – ilustru chion per la genezo kaj sumigo de hodiaŭ; kaj ke tia ilustrado kaj sumigo estas la chefaj postuloj de la anticipita imaga literaturo de Ameriko. Ne ellabori, en la aprobita stilo, ian elektindan intrigon de fortuna au malfortuna, au fantazio, au fajnaj pensoj, au incidentoj, au ghentilajhoj – chio kio estis jam farita superege kaj bone, vershajne neniam superota – sed ke, dum pri tia estetika prezentado de objektoj, pasioj, intrigoj, pensoj, ktp., niaj landoj kaj tagoj ne bezonas, kaj vershajne ne havos, ion pli bonan ol ili jam posedas el la testamentoj de la pasinteco, ankoraŭ restas diri ke estas ech kontraŭ chiujn tiujn subjektiva kaj nuntempa vidpunkto, konvena al ni mem solaj, kaj al nia nova genio kaj medioj, malsama ol io ghis nun; kaj ke tia koncepto de aktuala au pasinta vivo kaj arto estas por ni la sola rimedo de ilia asimilado, konforma kun la Okcidenta mondo.

* Lau Emanuelo Kantio, la fina esenca realeco, donanta formon kaj signifon al la tuta cetero.

Ja, kaj chiuokaze, por meti ghin konkrete, chu la tempo jam ne alvenis kiam (se ghi devas esti klare dirita, por demokratia Ameriko, se por nenio alia) devas nepre veni realghustigo de la tuta teorio kaj naturo de Poezio? La demando estas grava, kaj mi povas returni la argumenton kaj ripeti ghin: Chu la plej bona pensado de nia tempo kaj Respubliko ne konceptas naskon kaj spiriton de kantado superan al io pasinta au nuntempa? Por la efika kaj morala unuigo de niaj landoj (jam, kiel materiale establitaj, la plej grandaj faktoroj en konata historio, kaj multe, multe pli granda per tio kion ili estas enkondukontaj kaj necesigas, kaj kio ili farighos en la estonteco) – por konformighi kun kaj konstrui sur la konkretaj realajhoj kaj teorioj de la universo liveritaj de scienco, kaj de nun la sola nekontestebla bazo por io, inkluzive poezion – por radikigi ambau influojn en la emocia kaj imaga agado de la moderna tempo, kaj superregi chion kio antaŭiras au kontraŭstaras ilin – chu au radikala antaŭeniro kaj antaŭenpasho, au nova vertebro de la plej bona kantado ne estas absolute necesa?

La Nova Mondo ricevas kun ghojo la poemojn de la antikvaj tempoj, kun la richa provizo da epopeoj, teatraĵoj, kaj baladoj de la Europa feudismo – ne penas en la plej eta maniero obtuzigi au forigi tiujn vochojn for de nia orelo kaj regiono – ja rigardas ilin kiel nepre necesajn studojn, influojn, registrajhojn, komparojn. Sed kvankam la tagigha blindumo de la suno de literaturo estas en tiuj poemoj por ni hodiaŭ – kvankam eble la plej bonaj partoj de la aktuala karaktero en nacioj, sociaj grupoj, au la individueco de ia viro au virino, Malnov-monda au Nov-monda, estas de ili – kaj kvankam, se mi estus petita nomi la plej valoregan testamentajhon al aktuala Amerika civilizo de chiuj ghisnunaj epokoj, mi vershajne nomus tiujn malnovajn kaj malpli malnovajn kantojn transportitajn chi tien el oriento kaj okcidento – kelkaj gravaj vortoj kaj debetoj restas; kelkaj severaj konsideroj postulas audiencon. El la grandaj poemoj, ricevitaĵoj el eksterlande kaj el la epokoj, kaj hodiaŭ envolvantaj kaj penetrantaj Amerikon, chu estas unu kiu estas konforma kun chi tiuj Unuighintaj Shtatoj au esence aplikebla al ili kiel ili estas kaj estas estontaj? Chu estas unu kies subkushanta bazo ne estas nego kaj insulto al demokratio? Kian komenton tio formas, chiuokaze, pri chi tiu erao de literatura plenumo, kun la grandiozaj tagigho de scienco kaj revivigo de historio, ke niaj chefaj religiaj kaj poeziaj verkoj ne estas niaj propraj, nek adaptitaj al nia lumo, sed estis liveritaj de malproksime malantaŭaj epokoj el ilia ariero kaj mallumo, au, pleje, krepuska malhelo! Kio estas en tiuj verkoj kiu tiel tiraneme kaj malestime superregas nian tutan progresintan civilizon kaj kulturon?

Ech Shekspiro, kiu tiel trapenetas la aktualajn beletron kaj arton (kiuj ja en la plejparto de la kazoj elkresis el li), apartenas esence al la entombigita pasinteco. Sole li tenas la fieran distingon, pri certaj gravaj fazoj de tiu pasinteco, de tio ke li estis la plej nobla kantisto al kiu vivo iam donis la vochon. Chiuĵ, tamen, rilatas al kaj staras sur kondichoĵ, normoj, politikoj, sociologioĵ, gamoj de kredo, kiuj estis preskau forigitaj el la Orienta duonsfero, kaj neniam ech ekzistis en la Okcidenta. Kiel aŭtoritataĵ specoj de kanto ili apartenas en Ameriko ghuste tiel multe kiel la personoj kaj institutoĵ kiujn ili bildigas. Vere, povas esti dirate, la emociaĵ, moralaj, kaj estetikaj naturoĵ de homaro ne radikale shanghighis – ke pri chi tiuj la malnovaj poemoĵ aplikighas al niaĵ tempoj kaj chiuj tempoj, senkonsidere al dato; kaj ke ili estas de nekalkulebla valoro kiel bildoj de la pasinteco. Mi volonte faras tiujn agnoskoĵn, kaj kun ilia plej plena apliko; tiam mi asertas la aliajn punktoĵn kiel de serioza, ech unuaranga graveco.

Mi ja registris aliloke miajn respektigon kaj oracion pri tiuj neniam superotaj poeziaĵ testamentoĵ, kaj ilia nepriskribebla valorego kiel heredajhoĵ por Ameriko. Alia

kaj aparta punkto devas nun esti malkasheme dirita. Se mi ne staris antaŭ tiuj poemoj kun malkovrita kapo, tute konscia pri iliaj kolosa grandeco kaj beleco de formo kaj spirito, mi ne povus skribi "Folioj de Herbo". Mia verdikto kaj konkludoj kiel ilustritaj en iliaj paghoj estas atingitaj per la humoro kaj enplantado de la malnovaj verkoj tiom kiom per io alia – eble pli ol per io alia. Kiel Ameriko, plene kaj juste interpretita, estas la legitima rezulto kaj evoluajho de la pasinteco, tiel mi audacus pretendi por miaj poemoj. Ne haltante por kvalifiki la aserton, la Malnova Mondo havis la poemojn de mitoj, fikcioj, feudismo, konkerado, kasto, dinastiaj militoj, kaj grandiozaj esceptaj karakteroj kaj aferoj, kiuj estis grandaj; sed la Nova Mondo bezonas la poemojn de realajhoj kaj scienco kaj de la demokratia mezo kaj baza egaleco, kiuj estos pli grandaj. En la centro de chio, kaj celo de chio, staras la Homo, al kies heroo kaj spirita evoluo poemoj kaj chio rekte au malrekte tendencas, Malnov- au Nov-Mondaj.

Daurigante la temon, miaj amikoj pli ol unufoje sugestis – au eble la babilemo de maljunigho jam ekposedis min – iujn pluajn embriajn faktojn de "Folioj de Herbo", kaj precipe, kiel mi ekkomencis ilin. D-ro Bucke, en sia volumo, jam plene kaj juste priskribis la preparon de mia poezia kampo, kun la specifa kaj ghenerala plugado, plantado, semado, kaj okupado de la grundo, ghis chio estis grasumita, enradikigita, kaj preta komenci en ghia propra maniero por bono au malbono. Ghis post chio chi tio, mi ne provis ian seriozan konatighon kun la poezia literaturo. Chirkau mia dek-sesa jaro mi ighis la posedanto de dika, bone plenigita, milpagha oktava volumo (mi ankoraŭ havas ghin), enhavanta la tutan poezion de Walter Scott – neelcherpebla mino kaj trezoro da poezia furagho (precipe la senfinaj arbaroj kaj ghangeloj da notoj) – tia ghi estis al mi dum kvindek jaroj kaj tia restas ghis chi tiu tago.*

Poste, je intertempoj, somerojn kaj autunojn, mi kutimis foriri, iam por tuta semajno, en la kamparon, au al la marbordoj de Longa Insulo – tie, en la cheesto de subchielaj influoj, mi ghisfunde tralegis la Novan kaj Malnovan Testamentojn, kaj sorbis (vershajne pli avantajhe por mi ol en ia biblioteko au endoma chambro – tiom gravas kie oni legas), Shekspiron, Osianon, la plej bonajn tradukitajn versiojn kiujn mi povis akiri de Homero, Eshhilo, Sofoklo, la malnova Germana Nibelungen, la antikvaj Hinduaj poemoj, kaj kelkaj aliaj majstroverkoj, inter ili tiuj de Danto. Hazarde, mi legis chi tiun lastan precipe en malnova arbaro. La Iliadon (la prozan version de Buckley) mi legis unue ghisfunde sur la Duoninsulo de Oriento, la nord-orienta fino de Longa Insulo, en shirmita kavo de rokoj kaj sablo, kun la maro chiuflanke. (Mi demandis min poste kial mi ne estis superfortita de tiuj potencaj majstroj. Vershajne pro tio ke mi legis ilin, kiel priskribite, en la plena cheesto de Naturo, sub la suno, kun la malproksimen etendighantaj pejzagho kaj perspektivoj, au la maro enflusanta.)

Lastatempe mi inter multaj aliaj trarigardis la poemojn de Edgardo Poe – de kiuj mi ne estis admiranto, kvankam mi chiam vidis ke preter ilian limigitan gamon da melodio (kiel konstantaj sonoradoj de muzikaj sonoriloj, sonorantaj de la pli malalta b-

* La KOMPLETAJ POEMOJ de Sir Walter Scott; precipe enhavanta LANDLIMA MENESTRELARO; tiam Kavaliro Tristem; Kanto de la Lasta Menestrelaro; Baladoj el la Germana; Marmiono; Damo de la Lago; Vizio de Don Roderick; Lordo de la Insuloj; Rokeby, Edzigho de Triermain; Kampo de Vaterloo; Haroldo la Sentima; chiuajn Dramojn; diversajn Enkondukojn, senfinajn interesajn Notojn, kaj Eseojn pri Poezio, Noveloj, ktp. La 1833a (au '34a) eldono de Lockhart kun la plej lastaj kaj abundaj revizioj kaj prinotajhoj de Scott. (Chiuaj poemoj estis ghisfunde legitaj de mi, sed la baladoj kaj Landlima Menestrelaro ree kaj ree.)

bemolo ghis g), ili estas melodiaj esprimadoj, kaj eble neniam superitaj, de certaj fortaj fazoj de homa malsaneco. (La Poezia kampo estas tre vasta – havas spacon por chio – havas tiom da domegoj!) Sed mi estis repagita en la prozo de Poe de la ideo ke (almenau por niaj okazoj, nia tago) povas esti nenia afero kia longa poemo. La sama penso jam hantadis mian menson antaue, sed la argumento de Poe, kvankam mallonga, ellaboris la sumon kaj pruvis ghin al mi.

Alia punkto havis fruan decidighon, multe malobstrukcante la teron. Mi vidis de la tempo kiam mia entrepreno kaj demandadoj pozitive formis sin (kiel mi povas plej bone esprimi miajn proprajn distingajn eraon kaj chirkauajhojn, Amerikon, Demokration?) ke la trunko kaj centro de kiu la respondo estis radionta kaj al kiu chio devus reveni de forvagado je kiel ajn longa distanco devas esti identa korpo kaj animo, personeco – kiun personecon, post multaj longaj konsideroj kaj meditadoj, mi nepre decidis devus esti mi mem – ja ne povus esti iu alia. Mi ankau forte sentis (chu mi montris tion au ne) ke al la vera kaj plena takso de la Nuntempo, kaj la Pasinteco kaj la Estonteco estas chefaj konsiderindajhoj.

Chi tiuj, tamen, kaj multe pli eble okazus kaj venus al nenio (preskau definitive venus al nenio), se subita, vasta, terura, rekta kaj malrekta stimulo por nova kaj nacia deklama esprimo ne estus donita al mi. Estas certe, mi diras, ke, kvankam mi faris komencon antaue, nur pro la okazo de la Secesia Milito, kaj tio kion ghi montris al mi kvazau per ekfulmoj, kun la emociaj profundoj kiujn ghi sondis kaj ekcitis (kompreneble, mi ne volas diri en mia propra koro sole, mi vidis ghin ghuste tiel klare en aliaj, en milionoj) – ke nur el la forta flamego kaj provoko de la vidajhoj kaj scenoj de la milito la finaj estkialoj de autoktona kaj pasia kanto definitive elvenis.

Mi malsupreniris al la militkampoj en Virginio (finon de 1862), loghis de tiam en la tendaro – vidis grandajn batalojn kaj la tagojn kaj noktojn poste – tute partoprenis la sortoshanghighojn, malgajon, malesperon, esperojn denove ekcitatajn, kuraghon elvokatan – la morton senhezite riskatan – la *aferon*, ankau – dum tiuj necertaj kaj sensaciaj sekvantaj jaroj, 1863-’64-’65 – la veraj akushaj jaroj (pli ol 1776-’83) de chi tiu de tiam homogena Unio. Sen tiuj tri au kvar jaroj kaj la spertoj kiujn ili donis “Folioj de Herbo” nun ne estus ekzistanta.

Sed mi komencis kun la intenco ankau indiki au sugesti iajn punktokarakterojn, kiujn mi chi-poste vidas (kvankam mi ne vidis tiam, almenau ne difinite) kiel bazojn kaj celurghojn al tiuj “Folioj” ekde la komenco. La vorto kiun mi mem metis precipe por priskribi ilin, kiel ili staras finfine, estas la vorto Sugestiveco. Mi glatigas kaj poluras malmulton, se ion ajn; kaj ne povus, konsekvence kun mia plano. La leganto chiam havos sian taskon fari, ghuste tiom kiom mi havis la mian. Mi klopodas pli malmulte diri au montri ian temon au penson, kaj pli multe alporti vin, leganto, en la atmosferon de la temo au penso – por tie fari vian propran flugon. Alia impetovorto estas Kamaradeco, kiel por chiu landoj, kaj en pli trudema kaj agnoskita senco, ol ghis nun. Aliaj vortosignoj estus Konsolo, Kontento, kaj Espero.

La chefa trajto de iu donita poeto estas chiam la spirito kiun li alportas al la observado de Homaro kaj Naturo – la humoro el kiu li kontemplas siajn subjektojn. Kia temperamento kaj kiom da fido raportas chi tiujn aferojn? Ghis kiel lastatempa dato la kanto estas alportata? Kiaj la ekipajho kaj speciala vervo de la kantisto – kia lia nuanco de kolorado? La fina valoro de artaj esprimantoj, pasintaj kaj nuntempaj – Grekaj estetikuloj, Shekspiro – au en nia propra tago Tennyson, Victor Hugo, Carlyle,

Emerson – estas certe implikita en tiuj demandoj. Mi diras ke la plej profunda servo kiun poemoj au iaj aliaj skribajhoj povas fari por sia leganto ne estas nur kontentigi la intelekton au liveri ion rafinitan kaj interesan, nek ech pentri grandajn pasiojn, au personojn au okazojn, sed plenigi lin per vigla kaj pura vireco, religieco, kaj doni lin bonkorecon kiel radikan posedon kaj kutimon. La klera mondo shajnas pli kaj pli enuighadi dum epokoj, lasante en nia tempo la testamentajhon de chio tio. Feliche, estas la origina neelcherpebla provizo da kuraghigo, normale rezidanta en la raso kiun oni povas chiam alvoki kaj fidi.

Kiel koncernas la indighenan Amerikan individuecon, kvankam certe venonta, kaj grandskale, la distinga kaj ideala tipo de la Okcidenta karaktero (kiel konforma kun la funkciantaj politikaj kaj ech mongajnantaj aspektoj de homaro de la Unuighintaj Shtatoj en la Dek-naua Jarcento, kiel elektitaj kavaliroj, ghentilhomoj, kaj batalistoj estis la idealoj de la jarcentoj de Europa feudismo), ghi ankoraŭ ne aperis. Mi lasis la emfazon de miaj poemoj de komenco ghis fino rilati la Amerikan individuecon kaj helpi ghin – ne nur, char tio estas granda leciono pri Naturo, meze de chiuj shiaj ghegeneraligaj leghoj, sed kiel kontraŭpezo al la ebenigaj tendencoj de Demokratio – kaj pro aliaj kialoj. Defia kontraŭ pretendataj literaturaj kaj aliaj konvencioj, mi konfesinte kantas “la grandan fieron de la homo pri si mem”, kaj permesas ghin esti pli-malpli motivo de preskau mia tuta poezio. Mi opinias chi tiun fieron nemalhavebla al Amerikano. Mi pensas ke ghi ne estas malkonforma kun obeemo, humileco, cedemo, kaj memekzamenado.

Demokratio estis tiel malakcelita kaj endangherigita de potencaj personuloj, ke ghiaj unuaj instinktoj inklinighas tondi, konformighi, enporti disvagantojn, kaj redukti chion al kompleta ebena. Dum la ambicia intenco de mia kanto estas helpi la formadon de granda agregita Nacio, tio okazas, eble, tute per la formado de miriadoj da plene disvolvigitaj kaj enfermantaj individuoj. Kiel ajn bonvenaj la doktrinoj kaj la popola edukado de egaleco kaj libereco, certa malavantagho akompanas ilin chiujn, kiel ni vidas. Tiun praan kaj internan ion en la homo, en la abismoj de lia animo, kolorantan chion, kaj, per apartaj realighoj, donantan la finan majeston al li – ion, konstante traktatan kaj atingitan de la malnovaj poemoj kaj baladoj de feudismo, kaj ofte la precipan bazon de ili – moderna scienco kaj demokratio shajnas esti endangheriganta, eble foriganta. Sed tio prezentas nur shajnon; la realo estas tute malsama. La novaj influoj, plejparte, certe preparas la vojon por pli grandaj individuecoj ol iam. Hodiaŭ kaj chi tie la persona forto estas la motivo de chio, tute same. La tempoj kaj bildigoj ekde la Iliado ghis Shekspiro inkluzive povas neniam denove esti feliche realigitaj – sed la elementoj de kuragha kaj nobla vireco estas neshanghitaj.

Sen cedado ech iomete, la laboristo kaj laboristino estis cheestontaj en miaj paghoj de la unua ghis la lasta. La gamoj de heroismo kaj nobleco per kiuj Grekaj kaj feudaj poetoj dotis siajn diecajn au moshtnaskitajn karakterojn – ja per pli fieraj kaj pli bone bazitaj kaj pli ampleksaj gamoj ol tiuj – mi estis dotonta la demokratian mezon de Ameriko. Mi estis montronta ke ni, chi tie kaj hodiaŭ, meritas la plej grandan kaj la plej bonan – pli multe nun ol meritis iaj malnovaj tempoj. Mi ankau volos ke miaj eldiroj (mi diris al mi mem antau ol komenci) estu spirite la poemoj de la mateno. (Ili estis fonditaj kaj plejparte skribitaj en la suna antautagmezo kaj frua tagmezo de mia vivo.) Mi volos ke ili estu la poemoj de virinoj tute tiom kiom de viroj. Mi deziris meti la kompletan Union de la Shtatoj en miajn kantojn sen ia ajn prefero au partiece. De nun, se ili vivos kaj estos legataj, devas esti ghuste tiom Sude kiom Norde – ghuste tiom lau Pacifiko

kiom lau Atlantiko – en la valo de la Misisipo, en Kanado, supre en Majno, malsupre en Teksaso, kaj sur la bordoj de Markolo Pugheto.

De alia vidpunkto “Folioj de Herbo” estas konfese la kanto de Sekso kaj Amoremo, kaj ech Besteco – kvankam signifoj kiuj ne kutime akompanas tiujn vortojn estas malantau chiuj, kaj tauge eliros; kaj chiujn mi penas levi en diferenca lumon kaj atmosferon. Pri chi tiu aspekto, intence palpebla en kelkaj linioj, mi diros nur ke la subtenanta principo de tiuj linioj tiel donas la spiron de vivo al mia tuta plano ke la plejparto de la pecoj povus tute bone esti lasitaj neskribitaj se tiuj linioj estus ellasitaj. Kiel ajn malfacile estos, farighis, miaopinie, devige atingi shanghitan sintenon de la flanko de superaj viroj kaj virinoj al la penso kaj fakto de sekseco kiel elemento en la karaktero, personeco, la emocioj, kaj temo en literaturo. Mi ne argumentos pri la demando per si mem; ghi ne staras per si mem. Ghia vivforto estas tute en ghiaj rilatoj, orientighoj, signifo – kiel la kleo de simfonio. Je la fina analizo la linioj kiujn mi aludas kaj la spirito en kiu ili estas parolataj trapenetas la tutan “Folioj de Herbo”, kaj la verko devas stari au fali kun ili, kiel la homa korpo kaj animo devas resti kiel integro.

Kiel ajn universalaj estas certaj faktoj kaj simptomoj de komunumoj kaj individuoj en chiuj tempoj, estas nenio tiel malofta en modernaj konvencioj kaj poezio, kiel ilia normala agnosko. Literaturo chiam envokas la kuraciston por konsulto kaj konfeso, kaj chiam donas evitojn kaj kovrantajn subpremojn anstataŭ tiun “heroan nudecon”^{*} sur kiu sole autentika diagnozo de gravaj kazoj povas esti konstruata. Kaj rilate eldonojn de “Folioj de Herbo” en la venonta tempo (se estu tiaj) mi prenas la okazon nun konfirmi tiujn liniojn kun deciditaj konvinkoj kaj intencaj renovigoj de tridek jaroj, kaj chi-pere malpermesi, tiom kiom vorto de mi povas tiel fari, ian elizion de ili.

Tiam ankoraŭ celo enfermanta chion, kaj super kaj sub chio. Chiam de post kio povus esti nomata pensado, au la burghonado de pensado, iom komencighis en mia juna menso, mi havis deziron provi ian indan registron de tiu tuta kredo kaj akcepto (“pravigi la morojn de Dio al homo” estas la bone konata kaj ambicia frazo de Miltono) kiu estas la fundamento de morala Ameriko. Mi sentis ghin tiel pozitive tiam en mia junagho kiel mi faras nun en mia maljunagho; formuli poemon kies chiu penso au fakto rekte au malrekte estus au celus implicitan kredon je la sagheco, saneco, mistero, beleco de chiu procezo, chiu konkreta objekto, chiu homa au alia ekzistajho, ne nur konsiderataj de la vidpunkto de chiuj, sed de chiu.

Dum mi ne povas kompreni ghin au elargumenti ghin, mi plene kredas je signo kaj celo en Naturo, tuta kaj disdividita; kaj ke nevideblaj spiritaj rezultoj, ghuste tiel realaj kaj difinitaj kiel la videblaj, motivas tutan konkretan vivon kaj tutan materion, tra Tempo. Mia libro devus eldoni kuraghigon kaj gajecon sufiche logike, char ghi elkreskis el tiuj elementoj, kaj estis la trankviligo de mia vivo, de post ghi estis origine komencita.

Unu chefa genezomotivo de la “Folioj” estis mia konvinko (ghuste tiel forta hodiaŭ, kiel iam) ke la klimaksa kreskado de la Unuighintaj Shtatoj estas estonta spirita kaj heroa. Por helpi komenci kaj por favori tiun kreskadon – au ech atentigi pri ghi, au pri la bezono de ghi – estas la komenca, meza, kaj fina celo de la poemoj. (Efektive, vere registrite kaj sumite ghisfunde, suprenplugante la senfinajn mezajn novalojn de homaro – ne “bona regado” sole, en la ordinara senco – estas la pravigo kaj chefa celo de chi tiuj Unuighintaj Shtatoj.)

^{*} “Dek-naŭa Jarcento”, Julio, 1883.

Izolitaĵoj en ia rango aŭ gracio aŭ fortuna – la rektaj aŭ malrektaj fadenoj de la tuta poezio de la pasinteco – estas miaopinie antipatiaj al la respublika spirito, kaj proponas nenian fundamenton por ĝhia targa poezio. Establitaĵoj, mi scias, havas la grandan avantaĝon de chantado de la jam prezentita, tiel plena de gloroj, rememoroj, karaj al la mensoj de homoj. Sed mia volumo estas kandidato por la estonteco. “Tuta originala arto”, diras Taine, ĉiuokaze, “estas memregulata, kaj neniam originala arto povas esti regulata de ekstere; ĝi portas sian propran kontaŭpezon, kaj ne ricevas ĝin de aliloke – vivas per sia propra sango” – konsolo por miaj oftaj vundoj kaj ofendita fiero.

Ĉar ĉi tiu estas eble precipe provo je persona eldiro aŭ ilustrado, mi permesos al mi kiel pluan helpon elĉerpi la sekvantan anekdoton de libro “Analoj de Malnovaj Pentristoj”, tralegita de mi en la juneco. Rubens, la Flandra pentristo, en unu el liaj vagadoj tra la galerioj de malnovaj monahhinejoj, ektrovis nekutiman verkon. Rigardinte ĝin ĝisfunde dum longa tempo, kaj auskultinte la kritikojn de lia sekvantaro da studentoj, li diris al ĉi-lastaj, responde al iliaj demandoj (rilate kiun skolon la verko sugestas aŭ alapartenas), “Mi ne pensas ke la artisto, nekonsolata kaj eble ne plu vivanta, kiu donis al la mondo ĉi tiun testamentaĵon, iam apartenis al ia skolo, aŭ iam pentriston krom ĉi tiun unu bildon, kiu estas persona afero – peco el la vivo de homo”.

“Folioj de Herbo” ja (mi ne povas tro ofte ripeti) precipe estis la elkreskaĵo de mia propra emocia kaj alia persona naturo – provo, de la komenco al la fino, registri Personon, homon (min mem, en la lasta duono de la Dek-nova Jarcento, en Ameriko) libere, plene, kaj vere. Mi ne povis trovi ian similan personan registron en la aktuala literaturo kiu kontentigis min. Sed ne estas pri “Folioj de Herbo” distinge kiel literaturo, aŭ kiel specimeno de ĝi, ke mi sentas min insisti, aŭ fari pretendojn. Neniu komprenos miajn versojn kiu insistas rigardi ilin kiel literaturan prezenton, aŭ provon al tia prezento, aŭ kiel celantan precipe al arto aŭ estetiko.

Mi diras ke neniu lando aŭ popolo aŭ cirkonstancoj iam ekzistis tiel bezonantaj rason de kantistoj kaj poemojn diferencantajn de ĉiuj aliaj kaj rigide siajn proprajn kiel la lando kaj popolo kaj cirkonstancoj de niaj Unuighintaj Shtatoj bezonas tiajn kantistojn kaj poemojn hodiaŭ, kaj por la estonteco. Eĉ plue, tiel longe kiel la Shtatoj daurigas sorbi la poezion de la Malnova Mondo kaj esti superregataj de ĝi, kaj resti neprovizitaj per autoktonaj kantoj, por esprimi, vigligi, kaj kolori ilian materialan kaj politikan sukceson, kaj servi ilin speciale, tiel longe ili ne ĝhisatingos la unuarangan Naciecon kaj restos difektaj.

En la libera vespero de mia tago mi donas al vi, leganto, la antaŭirintajn babileman paroladon, pensojn, rememorojn,

Dum senokupe drivanta malsupren kun la malfluso,
Tiaj ondetoj, duonaŭdataj voĉoj, eĥas de la bordo.

Finante per du detaloj por la imaga spirito de la Okcidento, kiam ĝi inde levighos – Unue, tio kion Herder instruis al la juna Goeto, ke la vere granda poezio estas ĉiam (kiel la Homeraj aŭ Bibliaj kantikoj) la rezulto de nacia spirito, kaj ne la privilegio de polurita kaj elektita malmulto; Due, ke la plej fortaj kaj plej dolĉaj kantoj estas ankoraŭ kantotaj.